ELDONO DE ARAGONA ESPERANTO - FEDERACIO

SANGO KAJ SABLO

VICENTE BLASCO IBAÑEZ

ROMANO DE TIPAJ, HISPANAJ MOROJ

TRADUKIS EL LA HISPANA LINGVO

RAMÓN DE SALAS BONAL

NORMA, SUPERA DIPLOMITO

Presejo E. Berdejo Casañal

Zaragoza, 1935

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 90
FILIA Nr 14
w Białymstoku

82-3

821.134.2-3 = 922

ĈIUJ RAJTOJ REZERVITAJ

ANTAŬPAROLO

En ĉi tiu verko, la plej tipa kaj famkonata el lia verkaro, Blasco Ibáñez priskribas majstre per trafaj trajtoj la tiel nomatan "nacian feston" kaj la morojn kaj aferojn, kiuj rilatas al ĝi, kaj montras per la diroj de ĝiaj fiktivaj personoj la juĝojn kaj opiniojn plej oftajn en nia lando pri ĉio ĉi same, kiel la virtojn kaj malvirtojn, kiuj estas en ili.

Tamen pensus erare, kiu kredus, ke en Hispanlando estas nenio alia ekster taŭraj ludbataloj, toreadoroj, banditoj kaj procesioj.

Ne; en Hispanlando ni havas, kiel "specialaĵo", taŭrfestojn, sed tio ne gravas pli, ol somerdimanĉa kromspektaklo en niaj urboj ĉeestata de sufiĉa nombro da personoj, el kiuj nur malmultaj, almenaŭ ekster Andaluzio, devas esti konsideratai, kiel "entuziasmuloj".

La nuna Hispanlando havas aliajn priokupojn, celas, laboras kaj fieras pri tute aliaj aferoj, kiuj ne estas ja "ludbatali", kaj klopodas montriĝi moderna, progresema, klera, laborema, kiel plej eble permesas la geografiaj kaj ekonomiaj kondiĉoj de nia lando. Ludbatalado estas certe ankoraŭ vivanta anakronismo, kiu espereble iam malaperos el niaj spektakloj.

Pri famaj banditoj, jam de longe ili ne ekzistas ĉi tie kaj oni povas konsideri la fiktivan "Plumeton" de ĉi tiu verko, kiel la lasta de la serio en Hispanlando.

Blasco Ibáñez naskiĝis en Valencio la 29-an de januaro de 1867. Li studis jursciencon kaj sin donis al la politiko, laborante kiel redaktoro kaj fondinto je gazetoj. Pro sia arda agado en la respublika partio li estis kelkfoje arestata, laŭleĝe juĝata kaj devigata ekziliĝi por sin savi el malliberejo; krom tio estis multe da aliaj gravaj, politikaj okazaĵoj en lia vivado kaj oni povas konsideri lin entute, la plej militagema pioniro de sia partio. Li estis deputito ses sinsekvajn fojojn kaj lasis la aktivan politikon en 1909. Poste li vojaĝis en Amerikon, kie

aranĝis artajn kaj beletristikajn lekciojn, famigante sian nomon kaj tiun de sia lando.

Lia verkaro estas ja gravega laŭ nombro kaj precipe laŭ kvalito kaj li enkondukis en la hispanan literaturon la realismon de Zola kaj Maupassant kunigitan al la simbolismo de Ibsen kaj Maeterlinck. La priskribado de Blasco Ibáñez estas ja admirinda pro sia ĝusteco, klareco kaj realeco, kaj la plimulto el liaj romanoj estas, kvazaŭ turismaj travivaĵoj, en kiuj aperas la moroj kaj tipa, sed vera karaktero de la koncernaj popoloj per alloga, kaj tamen trafa maniero.

Liaj verkoj estis tradukataj en preskaŭ ĉiujn ĉefajn lingvojn de Eŭropo kaj li estas certe la plej eminenta kaj eksterlande konata el ĉiuj nuntempaj, hispanaj verkistoj.

Estis ja gravega, neriparebla perdo lia morto por la hispana literaturo, kies diskonigon tra la nehispanlingva mondo li per sia verkaro realigis en la moderna tempo.

LA TRADUKINTO

I

Same, kiel ĉiujn tagojn, kiam li estis ludbatalonta, Johano Gallardo tagmanĝis frue. Peco da rostita viando estis lia nura manĝaĵo. Vinon li trinkis nek eĉ por gustumi ĝin: La botelo staris netuŝite antaŭ li. Estas necese resti serena. Li trinkis du tasojn da nigra kaj densa kafo kaj bruligis grandegan cigaron. Poste li apogis ambaŭ kubutojn sur la tablon kaj la makzelon sur siajn manojn, rigardante per duondormantaj okuloj la gastojn, kiuj iom post iom plenigis la manĝoĉambron.

De antaŭ kelkaj jaroj, kiam li ricevis en la Madrida, taŭra cirko (1) la profesian permeson (2), li gastis ĉiufoje en tiu ĉi hotelo de strato *Alcalá,* kie la gemastroj akceptis lin, kvazaŭ li estus el ilia familio, kaj kelneroj, pordistoj, kuirejistoj kaj antikvaj servistinoj ŝatis lin, kiel hotelan gloron. Tie ankaŭ li restis alifoje dum multaj tagoj — envolvite per tolaĵoj, spirante densan aeron intense odorantan pro kuraciloj kaj tabaka fumo — kaŭze de du kornovundoj; sed tiu ĉi malplaĉa rememoro ne impresis lin. Laŭ lia superstiĉo de sudlandano tre ofte endanĝeriĝanta tiu ĉi hotelo estis "bonŝanca" kaj tie nenio malbona al li okazos. Tiuj vundoj estis malĝojaĵoj propraj je lia profesio, fendaĵoj sur liaj vestoj aŭ lia karno, sed neniel fali por ĉiam, kiel falis aliaj kamaradoj, kies memoro maltrankviligis lin eĉ dum plej gajaj okazoj.

Al li plaĉis ĉiujn tagojn, kiam li estis ludbatalonta, post sia frua tagmanĝo, resti en la manĝoĉambro rigardante la movadon de vojaĝantoj: ili estis fremduloj aŭ anoj el malproksimaj provincoj, kun indiferentaj mienoj, kiuj pasis preter li, lin ne rigardante, sed poste sinturnis scivoleme al li, kiam la servistoj sciigis ilin, ke tiu alta, belforta viro, zorge razita, nigrokula kaj elegante vestita, estas Johano Gallardo, famkonata toreadoro, kiun ĉiuj nomas familiare "Belfortulo" (3). Tiu ĉi scivolo al li lin amuzis, ĝis kiam li devis iri al taŭra cirko. Kia longa tempo! Tiuj ĉi maltrankviligaj horoj, ĉe kiuj neklaraj timoj ŝajnis eliĝi el lia anima fundo kaj dubigis lin pri si mem, estis la plej maldolĉaj el ĉiuj de lia profesio. Li ne volis eliri straten, ĉar pensis pri lacigo de ludbatalo kaj nepra neceso esti tiam tutfreŝa kaj malpeza; li devis ne sin distri per franda manĝado, ĉar estis

necese manĝi frue kaj malmulte, por ke li povu alveni en taŭran cirkon sen digesta embaraso.

Li restis ĉe la tablo kun la vizaĝo apogita inter siaj manoj kaj nubo el parfumita fumo antaŭ siaj okuloj, turnante tiujn ĉi per afekta maniero, por rigardi kelkajn sinjorinojn, kiuj scivoleme rigardadis la faman toreadoron.

Lia fiereco, pro tio ke la popolamaso lin adoris, kredigis al li diveni laŭdojn kaj plaĉojn en tiaj virinaj rigardoj. Ili certe opinias lin, li pensis, belkreska kaj eleganta. Kaj forgesante siajn priokupojn, instinkte, kiel faras ĉiu homo kutimanta sinteni bele, kiel heroo antaŭ publiko, li rektigis sian sintenadon, forigis per siaj ungoj la cigaran cindron, falintan sur lian manikon kaj aranĝis sian ringon, kiu okupis tutan fingroparton kaj havis grandegan brilianton, kies brilo ŝajnis multkolora nimbo, kvazaŭ brulus magie ĝia klara internaĵo simila al akva guto.

Li plezure rigardadis sian tutan personon fiere kontenta, admirante sian veston je eleganta fasono, la ĉapon uzatan de li en hotelo, kuŝantan sur proksima seĝo, la delikatan, oran ĉenon metitan sur veŝton de poŝo al poŝo, la kravatan perlon, kiu ŝajnis lumigi per laktokolora lumo lian brunan vizaĝon, kaj siajn ŝuojn el rusa ledo, kiuj lasis vidi inter sia buŝo kaj tiu faldita de la pantalono ŝtrumpetojn el true ornamita kaj brodita silko, kvazaŭ ŝtrumpoj de eleganta malĉastulino.

Aero odoranta pro anglaj, delikataj kaj ne precizaj parfumoj abunde surverŝitaj eliĝis el liaj vestoj kaj ondigitaj, nigre brilaj haroj, kiujn Gallardo gladis per la mano kontraŭ siajn tempiojn, dum posis triumfe antaŭ la scivolemaj virinoj...

Sed subite revenis liaj priokupoj, estingiĝis la okula brilo kaj ree li metis sian mentonon surmanen, suĉante persiste la cigaron, dum lia rigardo perdiĝis en la tabaka nubo. Li revis malpacience pri la vesperaj horoj kaj deziris, ke ili venu kiel eble plej baldaŭ, pri sia reveno el la taŭra cirko, kiam li estos ŝvite laca, sed kontenta ĉar venkis danĝeron, kun vekiĝantaj apetitoj, freneza dezirego je ĝuado kaj certeco pri kelke da sendanĝeraj tagoj por ripozadi. Se Dio protektos lin, kiel alifoje, li manĝos tiel apetite, kiel en sia malsata, pasinta epoko, iom ebriiĝos, serĉos ian junulinon, kiu kantadis en danckafejo kaj kiun li vidis ĉe alia vojaĝo, kvankam poste ne venis okazo por amikiĝi kun ŝi. Pro tia vivmaniero en senĉesa vojaĝado, de ekstremo de la ibera duoninsulo ĝis tiu kontraŭa, restas tempo por nenio.

Iom post iom venis en la manĝoĉambron entuziasmaj amikoj, kiuj, antaŭ la tagmanĝo, deziris viziti la toreadoron. Ili estis antikvaj taŭremuloj, deziregantaj havi idolon kaj aliĝi al iu partio, kiuj igis lin "sia toreadoro" kaj afekte konsilis lin saĝege, laŭ sia kredo, memorante ĉiumomente pri sia antikva adoro al Lacerteto aŭ Fraĉjo (4). Ili parolis al li senceremonie, per protekta, familiara inti-

meco, kaj li respondis ilin respekte, pro la tradicia disigo laŭ sociaj klasoj ankoraŭ ekzistanta inter toreadoro, devenanta el la socia fundo, kaj liaj admirantoj. Tiuj homoj kunigis sian entuziasmon al memoroj pri antaŭlonge pasintaj faktoj, por sentigi al la juna toreadoro la superecon de la sperto kaj maturaĝo. Ili parolis pri la malnova, taŭra cirko de Madrido, kie nur oni vidis taŭrojn kaj toreadorojn "nepre taŭgaj", kaj tiuj taŭremuloj tremis pro emocio memorante la pli modernan "negron". Tiu ĉi negro estis Fraĉjo.

—Se vi estus vidinta tion! Sed tiam vi kaj viaj samtempuloj estis suĉinfanoj aŭ ankoraŭ ne naskiĝis.

Aliaj entuziasmuloj de mizera aspekto kaj malsata vizaĝo estis enirantaj iom post iom la manĝoĉambron; ili estis nefamaj kritikistoj pri ludbatalarto en gazetoj, kiujn nur konis la toreadoro laŭdata aŭ mallaŭdata de ili; viroj, kies vivrimedoj estis neklaraj kaj kiuj aperis tuj post la alveno de Gallardo, por kvazaŭ sieĝi lin per laŭdoj kaj petoj je enirbiletoj. Komuna entuziasmo miksis ilin kun la aliaj sinjoroj, gravaj komercistoj aŭ publikaj oficistoj, kiuj diskutis pasie kun ili pri ludbatalaj aferoj, timante nenion malgraŭ ilia petema aspekto.

Ĉiuj, kiam vidis la spadulon (5), ĉirkaŭbrakis aŭ manpremis lin, dum laŭte ekdiris aŭ demandis:

— Joĉjo... Kiel fartas Karmeno?

— Bone, dankon.

— Kaj panjo, sinjorino Angustio?

— Ĉiam sprita, dankon.

— Kaj viaj genevoj kaj via fratino?

— Bonfartaj, dankon.

— Kaj via malsaĝa bofrato?

— Ankaŭ bone; tiel babilema, kiel ĉiam.

— Kaj pri ido? Ĉu vi atendas iun?

— Neniun, tute neniun.

Li faris per kapo energian, nean geston kaj poste siavice demandis simile la ĵusan alveninton, kies vivadon ekster lia taŭremeco li ne konis. — Kaj via familio. Ĉu ankaŭ bonfartas?... Mi ĝojas. Nu, sidiĝu kaj trinku ion.

Poste li demandis pri la aspekto de la baldaŭ ludotaj taŭroj; ĉar ĉiuj ĉi amikoj venis el la ludbatalejo, kie oni apartigis kaj enfermis ĉi tiujn bestojn, kaj ankaŭ, pro profesia scivolemo, li demandis novaĵojn el Angla Kafejo, kie kunestis multaj taŭremuloj.

La tuj okazonta taŭrfesto estis la unua el tiuj printempaj kaj la entuziasmaj Gallard'anoj multege esperis de li, memorante pri liaj freŝaj sukcesoj, kiujn ili estis legintaj en la gazetaro, en aliaj hispanaj cirkoj. Li estis la plej kontraktita el la toreadoroj. De taŭrfesto ĉe "Reviviĝa Pasko" (6) en Seviljo (unua grava en la jaro), Gallardo estis veturanta de cirko al cirko por mortigi taŭrojn. Poste,

kiam alvenos Aŭgusto kaj Septembro, li estos devigata resti nokte en vagonaro kaj posttagmeze en taŭra cirko, ne povante senlaciĝi. Lia kontraktfaristo en Seviljo estis ĉirkaŭpremata de multego da leteroj kaj telegramoj kaj li ne sciis, kiel kombini tiom multe da kontraktopetoj kun la disponebla tempo.

Hieraŭ posttagmeze li ludbatalis en *Ciudad Real* kaj, ankoraŭ vestite per "lumvesto" (7), li eniris en la vagonon por alveni matene en Madridon. Tiu nokto estis preskaŭ neutila por ripozi, ĉar li nur dormis okaze, maletendite sur parto da kanapo, kiun lasis al li la aliaj vojaĝantoj per prema kuniĝo, por ke iom senlaciĝu tiu viro riskonta sian vivon en la tuja tago.

Liaj entuziasmuloj admiris lian nelaceblan fortikecon kaj sentiman kuraĝegon, per kiu en la ĝusta momento li ĵetis sin kontraŭ la taŭron por ĝin mortigi.

— Nu, brave kaj lerte agu hodiaŭ — diris ili kun fervora kredo —. Taŭremularo multe esperas pri vi. Vi certe stariĝos super multajn famulojn... — Ludu same bele, kiel en Seviljo.

La admirantuloj iom post iom adiaŭis lin, por tagmanĝi hejme kaj tiel, frue iri en la cirkon. Gallardo pro nerva ekscito, kiu regis lin, intencis, kiam estis sola, supreniri en sian ĉambron. Viro kun du manprenataj infanoj transiris la pordon de la vitra muro de la manĝoĉambro, ne atentante la demandojn de la servistoj. Li ridetis kiel anĝelo, kiam vidis la toreadoron kaj antaŭeniris, trenante la malgrandulojn kun senlaca rigardado al Gallardo kaj sen atento eĉ, pri kien li metis siajn piedojn. Gallardo rekonis lin.

— Kiel vi fartas, amiko?

Kaj post tio venis ĉiuj aliaj demandoj kutime uzataj por sciiĝi ĉu la familio bonfartas. Poste la viro sin turnis al siaj filoj kaj diris ilin serioze.

— Jen li estas. Ĉu vi ne demandis senĉese pri li?... Vidu; tute same, kiel en portretoj.

Kaj ambaŭ infanoj religie rigardadis la heroon tiel ofte viditan de ili en bildoj ornamantaj la ĉambrojn de ilia malriĉa hejmo; li estis por ili supernatura estaĵo, kies heroaĵoj kaj riĉeco ilin miregigis, kiam la infanoj komencis konscii pri la aferoj de la vivo.

— Joĉjo, kisu la manon al via baptopatro.

La plej juna el la infanoj tuŝis la dekstran manon de la toreadoro per sia ruĝa, faldita buŝo, kiun lia patrino ĵus frotis por tiu vizito. Gallardo distre karesis lian kapon. La knabeto estis iu el multaj baptofiloj, kiujn li havis en Hispanlando. Liaj partianoj ofte petegis al li baptopatri iliajn filojn, ĉar tiel al tiuj ĉi ili kredis certigi prosperan estontecon. Sin montri ĉe serio da baptofestoj estis iu el sekvoj de lia gloro. Tiu ĉi baptofilo rememorigis al li lian malbonan epokon, kiam li komencis sian profesion; tamen li estis iom danka al la patro pro la fido, kiun montris tiu ĉi lasta, kiam ĉiuj dubis pri lia taŭgeco.

— Kaj viaj negocoj, amiko — demandis Gallardo — Ĉu ili bone prosperas?

La mieno de la taŭremulo malgajiĝis. Li ne prosperas; nur vivas dank'al maklerado ĉe la halo de placo Hordeo.

Gallardo rigardis kompate lian malĝojan aspekton de dimanĉe vestita malriĉulo.

— Vi volas vidi la taŭrfeston. Ĉu ne, amiko?... Supreniru en mian ĉambron kaj diru al Strekaro (8), ke li donu al vi unu enirbileton. Adiaŭ, altkreskulo!... Prenu, por ke vi aĉetu ion.

Kaj samtempe, kiam la baptofilo kisis alifoje la dekstran manon de la matadoro, tiu ĉi donis per la alia al la knaboj du durojn (9). La patro fortrenis la idojn dankeme kaj emocie, oni ne scias, ĉu pro la du duroj, ĉu pro la enirbileto.

Gallardo lasis pasi iom da tempo, por ne renkonti alifoje en sian ĉambron la entuziasmulon kaj liajn filojn. Poste li rigardis sian horloĝon. La unua! Kiom da tempo estas ankoraŭ pasonta ĝis la taŭrfesto!...

Kiam li eliris el la manĝoĉambro por sin direkti al la ŝtuparo, virino envolviĝinta per malnova ŝalo eliris el la hotela pordistejo kaj baris lian iron decide kaj familiare, ne atentante pri protestoj de la servistoj.

— Joĉjo!... Johano! Ĉu vi ne konas min?... Mi estas Heliko, sinjorino Doloreso, la patrino de malfeliĉa "Laktukisto".

Gallardo ridetis al brunaĉa, malgranda kaj tute sulkohaŭta maljunulino, kiu havis treege brilajn okulojn, okuloj de sorĉistino, kaj estis arda kaj babilema. Li prenis, divenante la celon de ŝia babilado, moneron el sia veŝta poŝo.

— Mizeraĵoj, mia kara! Malriĉaĵoj kaj doloroj!... Kiam mi sciiĝis, pri tio ke vi ludbatalos hodiaŭ, mi pensis jene: "Mi iru al Joĉjo, kiu certe ne forgesis la patrinon de sia malfeliĉa kamarado..." Nu! Kiel vi estas belkreska kaj alloga! Tial ĉiuj virinoj alkuras al vi... Mi tre malbone, mia kara. Eĉ mi ne havas ĉemizon. Hodiaŭ ankoraŭ, esceptinte iom da brando, mi enigis en mian buŝon nenion. Pupego, kiu estas el tie, el nia regiono, pro kompato gastigas min. Tre deca domo po kvin duroj. Venu tien, ĉar ili ŝatas vin multe. Mi kombas la junulinojn kaj servas la sinjorojn... Ve! se mia malfeliĉa filo vivus! Ĉu vi memoras pri Joŝĉjo?... Ĉu vi memoras pri la tago de lia morto?...

Gallardo, metinte unu duron en ŝian sekan manon, penis forkuri de tiu babilemulino, kiu komencis tremi ekplorante. Malbenita sorĉistino! Rememorigi al li en ludbatala tago la malfeliĉan Laktukiston, kamarado dum la unuaj jaroj, kiun li vidis morti preskaŭ subite pro kornovundo ĉe la koron, en la *Lebrija* cirko, kiam ambaŭ ludbatalis, kiel taŭridistoj! Kia malbonŝanca maljunulino!... Li puŝis ŝin flanken kaj ŝi, ŝanĝinte sian malĝojon per gajeco, kvazaŭ nekonstanta birdo, ekaklamis entuziasme la kuraĝajn virojn kaj lertajn toreadorojn, kiuj altiras la monon de la publiko kaj la virinajn korojn.

— La Hispanan Reĝinon vi meritas, belkreskulo! Ja bezonas lerte vin gardi sinjorino Karmeno. Ĉe iu ajn tago virino forrabos vin kaj vin ŝi ne redonos. Ĉu

vi donacos al mi enirbileton, Joĉjo? Mi multe deziras vidi, kiel vi mortigas taŭrojn, simpatiulo!...

La krioj de la maljunulino kaj ŝiaj entuziasmaj laŭdoj ridigis la servistojn de la hotelo kaj forgesigis la severan ordonon, kiu baris la eniron al aro da scivoluloj kaj petemuloj kuniĝintaj antaŭ la hotelan pordon pro ĉeesto de la toreadoro. Per paca puŝado antaŭen eniris la vestiblon fluo de almozuloj, vagemuloj kaj gazetvendistoj.

La buboj kun siaj presaĵoj sub brako salutis lin per entuziasma familiareco, demetante sian ĉapon.

— Belfortulo! Jen Belfortulo! Vivu la bravuloj!

La plej kuraĝaj prenis lian manon, premis ĝin forte kaj ĝin movis ĉiudirekten, dezirante daŭrigi kiel eble plej longe tiun ĉi kontakton kun la glora, nacia viro, kies portreton ili estis vidintaj en la gazetoj. Poste, por ke iliaj kamaradoj ankaŭ ĝuu je tio, ili proponis al la aliaj senceremonie:

— Prenu lian manon! Li ne koleretas. Li estas el plej simpatiaj.

Kaj ili, pro amrespekto preskaŭ sin metis genue antaŭ la matadoron. Aliaj scivoluloj kun ne zorgita barbo, vestite per malnovaj vestoj alitempe elegantaj, svarmis ĉirkaŭ la idolo kaj demetis siajn sebajn ĉapelojn, parolante al li mallaŭte kaj nomante lin Don Johano (10), por diferenciĝi de tiu entuziasma kaj ne respektema bubaro. Kiam ili parolis lin pri siaj mizeroj, petis al li almozon aŭ, pli kuraĝaj, pretekstante taŭrfestan emon, enirbileton, kiun ili intencis vendi tuj poste.

Gallardo defendis sin ridetante kontraŭ tiu amaso, kiu lin premis kaj ĉirkaŭpuŝis; amaso, el kiu ne sufiĉis liberigi lin la servistaro, embarasate pro la respekto, kiun inspiras populareco. Li reserĉis en ĉiujn siajn poŝojn, ĝis tio ke ili estis malplenaj, kaj li disdonis blinde arĝentajn monerojn al tiuj avidaj manoj ĉirkaŭstarantaj.

— Jam estas nenio plu. Finiĝis la mono. Lasu min ŝerculoj!

Ŝajne kolereta pro tiu populareco, kiu tamen plaĉis lin, li igis al si vojon per streĉo je siaj atletaj muskoloj kaj sin savis suprenirante la ŝtuparon malpeze, kiel vigla toreadoro, dum la servistaro jam libera pri respektoj elpuŝis la scivolularon al la strato.

Kiam Gallardo estis antaŭ la pordo malfermita de sia ĉambro, vidis inter valizoj kaj skatoloj sian serviston Strekaro, kiu pretigis lian lumveston por la taŭrfesto.

Li eksentis, vidante sin sola en la ĉambro, ke tuj foriĝis la gaja ekscito kaŭzita de la amaso da admiruloj. Alvenis nun la malĝojaj momentoj de luďbatalaj tagoj. La necerteco de lastaj horoj, antaŭ kiam li veturos al la cirko. Taŭroj de Miura (11) kaj Madrida publiko!... La danĝero, kiu vidate de proksime kuraĝigis

lin kaj pliigis lian bravecon, korpremis lin nun, kiam li estis sola, kvazaŭ ĝi estus io supernatura, terura pro sia necerteco mem.

Li sentiĝis neniigita same, kiel se subite rekuniĝus sur lin la ĵus pasintaj, noktaj lacigoj. Li deziris kuŝi sur iu el litoj okupantaj la ĉambran fundon, sed alifoje la maltrankvileco pri la tuja, mistera kaj nekonata estonto malaperigis lian dormodeziron.

Li promenis malkviete tra la ĉambro kaj bruligis alian Habanan cigaron per la restaĵo de tiu antaŭa.

Kiel estos por li la ludbatala sezono tuj komenciĝonta? Kion diros liaj malamikoj? Kian rezultaton atingos liaj konkurantaj samprofesiuloj?... Li estis ja mortiginta multajn taŭrojn de Miura; tute certe ili estas taŭroj, kiel ĉiuj aliaj; sed li pensis pri la falintaj en cirko kamaradoj; preskaŭ ĉiuj viktimoj de bestoj de ĉi tiu firmo. Malbenitaj miuroj (12). Tial li kaj ĉiuj ceteraj spaduloj postulis en siaj kontraktoj mil kromajn pesetojn, kiam estis ludontaj tiajn taŭrojn.

Li daŭrigis sian vagadon tra la ĉambro kun nerva ekscito kaj haltis foje por rigardadi malsaĝe konitajn objektojn el sia pakaĵaro, kaj poste li sidiĝis lace sur apogseĝon, kvazaŭ subite estus senfortiĝinta. Kelkajn fojojn li rigardis sian horloĝon. Ankoraŭ estas nur la dua. Kiel malrapide la tempo pasas!

Li deziris, por kvietigi siajn nervojn, ke alvenu kiel eble plej baldaŭ la momento sin vesti kaj veturi al la taŭra cirko. La homa amaso, bruo, popola scivolemo, la deziro sin montri gaja kaj trankvila antaŭ la publika admiro kaj, precipe, la proksimeco de reala kaj videbla danĝero malaperigis subite tiun ĉi korpremon kaŭzitan de soleco, ĉe kiu la spadulo sen ekstera ekscito eksentis ion similan al timo.

Por sin distri li serĉis ion en sian internan jakpoŝon kaj eltiris el ĝi, kune kun la poŝpaperujo, koverteton, kiu parfumodoris intense kaj delikate. Starante apud fenestro trapasata de nehela lumo el interna korto li rigardadis la koverton, kiun oni donis al li, kiam li alvenis en la hotelon, kaj admiris la elegantajn signojn delikatajn kaj graciajn, per kiuj estis skribita la adreso.

Poste li eltiris la leteron, ĝue enspirante ĝian nedifineblan parfumon. Ho! La altrangaj kaj longe vojaĝintaj personoj..., kiel montras sian ne imiteblan superecon, eĉ pri malgravaj detaloj!...

Gallardo, kvazaŭ lia korpo ankoraŭ akre malbonodorus pro mizero, kiel ĉe la unuaj jaroj, parfumis sin per skandala abundeco. Liaj malamikoj mokis la atletan junulon kaj eĉ pasie dubis pri lia vireco. La admirantuloj ridetis pro tia spirita malforteco; sed ofte ili estis devigataj turni sian vizaĝon flanken pro la ĝenanta, troa parfumo de la matadoro. Kompletan parfumaron li portis kun si dum siaj vojaĝoj kaj plej virinaj odoraĵoj estis verŝitaj sur lian korpon, kiam li iris en la areno de la cirko inter mortigitaj ĉevaloj, pendantaj intestoj kaj miksitaj kun sango ekskrementoj. Iaj al li entuziasmaj, elegantaj malĉastulinoj,

kiujn li konis dum vojaĝo por ludbatali en urboj de suda Franclando, donis al li sekreton por fari strangajn miksaĵojn el parfumoj: sed tiu letera odoraĵo, kiu estis la sama uzata de la persono ĝin skribinta! tiu mistera, delikata kaj nedifinebla odoro, tute neimitebla, kiu ŝajnis eliĝi el ŝia aristokrata korpo kaj kiun li nomis "sinjorina odoro"!...

Li legis kaj relegis la leteron kun kontenta rideto pro ĝojo kaj fiereco. Ĝi estis nenio grava: kelkaj linioj: saluto el Seviljo dezirante al li bonan sorton en Madrido: antaŭgratuloj pro liaj sukcesoj. Se tiu ĉi letero estus perdiĝinta, neniel riskus la reputacio de la subskribinta virino: "Amiko Gallardo" ŝi diris komence per eleganta literstilo, kiu ŝajnis tikli la okulojn de la toreadoro, kaj fine: "via amikino Suno"; ĉion, per nepasiaj, kvankam amikaj frazoj, parolante al li je "vi", per supera, afabla tono, kvazaŭ la vortoj ne irus al samrangulo, sed ili malsuprenirus al li nur pro ŝia bonkoremo.

La toreadoro, rigardante la leteron kun adoro propra al vilaĝano malmulte lerta pri legado, ne povis eviti ian ĝenan senton, kiel se li estus malŝatita.

— Tiu ĉi virino! — murmuretis li —. Tiu ĉi virino!... estas ĉiam alte. Paroli al mi je "vi"! Je "vi"! Kaj ĝuste al mi!...

Sed agrablaj memoroj ridetigis lin kontente. Tiu nepasia stilo estis nur por leteroj: kutimoj de altrangulinoj; priokupoj de sinjorinoj multe vojaĝintaj tra la mondo. Lia ĝeno iĝis admiro.

— Kiom saĝa ŝi estas! Jen danĝera virino!

Kaj kun lia rideto montriĝis profesia kontento, fiereco de rabbesta dresisto, kiu, alte taksante la forton kaj bravecon de la submetita besto, laŭdis tiel sian propran gloron.

Dum Gallardo admiris la leteron, jen eniris jen eliris lia servisto Strekaro, portante vestaĵojn kaj skatolojn, kiujn li metis sur liton.

Li estis nebrue kaj manvigle aganta viro, kiu ŝajnis ne sciiĝi pri la ĉeesto de la matadoro. De antaŭ kelkaj jaroj li akompanadis la toreadoron dum ĉiuj liaj vojaĝoj, kiel "spadportisto" (13). Li komencis en Seviljo per mantelludoj (14) samtempe, kiam Gallardo; sed la malbonaj okazaĵoj estis por li, dum lia kamarado sukcesis kaj atingis la gloron. Li estis malgranda, brunaĉa kaj malmulte muskolhava kaj havis sur sia vizaĝo zigzagan, malbone kunigitan cikatron, kiu tranĉis kvazaŭ duonblanka signaĉo lian sulkoplenan kaj falhaŭtan vizaĝon de maljunulo. Ĝi estis kornovundo, kiu preskaŭ mortigis lin en la cirko de lia naskiĝvilaĝo kaj krom tiu ĉi terura vundo li havis aliajn ĉe kaŝitaj lokoj de sia korpo.

Mirakle li vivis malgraŭ la sekvoj de sia toreadora emo; sed plej kruele estis, ke la publiko ridis pri liaj domaĝoj, ĝuante, kiam li estis hufbatata kaj disŝirata de taŭroj. Fine, lia obstina, mallerta taŭremo rezignis antaŭ tia malbonsorto, kaj li kontentiĝis estante, kiu akompanadis kaj konfide servis sian antikvan kamara-

don. Li estis plej fervora el la admirantoj de Gallardo, kvankam li trouzis tiun intimecon, permesante al si konsili kaj kritiki: Se li estus la majstro, li pli lerte estus ludinta ĉe iaj okazoj. La amikoj de Gallardo ridis pro tiu malsukcesinta ambicio de la spadportisto, sed li ne atentis pri tiaj mokoj. Ĉu li rezigni la taŭrojn? Neniam. Por ke io rememorigu lian pasinton, li kombis sian fortikan hararon laŭ brilaj tufoj sur siaj oreloj kaj tute konservis ĉe la supra, postaĵo de sia kapo la altestimatan hartufon (15), la haran vosteton de sia junaĝo; profesia signo, per kiu oni distingis lin el la ceteraj homoj.

Kiam Gallardo kontraŭ li koleris brue kaj impulseme, kiel kutime, ĉiam minacis tiun ĉi haran ornamaĵon.

— Sed, ĉu vi indas havi hartufon?, malhontulo!... Mi tondos al vi tiun ratan voston; fripono! mallertulo!

Strekaro akceptis rezignacie ĉi tiujn minacojn, sed li venĝis sin per superhoma silentado, respondante per ŝultra leviĝo al la majstro, kiam tiu ĉi, reveninte el taŭra cirko post sukcesa agado, demandis lin infane kontenta:

Kion vi opinias pri tio? Ĉu mi ne ludis ja bone?

Li konservis, de kiam ambaŭ estis kamaradoj, la privilegion paroli je "ci" (16) al sia mastro. Li digne ne povus paroli alimaniere la majstron, sed tiu "ci" estis dirata per naive respekta gesto. Lia familiareco estis simila al tiu de la antikvaj ŝildportistoj, rilate al siaj mastro-aventuristoj.

Estis de toreadoro lia kolo kaj kapo, sed la aliaj partoj de lia persono estis miksaĵo el ĉambrohelpa lakeo kaj tajloro. Vestite per vesto el angla drapo, donaco de la sinjoro, li portis sur la brusta, faldita rando de sia jako multegon da diversspecaj pingloj kaj sur maniko, kelkajn kudrilojn kun fadeno. Liaj brunaj kaj malgrasaj manoj virine delikate prenis kaj aranĝis ĉion.

Kiam li estis metinta sur la liton ĉion necesan por vesti la majstron, ree rigardis ĉiujn objektojn, por esti certa, pri tio ke nenio mankis. Poste li haltis meze de la ĉambro kaj ne rigardante Gallard'on, kvazaŭ li parolus al si mem, diris per raŭka kaj intense regiona prononco:

— La dua!

Gallardo levis nervekscite sian kapon same, kiel se li ne estus ĝis tiam rimarkinte, ke tie estas lia servisto. Li metis en sian poŝon la leteron kaj iris iom maldiligente al la fundo de la ĉambro, kiel prokrastante la momenton sin vesti.

— Ĉu ĉio preta?...

Sed subite lia pala vizaĝo ruĝiĝis kaj mienis terurite. Liaj okuloj malfermiĝis treege, kiel se ili estus vidintaj koboldon.

Kiun veston vi pretigis?

Strekaro montris tiun metitan sur la liton, sed, antaŭ kiam li povis paroli, la mastra kolero falis sur lin brue kaj terure.

Kia mallertaĵo! Sed, ĉu vi scias neniom pri niaj metiaj aferoj? Ĉu vi estas

falĉisto?... Madrida taŭrfesto, taŭroj el Miura kaj vi tamen pretigas ruĝan veston samkoloran, kiel tiu, kiun portis la malfeliĉa Emanuelo "Espartero" (17): Ŝajnas kvazaŭ vi estus mia malamiko, friponego! Ĉu vi deziras, ke mi mortu?, malbonŝanculo!

Kaj lia kolero des pli grandiĝis, ju pli li pensis pri teruraj sekvoj de tiu ĉi malatento, kiu estis ja inciti la sorton. Ludbatali en Madrido kun ruĝa vesto post tio pasinta!... Ekflamiĝis liaj okuloj malamike, same, kiel se li estus ĵus atakita perfide; lia vizaĝo ruĝiĝis kaj li ŝajnis preta sin ĵeti kontraŭ malfeliĉan Strekaron kun siaj manegoj de matadoro.

Diskreta pordofrapo finigis ĉi tiun scenon.

— Eniru.

Eniris hele vestita junulo kun ruĝa kravato kaj tenante Kordoban ĉaplon (18) per mano ringita de dikaj briliantoj. Gallardo tuj rekonis lin per tiu facileco por rekoni vizaĝojn, kiun havas ĉiuj vivantaj ligite al amasoj.

Li ŝanĝis subite sian koleron per ridetanta afableco, kiel se li sentus agrablan surprizon pro tia vizito. Estis li amiko el Bilbao, entuziasma taŭremulo, el liaj fervoraj partianoj. Nur tion ĉi li memoris pri li; sed, kiu estas lia nomo? Li konis tiom multe da ili!... kion li nur sciis certe, estis tio, ke li devas lin paroli je "ci", ĉar inter ambaŭ ekzistis antikva amikeco.

— Sidiĝu... kia surprizo! Kiam ci alvenis? Ĉu cia familio bonfartas?

La admirulo sidiĝis kontenta, kiel adoranto antaŭ sia idolo, intencante resti tie ĝis lasta momento, ĝuante, kiam la majstro diris al li "ci", kaj nomante ĉi tiun "Johano" ĉiumomente, por ke mebloj, muroj kaj ĉiuj pasantoj tra la apuda koridoro sciiĝu pri lia intimeco al tiu fama homo. Li estis alveninta tiun matenon mem el Bilbao kaj revenos tien la sekvantan tagon. Vojaĝo nur por vidi Gallard'on. Li legis liajn sukcesegojn: Bone komenciĝis la ludbatala sezono. La vetero estos bela. Li estis matene ĉe la apartigado je la taŭroj kaj rimarkis iun vinkoloran, kiu nedubeble faros belegan batalon ludate de Gallardo...

Sed la majstro tranĉis iom subite tiujn ĉi antaŭdirojn de la taŭremulo.

— Permesu al mi, senkulpigu min, tuj mi revenos.

Kiun veston mi devas meti? demandis Strekaro per ankoraŭ pli raŭka voĉo, pro tio mem ke li deziris sin montri submetita.

— Tiun verdan, tiun tabakkoloran, tiun bluan... kiun vi volos.

Kaj Gallardo malaperis trans la pordeton, dum lia servisto, ne embarasate de lia ĉeesto, ridetis venĝeme. Li konas ĉi tiun rapidan forkuron, kiam batas la horo sin vesti: "urinaĵo pro timo", laŭ diro de la profesiuloj. Kaj lia rideto montris ĝojon, tial ke la profesiaj famuloj, la kuraĝuloj, suferas pro duobla neceso devenanta de emocio same, kiel li, kiam ludbataladis en la taŭraj, vilaĝaj cirkoj.

Post iom longa tempo, kiam revenis Gallardo en sian ĉambron, ne plu bezonante rezisti lumvestite al iu ajn korpa neceso, li trovis novan vizitanton. Tiu

estis doktoro Ruiz, populara kuracisto, kiu de antaŭ tridek jaroj subskribis ĉiujn profesiajn raportojn pri taŭraj vundoj kaj kuracis ilin al ĉiuj falintaj toreadoroj en la Madrida areno.

Gallardo admiris lin, kredante, ke li estas plej klera scienculo el la mondo, kaj samtempe ŝercadis pri lia bonema karaktero kaj pri lia persona malzorgo. Lia admirado estis, kiel tiu de la plebo, kiu nur kredas pri sciencscio ĉe homoj nezorge vestitaj kaj kun karakteraj strangaĵoj, per kiuj oni diferencigas ilin el ĉiuj aliaj.

Li estis malalta kaj ventrodika, je larĝa vizaĝo, kun iom dispremita nazo kaj blankaĉ-flava, arkforma barbo, pro kio lia kapo iom similis al tiu de Sokrato. Kiam li staris, lia dika kaj falinta ventro moviĝis en lia granda veŝto, dum li parolis. Kaj se li ridis, tiu ĉi korpa parto supreniĝis apud lian maldikan bruston. Liaj vestoj makulitaj kaj ŝajne malnovaj post malmulte da uzo estis kvazaŭ nepropraj kaj flirtis sur lia neharmonia korpo, dika ĉe digestaj partoj kaj maldika ĉe tiuj movaj.

— Li estas benitulo — diris Gallardo —. Klerulo... maniulo tiel bona, kiel pano, kiu neniam posedos eĉ unu peseton... Li donacas, kion li havas, kaj ricevas, kion oni volas doni al li.

Du grandaj pasioj spicis lian vivadon, revolucio kaj ludbataloj: okazonta revolucio neklara kaj terura, kiu detruu en Eŭropo ĉion ekzistantan; anarĥia respubliko, kies konsiston li penis klarigi al neniu, kaj nur ĝi estis klara pri siaj ekstermaj neoj. La toreadoroj parolis al li, kvazaŭ al patro; li traktis al ĉiuj je "ci" kaj sufiĉis telegramo alveninta de iu ajn ekstrema loko de Hispanlando, por ke tiu bona doktoro veturos tuj al vundita "knabo", por lin kuraci, esperante ricevi nur, kion oni al li bonvolos doni.

Kiam li vidis Gallard'on post longa foresto, li ĉirkaŭprenis lin, premante sian falintan ventron kontraŭ tiun korpon bronzoŝajnan. Vivu la belfortulo! Li trovis la spadulon pli taŭga, ol iam ajn antaŭe.

—Kiel prosperas via respubliko, doktoro? Kiam ĝi alvenos?—demandis Gallardo per andaluzia ironio. Naciao diras, ke ĝi estas tuj venonta: ke tio okazos iun el tiuj ĉi unuaj tagoj.

— Nu! tio al vi ne interesas, mokemulo! Lasu pace bonan Naciaon. Pli multe utilus al li pli taŭge meti pikiletajn (19) parojn. Kaj al ci nur efikos interesiĝi, pri tio ke ci mortigu taŭrojn tiel belege, kiel ĝis nun... Ŝajne hodiaŭ estos emocio! Oni diris al mi, ke la taŭroj...

Sed tiam la junulo, kiu vidis la apartigadon kaj estis deziranta sciigi pri ĝi, interrompis la diron de la doktoro, parolante pri vinkolora taŭro, kiun li rimarkis kaj pri kiu li esperis plej bravan agadon. Ĉi tiuj du homoj restintaj longe en la ĉambro solaj kaj silentaj post reciproka saluto, estis en embarasiga situacio, kaj Gallardo opiniis necesa prezenton. Sed, kiu estas la nomo de ĉi tiu amiko, kiun li

parolas je "ci"?... li gratis dubeme sian kapon, streĉis siajn brovojn kun pripensa mieno; sed lia hezito malmulte daŭris.

— Aŭskultu: kiu estas cia nomo? Pardonu min... komprenu, estas tiom multaj amikoj!

La junulo maskis per aproba rideto sian malĝojon, sentinte sin forgesata de la majstro, kaj diris sian nomon. Kiam Gallardo aŭdis ĝin, rememoris subite kaj riparis sian forgeson, dirante post la nomo: "riĉa minposedanto el Bilbao". Poste li prezentis la "faman doktoron Ruiz" kaj ambaŭ homoj, kvazaŭ sin konus reciproke de ĉiam, ekbabilis pri la taŭraro.

— Sidiĝu ambaŭ — diris Gallardo, montrante kanapon ĉe la fundon de la ĉambro —. Tie vi ne baros. Interparolu kaj ne atentu pri mi. Mi vestos min. Ĉar, kiam nur ĉeestas viroj...

Li sin malvestis kaj restis nur tolaĵvestite. Sidante sur seĝo sub mezo de arko inter dormoĉambro kaj saloneto, li sin submetis al pretigado de Strekaro, kiu malfermis ledan sakon kaj elprenis purigilaron preskaŭ virinan por la majstra purigo.

Malgraŭ tio ke ĉi tiu estis zorge razita, li ree sapis ties vangojn kaj razis lin rapide, kiel tiu faranta ĉiutage saman agon. Post kiam li sin lavis, ree Gallardo okupis sian seĝon. La servisto verŝegis sur lian hararon briligilon kaj parfumojn, kaj kombis lin laŭ bukloj sur la frunto kaj tempioj; poste li komencis aranĝi la profesian distingilon, la estimegatan vosteton.

Li kombis respekte la longan tufon kreskantan ĉe la supra postaĵo de la majstra kapo, plektis ĝin kaj, prokrastante ĝian finan aranĝon, li fiksis ĝin per du harpingloj sur la verton. Tiam estis necese okupiĝi pri la piedoj, kaj li senigis la toreadoron je liaj ŝtrumpetoj, lasante sur tiu ĉi nur trikitan kamizolon kaj silkan kalsonon.

La fortika muskolaro de Gallardo montris sin sub ĉi tiuj vestaĵoj per fortaj ŝveloj. Kavo ĉe femuro sciigis pri profunda cikatro, pri karno forigita de kornopiko. Sur la bruna, braka haŭto montriĝis per blankaj makuloj restaĵoj de antikvaj batoj. Lia bruna kaj senvila brusto estis krucita de du neregulaj, violkoloraj linioj, kiuj ankaŭ estis memorigaĵoj je sangaj okazoj. Ĉe la maleolo, lia karno estis violnuanca kaj havis rondan kaveton, kvazaŭ ĝi estus modelilo por moneroj. Tiu batala organismo odoris, kiel karno pura kaj brava, miksita kun virinaj parfumoj.

Strekaro, portante sur brako kotonon kaj blankajn bandaĝojn, genuis apud la piedoj de la majstro.

— Tute same, kiel la antikvaj gladiatoroj — diris doktoro Ruiz, rompante sian interparoladon kun la bilbaano —. Ĉi estas kvazaŭ Romano, Joĉjo.

— Pro aĝo, doktoro — respondis iom melankolie la spadulo —. Ni maljuni-

ĝas. Kiam mi batalis kontraŭ taŭroj kaj kontraŭ malsato samtempe, mi ne bezonis ĉi tion ĉe mantelludoj. Kaj miaj piedoj estis el fero.

Strekaro enigis inter la piedfingrojn de la majstro malgrandajn flokojn el kotono; poste li kovris la plandojn kaj suprajn partojn de liaj piedoj per tavoloj el tiu ĉi mola substanco kaj, tirante la bandaĝojn, li komencis volvi ilin per streĉitaj spiraloj same, kiel estas volvitaj la antikvaj mumioj. Por fiksi tion ĉi, li prenis la kudrilojn kun fadeno, kiujn portis sur sia maniko, kaj kudris zorge la ekstremojn de la bandaĝoj.

Gallardo batis la plankon per siaj premitaj piedoj, kiuj ŝajnis pli rezistemaj per tiu rimedo. Li sentis ilin en tiu mola volvaĵo fortaj kaj malpezaj. La servisto metis ilin en longajn ŝtrumpojn, kiuj atingis mezon de femuro, kaj estis dikaj kaj flekseblaj, kiel gamaŝoj; nura ŝirmilo de la kruroj sub la lumvesta silko.

— Malaperigu sulkojn... Atentu, Strekaro, ĉar min ne plaĉas malstreĉitaj vestoj.

Kaj li mem, starante, intencis vidi sin per proksima, dufolia spegulo kaj, pasante la manojn inter siajn krurojn, sin fleksis por malaperigi sulkojn. Sur la blankajn ŝtrumpojn, Strekaro metis aliajn el silko rozkolora, kiuj estis la nuraj videblaj el lia toreadora vestaĵaro. Gallardo metis siajn piedojn en pantoflojn elektitajn el kelkaj paroj, kiujn Strekaro estis kolektinta sur kofron; ĉiuj kun tute novaj, blankaj plandoj.

Nun komenciĝis ja la vestiĝado. La servisto prezentis al li prenitan ĉe ĝiaj ekstremoj pantaloneton por ludbatalo; ĝi estis tabakkolora, lumvesta parto kun pezaj, oraj brodaĵoj laŭ ĝiaj kudrolinioj. Gallardo metis ĝin sur sin kaj lasis pendi la fortikajn kun oraj kvastoj ŝnuretojn, kiuj fermis ĝiajn ekstremojn. Ĉi tiuj ŝnuretoj, per kiuj oni tirpremis subgenue la pantaloneton, sangoŝveligante la kruron kaj pruntante al ĝi artifikan forton, estis nomataj "viroj".

Gallardo, streĉante samtempe siajn krurajn muskolojn, diris al sia servisto, ke li tiru sen timo. Tiu ĉi afero estis ja el plej gravaj. Al ĉiu matadoro multe interesas, ke la "viroj" estu tre streĉitaj. Kaj Strekaro, per lerta rapideco, igis el ĉirkaŭantaj ŝnuretoj kaŝitaj sub la ekstremoj de la pantaloneto, malgrandajn pendaĵojn.

La majstro eniĝis en delikatan, batistan ĉemizon, kiun prezentis al li lia servisto kaj kiu havis krispojn ĉe ĝia glata kaj travidebla brustumo, kvazaŭ el virina vestaĵo. Strekaro, post kiam li ĝin butonumis, faris la nodon de la longa kravato iranta, kiel ruĝa linio, de kolo ĝis zono. Restis nun plej malfacila afero, meti la talian volvostrion; silka tuko pli longa, ol kvar metrojn, kiu ŝajne okupis la tutan ĉambron kaj kiun Strekaro pretigis tiel lerte, kiel ĉion.

La spadulo iris apud siajn amikojn de la alia ekstremo de la ĉambro, fiksinte sur sian talion iun el striaj ekstremoj.

— Vin pretigu: atentu multe — li diris al sia servisto —. Estu lerta.

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ..... FILIA Nr 14

Kaj, turnante sin malrapide, li iris al sia spadportisto, dum la tukstrio tenata de tiu ĉi volvis regule lian talion, kiu tiel ŝajnis pli maldika. Strekaro per rapidaj manmovoj ŝanĝis la pozicion de la silka volvaĵo. Ĉe iaj turnoj, la tukstrio volvis estante faldita, ĉe aliaj, tute etendita kaj ĉiumomente ĝi alĝustiĝis al matadora talio, glate kaj kvazaŭ unupece, sen sulkoj nek malegalaĵoj. Dum ĉi tiu turniĝiro, Gallardo, kiu estis ĝustema kaj malkontentema pri sia persona aranĝo, haltigis kelkfoje sian antaŭeniron, por iri malantaŭen du aŭ tri turniĝojn kaj korekti la laboron.

— Estas malbone — li diris akre —. Fi! Malbenaĵo!... Zorgu, Strekaro!

Post multaj haltoj en la vojaĝo, Gallardo venis ĉe la finon, portante sur sia talio la tutan silkan volvostrion. La vigla servisto kudris kaj pinglis la majstran veston, igante el tiu ĉi nur unu pecon. Por eliĝi el ĝi, toreadoro estas devigata tondi aŭ esti helpata de aliuloj. Li ne povas demeti eĉ unu vestparton, ĝis kiam revenos en la hotelon, se almenaŭ ne faras tion taŭro antaŭ la publiko en la cirko, kaj oni senvestigas lin poste en la kuracejo.

Sidiĝis Gallardo alifoje kaj Strekaro komencis aranĝi la haran vosteton, liberigante ĝin el harpingloj kaj ĝin kunigante al falsa vosteto kun nigra kokardo, kiu memorigis la antikvan reteton uzatan de la primitivaj toreadoroj.

La majstro laŭŝajne deziris prokrasti la momenton definitive sin meti en la lumveston, ĉar li streĉe etendis ambaŭflanken siajn brakojn por vigliĝi, petis al Strekaro cigaron, kiun li lasis sur la apudlitan ŝranketon kaj demandis pri horo, opiniante, ke ĉiuj horloĝoj trorapidis.

—Ankoraŭ estas frue... La knaboj ne alvenis... Min ne plaĉas iri frue en la cirkon. Oni nur babilas tie, kiam ni estas atendantaj!...

Hotelservisto anoncis, ke strate atendas veturilo kun la ludbatala bando.

Estis la ĝusta horo. Oni ne povis prokrasti plu alveturon. Li metis sur la talian volvaĵon veŝton ornamitan per oraj kvastoj kaj sur ĉi tiun, la jaketon; blindiga vestoparto surhavanta dikegajn brodaĵojn, peza, kvazaŭ ŝirma fervesto, kaj brilanta, kiel brulaĵo. Tabakkolora silko nur restis videbla ĉe la internaj, manikaj partoj kaj ĉe du triangulaĵoj de la dorso. Preskaŭ la tuta jaketo malaperis sub la dika tavolo de cilindretoj kaj brodaĵoj el oro, desegnantaj florojn kun koloraj ŝtonoj sur ĝiaj koroloj. Sur ŝultraj partoj estis pezegaj, masivaj brodaĵoj el oro, de kiuj pendis ornamaĵo el sama metalo. Oro estis eĉ sur la vestorando, formante larĝajn rubandojn, kiuj tremis ĉiumomente. El la ora buŝo de ĝiaj poŝoj montriĝis anguloj de tuketoj el silko, ruĝaj same, kiel la kravato, kaj talia volvostrio.

— La ludbatalan ĉapon.

Strekaro eltiris zorge el ovala kesto la ludbatalan ĉapon, kiu estas nigra kaj bukloplena kun du pendantaj kvastoj, kvazaŭ pasamentaj oreloj. Gallardo metis ĝin sur sian kapon, atentante, pri tio ke la kokardo estu ekstere kaj la vosteto pendu sur la dorso.

— La mantelon.

De seĝo prenis Strekaro la ludmantelon nomatan "parada". Ĝi estas luksa, inda je princo mantelo el silko samkolora, kiel la vesto kaj, kiel ĉi tiu, ŝarĝita per oraj brodaĵoj.

Gallardo metis ĝin sur ŝultron kaj sin rigardis per spegulo, kontenta pri sia pretigado. Li ne aspektas malbone!... Ni veturu al la cirko!

Ambaŭ liaj amikoj adiaŭis lin rapidege, por lui veturilon kaj sekvi lin. Strekaro metis sub brakon grandan volvaĵon de ruĝaj tukoj, el kies ekstremoj aperis la teniloj kaj pintoŝirmiloj de kelkaj spadoj.

Kiam Gallardo malsupreniris al la hotela vestiblo, vidis bruan kaj multenombran homamason en la strato, kvazaŭ estus okazinta io grava. Plie, lin atingis murmuro el multo da aliaj personoj krom tiuj vidataj trans la pordon.

Alvenis la hotela mastro kaj lia tuta familio, kun etenditaj manoj, kiel se ili adiaŭus lin por longa vojaĝo.

— Bonan sorton! Estu al vi bono kaj sukceso!

La servistoj malgraŭ respekta sento pro entuziasmo kaj emocio, ankaŭ manpremis lin.

— Bonan sorton, Don Johano!

Kaj li ridetis ĉiuflanken, ne atentante pri la timaj mienoj de hotelaj sinjorinoj.

— Dankon; tre danka. Ĝis poste.

Li estis aliigita. De kiam Gallardo metis sur sian ŝultron la blindigantan mantelon, malpriokupata rideto vivigis lian vizaĝon. Li estis pala, ŝvite pala, kiel malsanulo; sed li ridis kontenta, ĉar vivis kaj iris al la publiko, sin tenante instinkte brave kaj bele antaŭ la popolamaso.

Li paŝis fiere kaj afekte, suĉante la cigaron, kiun tenis per la maldekstra mano; li movis siajn koksojn dum irado, portante sian belan mantelon kaj frappaŝante per malmodesteco de belfortulo.

— Bonvolu, sinjoroj... lasu min pasi. Tre danka, tre danka.

Kaj li zorge evitis malpurigajn kontaktojn kun lian kostumon, kiam li faris al si vojon en multego da malbone vestitaj kaj entuziasmaj personoj, kiuj amasiĝis antaŭ la hotelan pordon. Ili ne havis monon por ĉeesti taŭrfeston, sed profitis ĉi tiun okazon por manpremi la faman Gallard'on aŭ tuŝi almenaŭ ion de lia vesto.

Apud la trotuaro atendis veturilo trenata de kvar muloj vivkolore ornamitaj per kvastoj kaj tintiloj. Strekaro estis jam supreniĝinta sur la kondukistan sidilon kun sia volvaĵo el ruĝtukoj (20) kaj spadoj. Interne sidis tri toreadoroj kun mantelo sur siaj genuoj kaj vestitaj per helkoloraj vestoj tiel abunde broditaj, kiel tiu de la majstro, sed nur arĝente.

Gallardo, prempuŝate kaj ovaciate de popolamaso, sin defendante per siaj kubutoj kontraŭ tuŝemaj manoj, alvenis apud ŝtupeton de la veturilo, kien oni helpis al li supreniri per karesaj, dorsaj ekpuŝoj de la entuziasmuloj.

— Bonan tagon, sinjoroj — li diris mallonge al la viroj el sia bando.

Li sidiĝis postloke, apud la ŝtupeto, por ke ĉiuj povu rigardadi lin kaj li ridetis, respondante per kapmovoj la kriojn de kelkaj virinaĉoj kaj ekaplaŭdon de gazetvendistoj.

La veturilo ekmoviĝis rapide, trenate de viglaj muloj gaje tintegantaj tra la stratoj. Popolamaso disiĝis ambaŭflanken, por ke pasu la brutoj; sed multaj ekiris al la veturilo, kvazaŭ ili volus fali sub ĝiajn radojn. Oni svingis ĉapelojn kaj bastonojn; tremo pro entuziasmo kuris tra ĉie; ĝi estis iu el tiuj induktaj fluoj, kiuj frenezigas kaj agitas ĉe iaj momentoj la amasojn, kriigante ĉiujn, sen tio ke ili scias kial.

— Hura la bravuloj!... Vivu Hispanlando!

Gallardo ĉiam pala kaj ridetante salutis, dum ripetadis "tre danka", indukte emociate de popola entuziasmo kaj fiera pri sia kuraĝo kuniganta lian nomon kun tiun de la patrolando.

Aro da gebuboj sekvis la veturilon, kurante kiel plej eble rapide, kvazaŭ ĉe fino de tiu kurado, ili atingos ion eksterordinaran.

De antaŭ unu horo, strato *Alcalá* estis rivero de veturiloj inter du bordoj de kunpremitaj piedirantoj, kiuj iris eksterurben. Ĉiuj antikvaj kaj modernaj veturiloj estis en ĉi tiu brua kaj senorda elmigro; de la antikva, vojaĝa omnibuso, ja anakronismo, ĝis la plej moderna tipo de aŭtomobilo (21). Ĉiuj tramoj pasis amase plenaj kaj portante homajn berarojn sur ĝiaj ŝtupetoj. La omnibusoj akceptis veturantojn ĉe la komenciĝo de strato Seviljo, dum la kondukisto kriadis de supre "Al la taŭra cirko! al la taŭra cirko!". Trotis gaje tintante muloj kun kvastoj, trenante nekovritajn veturilojn, sur kiuj sidis virinoj portantaj "mantilojn" el blanka punto kaj florojn kun helaj koloroj; oni oftege aŭdis kriojn pro teruro, tial ke bubo, penante transpasi de trotuaro en trotuaron, savis sin per simia lerteco el veturilaj radoj, malgraŭ ilia rapida fluo. Grumblis aŭtomobilaj trumpetoj; kriis veturilaj kondukantoj; vendistoj anoncis paperfoliojn kun bildo kaj historio de la ludotaj taŭroj aŭ portretoj kaj biografioj de famaj toreadoroj, kaj foje, scivolema murmuro superregis la popolamasan zumadon. Inter la kavaleriaj policanoj, pasis hele vestitaj rajdantoj sur malgrasaj kaj mizeraj ĉevalaĉoj, kun kruroj tegitaj per flavaj ŝirmiloj, oraj jakoj kaj larĝaj, rondaj ĉapeloj, kiuj havis dikan kvaston anstataŭ kokardo. Tiuj estis la pikistoj; maldelikataj rajdistoj kun montarana aspekto portantaj post sia araba selo, kvazaŭ ruĝan diablon; nome: la "saĝan simion", la serviston kondukintan ĝis lia domo la rajdbeston.

La toreadoraj bandoj veturis sur nekovritaj veturiloj kaj la brodaĵoj de iliaj viroj, rebrilante la tagan lumon, ŝajnis blindigi la popolamason, ekscitante ĝian entuziasmon "Tiu estas Fuentes" "Tiu Bomba". Kaj la rekonintoj, kontentaj pro

siaj identigoj, sekvis per avidaj rigardoj la malproksimiĝantajn veturilojn, kvazaŭ estus okazonta io kaj ili timus alveni malfrue.

De la supra parto de strato *Alcalá* oni vidis tiun larĝan, tute rektan vojon, sune blanka, kun vicoj de printempe verdiĝantaj arboj, balkonoj nigraj pro personaro kaj ŝoseo, kiu aperis nur de loko al loko, sub svarmanta popolamaso kaj rapidantaj veturiloj, kiuj malsupreniris al Cibeleso. Ĉe tiu ĉi loko, ree supreniris la strato inter arbaroj kaj grandaj konstruaĵoj, kaj fermis la perspektivon, kiel triumfa arkado, pordo *Alcalá*, kies blankan grandon oni vidis projekcie sur lazuran ĉielon, ĉe kiu ŝvebis, kvazaŭ solaj cignoj, kelkaj nubaj flokoj.

Gallardo sidis silente respondante al aklamoj per nemova rideto. Post kiam li salutis la pikiletistojn, li diris nek eĉ unu vorton. Ili ankaŭ estis silentaj kaj palaj, korpremitaj de nekonata, tuja estonteco. Kiam ili estis antaŭ aliaj toreadoroj, lasis flanken pro neutilaj heroajn sintenadojn, kiuj estas necesaj antaŭ la publiko.

Mistera influo ŝajne avizis la popolamason pri paso de la toreadora bando veturanta al la taŭra cirko. La buboj, kiuj kuris post la veturilo kaj aklamis Gallard'on, fine disiĝis malproksime inter veturiloj; tamen ĉiuj personoj turnis sian kapon, kiel divenante post sin, ke tiu ĉi fama toreadoro estas proksima, kaj haltis sur la trotuara rando por pli oportune vidi lin.

En la veturiloj kurantaj antaŭe, virinoj turnis sian kapon, avizite de tintado el la trotantaj muloj. Neklara murmurego venis el iaj grupoj, kiuj haltis sur la trotuaro. Ŝajne ĝi estis entuziasmaj aklamoj. Iuj svingis ĉapelojn; aliaj per salutaj movoj, bastonegojn.

Gallardo respondis ĉiujn per sia rideta grimaco, sed ŝajne li ne konsciis pro priokupo pri la salutoj. Apude sidis Naciao, la fida pioniro, pikiletisto dek jarojn pli aĝa, ol li, maldelikata, granda viro kun kunigitaj brovoj kaj serioza mieno. Li estis fama ĉe la samprofesiuloj pro sia boneco, sia honesteco kaj sia politika entuziasmo.

— Johano, vi ne plendos kontraŭ Madrido — diris Naciao —. Vi estas idolo de la publiko.

Sed Gallardo, kvazaŭ li ne aŭdus tion kaj deziris konigi sian priokupon, respondis:

— Mi antaŭsentas, ke hodiaŭ okazos malbonaĵo.

Kiam alvenis la veturilo apud Cibeleson, haltis. Solena, kadavra transporto venis de promenejo Paŝtejo al Kastilanino, tranĉante la veturilan fluon de strato *Alcalá*.

Gallardo pli multe paliĝis, rigardante per maltrankvilaj okuloj, kiel preterpasis la krucifikso kaj la pastroj, kiuj tiam ekkantis funebre kaj rigardis, kelkaj malame, aliaj envie, tiun personaron forgesitan de Dio kaj rapidantan sin amuzi.

La spadulo tuj demetis sian ludbatalan ĉapon same, kiel la pikiletistoj, escepte Naciaon.

— Fi, malbenaĵo! — ekkriis Gallardo —. Demetu vian ĉapon, inferano!

Li rigardis Naciaon furioze, kiel se li intencis lin bati, ĉar estis certa, pri tio ke ĉi tiu ribelo kunportos al li plej grandajn malfeliĉaĵojn.

— Bone... mi demetas ĝin — diris Naciao malafable, kiel infano, al kiu oni kontraŭas ĝian volon, post kiam li vidis la krucifikson malproksima —. Mi demetas ĝin... sed por la mortinto.

Ili haltis dum multe da tempo, por ke preterpasu tiu longa procesio.

— Mi estas malbonŝanca! — murmuris Gallardo per voĉo tremanta pro kolero —. Ja estas strangaĵo transporti kadavron, tranĉante vojon al taŭra cirko!..., Malbenaĵo! Mi prave diris, ke hodiaŭ okazos io malbona!

Naciao ridetis levante siajn ŝultrojn.

— Superstiĉoj kaj fanatikaĵoj... Dio aŭ Naturo ne atentas pri tiaj aferoj.

Ĉi tiuj vortoj eĉ pli multe incitantaj Gallard'on forpelis priokupon el la aliaj toreadoroj, kiuj ekmokis sian kamaradon same, kiel ĉiuokaze, kiam li diris sian plej uzatan frazon "Dio aŭ Naturo".

Kiam la vojo estis senbara, la veturilo rapidis, kiel plej eble, kaj pasis antaŭen inter aliaj veturiloj ankaŭ irantaj al la ludbatalejo. Alveninte ĉi tiun lokon, ĝi direktiĝis maldekstren al pordo nomata Ĉevaleja, kiu kondukas al la kortoj kaj staloj, irante malrapide pro densa homamaso. Alifoje okazis ovacio al Gallardo, kiam li malsupreniris el la veturilo, sekvate de liaj pikiletistoj. Puŝoj kaj defendado je lia kostumo kontraŭ malpurigaj kontaktoj; salutaj ridetoj; kaŝado je lia dekstra mano, kiun ĉiuj deziris premi.

— Lasu min pasi, sinjoroj: tre danka!

La granda korto inter la ĉefkonstruaĵo kaj la muro de tiuj dependaj estis plenigita de publiko, kiu antaŭ la okupo je siaj benkoj, deziris vidi de proksime la toreadorojn. Super la kapoj de la amaso elstaris la pikrajdistoj kaj ŝlosilrajdistoj (22) kun siaj kostumoj el 17-a jarcento. Ĉe korta flanko estis konstruaĵoj unuetaĝaj, kun vinberarboj apud pordo kaj florpotoj ĉe ĝiaj fenestroj: vilaĝeto konsistanta el oficejoj, laborejoj, staloj kaj domoj, kie loĝis stalservistoj, lignaĵistoj kaj ceteraj cirkaj oficistoj.

La matadoro pene antaŭeniris inter la grupoj. Lia nomo flugis de buŝo al buŝo kune kun entuziasmaj ekkrioj.

— Gallardo!... Jam estas ĉi tie la belfortulo! Hura! Vivu Hispanlando!

Kaj li, sindonante tute al la publika aklamo, antaŭeniris per afekta paŝado, trankvila, kiel dio, gaja kaj kontenta, kvazaŭ li irus al festo por honori lin.

Du brakoj ĉirkaŭis lian kolon, samtempe kiam atingis lin forta vinodoraĉo.

— ¡ Simpatiulo!... Spritulo! Vivu la kuraĝaj viroj!

Li estis bonaspekta sinjoro, burĝo, kiu tagmanĝis kun amikoj kaj forkuris

el ilia gaja, deproksima observado. Li klinis sian kapon sur spadulan ŝultron kaj tiel li restis, kvazaŭ li intencus ekdormi pro entuziasmo. La puŝoj de Gallardo kaj tiroj de amikoj liberigis la majstron el tiu senfina ĉirkaŭpreno. La ebriulo, sin vidante disigita de sia idolo, ekkriis entuziasme:

— Hura la viroj! — Venu ĉi tien ĉiuj nacioj de la mondo por admiri tiajn toreadorojn kaj morti poste pro envio.

— Ili eble havas militŝipojn... monon... sed tio ne taŭgas! Ili nek havas taŭrojn nek virojn, kiel tiu ĉi, allogantajn ĉiujn per sia kuraĝego... Hura mia bravulo! Vivu mia lando!

Gallardo trapasis grandan kalkopentritan salonon sen iu ajn meblo, kie estis liaj samprofesiuloj ĉirkaŭataj de entuziasmuloj. Poste li faris al si paslokon en amaso baranta pordon, kaj eniris malluman kaj mallarĝan ĉambron, ĉe kies fundo brilis lumoj. Jen la kapelo. Malnova bildo prezentanta Madonon nomatan Kolomba Virgulino okupis la altaran fronton. Sur ĝia tablo brulis kvar kandeloj. Drapaj, polvoplenaj, tineatakataj bukedoj staris en ordinaraj fajencflorujoj.

La kapelo estis personplena. Neriĉaj taŭremuloj amasiĝis internen por vidi deproksime la famulojn. Ili restis kapnudaj, ĉu maletendiĝinte ĉe la unuaj vicoj, ĉu starante sur seĝoj kaj benkoj, preskaŭ ĉiuj dorse al Virgulino kaj avide rigardante la pordon, por eldiri nomon tuj, kiam ili vidis lumveston.

La pikiletistoj kaj pikrajdistoj, malfeliĉuloj riskantaj sian vivon same, kiel la majstroj, apenaŭ kaŭzis murmureton. Nur fervoraj taŭremuloj konis iliajn kromnomojn.

Subite eksonis persista zumo, nomo ripetata de buŝo al buŝo:

— Fuentes!... Tiu ĉi estas Fuentes!

La eleganta toreadoro per gracia sintenado, kun mantelo sur ŝultro antaŭeniris ĝis la altaro, fleksis sian genuon per teatra gesto, dum la lumoj rebrilis sur liaj ciganaj okuloj, kaj rektigis sian nedikan, gracian kaj malpezan figuron. Post preĝo kaj krucsigno li stariĝis, irante dorse al la pordo, rigardante ĉiam la Virgulinan bildon, kiel tenoro, kiu foriras salutante publikon.

Gallardo estis pli simpla. Li eniris, tenante per mano la toreadoran ĉapon kaj maletendita sur brako la mantelon, dum paŝadis ne malpli afekte; sed kiam li estis antaŭ la Virgulina bildo, li fleksis teren ambaŭ genuojn kaj preĝis, ne atentante pri la centoj da okuloj lin rigardantaj. Lia naiva, kristana animo tremis pro timo kaj pento. Li petis helpon fervore, kiel simpla homo vivanta en sinsekvaj danĝeroj kaj kredanta pri ĉiuspecaj, kontraŭaj influoj kaj supernaturaj protektoj. Unuafoje en la tuta tago li pensis pri sia edzino kaj sia patrino. Kompatinda Karmeno; tie, en Seviljo, atendante telegramon! Sinjorino Angustio, kiu vivadis trankvile kun siaj kokinoj en bieno *Rinconada,* necerte sciante, kie ludbatalas ŝia filo!... Kaj li, kun terura antaŭsento, pri tio ke hodiaŭ okazos malbono al li!...

Kolomba Virgulino! Iom da protekto. Li estos bona, forgesos la alian aferon, vivos dece.

Kaj, fortiginte sian superstiĉan animon per tiu neutila pento, li eliris el la kapelo ankoraŭ emocie, kun malklaraj okuloj, ne vidante la homamason, kiu baris al li pasi.

Ekstere, en la salono, kie atendis la toreadoroj, salutis lin tute razita sinjoro, vestite per nigra vesto de li iom mallerte surportata.

— Kia malbonŝanco! — murmuris la toreadoro, dum li daŭrigis sian iron antaŭen —. Mi pravas diri, ke hodiaŭ okazos malbonaĵo!...

Li estis la cirka kapelpastro; taŭra entuziasmulo portanta sur sia jako la Sanktajn Oleojn (23). Li venis el kvartalo Prospereco, sekvate de najbaro, kiu helpis lin dum meso kaj rajtis ŝanĝe side ĉeesti taŭrfeston. De antaŭ kelkaj jaroj, li defendis sian postenon kontraŭ lokita interne Madridon paroĥo, kiu sin kredis pli rajta por monopoli la religian servon de la taŭra cirko. Kiam okazis taŭrfesto, li metis la kalikon subjaken, elektis laŭvice el siaj amikoj kaj protektatoj iun, kiun favori per la sida ĉeesto kaj en veturilo pagata de la impresariaro veturis al la cirko, kie oni rezervis al li du antaŭajn sidlokojn apud la taŭreja pordo.

La pastro eniris la kapelon kvazaŭ mastro kaj indignis pro konduto de la publiko: ĉiuj estis kapnudaj, sed parolis laŭte kaj kelkaj eĉ fumis.

— Sinjoroj, tio ĉi ne estas kafejo. Bonvolu eliri. Taŭrfesto tuj komenciĝos.

Ĉi tiu avizo foririgis ĉiujn, dume la pastro eltiris la kaŝitajn Oleojn kaj gardis ilin en pentritan, lignan skatolon. Li mem, tuj post kiam enfermis la kalikon, rapidis por okupi sian lokon en la taŭran cirkon, antaŭ ol la toreadoraj bandoj parade marŝontaj eliros.

La homamaso estis malaperinta. En la korto nur restis homoj vestite per silko kaj brodaĵoj, flavaj pikistoj kun grandaj, rondaj ĉapeloj, ŝlosilrajdistoj kaj helpistoj kun oraj kaj bluaj vestoj.

Ĉe pordo nomata "Ĉevala" sub arkaĵo por eniri la cirkon laŭorde kaj rapide lokiĝis la toreadoroj por parada marŝo: unue la majstroj, sekvis la pikiletistoj, ĉiuj lasinte grandajn interspacojn, kaj poste en la korto la ferŝirmata kaj montara rajdistaro pikista, odorante kiel varma ledo kaj brutaj ekskrementoj, kun skeletaj ĉevaloj, kiuj hufbatis kaj havis nevidigan tukon antaŭ la dekstra okulo. Kiel armea pakaĵaro, moviĝis nerve la trenmuletoj; malkvietaj kaj fortaj brutoj bone purigitaj, surgarnitaj per kvastoj kaj tintiloj kaj portantaj ĉe la kolo hispanajn hirtflagetojn.

Inter la arkaĵa fundo kaj la ligna barilpordo, kiu ĝin duone ŝtopis, oni vidis ĉielan pecon, cirkan tegmenton kaj sekcion de ŝtuparbenkaro kun dense svarmanta publiko, ĉe kiu flirtis, kvazaŭ koloraj kuloj, ventumiloj kaj flugpaperoj.

Fortega blovo, spiro el grandega pulmo eniĝis tra tiu koridoro. Harmonia

zumo atingis ĝis tie per aeraj ondoj, divenigante malproksiman muzikon, preskaŭ neaŭdatan.

Apud la arkrando montriĝis kapoj, multaj kapoj: tiuj de ĉeestantoj sur apudaj benkoj, scivole rigardante por plej frue vidi la heroojn.

Gallardo lokiĝis samvice kun ambaŭ aliaj spaduloj kaj ĉiuj sin salutis reciproke per solena kapklino. Ili nek parolis, nek ridetis. Ĉiu el ili pensis pri si mem, lasante forflugi sian imagkapablon malproksimen, aŭ tute pensis pri nenio, kio okazas ofte dum emociaj momentoj. Ili malkovris sian priokupon per neniam finiĝanta, mantela belmetado, kiu konsistas meti ĝin sur ŝultron kaj volvi ĝiajn ekstremaĵojn sur la talion, tiamaniere, ke malsupre el tiu helkolora volvaĵo eliĝu gracie kaj vire la kruroj tegitaj per silko kaj oraĵoj. Ĉies vizaĝoj estis palaj; ne palaj sen brilo, sed brile kaj violkolore palaj; kun ŝvita glazuro pro emocio. Ili pensis pri la sabla areno nevidebla de tie kaj sentis nevenkeblan teruron pro la okazontaĵoj trans la muro, pro tio nevidata, pro la neklara danĝero, kiu anonciĝas, sed ne montriĝas. Kiel finiĝos la taŭrfesto?

Post la toreadoraj bandoj bruis du trotantaj ĉevaloj, kiuj iris sub la eksteraj, cirkaj arkadoj. Ili estis la ŝlosilrajdistoj; viroj portantaj nigran, antikvan kostumon kaj tegolĉapelon kun ruĝaj kaj flavaj plumoj. Ĵus ili faris la antaŭgalopon, por forpeli ĉiujn scivolulojn, kaj venis por rajdi antaŭ la ludbatalontaj bandoj, kiel regimentpioniroj.

La pordoj de la arkaĵo kaj tiuj de la barilo lokitaj antaŭ ĝi tute malfermiĝis. Tiam aperis vasta rondo, vera cirkego, sabla ejo, kie estis okazonta tragedio, por emociigi kaj ĝojigi dekkvarmil personojn. La harmonia kaj neklara zumado pligrandiĝis kaj fariĝis gaja kaj tipa muziko, triumfa marŝo kupre brueganta, kiu takte movigis la brakojn gracie kaj vire, kaj afekte paŝigis per koksa balancado. Antaŭeniru la belfortuloj!...

Kaj la toreadoroj, palpebrumante pro subita lumŝanĝo, transiris de ombro en lumon, de silenta, kvieta koridoro en bruegantan cirkon, sur kies ŝtuparbenkaroj moviĝis senĉese popolamaso, ondiĝante pro scivolemo, kiam, por pli bone vidi, oni sinsekve stariĝis.

Antaŭeniris sur la sablo la toreadoroj, malgrandigate de la grandioza perspektivo. Ili estis, kvazaŭ malgrandaj, brilaj marionetoj, ĉe kies brodaĵoj la suno naskis ĉielarkajn kolorojn. Iliaj graciaj movoj entuziasmigis la publikon same, kiel se ĝi estus infano antaŭ miriga ludilo. Freneziga blovo, kiu agitis la popolamason, ĝin ekscitante, kaj tremigis ĝiajn nervojn, sen tio ke ĝi sciis certe kial, flugis tra la tuta cirko. Aplaŭdis ĉiuj, kriis la plej entuziasmaj kaj nervemaj, muĝis la muziko kaj, inter tiu bruego venanta el ambaŭ flankoj paradis solene malrapide, de la elirpordo ĝis la prezidejo, la toreadoraj bandoj, kompensante la mallongajn paŝojn per gracia, braka kaj korpa movado. Tra la ĉiela, lazura rondo

super la ludbatalejo flugis blankaj kolomboj, timigite de la bruego eliĝanta el tiu brika kratero.

La toreadoroj sentiĝis alie, kiam ili antaŭeniris sur la sablo. Ili riskis sian vivon ne nur por mono. Sian teruron kaj timon antaŭ tio nekonata forgesis ili, enirante la arenon. Jam ili estis en la sabla rondo antaŭ la publiko; realo alvenis. Dezirego je gloro de iliaj simplaj kaj barbaraj animoj, volo superi siajn kamaradojn kaj fiereco pro sia forto kaj lerteco ilin blindigis, forgesigante timojn kaj donante al ili sovaĝan kuraĝon.

Gallardo aliformiĝis. Li rektiĝis dum irado, kiel se volus esti pli alta; li moviĝis fiere, kvazaŭ militvenkinto, kaj rigardis ĉien triumfe same, kiel se ne ekzistus ambaŭ aliaj spaduloj. Ĉio estis lia, cirko kaj publiko. Li sentis sin kapabla mortigi ĉiujn ajn taŭrojn, kiuj ekzistis tiam en Kastilaj aŭ Andaluziaj paŝtejoj. Li estis certa, pri tio ke ĉiuj aplaŭdoj estis por li. Ĉiuj miloj da virinaj okuloj ombrigataj de blankaj mantiloj ĉe loĝioj kaj benkaroj nur atentis pri lia persono: li tion ne dubis. La publiko adoris lin kaj, kiam li antaŭeniris, ridetante malmodeste, kvazaŭ al li estus direktata la tuta ovacio, li kontrolis la benkarojn, sciante, kie estis plej grandaj aroj da liaj partianoj kaj ignorante, kie kuniĝis la amikoj de la aliaj.

Ili salutis la prezidanton, tenante la ludbatalan ĉapon mane, kaj la brila parado finiĝis per disiro de la piedaj kaj rajdaj toreadoroj. Poste, dum ŝlosilrajdisto kaptis per sia ĉapelo la ŝlosilon ĵetitan de la prezidanto, Gallardo iris al benkaro, kie estis liaj plej fervoraj partianoj, kaj li donis al ili la luksan mantelon, por ke ili ĝin gardu. La belan mantelon prenitan de kelkaj manoj oni sternis sur la randon de la antaŭbenkara mureto, kiel respektinda, partisimbola balkonpendaĵo.

Plej entuziasmaj partianoj stariĝis kaj, svingante manojn kaj bastonojn, salutis la matadoron kaj montris siajn esperojn pri bela kaj brava agado de la seviljano.

Kaj li, sin apoginte sur la barilon, ridetis kontenta pri sia taŭgeco, kaj ripetis al ĉiuj:

— Tre danka. Mi ludos, kiel eble plej bone.

Ne nur la entuziasmuloj montris sian esperon lin vidante. Ĉiuj atentis pri li kaj atendis streĉitajn emociojn. Li estis toreadoro, kiu certe bezonos "laktolon", laŭ diro de taŭremuloj, kaj tiu "laktolo" estis tiu de vunditejaj litoj.

Ĉiuj opiniis, ke li estis mortonta en taŭra cirko pro kornopiko, kaj tial mem oni aplaŭdis lin per mortigema entuziasmo, kun barbara interesiĝo simila al tiu de persono sekvanta dresiston ĉien, por ĉeesti, kiam ĉi tiu estos disŝirata kaj manĝata de siaj leonoj.

Gallardo ridis pri la antikvaj taŭremuloj, seriozaj, teoriaj ludbatalsciuloj, kiuj opiniis neeble, esti atingata de taŭro, se toreadoro agas laŭ koncernaj reguloj. Koncernaj reguloj!... li nescias ilin kaj ne deziras ilin koni. Nur kuraĝo kaj

memfido estas necesaj por venki. Kaj preskaŭ blinde, gvidate de kuraĝo kaj helpate de siaj kapabloj, li sukcesis rapide, mirigante la publikon ĝis paroksismo kaj ĝin konfuzante per sia freneza braveco.

Li ne sukcesis, kiel aliaj matadoroj, iom post iom, per multjara, pionira (24) kaj pikiletista ludado apud la majstroj. Taŭraj kornoj ne timigis lin "Pli malbona estas malsato". Sukcesi rapide estis la plej interesa afero, kaj la publiko vidis lin komencanta, kiel spadulo, kiu atingis post malmulte da jaroj grandegan popularecon.

Oni admiris lin tial mem, ke oni opiniis nepre okazonta al li malfeliĉaĵon. Kulpe entuziasmiĝis la publiko, vidante, kiel blinde li ludis kun morto. Ĝi zorgis kaj dorlotis lin same, kiel oni agas rilate al tuj ekzekutota krimulo. Tiu ĉi toreadoro ne estis sinrezervema: li donis sin tute, li donis eĉ sian vivon. Li valoris tiom da mono, kiom kostis. Kaj la popolamaso beste senkonscia, kiel ĉiu rigardanta de senriska loko danĝeron, admiris kaj batalincitis la heroon. La prudentuloj mienis malaprobe antaŭ liaj heroaĵoj; ili opiniis lin bonsorta sinmortigemulo kaj grumblis: "Dum li ne mortos!..."

Eksonis trumpetoj kaj tamburoj kaj eliris la unua taŭro. Gallardo, tenante sur brako sian neornamitan ludmantelon, restis malŝateme nemova apud la barilo proksime al benkoj okupataj de siaj partianoj, kredante sin la celo de ĉiuj rigardoj. Tiu taŭro estis por alia. Li jam montros sian agemon, kiam eliros tiuj liaj. Sed aplaŭdado pro belaj mantelludoj de liaj kamaradoj movigis lin, kaj malgraŭ sia intenco li iris al taŭro, ludante pli kuraĝe, ol majstre. La tuta publiko aplaŭdis lin, ĉar, kio plej multe plaĉis ĝin, estis ja lia sentimo.

Kiam Fuentes mortigis la unuan taŭron kaj iris al la prezidejo, salutante la amason, Gallardo plipaliĝis, kvazaŭ ĉiu plaĉsigno direktata al alia egalvalorus insultantan forgeson. Nun venis lia vico: oni vidos gravajn aferojn. Li ne sciis certe kiujn, sed li estis decidinta timigi la publikon.

Apenaŭ la dua taŭro eliris, Gallardo per sia agemo kaj deziro mirplaĉi, ŝajnis plenigi per si la tutan cirkon. Lia mantelo estis ĉiam tuŝante la nazon de la besto. La taŭro faligis pikrajdiston de lia bando kromnomatan Kuiraĵo, kiu kuŝrestis antaŭ ĝiaj kornoj, kaj la majstro, preninte la voston de la bravbesto, tiris fortege, devigante ĝin turniĝi, ĝis kiam la rajdisto sendanĝeriĝis. La publiko aplaŭdis entuziasme.

Kiam alvenis la tempo kroĉmeti pikiletojn, Gallardo restis post la barilo atendante trumpetan signalon por mortigi. Naciao, preninte pikiletojn, incitis la taŭron ataki meze de la areno. Li faris nek graciajn movojn, nek kuraĝaĵojn "Pangajna afero". Tie en Seviljo estis kvar filetoj, kiuj se li mortus, ne trovus alian patron. Plenumi sian devon kaj nenio plu: pikileti kvazaŭ salajra ludbatalisto, ne dezirante ovaciojn, sed evitante fajfojn.

Kiam li kroĉis la paron de pikiletoj, kelkaj el benkaroj aplaŭdis, dum aliaj per mokema tono krie diris al li, aludante liajn ideojn.

— Malpli da politiko kaj pli da alproksimiĝo.

Kaj Naciao, pro erara kompreno kaŭze de la distanco, respondis ridetante, kiel lia majstro:

— Tre danka; tre danka.

Kiam Gallardo eksaltis ree en la arenon, ĉar sonis trumpetoj kaj tamburoj, anoncante la agon mortigi, la popolamaso moviĝis kaj zumis pro emocio. Ĉi tiu estas ja la matadoro, kiun ĝi preferas. Plej grava afero estas vidota.

Li prenis la maletenditan ruĝtukon donitan al li de Strekaro depost la barilo, tiris el ĝia ingo la spadon, kiun ankaŭ prezentis al li lia servisto, kaj per mallongaj paŝoj li iris antaŭ la prezidejon, tenante per mano la ludbatalan ĉapon. Ĉiuj etendis sian kolon, avide rigardante kaj aŭskultante la idolon, sed neniu aŭdis la honoran promeson (25). Lia belforta, gracitalia figuro kun postenklinita busto por pli laŭte paroli, impresis la amason same, kiel plej elokventa parolado. Kiam li finis sian diron, li duonturniĝis, ĵetante teren sian toreadoran ĉapon, kaj entuziasmo eksplodis brue: Hura la seviljano! Ja estas vidotaj belaj bravaĵoj!... Kaj la ĉeestantoj rigardis sin reciproke, kiel mute promesante miregigajn okazaĵojn. Tremo kuris tra la benkara publiko, kvazaŭ antaŭ io superhoma.

Subite profunda silento pro emocio fariĝis ĉe la homamaso same, kiel se la cirko estus ĵus malpleniĝinta. Vivo de tiuj miloj da personoj koncentriĝis en iliaj okuloj. Ŝajne neniu spiris.

Gallardo iris malrapide al la taŭro, apoginte sur ventron la ruĝtukon, kvazaŭ standardon, kaj pendole movante per la alia mano la spadon laŭ paŝada takto.

Kiam li turnis okaze sian kapon, li vidis, ke sekvis lin Naciao kaj alia bandano, portante surbrake mantelon por lin helpi.

— Ĉiuj for! — li diris.

Lia voĉo pro la profunda, reganta silento atingis ĝis plej malproksimaj benkoj kaj admira eksplodo aŭdiĝis... "Ĉiuj for!...". Li estis dirinta ĉiuj for!... Kia bravulo!

Li alvenis tute sola apud la bravan beston kaj subite ĉiuj ree silentis. Trankvile li malvolvis kaj etendis la ruĝtukon, dum iom plu antaŭen paŝis, ĝis kiam li estis preskaŭ tuŝanta la nazon de la taŭro, kiu miris kaj estis konfuzita pro tia homa maltimo.

La publiko ne kuraĝis paroli, nek eĉ spiri, sed ĝiaj okuloj brilis pro admiro. Kia viro! Li iras ĝis la kornoj mem!... Li frapis malpacience la sablon per piedo, incitante la bravbeston por atako, kaj ĝia grandega maso kun siaj akrepintaj kornoj sin ekĵetis al li muĝante. La kornoj preterpasis sub la ruĝtuko kaj tuŝis la kvastojn kaj ornamaĵojn de la matadora kostumo, sed la spadulo restis samloke

firme, nur malantaŭen movinte sian buston. La homamaso entuziasme eksplodis pro tiu ruĝtuka pasmovo (26). Hura!...

Turniĝis la brava besto, atakante ree la homon kaj lian tukon, kaj ree ankaŭ okazis pasmovo kaj eksplodo ĉe la publiko. La taŭro, pli kaj pli furioza pro tiu trompo, atakis la toreadoron kaj tiu ĉi ripetis la ruĝtukajn pasmovojn, nur ludante sur malgranda spaco, arde kuraĝigite per la danĝera proksimeco kaj la admiraj ekkrioj de la amaso, kiuj ŝajnis lin ebriigi.

Gallardo sentis apud sin la furiozan spiregon de la sovaĝa besto, atingis lian manon kaj vizaĝon la vaporoj el ĝia ŝaŭmo. Kutimiĝinte pro proksimeco, li konsideris taŭron bona amiko, kiu permesas esti mortigata por kontribui al lia gloro.

Restis nemova la taŭro dum kelkaj momentoj, tedite de tiu ludado, rigardante per malgaje pripensemaj okuloj la homon kaj la ruĝan drapon, kaj suspekto naskiĝis en ĝia neklara menso pri ekzisto de trompo, kiu, ju pli ĝi atakis, des pli puŝis ĝin al morto.

Gallardo antaŭsentis la ĝustan momenton, kiel ĉe siaj plej grandaj sukcesoj. Nun!... Li volvis la ruĝtukon ĉirkaŭ ĝia stangeto, per turnado de sia maldekstra mano, dum levis tiun dekstran ĝis okulalteco, klinante la spadon al la postsupra kolrando de la bravbesto.

La amaso moviĝis protestante kaj malaprobe.

— Ne vin ĵetu! — kriis miloj da voĉoj —. Ne... ne!

Estis tro frue. La taŭro sin tenis netaŭge por tio: ĝi certe ekatakos kaj trafos lin. Li ne agis laŭ teknikaj reguloj. Nu, reguloj kaj vivo interesis neniom tiun riskeman viron!

Subite li sin ĵetis kun la spado rekte al la taŭro, dum ĉi tiu atakis lin. Estis sovaĝa, reciproka kolizio. Dum momento homo kaj besto estis nur unu maso kaj tiel iris kune kelkajn paŝojn, ne montrante ankoraŭ, kiu estis la venkinto: la homo, kun brako kaj parto de sia korpo inter ambaŭ kornoj; la besto, mallevante sian kapon por atingi per ili tiun oran kaj multekoloran marioneton, kiu ĝis tiam glitis netrafite.

Fine la grupo disiĝis; lia ruĝtuko restis sur sablo, kiel ĉifono, kaj la toreadoro kun neokupitaj manoj iris ŝanceliĝante pro la kontraŭpuŝa forto, ĝis kiam post kelkaj paŝoj li ree ekvilibriĝis. Liaj vestoj estis malordigitaj: lia kravato ŝvebis ekster la veŝto, ŝirite de korno.

La taŭro daŭrigis sian kuron pro la inertforto. Sur ĝia larĝa kolo apenaŭ estis videbla la ruĝa tenilo de la spado enigita ĝis sia kruco. Subite la besto haltis, moviĝante pro sufero; fleksiĝis ĝiaj antaŭaj kruroj; kliniĝis ĝia kapo, ĝis tio ke tuŝis la sablon per sia muĝanta buŝo, kaj fine ĝi kuŝiĝis kun agoniaj ektremoj...

Ŝajnis kvazaŭ la ludbatalejo disfalus; kvazaŭ ĝiaj brikoj frapus sin reciproke; kvazaŭ la popolamaso estus tuj forkuronta pro teruro; tiom ĝi stariĝis, tremis,

paliĝis, gestis kaj mienŝanĝis. Mortinta!... Kia spadpiko! Ĉiuj opiniis dum sekundo, ke la toreadoro estis trafita de kornoj: ĉiuj estis certaj, pri tio ke li tuj sange sablonfalos; sed, ĉar li staras ankoraŭ, kapturnite de la ekpuŝego, sed ridetante, miro kaj surprizo pligrandigis la entuziasmon.

— Kia besto estas li! — ekkriis tiuj de la benkaroj, trovante neniun pli ĝustan vorton por esprimi sian admiron — Kia barbaro!

Kaj la ĉapeloj flugis al la areno kaj giganta aplaŭdado simila al hajlfala bruo kuris de benkaro al benkaro, laŭ iro de la matadoro ronde konturanta la cirkon, ĝis kiam li alvenis antaŭ la prezidejon.

La ovacio eksplodis bruege, kiam Gallardo per etenditaj brakoj salutis la prezidanton. Ĉiuj kriadis, petante por li la majstran honoron. Oni devas doni al li orelon de la taŭro. Neniam estis pli justa tiu premio. Malofte oni vidas spadpiki tiel trafe kaj kuraĝe. Kaj ankoraŭ kreskis la entuziasmo, kiam servisto de la cirko donis al li ian sangan, harplenan triangulaĵon: pinton de orelo de la bravbesto.

Jam estis en la areno la tria taŭro kaj ankoraŭ daŭris la ovacio al Gallardo; kiel se la publiko ne finus miri; kiel se ĉio okazonta dum la restanta festoparto valorus neniom.

La aliaj toreadoroj, palaj pro profesia envio, penis altiri la atenton de la publiko. Oni aplaŭdis ilin, sed ne entuziasme nek arde, kiel antaŭe. La publiko estis laca pro siaj ĵus pasintaj, deliraj ovacioj kaj atentis distreme tion, kio okazis en la areno. Oni diskutis pasie de benko al benko. La partianoj de aliaj matadoroj, jam kvietaj kaj liberaj el la emocia forto ĉiujn ĵus treninta, korektis sian ne pripensitan aprobgeston kaj diskutis Gallard'on. Tre brava, tre kuraĝa, vera sinmortigemulo; sed ja tio ne estas arto. Kaj iaj entuziasmuloj, ĉefe tiuj plej pasiaj kaj bestaj, kiuj admiris lian kuraĝon pro sia propra karaktera emo, indignis kiel kredanto, antaŭ kiu oni dubas pri la mirakloj de sia sanktulo.

Ne gravaj okazaĵoj interrompis la publikan atenton. Subite tumultis la homamaso en benkaro: ĉiuj stariĝis tie, formante konfuzan rondon, super kiu brakoj kaj bastonoj batis kaj estis svingataj. La restanta amaso ĉesis rigardi la arenon, atentante al tiu okaze malkvieta loko kaj al la grandaj ciferoj pentritaj sur la antaŭan muron de ĉiu benkaro.

— Bataleto en la 3-a! — oni kriis gaje —. Nun oni reciproke batas sin ĉe la 5-a!

Ĉiuj staris kaj agitiĝis, trenite de la imitiga forto de la homaj amasoj, rigardante super la najbarajn kapojn kaj vidante nur, kiel malrapide supreniris la policanoj, kiuj, pene pasante ŝtupare de benko al benko, venis ĉe la lokon, kie okazis la batado.

— Sidiĝu! — kriis la plej saĝaj, ĉar oni baris al ili vidi la arenon, kie la toreadoroj daŭrigis sian ludbatalon.

Iom post iom sereniĝis la homa maro; la kapvicoj formis kurbajn liniojn, kiel

la benkoj, kaj la taŭrfesto daŭris. Sed la publiko ŝajnis nerve ekscitita kaj montris sian animstaton per maljusta insultemo aŭ malŝatema silento kontraŭ kelkaj toreadoroj.

La publiko, tro emociite antaŭ nelonge, opiniis sengustaj ĉiujn okazaĵojn. Ĝi penis distri sian enuon manĝante kaj trinkante. Vendistoj iris laŭ la postbarila koridoro, ĵetante mirige lerte al la aĉetantoj, kion oni petis al ili. La oranĝoj flugis kvazaŭ ruĝaj pilkoj ĝis la supro de la benkaroj; rekte de la mano de vendisto al tiuj de la publiko same, kiel se fadeno tirus ilin. Oni malŝtopis botelojn de gastrinkaĵoj.

Oraj, andaluziaj vinoj brilis en la glasoj.

Scivolemo fariĝis ĉe la benkŝtuparoj. Fuentes pretiĝis pikileti sian taŭron kaj ĉiuj esperis ion eksterordinaran pri lerteco kaj gracio. Li antaŭeniris sola mezen de la areno, portante la pikiletojn per mano; la majstro iris trankvila, malrapide, kviete, kvazaŭ li estus komenconta amuzaĵon. La taŭro scivole rigardis lin, mirante vidi nur unu homon antaŭ si post la ĵus pasinta kapturnanta serio da mantelflugoj, kruelaj pikoj kaj malsaĝaj ĉevaloj, kiuj sin metis antaŭ ĝiajn kornojn, kiel se ili deziris provi ĝian puŝforton.

La homo ja hipnotigis la beston. Li proksimiĝis, ĝis tio ke tuŝis ĝian kapsupron per la pintoj de la pikiletoj; poste li kuretis per mallongaj paŝoj, kaj la taŭro sekvis lin, kvazaŭ konvinkite, ĝis la alia ekstremo de la areno. La besto ŝajnis dresita de la toreadoro; ĝi obeis lin laŭ ĉiuj movoj, ĝis kiam ĉi tiu, fininte la amuzantan ludon, etendis ambaŭflanken siajn brakojn kun unu pikileto ĉe ĉiu mano, levis, starante sur siaj piedpintoj, sian maldikan kaj gracian korpon kaj iris al la taŭro majeste, trankvile, por kroĉi la multkolorajn stangetojn sur la kolon de la surprizita bravbesto.

Tri fojojn li faris saman ludon kaj estis aklamata de la pupliko. Tiuj sin taksantaj inteligentaj sin venĝis nun je la entuziasma eksplodo kaŭzita de Gallardo. Ĉi tiu estas toreadoro! Ĉi tio estas ja arto!...

Gallardo, starante apud la barilo, viŝis sian vizaĝan ŝviton per viŝtuko, kiun pretigis al li Strekaro. Poste li trinkis akvon, sin turnante dorse al la areno por ne vidi la belludojn de sia kamarado. Ekster la taŭra cirko li estimis siajn samprofesiulojn per tiu frateco, kiun naskas komuna danĝero; sed en la areno ĉiuj estis liaj malamikoj kaj iliaj sukcesoj doloris lin, kiel ofendoj. Nun la publika entuziasmo ŝajnas al li, kvazaŭ ŝtelo malgrandiganta lian triumfegon.

Kiam eliris la kvina taŭro, kiu estis por li, li rapidis al la areno, avidante mirigi la publikon per siaj heroaĵoj.

Tuj kiam falis pikrajdisto, li etendis sian mantelon kaj irigis la taŭron ĝis alia arenekstremo, kie li kapturnis ĝin per serio da mantelaj flirtmovoj, ĝis kiam atingis, ke ĝi restis nemova. Tiam Gallardo tuŝis ĝian nazpinton per piedo aŭ, demetinte sian ludbatalan ĉapon, metis ĝin inter la kornojn. Alifoje, profitante la

malviglan miron de la besto, li prezentis al ĝi sian ventron per sentima incito aŭ genuiĝis antaŭ ĝi, preskaŭ kuŝante sub ĝia buŝo.

La maljunaj taŭremuloj grumblis mallaŭte. Negravaĵoj! Arlekenaĵoj ne toleritaj alitempe!... Sed ili estis devigataj silenti, neniigite de la publika kriarego.

Kiam sonis signalo por pikileti, ĉiuj subite atentis, vidante, ke Gallardo deprenis la stangetojn al Naciao kaj iris kun ili al la bravbesto. Oni protestis. Pikileti, li!... Ĉiuj konis lian mallertecon por tia ludo. Ĉi tiu taŭgis por tiuj, kiuj iom post iom fariĝis matadoroj post multaj jaroj da pikiletista agado apud siaj majstroj kaj Gallardo komencis ĝuste kontraŭe, mortigante taŭrojn, de kiam li unuafoje iris en arenon.

— Ne! ne! — ekkriis la homamaso.

Doktoro Ruiz kriis kaj gestis de la antaŭa vico de la benkaro.

— Lasu tion, infano! Vi nur scias la veron... (27). Mortigi!

Sed Gallardo malŝatis la publikon kaj estis surda por ĝiaj protestoj, kiam li sentis sin puŝata de maltimo. Inter tiuj krioj li iris rekte al la taŭro kaj, antaŭ ol ĉi tiu atakis, jen! li kroĉis la pikiletojn. La paro estis mallerte metita ekster ĝian difinitan lokon, kaj iu el la stangetoj falis, kiam la besto ekmoviĝis surprizite. Sed tio ne gravis. Ĉiujn plaĉis ridigante ĉi tiu maltimaĵo, ĉar popolamasoj ĉiam estas ja indulgemaj pri siaj idoloj, pravigante kaj senkulpigante iliajn mankojn. Li, ĉiufoje pli sentima, prenis aliajn pikiletojn kaj kroĉis ilin, malatentante la protestojn de la publiko, kiu timis pri lia vivo. Poste li ripetis triafoje la ludon, ĉiam mallerte, sed tiel kuraĝe, ke, dum iu ajn alia estus certe fajfata, li kaŭzis grandajn eksplodojn de admiro. Kia homo! Kiel helpas la sorto tiun maltimulon!...

Nur restis sur la taŭro kvar pikiletoj el ses, kaj tiuj metitaj tiel malforte, ke la besto ŝajnis ne senti ilian efikon.

— Ĝi estas tro fortoplena — kriis la taŭremuloj de la benkaroj, aludante la taŭron, dum Gallardo kun spado kaj ruĝtuko mane kaj la toreadora ĉapo kapmetita iris al ĝi bela, brava kaj trankvila, fidante al sia bonsorto.

— Ĉiuj for! — li kriis alifoje.

Kaj, divenante, ke iu restis apud li, ne obeante lian ordonon, li turnis la kapon. Fuentes estis kelkajn paŝojn poste. Li kun mantelo sur brako, ŝajnis sekvi lin hazarde, sed iris reale preta lin helpi, ĉar timis malfeliĉaĵon.

— Lasu min, Antono — diris Gallardo per maniero samtempe respektema kaj kolera, kvazaŭ li parolus al pliaĝa frato.

Tia estis lia mieno, ke Fuentes levetis siajn ŝultrojn, kiel forpelante ĉiun respondecon, sin turnis dorse al li kaj malproksimiĝis malrapide, ĉar li tuj certe estos necesa, laŭ sia opinio.

Gallardo etendis sian tukon antaŭ la kapon mem de la brava besto kaj ĉi tiu atakis lin. Unu pasmovo. Hura! raŭke kriis la entuziasmuloj. Sed la besto sin

turnis tre vigle, reatakante la matadoron kaj per fortega kapbato forprenis la ruĝtukon el liaj manoj. Trovante sin malarmita kaj senĉese atakata, li kuris al la barilo; sed tiam mem, la mantelo de Fuentes distris la beston. Gallardo, kiu divenis dum sia forkuro la subitan halton de la taŭro, ne saltis trans la barilon; li sidiĝis sur ĝian piedapogilon kaj tiel restis dum momentoj, rigardante kelkajn paŝojn antaŭen sian malamikon. La malvenko fariĝis aplaŭdado pro tiu ĉi bela montro je memregeco.

Reprenis Gallardo la ruĝtukon kaj spadon, zorge aranĝis la ruĝan drapon kaj alifoje iris antaŭ la taŭran kapon; sed nun malpli trankvila, regate de koleremo, de la deziro mortigi kiel eble plej baldaŭ tiun beston, kiu forkurigis lin antaŭ miloj da admirantoj.

Post unu pasmovo li jam opiniis, ke la decida momento estis alveninta. kaj li rektiĝis, kunigante siajn krurojn kaj prezentante la ruĝtukon ne sufiĉe alta; tuj li levis la spadon apud la okulojn kaj direktis ĝin al la taŭro.

La publiko ree protestis, timante pri lia vivo.

— Ne vin ĵetu! Ne!... Haaa!!

Ĝi estis terurega ekkrio, tremiganta la tutan publikon; nerva ekmovo, kiu starigis la homan amason kaj pligrandigis ĝiajn okulojn, dum la virinoj turnis sian kapon por ne vidi aŭ prenis konvulsie plej proksiman brakon.

Kiam la matadoro sin ĵetis sur la taŭron, lia spado pikis oston kaj, ĉar tio ĉi prokrastis lian movon posten, li estis atingata de korno kaj kroĉata korpomeze. Tiu fortika, muskolriĉa, virbela homo malgraŭ sia granda pezo estis skuata ĉe la ekstremo de korno, kvazaŭ malŝatinda marioneto, ĝis kiam la fortega besto per kapmovo ĵetis lin kelkajn metrojn malproksimen, kien, sur sablon la toreadoro falis peze, kun malfermitaj ekstremaĵoj, kvazaŭ rano vestita per silko kaj oro.

— Ĝi mortigis lin! Kornopiko ĉe la ventro — oni kriis de la benkaroj.

Sed Gallardo leviĝis inter manteloj kaj la homoj, kiuj rapidis por lin ŝirmi kaj savi. Li ridetis; palpis sian korpon; poste levetis siajn ŝultrojn por komprenigi al la publiko, ke li estas nevundita. Nur falbato kaj la talia volvostrio ĉifonigita. La korno nur penetris en ĉi tiun volvaĵon el fortika silko.

Li reprenis la mortigilaron; sed jam neniu volis sidi, divenante teruran kaj mallongan batalon. Gallardo iris al la sovaĝa besto per blinda impulso, kvazaŭ li ne kredus pri la povo de ĝiaj kornoj, post kiam li foriĝis el ili nevundite: li decidis mortigi aŭ morti; sed tuj, senprokraste, sen antaŭzorgoj. Aŭ la taŭro aŭ li! Li vidis ruĝe, kiel se liaj okuloj estis plenaj je sango. Li aŭskultis, kvazaŭ ili estus io malproksima, venanta de alia mondo, la voĉojn de la homamaso, al li konsilantajn trankvilon.

Li nur faris du pasmovojn, helpate de mantelportanto, kiu restis apud li kaj subite, per nekredebla rapideco, kiel se estus risorto liberiĝinta el sia detenpeco,

sin jetis sur la taŭron kaj ĝisfunde spadpiki: ĝin laŭ fulma maniero, kiel diris liaj admiruloj.

Kiam li foriĝis el kornoj, ĉar tiel multe estis eniginta sian brakon, lin tuŝis kaj jetis iu el ili, ŝancelante lin je kelkaj paŝoj; sed li restis stare, kaj la besto post freneza kuro falis ĉe la kontraŭa ekstremo de la areno kaj restis tie kun fleksitaj kruroj kaj la vizaĝo apogita sur sablon, ĝis kiam alvenis cerbetpikisto (28) por elmortigi ĝin.

La publiko ŝajnis deliri pro entuziasmo. Bela taŭrfesto! Ĝi estis satega je emocioj. Gallardo ja ne montrompis ilin: li kompencis abunde la enirbiletan koston. La taŭremuloj dum tri tagoj almenaŭ havos temon por babili en iliaj kafejaj kunsidoj. Kiel kuraĝa! Kia barbaro!... Kaj tiuj plej entuziasmaj rigardis provoke ĉien.

— La plej brava matadoro el la mondo... Kaj ĉi tie mi estas, kontraŭ kiu opinias kontraŭe.

La restantaj ludbataloj apenaŭ altiris atenton. Ĉio ŝajnis griza kaj senspica post la kuraĝajoj de Gallardo.

Kiam falis sur la sablon la lasta taŭro, ondego da knaboj, da popolaj taŭremuloj, da lernantoj je taŭrarto invadis la arenon. Ili ĉirkaŭis Gallard'on kaj sekvis lin, kiam li iris de sub la prezidejo al la elirpordo. Oni puŝis lin, tial ke ĉiuj deziris lin manpremi, tuŝi lian kostumon kaj fine, tiuj plej ardaj, malobeante la vortojn kaj manbatojn de Naciao kaj la aliaj pikiletistoj, prenis la krurojn de la majstro, levis lin sur siajn ŝultrojn kaj lin portis tiel tra la areno kaj koridoroj ĝis la ekstero de la cirko.

Gallardo salutis la grupojn, kiuj aplaŭdis, kiam li preterpasis, demetante sian ludbatalan ĉapon. Kun la luksa mantelo volvita sur sin, nemove, rekte starante, kvazaŭ dio, li lasis sin porti sur la fluo de Kordobaj ĉapeloj kaj Madridaj ĉapoj, el kiuj eliĝis entuziasmaj aklamoj.

Kiam li sidis en la veturilo kuranta malsupren tra strato *Alcalá*, salutate de la popolamaso, kiu ne ĉeestis la taŭrfeston, sed sciis jam lian sukcesegon, rideto pro fiero, pro kontento je liaj propraj fortoj vigligis lian ŝvitplenan vizaĝon, kie emocia paleco daŭris.

Naciao, ankoraŭ korpremite de la taŭratingo je sia majstro kaj lia terura falbato, demandis lin, ĉu al li io doloras kaj ĉu estos necese venigi doktoron Ruiz.

—Nenio: nur kareso... Estas neniu taŭro mortigonta min.

Sed li, kiel se meze de sia fiereco rememoris la pasintajn timojn kaj vidis ĉe la okulojn de Naciao ironian esprimon, aldonis.

— Ili estas malfortajoj okazantaj al mi antaŭ la iro en la arenon..., io simila al virinaj vaporoj. Sed vi pravas, Sebastiano. Kiel vi diras?... Dio aŭ Naturo, jen estas: Dio aŭ Naturo ne atentas pri ĉi tiuj ludbatalaj aferoj. Ĉiu sin savas,

kiel li povas, per lerteco aŭ kuraĝo kaj neniom efikas teraj aŭ ĉielaj rekomendoj... Vi estas saĝa, Sebastiano: al vi pli multe utilus esti elektinta studkarieron.

Kaj pro sia optimisma gajeco li rigardis la pikiletiston, kvazaŭ kleregulon, ne memorante la mokojn, per kiuj li mem ĉiam sintenis kontraŭ liaj komplikaj rezonoj.

Kiam li alvenis en sian loĝejon, li trovis en la halo multajn admirulojn, kiuj deziris ĉirkaŭpreni lin. Ili parolis pri liaj ludbataloj tiel trolaŭde, ke tiuj ĉi ŝajnis aliaj; tiom la komentarioj dum la mallonga veturtempo de la taŭra cirko ĝis la hotelo ilin ŝanĝis kaj troigis.

Supre li trovis sian ĉambron plena je amikoj; sinjoroj, kiuj parolis al li je "ci" kaj, imitante la parolstilon de la kampularo, paŝtistoj kaj brutproduktistoj, diris lin kun amikaj ŝultrobatoj:

— Vi agis bone... Ja tre bone!

Gallardo iris en la koridoron kun Strekaro kaj liberiĝis tiel el la entuziasma akcepto.

— Iru telegrafi hejmen. Vi jam scias: "Nenio malbona".

Strekaro rifuzis. Li devas helpi la majstron, kiam ĉi tiu ŝanĝos sian kostumon. Iu el la hotelservistoj sendos la telegramon.

—Ne: estas necese, ke vi mem iru. Mi atendos. Vi ankaŭ sendos alian telegramon. Vi jam scias, por kiu ĝi estas, por tiu sinjorino, por Doña Suno... Ankaŭ "Nenio malbona".

II

Kiam mortis la edzo de sinjorino Angustio, sinjoro Johano Gallardo, lerta ŝuflikisto laboranta en domenirejo ĉe kvartalo Foiro, ŝi ploris nekonsoleble, kiel konvenas en tiaj okazoj, sed samtempe en sia anima fundo ŝi sentis la ĝuon de tiuj, kiuj ripozas post peniga irado, forlasinte tro pezan ŝarĝon.

— Kara malfeliĉulo! Dio estigu lin en ĉielon! Tiel bona!... Tiel laborema!

Dum dudek jaroj da kunvidado li malkontentigis ŝin ne pli multe, ol estis ĉagrenitaj de siaj edzoj la ceteraj virinoj de la kvartalo. El tri pesetoj, kiujn meznombre li gajnis ĉiutage, li donis unu al sinjorino Angustio, por subteni la familion kaj hejmon, kaj destinis ambaŭ restantajn por sia propra persono kaj elspezoj pro delegiteco. Estas dece pagi siavice glasojn da "*manzanilla*" (29), kiam la amikoj ĝentile invitis nin por trinki, kaj la andaluzia vino, tial ke ĝi estas dia trinkaĵo, kostas multe. Ankaŭ li devas ĉeesti ludbatalojn; ĉar viro, kiu nek trinkas, nek iras en taŭran cirkon..., por kio li estas en la mondo?

Sinjorino Angustio, kiu havis du gefilojn: Enkarnacio kaj Joĉjo, estis devigata streĉi sian inteligenton kaj realigi multespecajn laborojn por vivigi la familion. Ŝi servis pohore en plej riĉaj hejmoj de la kvartalo, kudris por la najbarinoj, makleris vestaĵojn kaj juvelojn, delegite de ia amika aĉet-vendistino, kaj faris cigaredojn por la sinjoroj, rememorante tiel la metion de sia junaĝo, kiam sinjoro Johano, entuziasmema kaj karesema fianĉo, atendis ŝin ĉe la eliro de la tabaklaborejo.

Neniam ŝi rajtis plendi pri amaj perfidoj aŭ batoj de sia mortinta edzo. Ĉiusabate, kiam la ŝuisto revenis ebria hejmen post noktomezo, subtenite de siaj amikoj, gajeco kaj dolĉeco venis kun li. Sinjorino Angustio estis devigata puŝi lin internen, ĉar alie li obstine restadus apud la pordo, manplaŭdante kaj kantante per malklara voĉo multedaŭrajn kantatojn pri amo direktatajn al sia dika kunulino. Kaj, kiam fine fermiĝis post li la pordo, forprenante de la najbaroj tiun ĝojigan scenon, sinjoro Johano meze de sentimentala ebrieco obstine petis vidi siajn gefilojn, kiuj jam dormis, li kisis kaj malsekigis ilin per larmegoj kaj ripetadis siajn kantojn por honori sinjorinon Angustion. Hura plej bela virino el la mondo! Ĝis kiam, fine, la bona virino sensulkigis siajn brovojn kaj ridis, dum senvestigis kaj enlitigis lin, kvazaŭ li estus malsana infano.

Ĉi tio estis ja lia nura malvirto. Malfeliĉulo!... Pri virinoj aŭ vetludado, tute neniom Kvankam li estis egoisto, kiu portis bonajn vestojn, dum lia familio ĉifonis, kaj li malegale disdonis la gajnitan monon, ĉion ĉi li kompensis per malavaraj iniciatoj. Sinjorino Angustio fiere memoris la gravajn festotagojn, kiam Johano surmetigis al ŝi la broditan tukon de Manilo, kaj la edziniĝan mantilon, kaj kun la gefiloj antaŭirantaj iris apud ŝi, portante blankan, Kordoban ĉapelon kaj bastonon kun arĝenta tenilo, por promeni tra Ĉarmo, kvazaŭ komercista familio el strato Serpentoj. Kiam okazis malmultekosta taŭrfesto, li regalis ŝin malavare, antaŭ ol ili iris en la cirkon, per glasoj da "*manzanilla*" ĉe kafejo Sonorilo aŭ ĉe tiu de Nova Placo.

Tiu feliĉa epoko estis jam nur pala kaj agrabla memoraĵo por la kompatinda virino.

Sinjoro Johano malsaniĝis pro ftizo kaj dum du jaroj la edzino estis devigata flegi lin kaj pli streĉi siajn gajnokapablojn, por kompensi la mankon de la peseto, kiun donis al ŝi antaŭe la edzo. Fine li mortis en hospitalo rezignacie, konvinkite, pri tio ke vivo sen "*manzanilla*" nek ludbataloj valoras neniom, kaj lia lasta, ama kaj danka rigardo estis por lia edzino, kiel se li ekkrius per la okuloj: "Hura la plej bela virino el la mondo!..."

Malgraŭ tio ke sinjorino Angustio restis sola, ŝia situacio ne pli malboniĝis, kontraŭe ŝi sentis sin malpli embarasata sen tiu viro, kiu dum ambaŭ lastaj jaroj pezis sur ŝi pli multe, ol la restanta familio. Ŝi, energia kaj decida virino, elektis tuj profesion por ĉiu el la gefiloj. Enkarnacio, kiu jam estis deksepjara iris en

la tabaklaborejon, kie ŝia patrino sukcesis ŝin dungi dank'al la amikeco kun antikvaj kamaradinoj jam fariĝintaj majstrinoj. Joĉjo, kiu dum sia infanaĝo ĉiam estis en la domenirejo de kvartalo Foiro kaj vidis, kiel laboris la patro, estos ŝuisto, ĉar tion volis sinjorino Angustio. Ŝi ne sendis lin plu en lernejon, kvankam li nur sciis legi nebone, kaj de sia dekdua jaro li iris, kiel lernoservisto, ĉe iun el plej lertaj ŝuistoj de Seviljo.

Tiam komencis suferi la malfeliĉa virino.

— Ve, tiu knabo! Ido de tiel honestaj gepatroj!... Preskaŭ ĉiujn tagojn, anstataŭ veni en la majstran butikon, li iris en Buĉejon kun iaj buboj, kiuj kuniĝis ĉe benko de aleo Herkuleso kaj, kaŭzante grandan ĝojon al paŝtistoj kaj buĉistoj, ili kuraĝis mantelludi la bovojn, rezultante plej ofte renversataj kaj hufbatataj de ili. Sinjorino Angustio, kiu dum multaj noktoj kudris, por ke la knabo iru dece kaj pure vestite en la laborejon, trovis lin apud la hejma pordo, timanta eniri kaj samtempe sen kuraĝo por foriri pro la neceso manĝi, kun ŝirita pantalono, malpura jako kaj postsignoj sur lia vizaĝo pro batoj kaj gratoj.

Al tiu korpa difektado produktita de la perfidaj bovoj, kuniĝis la patrinaj vangofrapoj kaj balailaj batoj; sed la Buĉeja heroo ĉion subportis, se nur la manĝado ne mankis "Batu min, sed donu al mi manĝaĵojn". Kaj per ekscitita apetito, kiun produktis energia moviĝado, li englutis malmolan panon, difektitajn fazeolojn, duonputrintan gadon kaj ĉiujn netaŭgajn produktaĵojn, kiujn la laborema virino serĉis en butikoj, por nutri malmultekoste sian familion.

Tial ke la tutan tagon ŝi okupiĝis purigante plankojn de nepropraj hejmoj, nur malofte ŝi povis atenti sian filon kaj iri al la majstra laborejo por sciiĝi pri la progreso de la lernoservisto. Kiam ŝi revenis hejmen, ŝi siblomuĝis pro kolero, pensante plej severajn punojn por bonkondutigi la bubon.

Preskaŭ neniun tagon li sin prezentis en la laborejon. Dum la tuta mateno li estis en Buĉejo kaj, posttagmeze, grupiĝis kun aliaj vaguloj ĉe la enirejo de strato Serpentoj kaj admiris de proksime la kontraktatendantajn toreadorojn, kiuj kuniĝis ĉe Sonorilo, nove vestite, kun bonegaj ĉapeloj, sed sen pli, ol unu peseto en sia poŝo, kaj ĉiu, parolante pri siaj propraj faroj.

Joĉjo rigardadis ilin, kvazaŭ ili estus superegaj estaĵoj, kaj enviis iliajn bonajn figurojn kaj ilian sentimon por diri bellaŭdojn al la virinoj. Pensi, pri tio ke ĉiu el ili havas en sia hejmo silkan, broditan kostumon kaj, vestite per ĝi, iras antaŭ la homamaso laŭ takto de muziko, kaŭzis al li respektan ektremon.

La filo de sinjorino Angustio estis nomata "Ŝuisteto" de siaj ĉifonvestitaj amikoj, kaj li estis kontenta havi kromnomon, kiel preskaŭ ĉiuj famuloj de la areno. Oni ja komencas iel. Li metis sur sian kolon ruĝan tukon, kiun li ŝteletis al sia fratino kaj sub lia ĉapo eliĝis haroj, formante sur la oreloj dikajn tufojn glatigitajn per salivo. Li volis la tolan bluzon multefaldita kaj nur ĝiszone longa, postulis la pantalonon, malnova restaĵo el lia patra vestaro, adaptita de sinjorino

Angustio, alttalia, krurlarĝa kaj koksostreĉita, kaj ploris, kvazaŭ estus al li trudata humiligo, kiam lia patrino ne volis plenumi tiajn postulojn.

Mantelon! Posedi ludmantelon, por ne esti devigata ĝin pruntepeti por kelkaj minutoj al aliaj pli feliĉaj!... En ĉambraĉo de lia hejmo kuŝis forgesite malnova, malplenigita matraco. Sinjorino Angustio vendis ĝian lanon okaze de monbezono. Ŝuisteto dum tuta mateno restis tie, profitante foreston de sia patrino, kiu laboris tiun tagon, kiel pohora servistino, en la hejmo de ĉefpastro. Li vigle, kvazaŭ estus ŝipperea saviĝinto bezonanta en neloĝata insulo memfabriki ĉion, tondis ludmantelon el la neseka kaj eluzita tolaĵo. Poste li ŝutis en poton kun bolanta akvo manprenon da ruĝa anilino aĉetita en butiko kaj trempis en ĉi tiun tinkturon la malnovan tolaĵon. Joĉjo admiris sian laboraĵon. Jen plej hele skarlata ludmantelo, kiu certe vekos envion ĉe la vilaĝaj mantelludoj!... Nur restis, ke ĝi sekiĝu, kaj li metis ĝin ĉe la sunradiojn inter blankaj tolaĵoj de najbarinoj. Vento flirtigis la gutegantan tukon kaj malpurigis la apudajn tolaĵojn. Aro da malbenoj kaj minacoj, da streĉitaj pugnoj kaj buŝoj ekkriantaj plej terurajn insultojn kontraŭ li kaj lia patrino, devigis Ŝuisteton repreni lian belegan mantelon kaj forrapidi kun ruĝmakulitaj vizaĝo kaj manoj, kvazaŭ li ĵus estus mortiginta iun.

Sinjorino Angustio, forta, dika kaj lipharema virino, kiu ne timis la virojn kaj kaŭzis respekton al aliaj virinoj per siaj energiaj decidoj, estis senespera kaj laca pri sia filo. Kion fari!... Jam ŝiaj manoj agis sur ĉiujn korppartojn de la knabo; la balailoj rompiĝis sur lin sen pozitiva rezultato. Tiu malbenitulo estis laŭ ŝia diro hundokarna. Ĉar li kutimiĝis eksterhejme al la fortegaj, bovidaj kappuŝoj, la kruela, bovina hufbatado kaj la bastonbatoj de paŝtistoj kaj buĉistoj senkompate kondutantaj pri la ludbatalema bubaro, la patrinaj batoj ŝajnis al li tute natura fakto, hejma daŭro de la ekstera vivo, kaj li akceptis ilin sen intenco kondutŝanĝi, kiel koston de sia nutrado, ĝue manĝante pro malsato la malmolan panon, dum la patrinaj malbenoj kaj pugnobatoj falis sur lin. Ĉiam, apenaŭ li satiĝis, forkuris el la hejmo, profitante la liberecon, kiun lasis al li sinjorino Angustio, devigate iri al siaj okupoj.

Ĉe Sonorilo, antikva, respektinda taŭremulejo, kie cirkulis la gravaj, ludbatalaj sciigoj, li ricevis kelkfoje avizojn de siaj kamaradoj kaŭzantajn al li nervoskuojn pro entuziasmo.

— Ŝuisteto, morgaŭ, taŭrfesto.

La vilaĝoj de la provinco kutimis festi la datrevenon de la tiea sanktulo per mantelludoj kun jam luditaj taŭroj, kaj tien iris la malgrandaj toreadoroj, esperante rakonti ĉe la reveno, ke ili mantelludis en la gloraj ĉefplacoj (30) de *Aznalcollar, Bollullos* aŭ *Mairena*. Ili ekmarŝis nokte, ĉiu kun la mantelo sur ŝultro somere, kaj envolvite en ĝi vintre, kaj ne ĉesis paroli pri taŭraferoj.

Se marŝado estis kelktaga, ili dormis apud la vojo aŭ oni akceptis ilin pro kompato en gastejpajlejo. Ve al la maturaj vinberoj, melonoj kaj figoj, kiujn ili

trovis preterpasante!... Kio maltrankviligis ilin, nur estis, ke alia grupo, alia bando estu pensinta same kaj alvenu en la vilaĝon, okazigante akran konkuron.

Kiam ili alvenis en sian vojaĝcelon kun polyoplenaj brovoj kaj buŝo, lacigite kaj piedvundite pro marŝado, ili prezentis sin antaŭ la vilaĝestron; tiu plej kuraĝa, kiu plenumis direktoran taskon, parolis pri la meritoj de siaj kunuloj, kaj ĉiuj sin konsideris feliĉaj, se la vilaĝestro loĝigis en la gastejan stalon kaj regalis ilin per kuirajpoto baldaŭ tute malplenigota. En la vilaĝan ĉefplacon fermitan per ĉaroj kaj tabuloj oni liberigis maljunajn taŭrojn; veraj kornokasteloj plenaj je krustoj kaj cikatroj, kun grandaj splithavaj kornoj; bestoj ludataj dum multaj jaroj en ĉiuj vilaĝfestoj de la provinco; maljunaj, malicaj bestoj, kiuj pro tre ofta ludado konis ĉiujn rimedojn kaj trompojn de la ludistoj.

La vilaĝanoj pikis de senriska loko la virbovojn kaj la amaso serĉis amuziĝon, eĉ pli multe, ol ĉe la taŭro, ĉe la "toreadoroj" venintaj el Seviljo. Malfaldis ĉi tiuj siajn mantelojn kun tremantaj kruroj kaj refortigita animo per la ricevita nutrajo. Kiam okazis puŝrenverso, la publiko ĝojegis kaj, se iu subite timegis kaj rifuĝis trans palisaron, la barbaraj kampuloj malakceptis lin per insultoj, batoj sur liajn manojn prenintajn la palisarrandon aŭ per vergo sur la krurojn, por ke li eliru en la placon "Iru sendignulo! Vin metu antaŭ la taŭron, Fripono!...

Iujn fojojn kvar kamaradoj portis eksteren el la placo "toreadoron" palan kvazaŭ papero, vitrokulan, kun falanta kapo kaj brusto, kiel se ĝi estus rompiĝinta blovilo. Venis la veterinaro kaj trankviligis ĉiujn, ne vidinte sangon. Ĝi estas cerboskuo kaŭzita al la knabo, kiam li estis ĵetata ĝis kelkaj metroj da distanco kaj falis teren, kvazaŭ sako. Aliajn fojojn estis sveno okazinta pro hufpremado de pezega besto. Oni verŝis sur lian kapon sitelon da akvo kaj poste, kiam li rekonsciiĝis, oni regalis lin per gluto da brando de *Cazalla de la Sierra.* Nek eĉ princo estus pli bone flegita!

Refoje al la placo. Kaj fine, kiam la paŝtisto havis neniun pluan taŭron kaj venis vespero, du el la bando prenis sian plej bonan mantelon kaj, tenante ĝin per ĝiaj ekstremoj, rondiris la placon petante monon, kiel rekompencon. Pluvis sur la ruĝan mantelon la kupraj moneroj, des pli multe, ju pli la agado de la knaboj plaĉis la vilaĝanojn, kaj poste ili rekte ekmarŝis ree al la urbo, ĉar en la gastejo jam ili ne havis krediton. Multajn fojojn ili disputadis survoje pro la disdono je la kupraj moneroj, kiujn ili gardis en nodita tuko.

Poste, dum kelkaj tagoj ili rakontadis siajn heroajojn antaŭ la mirigitaj kamaradoj nepartoprenintaj la ekskurson. Ili parolis pri siaj "*verónicas*" (31) en *El Garrobo,* pri siaj "*navarras*" (31) en Lora aŭ pri terura taŭratingo en *El Pedroso,* imitante la gestojn kaj sintenadon de la veraj profesiuloj, kiuj proksime al ili konsoliĝis pri sia manko de kontraktoj per ĉiuspecaj mensogoj kaj fanfaronajoj.

Foje sinjorino Angustio estis dum pli, ol unu semajno, sciante nenion pri sia filo. Fine ŝi neprecize sciiĝis, pri tio ke li estis vundata ĉe mantelludo en vilaĝo

Tocina. Sankta Dio! Kie estas tiu vilaĝo? Kiel iri tien? Ŝi konsideris mortinta sian filon kaj ploris lin; tamen, ŝi volis iri kaj, kiam ŝi pretiĝis por la vojaĝo, vidis ke Joĉjo venas, pala kaj malforta, sed parolante per vira gajeco pri sia okazaĵo.

Ĝi estis nenio: kornopikaĵo ĉe postvango; vundo je kelkaj centimetroj da profundeco. Kaj per triumfa senhonto li volis ĝin montri al la genajbaroj kaj certigis ilin, ke li povis enigi fingron internen, ne atingante ĝian fundon. Li fieris pro la odoraĉo jodoforma de li dislasata ĉie kaj parolis pri la ĝentilaĵoj kaj zorgoj, per kiuj oni flegis lin en tiu vilaĝo, laŭ lia diro, la plej bona el Hispanlando. Lia stato interesis plej riĉajn vilaĝanojn: la aristokrataro de la vilaĝo; la vilaĝestro vizitis lin kaj pagis al li poste la revenvojaĝon. Ankoraŭ li gardis en sia poŝo tri durojn, kiujn donis al sia patrino malavare, kiel potenculo. Kiom da gloro por dekkvarjarulo! Lia ĝojo estis ankoraŭ pli granda, kiam ĉe Sonorilo kelkaj toreadoroj, sed veraj toreadoroj, atentis pri li kaj lin demandis, ĉu lia vundo kuraciĝas bone.

Post ĉi tiu okazaĵo li jam ne iris plu en la butikon de sia majstro. Li sciis, kio estas taŭroj: lia vundo pligrandigis lian maltimon. Toreadoro; nur toreadoro! Sinjorino Angustio ne plu provis ŝanĝigi al li sian vojon, ĉar tio ja estus neutila. Ŝi agis, kvazaŭ ŝia filo ne ekzistus. Kiam li prezentiĝis hejmen akurate por la vespermanĝo, la patrino kaj la fratino silente donis al li lian porcion, intencante lin hontigi per sia malŝatado. Sed tio neniel ŝanĝis lian efikan maĉadon. Se li alvenis malfrue, ili gardis al li nec eĉ panpeceton kaj li estis devigata reiri straten tiel malsata, kiel li venis.

Li promenis nokte en aleo Herkuleso kun aliaj malvirtaspektaj knaboj, ne klara miksaĵo el krimuloj kaj toreadorlernantoj. La najbarinoj kelkfoje lin trovis strate parolanta kun suspektindaj, duonvirinaj, junaj aŭ gravaj sinjoroj. Dum kelktagaj daŭroj li vendis gazetojn, kaj en la gravaj festtagoj de Sankta Semajno liveris pletojn kun sukeraĵoj al la sinjorinoj sidantaj en placo Sankta Francisko. Li vagadis ĉirkaŭ la hotelo dum la foiro, atendante, ke iu anglo, ĉar laŭ li ĉiuj vojaĝantoj estis angloj, bezonos lin kiel gvidiston.

— Milord!... Mi estas toreadoro! — li diris vidante fremdaspektan viron, kiel se lia profesio estus nepra rekomendo por la fremduloj.

Kaj por pruvi sian aserton, li demetis sian ĉapon kaj montris sian haran vosteton; tufo longa je ĉirkaŭ dudek centimetroj kuŝanta laŭlonge sur la kapsupro.

Lia kamarado en mizero estis "Maloftaĵo", knabo samaĝa kiel li, malgranda kaj ruzokula, sen gepatroj, kiu vagadis en Seviljo, de kiam li povis memori kaj influis Joĉjon pro sia pli granda sperto. Li havis kornocikatron sur vango, kaj Ŝuisteto konsideris ĉi tiun postsignon pli valora, oi tiun sian nevideblan.

Kiam ĉe la pordo de hotelo vojaĝantino avida je morkuriozaĵoj parolis kun la malgrandaj toreadoroj, admiris iliajn vostetojn kaj miris aŭskultante la ra-

kontojn pri iliaj vundoj, por fine doni al ili monon, Maloftaĵo diris al ŝi per sentimentala tono.

— Ne donu al tiu ĉi, ĉar li havas patrinon kaj mi estas sola en la mondo. Kiu havas patrinon, eĉ ne konscias, kiom multe tio valoras!

Kaj Ŝuisteto pente kaj malgaje permesis, ke la alia estis prenanta la tutan monon, murmurante:

— Vere... vere.

Ĉi tiu sentimentaleco neniel baris al Joĉjo daŭrigi sian nenormalan vivmanieron, ĉar li aperis en la hejmon de sinjorino Angustio nur malofte kaj vojaĝis malproksimen de Seviljo.

Maloftaĵo estis ja majstro pri vagado. Kiam estis taŭrfesto, li per ĉiuj rimedoj intencis eniĝi kun sia kamarado, ĉu per grimpado trans la murojn, ĉu per glitado inter la enirantoj aŭ humile petegante ĝin al la eniroficisto. Kiel povus okazi taŭra spektaklo nevidota de ili, kiuj estis ja el la profesio?... Kiam okazis mantelludo en neniu vilaĝo de la provinco, ili iris mantelludi la taŭridojn de paŝtejo *Tablada;* sed ĉiuj ĉi allogaĵoj de la vivado en Seviljo ne sufiĉis sati lian ambicion.

Maloftaĵo estis trairinta iom da mondo kaj rakontis al lia kamarado mirindaĵojn, kiujn li vidis en malproksimaj provincoj. Li estis lerta por vojaĝi senpage per kaŝa glitado en la vagonarojn. Ŝuisteto aŭskultis ravite liajn priskribojn je Madrido, revinda urbo ankaŭ havanta sian taŭran cirkon, kiu estis kvazaŭ katedralo pri taŭrarto.

Juna sinjoro, por moki ilin, ĉe kafejpordo de strato Serpentoj diris al ili, ke en Bilbao ili gajnos multe da mono, ĉar tie ne abundas la toreadoroj, kiel en Seviljo, kaj ambaŭ knaboj komencis la vojaĝon sen mono kaj sen alia valizaro ekster siaj manteloj; veraj manteloj apartenintaj al konataj toreadoroj; mizeraj malnovaĵoj aĉetitaj per kelkaj moneroj en vestaĵa aĉetvendejo.

Ili vigle glitis en la vagonarojn kaj sin kaŝis sub la sidilojn, sed malsato kaj aliaj korpaj necesoj devigis ilin aperi antaŭ la mirigitaj vojaĝantoj, kiuj fine kompatis pro tiaj aventuroj, ridis je iliaj figuraĵoj, vostetoj kaj manteloj kaj ilin regalis per manĝorestaĵoj. Kiam oficisto ĉasis ilin en stacio, ili kuris de vagono en vagonon aŭ grimpis sur vagontegmento kaj atendis tie nevidate, ke ree la vagonaro ekkuros. Multajn fojojn oni kaptis ilin kaj, kondukinte la bubojn per kaptitaj oreloj kune kun vangofrapoj kaj piedbatoj, oni lasis ilin en silentan stacion, dum la vagonaro malproksimiĝis, kvazaŭ forfluganta espero.

Ili atendis la alvenon de alia, restante ĉe la ĉirkaŭaĵoj de la stacio kaj, se ili sin sentis streĉe observataj, ekmarŝis al plej proksima tra la kamparo, por pli facile atingi sian celon. Tiel ili alvenis fine en Madridon post kelkaj tagoj da aventurplena vojaĝo kaj longaj haltoj kun abundaj batoj. En strato Seviljo kaj placo Sunpordo ili admiris la grupojn de kontraktatendantaj toreadoroj; superaj estaĵoj, al kiuj nesukcese ili kuraĝis almozpeti, por daŭrigi sian vojaĝon. Taŭr-

cirka servisto, ankaŭ seviljano, kompatis kaj permesis ilin dormi en stalo kaj plie liveris al ili la plezuron ĉeesti taŭridan feston en tiu famkonata cirko, kiun ili opiniis malpli grava, ol tiun de sia urbo.

Tial ke al ili ŝajnis ilia celo ĉiufoje pli malproksima, ili ektimis kaj komencis sian revenon al Seviljo same, kiel ili venis; sed de tiam ilin ekplaĉis la fervojaj kaŝvojaĝoj. Ili sin direktis al negravaj vilaĝoj de Andaluzio, kiam sciiĝis pri festoj kun siaj nepraj mantelludoj. Tiel ili alvenis ĝis Manĉo aŭ Ekstremaduro kaj, se ilia malbona sorto trudis al ili marŝadi, ili serĉis rifuĝon en loĝejon de kampuloj; kredemaj kaj ridemaj homoj, kiuj miris pro ilia junaĝo, ilia sentimo kaj malverema babilado, kredante ilin efektivaj toreadoroj.

Ĉi tiu senĉesa vagado devigis ilin uzi ruzojn de primitiva homo por satigi siajn necesojn. En la ĉirkaŭaĵoj de kampodomoj ili rampis nevidate por ŝteli legomojn. Fojojn ili atendis dum tutaj horoj, ĝis kiam kokino proksimiĝis al ili kaj, ĝin kaptinte, tordis rapide ĝian kolon kaj daŭrigis sian marŝadon, por bruligi sekan branĉaron post kelkkilometra irado kaj formanĝi la malfeliĉan, duonbruligitan kaj preskaŭ krudan besteton per avideco de malgrandaj sovaĝuloj. Ili timis la gardhundojn de bienoj kaj paŝtistoj pli multe, ol la taŭrojn. Tiuj estis bestoj ne facile ludeblaj, kiuj kuris al ili montrante siajn ŝirdentojn, kiel se ilin malplaĉis ilia stranga aspekto suspektinda kaj danĝera por la propraĵo.

Multajn fojojn, kiam ili dormis sur tero proksime al stacio, atendante, ke vagonaro alvenos, iris al ili paro da ĝendarmoj kaj, vidante la ruĝajn mantelojn, kiuj efikis kiel kapkusenoj al tiuj vaguloj, trankviliĝis la soldatoj. Milde ili demetis al la knaboj iliajn ĉapojn kaj, vidinte la haran vosteton, rideme foriris sen pluaj esploroj. Ili ne estas ŝtelistoj, estas taŭremuloj irantaj al mantelludoj. Kaj en tiu toleremo estis miksaĵo el simpatio al la nacia festo (ludbatalado) kaj respekto al mistera estonteco. Eble iu el tiuj ĉifonvestitaj junuloj kun krustoj pro mizero estos iam "taŭrarta stelo", supera homo honore promesanta taŭrojn al reĝoj, vivanta kiel princo kaj liveranta farojn kaj dirojn de la gazetoj publikigatajn!

Iun tagon Ŝuisteto iĝis sola en vilaĝo de Ekstremaduro. Por pli multe mirigi la kampulan publikon, kiu aplaŭdis al la famaj toreadoroj "speciale venintaj el Seviljo", ambaŭ knaboj volis pikileti bravan kaj maljunan taŭron. Joĉjo kroĉis la stangetojn sur la beston kaj restis apud tabularo, ĝuante la popolan ovacion, kiu montriĝis per amikaj manfrapoj kaj trinkado je vino. Ekkrio pro teruro finis lian gloran ekstazon. Maloftaĵo jam ne estis sur la tero de la placo. Nur restis de li pikiletoj ruliĝante sur la polvo, unu pantoflo kaj lia ĉapo. La taŭro moviĝis incitite de ia malhelpaĵo, kiun ĝi hokportis per korno, konsistanta el vestvolvaĵo simila al marioneto. Pro la fortaj kapskuoj, tiu senforma pakaĵo dekroĉiĝis de la korno, ĵetante ruĝan, abundan fluidaĵon; sed, antaŭ kiam ĝi atingis la teron, ĝi estis trafata de la alia korno, kiu siavice skuis ĝin dum longa tempo. Fine, tiu

malgaja aĵo falis sur la polvon kaj tie restis malstreĉite kaj nemove, verŝante fluidaĵon, kvazaŭ truita felsako, el kiu ŝprucus abunda vino.

La paŝtisto per siaj dresitaj virbovoj kondukis la taŭron en korton, ĉar neniu kuraĝis proksimiĝi al ĝi kaj kompatinda Maloftaĵo estis portata sur matraco en ian ĉambron de la Urbodomo, uzatan por malliberejo. Lia kamarado vidis lin vizaĝblanka, kiel se li estus el gipso, nebrilokula kaj kun lia korpo ruĝa pro sango, kiun ne povis ŝtopi la tukoj malsekigitaj per akvo kun vinagro, kiujn oni metis sur lin, ĉar io pli taŭga mankis.

— Adiaŭ, Ŝuisteto! — li sopiris —. Adiaŭ, Joĉjo!

Kaj li ne diris plu. La kamarado de la mortinto ekrevenis terurite al Seviljo, vidante liajn neklarajn okulojn, aŭdante liajn adiaŭajn ĝemojn. Li timis. Milda bovino iranta en lian vojon, lin forkurigus. Li pensis pri sia patrino kaj ŝiaj saĝaj konsiloj. Ĉu ne estas pli bone fari ŝuojn kaj trankvile vivadi?... Sed ĉi tiuj intencoj nur daŭris, dum li restis sola.

Kiam li alvenis en Seviljon, la medio influis lin. Liaj amikoj kuris al li por scii ĉiudetale la morton de kompatinda Maloftaĵo. La profesiaj toreadoroj demandis lin en Sonorilo kaj memoris kun bedaŭro tiun vangotranĉitan bubon, kiun ofte ili sendis por komisietoj. Johano, ardigite de tiuj ŝatmontroj, lasis funkcii sian imagkapablon kaj rakontis, ke li sin ĵetis al la taŭro, kiam vidis kornotrafita sian malfeliĉan kamaradon, ke li tirprenis la voston de la taŭro kaj aliajn mirigigajn heroaĵojn, malgraŭ kiuj lia kunulo forlasis la mondon.

La tima impreso malaperis. Toreadoro: nur toreadoro. Se aliaj estas tiaj, kial li ne estos? Li pensis pri la difektitaj fazeoloj kaj la malmola pano de sia patrino; pri la humiliĝoj, kiujn kostis al li ĉiu nova pantalono; pri la malsato daŭre akompananta lin dum multaj el liaj ekskursoj. Plie, li avide deziris ĉiujn ĝuojn kaj luksojn de la vivo: li rigardis envie la veturilojn kaj ĉevalojn: li haltis mirigite antaŭ la pordojn de la riĉulaj domoj, trans kies kradojn li vidis orientluksajn kortojn kun arkadoj el glazuritaj, diverskoloraj kaheloj, marmoraj plankoj kaj gajaj fontanoj tage kaj nokte disrulantaj sur sian vazon ĉirkaŭitan de verdaj folioj multegon da fluidaj perloj. Lia sorto estis decidita. Mortigi taŭrojn aŭ morti. Esti riĉa kaj ke la gazetoj parolu pri li kaj salutu lin ĉiuj, kvankam tio eble kostos lian vivon. Li malŝatis la malsuperajn gradojn de la toreadora profesio. Li spertis, ke la pikiletistoj riskas sian vivon same, kiel la majstroj, sed nur po tridek duroj ĉiun taŭrfeston kaj, post penplena vivado kaj sufiĉaj kornopikoj, ili alvenas en maljunan aĝon sen plua espero, ekster mizera industrio starigita per siaj ŝparoj aŭ ofico en Buĉejo. Kelkaj mortis en hospitalo: Plejmulto almozpetis al siaj junaj kamaradoj. Neniel pikileti nek dum longaj jaroj subporti la majstran despotecon en toreadora bando. Mortigi de la komenco taŭrojn: iri en cirkan arenon kun spadula rango. Pro la malfeliĉaĵo trafinta kompatindan Maloftaĵon, li ĝuis ian superecon pri siaj kamaradoj kaj kreis bandon; ĉifonvestita bando, kiu

sekvis lin al vilaĝaj mantelludoj. Ili respektis lin, ĉar li estis la plej kuraĝa kaj bonvestita. Kelkaj malĉastulinoj allogite de la vira beleco de Ŝuisteto, jam dekokjara, kaj de lia famo, disputadis sin reciproke per brua konkurado la honoron zorgi lian amindan personon. Krom tio, li havis ian maljunan protektanton; antikva juĝisto korinklina al la beleco de junaj toreadoroj kaj kies amikeco kun Johano indignigis sinjorinon Angustio kaj igis ŝin ekdiri plej malĝentilajn frazojn, kiujn ŝi lernis, kiam estis tabakistino.

Ŝuisteto sin vestis ĉiam per vestaĵoj el angla lano, tre ĝustigitaj al lia nedika korpo, kaj lia ĉapelo estis ĉiam bonega. La amantinoj treege zorgis, pri tio ke lia kolumo kaj brustumo estu nepre blankaj, kaj iajn tagojn li portis sur sia veŝto duoblan, oran ĉenon egalan al tiuj portataj de la sinjorinoj; prunto de lia respektinda amiko, kiu jam ornamis per ĝi la kolon de aliaj "komencantaj knaboj".

Li amike kuniĝis kun la veraj toreadoroj; li invitis trinki la maljunajn pikiletistojn, kiuj rakontis la bravaĵojn de la famaj majstroj. Oni certigis, ke iaj protektantoj helpis lin kaj atendis nur favoran okazon por prezenti lin unuafoje en la Seviljan cirkon, kiel taŭridiston.

Ŝuisteto estis jam matadoro. Iun tagon en *Lebrija*, kiam iris en la placon juna kaj vigla taŭro, liaj kamaradoj instigis lin al tiu ĉefa ludo: "Ĉu vi kuraĝas mortigi ĝin?... Kaj li kuraĝis. Poste, ardigite de la facileco, per kiu faris li ĉi tion, iris al ĉiuj mantelludoj, ĉe kiuj estis mortigota taŭrido, kaj al ĉiuj bienoj, kie oni ludbatalis kaj mortigis bravbestojn.

La mastro de "*Rinconada*", grava bieno havanta malgrandan taŭrcirkon, estis taŭremulo, kiu manĝigis kaj loĝigis en la pajlejon al ĉiuj malsataj ludbatalemuloj, pretaj amuzi lin, ludante liajn bravbestojn. Joĉjo iris tien en tempo de mizero kun aliaj kamaradoj por manĝi senpage, kvankam eble ties kosto estos kelkaj terruliĝoj pro ekpuŝegoj. Ili alvenis piedire post du marŝotagoj kaj la mastro, kiam vidis la polvoplenan trupon kun ĝiaj mantelvolvaĵoj, diris solene:

— Al tiu, kiu estos plej bone lulbatalinta, mi pagos bileton, por ke li revenu fervoje en Seviljon.

Dum du tagoj la biena mastro rigardadis kaj fumadis en la balkono de sia cirko, samtempe ke la knaboj el Seviljo ludbatalis taŭretojn kaj estis multajn fojojn atingitaj kaj hufbatitaj de ili.

— Tio valoras neniom, trompemulo! — li diris malaprobante netaŭgan mantelmovon.

— Stariĝu, malkuraĝulo!... Donu al li vinon por forigi lian ektimon — li ekkriis, kiam knabo ne sufiĉe rapide stariĝis, post kiam la taŭro hufpremis lian korpon.

Ŝuisteto mortigis taŭridojn tiel lerte laŭ la ŝato de la mastro, ke ĉi tiu invitis lin manĝi kun li mem, dum la aliaj kamaradoj restis en la kuirejo kun paŝtistoj

kaj kampolaboristoj, ĉerpante per korna kulero kuirajon el vaporeliganta kaldroneto.

—Vi gajnis la fervojan revenbileton, amiko. Vi atingos famon, se vi restos kuraĝa. Vi estas taŭge lerta.

Ŝuisteto, kiam ekvojaĝis revene al Seviljo en duaklasa vagono, dum lia bando piediris, pensis, ke nova vivo komenciĝis por li, kaj rigardis avide la grandegan bienon, al kiu apartenis tiuj vastaj olivarbaroj, tiuj grenkampoj kaj muelejoj, tiuj senlimaj paŝtejoj, sur kiuj paŝtiĝis miloj da kaproj kaj remaĉis nemove taŭroj kaj bovinoj surkrure kuŝante. Kiom da riĉeco! Se li iam sukcesos posedi ion similan!...

La famo de liaj faroj dum la taŭridaj ludbataloj ĉe la vilaĝoj atingis Seviljon kaj rimarkigis lin al la nekvietaj kaj nesateblaj taŭremuloj ĉiam atendantaj novan taŭrstelon, kiu superos tiujn jam ekzistantajn.

— Ŝajnas, ke li atingos glorsupron—Ili diris, kiam vidis lin preterpasanta en strato Serpentoj per mallongaj paŝoj kaj gracibrava braktakto — Estos necese vidi lin en serioza areno.

Tiu "serioza areno" estis, laŭ ili kaj laŭ Ŝuisteto, la areno de la Sevilja taŭrcirko. La knabo estis preta sin prezenti en ĝin. Lia protektanto aĉetis por li iom uzitan lumveston apartenintan al nefama matadoro. Oni aranĝis taŭridan, filantropicelan taŭrfeston kaj influaj taŭremuloj, kiujn plaĉis ĉiuj novajoj, sukcesis atingi, ke oni metu lian nomon en afiŝon, senpage, laŭ matadora rango.

La filo de sinjorino Angustio malpermesis, ke oni metu en afiŝon lian kromnomon "Ŝuisteto", kiun li deziris forgesigi. Neniel kromnomoj, precipe se ili estas pri neŝatindaj metioj. Li volis esti konata per la nomo de sia patro; li volis esti Johano Gallardo kaj, ke neniu kromnomo sciigu estonte lian devenon al altrangaj personoj, kiuj sendube estos liaj amikoj.

Ĉiuj najbaroj el kvartalo Foiro iris amase en la cirkon kun brua kaj patriota fervoro. Tiuj el Macarena ankaŭ estis interesataj kaj la anoj al ceteraj popolaj kvartaloj estis puŝataj de sama entuziasmo. Nova matadoro el Seviljo!... Ne estis sufiĉaj enirbiletoj por ĉiuj kaj ekstere restis miloj da personoj, atendante avide sciigojn pri la taŭrfesto.

Gallardo ludis, mortigis, estis nevunde renversata de taŭro kaj korpremis ĉiumomente la publikon per siaj kuraĝajoj, kiuj plej ofte sukcesis kaj kaŭzis fortegajn ekmuĝojn pro entuziasmo. Iaj taŭremuloj, respektataj pro siaj trafaj opinioj, ridetis kontente. Ankoraŭ li bezonas multe lerni; sed li volas sukcesi kaj estas kuraĝa; jen plej ĉefa afero.

— Precipe li ja sin ĵetas por mortigi kaj ne intencas trompi.

La belaj amikinoj de la toreadoro agitiĝis ebrie pro entuziasmo, per histeriaj korpomovoj, kun larmemaj okuloj, malseka buŝo kaj dirante tage tutan aron da amaj vortoj, kiujn kutime ili rezervis por la nokto. Iu ĵetis sian ŝalon al la areno;

alia por montri plian entuziasmon aldonis sian korsaĵon kaj ko seton; iu alia eĉ demetis sian jupon, kaj la ĉeestantoj tenis ilin ridante, por ke ne sin ĵetu ili mem al la areno aŭ iĝu nur ĉemizvestitaj.

En alia loko de la cirko, la maljuna juĝisto ridetis kortrafite kaj admiris la kuraĝon de la knabo kaj kiel bele li estis per la lumvesto. Kiam li vidis, ke la taŭro renversis Johanon, li preskaŭ svenis. Tio estis tro terura por li.

Ĉe la unua benkvico, fiere fanfaronis la edzo de Enkarnacio, la fratino de la toreadoro; li estis butikhava ledaĵisto, saĝa homo, malamiko de vaguloj, kiu edziĝis kun la tabakistino, altirate de ŝia beleco, sed kondiĉe ke li neniel rilatos kun ŝia fia frato.

Gallardo, ofendite de tia bofrata sintenado, ne kuraĝis iri en lian butikon, kiu estis ĉe la finiĝo de kvartalo *Macarena,* nek paroli al li je "ci", kiam li malofte renkontis lin en la hejmo de sinjorino Angustio.

— Mi deziras vidi, kiel oni ĵetos oranĝojn kontraŭ vian malhonteman fraton— Li diris al sia edzino, kiam adiaŭis ŝin por iri al la taŭrcirko.

Kaj nun de sia benko li salutis la toreadoron, nomante lin Joĉjo kaj parolante al li je "ci", kaj fiere fanfaronis, kiam la taŭridisto (taŭrida toreadoro), altirite de tiom da krioj, fine vidis lin kaj respondis per spadmovo.

— Li estas mia bofrato — diris la ledaĵisto, por ke la apuda publiko admiru lin —. Mi ĉiam opiniis, ke tiu knabo ege sukcesos en la toreadora profesio. Mia edzino kaj mi multe helpis lin...

Tuj post la taŭrfesta finiĝo, la homamaso sin ĵetis entuziasme al Joĉjo, kvazaŭ ĝi intencus formanĝi lin. Feliĉe, tie estis la ordotrudanta bofrato, kiu ŝirmis lin per sia korpo, lin kondukante ĝis la luveturilo, sur kiun li sidiĝis apud la taŭridiston.

Kiam ili alvenis apud la domaĉon de kvartalo Foiro, iris post la veturilo grandega grupo simila al popola manifestacio, kiu lin aklamadis kaj elirigis la loĝantaron ĉe la pordojn pro siaj krioj. La sciigo pri la sukceso alvenis tien, antaŭ ol la toreadoro, kaj la najbaroj rapidis por vidi lin deproksime kaj premi lian manon.

Sinjorino Angustio kaj ŝia filino estis ĉe la dompordo. La ledaĵisto, preskaŭ brakportante lin, malsuprenirigis sian bofraton; li monopolis kaj ŝirmis lin kontraŭ tuŝoj per krioj kaj mansvingado en la nomo de lia familio, kvazaŭ li estus malsana.

— Jen Enkarnacio — li diris, puŝante lin al sia edzino —. Nek Roger de Flor mem estis pli brava!

Kaj Enkarnacio nenion ja bezonis demandi, ĉar sciis, ke ŝia edzo, kiu estis konfuze leginta antaŭ longe ion pri tiu historia famulo, konsideris lin, kiel kuniĝaĵo el ĉiuj homaj virtoj kaj kapabloj kaj nur kuraĝis lin mencii okaze de miregigaj faroj.

Entuziasmaj najbaroj venintaj de la taŭrfesto, ekkriis laŭdojn al sinjorino Angustio, admirante fervore ŝian dikan ventron.

— Estu benata la patrino, kiu naskis tiel kuraĝan junulon!...

Ŝiaj amikinoj kapturnis ŝin per eldiroj. Kia bonsorto! Kiom da mono ja gajnos via filo!

La malfeliĉa virino montris per siaj okuloj miron kaj dubon. Ĉu estas reale ŝia Joĉjo, kiu kurigas ĉiujn tiel entuziasme? Ĉu ili freneziĝis?

Sed subite ŝi ĵetis sin al li, kiel se malaperus la tuta estinteco; kiel se ŝiaj ĉagrenoj kaj koleretoj estus sonĝo; kiel se ŝi konfesus hontigan eraron. Ŝiaj grandegaj kaj malstreĉitaj brakoj ĉirkaŭprenis la kolon de la toreadoro, kaj larmoj malsekigis liajn vangojn.

— Mia filo! Joĉjo!... Se vidus vin... via malfeliĉa patro!

Ne ploru patrino..., ĉar hodiaŭ estas gaja tago. Se Dio liveros al mi bonan sorton, mi al vi havigos propran domon, kaj viaj amikinoj vidos vin promenanta en veturilo, kaj vi vestiĝos per mirige belaj ŝaltukoj el Manilo.

La ledaĵisto akceptis ĉi tiujn intencojn je supera vivmaniero per jesaj gestoj antaŭ sia edzino ankoraŭ miranta pro tiel radikala ŝanĝo. Jes, Enkarnacio, ĉion faros ĉi tiu knabo, se li nur deziros... Li estas eksterordinara. Nek Roger de Flor mem.

Vespere en la trinkejoj de la popolaj kvartaloj kaj kafejoj oni nur parolis pri Gallardo.

— La estonta toreadorreĝo. Li plene sukcesis... Tiu knabo humiligos ĉiujn toreadorojn el Kordobo.

Per ĉi tiu aserto montriĝis fiero de la seviljanoj, kiuj estis en senĉesa konkurado kontraŭ la kordobanoj; gento ankaŭ produktanta bonajn toreadorojn.

La vivmaniero de Gallardo tute ŝanĝiĝis de ĉi tiu tago. La junaj sinjoroj salutis kaj sidigis lin apud ilin ĉe la kafejaj pordoj. La belulinoj, kiuj antaŭe malriĉe liveris al li manĝaĵojn kaj zorgis pri lia ornamo, estis iom post iom forigataj per ĝentila malŝatado. Eĉ la maljuna protektanto iĝis for saĝe, sekve de iaj malemoj, kaj direktis sian mildan amikecon al aliaj komencantaj knaboj.

La taŭrcirkaj impresarioj serĉis Gallard'on kaj dorlotis lin, ĉar li jam estis famulo. Kiam lia nomo estis en afiŝoj, sukceso fariĝis nepra: la ludbatalejo pleniĝis. La popolamaso entuziasme aplaŭdis la "filon de sinjorino Angustio", laŭdegante lian kuraĝon. La famo de Gallardo flugis tra Andaluzio, kaj la ledaĵisto, kvankam neniu al li petis helpon, okupiĝis pri ĉio, donante al si mem la postenon de defendanto je la bofrataj interesoj.

Li, homo saĝa kaj tre lerta por la negocoj, laŭ sia propra opinio, ekvidis klare sian agadvojon en estonto, de tiam por ĉiam.

— Via frato — li diris al sia edzino, kiam ili nokte enlitiĝis — bezonas praktikan homon por zorgi liajn monaferojn. Ĉu vi opinias, ke al li malutilus igi min

sia kontraktfaristo? Por li bonega afero. Nek Roger de Flor mem! Kaj por ni...

La ledaĵisto imagis la grandan kvanton da mono gajnotan de Gallardo kaj ankaŭ pensis pri la kvin filoj, kiujn li jam havis krom tiuj certe venontaj, ĉar li estis nelaceble fidela kaj naskema edzo. Eble tio, kion gajnos la spadulo, fine estos por liaj nevoj!...

Dum unu kaj duono jaroj, Johano mortigis taŭridojn en plej bonaj, hispanaj cirkoj. Lia famo atingis Madridon. La ĉefurbaj taŭremuloj deziris koni la "Andaluzian knabon", pri kiu tiel multe temis la gazetoj kaj kiun laŭdegis la spertuloj el Andaluzio.

Gallardo, eskortate de grupo de amikoj el sia regiono en Madrido, paradis sur la trotuaro de la strato Seviljo apud la Angla Kafejo. La belulinoj ridetis, kiam li diris al ili bellaŭdojn pri ilia beleco, kaj rigardis la dikan, oran ĉenon de la toreadoro kaj liajn grandajn diamantojn; luksaĵoj aĉetitaj per la unuaj gajnoj kaj la kredito por tiuj venontaj. Matadoro devas montri per sia persona ornamo kaj per malavara trinkinvito je ĉiuj, ke li multe gajnas. Kiel malproksima estis la tempo, kiam li kun kompatinda Maloftaĵo vagadis tra tiu sama trotuaro, timante la policistojn, rigardante admire la toreadorojn kaj prenante de la pavimo la cigarrestaĵojn!...

La laboro en Madrido estis sukcesplena. Li amikiĝis kun multaj personoj kaj naskiĝis ĉirkaŭ lin grupo da entuziasmuloj dezirantaj ion novan, kiuj ankaŭ proklamis lin la "estonta toreadorreĝo" kaj protestis, tial ke ankoraŭ li ne ricevis la profesian permeson.

— Milope li gajnos monon, Enkarnacio — diris lia bofrato —. Li estos milionulo, se nur lin ne trafos malfeliĉaĵo.

La familia vivmaniero tute ŝanĝiĝis. Gallardo, kiu amike rilatis kun la junaj sinjoroj de Seviljo, ne volis, ke lia patrino loĝu plu en la domaĉo de sia tempo de mizero. Laŭ lia gusto ili estus transloĝiĝintaj en plej bonan straton de la urbo; sed sinjorino Angustio volis resti fidela al kvartalo Foiro pro tiu amo, kiun la simpluloj sentas, kiam maljuniĝas, al la lokoj, kie ili vivadis dum sia junaĝo.

Ili loĝiĝis en hejmon multe pli bonan. La patrino jam ne bezonis labori kaj ŝiaj najbarinoj dorloteme ŝin vizitadis, ĉar ili opiniis ŝin malavara pruntistino, por kiam la mono mankos. Johano krom la pezaj kaj trovideblaj juveloj, per kiuj li ornamis sin, posedis plej superan, toreadoran luksaĵon; t. e.: orruĝan, tre vigle fortan ĉevalon kun bovinista selo, de kies antaŭaĵo pendis ambaŭflanken lankovrilo borderita per multekolora kvastaro. Trote li rajdis sur ĝi tra la stratoj nur por ricevi ovaciojn de la amikoj, kiuj salutis lin per bruaj "hura"! Ĉi tio kontentigis momente liajn dezirojn je populareco. Aliajn fojojn, la antaŭtagon de festo li rajdis kun junaj sinjoroj en brila grupo al paŝtejo *Tablada*, por vidi la taŭraron, kiun aliaj estis mortigontaj.

— Kiam mi ricevos la profesian permeson... — li diris ĉiumomente, dependigante de ĝi ĉiujn siajn planojn por la estonto.

Ĝis tiam li prokrastis serion da projektoj, per kiuj intencis surprizi sian patrinon; simpla virino timigata de tiu granda bono irinta subite al ili, kiun ŝi kredis neeble pligrandigi.

Fine alvenis tago, kiam li ricevis la profesian permeson: kiam oni atestis oficiale lian taŭgecon por mortigi taŭrojn.

Fama majstro donis al li ceremonie spadon kaj ruĝtukon meze de la areno de la Sevilja cirko kaj la homamaso freneziĝis pro entuziasmo, kiam li per nur unu spadpiko faligis la unuan formalan taŭron, kiu sin metis antaŭ lin. Post unu monato ĉi tiu toreadora doktoreco estis konfirmata en la Madrida taŭrcirko, kie alia samfama majstro redonis al li la profesian permeson en taŭrfesto per Miur'aj taŭroj.

Li jam ne estis taŭridisto; li estis matadoro kaj lia nomo montriĝis en la afiŝoj apud tiuj de malnovaj spaduloj, kiujn li admiris kvazaŭ neatingeblajn diojn, kiam iris en la vilaĝojn por partopreni la mantelludojn. Li memoris, ke iafoje atendis iun el ili en stacio proksima al Kordobo, por peti al li monhelpon, kiam li pasis en vagonaro kun sia bando. Ĉi tiun tagon Gallardo povis vespermanĝi dank'al helpema frateco, kiu ekzistas ĉe la vostetuloj (toreadoroj) kaj puŝas princluksan spadulon doni unu duron kaj cigaredon al ĉifonvestita bubo ekmantelludanta.

Pluvo da kontraktopetoj komencis fali sur la novan spadulon. En ĉiuj hispanaj ludbatalejoj oni deziris scivole vidi lin. La profesiaj gazetoj popularigis lian portreton kaj vivadon, spicante ĉi tiun per romanaj rakontoj pli-malpli neveraj. Neniu matadoro ludbataladis tiel multe, kiel li. Li ja estas gajnonta multe da mono.

Antono, lia bofrato, akceptis ĉi tiun sukcesadon per malkontenta mieno kaj grumblis antaŭ sia edzino kaj bopatrino.

La spadulo estis ja, laŭ lia diro, nedankema, kiel ĉiuj rapide supreniĝintaj. Tiom multe, kiom li klopodis por Johano! Tiel malcede, kiel li diskutadis la monkondiĉojn kun la impresarioj, kiam li kontraktis liajn taŭridajn ludbatalojn!... Kaj nun, estante jam majstro, li konfidas la kontraktfaristan postenon al sinjoro, kiun konis antaŭnelonge; al Don Josefo, kiu eĉ ne estas el lia familio, kaj kiun Gallardo tre multe estimas pro lia antikva taŭremeco.

— Iam li pentos — finis la bofrato —. Familio estas nur unu. Kiuj laborados por li tiel sindoneme, kiel liaj familianoj? Li ja tion perdas. Kun mi li certe prosperus, kiel...

Kaj li interrompis sian diron kaj ne nomis la famulon de li tiel ŝatatan, timante la mokojn de pikiletistoj kaj taŭremuloj, kiuj ofte iris en la spadulan hejmon kaj fine rimarkis ĉi tiun historian preferon de la ledaĵisto.

Gallardo bonkore, kiel triumfanto kontentigis sian bofraton, komisiante lin, por

ke li zorgu la konstruon je domo starigata de la matadoro. Li rajtis laŭvole elspezi. La spadulo nekonscie pro la facileco, per kiu la mono fluis al li, deziris, ke la bofrato ŝtelu lin, por tiamaniere kompenci tion, ke li ne volis komisii lin por kontrakti.

La toreadoro intencis realigi siajn dezirojn, starigante domon por sia patrino. Li volis, ke la malfeliĉulino, kiu dum sia tuta vivado tiom da plankoj de riĉulaj hejmoj lavis, ankaŭ posedu korton kun marmora planko kaj soklo el glazuritaj kaheloj ĉiukoloraj, ĉambrojn kun mebloj, kiel tiuj de altranguloj, kaj servistinojn, multe da servistinoj, por ke ili servu ŝin. Ankaŭ li sentis sin ligita per tradicia amo al la kvartalo, kie li vivadis dum sia mizera infanaĝo. Lin plaĉis blindigi per sia lukso tiujn dungintajn lian patrinon kiel servistinon kaj doni manplenon da pesetoj en momentoj de monmanko al tiuj, kiuj sendis ŝuojn al lia patro aŭ donis al li panpecon en liaj penplenaj tagoj. Li aĉetis kelkajn malnovajn domojn, iu el kiu estis tiu sama, kie la ŝuisto laboris, malaperigis ilin kaj komencis starigi konstruaĵon kun blankaj muroj, verdaj kradoj, halo tegita de glazuritaj kolorkaheloj kaj krada, fera pordo dense kaj bele laborita, tra kiu oni vidis la korton kun ĝia mezfontano kaj ĝiaj marmoraj kolonoj, inter kiuj pendis kaĝoj kun gajigaj birdoj.

La ĝojo de lia bofrato Antono, ĉar li rajtis libere regi kaj profiti la domkonstruon, malgrandiĝis multe pro terura sciiĝo.

Gallardo fianĉiĝis. Nun, somermeze li iris de cirko en cirkon tra Hispanlando, mortigante taŭrojn kaj ricevante ovaciojn; sed preskaŭ ĉiujn tagojn, li sendis leteron al knabino el sia kvartalo kaj dum la maloftaj libertagoj inter du taŭrfestoj, li forlasis siajn kamaradojn kaj vojaĝis en Seviljon, por ame konversacii kun ŝi dum la tuta nokto tra ŝia fenestra krado.

— Kion vi opinias? — ekkriis indignante la ledaĵisto en tio, kion li nomis "hejma kerno"; t. e.: antaŭ sia edzino kaj sia bopatrino —. Fianĉino kaj li diris pri tio nek eĉ unu vorton al sia familio, kiu estas la nura, vera afero en la mondo! La sinjoro volas edziĝi, ĉar li enuas kun ni... Kia malhontulo!

Enkarnacio aprobis ĉi tiujn dirojn per energiaj, konsentaj grimacoj de sia brave bela vizaĝo, kontente profitante okazon por opinii kontraŭ tiu frato, vekinta en ŝin iom da envio pro lia bonsorto. Jes, li ĉiam estis malhontulo.

Sed la patrino protestis.

— Ne, mi konas la knabinon kaj ŝia malfeliĉa patrino estis iu el miaj kamaradinoj en la tabaklaborejo. Ŝi estas puremega, saĝa, bonkora kaj bela... Mi jam diris al Johano, ke mi tion aprobas... kaj ke, ju pli frue li edziĝos, des pli bone.

Ŝi estis orfino kaj loĝis kun geonkloj posedantaj en la kvartalo manĝaĵbutiketon. Ŝia patro, antikva brandkomercisto, lasis al ŝi du domojn ĉe la finiĝo de la kvartalo *Macarena*.

— Tio estas ja malmulte — diris sinjorino Angustio —. Sed la knabino ion

posedas... Kaj pri vestaĵoj... Mia Dio! Kiel belege kaj lerte ŝi brodas; kiel bone faras sian edziniĝan vestaron...

Gallardo neklare memoris, kiel li en sia infanaĝo ludis kun ŝi apud la domenirejo, kie laboris lia patro, dum babilis ambaŭ patrinoj. Ŝi estis kvazaŭ maldika kaj malhela lacerteto kun ciganaj okuloj, nigraj pupiloj kiel inkogutoj, lazurblankaj korneoj kaj pale rozkoloraj larmotruoj. Kiam ŝi kuris malpeze, kiel knabo, ŝi montris siajn krurojn, kvazaŭ kanoj, kaj la hararo formis sur ŝia kapo ribelemajn tufojn laŭ spiraloj, kiel se ili estus nigraj serpentoj. Poste li ne vidis ŝin dum multaj jaroj, ĝis kiam li jam estis taŭridisto kaj lia nomo ekestis konata.

Tio okazis en Dikorpa (32) tago; iu el malmultaj festoj, kiam la andaluziaj virinoj, kutime hejme pro araba morrestaĵo, eliras straten, kiel liberigitaj maŭrinoj, ornamite per bela mantilo kaj diantoj sur sia brusto. Gallardo vidis altan, gracian kaj samtempe masivan junulinon kun bele vivplena figuro. Ŝia pala vizaĝo ruĝiĝis, kiam ŝi vidis la toreadoron, kaj ŝiaj grandaj, brilaj okuloj kaŝiĝis post longaj okulharoj.

— Ĉi tiu virino konas min — pensis Gallardo malmodeste —. Ŝi certe vidis min en la taŭra cirko.

Kaj, post kiam li sekvis ŝin kaj ŝian onklinon, sciiĝis, pri tio ke ŝi estas Karmeno, lia kamaradino dum infanaĝo; li miregis pro tia eksterordinara aliformiĝo de la nigra lacerteto de la pasinta tempo.

Ili gefianĉiĝis kaj ĉiuj najbaroj paroladis pri tiu amo, opiniante, ke tio estas nova, kontentiga afero por la kvartalanoj.

— Mi estas tiel — diris Gallardo al siaj entuziasmuloj per mieno de bona princo —. Mi ne volas imiti aliajn toreadorojn, kiuj edziĝas kun altrangaj fraŭlinoj nur pensantaj pri ĉapoj, plumoj kaj vantaĵoj. Min plaĉas iu el mia sociala klaso: riĉa, bela ŝaltuko; gracie paŝi; gajeco... Hura al ŝi!

Liaj amikoj entuziasme parolis laŭde pri la knabino. Belega virino kun multaj korpaj allogaĵoj kaj amekscitanta brusto... Sed la toreadora mieno fariĝis ĉe tio severa. Babilu malmulte... Ju pli malmulte oni parolos pri Karmeno, des pli bone.

Nokte, kiam li konversaciis kun ŝi tra la fenestra krado, rigardante ŝian araban vizaĝon borderatan de foliaro kaj floroj, iris al ili servisto de la proksima trinkejo, portante grandan pleton kun glasoj da vino "*manzanilla*". Li estis la "delegito", alveninta por "lui la lokon"; tradicia Sevilja moro por la gefianĉoj, kiuj interparolas tra fenestra krado.

La toreadoro trinkis unu glason, donis alian al sia fianĉino kaj diris al la knabo:

— Diru al tiuj sinjoroj, ke mi multe dankas kaj ke mi iros en la butikon tuj, kiam mi finos... Ankaŭ diru al via mastro, ke li enspezu nenion, ĉar Johano Gallardo pagos ĉion.

Kaj, tuj post kiam li finis paroli kun sia fianĉino, li iris en la trinkejon, kie

la invitintoj atendis lin; fojojn ili estis entuziasmaj amikoj, aliajn nekonatuloj dezirantaj trinki kun la toreadoro.

Kiam li revenis post sia unua ekskurso kiel kontraktita matadoro, li pasigis la vintrajn noktojn apud la krado de Karmeno, ŝirmite per gracie larĝa kaj mallonga mantelo sur lin volvita, el verde nigra drapo kun broditaj ornamaĵoj el nigra silko.

— Oni diris al mi, ke vi multe trinkas — murmuris Karmeno metante sian vizaĝon apud la feraron.

— Malsaĝaĵoj! Tio estas nur amikaj invitoj, kiujn poste laŭ la moro mi faras miavice kaj nenio plu. Komprenu, toreadoro estas toreadoro kaj li ne povas vivadi, kiel monaĥo.

— Oni diris al mi, ke vi iras kun malvirtulinoj.

— Kia mensogaĵo!... Tio okazis antaŭe, kiam mi ne konis vin... Nu! Malbenaĵo! Mi dezirus koni la malnoblulon, kiu fibabilis al vi ĉion ĉi...

— Kaj, kiam ni geedziĝos? — daŭrigis ŝi, tranĉante per ĉi tiu demando la indignon de la fianĉo.

— Tuj post kiam la domo estos finata, kaj, ke tio okazu morgaŭ mem, ja mi deziras! Mia sentaŭga bofrato finas neniam. Ŝajne li profitas la aferon kaj ne deziras rapidi.

— Mi ordigos ĉion, Joĉjo, kiam ni geedziĝos. Vi spertos, kiel bone iros ĉio. Vi vidos, kiel amos min via patrino.

Kaj tiel ili daŭrigis siajn interparoladojn, atendante la momenton de tiu geedziĝo, pri kiu oni parolis ĉie en Seviljo. La geonkloj de Karmeno kaj sinjorino Angustio parolis pri la afero ĉiufoje, kiam ili renkontis sin reciproke; sed malgraŭ tio la toreadoro apenaŭ iris en la fianĉinan hejmon, kvazaŭ tio estus malpermesita al li. Ili preferis laŭ la moro interparoli tra la fenestra krado (33).

La vintro pasis, Gallardo rajdis kaj ĉasis en ĉasejoj de kelkaj sinjoroj protekteme parolantaj al li je "ci". Estas necese konservi la korpan viglecon per senĉesa ekzercado, por kiam alvenos la ludbatala sezono. Li timis perdi siajn kapablojn pri forto kaj vigleco.

Kiu plej arde propagandis lian famon estis Don Josefo; sinjoro, kiu plenumis la taskon de kontraktfaristo kaj ĉiam nomis lin "sia matadoro". Li okupiĝis pri ĉio rilatanta Gallard'on kaj sin opiniis por tio pli rajta, ol liaj familianoj mem. Li vivadis per siaj rentoj sen iu ajn alia priokupiĝo ekster senĉesa parolado pri taŭroj kaj toreadoroj. Por li ludbatalado estis la nura interesa afero en la mondo kaj li dividis la popolojn laŭ du kastoj: tiu de la elektitoj, kiuj havas taŭrcirkojn, kaj la amaso de malgajaj nacioj, en kiuj estas nek suno, nek gajeco, nek bona "*manzanilla*", malgraŭ kio ili opinias sin potencaj kaj feliĉaj, vidinte nek eĉ malgravan, taŭridan ludbatalaĉon.

Li metis ĉe sian taŭremecon militistan energion kaj inkvizitoran kredon. Ĉi tiu

dika, ankoraŭ juna, kalva kaj blondbarba homo paca, gaja kaj ŝercema dum la ordinara vivado estis sovaĝa kaj maltolerema en cirka benkaro, kiam la najbaroj montris opiniojn diferencajn de tiu lia. Li sentiĝis kapabla batali kontraŭ la tuta publiko por defendi amikan toreadoron kaj kontraŭstaris la ovaciojn per akraj, neatenditaj protestoj, kiam ili estis por toreadoro, kiun li ne ŝatis.

Li estis kavaleria oficiro pli multe pro emo al la ĉevaloj, ol al la milito. Lia grasiĝo kaj entuziasmo por ludbataloj forlasigis al li la servon; dum somero li ne ĉesis vidi taŭrfestojn kaj vintre ne ĉesis paroli pri ili... Esti gvidanto, konsilanto, kontraktfaristo de spadulo! Jen lia deziro. Kiam li sentis ĝin ĉiu majstro jam havis tiun sian kaj estis por li granda feliĉo la apero de Gallardo. La plej malgranda dubo pri la meritoj de tiu ĉi ruĝigis lin pro kolero kaj la ludbatala disputo iĝis fine persona malpaco. Li rakontadis, kiel gloran militfaron, ke li bastonbatalis en kafejo kontraŭ du taŭremulaĉoj, kiuj mallaŭdis lian matadoron, ĉar ĉi tiu estis tro bela.

Li opiniis nesufiĉa la gazetaron por propagandi la gloron de Gallardo kaj en la vintraj matenoj li sin metis apud sunan stratangulon ĉe la enirejo de strato Serpentoj, tra kie pasis liaj amikoj.

— Nu, nur estas unu bravulo! — li diris laŭte, kiel se li parolus kun si mem, ŝajne ne vidante tiujn, kiuj alproksimiĝis —. La plej brava homo el la mondo! Kaj ĉiu opinianta kontraŭe parolu... La nura!

— Kiu? — demandis mokeme la amikoj kun ŝajna nekompreno.

— Kiu alia povus esti?... Johano.

— Kiu Johano?...

Lia mieno fariĝis indigna kaj mira.

— Kia demando!... Kvazaŭ estus tiom multe da Johanoj!... Johano Gallardo.

— Nu! — diris ili al li ŝerceme —. Vi parolas, kvazaŭ eĉ dormus kun li!... Ĉu estas vi, kiu edziniĝos kun li?

— Ne; ĉar li certe ne volos — respondis nehezite Don Josefo per idolana fervoro.

Kaj vidante, ke aliaj amikoj alproksimiĝis, li malatentis la mokemulojn kaj ripetis:

— Nu, nur estas unu bravulo... La plej brava el la mondo. Kaj ĉiu opinianta alie parolu..., ĉar mi respondos!

La edziĝo de Gallardo estis grava okazaĵo. Samtempe oni solene komencis loĝadon en la nova domo, pri kiu fieris la ledaĵisto, kiu montris ĝian korton, ĝiajn kolonojn kaj kahelojn kun multe da belaj glazurkoloroj, kiel se ĉio estus farita per liaj propraj manoj.

Ili geedziĝis en preĝejo Sankta Ĝilo antaŭ la altaro de Virgulino Espero, nomata *Macarena*. Kiam ili eliris el la preĝejo, brilis sub la suno la fremdaj floroj kaj diverskoloraj birdoj broditaj en la ŝaltukoj de Manilo, kiujn portis sur sin,

gracie envolvite per ili, la amikinoj de la fianĉino. Nacia deputito estis la geedziĝa patro. El la blankaj kaj nigraj feltĉapeloj de la plimulto el la invititoj montriĝis la brilaj, tuboformaj ĉapeloj de Don Josefo kaj aliaj sinjoroj, entuziasmaj Gallard'anoj. Ĉiuj ridetis kontentaj pro la populareco, kiun atingis irante kun la toreadoro.

Ĉe la dompordo oni disdonis dum ĉi tiu tago almozojn. La almozuloj alvenis eĉ de vilaĝoj, altirite de la famo de ĉi tiu bruega geedziĝo.

En la korto estis festeno. Kelkaj fotografistoj impresigis plakojn por Madridaj gazetoj. La edziĝo de Gallardo estis ja nacia okazaĵo. Ĝis tre malfrua nokto la gitaroj sonadis melankolie, ritme akompanate de manplaŭdado kaj rapida frapado per stangetoj. La knabinoj dancadis kun levitaj brakoj, ritme frapante la marmoran plankon per siaj piedetoj, dum iliaj jupoj kaj ŝaltukoj volviĝis kaj malvolviĝis ĉirkaŭ iliaj graciaj korpoj, laŭ turnoj kaj movoj de la Sevilja danco. Oni malkorkis multajn dekduojn de ĉarmaj, andaluziaj vinboteloj: iris de mano al mano glasoj kun ardiga Ĵereza vino, kun brava *Montilla* kaj pala kaj bonodora "*manzanilla*" el *Sanlucar*. Ĉiuj estis ebriaj; sed ilia ebrieco estis dolĉa, kvieta kaj melankolia kaj ĝi nur montriĝis per sopiroj kaj kantatoj; ofte kelkaj samtempe ekkomencis malgaje kanti pri malliberejoj, mortoj aŭ la malfeliĉa patrino: ĉiama muzo inspiranta ĉiujn kantatojn en Andaluzio.

Noktomeze foriris la lastaj invititoj kaj la freŝaj geedzoj restis en sia hejmo kun sinjorino Angustio. La ledaĵisto, kiam eliris kun sia edzino, montriĝis kolera. Li estis ebria kaj furioza, tial ke neniu atentis pri li dum la tuta tago. Kvazaŭ li estus neniu! Kvazaŭ ne ekzistus la familio!

— Oni forpelas nin, Enkarnacio. Tiu knabino malgraŭ sia vizaĝo simila al tiu de Virgulino Espero estos ja mastrino de ĉio kaj nenio restos por ni. Por plia malutilo ili certe naskos multenombran gefilaron.

Kaj tiu naskema viro indignis, pensante pri la estonta, spadula idaro, kiu laŭ lia opinio venos en la mondon nur por malhelpi tiun lian.

La tempo pasis: post unu jaro ankoraŭ ne efektiviĝis la antaŭdiroj de sinjoro Antono. Gallardo kaj lia edzino montriĝis en ĉiuj festoj brile kaj malŝpareme, kiel riĉa kaj populara geedza paro: ŝi, kun ŝaltukoj ekkriigantaj pro miro la virinojn; li, kun siaj briliantoj kaj estante preta elpoŝigi la monujon por inviti ĉiujn kaj helpi almozulojn, kiuj iris al li amase. Ciganinoj brunegaj kaj babilemaj, kiel sorĉistinoj, insisteme venis al Karmeno por antaŭdiri al ŝi kontentigajn okazontaĵojn. — Dio benu vin! Vi naskos belegan fileton. Oni konas ĉi tion per via rigardado. Jam la ido estas formiĝanta...

Sed, malgraŭ tio ke ŝiaj vangoj ruĝiĝis pro ĝojo kaj konfuziĝo, ŝiaj okuloj malleviĝis kaj la spadulo fiere pozis, atendante la alvenon de tiu esperita filo, la ido ne prezentiĝis.

Tiel pasis alia jaro kaj la espero de la geedzoj ne estis ankaŭ plenumata. Sin-

jorino Angustio malgajiĝis, kiam oni parolis al ŝi pri ĉi tiu ĉagreno. Ŝi havis aliajn nepojn, la filojn de Enkarnacio, kiuj pro ledaĵista instruo ĉiam estis en la avina hejmo kaj zorgis plaĉi lian onklan moŝton. Sed ŝi, kiu volis kompensi la pasintan malkonsenton kun Johano per fervora nuna amo al li, deziris filon de ĉi tiu por ĝin eduki laŭ sia plaĉo kaj por ĝin milde ami, kiel ŝi ne povis ami dum lia mizera infanaĝo sian propran filon.

— Mi jam scias, kial tio okazas — diris malgaje la maljunulino —. Malfeliĉa Karmeno ne vivadas trankvile. Ŝi multe suferas, kiam Johano iras tra la mondo.

Dum vintro, dum la libertempo, kiam la toreadoro restis hejme aŭ iris eksterurben por provi taŭridetojn aŭ ĉasi, ĉio glitis bone. Karmeno montriĝis kontenta, ĉar ŝi sciis, ke neniu danĝero minacis ŝian edzon. Ŝi ridis per iu ajn preteksto: ŝi manĝis apetite: ŝia vizaĝo viviĝis per sana koloro. Sed, tuj post kiam printempo alvenis kaj Johano iris eksterhejmen por ludbatali en la taŭrcirkoj de Hispanlando, la kompatinda knabino fariĝis dolore priokupata, pala kaj malfortika, kun okuloj pligrandigitaj pro timo kaj estis preta plori pro la plej malgranda aludo.

— Sepdek du taŭrfestojn li partoprenos ĉi tiun jaron — diris la amikoj, parolante pri la kontraktoj de la spadulo —. Neniu estas tiel multe ŝatata, kiel li.

Kaj Karmeno ridetis per dolora grimaco. Sepdek du korpremantaj tagoj, kvazaŭ por ekzekutota kondamnito en kapelo (34), dum kiuj ŝi deziregis kaj timis samtempe la alvenon de la telegramo. Sepdek du teruraj tagoj plenaj je neklaraj superstiĉoj, ĉe kiuj ŝi pensis, ĉu vorto forgesita el preĝo influos malfavore la sorton de la forestanto. Sepdek du dolore strangaj tagoj; ĉar, dum ŝi loĝis en kvieta hejmo, vidis samajn personojn, dolĉe kaj trankvile kiel kutime vivantaj, kvazaŭ en la mondo okazus nenio eksterordinara, dum ŝi aŭdis, kiel ludadas en la korto la nevoj de ŝia edzo, kaj la stratan kantanoncon de la florvendisto, dume, malproksime, tre malproksime, en nekonataj urboj ŝia Johano antaŭ miloj da rigardoj batalis kontraŭ bravbestoj, konsciante ke la morto preterpasas apud lia brusto ĉe ĉiu movo de la ruĝa tuko, kiun li portas mane.

Ve, ĉi tiujn tagojn de ludbataloj; festaj tagoj, ĉe kiuj la ĉielo ŝajnis pli bela, la senhoma strato eksonis pro paŝado de trairantaj dimanĉuloj, kaj la gitaroj zumadis, akompanate de kantatoj kaj manplaŭdado en la stratangula trinkejo!... Karmeno, malriĉe vestite, kun mantilo sur siaj okuloj eliris straten, kiel se ŝi volis forkuri el malplaĉaj sonĝoj, kaj rifuĝis en preĝejon. Ŝia simpla kredo, kiun necerteco igis superstiĉa, kondukis ŝin de altaro al altaro, memorigante al ŝi la povojn kaj miraklojn de ĉiu sankta bildo. Ŝi iris en Sanktan Ĝilon, la populara preĝejo, kie okazis ŝia plej granda feliĉaĵo, genuis antaŭ *Macarena'n* Virgulinon, ekbruligis al ŝi kandelojn, multe da kandeloj, kaj rigardadis ŝian ruĝete lumigatan de ili, brunan vizaĝon nigrokulan kaj je longaj okulharoj, kiu laŭdire estis simila al tiu ŝia. Ŝi konfidis al ŝi. Por io ĉi tiu estas Madono de la Espero. Ŝi certe en tiuj momentoj helpas Johanon per sia dia povo.

Sed subite timo kaj dubo aperis malgraŭ ŝia kredo. Sankta Madono estis ja virino kaj virinoj tiel malmulte povas!... Ilia sorto konsistas suferi kaj plori, kiel ŝi ploras pro sia edzo, kiel Sankta Virgulino ploris pro sia filo. Ŝi devas fidi al pli efikaj potenculoj; ŝi devas petegi helpon al pli energia povo. Kaj senskrupule, forlasante *Macarena'n* pro doloregoismo, kiel oni forgesas neutilan amikon, ŝi iris en preĝejon Sankta Lorenzo por trovi Nian Patron Jesuo Grandpotenca; homo-dio kronita per dornoj kaj portanta krucon sur sia dorso; skulptita bildo de Montañes, kiu ja ŝajnas ŝviti kaj larmoverŝi terure reale.

La drame malgaja bildo de la Nazaretano (35) duonfalanta pro vojaj malebenaĵoj kaj troŝarĝita per pezega kruco ŝajnis konsoli la kompatindan edzinon. Grandpotenca Jesuo!... Tiu nepreciza kaj grandioza nomo trankviligis ŝin. Tiu dio vestita per violruĝa veluro kaj oro volu akcepti ŝiajn sopirojn, ŝiajn preĝojn rapidege diratajn kaj mulfoje ripetatajn, por ke estu kiel eble plej granda amaso de vortoj en sama tempo, kaj certe Johano eliros nevundite el la areno, en kiu li estas ĉitiumomente. Kaj alifoje ŝi donis monon al sakristia knabo; kaj ĉi tiu ekbruligis kandelojn; kaj ŝi restis tie dum tutaj horoj, rigardante la glazuritan vizaĝon ruĝete lumigatan de tiuj ŝanceliĝantaj lumoj, pro kio ŝajnis al ŝi sur la dian vizaĝon vidi konsolajn ridetojn kaj grimacojn plene bonfaremajn, kiuj promesis al ŝi feliĉon.

Grandpotenca Jesuo ne trompis ŝin: kiam ŝi revenis hejmen, alvenis telegramo, kiun ŝi malfaldis per tremanta mano "Nenio malbona". Ŝi povis spiri, povis dormi kiel ekzekutoto, kies tujan mortigon oni prokrastas; sed post du aŭ tri tagoj, alifoje la turmentanta necerteco, la terura, suferiga dubo pri tio nekonata.

Karmeno, malgraŭ tio ke ŝi amis sian edzon, kelkefoje ribelis. Se ŝi estus sciinta, antaŭ kiam edziniĝis, kiel estas ĉi tiu ekzistado!... Ĉe iaj momentoj, puŝite de frateco, kiun estigas sufero, ŝi iris serĉi la edzinojn de toreadoroj apartenantaj al la ludbatala bando de Johano, kvazaŭ ili povus sciigi ion al ŝi.

La edzino de Naciao, mastrino de trinkejo en la sama kvartalo, akceptis la majstran edzinon trankvile kaj miris pro ŝiaj timoj. Ŝi jam kutimiĝis al tia ekzistado. Ŝia edzo certe bonfartas, ĉar li estas sendinta neniun sciigon. La telegramoj kostas multe kaj pikiletisto gajnas malmulte. Kiam la gazetvendistoj anoncas neniun malfeliĉaĵon, tio estas, ĉar nenio malbona okazis; kaj ŝi alifoje atentis la servon je la butiko, kiel se maltrankvilo ne povis efiki ŝian malviglan sentkapablon.

Aliajn fojojn iris Karmeno trans la ponton, en kvartalon *Triana*, por serĉi la edzinon de Kuiraĵo, la pikrajdisto; cigansimila virino loĝanta en domaĉo kvazaŭ kokkorto, kie ŝi estis ĉirkaŭata de malpuraj kaj kuprokoloraj idoj, kiujn regis kaj timigis per fortegaj krioj. La vizito de la majstra edzino fierigis ŝin; sed ŝiaj timoj preskaŭ ŝin ridigis. Karmeno ne pravas, timi ion. La piedirantaj toreadoroj ĉiam sin savas el la taŭro kaj sinjoro Johano Gallardo estas ja tre lerta por libe-

riĝi de tiaj bravbestoj. La taŭroj mortigas malmulte da personoj. Teruraj estas nur la ĉevalfaloj. Oni scias la finiĝon de ĉiuj pikrajdistoj post vivado kun teruraj falbategoj: kiu ne mortas subite pro nekonata kaj fulma akcidento, finas sian vivon en frenezulejo. Tiel mortos certe kompatinda Kuiraĵo. Kaj tiom da penegoj por manpreno da duroj, dum aliaj...

Tion ĉi lastan ŝi ne diris; sed ŝiaj okuloj protestis kontraŭ la maljustaĵoj de la sorto, kontraŭ tiuj belfortuloj, ricevantaj, tial ke ili estas spaduloj, aplaŭdojn, popularecon kaj monon sen pliaj riskoj, ol iliaj subuloj.

Iom post iom Karmeno kutimiĝis al sia nova ekzistado. La kruelajn atendojn en ludbatalaj tagoj, la viziton al la sanktuloj, la superstiĉajn necertaĵojn, ĉion ŝi akceptis, kiel necesajn aferojn de ŝia vivado. Krom tio la bona sorto de ŝia edzo kaj senĉesa hejma konversacio pri ludbatalaĵoj fine familiarigis ŝin al la danĝero. La taŭro estis laŭ ŝia konscio nobla kaj bonkora bravbesto naskita nur por riĉigi kaj famigi siajn mortigistojn.

Neniam ŝi ĉeestis taŭran ludbatalon. De la tago, kiam ŝi vidis dum lia unua taŭridfesto tiun, kiu poste estis ŝia edzo, ŝi ne plu revenis en taŭran cirkon. Ŝi sin sentis ne sufiĉe kuraĝa por ĉeesti ludbatalon, kvankam Gallardo ne partoprenis ĝin. Ŝi svenus pro teruro, se vidus aliajn homojn stari antaŭ danĝero vestitajn per sama kostumo, kiel ŝia Johano.

Tri jarojn post la geedziĝo la spadulo estis vundata en Valencio. Karmeno ne tuj sciiĝis. Telegramo alvenis kiel ĉiam kun "Nenio malbona". Tio estis kompataĵo de Don Josefo, la kontraktfaristo, kiu per ĉiutagaj vizitoj al Karmeno kaj per lertaj rimedoj, por ke ŝi ne legu la ĵurnalojn, prokrastis dum unu semajno ŝian sciiĝon pri la malfeliĉaĵo.

Kiam Karmeno fine konis ĝin pro najbarina maldiskretaĵo, ŝi volis tuj iri al li, fervoje vojaĝi por trovi sian edzon kaj lin flegi; ĉar ŝi supozis lin senhelpa. Tio ne estis necesa. La spadulo alvenis, antaŭ kiam ŝi estis ekiranta, pala pro perdo je sango kaj kun kruro devige nemova dum longa tempo; sed gaja kaj kuraĝa por trankviligi sian familion. Lia hejmo estis de tiam kvazaŭ sanktejo, ĉar iris en la korton centoj da personoj dezirantaj viziti Gallard'on, "la plej brava homo el la mondo", kiu sidis sur junka apogseĝo, kun la kruro sur tabureto, kaj fumis trankvile, kiel se li ne estus terure vundita.

Doktoro Ruiz, alveninte kun li en Seviljon, opiniis lin kuracita post malpli, ol unu monato, kaj miris pro la energio de tiu organismo. La facilo, per kiu la toreadoroj resaniĝas, estis por li ja mistero malgraŭ lia longedaŭra praktiko. La korno, malpura pro sango kaj besta ekskremento, splithava pro batoj, disŝiras, boras, tranĉas la karnon, samtempe kaŭzante profundan pikvundon kaj ĉifegan kontuzon. Kaj tamen tiuj teruraj vundoj estas kuracataj pli facile, ol ordinaraj.

— Mi nescias, kial ĝi okazas: mistero — diris la maljuna kuracisto per duba

mieno —. Aŭ la karno de ĉi tiuj knaboj estas, kiel tiu de hundoj, aŭ la korno malgraŭ siaj malpurajoj havas ian nekonatan kuracpovon.

Post malmulte da tempo Gallardo ree ludbatalis tiel arde, kiel ordinare, malgraŭ tio, kion antaŭdiris liaj malamikoj pro lia vundo.

Kvar jarojn post sia edziĝo la spadulo agrable surprizis sian edzinon kaj sian patrinon. Ili estos bienuloj; sed gravaj bienuloj posedantaj kampojn, kiuj ŝajne neniam finiĝas, kun olivarbaroj, muelejoj kaj multnombraj brutaroj; egala bieno al tiuj de riĉaj sinjoroj el Seviljo.

Gallardo, kiel ĉiuj toreadoroj, deziris esti kampara kaj rajdema sinjoro, mastro de brutaroj. Ili nek ŝatas nek komprenas la urban riĉecon, la paperan valoron. La taŭro altiras ilian penson al verda paŝtejo: la ĉevalo memorigas al ili la kamparon: Senĉesa bezono je moviĝo, ekzercado, ĉasado kaj marŝado dum vintra sezono puŝas ilin deziri la terposedon.

Laŭ Gallardo nur estis riĉa la bienmastro kun grandaj brutaroj. De kiam li estis mizerulo kaj piediradis tra olivarbaroj kaj paŝtejoj, li arde deziris posedi vastajn kamparojn, kiuj estu ja siaj kaj baritaj por la ceteraj homoj per pikpintaj ferfadenoj.

Lia kontraktfaristo konis tiun deziron. Don Josefo estis ankaŭ lia administranto, enspezis de la cirkaj impresarioj kaj faris kalkulojn, kiujn ne sukcesis klarigi al sia matadoro.

— Mi ne komprenas tiujn aferaĉojn — diris Gallardo kontenta pro tia neklereco —. Mi nur scias mortigi taŭrojn. Faru, kion vi volos, Don Josefo. Mi konfidas al vi kaj scias, ke nur vi celas mian bonon.

Kaj Don Josefo, kiu apenaŭ okupiĝis pri siaj interesoj, fidante ilin al la malstreĉa administrado de sia edzino, zorgis ĉiumomente la riĉajon de la matadoro, metante lian monon procentege, por ke ĝi multe fruktodonu.

Iun tagon li ekdiris gaje al sia protektato.

— Mi havas jam, kion vi deziras. Bienon grandan, kiel mondo, kaj krom tio tre malmultekostan; vera aĉetindaĵo. La venontan semajnon ni formaligos skribaĵon.

Gallardo volis scii la lokon kaj nomon de la bieno.

— Ĝi estas nomata "*Rinconada*".

Liaj deziroj estis plenumitaj.

Kiam Gallardo iris kun sia edzino kaj sia patrino por ricevi la bienon, li montris al ili la pajlejon, kie li dormis kun siaj kamaradoj de mizera vagado, la ĉambron, kie li manĝis kun la mastro kaj la taŭran cirketon, kie li spadpikis taŭrideton, gajnante tiel, unuafoje rajton vojaĝi vagonare sen bezono sin kaŝi sub ĝiajn sidilojn.

III

Dum la vintraj noktoj, kiam Gallardo ne estis en *Rinconada,* kuniĝis post la vespermanĝoj en lian hejman manĝoĉambron aro da amikoj.

La ledaĵisto kaj lia edzino estis el tiuj unue alvenantaj; ili havis ĉiam du el siaj gefiloj en la spadula hejmo. Karmeno, kiel se ŝi volis forgesi sian nenaskemon kaj estis ĝenata de la silento de tiu granda domo, loĝigis kun si la malplejaĝajn filojn de sia bofratino. Ĉi tiuj pro natura amo kaj ankaŭ pro konsilo de siaj gepatroj karesis ĉiuhore per kisoj kaj kataj dorlotoj la belan onklinon kaj la malavaran kaj popularan onklon.

Enkarnacio, kiu estis tiel dika, kiel sia patrino, kun malstreĉita ventro pro senĉesa naskado kaj buŝo iom lipharema pro aĝo, ridetis servute al sia bofratino, bedaŭrante la ĝenadon, kiun certe okazigis al ŝi la infanoj.

Sed, antaŭ kiam Karmeno povis ekrespondi, la ledaĵisto miksiĝis dirante:

— Lasu ilin, edzino. Ili tiel multe amas siajn geonklojn! La malgranda infanino ne povas vivadi sen sia onklinjo Karmeno...

Ambaŭ genevoj restis do tie, kiel en sia propra hejmo kaj divenis per sia infana ruzo, kion esperis el ili iliaj gepatroj, troigante karesojn kaj dorlotojn al tiuj riĉaj parencoj, pri kiuj ĉiuj parolis respekte. Tuj post la vespermanĝo ili kisis manon al sinjorino Angustio kaj al siaj gepatroj, kaj sin ĵetis ĉirkaŭpreni la kolon de Gallardo kaj lia edzino, elirante poste por enlitiĝi.

La avino sidis sur apogseĝo ĉe la ĉefloko de la manĝotablo. Kiam la spadulo havis gastojn, preskaŭ ĉiam altranguloj, la bona virino intencis ne sidi ĉe tiu honora loko.

— Ne — protestis Gallardo —. Panjo ĉe la prezidloko. Sidiĝu tien aŭ ni ne manĝos.

Kaj li kondukis ŝin per brako, ŝin ame karesante, kiel se li volis kompensi al ŝi la jarojn de vagema infanaĝo, kiuj estis por ŝi ja turmentego.

Kiam post vespermanĝo alvenis Naciao por babili dum iom da tempo en la majstra hejmo, kvazaŭ ĉi tiu vizito estus subula devo, la konversacio ŝajnis vigliĝi. Gallardo, vestite per bonega, mallonga surtuto, kiel kampara sinjoro, kun nuda kapo kaj la vosteto platigita ĝis la frunto, akceptis sian pikiletiston per ŝercema afableco. Kion diras la taŭremuloj? Kiuj malverajoj flugas?... Kiel iras tiu Respubliko?

— Strekaro, donu al Sebastiano pokalon da vino.

Sed Sebastiano, Naciao, malakceptis tiun inviton. Neniom da vino, li ne kutimas trinki. Vino estas kulpa pri la metiista malklereco. Kaj la tuta personaro,

kiam ĉi tion aŭdis, ekridis, kiel se li estus dirinta atenditan spritaĵon. La pikiletisto ja komencas ĉerpi el siaj strangaĵoj.

La nura persono, kiu silentis kun malamikaj okuloj, estis la ledaĵisto. Li malamis Naciaon, ĉar opiniis lin konkuranto. Ankaŭ ĉi tiu estis naskema pro sia bonula fideleco, kaj aro da knabetoj svarmis ĉirkaŭ sia patrino en la eta trinkejo. Tiuj du plej malgrandaj estis baptofiloj de Gallardo kaj lia edzino pro kamaradeca kuniĝo. Hipokritulo! Li venigas ĉiujn dimanĉojn en la hejmon ambaŭ baptofilojn, kun iliaj plej bonaj vestaĵoj, por ke ili kisu manon al iliaj gebaptopatroj kaj la ledaĵisto paliĝis pro indigno ĉiufoje, kiam la filoj de Naciao ricevis donacon. Ili venas rabi al lia idaro. Eble eĉ la pikiletisto revas, ke parto el la spadula riĉaĵo alvenu iam al tiuj baptofiloj. Ŝtelisto! Homo eĉ ne estanta familiano!

Kiam li ne akceptis Naciaon per malamika silento kaj malamikaj rigardoj, li intencis ĝeni lin opiniante, ke oni devus tuj pafmortigi ĉiujn, kiuj propagandas malsaĝaĵojn ĉe la popolo kaj estas danĝero por la deculoj.

Naciao estis dek jarojn pli aĝa, ol lia majstro. Kiam ĉi tiu komencis mantelludi, li jam estis pikiletisto en ĉefaj, toreadoraj bandoj kaj estis veninta el Ameriko, mortiginte taŭrojn en Limo. Ĉe la komenciĝo de sia profesio li estis iom populara pro sia juneco kaj korpa vigleco. Ankaŭ li dum kelkaj tagoj estis "la estonta toreadorreĝo", kaj la Seviljaj taŭremuloj observeme esperis, ke li superu la matadorojn el aliaj regionoj. Sed tio ĉi daŭris malmulte. Kiam li revenis post sia vojaĝo, famigite de malproksimaj kaj nebule eksterordinaraj faroj, la publiko amasiĝis en la taŭrcirkon de Seviljo, por vidi, kiel li mortigis taŭrojn. Mankis enirbiletoj por miloj da personoj. Sed en ĉi tiu momento por definitiva pruvo li ne estis sufiĉe kuraĝa. Li pikiletis lerte, kiel konscienca kaj serioza laboristo plenumanta devon; sed, kiam li estis tuj mortigonta, lia konservinstinkto estis pli potenca, ol lia volo, kaj estigis lin malproksima de la taŭro, sen eblo profiti sian altan staturon nek sian fortan brakon.

Naciao rezignis la plej altajn, ludbatalajn glorojn. Nur li estos pikiletisto. Li kontentiĝis, estante salajrulo laboranta sub estreco de aliaj pli junaj, ol li, por gajni neriĉigan monkvanton, per kiu li vivigis sian familion kaj povis ŝpari por starigi industrieton. Li estis famkonata de la vostetuloj pro sia bonkoro kaj honesta konduto. La edzino de lia majstro multe estimis lin kaj lin konsideris, kvazaŭ gardanĝelo por la amfideleco de sia edzo. Kiam somere Gallardo kun ĉiuj siaj homoj iris en danckafejon en provinca ĉefurbo, dezirante diboĉi kaj ĝoji post aro da ludbataloj, Naciao restis serioza kaj silenta inter la vaporrobaj (36) kaj lippentritaj kant-dancistinoj, kiel se li estus sanktulo el dezerto inter la malĉastulinoj de Aleksandrio.

Li ne indignis, sed malgajiĝis pensante pri sia edzino kaj siaj gefiloj atendantaj lin en Seviljo. Ĉiuj mondaj difektoj kaj malvirtoj estis, laŭ lia opinio,

produktataj de malklereco. Certe ĉi tiuj malfeliĉulinoj scias nek legi nek skribi. Li ankaŭ ne sciis kaj, tial ke li konsideris ĉi tiun mankon, kiel kaŭzo je lia malgraveco kaj malgranda inteligento, li atribuis al sama kialo ĉiujn mizerojn kaj malnoblaĵojn, kiuj ekzistas en la mondo.

Li estis fandisto dum sia unua junaĝo, agema membro de Internacia, Laborista Asocio kaj nelacebla aŭskultanto je siaj kamaradoj, kiuj, pli feliĉaj ol li, povis legi laŭte la gazetojn celantajn la popolan bonon. Li soldatludis en la tempo de la nacia militanaro, apartenante al la batalionoj, kiuj portis ruĝan ĉapon, kiel signo de federaciisma maltoleremo. Li restis dum tutaj tagoj antaŭ la tribunoj starigitaj en la placoj, kie la politikaj kluboj ekfunkciis laŭ ĉiamdaŭra kunsido kaj kie la oratoroj senĉese sekvis unu la alian tage kaj nokte, parolante per andaluzia flueco, ĉu pri la dieco de Jesuo, ĉu pri la altaj prezoj de plej necesaj nutraĵoj, ĝis kiam, post alveno de la reakcio, striko metis lin en malfacilan situacion de ribelema laboristo malakceptata en ĉiuj laborejoj.

Ludbataloj plaĉis lin kaj li iĝis toreadoro, kiam estis dudekkvarjara, same, kiel li povus adopti iun ajn alian metion. Li sciis multe kaj parolis malŝate pri la nunaj, sociaj absurdaĵoj. Ĉiam ion oni lernas, aŭskultante dum kelkaj jaroj gazetlegadon. Kvankam li malmulte prosperas ludbatalante, ĉiam tiel li gajnas pli multe kaj vivadas pli bone, ol lerta laboristo. La publiko, memorante kiam li portis pafilon en la nacia militanaro, kromnomis lin Naciao.

Li parolis pri la toreadora profesio iom malestime malgraŭ la jam pasintaj jaroj kaj senkulpigis sin pro sia aparteno al ĝi. La komitato de lia distrikto, kiu dekretis forigi el la partio ĉiujn anojn, kiuj ĉeestos ludbatalojn, barbaraj kaj malprogresemaj spektakloj, faris favoran escepton al li kaj lasis lin en lia komitata posteno.

— Mi scias — li diris en la manĝoĉambro de Gallardo — ke ludbatalado estas reakcia afero... io inda je la inkvizicia epoko. Mi ne scias ĉu mi komprenigas min. La homaro bezonas tiel multe, kiel manĝi, scii legi kaj skribi; kaj ne estas dece, ke ĝi elspezu monon por ni, dum mankas tiom multe da lernejoj. Tion diras paperaĵoj el Madrido... Sed la sampartianoj estimas min kaj la komitato post tio, kion diris al ĝi Don Joseĉjo, konsentis, pri tio ke mi restu en la partio.

Lia trankvila seriozeco neŝanĝebla malgraŭ la mokoj kaj komika furiozo, per kiuj Gallardo kaj liaj amikoj akceptis ĉi tiujn deklarojn, montris fierecon pro la escepto, per kiu honoris lin liaj sampartianoj.

Don Joseĉjo, entuziasmema, flue parolanta kaj unuagrada instruisto, kiu prezidis la distriktan komitaton, estis devene israelida junulo partoprenanta la politikan bataladon per sia rasa ardeco kaj sin montranta fiera pro sia bruna, malbela, varioltruita vizaĝo iom similanta al tiu de Danton (37). Naciao ĉiam aŭskultis lin mire.

Kiam Don Josefo, la kontraktfaristo de Gallardo, kaj aliaj amikoj de la majs-

tro mokeme kontraŭdiris per strangaĵoj lian doktrinon post la verpermanĝo, Naciao gratis sian frunton konfuzite.

— Vi estas sinjoroj kaj studadis, dum mi scias nek legi nek skribi. Tial ni, la popolanoj, estas malsaĝuloj. Sed, se Don Joseĉjo estus ĉi tie!... Se vi aŭdus lin, kiam li ekparolas tiel belege!...

Kaj por plifortigi sian kredon iom ŝanceliĝantan pro la atakoj de la mokemuloj li iris la morgaŭan tagon al Don Joseĉjo, kiu ĝuis maldolĉan volupton, kiel ido de multe persekutitaj uloj, kiam li montris sian de li nomatan "muzeo de teruraĵoj". La judo, reveninte al la lando de siaj praavoj, kolektis en lernejan ĉambron rememorigaĵojn el Inkvizicio same venĝeme kaj detaleme, kiel forkurinta malliberulo, kiu oston post osto kompletigus la skeleton de sia gardisto. En ŝranko estis laŭvice aranĝitaj, pergamenaj libroj, rakontoj pri inkviziciaj juĝoj kaj demandaroj, laŭ kiuj devis respondi la kulpigatoj dum turmento. Sur muro estis sternita blanka standardo kun la timinda, verda kruco. En la ĉambraj anguloj amasiĝis turmentaj feraĵoj, teruregaj vipoj, ĉio, kion trovis Don Joseĉjo en la aĉet-vendejoj, taŭga por fendi, premegi kaj disŝiri, kaj kion li tuj katalogis, kvazaŭ ĝi estus aparteninta al "Sankta Ofico".

La bonkoreco de Naciao, lia simpla, preta indigni animo ribelis antaŭ tiu amaso da rustiĝintaj feraĵoj kaj verdaj krucoj.

— Nu! Kaj ankoraŭ ili kuraĝas diri... Kia abomeno!... Ĉi tion ili devus vidi.

Pro forta, prozelitiga deziro, li ĉiuokaze montris sian kredon, ne timante mokojn de siaj kamaradoj. Sed eĉ tiam, li estis bonema kaj ne atakema. Laŭ lia opinio, kiuj restis indiferentaj antaŭ la landsorto kaj ne aniĝis al lia partio, estis kompatindaj viktimoj de la nacia malklereco. Saviĝo dependas nur de tio, ke ĉiuj sciu legi kaj skribi. Li siaflanke rezignis modeste tiun ĉi pliperfektiĝon, sin opiniante jam netaŭga por lerni; sed li kulpigis la tutan mondon pri sia nescio.

Multajn fojojn, kiam somere la toreadora bando vojaĝis vagonare kaj Gallardo ŝanĝiĝis en duaklasan kupeon, kie estis liaj "knaboj", okaze supreniris en ĝin vilaĝa pastro aŭ paro da monaĥoj.

La pikiletistoj avizis sin unu la alian per la kubutoj kaj okuloj, rigardante Naciaon, kiu ŝajnis pli serioza kaj solena antaŭ siaj malamikoj. La pikrajdistoj Kuiraĵo kaj Englutisto, maldelikataj kaj atakemaj homoj emantaj bataldisputojn kaj neklare abomenantaj la religiulojn, instigis lin mallaŭte:

— Jen li estas!... Ataku lin rekte... Pikiletu lin per iu el viaj akraj diroj.

La majstro aŭtoritate, kiel bandestro, kiun neniu rajtas kontraŭdiri nek diskuti, rigardis ordone Naciaon kaj ĉi tiu restis obee silenta. Sed pli forta, ol lia obeemo estis la prozelitiga inklino de lia simpla animo. Kaj sufiĉis malgrava vorto, por ke tuj li komencis diskuti kun la vojaĝantoj, intencante konvinki ilin pri la vero. Kaj lia vero estis kvazaŭ pilko el senordaj, konfuzaj kaj multspecaj partoj, farita per tio, kion li estis aŭdinta al Don Joseĉjo.

Rigardis sin reciproke liaj kamaradoj, mirigite de la saĝeco de sia kunulo kaj kontentaj, tial ke iu el ili kontraŭstaris kaj metis en embarason studulojn, kiuj tamen preskaŭ ĉiam estis nur nekleraj pastroj.

La religiuloj, konfuzite de la senorda rezonaro de Naciao kaj ridoj de liaj kamaradoj, fine uzis ekstreman rimedon. Nu! Ĉu homoj ofte riskantaj sian vivon ne kredas pri Dio kaj kuraĝas pensi tiajn aferojn? Kiel multe, certe preĝas por ili en tiuj momentoj iliaj edzinoj kaj patrinoj!...

La bandanoj iĝis timeme seriozaj, pensante pri la sanktulaj medaloj kaj bildotuketoj, kiujn virinaj manoj alkudris al iliaj toreadoraj kostumoj, antaŭ kiam ili eliris el Seviljo. La spadulo kun vekiĝinta superstiĉemo incitiĝis kontraŭ Naciao, kiel se li opiniis, ke tiu malpieco estas danĝero por lia vivo.

—Silentu kaj ne plu diru barbaraĵojn! Pardonu nin, sinjoroj. Li estas bonulo, sed oni duonfrenezigis lin per multego da malveraĵoj. Silentu kaj ne respondu min! Malbenaĵo! Mi ŝtopos vian buŝaĉon per...

Kaj Gallardo por trankviligi tiujn sinjorojn, kiujn li opiniis regantoj de la estonteco, superŝutis sian pikiletiston per amaso da minacoj kaj vortaĉoj.

Naciao malŝateme silentiĝis. Ĉio estas nescio kaj superstiĉo: manko de lega kaj skriba sciado. Kaj per neŝancelebla kredo kaj tiu simpleco de naivulo havanta nur du aŭ tri ideojn forte enkapigitajn li ree diskutadis post malmultaj horoj, ne atentante la matadoran koleron.

Li estis malpia eĉ en la areno inter pikiletistoj kaj pikrajdistoj, kiuj, post kiam preĝis en la cirka kapelo, iris en la arenon esperante, ke la religiaĵoj alkudritaj al iliaj vestoj savos ilin el danĝero.

Kiam grandega, peza, koldika taŭro tre nigra estis pikiletota, Naciao sin metis proksime, antaŭ ĝin, kun ambaŭflanken etenditaj brakoj kaj tenante per manoj pikiletojn, vokis ĝin per insultoj:

— Ataku, pastro!

La taŭro atakis furioze kaj, kiam ĝi pasis apud Naciao, ĉi tiu pikiletis per sia tuta forto ĝian kolon, dirante laŭte, kiel se li estus atinganta gravan venkon.

— Por la pastraro!

Gallardo fine ridis pro la strangaĵoj de Naciao.

— Vi metas min en neseriozan situacion: Fine oni atentos pri nia bando kaj diros, ke ni, ĉiuj estas herezuloj. Vi ja scias, ke tio ne plaĉas iajn publikojn. Toreadoro devas nur ludbatali.

Sed li multe amis la pikiletiston kaj memoris lian sindonon al li, kiu kelkajn fojojn eĉ fariĝis ofero. Neniom interesis Naciaon, ke oni fajfis lin, kiam okaze de danĝera taŭro li ĝin pikiletis iel ajn, dezirante nur fini baldaŭ. Li ne serĉis gloron kaj ludbatalis nur por salajro. Sed, tuj kiam Gallardo iris kun sia spado al danĝera taŭro, la pikiletisto restis apud li preta lin helpi per sia peza ludmantelo kaj forta brako, kiu sukcesis superregi la bravbeston. Du fojojn, kiam Gallardo falru-

liĝis sur la sablon kun grava risko esti atingota, Naciao sin ĵetis sur la beston, forgesante edzinon, gefilojn, trinkejeton, ĉion ajn kun nura deziro morti por savi sian majstron.

Kiam li iris en la manĝejon de Gallardo post la vespermanĝo, oni akceptis lin, kvazaŭ li estus el la familio. Sinjorino Angustio lin amis per tiu amo de humiluloj, kiuj renkontas sin reciproke ĉe superuloj kaj grupiĝas aparte.

— Sidiĝu apud min, Sebastiano. Ĉu vi vere deziras trinki nenion?... Rakontu al mi, kiel prosperas via trinkejo. Ĉu Tereso kaj viaj gefiloj bonfartas?

Naciao raportis ŝin pri la vendado dum la antaŭaj tagoj; jen: tiom da pokaloj, tiom da hejmen sendita vino de la lando, kaj la maljunulino aŭskultis lin atente, kiel virino suferinta pro mizero kaj scianta, kiom valoras mono kalkulita centimon post centimo.

Sebastiano parolis poste pri pligrandigo je siaj negocoj. Tabakvendejo en la sama butiko donus al li multe da profito. La spadulo povas atingi tion per sia amikeco kun potenculoj; sed li sentas iajn skrupulojn por ĝin akcepti.

— Komprenu, sinjorino Angustio: tabakvendejo estas registara afero kaj mi estas ideano, mi estas federaciano aliĝinta al tiu partio kaj eĉ apartenas al la komitato. Kion dirus miaj samideanoj.

La maljunulino indignis kontraŭ tiuj skrupuloj:

— Kion vi devas fari, tio estas nur gajni por via familio kiel eble plej multe. Kompatinda Tereso, kun tiom multe da gefiloj!... Sebastiano, ne estu malsaĝa! Purigu vian cerbon el tiaj araneaj retoj... Ne kontraŭdiru min. Ne ekdiru barbaraĵojn, kiel aliajn noktojn. Pensu, pri tio ke morgaŭ mi iros aŭdi meson en *Macaren'an* preĝejon.

Sed Gallardo kaj Don Josefo, kiuj fumis ĉe kontraŭa flanko de la tablo apud likvoraj pokaletoj, deziris paroligi Naciaon por ridi pri liaj ideoj kaj incitis lin, insultante Don Joseĉjon. Trompemulo, kiu frenezigas malklerulojn, kiel li estas.

La pikiletisto akceptis kviete la ŝercojn de la spadulo kaj lia kontraktfaristo. Dubi pri Don Joseĉjo!... Ĉi tiu absurdaĵo eĉ ne indignigis lin. Tio estis kvazaŭ, parolante pri lia alia idolo, Gallardo, oni dirus, ke li ne scias mortigi taŭrojn.

Sed, kiam la ledaĵisto, kiu inspiris al li nevenkeblan antipation, kuniĝis al mokantoj, li ne plu sinregis. Ĉu rajtas tiu malsatulo, kiu vivadas parazite apud lia majstro, diskuti kontraŭ li?... Kaj sen ia ajn sindeteno nek atento, pri tio ke ĉeestas la patrino kaj edzino de la matadoro kaj Enkarnacio, kiu imitante sian edzon rigardis kun malŝatanta mieno la pikiletiston, ĉi tiu sin ĵetis rekte malkaŝe montri siajn ideojn samfervore, kiel se li diskutus en la komitato. Pro manko de pli taŭgaj argumentoj li dronigis per insultoj la kredojn de tiuj mokemuloj:

— Kio estas Biblio?... Malveraĵo! Kio la sestaga kreo je la mondo?... Malveraĵo! Kio tio de Adamo kaj Evo?... Ankaŭ malveraĵo! Ĉio mensogoj kaj superstiĉo.

Kaj li diris "malveraĵo"! per profunde malŝatanta tono.

Tio de Adamo kaj Evo lin paroligis sarkasme. Li multfoje pensadis pri tio, dum silente en la posttagmezaj horoj duondormis okaze de vojaĝo kun la toreadora bando, kaj li trovis nekontraŭeblan argumenton tute produktitan de lia menso. Kiamaniere ĉiuj homoj povus veni de nur unu paro?

—Ĵen oni nomas min Sebastiano Venegas: kaj vi, Joĉjo, estas familinomata Gallardo: kaj por vi, Don Josefo, ankaŭ estas via familia nomo kaj por ĉiu estas tiu lia. Nu! se ni ĉiuj venus de Adamo kaj oni nomis lin ekzemple Pérez, ankaŭ ni ĉiuj estus nomataj familie Pérez. Ĉu vi komprenas?... Se ĉiu el ni estas do familinomata malsame, tio okazas, ĉar ni venas de multaj Adamoj kaj tio, kion rakontas la pastroj..., malveraĵo! Superstiĉo kaj manko de progreso. Ni estas malkleruloj kaj oni trompas nin... Ŝajnas al mi, ke mi klare parolas.

Gallardo, klinante posten sian buston pro rido salutis sian pikiletiston per imito je taŭra muĝo. La kontraktfaristo kun andaluzia, ŝajna seriozeco prezentis al li sian manon lin gratulante pro lia elokvento:

— Manpremu min! Vi parolis ja belege. Nek eĉ Castelar parolus tiel!

Sinjorino Angustio indignis, kiam ŝi aŭdis tiajn dirojn en sia hejmo, kun teruro de maljunulino konscianta proksima la finiĝon de sia ekzistado.

— Silentu, Sebastiano. Fermu vian inferan, malbenitan buŝon aŭ iru for. Ĉi tie ne parolu tiamaniere, demono... Se mi ne konus vin! Se mi ne estus certa, pri tio ke vi estas bonulo!...

Kaj ŝi fine reamikiĝis kun la pikiletisto, ĉar pensis, ke li multe amas ŝian Johanon, kaj memoris, kiel ofereme li helpis lin en danĝeraj okazoj. Krom tio estis por ŝi kaj por Karmeno tre trankviliga afero, ke apartenas al la toreadora bando tiu serioza kaj nedibocema homo, kontraste kun la aliaj "knaboj" kaj eĉ kun la spadulo mem, kiu, estante en aliaj urboj, tre sufiĉe emis amuziĝi kaj facile dibocis pro deziro esti admirata de virinoj.

La malamiko de la pastraro kaj de Adamo kaj Evo gardis al sia majstro sekreton, kiu lin kondutigis malkomunikeme kaj singarde, kiam li vidis lin hejme inter lia patrino kaj sinjorino Karmeno. Se ĉi tiuj virinoj scius, kion li scias!...

Malgraŭ la respekto, kiun ĉiu pikiletisto devas montri al sia majstro, Naciao kuraĝis iun tagon paroli Gallard'on per kruda sincereco, ŝildate per sia plia aĝo kaj per ilia malnova amikeco.

— Gardu vin, Joĉjo, ĉar en Seviljo sekretoj estas neeblaj! Oni parolas nur pri tio; kaj tiu sciigo atingos certe vian hejmon; kaj vin ja trafos multaj malplaĉoj... Pensu, ke por sinjorino Angustio tio estos granda ĉagreno kaj, ke Karmeno ekkoleros kontraŭ vi... Memoru tion, kio okazis pro la kantistino; kaj tamen ĝi ne gravis. Ĉi tiu "besto" estas pli forta, pli danĝera.

Gallardo ŝajnigis, kvazaŭ li ne komprenus, ĝenate kaj samtempe flatate, pro tio ke ĉiuj en la urbo konas lian aman sekreton.

— Nu! Kiu besto estas tiu? Kaj pri kiuj malplaĉoj vi parolas?

— Jen certe!... Doña Suno; tiu altrangulino, pri kiu tiom multe oni parolas. La nevino de markizo Moraima, la taŭrproduktisto.

Kaj, tial ke la spadulo restis silenta kaj ridetante, flatite de la ĝusta scio de Naciao, ĉi tiu daŭrigis, kiel predikanto, kiun jam ne allogas la mondaj vantaĵoj.

— Edziĝinta homo antaŭ ĉio devas celi la hejman trankvilon. Virinoj... Malvero! Ĉiuj estas egalaj: ĉiuj havas samajn aĵojn ĉe samaj lokoj kaj estas ja malsaĝaĵo maldolĉigi nian vivon, irante de iu al alia. Mi dum dudek kvar jaroj, vivante kun mia Tereso, malfidelis ŝin nek eĉ per penso kaj tamen, mi estas toreadoro kaj iam ankaŭ sukcesis kaj multaj belulinoj rigardis min ame.

Gallardo fine ridis je la pikiletisto. Li parolas kvazaŭ abato. Kaj ĉu estas li mem, kiu volis eĉ manĝi monaĥojn?...

— Naciao, ne estu malsaĝa. Ĉiu estas diferenca de la aliaj kaj, ĉar la virinoj venas al ni, ni akceptu ilin. Nia vivo estas mallonga, ni do profitu ĝin!... Iun ajn tagon ni eble ĝin lasos en areno... Plie, vi ne spertis tion, kio estas sinjorino. Se vi konus ŝin!...

Poste li aldonis naive, kiel se deziris forviŝi ian skandalan kaj malgajan mienon, kiu aperis sur la vizaĝo de Naciao:

Mi amas multe Karmenon, ĉu vi komprenas? Mi amas ŝin kiel ĉiam. Sed mi ankaŭ amas la alian. Ĝi estas alia afero...; mi ne scias, kiel klarigi tion al vi. Alia afero; jen estas!

Kaj la pikiletisto nenion plian atingis per sia interparolado kun Gallardo.

Kelkajn monatojn antaŭe, kiam kune kun aŭtuno alvenis finiĝo de la ludbatala sezono, al la spalulo okazis ia renkontiĝo en preĝejo Sankta Lorenzo.

Li ripozadis kelkajn tagojn en Seviljo antaŭ la iro al *Rinconada* kun sia familio. Kiam alvenis ĉi tiu kvieta jarparto, kio plej multe plaĉis la spadulon, estis loĝi en sia propra hejmo sen senĉesaj, vagonaraj ŝanĝoj. Mortigi pli, ol cent taŭrojn ĉiujare, malgraŭ ĝiaj ludbatalaj danĝero kaj klopodoj malpli lacigis lin, ol vojaĝi dum kelkaj monatoj de cirko al cirko.

Tio estis someraj ekskursoj sub kruela, senfortiga suno, tra ardaj ebenaĵoj kaj en antikvaj vagonoj, kies tegmento ŝajnis bruli. La banda kruĉo, kiun oni plenigis je akvo en ĉiu stacio, ne estis sufiĉa por sensoifigi ilin. Plie la vagonaroj iris plenegaj je vojaĝantoj plejmulte sindirektantaj al la urbaj foiroj por ĉeesti ludbatalojn. Multfoje Gallardo pro timo ne atingi la vagonaron, tuj post kiam li mortigis sian lastan taŭron en taŭrcirko kaj vestite ankoraŭ per la toreadora kostumo, rapidis al la stacio kaj pasis, kvazaŭ luma kaj multkolora meteoro, inter grupoj de vojaĝantoj kaj staciaj ĉaretoj. Li ŝanĝis sian veston en unuaklasa kupeo antaŭ ĝiaj okupantoj kontentaj, ĉar ili vojaĝis kun famulo, kaj li restis nokte fleksiĝinte inter vagonaj kusenoj, dum la kunvojaĝantoj grupiĝis en restantan lo-

kon por lasi al li, kiel eble plej grandan spacon. Ĉiuj respektis lin, tial ke la morgaŭan tagon li spertigos al ili tragike emocian plezuron sen risko por ili.

Kiam li alvenis lacigite en festantan urbon stratornamitan per flagetoj kaj arkaĵoj, li estis turmentata de la entuziasmo de siaj adorantoj. La taŭremuloj, liaj partianoj, atendis lin en la stacio kaj lin akompanis ĝis la hotelo. Ili estis gajaj kaj bone dormintaj homoj, kiuj manpremadis, ĉirkaŭbrakis, puŝis, brakprenis lin kaj deziris lin trovi gaja kaj parolema, kiel se li nepre spertus antaŭ ili plej grandan ĝojon.

Multfoje estis tri aŭ kvar sinsekvaj, ludbatalaj tagoj kaj tiam, kiam alvenis nokto, la tute laca kaj malmulte dorminta spadulo senrespekte al social konvenaĵoj sidiĝis sen jako apud la hotela pordo, por ĝui la stratan malvarmeton. La "knaboj" de la toreadora bando, kiuj gastis en sama hotelo, restis apud la majstro, kvazaŭ neliberaj kolegianoj. Iuj el plej kuraĝaj permespetis por promeni tra la ege lumigataj stratoj kaj foirejo.

— Morgaŭ miuroj — respondis la spadulo —. Mi scias tion, kio estas tiaj promenadoj. Vi revenos ĉe la tagiĝo, trinkinte pli, ol dece, kaj senfortiĝinte pro amdibocô. Mi malpermesas foriri. Jam vi sategos, kiam ni finos.

Kaj, post kiam ili plenumis sian taskon, se estis kelkaj libertagoj ĝis plej proksima taŭrfesto en alia urbo, la toreadora bando prokrastis sian vojaĝon kaj tiam, malproksime de siaj familioj, per abundo de vinoj kaj virinoj ili dibocis kun entuziasmaj taŭremuloj, kiuj imagis, ke iliaj idoloj ĉiam tiel kondutis.

La diversaj festdatoj devigis la spadulon absurde vojaĝi. De urbo li iris por plenumi kontrakton al alia lokita ĉe la kontraŭa ekstremo de Hispanlando, kaj post malmultaj tagoj li revojaĝis, por ludbatali en iu alia preskaŭ apud la unua. Dum la someraj monatoj, kiuj estis la plej batalabundaj li preskaŭ loĝis en la vagonaroj laŭ senĉesa zigzago tra ĉiuj duoninsulaj fervojoj; posttagmeze li mortigis taŭrojn en cirko kaj nokte dormis en vagonaro.

— Se oni rektigus ĉion, kion mi veturas dum somero — diris Gallardo — mi atingus almenaŭ Nordan Poluson.

Kiam komenciĝis la ludbatala sezono, li ekvojaĝis entuziasme, pensante pri la publikoj, kiuj parolis pri li dum la tuta jaro kaj atendis senpacience lian alvenon, pri neatenditaj, novaj amikecoj, pri amaj aventuroj liverataj al li de la virina scivolemo, pri la vivo de hotelo en hotelon kun ĝia malkvieteco, ĝiaj ĝenoj kaj ĝiaj diversaj kuiraĵoj; ĉio tiel multe kontrastanta kun la kvieta vivado en Seviljo kaj la montara soleco en *Rinconada*.

Sed post malmulte da ĉi tiuj fulme malkvietaj semajnoj, dum kiuj li gajnis po 5.000 pesetoj ĉiun taŭrfeston. Gallardo ekplendis, kvazaŭ infano malproksimigita de sia familio.

— Ve, mia Sevilja hejmo tiel malvarmeta, kun Karmeno tiel belpure ĝin zorganta! Ve, miaj panjaj kuiraĵoj! Tiel bongustaj!...

Kaj nur li forgesis Seviljon en tiuj liberaj noktoj, kiam la morgaŭan tagon ili ne estos ludbatalantaj kaj la tuta bando kun multaj taŭremuloj, kiuj deziris liveri al ili plezurigan restadon en la urbo, iris en flamenkkantan (38) kafejon, kie ĉio, virinoj kaj kantatoj, estis por la majstro.

Kiam li revenis hejmen por ripozado dum la restanta jarparto, Gallardo spertis kontenton, kiel potenculo, kiu, forgesante honorojn, ree ekvivas kiel ordinare. Li dormadis ĝis malfrue sen bezono atenti pri vagonaraj hortabeloj, sen emocio, kiam li pensis pri taŭroj. Li devas hodiaŭ fari nenion same, kiel morgaŭ, kiel la aliajn venontajn tagojn! Liaj vojaĝoj nur atingis ĝis strato Serpentoj aŭ placo Sankta Ferdinando. Lia familio ŝajnis alia, pli gaja kaj bonfarta, ĉar li restos tie senriske dum kelkaj monatoj. Li eliris straten kun posten klinita ĉapelo, movante laŭ marŝtakto sian arĝenttenilan bastonon kaj rigardante la aspekton de siaj dikaj, fingraj briliantoj.

En la halo kelkaj starantaj homoj atendis lin apud la kradpordo, tra kies feraĵoj estis videbla blanka kaj hela korto malvarmete pura. Ili estis homoj brunaj pro suno, akre odorantaj pro ŝvito, kun malpuraj bluzoj kaj larĝaj randdifektitaj ĉapeloj. Iuj el ili estis marŝantaj kamplaboristoj, kiuj, ĉar pasis tra Seviljo, opiniis dece peti monhelpon al la famkonata matadoro, kiun ili nomis sinjoro Johano. Aliaj loĝis en la urbo kaj familiare parolis la toreadoron, lin nomante Joĉjo.

Gallardo per sia fizionomia memoro, kiel homo kutimiĝinta rilati homamasojn rekonis iliajn vizaĝojn kaj akceptis ilian familiarecon. Ili estis antikvaj kamaradoj, ĉu lernejaj aŭ el lia vagepoko.

— Ĉu la negocoj ne prosperas?... Nuntempe ĉiuj malfacile prosperas.

Kaj, antaŭ kiam ĉi tiu familiareco puŝis ilin pli antaŭen, li sin turnis al Strekaro, kiu restis apude por fermi la kradpordon.

— Diru al la sinjorino, ke por ĉiu ŝi donu al vi po du pesetoj.

Kaj li eliris straten fajfante, kontenta pro sia malavareco kaj pro la plaĉo de sia vivo.

Ĉe la pordon de la proksima trinkejo aperis por rigardi lin la ĉeestantoj kaj servistoj de Montañés, kun ridetanta mieno kaj ege scivolaj okuloj, kiel se ili neniam estus lin vidintaj.

— Bonfartu, sinjoroj!... Mi dankas vian inviton, sed mi ne trinkos.

Kaj li preterpasis la entuziasmulon, kiu iris al li tenante glason da vino per mano; poste en alia strato li estis haltigata de du maljunulinoj, amikinoj de sia patrino. Ili petis lin, ke li baptopatru la nepon de iu el ili. Ŝia filino estis akuŝonta tuj: la bofilo, arda partiano de Gallardo kelkfoje bastonbatalinta por defendi sian idolon ĉe la taŭrcirka elirado, ne kuraĝis paroli lin.

— Nu, malbenaĵo!... Ĉu vi kredas, ke mi estas suĉistino?... Mi baptopatris pli multe da infanoj, ol ili estas en publika infanazilo.

Por sin liberigi je tio, li konsilis, ke ili tion petu al lia panjo. Mi faros, kion

ŝi diros! Kaj li daŭrigis sian iradon senhalte ĝis strato Serpentoj, salutante kelkajn kaj lasante aliajn honoriĝi per intima irado apud li antaŭ la rigardoj de la preterpasantoj.

Li iris en Kvardek-kvinanan Klubon por demandi, ĉu estas tie lia kontraktfaristo. Ĝi estis aristokratia societo kun fiksita nombro de anoj, laŭ sia titolo, kie nur oni parolis pri taŭroj aŭ ĉevaloj. Konsistigis ĝin riĉaj taŭremuloj kaj taŭrproduktistoj, el kiuj estis en ĉefa rango, kvazaŭ orakolisto, markizo Moraima.

En iu el ĉi tiuj eliroj ĉe vendreda posttagmezo Gallardo, irante al strato Serpentoj, ekdeziris eniri parohpreĝejon Sankta Lorenzo.

En ĝia placeto oni vidis luksajn veturilojn. Plej altrangaj personoj de la urbo ĉi tiun tagon preĝis antaŭ la miraklema, skulptita bildo de Nia Patro Jesuo Grandpotenca. Malsupreniris la sinjorinoj el siaj veturiloj, nigre vestite kaj portante riĉajn mantilojn, kaj la homoj eniris la preĝejon, altirate de la virinamaso.

Gallardo ankaŭ eniris. Al toreadoro konvenas profiti ĉiujn okazojn por rilati kun altranguloj. La filo de sinjorino Angustio triumfe fieris, kiam salutis lin riĉuloj kaj elegantulinoj murmuretis lian nomon, lin montrante per la okuloj.

Krom tio li pie kredis pri Grandpotenca Sinjoro. Li toleris al Naciao sen granda indigno liajn opiniojn pri Dio aŭ Naturo, ĉar dieco estis por lia kompreno neklara kaj nepreciza afero, simile al tio okazanta, kiam oni aŭdas trankvile diri mallaŭdojn pri sinjoro, kiun ni nur nome konas, aŭ tute ne. Sed Virgulino Espero kaj Grandpotenca Jesuo estis vidataj de li de lia plej frua infanaĝo, kaj kontraŭ tiuj oni diru nenion.

Tiu maldelikata, granda knabo emociiĝis antaŭ la spektakla doloro de Kristo portanta krucon, vizaĝe ŝvitanta, korpreme sufermiena kaj mortpala, kiel la kamaradoj, kiujn li vidis kuŝi en vunditejoj de taŭraj cirkoj. Estas necese amike rilati kun tiu grandpotenculo, kaj li fervore preĝis kelkajn "niapatrojn" (39), starante antaŭ la skulptita bildo, dum rebrilis la kandelaj lumoj sur la korneoj de liaj arabaj okuloj.

Svarmeto de virinoj genuantaj antaŭloke distris lian atenton, kiu avidis supernaturajn helpojn por sia riskoplena vivado.

Sinjorino pasis inter la piulinoj, altirante ilian atenton: ŝi estis alta, gracia, elmontriĝeme bela, vestita per helaj koloroj kaj granda ĉapelo, sub kiu brilis ŝia helege orblonda hararo.

Gallardo konis ŝin; ŝi estis Doña Suno, nevino de markizo Moraima, "La ambasadorino", kiel oni nomis ŝin en Seviljo. Ŝi pasis inter la aliaj virinoj, ne rimarkante ilian scivolemon, kontenta pro tio ke altiris ĉies rigardojn kaj vekis mallaŭtajn komentariojn, kvazaŭ ĉio ĉi estus natura honoro, kiu devas akompani ŝin ĉien.

La fremde eleganta vesto kaj la grandega ĉapelo elmontriĝis per akra kontrasto el la malhela amaso da virinaj vestoj. Ŝi genuiĝis kaj klinis sian kapon, kiel se

preĝis dum kelkaj momentoj, kaj poste ŝiaj helaj verdlazuraj okuloj kun oraj rebriloj rigardadis ĉien, trankvile, kvazaŭ ŝi estus en teatro kaj serĉus gekonatulojn el ĝia ĉeestantaro. Ĉi tiuj okuloj ŝajnis rideti, kiam ili trovis amikinan vizaĝon kaj, daŭrigante sian promenadon, ili fine renkontis tiujn de Gallardo fikse rigardantaj ŝin.

La spadulo ne estis modesta. Ĉar li kutimiĝis esti rigardata de multaj miloj da personoj dum ludbatalaj posttagmezoj, li naive opiniis, ke ie ajn li estas ĉiuj rigardoj nepre celas lin. Multaj virinoj konfidence rakontis al li pri la emocio, scivolo kaj amdeziro, kiujn ili spertis, kiam unuafoje vidis lin en la areno. La rigardo de Doña Suno ne malleviĝis, kiam ĝi renkontis tiun de la toreadoro: kontraŭe ĝi restis fikse, kun altrangulina malvarmeco, devigante la matadoron respekteman al riĉuloj deflankigi tiun sian.

— Kia virino! — pensis Gallardo malmodeste, kiel populara idolo —. Ĉu eble mi ame plaĉas ŝin?

Ekster la templo li deziris alifoje ŝin vidi kaj tial li atendis proksime ĝian pordon. Lia koro avizis lin pri io eksterordinara same, kiel ĉe bonsortaj, ludbatalaj posttagmezoj. Tio estis mistera, kora antaŭdiro, kiu en la areno igis al li malatenti la publikajn konsilojn kaj realigi plej maltimajn ekpensojn ĉiam sukcesege.

Kiam Doña Suno eliris el la templo, ree ŝi rigardis lin sen miro, kiel se estis diveninta, ke li atendos ŝin ĉe la pordo. Ŝi supreniris en nekovritan veturilon kun du amikinoj kaj, kiam la kondukisto ekirigis ĝin, ankoraŭ ŝi returnis sian kapon por vidi la spadulon kaj ekmontris ĉe sia buŝo etan rideton.

Gallardo restis priokupate. Li pensis pri siaj antaŭaj, amaj aventuroj; sukcesoj atingitaj el la virinaj admiro kaj scivolemo pro lia toreadora belbraveco, kiuj antaŭe fierigis kaj igis lin sin taksi nepre virinloganta viro kaj nun kaŭzis al li iom da honto. Virino, kia tia altrangulino, kiu vojaĝis tra duono da mondo kaj loĝas en Seviljo, kiel sentrona reĝino! Jen inda allogaĵo!... Krom admiro je ŝia beleco, li spertis ian subulan senton, kiel alitempa bubo respektoplena al riĉuloj en lando, kie rango kaj riĉeco estas tiel gravaj aferoj. Ĉu li atingos, ke tiu virino ekamu lin! Kia gravega amintrigo!...

Lia kontraktfaristo, intima amiko de markizo Moraima kaj ankaŭ de plej ĉefaj altranguloj de Seviljo, kelkfoje parolis al li pri Doña Suno.

Post kelkjara foresto, ŝi revenis Seviljon antaŭ malmultaj monatoj kaj vekis entuziasmon ĉe la junularo. Ŝi revenis post longa, fremdlanda restado, deziregante ĝui tipajn aferojn el Andaluzio: ŝin multe plaĉis la popolaj moroj kaj ĉio ŝajnis al ŝi tre interesa, tre... belarta. Por ĉeesti ludbatalojn, ŝi vestis sin per antikva, popolvirina kostumo kaj imitis la sintenadon kaj movojn de la graciaj sinjorinoj pentritaj de Goya. Ŝi estis forta, sportema virino, kiun oni ofte vidis galoprajdanta tra la ĉirkaŭaĵoj de Seviljo kun nigra rajdjupo, vira jaketo, ruĝa kravato kaj

blanka, ronda ĉapelo sur ŝia ora hararo. Kelkfoje ŝi portis pikstangon krucmetitan sur la selantaŭaĵo kaj kun aro da amikoj iris en herbejon por persekuti kaj renversi taŭrojn, multe ĝuante per tiu brava kaj danĝera amuziĝo.

Ŝi ne estis tre juna. Gallardo konfuze memoris esti vidinta dum sia infanaĝo ŝin sidanta apud sia patrino en promenejo Ĉarmo, kvazaŭ ŝi estus luksa pupego, dum li, mizera bubo, kuris inter veturilaj radoj, serĉante cigarrestaĵojn. Ili nedubeble estis samaĝaj: ŝi certe preskaŭ tridekjara, sed tiel hele bela! tiel diferenca de la aliaj virinoj!... Ŝi ŝajnis kvazaŭ tropika paradizbirdo falinta en korton, inter kokinojn.

Don Josefo, la kontraktfaristo, konis ŝian historion... Frenezulino estas ja Doña Suno. Ŝia teatre romantika nomo bone rilatas kun ŝia originala karaktero kaj ŝiaj liberaj kutimoj kaj moroj.

Post morto de sia patrino ŝi heredis grandan riĉaĵon kaj edziniĝis en Madrido kun ia altrangulo sufiĉe pli aĝa, ol ŝi, sed liverpovanta al virino avida je lukso kaj novaĵoj okazon trairi la mondon, kiel edzino de ambasadoro, delegito de Hispanlando antaŭ la ĉefaj fremdregistaroj.

Kiom multe tiu virino amuziĝis, Johano! — diris la kontraktfaristo —. Kiom da kapoj ŝi frenezigis en la tuta Eŭropo dum dek jaroj! Ŝi estas kvazaŭ geografia libro kun malsupraj sekretnotoj en ĉiu paĝo. Certe, se ŝi rigardas atlason, ŝi faras memorigan kruceton apud ĉiun gravan ĉefurbon... Kaj la malfeliĉa ambasadoro! Li mortis probable pro enuo, ĉar por li restis neniu loko, kien iri. Ŝi amlogis la suprulojn. La edzo, ekzemple, iris en kortegon, kiel hispana ambasadoro, kaj post kelkaj monatoj la reĝino de tiu lando skribpetis al Hispanujo, por ke oni ŝanĝu la ambasadoron kun lia timinda edzino, kiun nomis la gazetoj "la terure amloga hispanino". Kiom da kronuloj ŝi kapturnis... La reĝinoj tremis, kiam Doña Suno alvenis, kiel se ŝi estus ĥolero. Fine por la malfeliĉa ambasadoro nur restis la Amerikaj respublikoj; sed, tial ke li estis sinjoro pli multe ŝatanta la reĝojn, li preferis morti... Kaj ne supozu, ke al ŝi sufiĉas, kiuj manĝas kaj dancas en reĝaj palacoj. Se estas vero ĉio, kion oni rakontas pri ŝi!... Ĉi tiu virino estas tre ekstremema: aŭ ĉio aŭ nenio: foje ŝi amlogas plej ĉefan altrangulon, foje ŝi kapricas al plej humila popolano. Oni rakontis al mi, ke en Ruslando ŝi penis enamigi iun el tiuj bombojetantoj; longhara, virinvizaĝa junulo pri ŝi ne atentanta, ĉar ŝi malhelpis lin por liaj aferoj. Kaj Doña Suno tial mem, pli kaj pli obstinis pri li, ĝis tio ke fine kaŭzis, ke oni kolpendigis lin. Ankaŭ oni diras, ke ŝi amrilatis en Parizo kun pentristo kaj eĉ oni certigas, ke li pentris ŝian nudan portreton, sed kun brako sur vizaĝo, por ke oni ne konu ŝin, kaj tio ke ŝia nudkorpa bildo fotolitografie estas sur alumetaj skatoletoj. Eble tio estas nevera: nur troigaĵoj. Pli certe ŝajnas, ke ŝi estis amantino de germana operverkisto: Se vi aŭdus al ŝi pianludi!... Kaj kanti! same bele, kiel kantistino el tiuj venantaj dum Pasko en teatron Sankta Ferdinando. Kaj ne nur ŝi kantas itale: ŝi parolas ĉiu-

lingve: france, germane, angle. Ŝia onklo, markizo Moraima, kiu, konfidence mi diras al vi, estas tiel malmulte inteligenta, kiel bovo, kiam li parolas pri ŝi en Kvardek-kvinana Klubo, li diras, ke eble eĉ ŝi scias latinlingvon (40)... Kia virino, Joĉjo! Kiel interesplena ŝi estas!

La kontraktfaristo parolis pri Doña Suno admire kaj konsideris eksterordinaraj kaj originalaj ĉiujn okazaĵojn de ŝia vivado, ĉu nedubeblajn, ĉu dubindajn. Ŝia rango kaj riĉeco inspiris al li same, kiel al Gallardo, respekton kaj bonvolemon. Ili parolis pri ŝi kun admiraj ridetoj. Tiuj samaj faktoj ĉe alia virino estus kaŭzintaj multegon da senrespektaj komentarioj kaj ili komparus certe ŝin kun vulpo (41).

— En Seviljo — daŭrigis la kontraktfaristo — ŝi bonege kondutis. Tial mi dubas, ĉu estas vera tio fremdlande farita, kion oni rakontas pri ŝi. Kalumnioj de kelkaj dandoj dezirantaj nesukcese enamigi ŝin!

Kaj, ridante pri la energio de ĉi tiu virino, kiu ĉe iaj okazoj estis brava kaj atakema, kiel viro, li ripetis la murmurojn, kiuj cirkulis en la kluboj de strato Serpentoj. Kiam la ambasadora vidvino venis loĝi en Seviljon, ĉiuj junuloj kortege kuniĝis ĉirkaŭ ŝin.

— Imagu, Joĉjo. Eleganta virino el ĉitie malofta stilo, mendanta siajn vestaĵojn en Parizon kaj siajn parfumojn en Londonon kaj krom tio amikino de reĝoj... Kvazaŭ ŝi estus taŭro fermarkita de plej famaj firmoj de taŭrproduktado... Ili iris post ŝi, kiel frenezuloj, kaj ŝi permesis al ili iajn liberaĵojn, ĉar deziris vivadi ĉe ili, kiel viro. Sed kelkaj tro libere agis pri ŝi, opiniante erare tian liberecon alia afero, kaj ili estis manfrapataj de ŝi kaj eĉ io pli malbona, Joĉjo. Ĉi tiu virino estas danĝera. Laŭ tio, kion oni rakontas, ŝi lerte skermas, boksas, kiel angla maristo, kaj konas la japanan lukton "jitsu". Unuvorte, iu kuraĝas petole pinĉeti ŝin kaj ŝi per siaj belaj, malgrandaj manoj, preskaŭ sen incito, kaptas lin kaj post nelonge, faras el li ja ĉifonon. Nun oni ĝenas ŝin malmulte, sed ŝiaj malamikoj malice parolas pri ŝi; kelkaj, fanfaronante pri neveraĵoj, aliaj, dirante eĉ, ke ŝi ne estas bela.

Doña Suno laŭ la kontraktfaristo montriĝis entuziasmigita de sia vivado en Seviljo. Post longa restado en nebulaj kaj malvarmaj landoj ŝi admiris nian hele lazuran ĉielon, nian milde oran, vintran sunon kaj multe laŭdis la vivdolĉecon en tiel... pentrinda lando.

— Ŝin multe plaĉas niaj ne etiketemaj moroj. Ŝi ŝajnas anglino el tiuj, kiuj venas en Sankta Semajno. Kiel se ŝi ne estus naskiĝinta en Seviljo! Kiel se ŝi unuafoje estus vidanta ĝin! Diras Doña Suno, ke loĝos somere fremdlande, sed vintre ĉi tie. Ŝi estas tro sata je sia vivado en palacoj kaj kortegoj kaj, se vi scius kun kiaj ŝi rilatas!... Ŝi aniĝis al plej popola asocio religia, al tiu de Kristo de *Triana* aŭ Sanktega "Bestido" kaj elspezis multe da mono por "*manzanilla*" por la societanoj. Kelkajn noktojn ŝi venigas en sian hejmon multegon da gitaristoj

kaj dancistinoj; ĉiujn knabinojn, kiuj en Seviljo lernas kanti kaj danci. Kun ili iras iliaj majstroj kaj familioj kaj eĉ plej malproksimaj parencoj; ĉiuj manĝas grandan kvanton da olivoj kaj kolbaso kaj drinkas vinon. Doña Suno, sidante sur apogseĝo, kiel reĝino, restas dum kelkaj horoj kaj petas iun post alia ĉiujn dancojn de la lando. Ŝi diras, ke tio estas sama plezuro, kia tiu de reĝo, kiu ludigis nur por si sola operojn. Ŝiaj servistoj, altkreskuloj venintaj kun ŝi, rigidaj kaj seriozaj, kiel anglaj lordoj, estas frakvestitaj kaj portas grandajn pletojn por disdoni pokalojn da vino al la dancistinoj, kiuj en kompleta ebrieco tiretas iliajn vangoharojn kaj ĵetas al iliaj okuloj olivkernetojn. Kiel honestaj kaj ĝojigaj amuzaĵoj!... Nun Doña Suno akceptas matene Stringon; maljuna cigano instruanta ŝin gitarludi, iu el plej tipaj majstroj, kaj kiam vizitantoj ne ŝin trovas kun la muzikilo sur ŝiaj kruroj, tio estas, ĉar ŝi tenas mane oranĝon. Kiom multe da oranĝoj ŝi estas manĝinta, de kiam ŝi alvenis! Kaj ankoraŭ ŝi ne estas sata!

Tiel daŭrigis Don Josefo, rakontante al la matadoro strangaĵojn de Doña Suno.

Kvar tagojn, post kiam Gallardo vidis ŝin en paroĥa preĝejo Sankta Lorenzo, la kontraktfaristo iris al la spadulo iom mistere en kafejo de strato Serpentoj.

— Jen vi estas bonsortulo! Ĉu vi scias, kiu parolis al mi pri vi?

Kaj proksimigante sian buŝon al toreadora orelo li flustris:

— Doña Suno!

Ŝi demandis al li pri la matadoro kaj montris deziron, pri tio ke oni prezentu lin al ŝi. Li estis tiel multe originala, tiel multe hispana tipo!...

— Ŝi laŭ sia diro vidis, kiel vi mortigis taŭrojn: unuafoje en Madrido, alifoje, mi ne memoras kie... Ŝi aplaŭdis vin. Ŝi opinias, ke vi estas tre kuraĝa... Se okaze ŝi amakceptus vin! Kia honoro! Vi estus bofrato aŭ io simila de ĉiuj eŭropaj reĝoj.

Gallardo ridetis modeste, mallevante la okulojn; sed samtempe li afekte sintenis, kiel se ne konsideris malfacila nek eksterordinara la hipotezon de sia kontraktfaristo.

— Sed ne revu, Joĉjo — daŭrigis ĉi tiu — Doña Suno deziras vidi deproksime toreadoron kun sama intereso, per kiu ŝi akceptas la lekcionojn de majstro Stringo. Enlandaj tipoj kaj nenio plu. "Venigu lin postmorgaŭ en *Tablaď'on*", ŝi diris al mi. Vi jam scias, kio estas tio: renversado je taŭroj de produktfirmo Moraima: festo, kiun aranĝis la markizo, por ke lia nevino amuziĝu. Ni iru; ankaŭ ŝi invitis min.

Post du tagoj la majstro kaj lia kontraktfaristo eliris posttagmeze el kvartalo Foiro, kiel bonaspektaj renversemuloj, inter ĝenerala scivolo de la personaro, kiu eliris ĉe la pordojn aŭ grupiĝis sur la trotuaron.

— Ili iras en *Tablaď'on* — oni diris —. Estos hodiaŭ taŭra renversado.

La kontraktfaristo, rajdante sur blanka kaj multosta ĉevalino, portis kampan veston konsistantan el dika jakego, drapa pantalono kun flavaj gamaŝoj kaj, sur

liaj femuroj, ledaj ŝirmiloj nomataj "zaĥonoj". La spadulo elektis por la festo la kutiman kaj tipan kostumon de la antikvaj toreadoroj, antaŭ kiam la modernaj moroj egaligis ĝin al tiu de la ceteraj homoj. Kovris lian kapon kalanesa (42), velura, frizitkvasta ĉapelo, kiun li fiksadis per rimeno apogata sur lia makzelo. La ĉemiza kolumo, sen kravato, estis fiksita per paro da briliantoj kaj du aliaj pli dikaj fulmis sur la blanka brustumo. Lia jaketo kaj veŝto estis vinkoloraj, kun nigraj rubandoj kaj kvastaj ornamaĵoj; la talia volvostrio, el ruĝa silko; lia alĝustigita pantaloneto el malhela punto rimarkigis la muskolhavajn kaj graciajn krurojn de la toreadoro kaj estis subgenue fiksita al ili per ligiloj kun nigra kokardo. Liaj ambrokoloraj gamaŝoj havis ledajn stripecojn laŭlonge sur ĝiaj fermrandoj kaj liaj botoj samkoloraj, duonkaŝitaj en larĝaj, arabaj piedingoj estis armitaj per grandaj, arĝentaj spronoj. Supre ĉe la antaŭaĵo de lia selo, sur multekolora, ĵereza lankovrilo, kies kvastaro pendis ambaŭflanken de lia ĉevalo, kuŝis griza jakego kun nigraj kubutpecoj kaj ruĝa subŝtofo.

Ambaŭ rajdis galope, portante sur ŝultro, kiel lancon, la pikstangon el glata kaj fortika ligno, kun buleto ĉe ĝia finiĝo por ŝirmi ĝian feran pinteton. Ilia paso tra la popola kvartalo okazigis ovacion. Hura la belfortuloj!

— Iru feliĉe, belkreskulo! Amuziĝu, sinjoro Johano! La virinoj salutis lin per mano.

Ili spronis siajn ĉevalojn por postlasi kurantan post ili knabaron kaj la mallarĝaj, blankmuraj stratoj pavimitaj per blugrizaj ŝtonoj tremis pro ritma, huffera bruo.

En kvieta strato kun nobelaj domoj de ventregaj kradoj kaj grandaj verandoj, kie loĝis Doña Suno, ili trovis aliajn renversemulojn, kiuj atendis antaŭ ŝia pordo senmove sur siaj ĉevaloj kaj sin apogante sur la pikstangoj. Ili estis junaj sinjoroj, parencoj aŭ amikoj ŝiaj, kiuj per afabla familiareco salutis la toreadoron kontente, ĉar li akompanos ilin.

Eliris el la domo markizo Moraima kaj supreniĝis tuj sur sian ĉevalon.

— Ŝi baldaŭ malsupreniros. Oni jam scias, ke virinoj... multe daŭrigas sian tualeton.

Kaj li diris ĉi tion per sia sentenca, solena dirmaniero, kvazaŭ dirus orakolon. Li estis alta kaj multosta maljunulo, kun grandaj kaj blankaj vangoharoj, inter kiuj liaj okuloj kaj buŝo konserviĝis infane naivaj. Pro sia ĝentileco kaj vortmodero, sia virnobla gestado kaj ridetsobreco markizo Moraima ŝajnis nobela, el pasinta tempo sinjoro, kiu sinvestis per rajdista kostumo, malamis la urban vivadon kaj estis ĝenata de sociaj postuloj de lia familio, kiam ĉi tiu restigis lin en Seviljo, dum li sopiris kuri tra la kamparo inter rajdantaj taŭrpaŝtistoj, kiujn li traktis per kamarada familiareco. Preskaŭ li forgesis skribi pro neuzado, sed tuj kiam oni parolis al li pri bravbestoj, taŭra kaj ĉevala produktado aŭ terkulturaj laboroj, brilis liaj okuloj kaj li parolis memfide, kiel lerta spertulo.

Nuboj kaŝis la sunon. Paliĝis la lumo origanta flankon de la blanka strato. Kelkaj rigardis ĉielen. Super la spaco inter ambaŭ tegmentrandoj preterpasis malhela nubego.

— Ne timu — diris la markizo sentence —. Kiam mi eliris straten, mi vidis papereton portatan de la vento laŭ ia direkto, kiun mi konas. Ne pluvos.

Kaj ĉiuj konvinke konsentis. Pluvi estas neeble, ĉar tion asertis markizo Moraima. Li konas veteron, kiel maljuna paŝtisto kaj neniam eraras.

Poste li alparolis Gallard'on.

— Mi liveros al vi ĉi tiun jaron bonegajn taŭrojn. Kiaj belaj bestoj! Mi esperas, ke vi mortigos ilin brave kaj lerte. Vi ja scias, ke mi lastjare ne tute kontentiĝis. La malfeliĉaj bestoj pli multe meritis.

Doña Suno aperis, tenante per mano sian nigran rajdjupon, sub kiun oni vidis altajn rajdbotojn el griza ledo. Ŝi portis viran ĉemizon kun ruĝa kravato, jaketon kaj veŝton el violkolora veluro, kaj gracie klinitan, kalanesan ĉapelon ankaŭ veluran, sur siaj oraj bukloj.

Ŝi supreniĝis malpeze sur la ĉevalon malgraŭ siaj ekscitantaj, karnaj belaĵoj kaj prenis la pikstangon, kiun servisto donis al ŝi. Ŝi salutis la amikojn, senkulpigante sin pro sia malakurateco, dum ŝiaj okuloj direktiĝis al Gallardo. La kontraktfaristo spronis sian ĉevalinon por proksimiĝi kaj prezenti lin; sed Doña Suno antaŭe iris al la toreadoro.

Gallardo estis embarasata antaŭ ŝi. Kia virino! Kion li diros al ŝi?...

Li vidis, ke ŝi etendis al li sian delikatan, bonege odorantan manon; senpripense pro embaraso li nur sciis forte premi ĝin per sia manego. Sed la rozblanka kaj glata maneto anstataŭ cedi al ĝia nevola kaj barbara premo, kiu kaŭzus aĵ iu ajn alia dolorkrion, streĉiĝis energie kaj facile liberiĝis el ĝi.

— Mi dankas vin, pro tio ke vi venis. Mi multe ĝojas koni vin.

Kaj Gallardo, konfuze konsciante, ke li ion devas respondi, diris per tremanta voĉo, kvazaŭ salutus taŭremulon.

— Dankon. Ĉu via familio bonfartas?...

Diskreta ekrido de Doña Suno perdiĝis inter la bruego de hufferoj, kiuj dum irado frapis kaj glitis sur la pavimo. Ŝi trotigis sian ĉevalon kaj ĉiuj sekvis ŝin, kiel eskorto. Gallardo malantaŭe rajdis honte konfuzite, ĉar li nebule divenis, ke diris malsaĝaĵon.

Ili galoprajdis tra la ĉirkaŭaĵoj de Seviljo, laŭlonge de la rivero; preterpasis la Oran Turon, iris tra aleoj de densaj ĝardenoj kun flava sablo kaj poste, tra ŝoseo, sur kies flankoj staris manĝotrinkejoj.

Kiam ili alvenis en *Tablada'n,* sur ĝian verdan ebenaĵon vidis nigran amason konsistantan el multaj personoj kaj veturiloj apud palisaro, kiu apartigis en la herbejo la taŭrejon, en kies interno estis la bestoj.

Rivero Guadalkiviro fluis laŭlonge la paŝtejon. Sur la kontraŭa, dekliva bordo

kuŝis vilaĝo *San Juan de Aznalfarache*, kronate per ruiniĝinta kastelo. La kampodomoj montris sian blankecon inter la grizarĝentaj olivarbaroj. Ĉe la kontraŭan flankon de la vasta horizonto, sur lazuran fundon, ĉe kiu ŝvebis kotonsimilaj nuboj, oni vidis Seviljon kun ĝia domaro superregata de la impona katedralmaso kaj ĉarmega turo *Giralda* milde rozkolora sub la posttagmeza lumo.

La rajdistoj antaŭeniris pene inter la miksita amaso. La scivolo, kiun kaŭzis la originalaĵoj de Doña Suno, altiris tien preskaŭ ĉiujn sinjorinojn kaj fraŭlinojn de Seviljo. La amikinoj salutis ŝin de siaj veturiloj kaj trovis ŝin tre bela en vira kostumo. Ŝiaj parencinoj, filinoj de la markizo, kelkaj kun siaj edzoj, konsilis al ŝi singardemon. Bonvolu, Suno! Ne faru frenezaĵojn!...

Iris la renversontaj rajdantoj en la taŭrejon kaj estis akceptataj, kiam transiris la palisaron, per aplaŭdado de la publiko alirinta por ĉeesti la feston.

La ĉevaloj, vidante kaj flarante de malproksime la bravbestojn, stariĝis sur siaj postaj kruroj kaj komencis eksalti kaj bleki, tenate de la firma mano de la rajdantoj.

Meze, en la ejo ĉirkaŭbarita per la palisaro estis la taŭroj. Kelkaj paŝtiĝis trankvile aŭ kuŝis nemove sur la ruĝete verdaj herboj de la vintra paŝtejo, kun fleksitaj kruroj kaj malalta nazpinto. Aliaj pli ribelemaj trotis al la rivero, kaj la maljunaj taŭroj, la saĝaj gvidbestoj, persekutis ilin, sonigante la brutaran sonorilon, kiu pendis de sia kolo, dum la paŝtistoj al ili helpis kunigi la unuajn per trafaj ŝtonoj ĵetitaj per siaj ŝtonĵetiloj al la kornoj de la forkurantoj.

La rajdantoj restis nemove dum longa tempo, kvazaŭ ili interkonsiliĝus antaŭ la avidaj rigardoj de la publiko atendanta ion eksterordinaran.

Kiu unue aliris, estis la markizo, akompanate de unu el siaj amikoj. Ambaŭ galope rajdis al la taŭroj kaj haltis ĉe ilia proksimeco. Tuj ili stariĝis sur siaj piedingoj, svingis la pikstangojn kaj kriegis por fortimigi ilin. Nigra, fortkrura taŭro foriris el la bestaro kaj kuris al la fundo de la ĉirkaŭbarita ejo.

Prave la markizo fieris pri sia taŭraro konsistanta el belaj bestoj konstante plibonigataj per zorga, gepatra elektado. Ili ja ne estis tiu kapmallevema bovo destinata por viandproduktado, kun malpura, malglata kaj sulkoplena felo, larĝa hufo kaj grandegaj kaj malbone metitaj kornoj. Ili estis nerve viglaj, fortike fortaj bestoj, kiuj dum kurado tremigis la teron, levigante polvan nubeton per siaj hufoj, kaj havis glatan kaj brilan felon, kiel luksa ĉevalo, ardajn okulojn, dikan kaj brave gracian kolon, mallongajn krurojn, maldikan kaj delikatan voston, akre malgrandajn kornojn sen difektoj, kvazaŭ ili estus artefaritaj, kaj ronde maldikajn hufojn tiel malmolajn, ke ili tranĉas herbon, kiel ŝtala ilo.

Kuris ambaŭ rajdantoj post la besto kaj ĉiu siaflanke pelis ĝin kaj baris al ĝi sindirekti al la rivero, ĝis kiam la markizo, spronante sian ĉevalon, proksimiĝis al la taŭro kun sia pikstango antaŭen kaj, piketpuŝante ĝin ĉe ĝian vostosupron,

sukcesis per kombinita puŝo de sia brako kaj tiu de la ĉevalo senekvilibrigi kaj renversi ĝin, pro kio ĝi ruliĝis tere kaj fine restis kun ĝia ventro supren, la kornoj metitaj teren kaj siaj kvar kruroj alten.

La rapideco kaj facileco, per kiuj la markizo faris tion, kaŭzis trans la palisaron entuziasman eksplodon. Hura la maljunuloj! Neniu komprenis la taŭrojn tiel lerte, kiel la markizo. Li regis ilin, kvazaŭ ili estus liaj filoj, vivante kun ili de ilia naskiĝo, ĝis kiam oni sendis ilin por morti en cirko, kiel herooj indaj je pli bona sorto.

Aliaj rajdantoj intencis aliri tuj por esti aplaŭdataj de la publiko; sed markizo Moraima kontraŭstaris kaj preferis, ke iru lia nevino. Se ŝi deziras renversi. estas pli konvene, ke tuj ŝi aliru, antaŭ kiam la taŭroj iĝos atakemaj pro daŭra persekutado.

Doña Suno spronis sian ĉevalon, kiu senĉese stariĝis sur siaj postaj kruroj maltrankvila pro la taŭra ĉeesto. La markizo volis akompani ŝin dum la kurado, sed ŝi malkonsentis. Ne: ŝi preferas Gallard'on, kiu estas toreadoro. Kie estas Gallardo? La matadoro, ankoraŭ hontante pro sia mallertaĵo, sin metis apud ŝin silente.

Ekrajdis ambaŭ galope al la taŭra amaso. La ĉevalo de Doña Suno kelkfoje, elmontrante sian ventron, stariĝis preskaŭ vertikale, kiel se ĝi ne volis iri antaŭen; sed la energia rajdantino daŭrigis al ĝi sian iradon. Gallardo svingis la pikstangon, dum li eljetis kriegojn, kiuj estis ja muĝoj same, kiel en la areno, kiam li atakincitis la taŭrojn.

Ne multe li penis por atingi, ke brava besto disiĝu el la taŭraro.

Foriris el ĝi blanka besto kun cinamkoloraj makuloj, grandega kaj pendanta kolo kaj tre akrepintaj kornoj. Ĝi kuris al la fundo de la ĉirkaŭbarita ejo, kiel se ĝi estis altirata de tiu loko, kaj Doña Suno galoprajdis post ĝi, sekvite de la spadulo.

— Atentu, sinjorino! — kriis Gallardo —. Tiu taŭro estas maljuna kaj malica!... Vin gardu; ĝi eble turniĝos kontraŭ vin.

Kaj tiel okazis. Kiam Doña Suno pretiĝis fari same, kiel ŝia onklo, oblikve rajdante al la brava besto por piketpuŝi ĉe ĝian vostosupron kaj ĝin renversi, la taŭro turniĝis konsciante danĝeron kaj haltis minace fronte al la persekutantoj. La ĉevalo de Doña Suno, kiun ŝi ne povis haltigi pro ĝia rapideco mem, preterpasis antaŭ la taŭro kaj tiu ĉi ekkuris poste, rezultante persekutanto anstataŭ persekutato.

Ne volis ŝi forkuri. Multaj miloj da personoj rigardis ŝin; ŝi timis ridojn de amikinoj kaj kompaton de viroj; sekve haltigis sian ĉevalon, ĝin turnis al la bravbesto kun pikstango sub brako, kiel pikrajdisto, kaj pikis per ĝi kolsupron de la taŭro, kiu muĝante antaŭeniris al ŝi kun mallevita kapo. La grandega kolo ruĝiĝis per ŝprucanta sango; sed la bravbesto daŭrigis sian antaŭeniron kun po-

tenca puŝiĝo, kvazaŭ ĝi ne sentis, ke ĝia vundo plivastiĝas, ĝis kiam ĝi metis la kornojn sub la ĉevalon kaj ĝin skuis kaj levis de la tero.

La rajdantino estis forpelata de la selo, samtempe ke emocia kriego el multaj centoj da buŝoj eksonis malproksime. Kiam la ĉevalo liberiĝis el la kornoj, ĝi kuris freneze kun sangomakulita ventro, rompiĝinta selzono kaj duonfalinta selo sur sia dorso.

La taŭro intencis persekuti ĝin, sed io pli proksima altiris ĝian atenton. Ĝi estis Doña Suno, kiu anstataŭ resti nemove sur tero ĵus leviĝis, reprenis sian pikstangon kaj ĝin brave metis sub sian brakon por ree batalinciti la bravbeston; freneza kuraĝaĵo kaŭzita de la penso, ke oni rigardas ŝin; nepre morta riskiĝo, antaŭ ol subporti timon kaj ridindecon.

Jam oni ne kriis trans la palisaro. La homa amaso estis nemova, pro teruro silenta. Per freneza galopado kaj en polvaj nuboj la tuta rajdantaro proksimiĝis kaj ŝajnis pli kaj pli granda al ŝi. Tamen tiu helpo estis malfrue alvenonta. La taŭro skrapis la teron per siaj antaŭaj kruroj kaj mallevis sian kapon por ataki tiun sentiman figureton, kiu ankoraŭ minacis ĝin per sia lanco. Simpla kornopiko kaj ŝi malaperos. Sed en ĉi tiu momento sovaĝa muĝo distris la taŭron kaj io ruĝa preterpasis apud ĝiaj okuloj, kvazaŭ fajra flamo.

Tio estis Gallardo, kiu eksaltis teren de sia ĉevalo, lasante la pikstangon por preni la jakegon, kiun li portis sur la sela antaŭaĵo.

— Heee!... Ataku!

Kaj la taŭro atakis kaj kuris post la ruĝan, jakegan subŝtofon, altirate de tiu kontraŭulo inda je ĝi, kaj malŝate prezentis sian voston al tiu juponigra kaj buste violkolora figuraĵo restanta, pro konfuzo kaŭzita de la danĝero, ankoraŭ kun sia lanco sub brako.

— Ne plu timu, Doña Suno, ĉar mi jam regas ĝin — diris la pala pro emocio toreadoro, ridetante, tial ke li estis certa pri sia lerteco.

Sen plia rimedo, ol sia jakega ludado, li malproksimigis la beston de la sinjorino kaj sin savis el ĝiaj atakoj per bellertaj flankeniĝoj.

La homa amaso, forgesante la ĵusan danĝeron, komencis entuziasme aplaŭdi. Kia feliĉa okazaĵo! Veni por ĉeesti simplan, taŭran renversadon kaj vidi senpage Gallard'on ludanta preskaŭ serioze, kiel en areno.

La toreadoro, ardigite de la fortaj atakoj de la bravbesto, forgesis Doñan Sunon kaj ĉiujn, kaj nur atentis sin liberigi el la unuaj. Turniĝis furioze la taŭro, tial ke la homo glitis nevundeble el ĝiaj kornoj, kaj ree sin ĵetis kontraŭ lin; sed ĉiam ĝi nur renkontis tiun ruĝan, jakegan flugaĵon.

Fine ĝi laciĝis kaj restis nemove kun ŝaŭmanta buŝo kaj mallevita kapo, kaj tiam Gallardo profitis la bestan miron por demeti sian ĉapelon kaj tuŝi per ĝi ĝian kolsupron. Fortega ekkriaro elflugis de trans la palisaro por premii ĉi tiun faron.

Eksonis krioj kaj brutaraj sonoriloj post Gallardo kaj aperis ĉirkaŭ la beston paŝtistoj kaj trankvilaj gvidbestoj, kiuj malrapide enmiksigis kaj irigis ĝin al la taŭraro.

Gallardo iris al sia ĉevalo, kiu restis samloke pro kutimo esti inter taŭroj. Li reprenis sian pikstangon, supreniĝis sur la rajdbeston kaj milde galoprajdis al la palisaro, daŭrigante tiel la bruan aplaŭdadon de la homamaso.

La rajdantoj, post kiam ili helpis Doñan Sunon, salutis tre entuziasme la spadulon. La kontraktfaristo okulsignis lin mistere.

— Amiko, vi agis ja ĝustatempe. Tre bone. Ja tre bone! Nun mi al vi certigas, ke vi sukcesos pri ŝi.

Ekster la ĉirkaŭbarita ejo, sur veturilo de la markizaj filinoj sidis Doña Suno. Ŝiaj korpremataj kuzinoj ĉirkaŭis ŝin kaj tuŝis ŝian tutan korpon, por eble trovi ion difektitan pro ŝia falo. Ili donis al ŝi glasojn da "*manzanilla*", por ŝin trankviligi, dum ŝi ridetis, kiel superulino, kaj kompate akceptis iliajn virinajn troaĵojn.

Kiam ŝi vidis, ke Gallardo sulkigas per sia ĉevalo la homamason inter svingataj ĉapeloj kaj etenditaj manoj, Doña Suno pli kompleze ridetis.

— Venu ĉi tien, Cid Campeador (43). Mi premu vian manon.

Kaj ree ili premis reciproke siajn manojn dum longa tempo.

Post la vespermanĝo en la matadora hejmo oni komentariis ĉi tiun okazaĵon, pri kiu oni parolis en la tuta urbo. Sinjorino Angustio montriĝis kontenta same, kiel post sukcesega ludbatalo. Ŝia filo savinta iun el tiuj sinjorinoj, kiujn ŝi rigardis admire, kutimiĝinte ilin riverenci dum multaj, servistaj jaroj!... Karmeno restis silente, ne sciante ja, kion opinii pri ĉi tiu okazintaĵo.

Pasis kelkaj tagoj, dum kiuj Gallardo sciis nenion pri Doña Suno. La kontraktfaristo forestis la urbon por ĉasi aprojn kun kelkaj amikoj el Kvardek-kvinana Klubo. Iun posttagmezon, preskaŭ vespere, Don Josefo iris serĉi lin en kafejon de strato Serpentoj, kie taŭremuloj kuniĝis. Li antaŭ du horoj estis alveninta de la ĉasado kaj tuj poste iris al la hejmo de Doña Suno, sekve de letereto atendanta lin en lia skribocambro.

— Nu, vi estas pli sovaĝa, ol lupo! — diris la kontraktfaristo, irigante la matadoron eksteren el la kafejo por pli libere paroli —. Tiu sinjorino esperis, ke vi vizitu ŝin. Dum multaj vesperoj ŝi ne eliris el sia hejmo, ĉar ŝi supozis, ke vi eble tuj venos. Tio ne decas, ĉar vi estis prezentata al ŝi kaj ja okazis tio, kion vi scias; vi devas ŝin viziti: almenaŭ por demandi pri ŝia sano.

La spadulo haltis kaj penseme gratis sian kapon sub la ĉapelon.

— Tio, estas, ĉar... — li murmuris nedecide — tio estas, ĉar... mi hontas. Jes, mi jam ĝin diris, jes, mi hontas. Vi ja scias, ke mi ne estas hontemulo, ke mi amsukcesas kaj scias alloge paroli virinojn tiel sprite, kiel iu ajn alia. Sed por ĉi tiu ne. Ŝi estas sinjorino tre multe scianta kaj, kiam mi estas antaŭ ŝi, mi rekonas

min malsaĝa kaj restas silenta aŭ, se ne, mi nur diras malspritaĵojn. Do, Don Josefo... Mi ne iros! Mi ne povas iri!

Sed la kontraktfaristo, kun certeco lin konvinki, kondukis lin al la hejmo de Doña Suno, rakontante al li ilian ĵusan interparoladon. Ŝi konsideras sin iom ofendita de Gallardo. Plej ĉefaj personoj de Seviljo vizitis ŝin pro ŝia okazintaĵo en *Tablada,* kaj li ne.

— Vi ja scias, ke al toreadoro konvenas amike rilati kun altranguloj. Estas necese konduti ĝentile kaj pruvi, ke oni ne estas paŝtisto kreskinta inter brutoj. Tiel altranga sinjorino, kiu estimas kaj atendas vin!... Nu, mi iros kun vi.

— Ha! Se vi akompanos min!...

Kaj Gallardo ĝue spiris dirante tion, kiel se li liberigis sin el peza timego.

Ili eniris la hejmon de Doña Suno. Ĝia korto estis arabstila, kun multekoloraj arkadoj delikate traĉizitaj, kiuj memorigis tiujn de *Alhambra.* Fontano, en kies vazo naĝis oraj fiŝoj, dolĉe unutone kantadis meze de vespera silento. En la kvar flankaj koridoroj kun artlaborita plafono, disigataj de la korto per marmora, arkada kolonaro, mirigis la toreadoron antikvaj ĉizitaj ŝrankoj, malhelaj pentraĵoj pri palegaj sanktuloj kaj praavaj mebloj el ŝimplena fero kaj tinemanĝita ligno, kvazaŭ pafita per plumbbuletaro.

Servisto invitis ilin supreniri tra larĝa, marmora ŝtuparo kaj tie la toreadoro remiris, ĉar estis altarfrontoj kun neklaraj bildoj sur ora fundo; madonaj korpoj, kiuj ŝajnis skulptitaj per hakbatoj, kun palaj koloroj kaj velkinta oro, devenantaj el malnovaj altaroj; murtapiŝoj, kies kolora tono estis milde velkintfolia, borderitaj per floroj kaj pomoj kun scenoj de Kalvario (44) aŭ multvilaj viroj kun kornoj kaj hufoj, kiujn ŝajne ludis kelkaj preskaŭ nudaj junulinoj.

— Kia mallertulo mi estas! — li mire diris al sia kontraktfaristo —. Jen mi antaŭe opiniis ĉiun ĉi nur taŭga por monaĥejoj!... kaj tamen, kiom multe ŝajnas la altranguloj ŝati ĝin!

Supre oni eklumigis laŭ ilia paso la elektrajn lampojn, dum ankoraŭ brilis lastaj, vesperaj helaĵoj ĉe la fenestraj vitroj.

Gallardo plu remiris. Li fieris pro siaj pezaj kaj riĉaj mebloj senditaj el Madrido, ĉiuj kun helkoloraj silkoj kaj komplikaj ĉizlaboroj, kiuj ŝajnis laŭtege proklami, kiom multe ili kostis, kaj li sentiĝis konfuzata ĉi tie, ĉar nur estis malfortikaj kaj malpezaj, blankaj aŭ verdaj seĝoj, simplaj tabloj aŭ ŝrankoj, unukoloraj muroj nur ornamitaj per malgrandaj pentraĵoj maldense dismetitaj kaj pendantaj per dikaj ŝnuroj; glazurita kaj subtila lukso, kiel lignaĵista afero. Li hontis pro sia propra miro kaj pro tio, kion li konsideris plej supera lukso "Kia malklerulo mi estas!" Kaj, kiam li sidiĝis, li tion faris malfide, ĉar timis, ke la seĝo krake rompiĝu pro lia pezo.

Kiam aperis Doña Suno, li ĉesis pensi pri tio ĉi. Li vidis ŝin, kiel neniam ŝin vidis, sen mantilo nek ĉapelo, kun tute videbla, ora hararo plene praviganta ŝian

romantikan nomon. Ŝiaj belaj brakoj eliĝis el manikoj funelformaj de japana tuniko, kies randoj kruciĝis sur ŝia brusto kaj dekoltis belegan gorĝon indan je patrino Evo. Kiam ŝi movis siajn manojn, ĉarme brilis ĉiukoloraj ŝtonjuveloj fiksitaj sur strangaj ringoj tute kovrantaj la fingrojn. Sur ŝiaj freŝaj antaŭbrakoj tintis oraj braceletoj; kelkaj, el orienta filigrano, surhavis misterajn skribaĵojn; aliaj, masivaj, tenis aron da pendantaj amuletoj kaj fremdaj figuretoj, kiuj memorigis malproksimajn landojn.

Ŝi metis dum konversacio iun kruron sur la alian per vira senpriokupo kaj sur la pieda pinto dancadis ruĝa pantuflo malgranda kvazaŭ ludilo, kun alta, ora kalkanumo tute dike brodita.

La oreloj de Gallardo zumis, liaj okuloj nebuliĝis, li nur klare vidis helajn okulojn fikse rigardantajn lin per mikse karesa kaj ironia maniero. Por kaŝi sian emocion, li ridetis montrante siajn dentojn, kun mieno de infano, kiu deziras esti agrabla.

— Ne sinjorino... Tre danka. Tio valoris neniom.

Li modeste respondis tiel la dankajn vortojn de Doña Suno pri lia sava ago en la pasinta tago.

Iom post iom Gallardo iĝis pli trankvila. La sinjorino kaj la kontraktfaristo parolis pri taŭroj kaj tio produktis en li subitan memfidon. Ŝi vidis kelkfoje, kiel li mortigis ilin, kaj ŝi ĝuste memoris pri ĝiaj ĉefaj okazaĵoj. Gallardo sentiĝis fiera, ĉar tiu altrangulino rigardadis lin dum tiaj momentoj kaj eĉ freŝe memoras pri tio.

Ŝi malfermis lakitan skatolon kun strangaj floroj kaj prezentis al ambaŭ viroj cigaredojn kun ora suĉparto, kiuj odoris pike kaj strange.

— Ili havas opion kaj estas tre agrablaj.

Ŝi bruligis iun kaj sekvis ĝiajn fumajn spiralojn, rigardante ilin per siaj verdaj okuloj, kiuj tremis, kiel fluida oro, pro la rebriloj produktitaj de lumo.

La toreadoro, kutimante fumi plengustan tabakon el Habano, suĉis scivoleme ĉi tiun cigaredon. Kiel pajlo: sinjorina plezuro; sed la stranga parfumo disportita de la fumo ŝajnis malrapide kuraĝigi lin.

Doña Suno, lin rigardante fikse, demandis al li pri lia vivado. Ŝi deziris koni la kulisojn de la gloro, la fosaĵon de la famo, la mizeran kaj vageman vivadon de toreadoro, antaŭ kiam li atingas la publikan aklamon, kaj Gallardo pro subita konfido multe paroladis, rakontante siajn unuajn tempojn kaj pli speciale sian humilan devenon, pri kiu li fiere kaj ĝue daŭre detalis, kvankam silentante, kion li konsideris hontinda el sia aventurema knabeco.

— Tre interesa... Tre originala! — diris la bela sinjorino.

Kaj ŝi forigis sian rigardon de la toreadoro por revi en la spacon pri io nevidebla.

— La plej brava homo el la mondo! — ekdiris Don Josefo per senbrida entu-

ziasmo... kredu min, Suno; ne ekzistas alia, kiel li. Kaj, kion diri pri lia fortikeco por kornovundoj?...

Kontenta pro tiu fortikeco, kvazaŭ li estus lia naskinto, li priskribis tra liaj vestoj ĉiujn al li okazintajn vundojn same, kiel se li ilin vidus. La okuloj de Doña Suno sekvis lin laŭ tiu anatomia promenado kun sincera admiro. Vera heroo; timema, hontema, simpla, kiel ĉiuj fortuloj.

La kontraktfaristo intencis ekadiaŭi ŝin. Jam estas pli malfrue, ol la sepa, kaj oni atendas lin hejme. Doña Suno stariĝis ridetante, sed energie, por bari ilian foriron. Ili restos kaj vespermanĝos kun ŝi: senetiketa invito. Tiun nokton ŝi atendas neniun. La markizo kaj lia familio foriris en bienon.

— Mi estas tute sola... Kontraŭdiru neniom; mi estras. Vi restos kun mi por pentofari.

Kaj, kiel se ŝiaj ordonoj ne povus esti kontraŭataj, ŝi eliris el la ĉambro.

La kontraktfaristo protestis. Ne; li devas foriri hejmen; li estas alveninta tiun ĉi posttagmezon mem kaj lia familio apenaŭ lin vidis. Krome, li estas invitinta du amikojn. Pri la matadoro al li ŝajnas dece kaj nature, ke li restu. Ja la invito estis por li.

— Nu, restu kun mi! — diris timplene la spadulo —. Malbenaĵo!... Ne lasu min sola. Mi ne scios, kion fari; mi ne scios, kion diri.

Post kvarono da horo reaperis Doña Suno; sed aliaspekte, sen tiu fremda negligo, per kiu ŝi akceptis ilin, sed vestite per iu el la vestoj senditaj el Parizo, kiuj mirigis kaj malesperigis siajn parencinojn kaj amikinojn.

Don Josefo reinsistis. Li estas tuj forironta; neeble alie; sed la matadoro restos. Li mem avizos ĉe lia hejmo, por ke oni ne atendu lin.

Alifoje Gallardo mienis helppeteme; sed li trankviliĝis pro rigardo de la kontraktfaristo.

— Ne timu — murmuris ĉi tiu, kiam iris al la pordo —. Ĉu vi konsideras min infano? Mi diros, ke vi vespermanĝas kun taŭremuloj el Madrido.

Kian turmenton la spadulo suferis dum la unuaj vespermanĝaj momentoj!... Timigis lin la serioza kaj nobela lukso de tiu manĝoĉambro, kie ŝajnis perdiĝi ambaŭ, sidante unu antaŭ la alia ĉe la mezo de la granda tablo, apud grandegaj, arĝentaj kandelingoj kun elektraj kandeloj kaj rozkoloraj lumŝirmiloj. Kaŭzis al li respekton la imponaj, ceremoniaj kaj malvarmaj lakeoj, kiel se ili estis kutimiĝintaj al plej eksterordinaraj faktoj kaj nenio de ilia mastrino povis mirigi ilin. Li hontis pro sia vesto kaj ĝentilmanieroj, divenante la akran kontraston de tiu medio kaj sia aspekto.

Sed tiu unua tima kaj honta impreso malaperis iom post iom. Doña Suno ridis je lia eta apetito, ĉar li manĝis kaj trinkis tre malmulte. Gallardo fine admiris ŝin. Kiom multe manĝas tiu ĉi blondulino! Kutimiĝinte al malsinceraĵoj kaj troa modero de la fraŭlinoj de li konataj, kiuj konsideris malelegante multmanĝi, li

miris pro la granda manĝemo de Doña Suno kaj la eleganteco, per kiu ŝi plenumis sian nutran agon. Malaperis la manĝpecoj inter ŝiaj ruĝaj lipoj, lasinte neniun postsignon; funkciis ŝiaj makzeloj sen malpliigo je ŝia trankvila beleco; ŝi trinkis el sia pokalo kaj nek eĉ plej eta guto restis, kiel kolora perlo, sur ŝiaj lipaj kuniĝaĵoj. Tiel ja manĝas nur diinoj.

Gallardo, kuraĝiĝinte pro tia konduto, manĝis kaj precipe trinkis multe, intencante per la malsamaj kaj bongustaj vinoj forigi sian embarason, kiu restigis lin hontema antaŭ ŝi, sen plia rimedo, ol daŭre rideti kaj ripeti ĉiam "Tre danka".

La konversacio vigliĝis. La spadulo sin sentis parolema; li rakontis ridigajn okazaĵojn de la toreadora vivado kaj fine parolis pri la originalaj propagandoj de Naciao kaj la faroj de sia pikrajdisto Kuiraĵo; barbaro, kiu englutas kuiritajn kompletajn ovojn ne rompante ilin, estas sen duono da orelo, tial ke okaze ĝin forŝiris de li per mordo batalanta kontraŭ li kamarado, kaj, kiam li estas kontuzite portata en cirkan kuracejon, falas liten tiel plumbe pro feraĵoj kaj pezaj muskoloj, ke li trapikas la matracojn per siaj grandegaj spronoj kaj poste, oni bezonas malnajli lin, kvazaŭ li estus Kristo.

— Tre originala! Tre interesa!

Doña Suno ridetis, aŭskultante la detalojn de la ekzistado de tiuj krudaj viroj ĉiam batalantaj kontraŭ la morto, kiujn ŝi ĝis tiam admiris nur de malproksime.

Ĉampano kompletigis la ŝanĝiĝon de Gallardo kaj, kiam ili post la manĝo stariĝis, li prezentis sian brakon al la sinjorino, mirante pro sia propra sentimo. Ĉu oni ne agas tiamaniere ĉe la elegantuloj?... Li ja ne estas tiel nescianta, kiel ŝajnas unuavide.

En la salono, kie ili trinkis kafon, la spadulo vidis gitaron; nedubeble tiun, per kiu majstro Stringo ludinstruis ŝin. Doña Suno ĝin prezentis al li, petante, ke li ludu ion.

— Mi ne scias!... Mi estas plej sentaŭga el mondanoj, escepte por mortigi taŭrojn.

Li bedaŭris, ke tie ne ĉeestas la cerbetpikisto de lia toreadora bando; junulo, kiu kaŭzas sensacion ĉe la junulinoj pro sia granda lerteco por gitarludi.

Restis ambaŭ, daŭre silente. Gallardo sidis sur kanapo, suĉante bonegan, Habanan cigaron, kiun prezentis al li servisto. Doña Suno fumis iun el tiuj cigaredoj, kies parfumo duondormigis ŝin. La toreadoro peze malvigla pro digestado diris nenion kaj nur montris sian vivecon per stulte fiksa rideto.

La sinjorino, nedubeble enuigite de la silento, kiu respondis ŝiajn vortojn, sidiĝis antaŭ fortepianon kaj ĝiaj vire puŝitaj klavoj ekflugigis la gajajn sonojn de kantato el Malago.

— Hura!... Tio plaĉas min; multe plaĉas — diris la toreadoro, venkante sian malviglecon.

Kaj post la kantatoj el Malago eksonis tiuj el Seviljo kaj poste, ĉiuj Anda-

luziaj, melankoliaj kaj orientrevigaj muzikaĵoj; kiujn Doña Suno sciis parkere pro sia entuziasmo al la aferoj el sia regiono.

Gallardo ofte interrompis la muzikon per siaj ekdiroj same, kiel se li estus antaŭ estrado de kantkafejo.

— Hura por via lerteco! Alian kantaton!...

— Ĉu vin plaĉas muziko? — ŝi demandis.

Ho, multe!... Gallardo neniam demandis al si mem tion ĉi ĝis tiam, sed nedubeble ĝi plaĉis lin.

Doña Suno ŝanĝis laŭgrade la rapidan ritmon de la popolaj kantoj per alia pli malrapida, pli solena muziko, kiun la spadulo laŭ sia muzikscio rekonis, kiel "preĝeja muziko".

Jam li ne ĵetis entuziasmajn ekdirojn. Li sentis sin dolĉe nemoviĝema; liaj okuloj emis fermiĝi; li divenis, ke post ne longe li dormiĝos, se tia koncerto daŭros.

Por eviti tion, Gallardo rigardadis la belan sinjorinon sidantan dorse al li. Kian belan korpon ŝi havas! Liaj arabaj okuloj atentis pri ŝia ĉarma nuko kronita per ora, ribelema hararo. Absurda ideo dancis en lia malvigliĝinta kapo kaj helpis lin resti nedorme per ĝia tentekscito.

— Kion faros ĉi tiu virino, se mi leviĝos kaj paŝon post paŝo aliros kisi tiun tiel allogan nukon?

Sed tia intenco restis nur pense. Kaŭzis al li tiu virino nevenkeblan respekton. Li memoris krom tio, kion rakontis al li lia kontraktfaristo, la energion, per kiu ŝi forpelis la ĝenantajn burdojn, tiun ludon fremdlande lernitan, kiu permesis al ŝi facile venki homegon, kvazaŭ li estus marioneto... Li do daŭrigis rigardante ŝian belan nukon similan al luno ore nimbata tra nebulo, kiun dormemo metis antaŭ liajn okulojn. Certe estis li tuj ekdormonta. Li timis, ke subite malĝentila ronkaĵo tranĉu ĉi tiun muzikon nekompreneblan de li kaj tial mem certe belegan. Li pinĉis siajn krurojn por vigliĝi, etendis ambaŭflanken siajn brakojn; kovris sian buŝon per mano por oscedi nebrue.

Pasis multe da tempo. Gallardo ne sciis certe, ĉu li eble dormis. Subite el Doña Suno ekflugis voĉo, kiu forpelis lian penigan dormemon. Ŝi lasis flanken sian bluspiralan cigaredon kaj per duonlaŭta voĉo, kiu pli kontrastigis ŝiajn vortojn, igante ilin pasie tremantaj, ŝi ekkantis, akompanate de la fortepianaj melodioj.

La toreadoro antaŭenigis sian korpon por ion kompreni... Eĉ nek unu vorton. Ili estis fremdaj kantatoj. "Malbenaĵo! Kial ne tango aŭ *soleá?*... (45). Ĉu estis eble ne dormiĝi tiel?"

Doña Suno metis siajn fingrojn sur la klavojn dum ŝia rigardo vagadis alten; ŝi postenigis sian kapon kaj ŝia forta brusto tremis pro la muzikaj sopiroj.

Tio estis la preĝo de Elso, plendo de blonda virgulino, revanta pri forta viro; la bela heroo nevenkebla de la viroj kaj dolĉa kaj timema por la virinoj.

Ŝi sonĝis nedorme, kiam kantis, kaj igis siajn vortojn treme pasiaj, dum emociaj larmoj ekmontriĝis sur ŝiaj okuloj. Tiu forta, simpla viro! Tiu heroo!... Eble estas post ŝi... Kial ne?

Li certe ne legende aspektas, kiel la alia; li estas kruda kaj mallerta; sed ŝi ankoraŭ klare memoras pri la braveco, per kiu li antaŭ kelkaj tagoj rapidis helpi ŝin, pri la memfido, per kiu li ridetante batalis kontraŭ muĝanta taŭro same, kiel la herooj de Wagner agis kontraŭ teruregaj drakoj. Jes; li estas ŝia heroo.

Kaj de piedoj ĝis kapo, skuate de volupta timo, antaŭkonsiderante sin venkita, ŝi kredis diveni la dolĉan danĝeron, kiu antaŭeniris post ŝi. Ŝi image vidis la heroon, la batalanton leviĝanta malrapide de la kanapo kun siaj arabaj okuloj fikse rigardantaj ŝin; ŝi aŭdis liajn nebruajn paŝojn; sentis, kiel liaj manoj metiĝis sur ŝiajn ŝultrojn, poste ardan kison sur la nukon, ampasian markon, kiu por ĉiam signos kaj igos ŝin lia sklavino... Sed la romanco finiĝis, sen tio ke io okazis, sen tio ke ŝi sentis sur sia dorso alian impreson krom siaj propraj ektremoj pro timema amdeziro.

Seniluziigite pro tio, ŝi turnis la fortepianan tabureton kaj la muziko ĉesis. La heroo estis antaŭ ŝi profunde sidante sur la kanapo, kun alumeto ĉe mano por intenci kvarafoje bruligi sian cigaron, kaj malfermante treege siajn okulojn por sin defendi kontraŭ la sentuma malvigliĝo.

Kiam li vidis ŝin rigardanta lin fikse, Gallardo stariĝis... Ha: la sopirata momento estis tuj alvenonta. La heroo estis ironta al ŝi por ŝin premi vire pasie, por venki ŝin kaj fari el ŝi amproprajon.

— Bonan nokton, Doña Suno!... Mi foriras; estas malfrue. Vi certe deziras ripozi.

Pro surprizo kaj ofendita propramo ŝi ankaŭ stariĝis kaj, ne sciante kion faris, ŝi etendis al li sian manon... Mallerta kaj simpla, kiel heroo!

Ŝi pensis amase pri ĉiuj virinaj konvencioj, pri la tradiciaj dececoj, kiujn forgesas neniu virino, eĉ kiam ŝi plej multe emas cedi al amo. Ŝia deziro ne estas ebla... Li venis unuafoje en ŝian hejmon! Nek eta, ŝajna defendo!... Ĉu iri ŝi al li!... Sed, kiam ŝi premis la spadulan manon kaj vidis liajn okulojn, okuloj nur sciantaj rigardadi fikse pasie, dum fidis al muta obstino liajn timemajn esperojn, ŝi nur diris:

— Ne foriru... Venu: venu!

IV

Grava kontentigaĵo por lia vanteco kuniĝis al aliaj multnombraj, kiuj jam fierigis Gallard'on pri si mem.

Kiam li parolis kun markizo Moraima, rigardadis lin per preskaŭ fila amo. Tiu vestita kiel kampulo sinjoro, maldelikata centaŭro portanta ledajn femurŝirmilojn kaj fortikan pikstangon, estis ja altrangulo, kiu povis kovri sian tutan bruston per ordenaj skarpoj kaj krucoj kaj iri en la reĝan palacon, vestite per brodaĵplena kasako (46) kun ora ŝlosilo fiksita sur ĝian baskon (47). Lia plej malproksima praavo alvenis en Seviljon kun la monarĥo forpelinta la maŭrojn, kaj por premii liajn militfarojn, li ricevis vastegajn, al la malamikoj forprenitajn teritoriojn, kies restaĵoj estis tiuj vastaj ebenaĵoj, sur kiuj paŝtiĝis nuntempe la markizaj taŭroj. Liaj plej proksimaj avoj estis amikoj kaj konsilistoj de monarĥoj kaj elspezis pro la kortega lukso grandan parton el sia havaĵo. Kaj ĉi tiu nobela sinjoro bonkora kaj sincera, kiu vivadis simple, kiel kampulo, malgraŭ sia tre nobela praavaro, estis por Gallardo, kvazaŭ proksima parenco.

La filo de la ŝuflikisto intime fieris same, kiel se li estus apartenanta al lia nobela familio. Markizo Moraima estas lia onklo kaj, kvankam li ne rajtis tion diri publike, nek tiu parenceco estis laŭleĝa, li konsolis sin pensante, ke li superregas virinon el lia familio, dank'al amrilato, ŝajnanta malobei ĉiujn leĝojn kaj rasajn antaŭjuĝojn. Liaj kuzoj aŭ pli-malpli proksimaj parencoj estas ankaŭ ĉiuj ĉi junaj sinjoroj antaŭe akceptintaj lin per tiu malŝata familiareco, per kiu altrangaj taŭremuloj kutime parolas toreadorojn, kaj ektraktataj de li nun, kiel liaj egaluloj.

Kutimiĝinte, al tio ke Doña Suno parolis pri ili kun parenca familiareco, Gallardo opiniis ne digne trakti ilin alie.

Lia vivmaniero kaj kutimoj ŝanĝiĝis. Li malmulte iris en la kafejojn de strato Serpentoj, kien kunvenis la taŭremuloj. Ili estis bonuloj simplaj kaj entuziasmemaj, sed ne gravaj: malgrandskalaj komercistoj, laboristoj fariĝintaj mastroj, subaj oficistoj, vaguloj sen profesio mirakle vivantaj per misteraj rimedoj, sen alia konata metio ekster pritaŭra parolado.

Preterpasis Gallardo antaŭ la fenestregoj de la kafejoj, salutante siajn entuziasmulojn, kiuj respondis lin per grandaj mansignoj, por ke li eniru. "Tuj mi revenos". Kaj li ne revenis, ĉar iris en samstratan societon, aristokrata klubo kun lakeoj vestitaj per pantaloneto, impona, gotika ornamaro kaj arĝentaj manĝilaroj sur la tabloj.

La filo de sinjorino Angustio malmodeste emociiĝis ĉiufoje, kiam li pasis inter la militiste rigidaj servistoj en siaj nigraj frakoj, kaj impona, kvazaŭ juĝisto, lakeo prenis lian ĉapelon kaj bastonon. Ja estas plaĉe rilati kun tiom da altranguloj. La junuloj, profunde sidante sur altaj apogseĝoj indaj je romantika dramo, parolis pri ĉevaloj kaj virinoj (48) kaj ĝuste sciis pri ĉiuj dueloj okazintaj en Hispanlando, tial ke ĉiuj estis ofendiĝeme honoraj homoj devige kuraĝaj. En interna salono oni skermis: en alia oni vetludis de posttagmezo ĝis post la sunleviĝo. Ili toleris Gallard'on, kiel kluba originalaĵo, ĉar li estis deca toreadoro, vestis sin elegante, elspezis monon kaj rilatis kun altranguloj.

— Li estas tre klera — diris la klubanoj tre konvinkite; per kio ili konfesis, ke li sciis tiel multe, kiel ili.

Don Josefo, la kontraktfaristo, simpatia kaj el altranga familio, garantiis la toreadoron en tiu ĉi nova medio. Plie, Gallardo per sia antikva, buba ruzeco sciis atingi simpation de tiu brila junularo, ĉe kiu li trovis abunde parencojn.

Li multe vetludis. Tio estis plej taŭga rimedo por intime rilati kun lia nova familio. Li vetludis kaj perdis pro tiu malbona sorto karakterizanta laŭ vulgara diro homon bonsortan pri amaferoj. Li pasigis la noktojn en la "krimsalono", kiel ŝerce ili nomis la vetludejon, kaj tre malofte sukcesis gajni. Lia malbona sorto estis kaŭzo je kluba fiereco.

— Hieraŭ nokte malsukcese vetludis Gallardo — diris la klubanoj —. Li perdis almenaŭ dekunu mil pesetojn.

Kaj tiu famo de grandskala vetludisto same, kiel tiu trankvileco, per kiu li perdis sian monon, kaŭzis respekton al liaj bonaj amikoj, kiuj konsideris lin efika subtenanto de la kluba vetludado.

La nova pasio rapide superregis la spadulon. Vetludaj emocioj eĉ forgesigis al li kelkfoje lian altrangulinon, kiu estis laŭ lia ŝato plej interesa afero de la mondo. Vetludi kun la ĉefaj personoj el Seviljo! Esti traktata, kiel egalulo, de la junaj sinjoroj pro la frateco kreata de monpruntoj kaj komunaj emocioj!... Iun tagon falis subite sur la verdan, vetludan tablon granda, elektra lustro kun globoj lumigantaj la salonon. Ekokazis mallumiĝo kaj malordo, sed en tiu konfuziĝo eksonis ordone la voĉo de Gallardo.

— Trankviliĝu, sinjoroj. Ĉi tie okazis nenio. Ni daŭrigu la vetludon. Oni alportu kandelojn.

Kaj oni daŭrigis la vetludon, dum liaj kunuloj admiris lin pro lia energia diro eĉ pli multe, ol pro lia taŭrmortiga kuraĝo.

La amikoj de la kontraktfaristo demandis ĉi tiun pri la perdoj de Gallardo. Li ja malriĉiĝos: Ĉion, kion li gajnas ludbatalante, englutos vetludado. Sed Don Josefo ridetis malŝate, partoprenante la gloron de la matadoro.

Por ĉi tiu taŭrsezono, ni estas pli multe kontraktitaj, ol iu ajn alia. Ni enuos

mortigi taŭrojn kaj gajni monon .. Lasu, ke li amuziĝu. Por tio li riskas, sian vivon kaj estas neordinara persono... Plej brava homo el la mondo!

Don Josefo konsideris, kiel kromgloro de sia idolo, ke oni admiris lian trankvilecon por perdi monon. Al matadoro ne decas esti same, kiel ceteraj homoj ĉiam baraktantaj por centimoj. Por io li gajnas, kion li volas.

Plie, kontentigis lin, kiel propra venko, kiel propra faro, tio ke li atingis anigi Gallard'on en klubon, kien ne ĉiuj sukcesis eniĝi.

— Li estas nuntempa plejfamulo — li diris atakeme al tiuj, kiuj kritikis la novajn morojn de Gallardo —. Li ne rilatas kun friponoj nek iras en trinkejojn, kiel aliaj matadoroj. Kaj, kion tio signifas? Ke li estas toreadoro de la aristokrataro, ĉar li volas kaj povas... Ĉio cetera estas envio.

En sia nova ekzistado Gallardo ne nur iris ofte en sian klubon, sed ankaŭ li iujn fojojn eniris la societon Kvardek-kvinana Klubo. Ĝi estis kvazaŭ taŭrarta senato. La toreadoroj ne facile iris en ĝiajn salonegojn kaj tiel la respektindaj, taŭremaj doktoroj libere povis eldiri siajn doktrinojn.

Dum printempo kaj somero kuniĝis la kvardekkvinanoj en la societan halon kaj parton da strato, sidante sur junkaj apogseĝoj por atendi ludbatalajn telegramojn. Ili konfidis malmulte al gazetaj opinioj; ili krome bezonis koni la taŭrajn sciigojn antaŭ, kiam ĉi tiuj estis publikigataj en la ĵurnaloj. Ĉe la vespero alvenis telegramoj el ĉiuj urboj de Hispanlando, kie okazis taŭrfesto, kaj la klubanoj, post kiam aŭskultis ilian legadon kun religia seriozeco, diskutis kaj faris supozojn fundamentitajn sur la telegrafa vortsobreco.

Estis funkcio, kiu fierigis ilin, ĉar ĝi ilin starigis super la ceterulojn, resti oportune sidante ĉe la societa pordo en agrabla, malvarmeta aero kaj scii ĝuste sen pagitaj troigoj tion, kio okazis dum tiu mem posttagmezo en la taŭra cirko de Bilbao, en tiu de Koruno, de Barcelono aŭ Valencio; la taŭrajn orelojn, kiujn matadoro atingis, kiel honoran premion; la fajfadojn trafantajn alian, dum la ceteraj samurbanoj vivis en plej malgaja nescio kaj promenis sur la stratoj por atendi la ĵurnalan disvendadon. Kiam samregiona toreadoro estis kornovundita kaj alvenis telegramo anoncante tion, la emocio kaj samlandana solidareco kortuŝis la respektindajn senatanojn, eĉ tio ke ili sciigis al iu ajn amika pasanto la gravan sekreton. La sciigo disflugis tuj tra la kafejoj de strato Serpentoj kaj neniu dubis ĝin. Ĝi estis ja telegramo ricevita en Kvardek-kvinana Klubo.

La kontraktfaristo de Gallardo pro sia brua kaj atakema entuziasmo iom fuŝis la societan seriozecon; sed oni toleris lin, tial ke li estis antikva amiko kaj fine ĉiuj ridis pro liaj strangaĵoj. Estis neeble por tiuj saĝaj personoj diskuti trankvile kun Don Josefo pri la merito de ĉiu toreadoro. Multfoje, parolante pri Gallardo "kuraĝa, sed malmulte taŭrscianta junulo" ili rigardis time al la pordo.

— Josecĵo venas — oni diris kaj konversacio tuj rompiĝis.

Josecĵo eniris svingante alten telegramon.

— Ĉu vi ricevis sciigojn el Santandero?... Jen ili estas: Gallardo, per du spadpikoj, du taŭrojn kaj orelon post la dua. Nu; mi pravas! La plej brava homo el la mondo!

La koncerna telegramo de kvardek-kvinanoj ofte estis diferenca, sed la kontraktfaristo apenaŭ malŝate rigardis ĝin kaj tuj brue eksplodis proteste.

— Mensogaĵo! Ĉio envio! Mia papero pravas. Ĉi tie estas malamo, ĉar spite ilin Gallardo stariĝas super ĉiujn.

Kaj la klubanoj fine ridis je Don Josefo, montrante per fingrosigno (49), ke li frenezas, dum ili ŝercis pri la plej brava homo el la mondo kaj lia sprita kontraktfaristo.

Iom post iom, kiel neniam okazinta privilegio, li sukcesis enigi Gallard'on en la societon. Alvenis la toreadoro, pretekstante trovi sian kontraktfariston kaj fine sidis inter tiuj sinjoroj, multaj el kiuj eĉ ne estis siaj amikoj kaj elektis alian kontraŭ li konkurantan matadoron.

La ornamaro de la societo estis karakteriza: altaj sokloj el arabaj, diverskoloraj kaheloj kaj sur la senmakule blankaj muroj, multkoloraj afiŝoj anoncantaj antikvajn taŭrfestojn; konservataj, taŭraj kapoj famaj pro la granda nombro da ĉevaloj, kiujn ili mortigis, aŭ pro tio ke ili vundis iun famkonatan toreadoron; paradaj manteloj kaj spadoj, donacitaj de matadoroj tondintaj "sian haran vosteton", ĉar ili estis ne plu ludbatalontaj profesie.

La frakvestitaj lakeoj servis la sinjorojn, kiuj portis kampvestojn aŭ restis kun libera kolo en la varmaj, someraj tagoj. Dum Sankta Semajno kaj aliaj gravaj festoj de Seviljo, kiam altrangaj taŭremuloj el tuta Hispanlando vizitis kvardek-kvinanojn, la servistaro portis pantaloneton kaj blankan perukon kun ruĝa kaj flava livreo. Tiamaniere, kiel reĝaj lakeoj, ili servis pletojn kun glasoj da "*manzanilla*" al tiuj riĉaj sinjoroj, el kiuj kelkaj eĉ decidis ne porti kravaton.

Posttagmeze, kiam venis la plejaĝulo, lia moŝto markizo Moraima, la klubanoj ronde sidis sur profundaj apogseĝoj kaj la fama taŭrproduktisto okupis pli altan sidilon, ol la aliaj, kvazaŭ trono, de kie li prezidis la konversacion. Ĉiam ili ekparolis pri vetero. Ili estis preskaŭ ĉiuj, brutproduktistoj kaj riĉaj terkulturistoj, kiuj ĉiam bezonis atenti la kampajn necesojn kaj la veterajn ŝanĝojn. La markizo diris siajn saĝajn rimarkojn faritajn dum lia senĉesa rajdado en la Andaluzia ebenaĵo. senhoma, vastega, kun malproksimaj horizontoj, kvazaŭ tera maro, kie la taŭroj similis duondormantajn ŝarkojn, kiuj naĝis malrapide inter ĝiaj herbaj ondoj. Li ĉiam vidis sur pavimo, kiam aliris la klubon iun movatan de la vento papereton kaj tio sufiĉis al li por liaj antaŭdiroj. La malpluvemo, kruela malbonaĵo por la Andaluziaj kampoj, diskutigis ilin dum tutaj tagoj kaj, kiam post kelkaj atendsemajnoj nuba ĉielo lasis fali kelkajn dikajn kaj varmajn gutojn, la kampaj altranguloj ridetis kaj kontente frotis siajn manojn kaj la markizo diris solene, rigardante la malsekigitan trotuaron:

— Jen Dia beno!... Ĉiu el tiuj ĉi gutoj estas kvindura monero.

Kiam la vetero ne priokupis ilin, la brutoj estis ilia konversacia celo, precipe la taŭroj, pri kiuj ili parolis ameme, kiel se estus ligitaj al ili per rasa parenceco. La brutproduktistoj aŭskultis respekte la markizajn opiniojn, konsiderante lin pli ŝatinda, ĉar li estis pli riĉa. La taŭremuloj, kiuj kutime ne forestis la urbon, admiris lian lertecon por produkti bravbestojn. Kiom multe li scias!... Li montriĝis konvinkita pri la graveco de sia profesio, kiam parolis pri taŭrzorgado. El ĉiu deko da bovidoj, ok aŭ naŭ estas destinataj por viando post provo je la braveco de ĉiu el ili per pikstango. Nur unu aŭ du, kiuj montriĝis antaŭ ĝi bravaj kaj atakemaj, estas konsiderataj ludindaj bestoj, kaj oni vivigas ilin aparte kun ĉiuspecaj prizorgoj. Kaj, kiaj prizorgoj!...

— Taŭrproduktado — diris la markizo — devas ne esti negoco, sed luksaĵo. Oni pagas ludbatalan taŭron kvaroble aŭ kvinoble, ol bovo por buĉejo...; sed, kiom multe ĝi elspezigas!

Estas necese zorgi ĝin ĉiumomente, atenti pri paŝtaĵoj kaj akvoj, ĝin irigi de loko en lokon laŭ temperaturaj cirkonstancoj.

Ĉiu taŭro elspezigas pli multe, ol familio. Kaj, kiam ĝi estas jam tute taŭga, estas necese ĝin zorgi ĝis la lasta momento, por ke ĝi ne difektiĝu kaj iru bele en arenon, famigante la produktejan kokardon, kies rubandoj flirtas sur ĝia kolo.

La markizo en iuj urboj disputadis kun entreprenistoj kaj aŭtoritatuloj kaj eĉ ne volis doni siajn taŭrojn, ĉar la muzikejo de la taŭra cirko estis lokita sur la taŭrejoj. La muzikila bruo kapturnis la noblajn bestojn, malpliigante ilian bravecon kaj memfidon, kiam ili iris en arenon.

— Ili estas same, kiel ni — li diris ameme —. Nur al ili mankas parolkapablo... Kial mi diras, kiel ni? Iuj eĉ pli multe valoras, ol persono.

Kaj li parolis pri Lupeto; maljuna taŭro, gvidbesto, kiun li certe ne vendus, kvankam oni donus al li la tutan Seviljon kune kun ĝia turo *Giralda*. Apenaŭ li atingis galoprajdante tra la vastaj paŝtejoj la vidlimon de la taŭraro, en kiu vivadis tiu ŝateginda besto, sufiĉis al li krio por atentigi ĝin: "Lupeto!...". Kaj Lupeto, forlasante siajn kunulojn, venis renkonti la markizon kaj malsekigis boneme per sia nazpinto liajn rajdistajn botojn, malgraŭ tio ke ĝi estis fortega besto kaj ĝin timis ĉiuj ceteraj el ĝia taŭraro.

La taŭrproduktisto malsupreniĝis de la ĉevalo kaj prenis el siaj selsakoj pecon da ĉokolado por regali Lupeton, kiu danke balancis ĝian kapon armitan per grandegaj kornoj. Per brako apogita sur la gvidbestan kolon la markizo antaŭeniris trankvile en la grupon de taŭroj, kiuj svarmis malkviete kaj sovaĝe pro la homa ĉeesto. Neniu risko estis. Lupeto marŝis kiel hundo, ŝirmante la mastron per sia korpo kaj rigardis ĉien por trudi respekton al siaj kunuloj, per flamaj okuloj. Se iu pli kuraĝa alproksimiĝis por flari la markizon, ĝi renkontis la minacantajn

kornojn de la gvidbesto. Se kelkaj mallerte kaj peze ariĝis kaj baris pasi, Lupeto metis inter ili sian armitan kapon, farante per ĝi vojon.

Entuziasma kaj amema mieno montriĝis sur la markizan vizaĝon tute razitan escepte siajn vangojn, kiujn ornamis blankaj hararoj, kiam li memoris pri altvaloraj faroj de kelkaj bestoj el siaj paŝtejoj.

— La taŭro!... Plej nobla besto el la mondo! Se la homoj morale similus al ili, pli bone funkcius la socio. Jen ekzemple: la malfeliĉa Kolonelo. Ĉu vi memoras tiun noblegan beston?

Kaj li montris grandan fotografaĵon kun luksa kadro, kie bilde estis li mem multe pli juna, vestite per monta kostumo kaj ĉirkaŭate de kelkaj blankvestitaj infaninoj; ĉiuj sidis meze de herbejo sur preskaŭ nigra maso, ĉe kies ekstremo elmontriĝis kornoj. Ĉi tiu benko malhela kaj senforma, kun akra dorso, estis Kolonelo. Kvankam ĝi estis granda kaj brava kontraŭ la aliaj taŭroj, ĉi tiu besto kondutis serveme kaj ameme por la mastro kaj lia familio. Ĝi similis al tiuj grandaj kampohundoj sovaĝe atakemaj por nekonatuloj, kies orelojn kaj voston tamen tiras la dominfanoj; al kiuj ili per amemaj ronkaĵoj toleras ĉiujn petolaĵojn. La markizo iris kun siaj filinetoj kaj la besto flaris la blankajn jupetojn de la etulinoj, kiuj timeme prenis la patrajn krurojn, ĝis kiam per subita maltimo propra je infanoj ili fine gratis ĝian nazpinton. "Kuŝiĝu, Kolonelo!" Kolonelo obeis kaj restis kun falditaj kruroj, por ke la familio sidiĝu sur ĝiajn ripojn potence moviĝantajn pro spirado, kiel forĝa blovilo.

Post multa hezitado iun tagon la markizo vendis ĝin por la taŭrcirko de Pamplono kaj li ĉeestis la taŭrfeston. Moraima kortuŝate rakontis la okazintaĵon: liaj okuloj nebuliĝis pro emocio. En sia tuta vivado li vidis neniun taŭron, kiel ĝi. Ĝi iris en arenon bele kaj haltis brave en ĝia mezo kun miro pro la akra kontrasto de la taga heleco kaj la taŭreja mallumo kaj de la bruado el miloj da personoj kaj la silenta kvieteco de la bestokortoj. Sed, tuj post kiam pikis ĝin rajdisto, ĝi ŝajnis, kvazaŭ plenigus la tutan arenon per sia grandioza braveco.

— Efikis por ĝi nek homoj, nek ĉevaloj, nek io ajn. Rapide, kvazaŭ fulmo, li renversis ĉiujn ĉevalaĉojn, ĵetante aeren la pikrajdistojn. La piedirantaj toreadoroj kuregis; en la areno regis konfuzego. La publiko krie petis pluajn ĉevalojn kaj Kolonelo meze de la cirko atendis, ke iu alproksimiĝu por puŝĵetiĝi kontraŭ ĝin kaj ĝin renversruli. Neniam plu oni vidos ion similan pri nobleco kaj potenco. Sufiĉis alvoko, por ke ĝi ataku tiel noble kaj fortege, ke la publiko freneziĝis pro entuziasmo. Kiam sonis trumpetoj, por ke oni mortigu ĝin, malgraŭ dekkvar pikvundoj kaŭzitaj de la rajdistoj kaj kompleta nombro da pikiletoj portataj sur ĝia kolo, ĝi montriĝis tiel potenca kaj brava, kiel se ĝi ne estus foririnta el la paŝtejo. Tiam...

La taŭrproduktisto, alveninte en tiun parton de sia rakonto, haltis ĉiam por firmigi sian voĉon, kiu fariĝis tremanta.

Tiam... markizo Moraima, kiu estis en loĝio, troviĝis ne sciante kiel post la barilo, inter cirkaj servistoj kurantaj malkviete pro tiu akcidentplena ludbatalo, kaj proksime je la majstro, kiu pretigis sian ruĝtukon malrapide, kiel se li deziris prokrasti la momenton sin meti antaŭ tian potencan beston. "Kolonelo!" ekkriis la markizo, forigante antaŭen sian buston el la barilo kaj frapante per mano ĝiajn tabulojn.

La besto ne aliris, sed ĝi levis sian kapon por atenti tiujn kriojn, kiuj estis ja pasintaj rememorajoj de la lando ne plu vidota de ĝi. "Kolonelo!...". Ĝis kiam fine ĝi turnis sian kapon, vidis homon, kiu vokis ĝin de la barilo kaj atakis lin rekte. Sed meze de sia kurado ĝi malrapidiĝis kaj aliris kviete, ĝis kiam tuŝis per siaj kornoj la brakojn etenditajn al ĝi. Ĝi alvenis kun ruĝe glazurita kolo pro la sangofadenoj fluantaj el la bazo de la stangetoj alkroĉitaj sur ĝin kaj el la felaj ŝirajoj, kiuj malkovris bluajn muskolojn "Kolonelo! Mia filo!... Kaj la taŭro, kiel se ĝi komprenis ĉi tiujn amajn eksplodojn levis sian nazpinton, malsekigante per sia ŝaŭmo la vangoharojn de la taŭrproduktisto. "Kial vi portigis min ĉi tien?" ĝi ŝajnis diri per siaj bravaj okuloj, en kiujn sango alfluis. Kaj la markizo senkonscie kisis kelkfoje la bestan nazon malsekan pro la furioza spirado.

"Oni ne mortigu ĝin!" ekkriis bonkorulo el la benkaro kaj, kiel se ĉi tiuj vortoj enhavis la penson de la tuta publiko, eksplodo de krioj tremigis la konstruajon kaj samtempe miloj da poŝtukoj flirtis ĉe la benkaroj, kvazaŭ aroj da kolomboj. "Oni ne mortigu ĝin!". En tiu momento la homa amaso malŝatis sian propran amuziĝon, kortuŝate de neklara amemo, malamis la multkolore vestitan kaj neutile heroan toreadoron, admiris la bestan kuraĝon kaj sentiĝis malsupera al ĝi, konsciante ke inter tiom multaj miloj da raciuloj, nobleco kaj sentimentaleco estis ĉe tiu malfeliĉa besto.

— Mi reprenis ĝin — diris kortuŝate la markizo —. Mi redonis al la impresario liajn du mil pesetojn. Se necese mian tutan bienon mi estus doninta. Post unu monato en la paŝtejo, eĉ nek postsignoj restis sur ĝia dika kolo... Mi volis, ke tiu kuraĝulo mortu pro multaĝo; sed la bonuloj ne prosperas en ĉi tiu mondo. Malica taŭro kuraĝanta nek eĉ rekte rigardi ĝin, ĝin mortigis mallojale per kornopiko.

La markizo kaj liaj kamaradoj de taŭrproduktado ŝanĝis rapide ĉi tiun amemon al la bestoj en fierecon, kiun al ili kaŭzis ilia braveco. Per kia malŝato ili parolis pri la malamikoj de ludbatalado, pri la kriegantoj kontraŭ ĉi tiu arto je la nomo de bestprotektado. Malsaĝajoj de fremduloj! Eraroj de malkleruloj, kiuj nur konas tiujn ĉi bestojn per iliaj kornoj kaj konsideras egalaj bovon por buĉejo kaj ludbatalan taŭron. La hispana taŭro estas brava, sovaĝa besto: la plej kuraĝa besto el la mondo. Kaj ili memoris la multnombrajn batalojn de taŭroj kontraŭ timindaj leonoj kaj tigroj, okaze de kiuj ĉiam venkis nia nacia bravbesto.

La markizo ridis memorante alian el siaj bestoj. Oni pretigis en taŭra cirko

batalon de taŭro kontraŭ leono kaj tigro de fama dresisto, kaj la taŭrproduktisto sendis Barabason, malicega taŭro, kiun li apartigis en la herbejo, ĉar ĝi kornovundis siajn kamaradojn kaj multaj bestoj estis tiel mortigataj de ĝi.

— Ankaŭ mi vidis tion — diris Moraima —. Granda, fera kaĝo meze de la areno, kaj en ĝia interno, Barabaso. Oni enmetis unue la leonon, kaj tiu malbenita besto, profitante la malruzecon de la taŭro, eksaltis sur ĝian postaĵon kaj tuj komencis disŝiri ĝin per siaj ungegoj kaj dentoj. Barabaso saltadis furioze por forĵeti de si la leonon kaj estigi ĝin antaŭ siajn kornojn por povi sin defendi. Fine per rapida turniĝo ĝi sukcesis ĵeti antaŭ sin la leonon kaj hoki ĝin per korno kaj; jen, sinjoroj!... same, kiel se la leono estus pilko! La taŭro ĝin irigis de korno al korno multajn fojojn, skuante ĝin, kvazaŭ ĝi estus marioneto, ĝis kiam fine, malŝate ĝin ĵetis flanken kaj tie restis tiu, kiun oni nomas "reĝo de la bestaro", tute fleksiĝinte kaj dolore blekante, kiel kato, kiun oni batis per bastono... Poste oni enmetis la tigron kaj la afero daŭris eĉ malpli longe. Apenaŭ ĝi aperis, Barabaso kornohokis ĝin, ĝin ĵetis alten kaj post longa skuado flugsendis la tigron, kiel la leonon, teren, kie ĝi volviĝis sur si mem por ŝajni kompatinda... Kaj tiu Barabaso, kiu estis ja malica mokemulo, promenis tra la kaĝo, elpelis siajn ekskrementojn sur ambaŭ rabbestojn kaj, kiam la dresistoj elirigis ilin, ne sufiĉis unu sako da segaĵo por purigi la plankon, ĉar timo devigis al ili ellasi eksteren ĉiujn malpuraĵojn de sia korpo.

En Kvardek-kvinana Klubo ĉi tiuj rakontoj kaŭzis ĉiam grandajn ridojn. Ho la hispana taŭro!... Kiel neefikis rabbestoj kontraŭ ĝi!... Kaj montriĝis per iliaj ĝojaj ekdiroj nacia fiereco, kiel se la nobla kuraĝo de la hispana bravbesto signifus ankaŭ la superecon de la hispana lando kaj raso rilate al la cetera mondo.

Kiam Gallardo komencis viziti ofte la klubon, nova kaŭzo je konversacio interrompis la senfinajn diskutojn pri taŭroj aŭ terkulturo.

En Kvardek-kvinana Klubo same, kiel en la tuta urbo, oni ofte parolis pri Plumeto; rabisto fama pro sia sentimo, al kiu ĉiutage liveris novan famon la ne efikaj klopodoj de liaj persekutantoj. Rakontis la gazetoj liajn karakterajn strangaĵojn, kvazaŭ li estus nacia, grava persono; la registaro estis ofte demandata pri li en la parlamento kaj senato kaj ĝi promesis ĉiam lin kapti baldaŭ, sed neniam okazis tio; alfluis ĝendarmaro, konsistiganta ja armeon por lia persekutado, dum Plumeto ĉiam sola, sen plia helpo ekster sia karabeno kaj sia nelacigebla ĉevalo glitis, kvazaŭ fantomo, inter tiuj, kiuj preskaŭ estis kaptinte lin, batalis kontraŭ ili, se ili ne estis multaj, mortigante eble iun, kaj estis admire amata de la malriĉaj kampuloj; malfeliĉaj servutuloj de la vastegaj bienoj, kiuj konsideris la rabiston venĝanto de la malsatuloj, rapida kaj kruela justecfaristo simila al la antikvaj, tute armitaj juĝistoj de la rajdanta kavaliraro. Li postulis monon al la riĉuloj kaj per afekta maniero, kvazaŭ aktoro rigardata de multenombra publiko, monhelpis de tempo al tempo kompatindan maljunulinon aŭ multefilan kamplaboriston. Ĉi

tiun donacemon pligrandigis la komentarioj de la kampula amaso ĉiumomente parolanta pri Plumeto, sed blinda kaj surda, kiam la ordaj soldatoj demandis pri li.

Li pasis facile de iu provinco en alian, kiel lerta landkonanto, kaj la bienaj mastroj de Seviljo kaj Kordobo kontribuis egale per sia mono al lia subtenado. Dum semajnoj oni sciis nenion pri la bandito kaj subite li aperis en bieno aŭ iris en vilaĝon, ne timante danĝeron.

En Kvardek-kvinana Klubo oni rekte sciis pri li same, kiel se li estus matadoro.

— Plumeto estis antaŭhieraŭ en mia bieno — diris riĉa terkulturisto —. La bienestro donis al li tridek durojn kaj li foriris post la matenmanĝo.

Ili pacience toleris ĉi tiun kontribucion kaj nur komunikis siajn sciigojn al la amikoj. Denunco kaŭzus deklarojn kaj ĉiuspecajn ĝenojn. Por kio?... La ĝendarmaro ja ne efike persekutis la rabiston kaj, se ĉi tiu malamikiĝus kontraŭ la denuncintoj, iliaj bienoj sen iu ajn protekto riskus lian venĝadon.

Ili parolis pri Plumeto kaj liaj faroj sen indigno, ridetante, kiel se ĝi estus natura kaj ne evitebla malbonaĵo.

Ili estas malfeliĉuloj, kiujn trafis malbona okazaĵo, kaj forkuras al la kamparo. Mia patro (kiu pace ripozu) (50) konis famplenan Josefo-Marion kaj du fojojn manĝis kun li. Mi renkontis kelkajn ne tiel multe famajn, sed kiuj kaŭzis sufiĉe da malbono. Ili estas, kiel la taŭroj, noblaj simpluloj. Nur ili atakas, se oni pikas ilin; des pli multe, ju pli vundo doloras.

Lì estis ordoninta, ke en ĉiuj kampodomoj kaj paŝtistaj budoj de liaj vastaj bienoj oni donu al Plumeto, kion li petos, kaj laŭ tio, kion diris bienestroj kaj taŭraristoj, la bandito pro sia antikva, kampula respekto al la bonaj kaj donacemaj mastroj, parolis laŭdege pri li kaj diris, ke estas preta mortigi tiun, kiu ofendus eĉ nur iomete lian markizan moŝton. Malfeliĉulo! La mizeraĵo, kiun li petas, kiam prezentiĝas malsata kaj laca, neniel valoras la riskon lin inciti kaj altiri lian venĝemon.

La taŭrproduktisto, kiu ofte rajdadis sola tra la ebenaĵoj, kie paŝtiĝis liaj taŭroj, suspektis, ke li kelkfoje pasis apud Plumeto, ne konante lin. Eble li estis iu el la rajdantoj malriĉe aspektantaj, kiujn li renkontis en la senhoma, senvilaĝa kamparo kaj kiuj demetis sian seban ĉapelon por saluti, dirante per respekta natureco:

— Dio vin gardu, sinjoro markizo.

Moraima, parolante pri Plumeto atentis foje Gallard'on, kiu indignis kun novula ardeco kontraŭ la aŭtoritatuloj, ĉar ili ne sciis protekti la proprecon.

— Iun ajn tagon li prezentiĝos en *Rinconada'n*, mia kara — diris la markizo per ŝerca, andaluzia seriozeco.

— Malbenaĵo!... Tio ne plaĉas min, sinjoro markizo. Nu! ĉu por tio oni pagas tiel grandan imposton?...

Ja lin ne plaĉis renkonti tiun banditon en siaj ekskursoj tra *Rinconada*. Li estas bravulo por mortigi taŭrojn kaj en ludbatalejo forgesas sian vivamon; sed tiuj profesiaj hommortigistoj kaŭzis al li maltrankvilon, kiel nekonataĵo.

Lia familio loĝis en la bieno. Sinjorino Angustio post ekzistado pasinta en mizeraj, urbaj loĝejoj amis la kamparan vivon. Karmenon ankaŭ ĝi plaĉis. Ŝia laborema karaktero ŝin puŝis al ĉeesto kaj partopreno je la bienaj laboroj kaj ŝi ĝuis samtempe sian dolĉan situacion, vidante siajn vastajn proprajojn. Krome, la filoj de la ledaĵisto, tiuj genevoj, kiuj konsolis ŝian nenaskemon, bezonis por sia sano la kampan aeron.

Gallardo alirigis sian familion por loĝi en la bieno dum kelke da tempo, promesante kuniĝi al ĝi; sed li prokrastis la vojaĝon per ĉiuspecaj pretekstoj. Li loĝis en sia urba domo sen alia akompano ekster Strekaro, kio permesis al li konduti, kiel fraŭlo, kaj ĝui tutan liberecon por sia amrilato kun Doña Suno.

Li opiniis tiun epokon la plej bona el sia vivado. Kelkfoje li eĉ forgesis *Rinconada'n* kaj ĝiajn loĝantojn.

Rajdante sur vigle fortaj ĉevaloj, promenis Doña Suno kaj li kun samaj kostumoj, kiujn ili portis dum la tago, kiam ili sin reciproke konis, iujn fojojn solaj kaj aliajn akompanate de Don Josefo, kiu malpliigis per sia ĉeesto la publikan skandalon kaŭzatan de ĉi tiu para elmontriĝo. Ilia celo estis, ĉu vidi taŭrojn en la herbejoj proksimaj al Seviljo, ĉu piketi junajn taŭridojn ĉe la markizaj bovinaroj, kaj Doña Suno, kiun danĝero entuziasmigis, ardiĝis, kiam juna taŭro anstataŭ forkuri atakis ŝin, tial ke ĝi estis pikata per pikstango, kio ofte devigis Gallard'on iri por ŝia helpo.

Aliajn fojojn ili rajdis al fervoja stacio Kunigo, se oni estis anoncinta, ke tie okazos taŭra enkestigado por la eksterordinaraj ludbataloj de la vintra finiĝo.

Doña Suno scivole rigardadis ĉi tiun ejon. La plej grava, taŭra eksportstacio el la mondo. Ĝi konsistis el vastaj kortoj apud la fervojo. Grandaj, lignaj kestoj grizpentritaj, sur kvar radetoj kaj kun du leveblaj glitpordoj estis tie laŭvice metitaj grandnombre, atendante la taŭgan, ekspedan sezonon t. e: somero.

Ĉi tiuj kestegoj estis vojaĝinte tra tuta Hispanlando, portante interne bravan taŭron ĝis malproksima cirko, de kie ili revenis malplenaj por ree emporti multajn pluajn, unu post la alia.

La trompo elpensita de la homo, la ruza homlerteco, sukcesis facile sendi, kvazaŭ komercaĵojn, ĉi tiujn bravbestojn kutimiĝintajn al la kampa libereco. Alvenis la taŭroj, kiuj estis ekspedotaj vagonare, galopante tra la larĝa kaj polva ŝoseo, inter du bariloj el ferfadeno kun akraj pintoj. Ili venis de malproksimaj paŝtejoj kaj, kiam ili iris en la proksimecon de Kunigo, iliaj kondukantoj kurigis ilin freneze, por pli facile ilin trompi per tia rapideco.

Unue rajdis, per kiel eble plej rapida galopo de siaj ĉevaloj, la ĉefpaŝtistoj kaj paŝtistoj kun pikstango sur ŝultro, kaj post ili, kuris la saĝaj, maljunaj gvidbestoj, kovrante siajn kondukistojn per siaj grandegaj kornoj. Poste rapidis la bravaj taŭroj, la bravbestoj destinitaj por morti; ili iris lerte ĉirkaŭite de nebravaj taŭroj evitantaj, ke iu iru for el la grupo, kaj de fortaj taŭrgardistoj kurantaj kun ŝtonĵetilo mane, pretaj admoni per trafa ŝtonbato sur kornon tiun, kiu provos elgrupiĝi.

Kiam alvenis en la kortojn la antaŭirantaj rajdistoj, iĝis flanken, liberigante la pordon, kaj la tuta taŭra trupo kune kun polva lavango, hufbatoj, muĝoj, siblaj spiroj kaj bruo de brutaraj sonoriloj iris en la internon per potenca rapideco, dum la pordoj fermiĝis tuj post la lasta besto. Multaj personoj, rajde sidante sur la muroj aŭ de galerioj, ekscitis ĝin per krioj aŭ svingante siajn ĉapelojn. La taŭroj trairis la unuan korton, ne rimarkante sian enfermiĝon, kiel se ili ankoraŭ kurus tra libera kampo. La gvidbestoj, instruite de la sperto kaj obeante la paŝtistojn, haltis flanken, apenaŭ ili trairis la pordon, kaj lasis pasi trankvile la taŭran lavangon, kiu tuj post ili kuris brue spirante. Ĉi tiuj nur haltis kun miro kaj maltrankvilo en la dua korto, kiam ili vidis ĝian muron antaŭ si kaj trovis posten la pordon fermita.

Tiam oni komencis enkestigadon. Unu post alia la taŭroj estis kondukataj per tuka svingado, krioj kaj stangobatoj al strateto, en kies mezo estis lokita vojaĝa kestego, kun ambaŭ glitpordoj levitaj. Ĝi ŝajnis malgranda tunelo, trans kies ekstremon oni vidis liberan spacon de aliaj kortoj kun herbo kaj gvidbestoj trankvile paŝtiĝantaj: taŭga imitaĵo je ĝia malproksima paŝtejo, kiu altiris la bravan beston.

Antaŭeniris ĉi tiu malrapide tra la strateto, ĉar ĝi suspektis danĝeron kaj timis paŝi sur la ligna, dekliva tabularo helpanta supreniri en la metitan sur radetoj kestegon. Divenis la taŭro riskon en tiun ĉi malgrandan tunelon de ĝi devige trairotan. Ĝi sentis sur sia postaĵo senĉesajn piketojn, kiujn oni kaŭzis al ĝi de la galerioj, por ke ĝi antaŭeniru: ĝi vidis antaŭ sin du vicojn da personoj trans ambaŭ balustradoj kun antaŭeniĝintaj bustoj, kiuj ekscitis ĝin per fajfoj kaj manmovoj. De la kestega supro, sur kie du homoj kaŝiĝis pretaj faligi ĝiajn glitpordojn, pendis ruĝa tuko svingata sur la luma spaco videbla trans la kestegan elirejon. La piketoj, la krioj, tiu senforma aĵo dancanta antaŭ ĝiaj okuloj, kvazaŭ incitante ĝin al batalo, kaj la vido je siaj trankvilaj kamaradoj, kiuj paŝtiĝis pace trans tiu pasejo, decidigis ĝin fine. Ĝi ekkuris por rapide trairi la mallongan tunelon, tremigante pro sia pezo la tabulan deklivaĵon; sed tuj post kiam ĝi estis irinta en la kestegon, falis la antaŭa glitpordo kaj, antaŭ ol ĝi povis iri posten, ankaŭ glitis la alia.

Grincis la fortaj, feraj seruroj kaj la besto dronis en silentan mallumon, kaptite en malgranda spaco, kie ĝi nur povis kuŝi sur siaj kruroj. Tra plafona fenestreto

falis sur ĝin falĉita herbo; la servistoj puŝis la irantan sur radetoj malliberejon ĝis la proksima fervojo kaj tuj poste, oni metis alian kestegon meze de la strateto, por ripeti tiun trompon, ĝis kiam ĉiuj ludotaj taŭroj estis pretigitaj por vojaĝi.

Doña Suno admiris pro sia entuziasma avideco je regionaĵoj ĉi tiujn procedojn de la grava, nacia industrio kaj volis imiti la paŝtistojn. Ŝin plaĉis la kampa vivado, galope rajdi tra tiuj vastegaj ebenaĵoj, sekvate de akrekornaj kapoj povantaj mortigi ŝin per nur eta movo. Ŝi sentis en sia animo la paŝtistan emon, kiun ni ĉiuj heredis de niaj ege malproksimaj praavoj, kiam la homo nur sciis arigi utilajn bestojn por vivadi per iliaj produktaĵoj kaj korpaj konsistaĵoj. Paŝtisto, sed bravbesta paŝtisto, estis laŭ Doña Suno plej interesa kaj heroa profesio.

Gallardo, kiam malaperis la unua ebrieco kaŭzita de lia bona sorto, rigardadis mire ŝin en la intimaj horoj, demandante sin mem, ĉu eble estas egalaj ĉiuj altrangulinoj.

Ŝiaj kapricoj, ŝiaj karakteraj ŝanĝoj, konfuzis lin. Li ne kuraĝis paroli al ŝi je "ci": ne, tio ne. Ŝi neniam incitis lin al tia familiareco kaj fojon, kiam li provis fari tion per mallerta diro kaj tremanta voĉo, li vidis sur ŝiajn orbrilajn okulojn tian mirantan mienon, ke hontigite li ree parolis ŝin, kiel antaŭe.

Ŝi kontraŭe parolis al li je "ci" same, kiel la altrangaj amikoj de la toreadoro; sed ĉi tio nur okazis en intimeco, ĉar, kiam ŝi skribis al li mallongan leteron por avizi, ke li ne vizitu ŝin, tial ke ŝi estas elironta kun siaj geparencoj, ŝi metis "vi" en sian skribaĵon, kie estis neniu ama esprimo ekster tiuj malpasie ĝentilaj, kiujn oni kutimas meti por amikoj el malsupera rango.

— Tiu virino! — murmuris Gallardo malespere —: ŝajnas, ke ŝi ĉiam rilatis kun friponoj montrantaj ŝiajn leterojn al ĉiuj kaj tial ŝi timas. Oni povus pensi, ke ŝi ne konsideras min honora homo, ĉar mi estas matadoro.

Aliaj strangaĵoj de tiu altrangulino igis malbonhumora kaj malgaja la toreadoron. Kelkfoje, kiam li iris en ŝian domon, iu el tiuj lakeoj, kiuj aspektis malriĉiĝintaj, altrangaj sinjoroj, baris lian pason, dirante malvarme "La sinjorino forestas" "La sinjorino eliris". Kaj li divenis, ke tio estas mensogo, ke Doña Suno estas tie, tre proksime de li, trans pordoj kaj kurtenegoj. Certe li ŝin tedis, ŝi subite sentis abomenon al li kaj, tial ke estis proksima la vizithoro, ŝi ordonis la lakeojn, ke oni ne akceptu lin.

— Nu, tio ĉi finiĝis! — diris la spadulo, dum li foriris —. Mi jam ne plu revenos. Ĉi tiu virino ne amuziĝos per mi.

Kaj li hontis, kiam revenis, pro tio ke li estis konsiderinta ebla afero ne plu vidi Doñan Sunon. Ŝi akceptis lin per brakoj etenditaj al li, lin ĉirkaŭpremante kontraŭ lian pasie belan korpon, kun iom streĉita buŝo pro amordeziro kaj okuloj pligrandigitaj kaj nebulaj, strange brilantaj, kvazaŭ ili montrus mensan malsanon.

— Kial ci parfumas cin? — ŝi protestis, kiel se li odorus abomeninde —. Tio

ne estas inda je ci... Mi volas, ke ci odoru taŭre, ke ci odoru ĉevale... Kiaj ĉarmaj odoroj! Ĉu vin ne plaĉas ili?... Diru jes, Joĉjo, Dia besto, mia taŭro!

Gallardo iun nokton en la milda duonlumo de la dormoĉambro de Doña Suno eksentis timon, aŭdante al ŝi paroli kaj vidante ŝiajn okulojn.

— Mi deziras kuri kvarpiede. Mi volus esti taŭro kaj ke ci cin metus antaŭ min kun spado mane. Kiel fortajn kornovundojn mi farus al ci! Ĉi tien... tien ĉi!

Kaj per streĉitaj pugnoj, al kiuj nerva ekscito pruntis plian forton, ŝi batis terure la toreadoran buston nur kovritan de silka kamizolo. Gallardo posteniĝis por ne konfesi, ke virino povas kaŭzi al li doloron.

— Ne, taŭro ne. Nun mi volus esti hundo..., paŝtista hundo kun tre longaj ŝirdentoj, kaj iri en cian vojon por cin boji "Ĉu vi, homoj, konas tiun malmodestulon, kiu mortigas bravbestojn kaj laŭ la publika diro estas tre kuraĝa? Tamen, mi manĝas lin! Jes mi lin jene manĝas! Aaaam!"

Kaj per histeria plezuro ŝi mordis toreadoran brakon, turmentante lian dikan bicepson. La spadulo ekkriis blasfemon pro doloro kaj malkuniĝis de tiu bela kaj duonnuda virino, de tiu ebria, Bakusa servistino, kies kapo surhavis buklojn similajn al oraj serpentoj.

Doña Suno ŝajnis vekiĝi.

— Kompatindulo! Oni kaŭzis al ci doloron. Kaj estis mi mem..., mi, kiu foje estas freneza! Permesu al mi kisi cian mordovundon por ĝin kuraci. Lasu al mi kisi ĉiujn ciajn cikatrojn tiel belajn. Mia malfeliĉa bruteto, kiun oni suferigis!

Kaj la bela furio iĝis humila kaj dolĉa dorlotante la toreadoron per katinaj gestoj.

Gallardo, laŭ kiu amo devas esti edze intima, kiel antikve, neniam sukcesis resti dum tuta nokto kun Doña Suno. Kiam li konsideris venkita tiun virinon per liaj amoraj klopodoj ŝi subite ordonis imperie pro ekabomeno al la materia amo:

— Foriru. Mi bezonas resti sola. Ci jam scias, ke mi ne povas cin toleri. Nek cin nek iun ajn. La viroj! Kia abomenaĵo!...

Kaj Gallardo foriris humiligite kaj malgaja pro la kapricoj de tiu nekomprenebla virino.

Iun tagon la toreadoro, ŝin kredante momente inklina al konfidencoj, demandis al ŝi scivole pri la reĝoj kaj altrangaj sinjoroj, kiuj laŭ la publika diro amrilatis kun Doña Suno dum ŝia pasinta ekzistado.

Ŝi respondis al lia scivolemo per malvarma rigardo de siaj helaj okuloj.

— Kial tio interesas cin? Ĉu ci estas ĵaluza?... Kaj, kvankam tio estus vera, kio okazus?

Ŝi longe silentis kun nepreciza rigardado; frenezula rigardmaniero, kiun ĉiam akompanis absurdaj pensoj.

— Ci certe batis virinojn — ŝi diris scivole lin rigardante —. Ne neu. Tio multe interesas min!... Vian edzinon ne; mi jam scias, ke ŝi estas tre bona. Mi parolas

pri aliaj virinoj, pri tiuj rilatantaj kun toreadoroj: tiuj inoj, kiuj des pli arde amas, ju pli oni batas ilin. Ĉu ne? Ĉu vere ci neniam batis?

Gallardo protestis digne, kiel kuraĝa homo nur kapabla bati fortulon, kiel li. Doña Suno montris iom da seniluziiĝo, aŭdante lin.

— Iun tagon ci batos min. Mi volas koni tion. Ŝi diris decide.

Sed malĝojiĝis ŝia mieno, kuniĝis ŝiaj brovoj kaj blua fulmo trairis ŝiajn orajn pupilojn.

— Ne, mia besto, ne obeu min, ne intencu fari tion. Ci certe perdus pli multe, ol mi.

Ŝi pravis kaj Gallardo baldaŭ konvinkiĝis pri tio. Foje, ĉe intimaj momentoj, sufiĉis iom maldelikata kareso de liaj manoj de batalisto, por veki la koleron de tiu virino, kiu allogis la viron kaj lin malamis samtempe "Jen!". Kaj ŝia dekstra mano, fermita kaj malmola kiel batilo, batis de malsupre supren la spadulan makzelon per tiel efika maniero, ke ĝi ŝajnis obei boksan regulon.

Gallardo restis kunfuzite pro doloro kaj honto, dum ŝi, ĉar komprenis kiel sen kialo ekatakis lin, intencis praviĝi per indiferenta malamikeco.

— Tio estas, por ke ci eklernu. Mi scias, kio estas toreadoroj. Mi permesus al ci tiun malagrablaĵon kaj ci fine batus min ĉiutage, kvazaŭ ciganinon el kvartalo *Triana*... Mi bone agis. Estas necese trudi respekton.

Iun vesperon, ĉe la printempa komenciĝo ambaŭ revenis de provado je taŭridetoj en paŝtejo de la markizo. Ĉi tiu kun rajdanta grupo iris sur la vojo.

Doña Suno, sekvate de la spadulo irigis sian ĉevalon tra herbejoj, por ĝui la agrablan impreson, kiu kaŭzis al ŝi rajdi sur herba tapiŝo.

La kuŝanta suno kolorigis ruĝete la verdan ebenaĵon surŝutitan per blankaj kaj flavaj kampfloroj. Sur tiu vasteco, kie ĉiuj koloroj ŝajnis surhavi fajrajn nuancojn, kiel malproksima brulado, la ombroj de ĉevaloj kaj rajdantoj estis longaj kaj mallarĝaj. La pikstangoj, kiujn ili portis sur sia ŝultro, ĵetis tiel longegajn ombrobildojn, ke ilia malluma linio atingis la horizonton. Ĉe iu flanko brilis la rivero, kvazaŭ arda, ŝtala rubando duonkaŝita inter herboj.

Doña Suno rigardis Gallard'on per ordona maniero.

— Prenu mian talion.

La spadulo obeis kaj tiel ambaŭ rajdis kun siaj ĉevaloj unu apud la alia kaj brakligitaj bustoj. Ŝi rigardadis tiujn du ombrojn, kiuj nur estis unu, dum ili antaŭeniris en tiu rava, herba scenejo per malrapida ĉevalpaŝado kaŭzanta laŭtaktan, moviĝon de iliaj kapoj.

— Ŝajnas kvazaŭ ni loĝus en alia mondo — ŝi murmuretis — legenda mondo; en io similanta la murtapiŝajn herbejojn. Sceno el libroj de kavalireco; enamiĝintaj kavaliro kaj rajdantino, kiuj kune vojaĝas kun lanco sur ŝultro, serĉante aventurojn kaj danĝerojn. Sed ci ne komprenas ĉi tion, mia kara besto. Ĉu ne vere, ke ci ne komprenas min?

La toreadoro ridetis, montrante sian sanan, fortan kaj lume blankan dentaron. Ŝi, altirite de lia maldelikata neklereco, plu kunigis sian korpon al li kaj metis la kapon sur lian ŝultron, ĝue tremante pro la tiklanta spirado de Gallardo sur ŝian kolon.

Tiamaniere ili rajdis silente. Doña Suno ŝajnis duondormanta sur la toreadora ŝultro. Subite ŝiaj okuloj malfermiĝis kaj brilis sur ili tiu stranga aspekto, anoncanta plej frenezajn demandojn.

— Aŭskultu. Ĉu ci neniam mortigis homon?

Gallardo malkviete ekmoviĝis mire, kaj eĉ malkuniĝis de Doña Suno. Kiu? ĉu li?... Neniam. Li estas bonulo, kiu iras sian vojon farante al neniu malutilon. Apenaŭ malofte li bataletis kontraŭ mantelludaj kamaradoj, kiam ili ne volis doni al li la monparton, kiun li rajtis. Kelkaj manfrapoj al samprofesiuloj dum disputoj; botelbato en kafejo: jen ĉiuj liaj faroj. Homa vivo kaŭzis al li nevenkeblan respekton. Tiu taŭra estis alie.

— Do, ĉu ci neniam deziris mortigi homon?... Kiel mi eraris supozante, ke la toreadoroj!...

La suno malaperis; la herbejo perdis sian ravigan lumon; la rivero iĝis malhela kaj Doña Suno vidis malluma kaj vulgara la tapiŝan pejzaĝon, kiun ŝi tiel multe jus admiris. La aliaj rajdantoj iris malproksime kaj ŝi spronis sian ĉevalon por kuniĝi al la grupo, dirante nenion al la spadulo, kvazaŭ ŝi ne scius, ke li sekvas ŝin.

Ĉe Sankta Semajno revenis en la urbon la familio de Gallardo. La spadulo estis ludbatalonta la Paskan tagon. Tiam unuafoje li mortigos antaŭ Doña Suno, de kiam li ŝin konis, kaj ĉi tio priokupis kaj dubigis lin pri liaj kapabloj.

Krome, ĉiam li, kiam ludbatalis en Seviljo, spertis emocion. Li pensis trankvile pri sia ebla malsukceso en alia, hispana taŭrcirko, ĉar dum multe da tempo li ne revenos tien; sed en sia urbo, kie estis liaj plej gravaj malamikoj!...

— Mi esperas, ke vi brile ludbatalos — diris la kontraktfaristo —. Pensu pri tiuj, kiuj vidos vin. Mi volas, ke vi agu kiel la plej brava homo el la mondo.

La Gloran Sabaton (51) okazis post noktomezo la enfermigo je la ludotaj bestoj kaj Doña Suno deziris partopreni, kiel rajdantino, ĉi tiun manovron, precipe alloganta ŝin, ĉar ĝi okazis en mallumo. La taŭroj estis kondukotaj de la herbejo *Tablada* ĝis la cirkaj kortoj.

Gallardo ne aliris malgraŭ sia deziro akompani Doñan Sunon. Tion kontraŭstaris la kontraktfaristo, ĉar estis por la toreadoro nepre necese resti freŝa kaj fortoplena la morgaŭan tagon. En la vojo por iri de la herbejo al la taŭra cirko svarmis noktomeze homa amaso same, kiel en foiro. La fenestroj de la apudaj domoj lumiĝis kaj tra ili pasis paraj ombroj, dancante laŭ piana muziko. La ruĝaj pordoj de la manĝotrinkejoj ĵetis luman rektangulaĵon sur la vojon, kaj internen oni aŭdis kriojn, sonojn de gitaroj, ridojn, tintadon de glasoj aŭ boteloj. Estis facile diveni, ke vino tie abunde fluis.

Ĉirkaŭ la unua horo rajdisto pasis tra la vojo paŝtrote. Li estis la "avizanto"; maldelikata paŝtisto, kiu haltis antaŭ la manĝotrinkejoj kaj lumigataj domoj, anoncante, ke la taŭraro preterpasos antaŭ ol kvarono da horo, por ke oni estingu lumojn kaj ĉio restu senbrua.

Ĉi tiu ordono je la nomo de la nacia festo estis obeata pli rapide, ol se ĝi venus de rajta aŭtoritatulo. La domoj iĝis senlumaj kaj ilia blankeco fandiĝis kun la malhelan mason de la arboj; ĉiuj silentis, grupiĝante nevidate trans kradoj, palisaroj kaj ferfadenaj bariloj, por atendi tiun eksterordinaran okazaĵon. En la promenejoj proksimaj al la rivero oni estingis unu post la alia ĉiujn publikajn lanternojn, laŭ tio ke la paŝtisto antaŭeniris anonckriante la taŭraran pason.

Ĉio restis silenta. Supre, super la arbaj masoj treme brilis la steloj trans la densa, kvieta aero: malsupre, sur la tero oni rimarkis etan svarmadon, sufokatan murmureton, kvazaŭ en mallumo zumus insektaj amasoj. Oni malpacience atendis, ĝis kiam malproksime, meze de la silento ekiĝis aŭdeblaj basaj sonoj de brutaraj sonoriloj. Jam ili venas! Ili estas tuj alvenontaj!

Pligrandiĝis la bruego de la kupraj sonoriloj, akompanate de neklara galopfrapado tremiganta la teron. Pasis unue kelkaj rajdistoj, kiuj ŝajnis gigantaj en la mallumo, kurante, kun sia lanco malsupren, kiel plej multe povis iliaj ĉevaloj. Ili estis la paŝtistoj. Poste grupo da pikstangemuloj, inter kiuj galoprajdis Doña Suno, emociate de ĉi tiu freneza kurado tra mallumo, kie mallerta paŝo de la ĉevalo aŭ rajdista falo signifis morto per dispremado sub la malmolaj hufoj de la sovaĝa taŭraro sekvanta poste, blinde kuregante.

Sonis furioze la brutaraj sonoriloj; la malfermitaj buŝoj de la ĉeestantoj sin kaŝintaj en la mallumo abunde englutis polvon, kaj preterpasis, kvazaŭ fantaziaĵo, la sovaĝa brutaro; noktaj, senformaj monstroj, kiuj trotis peze kaj vigle samtempe kun siaj tremantaj, dikegaj korpoj, terure kaj furioze elspirante kaj pikante la aeron per siaj kornoj, kun timo kaj kolero samfoje pro la krioj de la junaj paŝtistoj piede sekvantaj ilin kaj pro la rajdistoj, kiuj galoprajdis lastvice kaj incitis ilin per siaj pikiloj.

La paso de tiu peza kaj brua trupo nur daŭris momenton. Restis nenio plu por esti vidota... la homamaso, kiun plaĉis tiu fulma spektaklo post longa atendado, forlasis siajn kaŝejojn kaj multaj entuziasmuloj ekkuris post la brutaro, esperante vidi ĝian eniron en la kortojn.

Kiam oni alvenis apud la taŭran cirkon, la rajdistoj flankeniĝis, lasante pasi la taŭran bestaron, kaj ĉi tiu pro sia propra rapideco kaj la kutimo sekvi la gvidbestojn iris en la "manikon"; strateto farita per palisaroj, kiu kondukis ĝin en la kortojn.

La pikstangemuloj estis kontentaj pro la sukceso de la enfermigo. La brutaro venis bone kunigate kaj nek eĉ unu taŭro disiĝis aŭ distriĝis, devigante la rajdantaj aŭ piedirantaj paŝtistoj agi kontraŭ ĝi. Ili estis bonrasaj bestoj, la plej bonaj

el la markizaj taŭraroj. La morgaŭan tagon, se la majstroj amos gloron kaj deziros brave agi, vidos belan kaj emociigan ludadon... Kaj esperante interesan, taŭran feston, foriris unu post la alia rajdistoj kaj piedirantoj. Post unu horo jam estis neniu en la ĉirkaŭaĵoj de la cirko, kiu dronis en mallumo kaj entenis la bravajn bestojn trankvile en la korto ree ekdormantajn lastfoje en sia vivado.

La morgaŭan tagon Johano Gallardo ellitiĝis frue. Li dormis malbone, kun granda malkvieteco abunde produktanta al li malagrablajn sonĝojn.

Lin ne plaĉis ludbatali en Seviljo. En aliaj urboj li kondutis, kiel fraŭlo, forgesate momente de la familio, en hotela, por li tute fremda ĉambro, kiu nenian emocion kaŭzis al li, tial ke nenio estis lia. Sed, sin vesti la toreadoran kostumon en sia propra dormoĉambro, ĉie vidante aĵojn, kiuj rememorigis al li Karmenon; iri al danĝero el tiu domo, kiun li mem konstruigis kaj kiu enhavas plej de li amatajn estulojn, konfuzis lin kaj kaŭzis al li saman maltrankvilon, kiel se li estus unuafoje mortiganta taŭron. Krom tio li timis la samurbanojn, kun kiuj li ĉiam vivadis kaj vivados kaj kies opinio estis por li pli grava, ol la aplaŭdoj de la ceteraj hispanoj. Ve, la terura elirmomento, kiam, vestite de Strekaro per lumvesto, li malsupreniros en la silentan korton! La nevetoj venos al li, imponate de la brilaj ornamaĵoj de lia kostumo, kaj tuŝos ilin admire, ne kuraĝante paroli; lia lipharema fratino kisos lin kun timega mieno, kvazaŭ li irus por morti; panjo kaŝos sin en plej mallumajn ĉambrojn. Ne; ŝi ne volas vidi lin: ŝi malbonfartas. Karmeno montriĝos kuraĝa, tre pala, premante siajn lipojn bluetajn pro emocio, kun nerva movado je palpebroj por resti trankvila kaj, kiam ŝi vidos lin jam en la halo, ŝi subite metos poŝtukon sur siajn okulojn, dum ŝia korpo ektremos pro sopiroj kaj ploroj ne sukcesantaj eliĝi, kaj ŝia bofratino kaj aliaj virinoj rapidos subteni ŝin, por ke ŝi ne falu planken.

Ĉio ĉi certe malkuraĝigus eĉ Roger'on de Flor mem, kiun ĉiumomente nomis lia bofrato.

— Malbenaĵo!... Mi ja — diris Gallardo — nek por la tuta oro el la mondo ludbatalus en Seviljo, se oni ne devus plaĉi la samurbanojn kaj la malhonestuloj ne dirus, ke mi timas la ĉitiean publikon.

Post kiam la spadulo sin vestis, li vagis hejme kun cigaredo ĉe la buŝo, etendante siajn muskolplenajn brakojn, por provi ĉu ili estas viglaj. Li trinkis en la kuirejo pokaleton da brando kaj vidis tie sian ĉiam malgraŭ multaĝo kaj dikeco diligentan panjon, kiu ĉion inspektis kaj zorge regis la hejmon, patrine traktante la servistinojn.

Gallardo iris en la malvarmetan kaj luman korton. La birdoj kantadis en la matena silento, dum saltetis en siaj oraj kaĝoj. Fasko da sunradioj falis ĝis la marmora planko. Ĝi estis ora triangulo kovranta la verdan foliaron, kiu borderis la fontanon kaj akvon de ĝia vazo, kie naĝis ruĝaj fiŝoj lasante supreniri abundajn aervezikojn.

La spadulo vidis, ke nigrevestita, preskaŭ kuŝanta sur la planko virino kun apuda sitelo, frotas per malseka tuko la marmorajn ŝtonojn, kiuj ŝajnis per tio revivi. La virino levis sian kapon.

— Bonan tagon, sinjoro Johano — ŝi diris per tiu ama familiareco, kiun kaŭzas ĉiam la popularaj herooj.

Kaj ŝi ĵetis sur lin rigardon de sia nura okulo. La alia konsistis el serio da koncentraj sulko-ondoj ŝajne fluantaj al nigra profundaĵo.

Sinjoro Johano ne respondis. Per nerva ekpuŝiĝo rapidis al la kuirejo, kie vokis sinjorinon Angustion.

— Sed panjo, kiu estas tiu virino, tiu malbenita okulkriplulino lavanta la kortan plankon?

— Jen kiu, mia filo!... Malriĉulino. La luservistino malbonfartas kaj mi venigis ĉi tiun malfeliĉulinon, kiu havas multe da filoj.

La toreadoro montriĝis malkvieta, kun duba kaj tima mieno ĉe sia rigardo. — Malbenaĵo! Ludbatali en Seviljo kaj, krom tio, la unua persono, kiun mi hodiaŭ ekvidis... okulkriplulino! Ja kio okazas al mi, okazas al neniu. Tio estas afero plej malbonŝanca. Ĉu oni deziras, ke mi mortu?

Kaj la kompatinda panjo, ege timigite de la malfeliĉaĵo, kiun antaŭdiris la toreadoro, kaj de lia granda incitiĝo, intencis senkulpiĝi. — Neniel mi deziras tion! Nur okazas, ke tiu malfeliĉulino bezonas gajni monon por siaj filetoj. Estas necese scii kompati kaj ni devas danki Dion, kiu helpis kaj savis nin el samaj mizeraĵoj.

Gallardo fine trankviliĝis per tiuj vortoj: la memoro je ilia estinta malriĉeco igis al li esti tolerema pri la malfeliĉulino. Do restu tie la okulkriplulino kaj okazu tio, kion Dio volos.

Kaj, trairante la korton, preskaŭ dorsturnite por ne renkonti la timindan okulon de tiu malbonŝanca virino, la matadoro sin rifuĝis en la skriboĉambron apud la halo.

Ĝiaj blankaj muroj tapetitaj per arabaj glazurkaheloj ĝis homa alteco estis ornamitaj per ludbatalaj afiŝoj presitaj sur diverskolorajn silkojn. Diplomoj kun bele desegnitaj titoloj de bonfarantaj asocioj rememorigis la taŭrfestojn, ĉe kiuj Gallardo sengajne ludis por la malriĉuloj. Multego da portretoj de la spadulo, staranta, sidanta, kun etendita mantelo aŭ sin ĵetanta por mortigi taŭron, atestis la zorgon, per kiu la gazetoj bildigis la gestojn kaj sintenojn de tiu famulo. Sur la pordo estis portreto de Karmeno kun blanka mantilo, ankoraŭ rimarkiganta pli ŝian okulan nigrecon, kaj aro da diantoj sur ŝia malhela hararo. Ĉe la kontraŭa muro, super la skribotabla apogseĝo ŝajnis prezidi tiun bonordan ĉambron grandega kapo de nigra taŭro kun vitraj okuloj, glazurbrila nazo, makulo el blankaj haroj sur ĝia frunto kaj grandegaj, akrepintaj kornoj, kiuj estis eburkoloraj ĉe ilia bazo kaj iom post iom malheliĝis, ĝis tio ke iliaj pintoj estis inknigraj. Pik-

rajdisto Kuirajo ekdiris poeziajn imagajojn el sia speciala stilo, kiam li rigardadis la grandegan kornoparon de tiu besto: Estas tiel grandaj kaj malproksimaj ĝiaj kornoj, ke, se merlo kantus sur iu el ili, oni ne aŭdus ĝin de la alia.

Gallardo sidiĝis apud la elegantan kaj plenan je bronzajoj tablon, trovante sur ĝin neniun malordon ekster kelketaga polvo. La inkujo, kies soklo ja estis grandega kaj havis du metalajn ĉevalojn, restis blanka kaj pura. La atentaltiraj plumteniloj, kun hundaj kapoj supre, ne havis plumojn. La famulo ne bezonis ja skribi. Don Josefo, lia kontraktfaristo, okupiĝis pri ĉiuj kontraktoj kaj ceteraj profesiaj dokumentoj, kaj la spadulo subskribis ilin malrapide kaj pene sur tableto de la klubo de strato Serpentoj.

Flanke estis kverka librośranko, kies vitraj pordoj ĉiam estis fermitaj kaj tra kiuj estis videblaj imponaj vicoj de volumoj ŝatindaj pro siaj grandoj kaj luksaj bindajoj.

Kiam Don Josefo komencis titoli la matadoron "toreadoro de la aristokrataro", Gallardo komprenis, ke estas necese respondi al tiu honorajo, sin klerigante, por ke liaj altrangaj amikoj ne ridu pri lia malklereco, kiel okazas al aliaj samprofesiuloj. Iun tagon li iris decide en librovendejon.

— Sendu al mia hejmo trimil pesetojn da libroj.

Kaj, ĉar la librovendisto mienis hezite, kiel se li ne komprenis, la toreadoro energie aldonis:

— Jes, da libroj, ĉu vi komprenas min?... Libroj el plej grandaj kaj, se tio plaĉas vin, ore ornamitaj.

Gallardo estis kontenta pri sia bonaspekta biblioteko. Kiam oni parolis en la klubo pri io, kion li ne sukcesis kompreni, li ridetis kun inteligenta mieno pensante:

— Tio certe estas en iu el la libroj, kiujn mi havas en mia skribo-ĉambro.

Iun pluvan tagon, ĉe kiu li nebonfarte vagadis hejme, ne sciante kion fari, li fine malfermis la ŝrankon kaj emocie eltiris plej grandan volumon, kvazaŭ ĝi estus mistera dio, kiun pastro demetus el sanktujo. Li rezignis legi la unuajn liniojn kaj komencis pasigi foliojn, naive ĝuante per rigardado je ĝiaj bildoj. Leonoj, elefantoj, ĉevaloj kun sovaĝa kolhararo kaj ardaj okuloj, azenoj kun koloraj strioj, kiel se ili estus pentritaj per kurbilo... La toreadoro senzorge iris tra tiu scienca vojo, ĝis kiam li renkontis multekoloran, ringoriĉan serpenton. Fi! serpento! malbonŝanca serpento! Kaj li konvulsie etendis la montran kaj malgrandan fingrojn de sia mano por kontraŭstari malbonan sorton. Li volis daŭrigi, sed ĉiuj bildoj prezentis malbelegajn rampulojn kaj li fine fermis la libron per tremantaj manoj kaj remetis ĝin en la ŝrankon, dum li murmuris: "Lacerto! lacerto! por tiel nuligi la efikon de ĉi tiu malbona renkonto.

La ŝlosilo de la librośranko estis de tiam forgesita de ĉiuj inter presajoj kaj malnovaj leteroj, en tabla tirkesto. La spadulo ne bezonis legi. Kiam liaj partianoj

venis kun taŭrgazeto, kiu "estis ardanta", kio ĉiam signifis atakoj kontraŭ liaj konkurantaj kamaradoj, Gallardo petis al sia bofrato aŭ al Karmeno, ke ili legu ĝin kaj li aŭskultis kontente ridetante, dum mordetis cigaron.

— Tio ja estas trafa. Nu, per kiaj beltranĉaj vortoj ili ĉion diras!

Kiam la gazetoj "ardis" kontraŭ Gallardo, neniu al li ilin legis, kaj la spadulo parolis malŝate kontraŭ tiuj, kiuj verkas pri ludbatalarto kaj scias, nek eĉ ludaĉi la mantelon en areno.

La restado en la skriboĉambro nur efikis por pligrandigi lian matenan maltrankvilon. Gallardo ekrigardis nekonscie la taŭran kapon kaj plej malplaĉa, profesia okazaĵo venis en lian memoron. Estis ĝuo de venkinto havi en sia skriboĉambro ĉiam videbla la kapon de tiu malica besto. Kiom multe ĝi ŝvitigis lin en la cirko de Zaragozo! Gallardo kredis tiun taŭron tiel saĝa, kiel persono. Nemove kaj kun diable ruzaj okuloj ĝi atendis, ĝis kiam la spadulo proksimiĝis, kaj ĝi sin ĵetis tiam rekte por trafi lian korpon, ne atentante la ruĝtukan trompon. La spadoj flugis tra la aero nevundinte ĝin, ĵetite per ĝiaj kapaj ekmovoj. La publiko malpacienciĝis, fajfante kaj insultante la matadoron: ĉi tiu sekvis la taŭron de iu al alia ekstremo de la areno, sciante ke, se li sin ĵetus rekte por mortigi la taŭron, li mortus anstataŭ ĝi, ĝis kiam fine, tute ŝvitlaca li profitis okazon por ĝin mortigi per malnobla spadpiko, meze de terura skandalo ĉe la homamaso, kiu ĵetis botelojn kaj oranĝojn kontraŭ lin. Kia hontiga memoro!... Gallardo fine opiniis tiel malbonŝance, kiel renkonti okulkriplulinon, resti en la skriboĉambro rigardante la kapon de tiu infera besto.

— Estu malbenata, vi kaj ankaŭ via produktisto! Iĝu venena la herbo, kiun manĝas ĉiuj viaj samrasanoj!...

Strekaro avizis lin, ke en la korto lin atendas amikoj. Ili estis entuziasmaj partianoj venantaj viziti lin en taŭrfestaj tagoj. La spadulo forgesis tuj ĉiujn siajn priokupojn kaj eliris ridetante, kun levita kapo kaj bela sintenado, kvazaŭ estus ja liaj privataj malamikoj tiuj taŭroj, kiuj atendis lin en la cirko, kaj li dezirus esti antaŭ ili kiel eble plej baldaŭ, por ilin faligi per sia trafa spado.

Li manĝis sola kaj malmulte, kiel en ĉiuj ludbatalaj tagoj, kaj malaperis la virinoj, kiam li komencis sin vesti. Ha, kiel ili malamis tiujn lumvestojn zorge garditajn en tolaj tegiloj; brilaj instrumentoj, per kiuj oni atingis la familian bonvivadon...

La adiaŭo estis, kiel aliajn fojojn, konfuzanta kaj neniiganta por Gallardo. La forkuro de virinoj por ne vidi lian ekiron; la dolora energio de Karmeno, kiu penis resti trankvila, akompanante lin ĝis la pordo; la mira scivolemo de la nevetoj; ĉio incitis la toreadoron, belsintena kaj brava ĉe la danĝera momento.

— Kvazaŭ oni alportus min sur eŝafodon! Do, ĝis baldaŭ! Restu trankvile, ĉar okazos nenio malbona.

Kaj li iris en la veturilon, farante al si vojon inter la najbaroj kaj scivolemuloj grupiĝintaj antaŭ la domon, kiuj deziris bonan sorton al sinjoro Johano.

Por la familio la posttagmezo estis pli korpremiga, kiam la spadulo ludbatalis en Seviljo. Ili ne tiel facile atendis rezignacie, kiel aliajn fojojn, por ricevi la vesperan telegramon. Nun la danĝero estis proksima kaj tio naskis en ili deziregon scii ĉiumomente, kiel iras la taŭrfesto.

La ledaĵisto, vestite kiel sinjoro per bonaj vestaĵoj el hela laneto kaj blanka, glata feltĉapelo, promesis al la virinoj sendi sciigojn, kvankam li furiozis pro la malĝentilaĵo de lia fama bofrato. Nek eĉ ĉi tiu invitis lin, por ke li veturu kun lia bando en la taŭran cirkon! Tuj post la morto de ĉiu taŭro spadpikita de Johano li sendos raporteton pri tio okazinta per iu el la knaboj svarmantaj ĉirkaŭ la cirko.

La taŭrfesto estis brua sukcesego de Gallardo. Kiam li eniris la arenon kaj aŭdis la aplaŭdadon de la homamaso, ŝajnis al la spadulo, ke li estas pli granda.

Li konis la teron, sur kiu iris: ĝi estis por li familiara; li konsideris ĝin sia. La sablo de la arenoj kaŭzis ian influon en lian superstiĉan animon. Li memoris la grandajn taŭrcirkojn de Valencio kaj Barcelono, kun blankaĉa sablo, tiun malhelan de la nordaj ludbatalejoj kaj la ruĝetan teron de la granda Madrida cirko. La sablo de Seviljo estis diferenca je la aliaj; sablo de rivero Guadalkiviro, tre flava, kvazaŭ ĝi estus pulvorigita kolorilo. Kiam ventrovundita ĉevalo verŝis sian sangon sur ĝin, kiel se estus vina kruĉo subite rompiĝinta, Gallardo pensis pri la koloroj de la nacia flago (52), kiu flirtis sur la cirka tegmento.

La taŭrcirkaj, arĥitekturaj stiloj ankaŭ influis la toreadoron, al kiu ofte maltrankvilo imagigis strangaĵojn. Ili estis pli-malpli modernaj konstruaĵoj; kelkaj, romanstilaj; aliaj, arabaj, kun sama vanteco, kiel nova preĝejo, kie ĉio ŝajnas sen vivo nek varmo. La Sevilja ludbatalejo estis kontraŭe, kvazaŭ katedralo plena je rememorigaĵoj, animita de kelkaj generaciôj, kiuj agadis en ĝi, kun portalo el tiu epoko — kiam la homoj uzadis blankan perukon — kaj kun ĝia flava areno, sur kiu iris plej miregigaj herooj. Tie ludis la gloraj elpensintoj je malfacilaj ludmovoj, la perfektigintoj de tiu arto, la fortegaj venkemuloj el *Ronda* ludbatalintaj kviete kaj laŭregule, la gajaj kaj viglaj majstroj el Seviljo kun siaj ludoj kaj moviĝemo, kiuj entuziasmigis la publikon... kaj fine tie estis li mem, kiu, ekscitite de la aplaŭdoj, la suno, la bruo kaj precipe de la vido je blanka mantilo kaj blua brusto antaŭeniĝanta sur loĝia balustrado, sentiĝis kapabla je plej grandaj kuraĝaĵoj.

Gallardo ŝajnis esti ĉio en la areno pro sia agemo kaj kuraĝo; li avidis superi ĉiujn kamaradojn kaj altiri nur por li ĉiujn aplaŭdojn. Neniam liaj partianoj vidis lin tiel brava kaj vigla. La kontraktfaristo tuj post ĉiu eksterordinara faro kriis, starante, por la kaŝitaj malamikoj dissidantaj ĉe la benkaroj "Nu, kiu kuraĝas kontraŭdiri!... La plej brava homo el la mondo!..."

Naciao irigis pro lia ordono kaj per lertaj mantelmovoj la duan taŭron mortigotan de Gallardo ĝis arena ekstremo, super kiu estis loĝio, kie sidis la blankmantila kaj bluvestita virino. Apud Doña Suno montriĝis la markizo kaj liaj du filinoj.

Iris Gallardo apud la barilo kun spado kaj ruĝtuko mane, rigardate de la homamaso kaj, kiam alvenis antaŭ la loĝion, li haltis, kunigis siajn krurojn kaj demetis sian toreadoran ĉapon. Li promesis honore sian taŭron al la nevino de markizo Moraima. Multaj rikanis ruze "Hura la bonsortuloj!". Li duonturniĝis, kiam finis sian eldiron, ĵetante samtempe sian ĉapon, kaj atendis la taŭron, kiun oni kondukis tien per la mantela trompado. En tre malgranda spaco, agante tiamaniere, ke la bravbesto ne malproksimiĝu de tiu loko, plenumis la spadulo sian taskon. Li volis mortigi sub la okuloj mem de Doña Suno; ĉi tiu vidu lin deproksime serĉi la danĝeron. Ĉiu movo de la ruĝtuko glitanta laŭlonge sur la taŭro estis akompanata de entuziasmaj ekdiroj kaj timaj ekkrioj. La kornoj preterpasis apud lian bruston; ŝajnis neeble, ke li restis nevundite post la taŭraj atakoj. Subite li kunigis siajn krurojn, direktis antaŭen sian spadon kaj, antaŭ ol la publiko povis sciigi siajn opiniojn per krioj kaj konsiloj, li rapide sin ĵetis kontraŭ la bravbeston, kun kiu li konsistigis nur unu korpon dum kelkaj sekundoj.

La spadulo, post kiam malkuniĝis el la taŭro restis nemove; ĉi tiu kuris ŝanceliĝante, kun furiozaj muĝoj, pendanta lango inter la lipoj kaj la ruĝa tenilo de la spado apenaŭ videbla supre, sur ĝia sangomakulita kolo. Ĝi falis post kelkaj paŝoj kaj la publiko stariĝis ĉiuj samtempe, kvazaŭ ĝi konsistus el nur unu peco kaj ĝin movus potenca risorto, dum eksplodis hajla aplaŭdado kaj frenezaj aklamoj. Estas en la mondo neniu bravulo same kuraĝa, kiel Gallardo!... Ĉu tiu homo iam ajn timis?

La spadulo salutis antaŭ la loĝio, ambaŭflanken etendante siajn brakojn kun la spado kaj ruĝtuko, dum la manoj de Doña Suno, tegitaj per blankaj gantoj, febre aplaŭdadis.

Poste objekto iris de ĉeestanto al ĉeestanto, de la loĝio ĝis la barilo. Ĝi estis tuketo de la altrangulino, tiu mem, kiun ŝi tenis mane; bonodora kaj eta rektangulaĵo el batisto kaj punto, metita en ringo kun briliantoj, kiun ŝi donacis al la toreadoro ŝanĝe pro lia honora eldiro.

Ree estis aplaŭda eksplodo kaŭze de tiu donaco kaj la publika atento, altirate ĝis tiam de la matadoro, sin turnis al Doña Suno, krilaŭdante ŝian belecon per ĝentila, andaluzia familiareco. Malgranda, fela kaj ankoraŭ varma triangulo supreniris de la barilo al la loĝio. Ĝi estis orelo de la taŭro, kiun la matadoro sendis, kiel atesto je lia taŭra honorpromeso.

Post la festa finiĝo, jam disflugis tra la tuta urbo sciigo pri tiu granda sukceso de Gallardo. Kiam la spadulo alvenis hejmen, la najbaroj atendis lin apud la pordo kaj lin aplaŭdis, kiel se reale ili estus ĉeestintaj la taŭrfeston.

La ledaĵisto, forgesante sian ofendiĝon kontraŭ la matadoro, admiris lin pli

multe, ol pro liaj ludbatalaj sukcesoj, pro liaj valoraj amikaĵoj. Li antaŭ longe deziris ian oficon kaj kredis certe ĝin atingi nun, tial ke lia bofrato estas amiko de plej altrangaj personoj el Seviljo.

— Montru al ili la ringon. Rigardu, Enkarnacio, kiel valora donaco. Nek Roger de Flor mem!

Kaj la ringo iris de mano al mano ĉe la virinoj, kiuj ĝin admiris per entuziasmaj ekdiroj. Nur Karmeno faris grimacon, kiam vidis ĝin. "Jes; tre bela". Kaj ŝi ĝin pasigis rapide al sia bofratino, kvazaŭ ĝi estus brulanta karbo.

Post ĉi tiu taŭrfesto komencis Gallardo la vojaĝan sezonon. Li estis pli kontraktita, ol iam ajn en antaŭaj jaroj. Post la Madridaj ludbataloj li estis ludonta en ĉiuj hispanaj taŭrcirkoj. Lia kontraktfaristo studis la fervojajn horlibrojn, serĉante senlace taŭgajn kombinojn je horoj, por ke ili gvidu poste la matadoron.

Gallardo iris de sukceso en sukceson. Neniam antaŭe li estis tiel memfida, kiel nun. Ŝajnis, kiel se li ricevis novan forton. Antaŭ la ludbataloj lin turmentis kruelaj duboj, hezitoj similantaj ja timon, nekonataj de li en lia malbona epoko, kiam li ekfariĝis famkonata; sed, tuj post kiam li eniris la arenon, malaperis tiuj timoj kaj li montris barbaran kuraĝon, kiun ĉiam akompanis brila sukceso.

Post sia agado en iu ajn provinca cirko li revenis la hotelon kun sia bando, ĉar ĉiuj loĝis kune. Li sidis ŝvitplena, kun agrabla, venka laciĝo, ne demetinte la lumveston, kaj aliris tien la "taŭrartaj inteligentuloj" de la urbo, por gratuli lin. Li ludis bonege. Li estas plej taŭga toreadoro el la mondo. Kia spadpiko, tiu al la kvara taŭro!...

— Ĉu vere? — demandis Gallardo kun infana fiereco —. Tio ja ne estis malbona.

Kaj dum senfina babilado pri taŭroj pasis la tempo, sen tio ke la spadulo kaj liaj admirantoj laciĝis paroli pri la posttagmeza taŭrfesto kaj pri aliaj okazintaj antaŭ kelkaj jaroj. Kiam alvenis vespero, oni lumigis ĉion, sed la taŭremuloj ne foriris. La bandanoj pro toreadora disciplino silente subportis en ĉambra ekstremo ĉi tiun babiladon. Ĝis kiam la majstro tion permesos, la "knaboj" ne rajtas iri ŝanĝi siajn vestojn nek manĝi. La pikrajdistoj, lacigite de siaj feraj krurŝirmiloj kaj siaj teruraj ĉevalfalbatoj, movis malpacience la fortikan ĉapelon inter siaj genuoj: la pikiletistoj, ĝenate de siaj ŝvite malsekaj kostumoj el silko, estis malsataj post tuta posttagmezo de energia agado. Ĉiuj pensis same, dum ĵetis akrajn rigardojn al la entuziasmuloj.

— Nu, kiam foriros ĉi tiuj tedemuloj? Ili estu malbenataj!...

Fine la matadoro atentis pri ili "Vi rajtas foriri". Kaj la toreadora bando eliris, sin puŝante reciproke, kiel liberigitaj lernantoj, dum la majstro daŭrigis aŭskulti la laŭdojn de la inteligentuloj, ne memorante pri Strekaro, kiu atendis silente por ŝanĝi al li la vestojn.

En senokupaj tagoj la majstro, ne ekscitite de danĝero kaj gloro, pensis pri

Seviljo. De tempo al tempo alvenis por li iu el tiuj etaj, mallongaj kaj parfumitaj leteroj, en kiu ŝi gratulis lin pro liaj sukcesoj. Ha, se kun li estus tie Doña Suno!...

Dum tiu ĉi senĉesa irado de publiko al publiko, adorate de la entuziasmaj partianoj deziregantaj, ke li agrable estu en la urbo, li konis virinojn kaj ĉeestis diboĉojn aranĝitajn je lia honoro. El ĉi tiuj festoj li eliris ĉiam kun malklara pro vino pensado kaj terura malgajeco, kiu igis lin ja malafabla. Li kruele deziris bati virinojn. Tio estis nevenkebla puŝo sinvenĝi, pro la atakemo kaj kapricoj de la alia, sur personojn de ŝia sama sekso.

Alvenis momento, en kiu li nepre bezonis konfidi sian malgajecon al Naciao same, kiel ĉiu portanta sur sia pensado troan pezon.

Plie, pri la pikiletisto li spertis for de Seviljo pli grandan amikecon, ian kvazaŭ spegulitan amon. Sebastiano konis lian amrilaton kun Doña Suno, li vidis ilin kune, kvankam de malproksime, kaj ŝi ridis multajn fojojn aŭskultante al li originalaĵojn de la pikiletisto.

Ĉi tiu akceptis per honesta seriozeco la majstrajn konfidencojn.

— Via devo, Johano, estas forgesi tiun sinjorinon. Pripensu, ke la familia paco valoras pli multe, ol io ajn alia, precipe por ni, kiuj iras tra la mondo kaj riskas reveni hejmen por ĉiam kriple netaŭgigitaj; pripensu ankaŭ, ke Karmeno scias pri tio pli multe, ol tiom, kiom vi supozas. Ŝi sciiĝis pri ĉio. Al mi parolis ŝi nerekte pri via rilato kun la markiza nevino... Malfeliĉulino! Estas ja peko, ke vi suferigu ŝin!... Ŝi ankaŭ scias koleri kaj, se ŝi tion faros, okazigos al vi malplaĉon.

Sed Gallardo malproksime de sia familio, regate de la memoro je Doña Suno, ŝajnis ne kompreni la danĝerojn, pri kiuj al li parolis Naciao, kaj levetis siajn ŝultrojn antaŭ liaj sentimentalaj skrupuloj. Li bezonis paroli pri siaj memoroj, senhonte sciigi al la amiko sian pasintan feliĉon, kiel kontenta amanto, kiu deziras esti admirata pro sia bonsorto.

— Vi ne scias, kio estas tiu virino! Vi, Sebastiano, estas simplulo ne ĝuinta bonaĵojn. Se vi metus kune ĉiujn virinojn el Seviljo, ili valorus neniom kompare al ŝi. Ankaŭ neniom, ĉiuj el ĉiuj urboj, kie ni estis. Nur valoras Doña Suno. Kiam oni konas sinjorinon, kiel ŝi, oni deziras neniun plu... Se vi konus ŝin tiel bone, kiel mi! La virinoj de nia rango odoras nur pure, tolaĵe. Sed tiu ĉi, Sebastiano, ĉi tiu!... Imagu kvazaŭ ĉiuj rozoj el ĝardenoj de Alkazaro estus kune... Ne; ŝia odoro estas eĉ pli bona; estas jasmeno, lonicero, parfumo el paradizaj floroj: Kaj ĉi tiuj bonaj odoroj venas el ŝia internaĵo, kiel se ŝi ne verŝus ilin sur sin, kiel se ili venus el ŝia propra sango. Kaj plie, ŝi ne estas malsaĝulino, kiun vidi unu fojon jam estas sufiĉe. Ĉe ŝi ĉiam estas io dezirinda; io, kio estas atendata, sed ne alvenas. Fine, Sebastiano, mi ne povas bone al vi komprenigi min... Sed vi ne scias, kio estas sinjorino; do, ne prediku min kaj bonvolu silenti.

Gallardo jam ne ricevis leterojn el Seviljo, Doña Suno estis fremlande. Li

vidis ŝin unu fojon, kiam li ludbatalis en *San Sebastián*. La bela altrangulino estis en *Biarritz* kaj venis tien kun kelkaj francaj sinjorinoj, kiuj deziris koni la toreadoron. Li vidis ŝin posttagmeze. Ŝi foriris kaj li nur havis pri ŝi neprecizajn sciigojn dum somero per kelkaj malmultaj leteroj, kiujn li ricevis, kaj per tio, kion diris al li lia kontraktfaristo, aŭdita al markizo Moraima.

Ŝi estis en elegantaj, apudmaraj banurboj, kies nomojn la toreadoro aŭdis unuafoje kaj kies prononco estis por li neebla; poste li sciiĝis pri tio ke ŝi vojaĝis en Anglolando; pli poste, ke ŝi iris en Germanlandon por aŭdi operojn kantatajn en sorĉe ĉarmega teatro nur funkcianta ĉiujare dum kelkaj semajnoj. Gallardo ne esperis plu vidi ŝin. Ŝi estis aventurema kaj malkvieta pasbirdo kaj supozeble ne serĉos alifoje sian neston en Seviljon, kiam vintro venos.

Tiu ebleco ne plu renkonti ŝin malgajigis la toreadoron, kiu montris per tio la grandan influon, kiun tiu virino produktis sur lian karnon kaj lian volon. Ne plu vidi ŝin! Por kio do, riski sian vivon kaj esti fama? Ĉu taŭgas por io la homamasa aplaŭdado?...

La kontraktfaristo trankviligis lin. Ŝi revenos: li estas certa pri tio. Ŝi revenos almenaŭ unu jaron. Doña Suno malgraŭ ĉiuj siaj frenezaj kapricoj estas praktika virino scianta zorgi siajn aferojn. Ŝi bezonas helpon de la markizo, por meti ordon en la neklaran staton de ŝia propra havaĵo kaj de tiu, kiun heredis de sia edzo, ambaŭ malpliigitaj pro longa kaj multelspeza, luksa foresto.

La spadulo revenis en Seviljon, kiam somero finiĝis. Ankoraŭ multfoje li estis ludbatalonta en aŭtuno, sed li volis profiti preskaŭ unumonatan libertempon. La spadula familio estis en apudmara banurbo *Sanlucar* pro skrofolo de neveto, kiu bezonis marbanojn.

Gallardo ektremis pro emocio, kiam iun tagon diris al li lia kontraktfaristo, ke Doña Suno ĵus alvenis atendite de neniu.

La spadulo tuj vizitis ŝin, sed post malmultaj vortoj li malkuraĝiĝis pro ŝia malvarma afableco kaj okulesprimo.

Ŝi rigardis lin, kvazaŭ li estus alia. Oni divenis ĉe ŝia mieno iom da miro pro la maldelikata aspekto de la toreadoro kaj pro la diferenco inter ŝi kaj tiu homego, mortigisto je bestoj.

Li ankaŭ divenis ĉi tiun abismon, kiu ŝajnis fariĝi inter ambaŭ. Li vidis ŝin, kvazaŭ ŝi estus malsama virino, alilanda kaj alirasa altrangulino.

Ili konversaciis trankvile. Ŝi ŝajnis forgesi la pasinton kaj Gallardo ne kuraĝis rememorigi ĝin, nek agi ame al ŝi pro timo al eksplodo de ŝia kolero.

— Seviljo! — diris Doña Suno —. Tre bela... tre agrabla urbo. Tamen en la mondo estas aliaj! Eble, Gallardo, iun tagon mi forflugos por ĉiam. Mi timas, ke multe enuos ĉi tie. Ŝajnas, kvazaŭ oni estus ŝanĝinta mian Seviljon.

Jam ŝi ne parolis al li je "ci". Pasis kelkaj tagoj kaj la toreadoro dum siaj vi-

zitoj ne kuraĝis paroli pri ilia pasinta amrilato. Li nur rigardadis ŝin silente per siaj arabaj okuloj adoremaj kaj larmemaj.

— Mi enuas. Mi foriros iun ajn tagon — ekdiris ŝi en ĉiuj iliaj intervidoj.

Ree la gestimpona lakeo akceptis Gallard'on ĉe la kradpordo por lin diri, ke la sinjorino eliris, kiam li scias certe, ke ŝi estas hejme.

Gallardo parolis al ŝi iun tagon pri mallonga ekskurso, kiun li devos realigi en *Rinconada'n*. Li bezonos vidi olivarbarojn, aĉetitajn de lia kontraktfaristo dum lia foresto, por pligrandigi la bienon. Li ankaŭ devos sciiĝi pri la terkulturaj laboroj.

Ideo akompani la spadulon dum tiu ekskurso ridetigis Doñan Sunon pro absurda kaj kuraĝa. Iri en tiun bienon, kie la familio de Gallardo loĝas dum jarparto! Eniri kun skandala bruego de nedececo kaj peko tiun trankvilan medion de doma korto, kie loĝis kun siaj familianoj tiu simplulo!

Ŝi decidiĝis pro tio mem, ke la deziro estis absurda. Ŝi ankaŭ iros: vidi *Rinconada'n* interesas ŝi.

Gallardo ektimis. Li pensis pri la bienanoj, pri la babilemuloj, kiuj eble sciigos la familion pri ĉi tiu vojaĝo. Sed rigardo de Doña Suno faligis ĉiujn ĉi skrupulojn. Ĉu eble... tiu vojaĝo remetos lin en lian antaŭan situacion.

Li tamen, ankoraŭ lastfoje baris tiun ĉi deziron.

— Ĉu vi forgesis Plumeton?... Pripensu, ke nun laŭ diro li iras proksime al *Rinconada*.

Ho, Plumeto! La vizaĝo de Doña Suno, ĝis tiam enumiena, ŝajnis vigliĝi per interna ekflamo.

— Ja, kuriozaĵo! Mi ĝojos, se vi lin prezentos al mi.

Gallardo aranĝis la vojaĝon. Li pensis iri sola, sed, tial ke Doña Suno akompanos lin, li devos serĉi plian helpon por ebla, malbona renkonto ĉe la vojo.

Li elektis Kuiraĵon, la pikrajdisto. Tiu ĉi estis tre barbara kaj timis en la mondo nur sian ciganan edzinon provantan mordi lin, kiam ŝi tedis ricevi edzajn batojn. Estas necese klarigi al li nenion, sed nur al li doni vinon abunde. Pro alkoholo kaj tiuj teruraj ĉevalfaloj en areno kapturniĝo regis lin ĉiam, kiel se lia cerbo zumas, kaj li nur povis mallerte paroli kaj nebule konscii.

Ankaŭ li ordonis al Naciao iri kun ili: unu plua viro kaj krome, provite diskreta.

La pikiletisto obeis pro subuleco, sed li grumblis, kiam sciis, ke Doña Suno akompanos ilin.

— Kia malplaĉo!... Devigi honestan patron partopreni ĉi tiujn maldecaĵojn!... Kion diros pri mi Karmeno kaj sinjorino Angustio, se okaze ili scios ĉi tion?

Kiam li estis meze de la kamparo, sidante apud Kuiraĵo en aŭtomobilo, fronte al la spadulo kaj la altrangulino, lia incitiĝo malaperis iom post iom.

Li ne vidis bone ŝin, ĉar ŝi estis envolvita per granda, blua vualo pendanta de

ŝia vojaĝa ĉapo kaj nodita sur silka, flava surtuto; sed ŝi estis tre bela... Kaj, kian konversacion! Kaj, kiom multajn aferojn ŝi scias!

Antaŭ kiam ili atingis la vojan mezon, Naciao malgraŭ siaj dudek kvin jaroj da hejma fideleco senkulpigis la konduton de la matadoro kaj komprenis lian entuziasmon. Li mem en tia okazo agus same!...

Klereco!... Bonega afero, kiu igas respektindaj eĉ plej grandajn pekojn.

V

— Li diru al vi, kiu estas aŭ, li iru en inferon. Malbenaĵo!... Ĉu oni ne povas dormi?...

Naciao aŭdis ĉi tiun respondon tra la pordo de la majstra ĉambro kaj ĝin rediris al la biena laboristo atendanta ĉe la ŝtuparo.

— Li diru al vi, kiu estas. Se ne, la mastro ne leviĝos.

Estis la oka; la pikiletisto iris ĉe la fenestron kaj sekvis rigarde la bienanon kurantan tra vojo antaŭ la biendomo, ĝis tio ke li atingis la malproksiman, ferfadenan barilon ĉirkaŭantan la bienon. Apud la barilan enirejon li vidis rajdanton etan pro la granda distanco: homon kaj ĉevalon, kiuj ŝajnis aparteni al ludila skatolo.

Post ne longe revenis la bienano parolinte kun la rajdanto.

Naciao, interesite de ĉi tiuj iroj ĉi tien kaj tien, atendis lin ĉe la ŝtupara malsupro.

— Li diris, ke li bezonas vidi la mastron—kvazaŭ maĉis rapidege la kampulo—. Ŝajnas koleremulo. Ankaŭ diris, ke li malsupreniru tuj, ĉar li estas dironta al li ion gravan.

La pikiletisto refrapadis la pordon de la spadula ĉambro, ne atentante pri liaj protestoj. Li decas ellitiĝi: laŭ la kampara vivo estas jam malfrue, kaj tiu homo eble diros al li ion interesan.

— Jam mi leviĝas — respondis malbonhumore Gallardo, ne moviĝante el sia lito.

La pikiletisto ree sin metis ĉe la fenestron kaj vidis, ke la rajdanto antaŭeniris tra la vojo al la biendomo.

La kampolaboristo iris al li por sciigi lin pri la mastra respondo. Li ŝajnis maltrankvila kaj dum ambaŭ dialogoj kun la pikiletisto balbutis, montrante timon kaj heziton, kiel se li ne kuraĝis diri, kion pensis.

Kiam li renkontis la rajdanton, li aŭskultis lin kelkajn momentojn kaj alifoje venis domen, sed nun pli rapide ankoraŭ.

Naciao aŭdis al li supreniri la ŝtuparon ankaŭ rapidege, post kio li iris al li tremante kaj pala.

— Li estas Plumeto, sinjoro Sebastiano! Li diris, ke estas Plumeto kaj, ke li bezonas paroli kun la mastro... Mi tion antaŭsentis, de kiam vidis lin.

Plumeto!... La voĉo de la bienano, malgraŭ tio ke ĝi estis balbutanta kaj sufokata pro laciĝo, ŝajnis disflugi al ĉiuj ĉambroj, kiam li prononcis ĉi tiun nomon. La pikiletisto mutiĝis pro surprizo. En la spadula ĉambro eksonis kelkaj interjekcioj krom bruo de vestaĵoj kaj de homa korpo, kiu ellitiĝas subite. En tiu okupata de Doña Suno ankaŭ oni rimarkis movon ŝajne respondantan al tiu eksterordinara sciigo.

— Nu, malbenaĵo! Kion volas tiu homo? Kial li venas en *Rinconada'n?* Kaj ĝuste nun!...

Li estis Gallardo, kiu eliris rapidege el sia ĉambro, portante sur si nur pantalonon kaj jakegon metitajn kiel eble plej rapide sur siajn internajn vestaĵojn. Li preterpasis kurante antaŭ la pikiletisto kun tiu blinda troemo de sia impulsema karaktero kaj li sin ĵetis, pli ĝuste dirate, ol iris, malsupren tra la ŝtuparo, sekvate de Naciao.

Ĉe la enirejo de la biendomo la rajdanto tereniĝis. Kampulo tenis la ĉevalajn kondukilojn kaj la ceteraj laboristoj grupiĝis proksimen, scivoleme kaj respekte rigardante la ĵus alvenintan homon.

Li estis mezalta viro, pli ĝuste malalta, ol alta, rondvizaĝa, blonda kaj kun mallongaj kaj fortaj membroj. Li vestiĝis per griza bluzo ornamita per nigra, malhela kaj malnova pasamentaro, rajdista pantalono kun dikaj, drapaj ŝirmopecoj inter ambaŭ kruroj kaj ledaj gamaŝoj, difektitaj de la suno, la pluvado kaj koto. Sub la bluzo lia ventro ŝajnis ŝvelinta pro dika, talia volvostrio kaj kartoĉa zono, al kiuj estis aldonitaj revolvero kaj piktranĉilo, kruce metitaj sub la zonon. Per sia dekstra mano li tenis ripetkarabenon. Kovris lian kapon ĉapelo, kiu iam estis blanka kaj kies rando falis kaj tute difektiĝis pro la efiko de libera aero. Ruĝa tuko nodita sur kolon estis lia plej vidinda ornamaĵo.

Lia larĝa kaj vangodika vizaĝo ŝajnis trankvila, ronda luno. Sur liaj vangoj, kiuj montris sian fundan blankecon tra suna bruniĝado, hirtis blondaj, de kelkaj tagoj nerazitaj barboharetoj aspektantaj en lumo, kvazaŭ malnova oro. Liaj okuloj estis, kio nur ŝajnis maltrankviliga de tiu bonula vizaĝo inda je vilaĝa sakristiisto: malgrandaj kaj triangulaj okuloj dronantaj inter grasaj ondoj; malsupren tiritaj okuletoj, kiuj similis tiuj de la porkoj, kun ruza, malhele blua pupilo.

Kiam aperis Gallardo ĉe la doma pordo, tuj Plumeto rekonis lin kaj levis sian ĉapelon super sian rondan kapon.

— Bonan tagon liveru al ni Dio, sinjoro Johano— diris li per tiu serioza ĝentileco de andaluzia kampulo.

— Bonan tagon.

— Ĉu via familio bonfartas, sinjoro Johano?

— Jes, dankon. Ĉu tiu via ankaŭ? — demandis la spadulo pro kutimo.

— Mi supozas, ke ĝi ankaŭ bonfartas. Mi de longe ne vidas ĝin.

Ambaŭ homoj proksimiĝis kaj rigardadis sin reciproke per tute natura maniero, kiel se ili estus du vojirantoj, kiuj renkontas sin unu la alian meze de la kamparo. La toreadoro estis pala kaj premis ambaŭ lipojn por kaŝi siajn impresojn. Ĉu la bandito supozas, ke li timigos lin!... Aliokaze eble li timus pro tiu vizito; sed nun kun tia gastulino supre li sentiĝis preta batali kontraŭ li, kvazaŭ li estus taŭro, tuj kiam li montros malbonan intencon.

Ili silentis dum kelkaj momentoj. Ĉiuj bienanoj ne foririntaj por labori en la kamparo (pli multe, ol dekduo) rigardadis per iom infana miro tiun teruran famulon, nur pensante pri lia krimfama nomo.

— Ĉu vi permesas, ke oni konduku mian ĉevalon en vian stalon, por ke ĝi iom ripozu? — demandis la bandito.

Gallardo faris ordonan signon kaj bienano ĝin irigis per la kondukiloj en stalon.

— Zorgu multe ĝin — diris Plumeto —. Pensu, ke ĝi estas mia plej ŝatata posedaĵo kaj mi amas ĝin pli multe, ol mian edzinon kaj filetojn.

Nova persono kuniĝis al la grupo konsistanta el la spadulo kaj la bandito meze de la mirantaj bienanoj.

Li estis Kuiraĵo, la pikrajdisto, kiu eliris kun libera kolo, streĉante siajn muskolojn por elvekiĝi kaj montrante sian brute grandan korpon de atleto. Li frotis siajn okulojn, ĉiam sange ruĝaj kaj ŝvelantaj pro trouzo de alkoholaĵoj, kaj, proksimiĝante al la bandito, lasis fali manegon sur iun el liaj ŝultroj per pensita familiareco, kiel se li ĝuis tremigante lin sub sia besta mano kaj esprimis tiel, samtempe, sian barbaran simpation.

— Kiel vi fartas, Plumeto?...

Li vidis lin unuafoje. La bandito fleksiĝis, kvazaŭ li estus eksaltonta sub tiu maldelikata kaj malrespekta kareso kaj lia dekstra mano levis la karabenon. Sed, rigardante la pikrajdiston per siaj bluaj okuletoj, li ŝajnis rekoni lin.

— Vi estas Kuiraĵo, se mi ne eraras. Mi vidis vin piki en Seviljo ĉe la alia foiro. Kiaj ĉevalfaloj! Kia besto vi estas!... Ŝajnas, kvazaŭ vi estus ŝtala!

Kaj, kiel se li volis respondi lian saluton, li prenis per sia kalhava mano pikrajdistan brakon, premante ĝian bicepson kun admira rideto. Ambaŭ ameme rigardadis sin reciproke. La pikrajdisto ridis brue.

— Ho! ho! Mi supozis vin pli granda, Plumeto... Sed estas same; ankaŭ tiel vi estas fortulo.

La bandito alparolis la spadulon:

— Ĉu mi tagmanĝos ĉi tie?

Gallardo respondis per altranga maniero:

— Neniu venanto en *Rinconada'n* eliras ne manĝinte.

Ĉiuj iris en la bienan kuirejon; granda ĉambro kun kapuĉa kameno, kie kutime kunestis la bienanoj.

La spadulo sidiĝis sur apogseĝon, kaj knabino, filino de la bienestro, lin helpis meti liajn ŝuojn, ĉar pro sia rapida sinvesto li malsupreniris nur kun pantofloj.

Naciao, dezirante fariĝi videbla, jam trankvila pro la ĝentila aspekto de tiu vizito, aperis portante botelon de vino kaj glasojn.

— Vin ankaŭ mi konas—diris la bandito, parolante lin same neetikete, kiel la pikrajdiston —. Mi vidis vin pikileti. Kiam vi volas, faras lerte tion, sed vi devas proksimiĝi pli al la taŭro...

Kuirajo kaj la majstro ridis pro tiu konsilo. Kiam Plumeto intencis preni la glason, li estis embarasata de la karabeno, kiun tenis inter siaj genuoj.

— Nu, lasu tion — diris la pikrajdisto —. Ĉu vi tenas tiun pafilon, eĉ kiam vizitas iun?

La bandito serioziĝis. Ĝi estas bone tiel; tio iĝis lia kutimo. La ripetpafilo akompanas lin ĉiam, eĉ kiam li dormas. Kaj tiu parolo pri lia armilo, kiu estis kvazaŭ membro ĉiam kunigita al lia korpo, reigis lin neŝercanta. Li rigardis ĉien iom maltrankvile. Oni rimarkis sur lian vizaĝon malkonfidon, kutimon ĉiam vigli kaj nur fidi al sia propra agado, konsciante ĉiumomente danĝeron ĉirkaŭ si.

Bienano trairis la kuirejon, sin direktante al la pordo.

— Kien iras tiu homo?

Kaj samtempe li rektigis sian buston kaj proksimigis al la mano per siaj genuoj la klinitan karabenon.

Li iris en grandan, apudan kampon, kie laboris la bienaj salajruloj. Plumeto trankviliĝis.

— Aŭskultu, sinjoro Johano. Mi venis ĉi tien por plezuro vidi vin kaj ĉar mi scias, ke vi estas noblulo nekapabla sendi fisciigojn... Krome, vi certe aŭdis paroli pri Plumeto. Ne estas facile lin kapti kaj, kiu perfidas lin, baldaŭ pentas.

La pikrajdisto respondis, antaŭ kiam lia majstro ekparolis.

— Plumeto, ne estu malsaĝa. Ĉi tie vi estas inter kamaradoj, dum vi bone kondutos kaj dece agos.

Kaj trankviligate subite la rabisto komencis paroli pri sia ĉevalo al la pikrajdisto, laŭdante ĝiajn bonajn kvalitojn. Ambaŭ viroj entuziasme ekkonversaciis pri ĉevaloj, kiujn ili amis eĉ pli multe, ol personojn.

Gallardo ankoraŭ iom maltrankvila, promenis tra la kuirejo, dum la bienaj virinoj, brunaj kaj duonviraj, vigligis la fajron per blovilo kaj pretigis la tagmanĝon, rigardante nerekte faman Plumeton.

La spadulo en iu el siaj iroj proksimiĝis al Naciao. Li sendis lin al Doña Suno por peti, ke ŝi ne malsupreniru. La bandito foriros certe, post kiam li tagmanĝos. Por kio esti vidata de tiu bedaŭrinda famulo?

Malaperis la pikiletisto kaj Plumeto, ĉar vidis, ke la majstro ne partoprenis la konversacion, alparolis lin, demandante pri la ludbataloj farotaj de li en la jaro.

— Nu, mi estas Gallard'ano. Mi aplaŭdis vin pli multe da fojoj, ol vi certe supozas. Mi vidis vin en Seviljo, en Ĵaeno, en Kordobo..., en multaj urboj.

Gallardo miris pro tio ĉi. Kiel li povis, persekutate de ja tuta armeo, trankvile ĉeesti ludbatalojn? Plumeto ridetis kun mieno de supereco.

— Ha! Mi iras, kien mi volas. Mi estas ĉie.

Poste li parolis pri tiuj okazoj, en kiuj li vidis, kiel la spadulo iris al la bieno, iujn fojojn akompanate, aliajn sola, kaj kiel ĉi tiu pasis apud li ĉe la vojo, ne atentante pri li, kvazaŭ li estus mizera, rajdanta kampulo komisiita por io al proksima kabano.

— Kiam vi venis el Seviljo por aĉeti viajn du muelejojn, kiuj kuŝas malsupre, mi renkontis vin en la vojo. Vi portis sur vi kvin mil durojn. Ĉu ne vere? Respondu sincere. Tio vin pruvas, ke mi ĝuste sciiĝas... Alifoje mi vidis vin en aŭtomobilo kun sinjoro el Seviljo, kiu, mi kredas, estas via kontraktfaristo. Vi aliris por subskribi aĉet-vendan dokumenton pri Pastra Olivarbaro kaj vi portis eĉ pli multe da mono.

Gallardo iom post iom rememoris tiujn ĝuste menciitajn faktojn kaj rigardis mire tiun homon ĉion sciantan. La bandito, por pruvi sian bonvolon al la toreadoro, parolis pri la preskaŭ neniu respekto, kiun malfacilaĵoj inspiris al li.

— Ĉu aŭtomobiloj? Malgravaĵo! Tiujn kurbestojn mi haltigas nur per ĉi tio. (Kaj li montris sian ripetpafilon). En Kordobo mi estis venĝonta min kontraŭ malamika riĉulo. Mi metis mian ĉevalon ĉe flanko de la ĉefvojo kaj, kiam alvenis lia aŭtomobilo, levante polvon kaj petrole odoraĉante, mi ordonis halti. Li ne volis obei, kaj mi pafvundis tiun, kiu kondukis ĝin. Unuvorte: la aŭtomobilo haltis iom pli poste kaj mi per nedaŭra galopeto iris al ĝi, por pagigi al la sinjoro lian ŝuldon. Homo paftrafanta, kion li volas, povas haltigi ĉion sur vojo.

Gallardo aŭskultis Plumeton kaj miris, pro tio ke li parolis tiel profesie neafekte pri siaj survojaj faroj.

—Vin mi ne deziris haltigi. Vi ne devenas el riĉuloj. Vi estas malriĉulo, kiel mi; sed pli bonsorta, pli lerta por via metio kaj, se vi nun havas monon, tre multe pene vi ĝin gajnis. Mi multe amas vin, sinjoro Johano. Mi vin estimas, ĉar vi estas netrompema matadoro kaj mi estas inklina al kuraĝuloj. Ni ambaŭ estas preskaŭ kamaradoj: ambaŭ gajnas niajn vivrimedojn, riskante nian vivon. Tial, kvankam vi ne konis min, mi lasis vin pasi, petante al vi nek eĉ cigaredon, kaj estis tie, por ke neniu tuŝu al vi eĉ ungon, por vigli, ke iu fripono ne profitu la okazon vin rabi, dirante, ke li estas Plumeto; ĉar oni konstatas pli strangajn friponaĵojn.

Neatendita apero tranĉis la rabistan parolon kaj malkontentigis la toreadoran mienon. Malbenaĵo! Doña Suno! Ĉu Naciao ne transdonis lian avizon?... La pikiletisto venis post ŝi kaj de la kuireja pordo gestis por montri, ke ĉiuj liaj petoj kaj konsiloj estis neefikaj.

Venis Doña Suno kun vojaĝa surtuto kaj sia ora hararo nekrovita, kombita kaj nodita, kiel eble plej rapide. Plumeto en la bieno! Kia feliĉaĵo! Dum parto de la nokto ŝi ĝuste pensis pri li, tremante pro dolĉa teruro, kaj intencis la morgaŭan matenon rajdi tra la apudaj al *Rinconada* senhomaj ĉirkaŭaĵoj, esperante, ke ŝia bonsorto renkontigos al ŝi tiun interesplenan banditon. Kaj, kvazaŭ ŝia penso influus de malproksime, altirante la personojn, la rabisto obeis ŝiajn dezirojn kaj sin prezentis frumatene en la bienon.

Plumeto! Tiu nomo imagigis al ŝi la tutan banditan figuron. Preskaŭ ŝi ne bezonis lin koni; apenaŭ ŝi miros. Ŝi bildis lin alta, nedika, pale bruna, kun larĝranda ĉapelo metita sur ruĝa tuko, sub kiu montriĝis brile nigraj harbukloj; malpeza korpo vestita per nigra veluro; fleksebla talio volvita per purpura, silka strio kaj kruroj kun daktilkoloraj, ledaj gamaŝoj; rajdanta kavaliro el andaluziaj stepoj, preskaŭ egala al tiuj bonfiguraj tenoruloj, kiujn ŝi vidis en opero Karmeno, ŝanĝantaj pro amo soldatan kostumon per tiu de kontrabandisto.

Ŝiaj pligrandigitaj pro emocio okuloj rigardis ĉien en la kuirejo, trovante nek larĝrandan ĉapelon nek "trabukon" (53). Ŝi nur vidis nekonatan homon, kiu stariĝis; viron similan al kampogardistoj kun karabeno, kiujn ŝi renkontis multfoje en la bienoj de sia familio.

— Bonan tagon, markizina moŝto... Ĉu via onklo, la markiza moŝto, bonfartas?

Ĉies rigardoj kuniĝantaj sur tiun viron divenigis al ŝi la veron. Ve! Ĉu tiu ĉi estas Plumeto?...

Li demetis sian ĉapelon per mallerta ĝentileco, embarasate de la sinjorina ĉeesto, kaj restis starante kun karabeno tenata per mano kaj sia malnova ĉapelo per la alia.

Gallardo miris pro tiuj vortoj de la rabisto. Tiu homo konas ĉiujn! Li scias, kiu estas Doña Suno, kaj pro troa respekto ankaŭ nomis ŝin per la nobela titolo de ŝia onklo.

La sinjorino post tiu surprizo faris signon, por ke li sidiĝu kaj kapkovru; sed li, kvankam obeis tiun unuan, metis la ĉapelon sur apudan seĝon.

Kiel se li divenis demandon sur la okuloj de Doña Suno fikse rigardantaj lin, li aldonis:

— Ne miru via markizina moŝto, ĉar mi konas vin: mi vin vidis multfoje kun la markizo kaj aliaj sinjoroj, kiam vi rajdis al la taŭridetaj provadoj. Mi vidis ankaŭ de malproksime, kiel via moŝto persekutis kun pikstango la taŭrojn. Via moŝto estas tre kuraĝa kaj plej bela virino, kiun oni vidis en ĉi tiu dia lando. Estas

ĉarmege vin vidi rajdanta kun larĝranda ĉapelo, kravato kaj talia volvostrio. Viroj devus ja senĉese batali por viaj ĉielaj okuloj.

La bandito lasis puŝi sin de sia suda entuziasmo per tute neafekta maniero, serĉante novajn laŭdojn por la sinjorino.

Ĉi tiu paliĝis kaj grandigis siajn okulojn pro agrabla teruro, ektrovante interesa la rabiston. Ĉu eble li venis en la bienon nur por ŝi?... Ĉu li intencis ŝin rabi kaj porti ŝin en montan kaŝejon, kiel malsata rabbirdo revenanta en sian alte lokitan neston kun riĉa kaptaĵo?...

La toreadoro ankaŭ maltrankviliĝis, aŭdante ĉi tiujn laŭdojn de maldelikata admiro. Malbenaĵo! En lia domo!... kaj antaŭ li mem! Se la bandito daŭrigos tian konduton, li supreniros por preni sian pafilon kaj, kvankam la alia estas ja Plumeto, jam oni vidos, kiu batale gajnos ŝin.

La rabisto ŝajnis subite kompreni, ke liaj vortoj ĝenis, kaj adoptis respekteman sintenadon.

— Pardonu min, markizina moŝto. Tio estas nur babilaĵo. Mi havas edzinon kaj kvar filojn, kaj la kompatindulino ploras pro mia kaŭzo pli multe, ol Virgulino Angustio. Mi estas pacema; malfeliĉulo, kiu rezultas tia, kia vi vidas, ĉar malbonsorto persekutas lin.

Kaj, kiel se li deziris fariĝi agrabla al Doña Suno, ekkomencis entuziasme laŭdi ŝian familion. Markizo Moraima estas iu el homoj, kiujn li pli multe respektas en la mondo.

— Ja ni ĝojus, se ĉiuj riĉuloj estus tiaj. Mia patro laboris por li kaj parolis al ni pri lia monhelpemo. Mi mem restis dum tuta febromalsano en paŝtista kabano de iu el liaj herbejoj. Li sciis kaj ne malaprobis tion. En ĉiuj liaj bienoj oni ricevis de li ordonon doni al mi, kion mi petos, kaj ne ĝeni min... Tiajn aferojn oni forgesas neniam. Estas tiom multe da friponaj riĉuloj en la mondo!... Okaze mi renkontas lin sola, rajdanta sur ĉevalo, kiel knabo, kvazaŭ al li ne efikus multaĝo. "Dio vin gardu, sinjoro markizo". "Fartu bone, karulo". Li ne konas min; li ne divenas, kiu mi estas, ĉar mi portas mian kunulon (kaj li montris sian karabenon), ĝin kaŝinte sub la lankovrilon. Mi foje ekdeziras haltigi lin kaj peti lian manon; ne por ĝin premi; tio ne; kiel tiom bona sinjoro estus manpremanta min, kiu estas kulpa pri tiom da krimoj kaj malbonaĵoj! sed por ĝin kisi, kiel se li estus mia patro, por genufleksi antaŭ li kaj danki lin pro lia helpado al mi.

Tiu varmo, per kiu li parolis pri sia dankemo, ne kortuŝis Doñan Sunon. Ĉu tiu estis fama Plumeto?... Ja malfeliĉulo; bona, kampa kuniklo, kiun ĉiuj opiniis lupo, trompite de la famo.

— Estas riĉuloj tre malbonaj — daŭrigis la rabisto —. Kiom multe kelkaj suferigas la mizerulojn... Proksime al mia vilaĝo loĝas iu, kiu pruntedonis monon procente kaj estas pli malbona, ol Judaso. Mi sendis al li averton, por ke li ne turmentu la loĝantojn kaj tiu fripono, anstataŭ obei min, avizis la ĝendarmaron.

por ke ĝi min persekutu. Do: mi bruligis al li pajlejon, faris kontraŭ li aliajn ĉikanojn, kaj de antaŭ duonjaro li ne kuraĝas iri en Seviljon nek eliri eksteren de la vilaĝo, pro timo renkonti Plumeton. Alia intencis forigi el ŝia loĝejo malriĉan maljunulinon, ĉar ŝi de antaŭ unu jaro ne pagis luprezon por domaĉo, kie loĝas de la tempo de siaj gepatroj. Mi vizitis tiun sinjoron, kiam li pretiĝis ekvespermanĝi kun sia familio. "Mia sinjoro, mi estas Plumeto kaj bezonas cent durojn". Li ilin donis al mi kaj mi iris kun ili al la maljunulino. "Prenu, avino: pagu al tiu avarulo; kio restos, por vi, kaj ĝi utilu vian sanon.

Doña Suno rigardis pli interesate la rabiston. — Kiom da mortigoj vi faris? — ŝi demandis.

— Sinjorino, ni ne parolu pri tio — diris serioze la bandito —. Vi certe abomenus min kaj mi nur estas malfeliĉulo, kompatindulo, kiun oni sieĝas kaj kiu sin defendas, kiel li povas...

Ĉiuj silentis dum kelke da tempo.

— Via markizina moŝto ne scias, kiel mi vivadas — li daŭrigis —. Lupoj suferas malpli, ol mi. Mi dormas, kie mi povas aŭ tute ne dormas. Vekiĝas mi en flanko de la provinco kaj nokte kuŝas en flanko kontraŭa. Estas necese vigle uzi la okulojn kaj agi energie, por ke oni respektu kaj ne perfidu nin. La malriĉuloj estas bonaj, sed mizero estas malbenita afero iganta malbona tiun plej bonan. Se oni ne timus min, mi jam estus fordonita multfoje al ĝendarmoj. Miaj veraj amikoj estas nur mia ĉevalo kaj ĉi tiu (kaj li montris la karabenon). Okaze mi ekdeziregas vidi mian edzinon kaj filetojn; do, mi iras nokte en la vilaĝon kaj ĉiuj najbaroj, kiuj estimas min, agas, kiel se ili vidus nenion. Sed ĉi tio iam malbone finiĝos... Kelkfoje mi enuas en soleco kaj bezonas paroli kun personoj. Antaŭ longe mi deziris veni en *Rinconada'n*. Kial mi, kiu ja estimas kaj aplaŭdas sinjoron Johanon, ne vidos lin de proksime? Sed mi ĉiam trovis vin akompanata de multaj amikoj aŭ loĝis en la bieno via edzino kaj via patrino kun infanoj. Mi scias tion, kio estus okazinta: Ili ektimegus nur vidante Plumeton. Sed nun estas alie. Nun vi venis kun ŝia markizina moŝto kaj mi pensis: "Mi iru saluti tiujn gesinjorojn kaj konversacii iom kun ili".

Kaj per preskaŭ nerimarkebla rideto li substrekis la diferencon, kiun li faris, inter la toreadora familio kaj tiu sinjorino, komprenigante, ke ne estis por li sekreto la amrilato inter Gallardo kaj Doña Suno. Lia kampula animo konservis respekton al la laŭleĝa geedziĝo, konsiderante, ke li rajtis agi pli libere pri tiu aristokrata amikino de la toreadoro, ol pri la simplaj virinoj de lia familio.

Ne atentis Doña Suno pri ĉi tiuj vortoj kaj sieĝis per siaj demandoj la rabiston, dezirante scii, kial li alvenis en sian nunan staton.

— Pro malgravaĵo, markizina moŝto: pro maljustaĵo; pro malfeliĉa okazo el tiuj falantaj foje sur nin, la malriĉuloj. Mi estis iu el plej viglaj de mia vilaĝo, kaj la laboristoj ĉiam sendis min, kiam estis necese peti ion al la riĉuloj. Mi scias

legi kaj skribi; en mia knabaĝo mi estis sakristiisto kaj oni nomis min vulgare "Plumeto", ĉar mi persekutis kokinojn por fortiri plumojn el ilia vosto por mia skribado.

Manbato de Kuiraĵo interrompis lian diron.

— Kamarado, mi jam divenis, de kiam mi vidis vin, ke vi estas preĝeja rato aŭ io simila.

Naciao silentis, ne konsiderante decaj tiajn intimaĵojn, sed iomete ridetis. Sakristiisto, kiu iĝis bandito! Kion diros Don Joseĉjo, kiam li raportos al li pri tio!...

— Mi edziĝis kaj naskigis mian unuan fileton. Iun nokton frapas la domporton la ĝendarma paro kaj irigas min el la vilaĝo, en draŝejon. Oni estis pafinta apud dompordo de riĉulo kaj tiuj sinjoroj obstinis, pri tio ke mi estis la aŭtoro... Mi neis kaj ili batis min per siaj karabenoj. Mi reneis kaj ili ree min batis. Mallongigante: ke ili ĝis la sunleviĝo batadis mian tutan korpon, iujn fojojn per siaj pafiloj, aliajn per la tubpurigiloj, ĝis kiam ili laciĝis kaj lasis min sveninta sur tero. Ili estis ligintaj min piede kaj mane kaj min batis, kvazaŭ mi estus pakaĵo, kaj krome ili diris: "Ĉu vi ne estas plej kuraĝa viro el la vilaĝo? Do, defendu vin, ni vidos, kiom brava vi estas". Tiu moko estis, kio pli multe vundis min. Mia malfeliĉa edzino min kuracis, kiel ŝi sciis, kaj mi ne povis vivi trankvila, memorante la batojn kaj la mokon... Mallongigante alifoje: iun tagon oni trovis unu el la ĝendarmoj mortigita en draŝejo kaj mi, por eviti al mi malplaĉon, iris en montan kamparon... kaj tie mi restas ĝis nun.

— Nu, vi estas trafa — diris admire Kuiraĵo —. Kaj kio al la alia?

— Mi ne scias; certe li estas ie. Li foriris el la vilaĝo, li petis servi aliloke malgraŭ sia granda braveco, sed mi ne forgesas lin. Mi bezonas pagigi al li sian ŝuldon. Okaze oni diras al mi, ke li estas en la kontraŭa flanko de Hispanlando, kaj tien mi iras, kvankam li estus en infero mem. Mi lasas mian ĉevalon kaj mian karabenon al amiko, por ke li ilin gardu, kaj vojaĝas vagonare, kiel sinjoro. Mi estis en Barcelono, en Valjadolido, en multaj urboj. Mi lokiĝas apud la kazerno kaj observadas la ĝendarmojn, kiuj eniras aŭ eliras "Ĉi tiu ne estas li: tiu ĉi ankaŭ ne". Oni erare informis min, sed tio ne gravas. Mi serĉas de antaŭ kelkaj jaroj kaj certe trovos lin. Se ne okazas, ke li mortis, kio estus ja domaĝo.

Doña Suno aŭskultis interesate ĉi tiun rakonton. Ja Plumeto estas originalulo! Ŝi eraris, opiniante lin kuniklo.

La bandito silentis, streĉante siajn brovojn, kiel se li timis esti tro multe dirinta kaj deziris eviti pluajn konfidencojn.

— Permesu min — li diris al la spadulo — mi iras en la stalon por vidi, kiel oni zorgis mian ĉevalon. Ĉu vi venas, kamarado?... Vi vidos belan beston.

Kuiraĵo akceptis lian proponon kaj eliris kun li el la kuirejo.

Kiam restis solaj la toreadoro kaj la altrangulino, li montris sian malbonan

humoron. Kial ŝi malsupreniris? Estas troa maltimo sin prezenti antaŭ tian homon; bandito, kies nura nomo estas ĉies teruro.

Sed Doña Suno kontenta pro la sukceso, kiun ŝi atingis sin prezentante, ridis pri la spadula timo. Al ŝi ŝajnas la bandito bonulo, malfeliĉulo, kies malbonaĵojn trograndigas la popola fantazio. Preskaŭ li estas servisto de ŝia familio.

— Mi imagis lin alimaniera, sed malgraŭ ĉio mi ĝojas esti koninta lin. Ni donos al li almozon, kiam li foriros. Kiel originala lando! Kiaj tipuloj!... Kaj kiel interesplena lia ĉasado je la ĝendarmo tra tuta Hispanlando... Per tio iu ajn povus verki tre interesan gazetromanon.

La bienaj virinoj demetis el la fajrejaj flamoj du grandajn potojn, kiuj kolbase disodoris agrable.

— Venu tagmanĝi gesinjoroj— ekkriis Naciao, kiu atribuis al si domestran postenon en la bieno de sia majstro.

Meze de la kuirejo estis granda tablo kovrita per tablotuko kun rondaj panoj kaj multenombraj vinboteloj. Venis pro tiu alvoko Plumeto, Kuiraĵo, kelkaj el la bienaj laboristoj, la bienestro, la terkulturestro, kaj ĉiuj plenumantaj ĉefajn oficojn. Ili sidiĝis sur du benkojn lokitajn laŭlonge apud la tablo, dum Gallardo rigardis hezite Doñan Sunon. Decas, ke ŝi manĝu supre en la familiaj ĉambroj. Sed ŝi, ridante pri tia konsilo, sidiĝis ĉe al tabla honorloko. Ŝin plaĉas la kampara vivo kaj ŝi opinias tre interese manĝi kun tiaj personoj. Ŝia denaskiĝa inklino estas militi. Kaj per vira gesto ŝi invitis la spadulon sidiĝi, malfermante, por volupte flari, sian gracian nazon, kiu avidis la nutran odoron de la kolbasoj. Ja bongusta manĝaĵo. Kiel grandan apetiton ŝi sentis.

— Estas tre bone — diris sentence Plumeto, rigardante la tablon —. La mastroj kaj servistoj manĝantaj kune, kiel, oni diras, okazis pratempe. Mi ja unuafoje vidas ĉi tion.

Kaj li sidiĝis apud la pikrajdisto, ne lasante sian karabenon, kiun li konservis inter siaj genuoj.

—Lasu lokon al mi, mokemulo — li diris, puŝante Kuiraĵon per sia korpo.

La pikrajdisto, kiu traktis lin per maldelikata kamaradeco, lin respondis per alia korppuŝo kaj ambaŭ fortaj viroj ridis, sin reciproke puŝante, kaj ĝojigis ĉiujn ĉeestantojn per tiaj brutaj ludoj.

— Nu, malbenaĵo! — diris la pikrajdisto — demetu tiun ilon el viaj genuoj. Ĉu vi ne rimarkas, ke ĝi direktiĝas al mi kaj eble okazos malfeliĉaĵo?

La bandita karabeno, kliniĝinte inter liaj kruroj, direktis sian nigran truon al la pikrajdisto.

— Pendigu tion, malspritulo — insistis ĉi tiu —. Ĉu vi tion bezonas por manĝi?

— Ĝi estas bone tiel. Nenion timu — respondis mallonge la rabisto, iĝante malbonhumora, kiel se li ne volis akcepti konsilojn pri liaj antaŭzorgoj.

Li prenis sian kuleron, kaptis panpecon kaj rigardis la ceterulojn, por esti certa laŭ vilaĝa ĝentileco, pri tio ke ekmanĝa momento alvenis.

— Sanon, gesinjoroj!

Li atakis la grandegan pladon, kiun oni metis mezen de la tablo por li kaj ambaŭ toreadoroj. Alia egala plado fumis iom pli malproksime por la bienanoj.

Li ŝajnis subite honti pro sia apetitego kaj post ne multaj kulerprenoj li haltis, opiniante necesa klarigon.

— De hieraŭ matene mi manĝis nur panpecon kaj iom da lakto, kiun oni donis al mi en paŝtista kabano. Bonan apetiton!

Kaj li reatakis la pladon, akceptante per okulsignoj kaj senĉesa movado je siaj makzeloj la ŝercojn de Kuiraĵo pri lia manĝegemo.

La pikrajdisto deziris trinkigi lin. Timigite antaŭ sia majstro, kiun tute ne plaĉis, ke li ebriiĝu, li rigardis avide la botelojn de vino metitajn apud lin.

— Trinku, Plumeto. Seka manĝo estas tre malbona afero. Estas necese verŝi sur ĝin.

Kaj, antaŭ ol la bandito akceptis lian inviton, la pikrajdisto trinkis, kaj trinkis rapidege. Plumeto nur malofte tuŝis sian glason post longa hezito. Li timas vinon: li perdis kutimon trinki ĝin. En la kamparo multfoje ĝin oni ne trovas. Plie vino estas plej danĝera malamiko por homo, kiel li, kiu bezonas vivadi tre vigle kaj tute preta.

—Sed tie ĉi vi estas inter amikoj—diris la pikrajdisto—. Imagu, Plumeto, ke vi estas en Seviljo, sub la mantelo mem de *Macarena* Virgulino. Neniu eĉ tuŝos vin... Kaj, se okaze venos ĉi tien la ĝendarmoj, mi batalos favore al vi; mi prenos pikstangon kaj ni mortigos ĉiujn el tiuj sentaŭguloj. Ĝuste min multe plaĉus iĝi kampara rajdisto!... Ĉiam mi emis tion.

— Kuiraĵo! — diris la spadulo de tabla ekstremo, timante la pikrajdistan babilemon kaj lian proksimecon al boteloj.

La bandito, malgraŭ tio ke li trinkis malmulte, estis vizaĝruĝeta kaj liaj bluaj okuloj brilis gaje. Li elektis vigle sian sidlokon fronte al kuireja pordo; de tie li vidis la bienenirejon kaj parton de la senhoma vojo. De tempo al tempo transiris ĉi tiun flavan strion bovino, porko, kapro, kaj iliaj ombroj ĵetitaj de la suno sur ĝin sufiĉis por tremigi Plumeton, preta lasi la kuleron kaj preni sian karabenon.

Li parolis kun siaj tablokunuloj, ne forgesante tamen atenti la eksteraĵon, ĉar li estis kutimiĝinta vivadi ĉiumomente preta sin defendi aŭ forkuri kaj konsideris malhonoriga afero por li esti surprizata.

Kiam li finis sian manĝon, li akceptis de Kuiraĵo unu pluan glason, la lastan, kaj restis kun mano sub sia makzelo, rigardante eksteren, embarasate kaj silente pro digestado. Tiu estis ja digestado de boao, de stomako kutimiĝinta sin nutri neregule per grandegaj manĝoj kaj longaj fasttempoj.

Gallardo prezentis al li cigaron el Habano.

— Dankon, sinjoro Johano. Mi ne kutimas fumi; tamen mi gardos ĝin por malfeliĉa kamarado, kiu iradas tra la kamparo kaj pli multe ŝatas fumi, ol eĉ manĝi. Li estas junulo kiun trafis malbonsorto kaj kiu helpas min, kiam estas okupo por ambaŭ.

Li gardis la cigaron sub sian bluzon kaj ridetis kun sovaĝa gajeco, memorante tiun kamaradon, kiu certe vagadis tiumomente tre malproksime de ili. Vino vigligis Plumeton. Lia mieno estis alia. Liaj okuloj brilis maltrankvilige per metalaj nuancoj. Lia vangodika vizaĝo streĉiĝis laŭ grimaco ŝajnanta forpeli lian kutiman aspekton je boneco. Oni divenis, ke li deziras paroli, sin laŭdi pri siaj faroj, pagi sian gastecon, mirigante siajn bonfarintojn.

—Vi certe aŭdis rakonti, kion mi faris la pasintan monaton sur la vojo al *Fregenal*. Ĉu vi vere scias nenion pri ĝi?... Mi metis min en la vojon kun mia kamarado, ĉar estis necese haltigi omnibuson kaj pagigi ŝuldon al riĉulo, kiu ĉiumomente okupiĝis pri mi. Li estis ja influema homo kutimiĝinta regi laŭ kaprico vilaĝestrojn, personojn kaj eĉ ĝendarmojn. Tio, kion oni nomas en gazetoj "kaciko". Mi sendis al li peton je cent duroj kaj, anstataŭ obei min, li skribis al Sevilja provincestro, kaŭzis skandalon en Madrido kaj persekutigis min pli multe, ol iam ajn antaŭe. Li estis kulpa pri pafado okazinta inter mi kaj la ĝendarmoj, el kiu mi rezultis krurvundita, kaj ankoraŭ ne kontenta li petis, ke oni arestu mian edzinon, kvazaŭ ŝi, malfeliĉulino, scius, kie oni povus kapti min. Tiu perfidulo ne kuraĝis eliri eksteren el sia vilaĝo pro timo al Plumeto. Sed subite mi malaperis, mi forvojaĝis; iu el la vojaĝoj, pri kiu mi jus parolis, kaj li konfidiĝis kaj iris en Seviljon por siaj negocoj kaj por inciti kontraŭ mi la aŭtoritatulojn. Ni atendis la omnibuson, revenontan el Seviljo, kaj la omnibuso alvenis. Mia kamarado, kiu estas ja lerta por haltigi iun ajn en vojo, ordonis la kondukiston halti. Mi enigis mian kapon kaj mian karabenon tra la veturila pordeto. Krioj de virinoj, ploroj de infanoj, homoj nenion dirantaj, sed aspektantaj vaksfiguroj. Kaj mi diris la vojaĝantojn. "Nenio al vi. Trankviliĝu, sinjorinoj: bonan sanon al vi, sinjoroj, kaj feliĉan vojaĝon al ĉiuj... Nu, tiu grasulo malsupreniru". Kaj mia homo, kiu fleksiĝis, kiel se li intencus sin kaŝi sub la virinajn jupojn, estis devigata malsupreniri blanke pala, kvazaŭ lia sango estus foririnta, ŝanceliĝmarŝante, kiel ebriulo. La omnibuso daŭrigis sian vojaĝon. "Aŭskultu: mi estas Plumeto kaj mi donacos al vi memorigilon". Kaj mi plenumis mian promeson. Sed mi ne mortigis lin tuj. Mi lin vundis ĉe korpolokon, kiun mi scias, por ke li vivu ankoraŭ dudek kvar horojn kaj, kiam la ĝendarmoj poste helpos lin, li povu diri, ke Plumeto lin mortigis. Tiel eraro estas neebla kaj neniu alia povos fanfaroni pri ĝi.

Doña Suno aŭskultis treege pala, kun premataj pro teruro lipoj, kaj sur ŝiaj okuloj aperis tiu stranga brilo akompananta ŝiajn misterajn pensojn.

Gallardo streĉis sian vizaĝon, ĝenate de tiu sovaĝa rakonto.

— Ĉiu devas scii sian metion, sinjoro Johano — diris Plumeto, kiel se li dive-

nis, kion pensis la toreadoro —. Ni ambaŭ vivadas per mortigado: vi mortigas taŭrojn kaj mi, personojn. Nur estas tiu diferenco: ke vi estas riĉa, famaplaŭdata kaj alloganta belajn virinojn, dum mi ofte malsategas kaj finiĝos, se mi iam malviglos, fariĝinte kribrilo, meze de la kamparo, por ke min manĝu korvoj. Sed pri scio je sia metio, vi ne superas min, sinjoro Johano! Vi scias, ĉe kiun lokon estas necese vundi taŭron, por ke ĝi tuj falu. Mi scias vundi homon tiamaniere, ke li mortu tuj, ke li ankoraŭ vivu iomete kaj ke li suferu kelkajn semajnojn memorante pri Plumeto, kiu volas ĉikani neniun, sed scias sin defendi kontraŭ tiuj ĉikanantaj lin.

Alifoje Doña Suno volis scii la nombron de liaj krimoj.

— Kaj pri mortigoj... Kiom da personoj vi senvivigis?

— Vi abomenos min, via markizina moŝto; sed tial ke vi obstinas!... Kredu, ke mi ne memoras pri ĉiuj, kvankam mi volas rememori. Eble ilia nombro estas inter tridek kaj tridek kvin: Mi ne scias certe. Ĉe tiu tiel mizera vivado, kiu kapablas kalkuli?... Sed mi estas malfeliĉulo, markizina moŝto: ja kompatindulo. Kiuj igis min malbona, estas kulpaj. Mortigi estas kiel ĉerizoj. Oni tiras unu kaj la aliaj sekvas dekduope. Estas necese mortigi por daŭrigi nian vivadon kaj, se oni kompatas, oni estas formanĝata.

Longa silento sekvis. La sinjorino rigardadis la mallongajn kaj dikajn manojn de la bandito kun iliaj difektitaj ungoj. Sed Plumeto ne atentis pri ŝia markizina moŝto. Nur li pensis pri la spadulo, deziregante montri al li sian dankemon, ĉar li akceptis lin ĉe sian manĝotablon, kaj malaperigi tiun malbonan impreson, kiun ŝajne kaŭzis al li liaj vortoj.

— Mi vin respektas, sinjoro Johano—li daŭrigis—. De kiam mi unuafoje vidis al vi ludbatali, mi pensis: "Jen estas kuraĝa viro". Vi havas multe da partianoj, kiuj amas vin; sed tiel multe, kiel mi!... Por vidi vin mi multajn fojojn min maskis kaj iris en urbojn, riskante esti kaptata. Ĉu tio ne estas emo?...

Gallardo ridetis jesante per kapo, ĉar tio plaĉis lian artistan fierecon.

— Plie — daŭrigis la rabisto — neniu prave diros, ke mi iam venis en *Rinconada'n* por peti ion, nek eĉ panpecon. Multfoje mi estis malsata aŭ bezonis kvin durojn, irante proksime al tie ĉi, kaj neniam ĝis nun mi intencis pasi trans la ferfadenan barilon. Sinjoro Johano estas respekteginda por mi — mi ĉiam pensis: "Li gajnas sian monon same, kiel mi, riskante sian vivon. Decas esti bona kamarado..." Ĉar vi ne neos, sinjoro Johano, ke, kvankam vi estas riĉa famulo kaj mi malfeliĉulo el plej malbonaj, ambaŭ estas egalaj, ambaŭ vivadas per ludado kun la morto. Nun ni estas ĉi tie trankvile manĝante, sed iun tagon, se Dio enuos je ni kaj nin li ne plu helpos, oni kunprenos min apud vojo, kvazaŭ rabian, dispecigitan hundon kaj vin malgraŭ via tuta mono oni transportos el taŭra cirko kun viaj piedoj antaŭen, kiel mortintojn, kaj, kvankam dum kvar semajnoj la gazetoj parolos pri via malfeliĉaĵo, vi, kiu ne estos jam en ĉi tiu mondo, neniel ŝatos tion.

— Jen vero... jen vero — diris Gallardo, subite paliĝinte pro tiuj ĉi vortoj de la bandito.

Lia mieno montris la superstiĉan timon, kiu atakis lin, kiam la danĝeraj momentoj proksimiĝis. Lia sorto ŝajnis al li egala al tiu de la bandito, kiu nepre iun tagon aŭ alian mortfalos pro sia neegala batalado.

— Nu, ĉu vi kredas, ke mi pensas pri morto?—daŭrigis Plumeto—. Mi pentas pri nenio kaj iras mian vojon. Mi ankaŭ havas ĝojojn kaj foje eĉ fieras same, kiel vi, kiam vi legas en la gazetoj, ke vi ludis bonege taŭron kaj oni premiis vin per ĝia orelo. Konsciu, ke la tuta Hispanlando parolas pri Plumeto, ke la gazetaro rakontas plej grandajn mensogojn pri mi, ke eĉ laŭ tio, kion oni diras, oni verkos teatraĵojn temante miajn farojn kaj, ke en Madrido, en tiu palaco, kie la deputitoj kuniĝas por oratori, oni parolas pri mi preskaŭ ĉiujn semajnojn. Krome, tiu fiereco, ĉar mi sola militas kontraŭ tuta armeo kaj kapturnas milojn da personoj, kiuj gajnas monon de la ŝtato kaj portas spadon... Antaŭ nelonge, iun dimanĉon, mi iris tagmeze en vilaĝon kaj haltigis mian ĉevalon en la placo, apud blinduloj, kiuj kantis kaj ludis gitarojn. La popolamaso rigardis mirigite grandan bildon, kiun montris la kantistoj kaj kiu prezentis bonfiguran, bele vestitan viron kun larĝranda ĉapelo kaj vangaj hararoj, rajdantan sur bonega ĉevalo, kun "trabuko" sur la sela antaŭaĵo kaj bela, diketa virino post si. Mi dum kelke da tempo ne sciiĝis, pri tio ke tiu belfortulo estas la bildo de Plumeto... Tio ja plaĉas. Mi iras malpura, ĉifonvestite kaj ofte malsatas, sed almenaŭ la homamaso imagas min tute alia. Mi aĉetis al ili paperon kun la kantato, el kiuj ili vendis kaj ĉi tie mi ĝin portas. La tutan vivadon de Plumeto kun multe da mensogoj, sed versigitan. Bela afero. Kiam mi ripozas en la kamparo, mi legas ĝin por ĝin lerni parkere. Certe tion ĉi verkis klera sinjoro.

Timinda Plumeto montris infanan fierecon, parolante pri siaj gloroj. Forpelis nun li tiun silentan modestecon, per kiu venis en la bienon, tiun deziron, pri tio ke oni forgesu lian propran personon, por nur konsideri lin malfeliĉa iranto puŝita de malsato. Li ardiĝis pensante, ke lia nomo estas famkonata kaj liaj faroj tuj atingis la honoron esti publikigataj.

— Kiu konus min— li daŭrigis — se mi ne estus foririnta el mia vilaĝo?... Mi multe pensis pri tio ĉi. Por la malriĉuloj nur estas la rimedo malĝoji laborante por aliaj aŭ iri la nuran vojon liverantan monon kaj nomon: mortigi. Mi ne taŭgas por mortigi taŭrojn. Mia vilaĝo estas montara kaj tie ne estas bravbestoj. Plie, mi estas peza kaj nelerta... Tial mi mortigas personojn. Tio estas plej bona afero, kiun povas fari malriĉulo, por ke oni respektu lin kaj por prosperi.

Naciao, kiu ĝis tiam aŭskultis tre atente la banditon, konsideris necese paroli

— Kion la malriĉulo bezonas, tio estas kleriĝi: scii legi kaj skribi.

Kaŭzis ĉi tiuj vortoj de Naciao ridojn de ĉiuj konantaj lian manion.

— Vi jam elmontris vian temon, kamarado — diris Kuirajo —. Lasu al Plumeto paroli, ĉar, kion li diras, tio estas ja prava.

La rabisto akceptis malŝate tiun interrompon de la pikiletisto, kiun li malalte taksis pro lia singardemo en la areno.

— Mi scias legi kaj skribi. Por kio ĝi tamen utilas al mi? Kiam mi loĝis en mia vilaĝo, tio taŭgis, por ke oni malamike atentis pri mi kaj por ke mia sorto ŝajnis al mi pli kruela... Kion bezonas la malriĉulo, tio estas justeco: ke oni donu al li tion, kio estas lia, kaj, se oni ne donas, ke li prenu ĝin. Estas necese iĝi lupo kaj timigi. La aliaj lupoj respektas nin kaj la kaptaĵoj eĉ lasas danke, ke ni manĝu ilin. Se oni vidas nin malkuraĝaj kaj malfortaj, tiam eĉ la ŝafinoj ofendos nin.

Kuirajo, kiu jam estis ebria, konsentis entuziasme pri ĉio, kion diris Plumeto. Li ne bone komprenis liajn vortojn, sed tra sia malklare nebula ebrieco li kredis vidi lumon de supera saĝeco.

— Jen estas la vero, kamarado. Bastonbato al ĉiuj. Daŭrigu, ĉar vi estas ja trafa.

—Mi lernis, kiel estas la homaro—daŭrigis la rabisto—. La mondo estas dividita laŭ du gentoj: lantonditoj kaj lantondistoj. Mi ne volas, ke oni lantondu min; mi naskiĝis por lantondi, ĉar estas ja viro kaj timas neniun. Al vi, sinjoro Johano, okazis same. Vi lasis la malsuperan vojon per via kuraĝego; sed via vojo estas pli glata, ol tiu mia.

Li restis dum kelkaj sekundoj rigardante la spadulon kaj poste daŭrigis konvinke.

— Mi opinias, sinjoro Johano, ke ni naskiĝis iom malfrue. Kiom da kuraĝaĵoj antikve estus farintaj ni, kiuj estas bravaj kaj dignaj viroj! Nek vi mortigus taŭrojn nek mi estus persekutata tra la kamparo, kiel malbona besto. Ni estus duonreĝoj, guberniestroj aŭ altrangaj postenuloj trans la maro. Ĉu vi ne aŭdis paroli pri Pizarro, sinjoro Johano?

Sinjoro Johano faris nedifineblan signon, ĉar li ne volis konfesi sian nescion pri tiu mistera nomo, kiun li tiam aŭdis unuafoje.

— Via markizina moŝto ja scias, kiu li estis pli bone, ol mi, kaj pardonu min, se mi ion diros erare. Mi sciiĝis pri tiu rakonto, kiam mi estis sakristiisto kaj ekzercis min legi per malnovaj historioj gardataj de la pastro... Pizarro estis malriĉulo, kiel ni; li ŝipveturis trans la maron kaj kun dekdu aŭ dektri viroj tiel mizeraj, kiel li, iris en pli riĉan landon, ol Paradizo mem... en regnon, kie estas Potosio: imagu. Ili multfoje batalis kontraŭ la gentoj el Ameriko portantaj plumojn kaj sagojn kaj fine ili venkis ĉiujn, forprenis la trezorojn de la tieaj reĝoj kaj tiu malplej riĉiĝinta el ili plenigis per oraj moneroj sian domon ĝis la tegmento, atingante samtempe postenon, ĉu de markizo, ĉu de generalo aŭ altranga juĝisto. Kaj same, kiel ĉi tiuj, estis multaj aliaj. Imagu, sinjoro Johano, se ni estus

vivantaj tiam... Kiel facile vi kaj mi kun kelkaj el ĉi tiuj ĉeestantaj bravuloj estus farintaj tiom multe da mirindaĵoj aŭ eĉ pli, ol tiu Pizarro...

Kaj la bienaj homoj ĉiam silentaj, sed emocie brilokulaj pro tiu rava historio konsentis per siaj kapoj pri tiuj ideoj de la bandito.

— Mi ripetas, ke ni naskiĝis malfrue, sinjoro Johano. La fruktodona vojo malfermiĝis por la malriĉuloj. Ni, hispanoj, ne scias nun, kion fari. Restas jam neniu lando, kien iri. Tion, kio estis en la mondo konkerinda, al si proprigis la angloj kaj aliaj fremduloj. La pordo estas fermita kaj la kuraĝaj homoj estas devigataj putri en ĉi tiu korto kaj aŭdi mallaŭdojn, ĉar ni ne rezignacias pri nia sorto. Mi, kiu eble estus atinginta reĝan postenon en Ameriko aŭ ie ajn alie, estas konsiderata nuntempe, kiel rabisto. Vi, bravulo, mortigas bestojn kaj estas aplaŭdata, sed mi scias, ke multaj sinjoroj rigardas toreadoran metion, kiel nedigna.

Doña Suno partoprenis por konsili la banditon. Kial li ne sin dungas, kiel soldato? Li povus iri en malproksimajn landojn, kie estus milito kaj noble utiligi siajn kapablojn.

— Jes mi taŭgas por tio, markizina moŝto. Mi pri tio multfoje pensis. Kiam mi dormas en bieno aŭ min kaŝas en mia hejmo dum kelkaj tagoj, mia korpo dankas ĉe la unuaj enlitiĝoj kaj varmaj manĝoj sur tablo, kiel ĉi tiu, sed poste mi enuas kaj ŝajnas, ke la montaro altiras min malgraŭ siaj mizeroj kaj ke mi bezonas dormi en libera aero, metinte mian kapon sur ŝtonon... Jes; mi taŭgas por esti soldato; mi estus bona soldato. Sed kien iri?... Finiĝis jam la veraj militoj, kie ĉiu viro kun kelkaj kamaradoj faris, kion li konsideris plej bona. Nuntempe nur estas aroj da homoj, ĉiuj same vestitaj kaj markitaj, kiuj vivas kaj mortas, kvazaŭ marionetoj. Tie okazas same, kiel en la mondo: lantonditoj kaj lantondistoj. Iu faras mirindaĵon, kaj ĝin proprigas la kolonelo; iu batalas, kiel leono, kaj estas premiata la generalo... Ne: ankaŭ mi naskiĝis malfrue por esti soldato.

Kaj Plumeto rigardis malsupren, restante dum iom da tempo absorbate de la malĝojiga penso pri sia malfeliĉo kaj konsiderante sin netaŭga por la nuntempo. Subite li prenis sian karabenon kaj intencis stariĝi.

— Mi foriras... Tre danka, sinjoro Johano, pro viaj ĝentilaĵoj. Fartu bone, markizina moŝto.

— Sed, kien vi iras? — diris Kuiraĵo lin tirante —. Sidiĝu, malspritulo. Nenie vi estos pli bone, ol ĉi tie.

La pikrajdisto deziris, ke la bandito restu plu kun ili, ĉar lin plaĉis paroli kun li, kiel kun ĉiama amiko, kaj poste povi rakonti en la urbo tiun interesplenan babilon.

— Mi jam estas ĉi tie de antaŭ tri horoj kaj mi devas foriri. Neniam mi restas dum tiom da tempo en loko nekaŝita kaj sur ebenaĵo, kiel *Rinconada*. Eble en tiu momento oni sciigis, ke mi estas ĉi tie.

— Ĉu vi timas la ĝendarmojn? — demandis Kuirаĵo —. Ili ne venos kaj, se venos, mi batalos apud vi.

Plumeto faris malŝatan geston. La ĝendarmoj! Ili estas ja homoj, kiel la ceteraj: kelkaj, bravaj; sed preskaŭ ĉiuj, kelkfilaj patroj tute ne dezirantaj vidi lin aŭ alvenantaj malfrue, kiam ili scias, ke li estas ie. Nur ili iras kontraŭ lin, kiam okazas neatendita renkonto kaj ili ne povas agi alie.

— La pasintan monaton mi estis en bieno nomata "Kvin-kamentuboj", tagmanĝante, kiel nun ĉi tie, kvankam ne tiel agrable akompanate, kiam jen mi vidis veni ses piedirantajn ĝendarmojn. Mi estis certa, pri tio ke ili ne sciis, ke mi estis tie, kaj ili venis nur por sensoifigi sin. Ja malbona okazo; sed nek ili nek mi povis forgliti antaŭ la bienanoj. Tion poste oni rakontus kaj la kritikemuloj malrespektus kaj dirus, ke ĉiuj estas malkuraĝuloj. La bienestro fermis la pordon kaj la ĝendarmoj komencis ĝin bati per siaj karabenoj, por ke oni malfermu ĝin. Mi ordonis lin, ke li kaj bienano sin metu post ĉiun el ambaŭ pordfolioj. "Kiam mi diros "nun", vi subite tute malfermu". Mi supreniĝis sur mian ĉevalon kaj prenis per mano revolveron. "Nun!". Oni malfermis la pordon kaj mi eliris eksteren, kvazaŭ fulmo. Vi ne scias, kiom multe kuregas mia brava ĉevalo. Ili sendis al mi sufiĉe da kugloj, sed neefike. Mi ankaŭ pafis ilin ĉe la elirmomento kaj laŭ tio, kion oni diris, mi trafis du ĝendarmojn... Mallongigante: mi forflugis, kuŝante sur la ĉevalkolo por esti pli malfacile vundebla kaj la ĝendarmoj sin venĝos poste, batante la bienanojn. Tial estas plej konvene diri nenion pri miaj vizitoj, sinjoro Johano. Poste venas ili kaj vin kapturnos per demandoj kaj deklaroj, kiel se per tio ili estus kaptontaj min.

La bienanoj de *Rinconada* mute jesis. Ili tion jam scias. Estas necese silenti pri tiu vizito, por eviti al si ĝenojn, kiel oni faras en ĉiuj bienoj kaj paŝtistaj kabanoj. Ĉi tiu ĝenerala silento estis plej potenca helpanto de la bandito. Krom tio ĉi ĉiuj kampuloj admiris Plumeton. Per kruda entuziasmo ili konsideris lin venĝanta heroo. Nenion malbonan ili timis de li. Liaj minacoj nur rilatis la riĉulojn.

— Mi ne timas la ĝendarmojn — daŭrigis la rabisto —. Kiujn mi timas, tiuj estas la malriĉuloj. Ĉiuj estas bonuloj, sed kiel malnobla estas mizero! Mi scias, ke ne mortigos min la policaj soldatoj: iliaj kugloj ne taŭgas por mi. Se iu mortigos min, tiu estos ja malriĉulo. Oni lasas sen timo, ke ili proksimiĝu, ĉar ili estas niaj fratoj, kaj tiam ili profitas tiun nesingardon. Mi havas malamikojn: homoj ĵurintaj mortigi min. Kelkfoje ili estas malnobluloj, kiuj min perfidas esperante monpremion, aŭ nedankemuloj, al kiuj mi ordonas fari aferon, kaj ili ne faras ĝin, kaj, por ke ĉiuj respektu nin, estas necese agi energie. Se oni pikas ilin forte, kontraŭ nia familio ili intencas sin venĝi. Se oni estas bona kaj kontentiĝas malsuprenigante ilian kalsonon por karesi ilin per manpreno je urtikoj kaj kardoj, ili memoras ĉi tiun ŝercon dum sia tuta vivado. La malriĉuloj, niaj fratoj, estas tiuj, kiujn mi ja timas.

Silentis momente Plumeto kaj, rigardante la spadulon, aldonis:

— Plie estas la rabemuloj, la disĉiploj, la junuloj konkurantaj kontraŭ nin. Sinjoro Johano, diru vere: Kiuj pli multe priokupas vin? Ĉu la taŭroj aŭ tiuj taŭridistoj, kiuj aperas puŝate de malsato kaj volas superi la majstrojn?... Same okazas al mi. Prave mi asertas, ke ni estas egalaj! En ĉiu vilaĝo ekzistas bravulo, kiu revas esti mia heredonto kaj esperas iam trovi min dormanta sub arba ombro kaj krevigi mian kapon, min pafante de apud ĝi. Kia famo atingus, kiu mortigus Plumeton!

Poste li iris en stalon, sekvate de Kuiraĵo, kaj post kvarono da horo li irigis en la bienan korton sian vigle fortan ĉevalon, kunulo de aventuroj. La ostoriĉa besto ŝajnis pli granda kaj grasa post tiuj nemultaj horoj kun abunda manĝo en la stalo de *Rinconada*.

Plumeto karesis ĝiajn flankojn kaj aranĝis sian lankovrilon sur la sela antaŭaĵo. Ja la besto pravas esti kontenta. Malofte ĝi estos tiel regalata, kiel en la bieno de sinjoro Johano Gallardo. Nun ĝi senlace iru, ĉar la vojo estos longa.

— Kien vi iros, kamarado? — diris Kuiraĵo.

— Tion demandi ne decas... Tra la mondo! Eĉ mi mem ne scias kien... Preta por ĉiuj okazaĵoj.

Kaj, metinte piedpinton en iun el la rustiĝintaj, kotmalpuraj piedingoj, li supreniĝis kaj restis rekte sidante sur la selo.

Gallardo malproksimiĝis de Doña Suno, kiu rigardis tiujn iradpretiĝojn de la bandito per nedifineblaj okuloj, premante pro emocio sian palan buŝon.

La toreadoro serĉis en la internan, jakan poŝon kaj antaŭeniris al la rajdisto, prezentante kaŝe, falditajn paperojn en sia mano.

— Kio estas tio? — diris la rabisto —. Ĉu mono?... Dankon, sinjoro Johano. Al vi certe oni diris, ke estas necese doni al mi ion, kiam mi foriras el bieno: sed tio rilatas la aliajn, la riĉulojn, kiuj gajnas monon senpene. Vi gajnas ĝin, riskante vian vivon. Gardu ĝin, sinjoro Johano.

Sinjoro Johano gardis siajn bankbiletojn iom malkontenta pro tiu rifuzo de la bandito, kiu obstinis konsideri lin sia kamarado.

— Jam vi honore promesos al mi taŭron, se iam ni vidos nin reciproke en cirko — aldonis Plumeto —. Tio valoras por mi pli multe, ol la tuta oro el la mondo.

Antaŭeniris Doña Suno, ĝis tio ke ŝi sin metis apud kruron de la rajdisto kaj, demetinte aŭtunan rozon, kiun ŝi portis sur sia brusto, mute prezentis ĝin al li, lin rigardante per siaj oraj kaj verdaj okuloj.

— Ĉu ĝi estas por mi? — demandis la rabisto per surpriza kaj mira tono —. Ĉu por mi, markizina moŝto?

Vidinte la jesan geston de la sinjorino, li prenis mallerte kaj embarasate la

floron, ne sciante, kien ĝin meti, ĝis kiam fine li enigis ĝin tra butontruo de la bluzo inter ambaŭ ekstremoj de la ruĝa tuko, kiun li portis sur sia kolo.

— Tio ĉi ja estas bela — li ekdiris, plilarĝigante sian rondan vizaĝon —. En mia tuta vivado okazis al mi nenio simila.

La maldelikata rajdisto ŝajnis kortuŝita kaj embarasata samtempe pro la virina deveno de tiu donaco. Rozojn al li!

Li tiris la kondukilojn de sia ĉevalo.

— Fartu bone ĉiuj, gesinjoroj. Ĝis la revido... Fartu bone, kamarado. Eble foje mi ĵetos al vi cigaron, kiam vi lerte spadpikos taŭron.

Li adiaŭis per manbato la pikrajdiston kaj ĉi tiu respondis per surfemura pugnobato tremiganta la fortikan muskolaron de la bandito. Kiel simpatia Plumeto! Kuiraĵo pro sia amema ebrieco volis iri al la kamparo kun li.

— Adiaŭ! Adiaŭ!

Kaj, spronante sian ĉevalon, eliris la bandito per rapida troto for el la bieno.

Gallardo montriĝis kontenta, ĉar la bandito malproksimiĝis. Poste li rigardis Doñan Sunon, kiu restis nemove, sekvante per siaj okuloj la rajdanton des pli malgrandiĝintan, ju pli la distanco kreskis.

— Kia virino! — grumblis la spadulo senespere —. Kiel freneza sinjorino!...

Feliĉe Plumeto estis malbela kaj sin vestis per malpuraj ĉifonoj, kiel vagulo. Se ne, ŝi certe estus foririnta kun li.

VI

— Ŝajnas neeble, Sebastiano, ke homo, kiel vi, havanta edzinon kaj filojn konsentis pri tiaj fiamaj maklerajoj... Mi, kiu kredis vin alia kaj konfidis al vi, kiam vi vojaĝis kun Joĉjo! Mi, kiu restis trankvila, ĉar li iris kun persono de energia karaktero!... Ĉu jam forflugis ĉiuj viaj idealoj kaj konvinkoj? Ĉu tion ordonas la judoj kuniĝantaj en la hejmon de instruisto Don Joseĉjo?...

Naciao, timigate de la indigno de la patrino de Gallardo kaj kortuŝate de la silenta plorado de Karmeno, kiu kaŝis sian vizaĝon per naztuko, sin defendis mallerte. Sed, kiam li aŭdis la lastajn vortojn, li rektiĝis per pastra afekto.

— Sinjorino Angustio, ne tuŝu miajn idealojn kaj lasu pace, se vi volas, Don Joseĉjon neniel rilatantan tion ĉi. Mi iris en *Rinconada'n,* ĉar tion ordonis al mi mia majstro. Ĉu vi scias, kio estas toreadora bando? Nu, same kiel armeo: disciplino kaj servutismo. La matadoro ordonas kaj estas necese obei. Ludbatalado venas el inkvizicia epoko kaj estas plej reakcia metio.

— Arlekeno! — kriis sinjorino Angustio —. Vi hipokritas per viaj fabeloj pri Inkvizicio kaj reakcioj! Ĉiuj vi kune elmortigos ĉi tiun kompatindulinon, kiu dum la tuta tago ploras, kiel Afliktita Madono. Vi volas kaŝi tiun malbonan konduton de mia filo, ĉar li liveras al vi manĝrimedojn.

— Vi pravas, sinjorino Angustio; Joĉjo ebligas al mi manĝadi; tiel estas. Kaj, ĉar li ebligas al mi manĝadi, mi devas obei lin... Nu, sinjorino: vin metu en mian situacion. La matadoro diras al mi, ke mi akompanu lin en *Rinconada'n*... Bone! Post unu horo mi troviĝas en aŭtomobilo kun tre bela sinjorino... Kion fari? La majstro komandas. Plie, mi ne iris sola. Ankaŭ iris Kuiraĵo, kiu estas nejuna kaj respektinda persono, kvankam sufiĉe bruta. Neniam li ridas.

La toreadora patrino indignis pro tiu rezono.

— Kuiraĵo! Malbonulo, kiun Joĉjo devus maldungi el sia bando, se estus deca. Ne parolu min pri tiu ebriulo, kiu batas sian edzinon kaj lasas, ke liaj gefiloj malsatas.

— Bone, ni ne parolu pri li... Mi diras, ke vidis tiun altrangulinon kaj, kion fari? Ŝi ne estas fivirino: ŝi estas markiza nevino, partianino de la majstro, kaj la toreadoroj, vi ja scias, bezonas amike rilati kun potenculoj. Estas necese gajni vivrimedojn el la publiko. Ĉu tio ĉi estas malbona?... Poste en la bieno okazis nenio! Mi ĵuras tion al vi per miaj familianoj; nenio! Mi tute ne taŭgas por subporti tiajn rolojn, kvankam la matadoro tion ordonus! Mi estas deculo, sinjorino Angustio, kaj vi malbone agis, kiam vi ĵus nomis min per tiu finomo... Kiam iu estas komitatano kaj oni konsultas lin ĉe balottagoj kaj urbokonsilantoj kaj deputitoj premis ĉi tiun jenan manon. Ĉu estas eble ludi iajn rolojn?... Mi ripetas, ke okazis nenio. Ili parolis sin reciproke je "vi" same, kiel vi kaj mi; ĉiu el ili dormis en sia ĉambro; estis nek eĉ unu amrigardo, nek eĉ unu nebona vorto. Ĉiumomente dececo. Kaj, se vi volus, ke Kuiraĵo venu al vi, li dirus...

Sed Karmeno interrompis lin per plenda voĉo tranĉata de sopiroj.

— En mia hejmo! — ŝi ĝemis kun mira mieno —. En la bieno!... Kaj ŝi dormis sur mia lito!... Mi sciis ĉion kaj tamen mi silentadis! silentadis!... Sed ĉi tion! Jesuo! Ĉi tion, en tuta Seviljo estas neniu, kiu kuraĝus fari.

Naciao afable konsolis ŝin. Trankviliĝu, sinjorino Karmeno. Tio ne gravis! Vizito en la bienon de entuziasma partianino deziranta vidi de proksime, kiel li vivadas kampare. Ĉi tiuj duonfremdaj sinjorinoj ĉiam estas kapricemaj kaj strangaj. Kion vi dirus, se estus vidinta la francinojn, kiam la toreadora bando vojaĝas por ludbatali en *Nimes* kaj *Arlés*!...

— En tute, nenio. Ĉio... bagateloj. Nu, mi ĝojus koni la senhontulon, kiu diris tion. Se mi estus Joĉjo kaj tiu mensogulo, bienano, mi forpelus lin kaj, se li estus eksterulo, mi irus ĉe la juĝiston, por ke li arestu lin en malliberejon pro kalumniinto kaj malnoblulo.

Karmeno ne ĉesis plori, ne aŭskultante la indignajn esprimojn de la pikiletisto,

dum sinjorino Angustio, sidante sur apogseĝo, el kiu elbordiĝis ŝia dika korpo, streĉis la brovojn kaj premis sian vilan kaj sulkoplenan buŝon.

— Silentu, Sebastiano, kaj ne mensogu — diris la maljunulino —. Mi scias ĉion. Maldeca diboĉo estis tia vojaĝo en la bienon; cigana festo. Oni diras, ke eĉ vizitis vin Plumeto, la rabisto.

Aŭdante tion, Naciao eksaltis pro surprizo kaj maltrankvilo. Ŝajnis al li, kvazaŭ enirus en la korton, paŝante sur la marmora planko, malbonaspekta kaj sebĉapela rajdanto, kiu terensaltas kaj direktas al li sian karabenon pro perfidulo kaj timemulo. Poste ŝajnis al li vidi multe da nigrelakitaj ĉapeloj, lipharaj kaj demandemaj buŝoj kaj skribantaj manoj kaj fine, la tutan toreadoran bandon vestitan per lumvestoj, kubutligita kaj iranta al malliberejo. Pri tio de Plumeto ja estis necese nei energie.

— Malvero! Ĉio malvero! Kion vi diris pri Plumeto? Tie nur estis dececo. Nu, estus ja troe, ke, parolante pri civitano, kiel mi, kiu liveras pli multe, ol cent balotajn voĉdonojn al sia partio, oni dirus, ke li estas amiko de Plumeto!

Sinjorino Angustio, venkite de la protestoj de Naciao kaj ne tre certa pri tiu lasta afero, fine ne kredis ĝin. Bone, nenio pri Plumeto. Sed tio alia! Iri en la bienon kun tiu fivirino! Kaj per obstino de patrino kulpiganta pri la malbona konduto de sia filo liajn akompanantojn, ŝi daŭrigis insulti Naciaon.

— Jam mi sciigos al via edzino, kia vi estas. Ŝi, malfeliĉulino, penegadas en via butiko de la sunleviĝo ĝis la nokto, dum vi diboĉas, kvazaŭ fijunulo! Vi devus honti... je via aĝo! havante tiom multe da filoj!

La pikiletisto fine foriris, forkurante de sinjorino Angustio, kiu pro indigno sin montris tiel insultema, kiel en tiu epoko, kiam ŝi estis dungita en la tabaklaborejo. Li decidis ne plu iri en la majstran hejmon.

Kelkajn fojojn Naciao renkontis Gallard'on en strato; ĉi tiu ŝajnis malbonhumora, sed, kiam vidis sian pikiletiston, li montriĝis ridetanta kaj kuraĝema, kiel se ne efikus lin la hejma malpaco.

— Tie estas malplaĉo Joĉjo. Mi ne reiros en vian hejmon, kvankam oni volus treni min tien. Via patrino insultas min, kvazaŭ mi estus cigano el *Triana*. Via edzino ploradas kaj rigardas min, kiel se mi estus kulpa pri ĉio. Nu, alifoje bonvolu ne pensi pri mi, kiam vi deziros iri kun virinoj. Serĉu alian akompananton.

Gallardo ridetis kontente. Okazos nenio: Tio baldaŭ pasos. Pli gravajn fulmotondrarojn li rezistis.

— Plej konvene estas, ke vi venu en mian hejmon. Tie kun multe da vizitantoj neniu kuraĝos riproĉi.

— Ĉu mi? — ekkriis Naciao —. Prefere mi igus min pastro.

Post ĉi tiuj vortoj la spadulo konsideris neutile insisti. Li dum granda parto de la tago estis eksterhejme, for de tiu malamika silento de la virinoj, multfoje

interrompata per larmado, kaj, kiam li revenis, estis eskortate de la kontraktfaristo kaj aliaj amikoj.

La ledaĵisto ankaŭ estis grava helpanto por Gallardo. Unuafoje ĉi tiu konsideris sian bofraton simpatia homo, tre saĝa kaj inda je pli bona sorto. Estis li, kiu dum la matadoraj forestoj okupiĝis pacigi la virinojn, inkluzive tiun sian, igante ilin kvazaŭ lacigitaj furioj.

— Nu — li diris —; kio estas ĉio? Negrava infanaĵo. Ĉiu estas, kiu estas, kaj Joĉjo estas famulo bezonanta rilati kun potenculoj. Ke tiu sinjorino iris en la bienon! Kio nebona?... Estas necese regali la utilajn geamikojn; tiel oni povas poste peti favorojn kaj per ili helpi la familion. Okazis nenio nedeca: ĉio kalumnioj. Tie estis Naciao, kiu estas energia homo... Mi multe konas lin.

Kaj li unuafoje en sia vivado laŭdis la pikiletiston. Ĉar la bofrato ĉiumomente estis hejme, lia helpo tre multe valoris por Gallardo. Li sola sufiĉis por kvietigi la virinojn, konfuzante ilin per sia senĉesa babilado. La toreadoro malavare montris sian dankon al li. Lia bofrato lasis la ledaĵistan butikon, ĉar la negocoj ne estis gajnodonaj, kaj atendis, ke la spadulo liveros al li oficon. Dume la matadoro pagis ĉiujn necesojn de lia familio kaj fine petegis al li kaj al sia fratino, ke ili bonvolu loĝi en lia hejmo. Tiel kompatinda Karmeno malpli multe enuos. Ŝi ne estos tiel sola.

Iun tagon Naciao ricevis avizon de la matadora edzino, por ke li iru al ŝi. La edzino mem de la pikiletisto komunikis al li tiun peton.

— Mi vidis ŝin ĉi tiun matenon. Ŝi venis el Sankta Ĝilo. La okuloj de la malfeliĉulino ŝajnas, kiel se ili ploris ĉiumomente. Iru al ŝi... Ve la beluloj! Kia suferigado!

Karmeno akceptis Naciaon en la spadula skriboĉambro. Tie ili estos solaj sen timo, pri tio ke sinjorino Angustio eniru ĝeni lin per siaj troaj indignoj aŭ la bofratoj, kiuj enloĝiĝis tien kun ĉiuj siaj gefiloj. Gallardo estis en la klubo de strato Serpentoj. Li forkuris ĉiam el sia hejmo kaj multajn tagojn, por eviti renkonti sian edzinon, manĝis kun amikoj en kampa manĝejo *Eritaña*.

Naciao sidiĝis sur kanapo kaj restis tie kun mallevita kapo kaj ĉapelo inter manoj, ne dezirante rigardi la edzinon de sia majstro. Kiel ŝia fartaspekto difektiĝis! Ŝiaj okuloj ruĝiĝis kaj estis ĉirkaŭataj de profundaj, malhelaj sulkoj. Ŝiaj brunaj vangoj kaj nazrando estis brile rozkoloraj pro ofta frotado per naztuko.

— Sebastiano, diru al mi la tutan veron. Vi estas bona, vi estas plej intima amiko de Johano. Tio de panjo la alian tagon estis iu el ŝiaj karakterajoj. Vi jam scias, kiom ŝi estas bona. Subitaĵo kaj poste nenio. Ne konsideru vin ofendita.

La pikiletisto jesis per kapmovoj, atendante la demandon. Kion deziras scii sinjorino Karmeno?

— Ke vi diru al mi tion, kio okazis en *Rinconada;* kion vi vidis kaj kion vi suspektas.

Ha bona Naciao! Per kia nobla gesto li levis sian kapon kontenta povi bonfari, konsolante tiun malfeliĉulinon!... Vidi? Li ja vidis nenion malbonan.

— Mi tion ĵuras per mia patro, mi tion ĵuras... per miaj idealoj.

Kaj li apogis sen timo sian ĵuron sur tiun sanktegan ateston, ĉar li vidis nenion kaj tial li pensis laŭ sia logiko, kiun li fiere taksis vigla kaj saĝa, ke nenio malbona okazis.

— Mi opinias, ke ili nur estas amikoj... Nu, mi ne scias ĉu antaŭe estis alie. Oni diras... oni babilas... sed oni elpensas ankaŭ tiom multe da mensogoj! Vi ne priokupiĝu, sinjorino Karmeno. Gajeco kaj vivo, jen estas la vero!

Ŝi reinsistis. Sed, kio okazis en la bieno?... La bieno estas ŝia hejmo kaj pro tio ŝi indignas, ĉar tiel kuniĝis malfideleco kaj io, kio al ŝi ŝajnis rekta ofendo kaj insulto al ŝia propra persono.

— Ĉu vi konsideras min malsaĝa, Sebastiano? Mi vidas ĉion. De kiam li komencis atenti pri tiu sinjorino... aŭ, kio ŝi estas, mi konis, kion Johano pensis. Tiun tagon, kiam li honore promesis al ŝi taŭron kaj li venis hejmen kun tiu ringo de briliantoj, mi divenis tiun rilaton ekzistantan inter ambaŭ, kaj ekdeziregis ĵeti la ringon planken kaj disrompi ĝin per piedo... Poste mi sciis ĉion; ĉion! Estas ĉiam personoj, kiujn plaĉas sciigi pri tiaj aferoj, ĉar tio ĉagrenas. Krome ili ne kaŝiĝis, iris ĉien kvazaŭ geedza paro, vidate de ĉiuj, rajdante same, kiel ciganoj, kiuj iras de foiro en foiron. Kiam ni loĝis en la bieno, ĝis mi venis sciigoj pri ĉio, kion faris Johano, kaj poste en *Sanlucar* ankaŭ.

Naciao konsideris necese interrompi ŝin, tial ke Karmeno, kortuŝite de tiaj memoroj, estis tuj ekploronta.

— Kaj ĉu vi kredas tiujn mensogojn, naivulino? Ĉu vi ne konscias, ke ili estas elpensaĵoj de tiuj, kiuj ne amas vin?... Nur enviaĵoj.

— Ne; mi konas Johanon. Ĉu vi kredas, ke ĉi tiu estas lia unua faritaĵo?... Li estas, kiel estas, kaj ne kapablas aliiĝi. Malbenita metio, kiu ŝajnas frenezigi la virojn! Post du jaroj de nia geedziĝo li jam amrilatis kun bela viandistino. Kiom multe mi suferis, kiam mi sciiĝis!... Sed nek eĉ unu vorton mi diris. Li ankoraŭ kredas, ke mi scias neniom. Poste kun kiom multe da ili li amrilatis! Kun dancistinoj sur kafejaj estradoj, kun fivirinoj el manĝotrinkejoj, eĉ kun publikaj malĉastulinoj... Mi ne scias, kiom da ili, dekduoj! kaj mi silentis, dezirante konservi la hejman pacon. Sed ĉi tiu nuna virino ne estas, kiel la ceteraj. Johano estas freneza pro ŝi; li malsaĝiĝis: mi scias, ke li multfoje agis maldigne, por ke ŝi malgraŭ sia altrango ne forpelu lin straten pro honto amrilati kun toreadoro... Nun ŝi estas foririnta. Ĉu vi tion ne scias? Ŝi foriris, ĉar enuis en Seviljo. Al mi oni raportas pri ĉio. Ŝi forvojaĝis kaj ne adiaŭis Johanon kaj, kiam li iris viziti ŝin la pasintan tagon, li trovis la pordon fermita. Kaj jen li estas malgaja, kvazaŭ malsana ĉevalo, kaj iras kun amikoj funebromiena, kaj trinkas por gajiĝi kaj, kiam li revenas hejmen, ŝajnas senespere ĉagrenita. Ne;

li ne forgesas tiun virinon. La sinjoro estis fiera, pro tio ke amis lin tia altrangulino, kaj lia fiereco nun doloras, ĉar ŝi forlasas lin. Ha, kiel mi abomenas lin! Jam li ne estas mia edzo: al mi ŝajnas alia. Apenaŭ ni interparolas, se ne estas por disputi. Same, kiel se ni ne konus nin unu la alian. Mi restas sola supre kaj li dormas malsupre en ĉambro apud la korto. Ni ne plu kuniĝos; mi tion ĵuras! Antaŭe mi ĉion pardonis al li: tio estis malbonaj profesimoroj: manio de toreadoroj sin taksantaj nepre virinallogaj viroj...; sed nun mi ne volas vidi lin: li naŭzegas min.

Ŝi parolis energie kaj brilis sur ŝiaj okuloj malama flamo.

— Ha tiu virino! Kiel ŝi ŝanĝis lin!... Li estas alia! Nur li volas iri kun riĉuloj kaj la kvartalanoj kaj ĉiuj malriĉuloj el Seviljo, kiuj estis liaj amikoj kaj helpis lin, kiam li komencis ludbatali, plendas pri li kaj eble iun tagon ili fajfegos lin en la cirko pro maldankemo. Ĉi tien eniras mono grandkvante kaj ne estas facile kalkuli ĝin. Nek eĉ li mem scias neniam, kiom multe li havas; sed mi ĉion observas. Li vetludas multe, por ke liaj novaj amikoj ŝatu lin; ankaŭ li multe perdas kaj la mono eniras tra pordo kaj foriras tra iu alia. Mi nenion diras al li. Ĉar ja li estas kiu ĝin gajnas. Sed li estis devigata pruntepeti al Don Josefo por bienaj elspezoj kaj li aĉetis ĉi tiun jaron olivarbarojn por kunigi ilin al la bieno per aliula mono. Preskaŭ ĉio, kion li gajnos en la venonta sezono estos por pagi ŝuldojn. Kaj, se li estus vundota, kiel li pagos? Kaj ankaŭ kiel, se li estus devigota ne plu ludbatali, kiel okazas al aliaj?... Eĉ min li volis ŝanĝi same, kiel li ŝanĝiĝis. Certe la sinjoro, kiam revenas hejmen post vizito al Doña Suno aŭ Doña Demono, trovas malelegantaj sian panjon kaj min vestitajn per ŝaloj kaj roboj, kiel ĉiuj enlandaninoj. Li estas, kiu trudis al mi tiujn ĉapojn senditajn el Madrido, per kiuj mi malgracias, mi tion konas, kaj ŝajnas simio el tiuj dancantaj laŭ gurda ritmo. Tiel bela aĵo, kiu estas mantilo!... Li ankaŭ estas, kiu aĉetis tiun inferan veturilon, la aŭtomobilon, en kiu mi ĉiam veturas time kaj kiu odoras infere. Se ni lasos lin, eĉ li metos ĉapelon kun kokvostoj al maljuna panjo. Li estas fanfaronulo nur pensanta pri tiu alia virino kaj deziranta, ke ni estu same, kiel ŝi, por ne honti je ni.

La pikiletisto ekprotestis. Tio ne, Johano estas bona kaj faris ĉion ĉi, ĉar li multe amas sian familion kaj deziras por ĝi luksaĵojn kaj oportunaĵojn.

— Joĉjo eble estas, kiel vi diras, sinjorino Karmeno, sed tamen, necese estas indulgi ion al li... Ja multaj virinoj mortas pro envio, kiam vidas vin! Kia fierindaĵo esti edzino de plej brava toreadoro kun abundega mono kaj hejma domo mirinde bela kaj povi absolute mastrumi ĉion; ĉar la majstro ja lasas al vi disponi pri ĉiuj aferoj.

La okuloj de Karmeno eklarmis kaj ŝi metis sur ilin sian naztukon por ilin viŝi.

— Plej volonte mi estus ŝuflikista edzino. Kiom multfoje mi pensis pri tio!

Se Johano estus irinta la vojon de sia unua metio anstataŭ tiu malbenita de toreadoro!... Pli feliĉa mi estus, se mi kun malriĉa ŝalo portus al li manĝaĵaron en domenirejon, kie li laborus, kiel laboris lia patro. Estus neniu belulino, kiu forŝtelus lin al mi; li estus mia; monmanko premus nin; sed ĉiujn dimanĉojn tre dece vestite ni irus posttagmeze en kampan gastejon por manĝeti. Plie estas tiu timado, kiun kaŭzas al mi la malbenitaj ludbataloj. Tio ĉi ja ne estas vivi! Multe da mono, multe! sed kredu min, Sebastiano, por mi ĝi estas kvazaŭ veneno kaj, ju pli ĝi eniras hejmen, des pli malbone mi estas kaj des pli mia sango putriĝas. Por kio mi volas la ĉapojn kaj tiun tutan lukson?... Oni konsideras min tre feliĉa kaj oni min envias kaj mi tamen revas pri tiuj malriĉaj virinoj, kiuj eĉ malsatas, sed portas sian fileton sur brako kaj, kiam ili ĉagreniĝas, forgesas ĉion rigardante la etulon kaj ridante kun ĝi... Ve la filetoj! Jen estas mia malfeliĉo. Se ni havus iun!... Se Johano vidus hejme infaneton, kiu estus lia, tute lia, pli, ol tiaj estas la genevetoj!...

Ploris Karmeno, sed nun per sinsekva larmado fluanta malgraŭ la naztuko sur ŝiaj ruĝetaj pro plorado vangoj. Tio estis malĝojo de nenaskpova virino, kiu ĉiumomente envias la patrinan sorton; malespero de edzino, kiu konsciante, ke ŝia edzo foriĝis de ŝi, ŝajnas kredi pri diversaj kaŭzoj, sed funde ŝi atribuas sian malfeliĉon al sia nenaskemo. Filo liganta ilin!... Kaj Karmeno, konvinkite post la jam pasintaj jaroj pri la neutilo de tia deziro, malesperis kontraŭ sia sorto, rigardante envie sian silentan aŭdanton, al kiu Naturo abunde donis tion, pri kio ŝi tiel multe sopiris.

La pikiletisto kun mallevita kapo pro tiu interparolado iris serĉi sian majstron, kiun li trovis ĉe la enirejo de Kvardek-kvinana Klubo.

— Johano, mi ĵus vidis vian edzinon. Tio, ju pli la tempo pasas, des pli malboniĝas. Provu pacigi ŝin; kondutu bone.

— Malbenaĵo! Malsano mortigu ŝin, vin kaj min mem! Tio ne estas ja vivi. Dio lasu, ke ĉi tiun dimanĉon trafu min taŭro, kaj tiel ni jam finos! Ĉu vivo estas vivinda?...

Li estis iom ebria. Incitis lin tiu malbonhumora mutado, kiun li trovis en sia hejmo kaj pli multe ankoraŭ, kvankam li al neniu tion konfesis, tiu forkuro de Doña Suno, kiu lasis por li nek unu vorton nek paperon kun mallonga, adiaŭa skribaĵo. Oni forpelis lin pli malĝentile, ol serviston. Nek eĉ li scias, kie estas tiu virino. La markizo preskaŭ ne atentis pri la nevina vojaĝo. Kiel freneza junulino! Ankaŭ ŝi ne avizis al li sian foriron, sed ne pro tio li konsideras ŝin perdiĝinta en la mondo. Jam ŝi montros, ke ekzistas, de iu stranga lando, kien ŝi estos irinta, puŝite de siaj kapricoj.

Gallardo ne kaŝis sian malesperon en sia propra hejmo. Antaŭ la silento de sia edzino, kiu restis kun mallevitaj okuloj aŭ rigardis lin malmilde, rezistante res-

pondi liajn demandojn por ne komenci konversacion, la spadulo ekmontris mortdezirojn.

— Kia malbenita sorto! Miuro min kornatingu ĉi tiun dimanĉon kaj ĝi ĵetu min aeren kaj oni min portu hejmen sur vunditportilo!

— Ne diru tion, malsaĝulo! — kriegis sinjorino Angustio —. Ne incitu Dion; tio alportas malbonsorton.

Sed la bofrato partoprenis per sentenca gesto, profitante tiun okazon flati la spadulon.

— Ne timu panjo. Ĉi tiun neniu taŭro kapablas trafi. Almenaŭ dum ĝi ne ĵetos al li kornon!...

Tiun dimanĉon estis okazonta la lasta jara ludbatalo de Gallardo. La mateno pasis, sen tio ke li spertis tiujn neprecizajn timojn kaj superstiĉajn priokupojn je aliaj fojoj. Li vestiĝis gaje per nerva ekscito, kiu ŝajnis pliigi la forton de liaj brakoj kaj kruroj. Kia ĝuo povi kuri tra tiu flava sablo, miregigante per siaj kuraĝaĵoj kaj belaj gestoj kelkajn milojn da ĉeestantoj!... Nur estas vero lia arto: kiu liveras entuziasmojn de homaj amasoj kaj abundan monon. Tio cetera, familio kaj amintrigoj, nur taŭgas por kompliki la vivon kaj produkti malplaĉojn. Ha, kiel bele li spadpikos!... Li sentis sin forta, kiel giganto; li estis, kvazaŭ alia homo: nek timon nek priokupojn. Eĉ li montris malpaciencon, ĉar ankoraŭ ne alvenis la ĝusta momento veturi en la cirkon; tute kontraŭe de aliaj fojoj, kiam li emis prokrasti la timatan momenton. Li deziregis eksplodigi sian koleron sur la taŭrojn pro la hejmaj malplaĉoj kaj pro tiu forkuro vundinta lian fierecon.

Kiam alvenis la veturilo, Gallardo trairis la hejman korton, ne atentante, kiel aliajn fojojn, pri la emocio de la virinoj. Karmeno ne aperis. Nu, virinoj!... Ili taŭgas nur por ĉagrenigi la vivon. Nur ĉe la viroj oni povas trovi multedaŭran amon kaj gajajn kunulojn. Tie estas lia bofrato, kiu admiras sin mem antaŭ la cirkoniro, kontenta pro stratkostumo alĝustigita al li, antaŭ ol ĝia posedanto, la spadulo, uzis ĝin. Malgraŭ tio ke li estas ridinda babilemulo, valoras pli multe, ol lia tuta, cetera familio. Tiu ĉi neniam forlasis lin.

— Vi estas pli bela, ol Roger de Flor mem — diris al li gaje Gallardo —. Supreniru en la veturilon kaj ni kune iros en la cirkon.

La bofrato sidiĝis apud la famulon, tremante pro fiero, kiam ili pasis tra la stratoj de Seviljo kaj ĉiuj vidis lin inter la silkaj manteloj kaj dikaj orbrodaĵoj de la toreadoroj.

La homamaso plenigis la cirkon. Ĉi tiu grava taŭrfesto ĉe aŭtuna finiĝo altiris multe da publiko ne nur urba, sed ankaŭ kampara. En la sunbenkaroj (54) estis multaj vilaĝanoj.

Gallardo montris de la unuaj momentoj tiun nervan agemecon regantan lin. Oni lin vidis malproksima de la barilo kaj iranta renkonti la taŭron, kiun li distris

per sia mantela ludado, dum la pikrajdistoj atendis la momenton, kiam la bravbesto atakos iliajn mizerajn ĉevalojn.

Oni rimarkis ĉe la publikon ian malfavoron kontraŭ la toreadoro. Oni aplaŭdis lin, kiel ĉiam, sed tiuj entuziasmaj eksplodoj estis pli densaj kaj ardaj en la ombraj benkaroj, kie la blankaj ĉapeloj montriĝis laŭ regulaj vicoj, ol en tiuj sunaj, svarmantaj kaj multkoloraj, kie multaj estis demetintaj siajn jakojn sub la bruligaj sunradioj.

Gallardo divenis danĝeron. Se li estos malbonsorta, duono de la cirka publiko stariĝos insulteme kontraŭ li kaj oni konsideros lin maldanka al tiuj lin helpintaj.

Li mortigis sian unuan taŭron ne tre brile. Li ĵetis sin kuraĝe, kiel ĉiam, inter ambaŭ kornojn, sed lia spado trafis oston. Liaj partianoj aplaŭdis lin. Li pikis laŭ bona direkto kaj ne estas kulpa, se lia ago ne efikis. Duafoje li intencis mortigi; la spado pikis en saman lokon, kiel antaŭe, kaj la taŭro, irante post la ruĝtukon, ĝin ĵetis el sia vundo ĝis iom da distanco. Tiam li prenis de Strekaro alian spadon kaj reiris al la bravbesto, kiu atendis lin, firme starante sur siaj kruroj, kun sangoverŝanta kolo kaj malseka nazpinto preskaŭ tuŝanta la sablon.

La majstro, metinte sian ruĝtukon antaŭ la taŭrajn okulojn, postenigis per la spadpinto la stangetojn de la pikiletoj, kiuj direktiĝis al ĝia kapo. Li intencis cerbetpiki ĝin. Gallardo apogis la ŝtalan pinton sur la kapan supron, serĉante inter ambaŭ kornoj la senteman lokon. Li pikis, kaj la taŭro dolore ektremis, sed restis stare kaj pelis la spadon per forta kapmovo.

— Unu! — kriis moke la publiko el la sunaj benkaroj.

"Malbenaĵo!..." Kial tiu personaro atakas lin tiel maljuste?

Ree la spadulo apogis la pinton kaj pikis, trafante nun la ĝustan, vundeblan punkton. La taŭro falis tuj, kvazaŭ vundite de fulmo, ĉar ĝi estis atingata en la nerva centro de sia vivo, kaj tie restis kun siaj kornoj eniĝintaj teren kaj la ventro supren inter kvar rigidaj kruroj.

Aplaŭdis tiuj de la ombro per klasa entuziasmo, dum la suna publiko komencis fajfi kaj insulti.

— Afektulo!... Aristokrato!

Gallardo kun turnita dorso al la protestantoj salutis per la ruĝtuko kaj la spado siajn partianojn.

La insultoj de la popolo, kiu ĉiam estis lia amiko, ĉagrenis lin kaj fermigis al li liajn pugnojn.

— Nu, kion volas ili? La taŭro ne taŭgis por pli brila agado. Malbenaĵo! La malamikoj kulpas pri tio.

Kaj li restis dum granda parto de la tempo apud la barilo, rigardante malŝate, kion faris liaj kamaradoj, kiujn li kulpigis pense, pri tio ke ili estis instigintaj tiujn montrojn je malplaĉo kontraŭ lin.

Interne li malbenis la taŭron kaj eĉ la paŝtiston zorgantan pri ĝi. Li ja venis

tien tute preta fari belajn bravaĵojn; sed jen besto, kiu malebligis al li brile agi! Oni devus pafmortigi la taŭrproduktistojn, kiuj sendas tiajn bestaĉojn.

Kiam li reprenis la mortigilojn, li ordonis Naciaon kaj alian el siaj pioniroj, ke ili per mantelo irigu la taŭron al la arena parto, apud kiu estis la popolaj benkaroj.

Li konis la publikon. Estas necese flati la sunan amason; tumultema kaj terura demagogio kunportanta en cirkon la klasajn malamojn, sed ŝanĝanta plej facile fajfadon, en aplaŭdadon, se nur ŝatmontro al ĝi karesas ĝian fierecon.

La piedirantaj toreadoroj rapide etendis siajn mantelojn al la taŭro kaj kuris, por ke la taŭro sekvu ilin al la arena parto varmigata de la suno. La popolo akceptis per gaja, surpriza ekmoviĝo ĉi tiun konduton. La ĉefa momento, tiu de la taŭra mortigo okazos sub ĝiaj okuloj kaj ne malproksime, kiel preskaŭ ĉiam, por ke la sidantaj en ombro riĉuloj oportune ĝin vidu.

La bravbesto, kiam restis sola en ĉi tiu loko, atakis ĉevalan kadavron. Ĝi metis sian kapon en la fenditan ventron kaj levis per siaj kornoj, kvazaŭ pendantan ĉifonon, tiun mizeran restaĵon, kiu lasis disfali intestojn kaj ekskrementojn. Falis la kadavro sur sablon kaj restis tie preskaŭ faldite, dum la taŭro malproksimiĝis per nedecida paŝado. Alifoje li revenis por flari ĝin, furioze kaj brue elspirante, kaj enigis siajn kornojn en la ventran kavaĵon, dum la publiko ridis pro tiu malsaĝa obstino, pro tiu vivserĉado en mortintaĵo.

— Ataku forte!... Kiel potenca vi estas!... Kiam vi laciĝos, avizu nin! — ĝi kriis mokeme.

Sed ĉiuj ĉesis atenti tiun bestaĵon por tion fari pri Gallardo, kiu trairis la arenon per mallongaj paŝoj kaj fleksebla talio, portante ĉe mano volvitan ruĝtukon kaj ludante per la alia spadon, kiel se ĝi estus bastoneto.

La tuta sunpubliko aplaŭdis, dankante ĉi tiun spadulan proksimiĝon.

— Vi ja sukcesis pacigi ilin — diris Naciao, kiu estis kun preta mantelo proksima al la taŭro.

La popolamaso vokis per mansvingado la toreadoron, "Ĉi tien; ĉi tien!". Ĉiu volis, ke li estu mortigonta sub ĝia benkaro mem, por povi vidi eĉ plej malgravan detalon, kaj la spadulo hezitis pro tiuj kontraŭaj vokoj de miloj da buŝoj.

Kun piedo sur la barila ŝtupo li pripensis plej taŭgan lokon por mortigi la taŭron. Estas necese irigi ĝin iom pli malproksimen. Embarasis la toreadoron tiu ĉevala kadavro, kiu ŝajnis bari per sia disigita mizeraĵo tiun tutan parton de la areno.

Li intencis voki Naciaon por ordoni al li konduki la beston aliloken, kiam li aŭdis post sin konatan voĉon igantan al li rapide turniĝi, ne divenante tamen, al kiu ĝi apartenis.

— Bonan tagon, sinjoro Johano... Ni estas pretaj aplaŭdi vian kuraĝon!

Li vidis ĉe la unuan vicon sub la ŝtalajn ŝirmŝnurojn (55) de la plej proksima

benkaro falditan jakegon sur la antaŭbenkara murrando, krucigitajn sur ĝi brakojn ĉemizvestitajn kaj larĝan, apogitan sur manoj vizaĝon ĵus razitan kaj kun ĝis funde metita ĉapelo. Li ŝajnis bonema kampulo veninta el vilaĝo por ĉeesti la taŭrfeston.

Gallardo rekonis lin. Li estas Plumeto.

La bandito plenumis sian promeson kaj tie estis sen timo inter dekdumil personoj, kiuj ne rekonis lin, salutante la spadulon, kiu dankis tiun konfidan montron.

Gallardo miris pro lia sentimo. Veni en Seviljon kaj iri en taŭran cirkon malproksiman de montoj kaj dezertoj, kie li facile sin defendus, sen helpo de siaj du kunuloj, la ĉevalo kaj la karabeno, nur por vidi, kiel li mortigos taŭroin! El ambaŭ, tiu viro ja estas la plej kuraĝa.

Krome, li pensis pri sia bieno tute negardata kontraŭ Plumeto kaj pri la kampula vivado, kiu nur estis ebla amike rilatante kun tiu eksterordinara famulo. Por li estos la taŭro.

Li ridetis al la bandito, kiu daŭrigis rigardante lin kun kontenta mieno, demetis sian toreadoran ĉapon kaj kriis, sin direktante al la bruega popolamaso, kvankam kun siaj okuloj fiksataj al Plumeto.

— Honore al vi.

Li ĵetis sian ĉapon en la benkaron kaj multo da manoj leviĝis, iuj kontraŭ la aliaj, por kapti tiun, kvazaŭ sanktegan, deponatan objekton.

Gallardo signis Naciaon, por ke li irigu la taŭron apud lin per taŭga mantelludo.

Malvolvis la spadulo sian ruĝtukon kaj la besto atakis per brua, furioza elspirego, pasante sub ĝi. "Hura!" muĝis la homamaso ree familiarigita jam kun sia antikva idolo kaj preta opinii admirinda ĉion, kion li faros.

Li ankoraŭ kelkfoje pasigis la taŭron sub sia ruĝtuko, inter aklamoj de la amaso, kiu estis proksima al li kaj tial ankaŭ konsilis lin. Gardu Gallardo! La taŭro ankoraŭ estas tre potenca. Rezultas danĝere resti inter la besto kaj la barilo. Estas konvene lasi facilan elirejon.

Aliaj pli entuziasmemaj ekscitis lian sentimon per kuraĝaj konsiloj.

— Agu, kiel kutime... Jen! spadpikon kaj ĉio finiĝos.

Estis la besto tro granda kaj malkonfidema por agi tiamaniere. Ekscitite de tiu proksima, mortinta ĉevalo, ĝi emis reveni al ĝi, kiel se ĝin ebriigis la naŭziga ventrodoro.

Post iu el siaj atakoj la taŭro, lacigite de la ruĝtuko, restis nemove sur siaj kruroj. Estis post Gallardo la mortinta ĉevalo. Rezultis do, netaŭga situacio; sed li venkis el aliaj pli malbonaj.

Li volis profiti la bestan pozicion. La publiko ekscitis lin al tio. El la homoj starantaj ĉe la unua vico, kun antaŭenigita busto por vidi eĉ plej sensignifan de-

talon de tiu decida momento, li rekonis multe da popolaj taŭremuloj, kiuj komencis ne esti liaj partianoj, sed nun ree pretiĝis aplaŭdi lin, kortuŝite de lia ŝatmontro al la sunanoj.

— Profitu la okazon, bravulo... Vidigu al ni la veron... Vin ĵetu ĝis funde.

Gallardo turnis iomete sian kapon por saluti Plumeton, kiu restis ridetante kun sia lunvizaĝo inter siaj jakego kaj brakoj.

— Honore al vi, kamarado!...

Li rektiĝis kun la spado antaŭen por sin ĵeti kontraŭ la taŭron; sed en tiu momento mem al li ŝajnis, kvazaŭ la tero ektremus, lin puŝante malproksimen, kiel se la cirko disfalus kaj ĉio nigriĝus ĉirkaŭ li, dum sovaĝa, furioza elspirego blovis, kiel uragano. Vivris dolore lia korpo de kapo ĝis piedoj, preskaŭ krevante; zumis lia kranio, kiel se ĝi eksplodus; morta korpremo streĉis lian bruston... kaj li falis en malhelan kaj senliman malplenaĵon per tiu nekonscio propra je tio, kio ne estas.

La taŭro en la momento mem, kiam li estis tuj sin ĵetonta por mortigi, puŝiĝis neatendite kontraŭ lin, altirate de sia manio al la ĉevalo kuŝanta post li. Okazis fortega puŝego, kiu renversis kaj malaperigis inter ĝiaj kruroj tiun orsilke tegitan korpon. Ĝi ne trafis lin per siaj kornopintoj, sed la bato estis terura, detrukapabla; kapsupro kaj kornoj, la tuta fronta armilaro de la bravbesto, faligis la homon, kiel per osta batilo.

La taŭro, kiu nur atentis la ĉevalon, sentis inter siaj kruroj baron kaj, malŝatante la bestan kadavron, turniĝis por alifoje ataki tiun brilan marioneton nemove kuŝantan sur sablo. Ĝi levis lin per korno kaj post nedaŭra skuo ĵetis lin ĝis kelkaj paŝoj da distanco kaj ĝi triafoje volis iri kontraŭ lin.

La homamaso, konfuzite pro la rapideco, per kiu ĉio ĉi okazis, restis silenta kun premata brusto. Ĝi nepre lin mortigos! Eble jam li mortis!... Subite ekkriego de la tuta publiko rompis tiun korpreman silenton. Mantelo etendiĝis inter la bravbesto kaj ĝia viktimo; ŝvebanta tuko preskaŭ tuŝanta la kornaron, tenata de fortaj brakoj, kiuj intencis per ĝi blindigi la taŭron. Tio estis Naciao, kiu puŝite de malespero iris al la besto, dezirante esti atingata de ĝi por savi sian majstron. La taŭro, konfuzite de tiu nova baro, puŝiĝis kontraŭ ĝin, lasante post si la falinton. La pikiletisto inter ambaŭ kornoj kaj svingante sian mantelon kuris posten, ne sciante kiel foriri el tiu danĝera situacio; sed kontenta, ĉar li malproksimigis la taŭron de la vundito.

La publiko preskaŭ forgesis la spadulon antaŭ tiu nova danĝero. Naciao ankaŭ estas falonta; li ne povas foriri el kornoj; la bravbesto devigas lin iri preskaŭ kroĉite... Kriis la homoj, kiel se iliaj krioj povus helpi la persekutaton; sopiris korpremate la virinoj, dum deturnis sian vizaĝon kaj prenis konvulsie siajn najbarojn, ĝis kiam la pikiletisto, profitante momenton, kiam la taŭro mallevis la

kapon por lin hoki, flankeniĝis for de la kornoj, dum ĝi kuris blinde kun la ŝirita mantelo inter siaj kornoj.

Emocio eksplodis laŭ surdiganta aplaŭdado. Tiu ŝanĝema popolamaso pro impreso de la danĝera momento aklamis Naciaon. Estis tio iu el plej feliĉaj okazaĵoj de lia vivado. La publiko, ĉar ĝi okupiĝis aplaŭdi lin, apenaŭ atentis pri la sveninta korpo de Gallardo, kiun kappendanta forportis el la areno kelkaj toreadoroj kaj cirkaj servistoj.

Vespere oni nur parolis en la urbo pri la Gallard'a taŭratingo: la plej terura el ĉiuj liaj ĝis tiam. En la samaj momentoj oni publikigis eksterordinarajn foliojn en multaj urboj, kaj la tuta, hispana gazetaro sciigis pri tiu okazintaĵo kun longaj komentarioj. Telegrafo funkciis tute same, kiel se politika famulo ĵus estus viktimo de atenco.

Flugis tra strato Serpentoj teruraj sciigoj, pro tiu sudlandana emo troigi ĉion. Malfeliĉa Gallardo ĵus mortis. Kiu sciigis pri tio, vidis lin sur lito, laŭ sia diro, en la cirka vunditejo, blanka kvazaŭ papero kaj kun kruco ĉe liaj manoj. Alia venis kun malpli funebraj sciigoj. Ankoraŭ li ne mortis, sed tio certe okazos tre baldaŭ.

— En li ĉio estas malligita; la koro, internaĵoj, ĉio! La besto faris el la malfeliĉulo kribrilon.

Oni metis policanojn ĉirkaŭ la taŭran cirkon, por eviti, ke la publiko, deziregante scii pri li, iru amase en la vunditejon. Ekster la cirko estis multego da personoj, kiuj demandis al la enirantoj aŭ elirantoj pri la stato de la vundito.

Naciao, ankoraŭ vestite per lumvesto, aperis kelkfoje malbonhumora kaj kun sulkiĝinta frunto, kriante kolere, ĉar ĉio necesa por porti la majstron hejmen ankoraŭ ne estis preta.

La publiko, kiam vidis la pikiletiston, forgesis la vunditon por gratuli Naciaon.

— Sinjoro Sebastiano, vi agis tre kuraĝe. Dank'al vi li ne mortis!

Sed li rifuzis tiujn laŭdojn. Ĉu atenti pri tio, kion li faris? Ĝi valoris neniom. Nur interesas nun tiu malfeliĉa Johano, kiu en vunditejo batalas kontraŭ la morto.

— Kaj, kiel li fartas, sinjoro Sebastiano?—oni demandis lin, reatentante pri Gallardo.

—Tre malbone. Li ĵus rekonsciiĝis. Iu el liaj kruroj estas tute difektita: kornopiko sub brako kaj multe plu!... La kompatindulo fartas ja malbonege... Ni lin transportos hejmen.

Jam nokte oni eligis Gallard'on sur vunditportilo. La popolamaso sekvis silente post li. La vojaĝo estis longa. Ĉiumomente Naciao, kiu portis sian mantelon sur brako, miksante sian brilan kostumon kun tiuj vulgaraj de la ceteruloj, kliniĝis sur la laktolan kovrilon de la vunditportilo kaj ordonis ripozi al la portistoj.

La cirkaj kuracistoj iris poste kun ili, markizo Moraima kaj Don Josefo, la kontraktfaristo, kiu ŝajnis preskaŭ svenonta kaj sin apogis sur la brakoj de ami-

koj el Kvardek-kvinana Klubo; ĉiuj iris tute intermiksite pro komuna emocio kun la popolanoj sekvantaj la toreadoron.

La publiko estis neniigita. Ĝi iris malgaje, kiel se ĵus estus okazinta nacia malfeliĉaĵo el tiuj, kiuj forigas la sociklasajn diferencojn kaj nivelas ĉiujn homojn sub ĝenerala ĉagreno.

— Kia malbona okazaĵo, markiza moŝto! — diris al Moraima blonda kaj vangodika kampulo kun jakego sur ŝultro.

Dufoje li volis helpi la transportadon, provante nedelikate flankenigi portiston. La markizo rigardis lin simpatie. Li certe estas iu el la kamparanoj, kiuj kutimas lin saluti survoje.

— Jes; malbonega okazaĵo, amiko.

— Kaj, ĉu vi opinias, ke li mortos, markiza moŝto?

— Tion oni timas, se miraklo ne savas lin. Li estas terure vundita.

Kaj la markizo, metante sian dekstran manon sur ŝultron de tiu nekonatulo, ŝajnis danki la malĝojon montratan de lia mieno.

La alveno en la hejmon de Gallardo estis ja emociiga. Eksonis en la korto malesperaj kriegoj. Strate kriis kaj malordigis sian hararon aliaj virinoj, najbarinoj kaj amikinoj de la familio, kiuj jam kredis Joĉjon mortinta.

Kuiraĵo kaj aliaj kamaradoj sin metis antaŭ la pordon por bari la eniron, puŝante kaj batante abunde, por ke la popolamaso ne invadu la domon post la vunditportilo. Plenigis la straton densa personaro, kiu zumis komentariante la okazintaĵon. Ĉiuj rigardis la domon, kiel se ili volis diveni ion tra ĝiaj muroj.

Oni metis la vunditportilon en ĉambron apudan al la korto kaj la spadulo per ĉiuspecaj zorgoj estis portata sur liton. Oni envolvis lin per sangomakulitaj tukoj kaj bandaĝoj akre odorantaj pro kuraciloj. El sia toreadora kostumo li nur portis rozkoloran ŝtrumpon. La interna vestaĵaro estis ĉe kelkaj lokoj rompita kaj ĉe aliaj tondita.

La vosteto pendis malplektite kaj senorde sur lia kolo; lia vizaĝo estis kremkolore pala. Li malfermis la okulojn, ĉar sentis manon inter tiuj siaj, kaj ridetis iomete vidante Karmenon; sed Karmeno ja estis tiel blanka, kiel li; ŝiaj okuloj estis sekaj, la buŝo violkolora kaj ŝia mieno tiel timega, kiel se la lasta momento por ŝi estus alveninta.

La respektindaj sinjoroj, amikoj de la spadulo, saĝe partoprenis. Estas necese, ke tio ĉesu. Karmeno devas eliri. Nur unuafoje oni kuracis lin kaj la kuracistoj ankoraŭ multe estas laborontaj.

La edzino fine eliris el la ĉambro, milde puŝate de la familiaj amikoj. La vundito signis per siaj okuloj al Naciao kaj ĉi tiu kliniĝis al li, penante kompreni lian malfortan murmureton.

— Volas Johano — diris li, elirante en la korton — ke oni telegrafu tuj doktoron Ruiz.

La kontraktfaristo respondis kontenta pro sia antaŭvido. Jam li sendis telegramon antaŭ la vespero, kiam li konvinkiĝis pri la vunda graveco. Preskaŭ certe la doktoro jam ekvojaĝas por alveni la morgaŭan matenon.

Post tio Don Josefo daŭrigis sian demandadon al la doktoroj kuracintaj lin en la cirko. Jam ili post la unua konfuza impreso sin montris pli optimismaj. Eble li ne mortos. Tiu organismo enhavas tiom da energio!... Plej timinda estas la cerba ekskuo, kiun li ricevis; tiu terura batego, kiu certe estus tuj mortiginta aliajn: sed li jam venkis la kolapson kaj malsvenis, kvankam lia malforteco estis granda... La vundojn ili ne konsideris danĝeraj. Tiu de la brako ne gravas: eble ĝi restos iom malpli vigla, ol antaŭe. Tiu de la kruro ne esperigas tiel bone. Ĝia osto estas rompita: Gallardo riskas resti lama por ĉiam.

Don Josefo, kiu penis sin montri trankvila, kiam antaŭ kelkaj horoj ĉiuj konsideris neevitebla la spadulan morton, ektremis aŭdante ĉi tion. La matadoro lama!... Ĉu li do ne povos ludbatali?...

Li indignis antaŭ tiu trankvilo, per kiu la kuracistoj parolis, pri tio ke eble Gallardo restos netaŭga por ludbatalado.

— Tio estas neebla. Ĉu vi opinias logikaĵo, ke Johano vivos ne ludbatalante?... Kiu kapablus anstataŭi lin? Nepre neebla! La plej brava homo el la mondo!... kaj ili volas, ke li ne plu ludbatalu!

Li pasigis la tutan nokton maldormante kune kun la bandanoj kaj la bofrato de Gallardo. Ĉi tiu, jen estis en la spadula ĉambro, jen supreniris en la superan etaĝon por konsoli la virinojn kaj bari ilian intencon vidi la toreadoron. Ili devas obei la kuracistojn kaj eviti emociojn al la vundito. Johano estas tre malforta kaj tiu malforteco kaŭzas al la doktoroj pli multe da priokupo, ol liaj vundoj.

La morgaŭan matenon la kontraktfaristo rapidis al la fervoja stacio. Alvenis la ekspreso el Madrido kaj en ĝi doktoro Ruiz. Li venis sen pakaĵaro, senzorge, kiel ĉiam, vestite. ridetante sub sia flavblanka barbo, kun ventro simila al tiu de Budo, dancanta laŭ takto de liaj mallongaj kruroj en la malstreĉita veŝto. Li sciiĝis pri la malfeliĉaĵo en Madrido, kiam eliris el taŭrida festo aranĝita por montri al la publiko "knabon" el kvartalo Kampogastejoj. Arlekenaĵo amuzinta lin multe... Kaj li ridis malgraŭ laciga nokto en vagonaro, memorante tiun groteskan spektaklon, kiel se li forgesus la vojaĝan celon.

Kiam li eniris la ĉambron de la toreadoro, ĉi tiu, kiun regis plej ekstrema malforteco, malfermis siajn okulojn kaj rekonis lin, kuraĝiĝante per konfida rideto. Ruiz, post kiam aŭskultis en ĉambra angulo la informan flustradon de la kuracistoj unue kuracintaj lin, proksimiĝis al la vundito decide.

— Kuraĝo, bravulo, pro tio ĉi certe ne mortos! Vi ja estas bonsortulo!

Kaj poste aldonis, parolante al siaj samprofesiuloj.

— Kia fortika besto estas Joĉjo! Iu ajn alia jam ne laborigus nin.

Li tre atente esploris lin. Danĝera kornovundo; sed li vidis tiom multe da

ili!... Ĉe la malsanoj, kiujn li nomis *ordinaraj*, li hezitis dubeme kaj ne kuraĝis subteni sian opinion. Sed kornovundoj estis lia specialaĵo kaj en tiaj okazoj li esperis ĉiam plej miregigajn kuracojn, kvazaŭ la kornoj kaŭzantaj vundojn liverus samtempe ian misteran rimedon.

— Se toreadoro ne mortas en la cirko mem — li diris — oni preskaŭ rajtas certigi, ke li saviĝos. Kuracado estas nur tempa afero.

Dum tri tagoj oni kruele operaciis Gallard'on, kiu muĝis pro doloro, ĉar lia granda malforteco ne permesis anestezi lin. El la vundita kruro doktoro Ruiz eligis kelkajn ostajn splitojn; fragmentoj de ĝia rompita tibio.

— Kiu diris, ke vi estos netaŭga por ludbatali?—ekdiris la daktoro, kontenta pro sia lerteco —. Vi ludbatalos, mia kara; ankoraŭ la publiko vin aplaŭdos multe.

La kontraktfaristo kapjesis al tiu aserto. Same li kredas. Ĉu kriplite povus elvivadi, kiu estas la plej brava homo el la mondo?...

Ĉar tion ordonis doktoro Ruiz, la toreadora familio transloĝiĝis en la hejmon de Don Josefo. Virinoj embarasas: ilia proksimeco estas netolerebla, kiam oni operacias. Sufiĉis plenda krieto de la toreadoro, por ke tuj respondis de ĉiuj hejmaj ekstremoj, kvazaŭ doloraj eĥoj, patrina kaj fratina kriegado, kaj estis necese deteni Karmenon, kiu furioze baraktis por kuri apud sian edzon.

Ĉagreno duonfrenezigis la edzinon kaj igis al ŝi forgesi sian malamon al li. Multfoje ŝi ploris pente, ĉar sin kredis nevola kaŭzo je la malfeliĉaĵo.

— Mi estas kulpa: jam mi scias — ŝi diris malespere al Naciao —. Li multfoje ripetis, ke taŭro kornatingu lin, por ne plu suferi. Mi estis tre malbona al li: Mi amarigis lian vivadon...

Neutile la pikiletisto rakontis ĉiudetale al ŝi la malfeliĉaĵon, por konvinki ŝin, pri tio ke ĝi estis nevola okazaĵo. Ne, Gallardo, laŭ ŝia diro, volis fini sian vivadon por ĉiam kaj, se la pikiletisto ne estus tiam helpinta lin, oni lin forportus mortinta el la areno.

Kiam operaciado finiĝis, la familio revenis hejmen.

Eniris Karmeno la ĉambron de la vundito per senbrua paŝado kaj mallevitaj okuloj, kiel se ŝi hontis pro sia antaŭa malamikeco.

— Kiel vi fartas? — demandis ŝi, dum prenis manon de Johano inter tiuj siaj.

Kaj tiel ŝi restis silente kaj timeme antaŭ Ruiz kaj aliaj amikoj, kiuj ne malproksimiĝis de la spadula lito.

Se ŝi estus sola, ŝi eble genuiĝus antaŭ sian edzon, petante, ke li pardonu ŝin. Malfeliĉulo! Ŝi lin malesperigis pro sia krueleco kaj puŝis lin al morto. Estas necese ĉion forgesi. Kaj ŝia naiva animo montriĝis ĉe ŝiaj okuloj per oferema kaj amema mieno, miksaĵo je edzina kaj patrina amo.

Gallardo ŝajnis malgrandigita pro sufero; malgrasa, pala, infane timema. Nenio restis el tiu belforta bravulo ardiganta la publikojn per siaj kuraĝaĵoj. Li plendis pri sia kvieteco, pri tiu kruro, kiun li ne povis movi, peza kvazaŭ ĝi estus

el plumbo. Li ŝajnis malkuraĝigita pro tiuj teruraj operacioj subportitaj kun sia tuta sentemo. Lia antaŭa, harda rezisto kontraŭ doloro estis malaperinta kaj nun li ĝemis pro plej eta ĝeno.

Lia ĉambro estis kuniĝejo, kiun vizitis plej konataj taŭremuloj de la urbo. Cigara fumo miksiĝis kun jodoforma haladzo kaj aliaj akraj odoroj. Sur la tabloj oni vidis inter medikamentaj boteletoj, kotonpakaĵoj kaj bandaĝoj vinajn botelojn, per kiuj oni regalis la vizitantojn.

— Tio estas nenio — kriis la amikoj, dezirante kuraĝigi la toreadoron per sia brua optimismo —. Post du monatoj vi alifoje ludbatalos. Lertulo ja kuracas vin. Doktoro Ruiz faras miraklojn.

Ĉi tiu ankaŭ montriĝis gaja.

— Jam li estas saviĝinta. Jen li eĉ fumas. Kaj, se malsanulo fumas!...

Ĝis tre malfrua nokto la doktoro, la kontraktfaristo kaj kelkaj bandanoj akompanis la vunditon. Kiam Kuiraĵo alvenis, li penis resti apud tablo kun kapteblaj, vinaj boteloj.

La konversacio inter Ruiz, la kontraktfaristo kaj Naciao ĉiam temis pri taŭroj. Estis neeble kuniĝi kun Don Josefo por paroli pri alia afero. Oni komentariis la malperfektecojn de ĉiuj spaduloj, oni diskutis pri iliaj meritoj kaj pri la mono, kiun ili gajnis, dum la malsanulo aŭskultis devige nemova aŭ malvigle duondormiĝis, lulate de la konversacio.

Preskaŭ ĉiam la parolanto estis nur la doktoro, atente aŭskultate de Naciao, kiu admire kaj serioze rigardis lin. Kiom multe tiu homo scias!... La pikiletisto, puŝate de sia amo al la idealo, demandis al la doktoro, kiam okazos la revolucio.

—Kial ĝi interesas vin? Tio, kion vi devas atenti, estas koni la taŭrojn por eviti al vi malfeliĉaĵon kaj multe ludbatali, por gajni monon por via familio.

Naciao protestis kontraŭ tiu humiligo, kiun la doktoro intencis trudi al li pro lia toreadora profesio. Li estas civitano, kiel la aliaj, voĉdonanto, kies helpon serĉas la politikaj famuloj ĉe balotadaj tagoj.

— Mi kredas, ke rajtas opinii. Ĉu ne?... Jen mi estas komitatano de mia partio!... Mi jam scias, ke mia toreadora metio estas malnobla kaj reakcia, sed tamen tio ne malhelpas, ke mi havu ideojn.

Li insistis pri tio de la reakcio, ne atentante la mokojn de Don Josefo, ĉar li, kvankam multe respektis ĉi tiun, nur parolis por doktoro Ruiz. Kiu estis kulpa pri ĉio, estis Ferdinando VII-a, jes; tirano, kiu fermis la universitatojn kaj malfermis Ludbatalartan Lernejon de Seviljo, pro kio igis ĉi tiun arton malaminda kaj ĝin metis en ridindan situacion.

— Estu malbenata tiu tirano, doktoro!

Naciao konis la politikan historion de sia lando rilate al ludbatalarto kaj, samtempe ke li mallaŭdis Ĉapeliston kaj aliajn toreadorojn, kiuj estis partianoj de tiu absoluta reĝo, li memoris Johanon León; provokanto je publikoj dum la

absolutisma epoko, ĉar li sin montris por ludbatali nigre vestite, tial ke oni nomis la liberalulojn nigraj, kaj li eliris el la cirkoj inter minacoj de la popolo, kies furiozon li sen timo rigardis. Naciao insistis pri sia kredo. Ludbatalado estas arto propra al la antikva tempo, barbara metio; sed ĝi ankaŭ havis homojn indajn je sama respekto, kiel la ceteraj.

— Nu, kial vi diras, ke ĝi estas reakcia? — diris la doktoro —. Vi estas bonulo, Naciao, deziranta agi, kiel eble plej bone, sed ankaŭ vi estas malklerulo.

— Jen — ekdiris Don Josefo — jen estas vero. Ĉe la komitato oni duonmalsaĝigis lin per predikoj kaj paroladoj.

— Ludbatalado estas progreso — daŭrigis ridetante la doktoro —. Ĉu vi komprenas, Sebastiano? Progreso de niaj landaj moroj, mildiĝado de la popolaj amuziĝoj de la alitempaj hispanoj; tiu tempo mem, pri kiu via Don Joseĉjo multfoje certe parolis al vi.

Kaj Ruiz kun pokalo mane senĉese parolis, nur interrompante sian diradon por sorbi iomete da vino.

—Nur estas grandega eraro diri, ke ludbatalado estas treege antikva. Oni mortigis en Hispanlando bravbestojn por amuzi personojn, sed ne ekzistis ludbatalado tiel, kiel nun ĝi estas. Cid lancadis taŭrojn; mi konsentas. La arabaj kaj kristanaj kavaliroj amuziĝis en siaj arenoj; sed nek ekzistis la toreadora profesio nek oni mortigis la bestojn noble kaj laŭregule.

La doktoro parolis pri la nacia festo de antaŭ kelkaj jarcentoj. Nur en tre maloftaj okazoj: kiam edziĝis reĝo, oni subskribis pacon aŭ inaŭguris katedralan kapelon, oni festis tiajn solenaĵojn per taŭraj ludbataloj. Nek tiuj festoj okazis regule nek oni konis la profesiajn toreadorojn. Belfortaj kavaliroj vestite per brilaj silkoj iris en arenon, rajdante sur siaj ĉevaloj, por lancmortigi la beston aŭ ĝin piki per manpikilo antaŭ altrangulinaj okuloj. Se la taŭro faligis ilin teren, ili prenis sian spadon kaj, helpate de siaj servistoj, mortigis la beston, vundante ĝin, kien ili povis sen iu ajn deviga regulo. Kiam taŭrfesto estis popola, malsupreniris en la arenon la viroj kaj atakis amase la taŭron, ĝis kiam ili sukcesis ĝin renversi, en kiu momento ili elmortigis ĝin per siaj ponardoj.

— Tiam taŭraj ludbataloj ne ekzistis — daŭrigis la doktoro — tio estis ĉasado je bravbestoj... Se oni atente ĝin konsideras, oni rimarkas, ke en tiu epoko la personoj okupiĝis pri aliaj aferoj kaj ĝuis aliajn festojn proprajn al tiu tempo kaj tial ne bezonis perfektigi ĉi tiun amuzadon.

La batalema hispano certe povis sukcesi ĉe la senĉesaj militoj en diversaj landoj el Eŭropo aŭ ŝipveturante en Amerikon, kie ĉiam estis necesaj kuraĝaj viroj. Krom tio la religio estis kialo je emociaj spektakloj, ĉe kiuj oni spertis tiun malvarman skuon, kiun kaŭzas nepropra danĝero kaj oni gajnis samtempe indulgojn por la animo. Tiuj Inkviziciaj Juĝoj, post kiuj oni bruligis homojn, estis akraj

spektakloj igantaj neinteresaj ludojn per simplaj, kompatindaj bestoj. Tiam Inkvizicio estis la granda, nacia festo.

— Sed alvenis tempo — daŭrigis Ruiz subtile ridetante — kiam Inkvizicio komencis malfortiĝi. Ĉio eluziĝas en ĉi tiu mondo. Fine ĝi mortis pro maljuneco pli multe frue, ol kiam revoluciaj leĝoj forigis ĝin. Ĝi estis tedita de sia ekzistado: La mondo ŝanĝiĝis kaj tiaj festoj rezultis io simila al taŭra ludbatalo en Norvegujo inter glacio kaj malhela ĉielo. La medio ne plu taŭgis. Ĝi komencis honti pro la homa bruligado akompanata de predikoj, ridindaj vestaĵoj, publikaj konfesigoj je kredaj eraroj ktp. Jam oni ne plu kuraĝis fari tion. Kiam ĝi bezonis pruvi, ke ankoraŭ ekzistas, ĝi satiĝis vipbatante iomete iun en malliberejo mem. Samtempe la hispanoj, lacaj iri tra la mondo serĉante aventurojn, eniĝis hejmen: jam ne plu ili militis en Flandlando nek en Itallando; la Amerika konkerado finiĝis per tiu senĉesa ŝipveturado de aventuristoj kaj tiam ekkomenciĝis la ludbatala arto; oni konstruis specialajn ludbatalejojn kaj aperis bandoj de profesiaj toreadoroj kaj oni reguligis taŭrfestojn kaj kreis tiel, kiel nuntempe ni konas ilin, la ludajn agojn pikileti kaj mortigi. La festo multe plaĉis la homamason. Ludbatalado demokratiĝis, ĉar ĝi fariĝis profesio. La kavaliroj estis anstataŭataj per popolanoj, al kiuj estis necese pagi monon, ĉar ili riskis sian vivon, kaj la popolo iris amase en la cirkojn, kie nur ĝi absolute regis tiom, ke ĝi povis eĉ insulti de la benkaroj tiun saman aŭtoritaton, kiu kaŭzis al ĝi teruron ĉe la stratoj. La idoj de tiuj ĉeestantaj per religia kaj interna entuziasmo, kiel oni bruligis herezulojn kaj judojn, sindonis ĉeesti kun brua ĝojo la batalon de viro kontraŭ taŭro, ĉe kiu nur malofte mortas la ludbatalanto. Ĉu tio ne estas progreso?

Ruiz insistis pri sia penso. Ĉe la mezo de 18-a jarcento, kiam Hispanlando enfermiĝis en sin mem, rezignante malproksimajn militojn kaj novajn koloniadojn, kaj estingiĝis pro manko de favora medio tiu malvarma, religia krueleco, tiam ekfloris ludbatalado. La popola heroeco bezonis novajn vojojn por supreniri ĝis la famo kaj riĉeco. Tiu suferigema amaso kutimiĝinta al mortaj festoj bezonis elirklapon por sati tra ĝi sian animon edukitan dum kelkaj jarcentoj rigardi turmentojn. Inkvizicia Juĝo estis anstataŭata per taŭrfesto. Kiu antaŭ unu jarcento estus soldato en Flandlando aŭ milita kolonianto je la vastaj landoj el Nova Mondo, iĝis tiam toreadoro. La popolo, ne trovinte alian rimedon por famiĝi, kreis per tiu nova, nacia festo gloran irejon por ĉiuj kuraĝaj kaj sentimaj ambiciuloj.

— Jes progreso — daŭrigis la doktoro —. Mi tion opinias tute klara. Tial mi, kiu estas revoluciema pri ĉio, ne hontas diri, ke min plaĉas ludbatalado... La homo bezonas spici sian unutonan ekzistadon per iom da malbono. Ankaŭ alkoholo estas malbona kaj ni scias, ke ĝi malutilas nin, tamen preskaŭ ĉiuj ĝin trinkas. Iom da sovaĝeco de tempo al tempo liveras novajn fortojn por daŭrigi nian ekzistadon. Nin ĉiujn plaĉas rigardi foje posten kaj vivi, iom kiel niaj praavoj.

Besteco renaskas en ni misterajn fortojn, kiujn lasi morti tute ne konvenas. Nu, mi konsentas, pri tio ke taŭraj ludbataloj estas barbaraj; tamen ili ne estas la nura, barbara festo en la mondo. Emo al perfortaj kaj sovaĝaj plezuroj estas homara malsano egalkvante komuna al ĉiuj popoloj. Tial mi indignas kontraŭ la fremduloj nur atentantaj pri Hispanlando, kvazaŭ nur ĉi tie estus perfortaj festoj.

Kaj la doktoro mallaŭde parolis pri tiuj neutilaj, ĉevalaj vetkuroj, ĉe kiuj mortas pli multe da homoj, ol en taŭrcirkoj; pri tiuj ĉasadoj je ratoj per dresitaj hundoj, kiujn ĉeestas kleraj publikoj; pri modernaj sportludoj, pro kiuj la ludantoj ofte rezultas kriplaj, kranirompitaj aŭ nazdifektitaj; pri duelado, preskaŭ ĉiam nur pro malhonesta deziro je propra reklamo.

— La taŭro kaj la ĉevalo — mallaŭdis Ruiz — plorigas kompate tiujn, kiuj ne plendas en siaj landoj, kiam ili vidas en hipodromo, kiel kurbesto falas krevinte aŭ kun rompitaj kruroj, kaj kiuj konsideras bela kompletigo je ĉiu grava urbo, krei zoologian ĝardenon.

Doktoro Ruiz indignis, tial ke je la nomo de civilizacio oni kondamnas pro barbaraj kaj sangemaj taŭrajn ludbatalojn kaj je la nomo de tiu sama civilizacio oni loĝigas en ĝardenon la plej malutilajn kaj danĝerajn bestojn el la mondo, princlukse nutrante kaj varmigante ilin. Por kio? Scienco bone jam de longe konas kaj katalogis ilin. Se iaj spiritoj abomenas stermadon, kial ne protesti kontraŭ tiuj sengloraj tragedioj ĉiutage okazantaj en la kaĝoj de la zoologiaj parkoj? Tremblekemaj kaproj kun siaj neutilaj kornoj estas enigataj sen ebleco sin savi en panteran loĝejon kaj tie ili suferas ĝiajn atakojn, pro kiuj rompiĝas iliaj ostoj terure krakante, dum la rabbesto enigas siajn ungegojn en la viktiman internaĵon kaj lekas avide ĝian fumantan sangon. Mizeraj kunikloj forkaptitaj el siaj pacaj, bonodoraj montkaŝejoj timtremas, kiam sentas apud si la blovantan boaon, kiu ŝajnas hipnotigi ilin per siaj okuloj kaj antaŭenigas perfide la ringojn de sia pentrita korpo por sufoki ilin per malvarma premado... Centoj da malfeliĉaj bestoj respektindaj pro sia malforteco mortas por nutri tute neutilajn rabbestojn regale gardatajn en urboj, kiuj sin opinias plej civilizitaj; kaj el tiuj urboj mem oni insultas la hispanan barbarecon, ĉar kuraĝaj kaj lertaj viroj laŭ ne disputeble saĝaj reguloj mortigas malperfide fortan, danĝeran bravbeston meze de sunlumo, sub lazura ĉielo, antaŭ brua kaj multekolora homamaso, kunigante la emocion pro danĝero kun pentrinda beleco... Jen malnoblaĵo!...

—Oni insultas nin, ĉar ni nun ne gravas — diris Ruiz indignante kontraŭ tion, kion li konsideris universala maljustaĵo —. Nia mondo estas, kiel simio imitanta la gestojn kaj plezurojn de tiu, kiun ĝi akceptas, kiel mastron. Nun estras Anglolando kaj en ambaŭ mondaj duonsferoj estas modo ĉevalaj vetkuroj kaj la homamaso enuas vidante malgrasajn ĉevalojn kuri laŭ kurvojo; ja senspica spektaklo. Veraj, taŭraj ludbataloj alvenis tre malfrue, kiam ni jam malsukcesis. Se

en la epoko de Filipo II-a ili estus tiel gravaj, kiel nun, ankoraŭ restus funkciante ludbatalejoj en multaj, eŭropaj landoj... Nu, oni ne parolu al mi laŭde pri la fremduloj! Mi admiras ilin, ĉar ili faris revoluciojn, kaj ni ŝuldas al ili grandan parton el nia pensaro; sed rilate al la taŭra afero, ja, certe!... ili nur diras malsaĝaĵojn!

Kaj tiu pasia doktoro blinde, kiel fanatikulo, ampleksis en sia akra mallaŭdo ĉiujn popolojn el nia planedo, kiuj abomenas la hispanan feston kaj samtempe estigas ĉe si aliajn sangemajn amuzojn, kiujn eĉ oni ne povas pravigi, pretekstante ĝian tute mankantan belecon.

Post dek tagoj de restado en Seviljo la doktoro reiris en Madridon.

— Nu, bravulo — li diris al la malsanulo —. Vi jam ne bezonas min kaj mi estas multe faronta. Estu nepre singarda. Post du monatoj vi estos sana kaj forta. Eble vin iom ĝenos via kruro, sed via naturo estas fera kaj vi venkos tion.

Gallardo resaniĝis laŭ tio, kion antaŭdiris Ruiz. Kiam post unu monato ĉesis la deviga kvieteco de lia kruro, la toreadoro, malforta kaj iom lama, povis iri sidiĝi sur apogseĝon en la korton, kie li akceptis siajn amikojn.

Dum lia malsano, kiam li estis febra kaj dronis en malagrablaj, pezaj sonĝoj, ĉiam sama penso staris firme, meze de liaj imagaj strangaĵoj. Li memoris Doñan Sunon. Ĉu tiu virino konas lian malfeliĉaĵon?...

Ankoraŭ restante en lito li kuraĝis demandi sian kontraktfariston pri ŝi en okazo, kiam ili restis solaj.

— Jes, karulo — diris Don Josefo —. Ŝi interesiĝis pri vi kaj sendis el Nizo telegramon demandantan pri via sano tri tagojn post la malfeliĉa okazaĵo. Nedubeble ŝi sciiĝis per la gazetoj. Ĉie oni okupiĝis pri vi, kiel se vi estus reĝo.

La kontraktfaristo respondis la telegramon kaj poste ne plu sciis pri ŝi.

Restis Gallardo kontenta per tiu sciigo dum kelkaj tagoj, sed poste li ree demandis insiste, kiel ĉiu malsanulo, kiu kredas, ke la ceteraj personoj nur atentas pri lia sano. Ĉu ŝi ne skribis? Ĉu ŝi ne plu demandis pri li?... La kontraktfaristo penis senkulpigi tiun silenton de Doña Suno, tiel konsolante la spadulon: Tiu sinjorino senĉese ja vojaĝas. Kiu povas scii, kie ŝi estas nunmomente?...

Sed, tial ke la toreadoro malgajiĝis, sin opiniante forgesita de ŝi, Don Josefo estis devigata kompate mensogi. Antaŭ kelkaj tagoj li ricevis el Itallando mallongan leteron, kie Doña Suno demandis lin pri la vundito.

— Montru ĝin! — diris avide la spadulo.

Kaj, ĉar la kontraktfaristo pretekstis, ke li lasis ĝin forgesita hejme, Gallardo humile petegis jenan konsolon: "Portu ĝin ĉi tien. Min tiel multe plaĉus vidi ŝian skribaĵon; esti konvinkita pri tio, ke ŝi memoras min!..."

Por eviti novajn komplikaĵojn pro siaj mensogoj, Don Josefo elpensis korespondadon, kiun neniam li kaptis per siaj manoj, tial ke ĝi estis adresata al alia persono. Doña Suno skribis, laŭ lia diro, la markizon pri aferoj de sia havaĵo kaj

ĉe la finiĝo de ĉiuj siaj leteroj demandis pri la farto de Gallardo. Aliajn fojojn estis leteroj al iu el ŝiaj kuzoj kaj en ili ŝi ankaŭ memoris la toreadoron.

Gallardo aŭskultis ĝoje tiujn sciigojn, sed samtempe li movis sian kapon montrante dubon. Kiom multe li deziras vidi ŝin!... Ĉu iam li ŝin vidos?... Ve tiu kapricema virino forkurinta sen kaŭzo, puŝite de sia stranga karaktero!

— Kio al vi konvenas — diris la kontraktfaristo — estas forgesi virinojn kaj atenti iom viajn negocojn. Vi jam ne estas en lito; vi jam preskaŭ bonfartas. Ĉu viaj fortoj renaskiĝas? Respondu: ĉu vi ludbatalos aŭ ne? Vi dum la tuta restanta vintroparto povos peni fortiĝi. Ĉu ni akceptos kontraktojn aŭ, ĉu vi rezignas ludbatali la venontan sezonon?...

Gallardo levis sian kapon fiere, kiel se al li oni proponus ion malhonorigan. Rezigni ludbatali! Pasigi unu jaron ne vidate en la areno! Ĉu la publikoj povus rezignacii pri tiu foresto?

— Komprenu, Don Josefo. De nun ĝis printempo estas sufiĉe longe por fortiĝi. Mi ludbatalos, kion oni metos antaŭ min. Vi povas kontrakti por la taŭrfesto ĉe Reviviĝa Pasko. Ŝajnas al mi, ke ĉi tiu kruro embarasos min multe, sed tiam, se Dio helpas, mi estos kvazaŭ el fero.

Post du monatoj la toreadoro jam sentiĝis forta. Li marŝis iomete lame kaj liaj brakoj ne estis tiel viglaj; sed tiujn ĝenojn li malŝatis opiniante ilin negravaj, dum sentis, ke novaj fortoj vivigis alifoje lian fortikan korpon.

Kiam li estis sola en la geedza ĉambro (ĉar li ree dormis tie, de kiam forlasis la malsanulan ĉambron), li sin metis fronte de spegulon kaj rektiĝis same, kiel se li estus antaŭ taŭro, metante kruce brakon sur la alian, kvazaŭ li tenus per siaj manoj la spadon kaj ruĝtukon. Jen! Li spadpikis la neekzistantan taŭron. Ĝis la tenilo mem!... Kaj li ridetis kontenta, pensante pri la malĝojo de siaj malamikoj, kiuj antaŭdiris lian tujan dekadencon pro la kornovundo kaj esperis trovi lin en tia stato.

Li senpacience atendis la momenton iri en arenon. Avidis li la glorajn aplaŭdojn kaj la amasan aklamon same, kiel komencanto; kvazaŭ tiu ĵusa taŭratingo estus duobliginta lian ekzistadon; kvazaŭ tiu antaŭa Gallardo estus alia kaj li bezonus rekomenci sian karieron.

Por plifortiĝi, li decidis loĝi dum la restanta vintroparto kun sia familio en *Rinconada*. Ĉasado kaj longaj marŝadoj fortigos lian difektitan kruron. Plie, li rajdos por vigli la terkulturajn laborojn; li vizitos la kaprarojn, la porkarojn, la bovinaron kaj ĉevalojn, kiuj paŝtiĝis en herbejoj. La administrado de la bieno ne iris bone. Ĉio kostis al li pli multe, ol al aliaj bienmastroj kaj la produktaĵoj rezultis malpli abundaj. Ĝi estis bieno de toreadoro kutimiĝinta al malavareco, al tio ke li gajnis grandajn monkvantojn, ne bezonante ŝpari. Liaj vojaĝoj dum jarparto kaj tiu malfeliĉaĵo kunportinta en lian hejmon maltrankvilon kaj malordon, kaŭzis, ke negocoj ne prosperis.

Antono, lia bofrato, kiu iris en la bienon por loĝi tie dum iom da tempo, kiel diktatoro, volis meti ĉion en ordon kaj nur sukcesis embarasi la laborfunkciadon kaj inciti la laboristojn. Dank'al tio ke Gallardo povis kalkuli certe al siaj ludbatalaj enspezoj; ne elĉerpebla riĉfonto kompencanta pli, ol sufiĉe, liajn sencelajn elspezojn kaj malsaĝaĵojn.

Antaŭ ol ekiri al *Rinconada,* sinjorino Angustio volis, ke ŝia filo iru genuiĝi antaŭ Virgulinon Espero. Tio estis promeso, kiun ŝi faris la malĝojigan vesperon, kiam vidis, ke li alvenis kuŝante sur vunditportilo pala kaj nemova, kiel mortinto. Kiom multe da fojoj ŝi ploris antaŭ *Macarena,* tiu bela ĉielreĝino kun longaj okulharoj kaj brunaj vangoj, petante, ke ŝi ne forgesu ŝian malfeliĉan Joĉjon!...

La soleno estis ja popola okazaĵo.

La spadula patrino venigis la ĝardenistojn de kvartalo *Macarena,* por ke ili ornamu preĝejon Sanktan Ĝilon, kiun li plenigis per floroj, formante ĉe ĝiaj altaroj grandajn, piramidajn bukedojn, kiuj disiĝis laŭ girlandoj inter la arkaĵoj kaj dikaj floraroj pendantaj de lucernoj.

En suna mateno okazis tiu sankta ceremonio. Malgraŭ tio ke ĝi estis labortago, plej ĉefaj personoj el la apudaj kvartaloj plenigis la preĝejon: ili estis dikaj virinoj nigrokulaj kaj je mallonga kolo, kun ŝvelantaj korsaĵo kaj jupo pro ŝiaj korpaj kurbaĵoj, vestitaj per nigresilkaj kostumoj kaj portantaj puntan mantilon super siaj palaj vizaĝoj; kaj laboristoj ĵus razitaj, kun novaj vestaĵoj, ronda ĉapelo kaj granda, ora ĉeno sur la veŝto. Almozuloj aliris tien amase, kiel se okazus geedziĝo kaj formis du vicojn ambaŭflanken de la preĝeja portalo. La neriĉaj virinoj de la kvartalo, malbone kombite kaj portante sur brako infanojn, grupiĝis atendante senpacience la alvenon de Gallardo kaj lia familio.

Estis okazonta meso akompanata de orkestro kaj kanto; eksterordinara afero tiel brila, kiel opero, kiam Pasko alvenas, en teatro Sankta Ferdinando. Poste la pastroj kantos dankan "Te Deum" (56), pro tio ke sinjoro Johano Gallardo ne mortis; tute same, kiel ĉe vizito de la reĝo en Seviljon.

Aperis la solenantoj kaj ilia eskorto, farante al si vojon inter la popolamaso. La patrino kaj la edzino de la toreadoro inter parencinoj kaj amikinoj iris unue, bruetigante laŭ sia paŝado la dikajn jupojn el nigra silko kaj milde ridetante sub siaj mantiloj. Poste venis Gallardo, sekvate de multego da toreadoroj kaj amikoj; ĉiuj vestite per helaj kostumoj, kun veŝtaj ĉenoj kaj ringoj parade brilaj, portante sur siaj kapoj blankajn feltĉapelojn, kiuj akre kontrastis kun la nigreco de la virinaj vestaĵoj.

Gallardo montriĝis serioza; li estas ja kredanto. Li malofte memoris Dion kaj blasfemis kontraŭ lin aŭtomate, pro kutimo, kiam io kolerigis lin; sed nun estis alie: li iris tien por danki Sanktegan *Macarena'n* kaj eniris la templon kun penta mieno.

Ĉiuj eniris escepte Naciaon, kiu lasis sian edzinon kaj filaron kaj restis en la placeto.

— Mi estas liberpensano — li opiniis dece deklari antaŭ grupo de amikoj —. Mi respektas ĉiujn kredojn, sed tio, kion oni faras tie interne, estas laŭ mi malvera. Mi ne volas malrespekti *Macarena'n* nek nei ŝian influon, sed, kamaradoj, se mi ne estus alirinta ĝustatempe por forigi la taŭron aliloken, kiam Joĉjo kuŝis sur tero...

Tra la malfermitaj pordegoj flugis ĝis la placo la ĝemoj el la muzikiloj, la voĉoj el la kantistoj, dolĉega kaj volupta melodio akompanata de ondoj da flora parfumo kaj vaksa odoro.

La toreadoroj kaj taŭremuloj grupiĝintaj ekster la templo fumis cigaredon post cigaredo. De tempo al tempo, por igi malpli teda tiun atendadon, kelkaj iris en plej proksiman trinkejon.

Kiam la solenantoj eliris, la almozuloj sin ĵetis, batante sin reciproke, por kapti avide per siaj manoj laŭmanprene ĵetitajn monerojn. Sufiĉis por ĉiuj. Majstro Gallardo estas ja malavara.

Sinjorino Angustio ploris kun sia kapo apogita sur ŝultro de amikino.

Ĉe la preĝeja pordo aperis ridetante kaj kontenta la spadulo, sur kies brako sin apogis lia edzino, tremante pro emocio kaj kun mallevitaj okuloj, ĉe kiuj larmo briletis.

Karmeno pensis, ĉu ŝi edziniĝis duafoje.

VII

Kiam alvenis Sankta Semajno, Gallardo diris al sia patrino ion, kio multe gajigis ŝin.

La antaŭajn jarojn la spadulo iris en la procesio de la paroĥo Sankta Lorenzo, kiel fervorulo de Nia Patro Jesuo Grandpotenca, vestite per nigraj robo, altega konuskapuĉo kaj masko nur lasanta vidi la okulojn.

Ĝi estis religia, altrangula asocio kaj la toreadoro, ĉar li konsciiĝis iranta al la riĉeco, aniĝis al ĝi, forlasante tiujn popolajn, ĉe kiuj pieco kuniĝis al ebrieco kaj skandalo.

Gallardo parolis fiere pri la seriozeco de ĉi tiu religia asocio. Tie regas ja akurateco kaj bona disciplino same, kiel en armeo. Kiam en nokto de Sankta Ĵaŭdo la horloĝo de preĝejo Sankta Lorenzo frapis la duan sonon de la dua horo, en ĉi tiu momento mem malfermiĝis la pordegoj kaj aperis antaŭ la publiko

amasiĝinta en la malluman placon la tuta templinterno plena je lumoj kun ĝiaj asocianoj laŭ procesia ordo.

La nigraj kapuĉuloj silente kaj funebre, sen iu ajn montro je vivo ekster siaj brilantaj okuloj tra la maskaj truoj, antaŭeniris duope per malrapida paŝado, lasante grandan distancon de paro al paro, portante mane grandegan, palflaman kandelon kaj trenante sur tero sian longan, roban voston.

La homamaso pro tiu granda impresiĝemo de la sudaj popoloj rigardadis atentege, kiel preterpasis la kapuĉuloj, kiujn ĝi nomis "nazaretanoj" (57); misteraj maskuloj, eble altrangaj sinjoroj puŝitaj de tradicia pieco partopreni ĉi tiun noktan procesion finiĝontan post sunleviĝo.

Ĝi estis silenta, religia asocio. "Nazaretanoj" devis neparoli kaj iris eskortataj de urbaj policanoj zorgantaj, pri tio ke neniu ĝenu ilin. Ebriuloj ja abundis ĉe la popolamaso. Vagadis tra la stratoj nelacigeblaj piuloj (58), kiuj por solenigi la datrevenon de la morto de Kristo komencis promeni sian religiecon de trinkejo en trinkejon la Sanktan Merkredon kaj ne finis siajn haltojn ĝis la sabato, ĉe kiu oni definitive transportis ilin hejmen, post kiam ili estis trinkinte nenombreblajn fojojn en ĉiuj stratoj, kvazaŭ novaj nazaretanoj trairantaj "Vojon de Amareco".

Kiam antaŭe la kapuĉuloj, kiuj, se ne silentas, faras pekon, iris neeskortate en la procesio, la ebriuloj sen iu ajn morala skrupulo pro vina drinkegado sin metis apud ilin, murmurante ĉe iliaj oreloj plej akrajn insultojn kontraŭ ili aŭ iliaj familioj, kiujn ili eĉ ne konis. La "nazaretano" silentis kaj suferis, ricevante la insultojn, kiel se tio estis ofero al Grandpotenca Jesuo, sed la ĝenanta burdo, kuraĝigite pro tia pacemo, gravigis sian ofendantan zumadon, ĝis kiam fine la religia maskulo pensis, ke, kvankam paroli estas malpermesate, agi tute ne, kaj en absoluta silento levis sian grandan kandelon kaj batis per ĝi la ebriulon barantan tiun sanktan, ceremonian malbruemon.

Dum la procesia irado, kiam la portantoj je la religiaj skulptaĵoj bezonis ripozi, sufiĉis malforta sono "ssss...", por ke la kapuĉuloj haltu, kaj restu nemove tiuj pezaj sokloj, sur kiuj staris skulptitaj bildoj de sanktaj scenoj kaj estuloj, lumigataj de multaj lanternoj. Samtempe la nigraj paroj fronto kontraŭ fronton, kun sia ega kandelo apogita sur piedo, rigardis la homamason per siaj misteraj okuloj tra la maskaj truoj. Ili ŝajnis mortaltirantaj figuroj el inkvizicia juĝo: grandaj maskuloj, kies nigraj robovostoj odoris kvazaŭ incenso kaj brulhaladzo. Sonis plende la longaj, kupraj trumpetoj, ŝirante la noktan silenton. Pendis de la kapuĉaj pintoj kaj flirtis pro venteto la asociaj distingiloj; rektangulaĵo el nigra veluro kun oraj strioj, sur kiu estis brodita anagramo S. P. Q. R. por memorigi la partoprenon de la romana ŝtatjuĝisto en Judlando pri la morto de Kristo.

Antaŭeniris la procesia skulptaĵo de Nia Patro Jesuo Grandpotenca: peza soklo el arte laborita metalo kun nigra velurjupo, kiu ŝoviĝis sur tero, kaŝante la

piedojn de dudek ŝvitplenaj kaj preskaŭ nudaj homoj ĝin subportantaj. Kvar lanternaj grupoj kun oraj anĝeloj brilis ĉe la anguloj kaj meze iris fleksite Jesuo; tragedia, suferanta, sangomakulita Jesuo preskaŭ senforta por subteni la pezan krucon, kun dorna krono, kadavra vizaĝo kaj larmaj okuloj, vestita per granda velurrobo surŝutita per oraj floroj, ĝis tio ke ĝia riĉa ŝtofo apenaŭ estis videbla kaj ŝajnis nur subtila arabesko inter tiuj komplikitaj kurboj de la brodaĵo.

La ekvido je Grandpotenca Jesuo kaŭzis ekĝemon el centoj da homaj brustoj. — Patro Jesuo! — murmuris la maljunulinoj, fikse rigardante la skulptaĵon, kiel hipnotigite — Grandpotenca Sinjoro! Ne forgesu nin!

La procesia skulptaĵo haltis meze de la placo kun sia eskorto el inkviziciaj kapuĉuloj kaj la pieco de la andaluzia popolo, kiu montras per kantado ĉiujn siajn animstatojn, salutis Jesuon per birdaj kantatoj kun longaj plendoj.

Infana, dolĉe tremanta voĉo flugis tra la silento. Ĝi estis knabineto, kiu antaŭeniris inter la homamaso ĝis la unua vico kaj ĵetis "kantsagon" al Jesuo. La tri kantataj versoj estis por honori Grandpotencan Sinjoron, "la plej bela skulptaĵo el la mondo", kaj skulptiston Montañés, iu el la gloraj, hispanaj artistoj el la ora jarcento.

Ĉi tiu "kantsago" ŝajnis, kvazaŭ la unua pafo de batalo, kiun sekvas senfina serio da eksplodoj. Ankoraŭ ĝi ne finiĝis kaj jam eksonis alia en malsama loko, kaj tuj alia, kaj alia, kiel se la tuta placo estus granda kaĝo plena je frenezaj birdoj, kiuj, vekite de la voĉo de unu el ili, ekkantus, ĉiuj samtempe, laŭ konfuza malordo. Viraj voĉoj basaj kaj raŭkaj kunigis siajn malaltajn tonojn kun tiuj virinaj. Ĉiuj kantis, fikse rigardante la sanktan skulptaĵon, kiel se ili estus solaj antaŭ ĝi, forgesitaj de la ĉirkaŭanta popolamaso, surdaj por la aliaj voĉoj, ne erarante nek hezitante pri tiuj komplikitaj, birdaj melodioj, kiuj tranĉe intermiksiĝis malharmonie kun la kantoj de la ceteruloj. Aŭskultis dume nemove la kapuĉuloj, rigardante Jesuon, kiu akceptis la belajn laŭdojn ĉiam larmeme sub la peza lignaĵo kaj akre dolorigate de la dornaj pikoj, ĝis tiam ke la kondukanto, konsiderante sufiĉa la halton, batis arĝentan tintilon lokitan ĉe la antaŭaĵo de la soklo. "Suprenigu!" Grandpotenca Sinjoro post kelkaj balancmovoj leviĝis, kaj ekpaŝis la piedoj de la nevidataj portistoj.

Poste iris Virgulino Sankta Madono Plej Suferanta, ĉar ĉiuj paroĥoj portis en la procesion du skulptitajn bildojn, iun de Dia Filo kaj alian de lia Sankta Patrino. Sub velura baldakeno vibris la ora krono de Sankta Madono Plej Suferanta, ĉirkaŭata de lumoj. Ŝia mantela vosto kelkajn metrojn longa falis post la soklon, ŝveligate de ligna, ronda tenilo, lasanta, ke elmontriĝu ĝiaj riĉegaj, pezegaj, blindige brilaj kaj multekostaj brodaĵoj, ĉe kiuj certe eluziĝis la pacienco kaj lerteco de tuta generacio.

La kapuĉuloj kun siaj brulantaj kandeloj eskortis Virgulinon, dum tremis

rebrilado de iliaj lumoj sur ĉi tiu reĝa, longa mantelo disĵetanta ĝin tra la medio. Laŭtakte de la sonado de tamburoj marŝis poste aro da virinoj kun sia korpo en ombro kaj la vizaĝo ruĝigata de flamanta kandelo, kiun ĉiu portis mane. Ili estis piednudaj maljunulinoj kun mantilo, junulinoj vestitaj per blankaj kostumoj, kiuj estis destinitaj por vesti ilin post ilia morto okaze de grava malsano, virinoj marŝantaj pene kun siaj ventroj ŝvelintaj pro nevideblaj kaj doloraj malsanoj; tuta bataliono da suferantaj personoj saviĝintaj el morto, ĉar tion volis Grandpotenca Sinjoro kaj lia Sanktega Patrino, iranta post iliaj skulptitaj bildoj por plenumi promeson.

La pia, religia asocio, post kiam ĝi marŝis malrapide tra la stratoj kun longedaŭraj haltoj, dum kiuj oni ĉiuflanke kantadis, eniris la katedralon restantan la tutan nokton kun malfermitaj pordegoj. La longaj vicoj da lumoj interniĝis en la gigantajn navojn de ĉi tiu templo mirinda pro ĝia eksterordinara grandeco, kaj vidigis el mallumo la grandegajn kolonojn tapetitajn per purpura veluro kun oraj strioj, sen tio ke ili atingis heligi la densan nigrecon de ĝiaj arkaĵaroj. La kapuĉuloj antaŭeniris, kvazaŭ akrepintaj insektoj, en tiu ruĝeta kandellumo reganta apud la planko, dum nepenetrebla nokto restis alte. Ili alifoje eliris en stellumon, forlasante ĉi tiun kriptan malhelecon, kaj la suno fine surprizis la procesion meze de la stratoj, estingante la lumon de kandelegoj kaj briligante la oron el la sanktaj vestaĵoj kaj la larmojn kaj agoniajn svitojn de la skulptitaj bildoj.

Gallardo estis entuziasma partiano de Grandpotenca Jesuo kaj de la majesta silento de lia religia asocio. Ja serioza afero! Pri la aliaj, procesiaj skulptaĵoj oni rajtis ridi pro nepieco kaj malordo ĉe ĝiaj asocianoj. Sed, ĉu ankaŭ pri ĉi tiu? Kia malsaĝaĵo!... Li eksentis emocian skuon, kiam rigardadis tiun imponan bildon de Jesuo, "plej valora skulptaĵo el la mondo", kaj vidis la solenan marŝadon de la kapuĉuloj. Krome en ĉi tiu asocio oni rilatis kun altrangaj personoj.

Malgraŭ tio ĉi la spadulo decidis forlasi ĉi tiun jaron la grandpotencanojn por eliri kun tiujn de *Macarena,* kiuj eskortis mirakleman Virgulinon Espero.

Sinjorino Angustio multe ĝojis, kiam sciis lian decidon. Ja li tion ŝuldis al la Virgulino, ĉar ŝi savis lin el la lasta taŭratingo. Plie ĉi tio flatis ŝian pleban, naivan senton.

— Ĉiu kun siaj samklasanoj, Joĉjo. Vi pravas rilati kun altranguloj, sed pensu, pri tio ke la malriĉuloj ĉiam amis vin kaj ili jam vin ekmallaŭdis, kredante, ke vi malŝatas ilin.

Tre bone la toreadoro sciis tion. La tumultema popolamaso okupanta en la cirko la sunajn benkarojn komencis montriĝi iom malamika al li, ĉar ĝi sin opiniis forgesita. Oni kritikadis al li lian amikecon al la riĉuloj kaj lian forlason je tiuj, kiuj estis liaj unuaj partianoj. Por eviti tian malfavoron Gallardo profitis ĉiujn rimedojn, flatante la plebon per tiu senskrupula submetiĝo, kiun utiligas,

kiu bezonas por vivi serĉi la publikan aplaŭdadon. Li vokis la plej ĉefajn asocianojn el *Macarena*, por sciigi ilin, ke li iros en la procesio. Tute oni ne diskonigu la sciigon. Li faros tion pro dankpia sento kaj volas, ke lia ago restu sekreta.

Sed post nemultaj tagoj ĉiuj kvartalanoj nur parolis pri ĝi najbare fiere. Nu, kiel belega ĉi tiun jaron eliros *Macarena!* Ili malŝatis la Grandpotencajn riĉulojn kun ilia orde aranĝita kaj teda procesio, kaj ili nur atentis pri siaj konkurantoj el la alia bordo de la rivero, tiuj gaje bruemaj el *Triana*, kiuj estis tiel kontentaj pro sia Sankta Madono Patrocinio kaj sia Mortanta Kristo de ili nomata Sanktega "Bestido".

— Ja *Macarena* estos vidinda — oni diris ĉe la najbargrupetoj, kiam ili komentariis la toreadoran decidon —. Sinjorino Angustio certe superŝutos la skulptaĵon per floroj. Almenaŭ ŝi elspezos cent durojn. Kaj Joĉjo metos sur Virgulinon sian tutan juvelaron. Kia riĉaĵo!

Tiel estis. Gallardo kolektis ĉiujn siajn juvelojn kaj ĉiujn de sia edzino por ornami per ili *Macarena'n*. Ĉe ŝiaj oreloj oni metos orelringojn, kiujn la spadulo aĉetis en Madrido, elspezante por tio sian gajnon de kelkaj taŭrfestoj. Sur la brusto ŝi portos duoblan, toreadoran veŝtoĉenon el oro, de kiu pendos ĉiuj liaj ringoj kaj dikaj butonoj el briliantoj, kiujn li metis sur sian brustumon, kiam vestiĝis per tipa, andaluzia kostumo.

— Ho! Kiel belega eliros nia brunulino! — diris la najbarinoj, parolante pri Virgulino —. Sinjoro Johano pagos ĉion. Certe envimortos duono da la urbanoj.

La spadulo, kiam oni demandis lin pri tio, ridetis modeste. Li ĉiam sentis fortan, pian altiron al *Macarena*. Ŝi estas Virgulino de la kvartalo, en kiu li naskiĝis, krom tio ke lia malfeliĉa, mortinta patro ĉiujn jarojn partoprenis la procesion, vestite kiel "armito". Tio estas honoro, kiun rajtas la familianoj kaj, se li estus en alia situacio, li certe metus kaskon sur sian kapon kaj manprenus lancon, irante kiel romana legiano same, kiel iris multaj aliaj Gallard'oj jam de longe putrintaj en tero.

Ĉi tiu pia populareco flatis lin: li volis, ke ĉiuj najbaroj el la kvartalo sciu lian partoprenon en la procesio kaj samtempe li timis, ke tiu sciigo multe disflugu tra la urbo. Li kredis pri Virgulino kaj deziris pie egoisme amikiĝi al ŝi, por ke ŝi helpu lin okaze de estontaj danĝeroj, sed li tremis, kiam pensis pri la mokoj de la amikoj kuniĝantaj en la kafejoj kaj societoj de strato Serpentoj.

— Ili certe mokos min, se min rekonos tie — li diris —. Estas necese rilati amike al ĉiuj.

La Sanktan Ĵaŭdon li iris vespere en la Katedralon kun sia edzino por aŭdi "Misereren" (59). La templo kun siaj ogivaj arkadoj treege altaj nur estis lumigata per ruĝemaj kandelegoj lokitaj ĉe ĝiaj kolonoj: sufiĉe nur, por ke la ho-

mamaso ne iru tute blinde. Post la kradoj de la flankaj kapeloj estis, kvazaŭ en kaĝo, gealtranguloj dezirantaj ne sin miksi kun tiu ŝvitanta popolamaso preme svarmanta en la navoj.

En la malhela ĥorejo brilis, kiel aro de ruĝetaj steloj, lumoj destinitaj por muzikistoj kaj kantistoj. "Miserere" de Eslava dissendis siajn gajajn melodiojn en tiu terura, malhelega kaj mistera medio. Ĝi estis andaluzia "miserere"; io petolema kaj gracia, kvazaŭ birdflugila svingado, kun romancoj similaj al amaj serenadoj kaj ĥoroj ŝajnantaj kantoj de trinkemuloj; vivgajeco en dolĉa lando, kiu forgesigas la morton kaj ribelas kontraŭ tiu Kristmorta malĝojo.

Kiam la tenora voĉo finis la lastan romancon kaj liaj plendoj dronis en la arkajarojn, riproĉante la urbon, kie oni mortigis Dion: "Jeruzalemo, Jeruzalemo!", la homamaso disiĝis, dezirante kiel eble plej baldaŭ reiri en la stratojn, kiuj ŝajnis ja teatro pro siaj elektraj lumoj, siaj seĝaj vicoj sur la trotuaroj kaj siaj loĝioj en la placoj.

Gallardo iris hejmen por sin vesti kiel "nazaretano". Sinjorino Angustio zorgis pri tiu kostumo tiel ame interesate, kiel se ŝi alifoje estus en sia junaĝo. Ve, ŝia malfeliĉa edzo, kiu ĉiujare en tia vespero sin kovris per milita armilaro kaj, metinte sian lancon sur ŝultron, eliris straten por ne reveni ĝis la morgaŭa tago kun difektita kasko kaj malpurega kiraso post haltado kun siaj armeaj kamaradoj en ĉiujn trinkejojn el Seviljo!...

La spadulo atentis pri siaj piedaj vestaĵoj per virina detalemo. Li traktis la "nazaretanan" kostumon samzorge, kiel tiun toreadoran en ludbatala tago. Vestis li siajn piedojn per silkaj ŝtrumpoj kaj ŝuoj el lakita ledo. Li metis sur sin robon el blanka, brila ŝtofo fasonita de lia patrino mem, kaj sur la robon, altan kaj akrepintan kapuĉon verdveluran, kiu falis sur liaj ŝultroj, kiel masko, kaj sin sekvis ĝis pli malsupre, ol la genuoj, kvazaŭ pastra mesvestaĵo. Flanke de la brusto la asocia blazonŝildo estis riĉkolore kaj detaleme brodita. La toreadoro sin metis blankajn gantojn kaj manprenis la altan bastonon; signo de grava hierarĥio en la religia asocio; stango tegita per verda veluro kun arĝenta pintŝirmilo kaj finiĝanta supre per sammetala ovalo.

Jam estis post la dekdua nokte, kiam la eleganta kapuĉulo iris al Sankta Ĝilo tra la stratoj plenaj je homamaso. Sur la blankaj dommuroj la kandelegaj flamoj kaj la lumo el trinkejaj pordoj desegnis tremantan miksaĵon el ombroj kaj brulbriloj.

Antaŭ ol atingi la preĝejon. Gallardo renkontis en mallarĝa strato, laŭ kiu estis ironta la procesio, la "judan roton"; trupo de "armitoj", bravaj soldatoj, kiuj, dezirante montri sian militistan disciplinon, senlace paŝis restante sur sama loko, laŭ takto de tambura, senĉesa sonado.

Ili estis ĉiuaĝaj viroj kun vizaĝo enkadrigata de la metalaj, kaskaj vangoŝirmiloj, vinkolora ŝirmovestaĵo, kruroj tegitaj per kotonaj ŝtrumpoj, kiuj aspek-

tigis ilin el virina karno, kaj altaj sandaloj. Ĉe sia zono ili portis romanan spadon kaj, por imiti la modernajn soldatojn, ili pendigis de ŝultro per ŝnuro, kvazaŭ ĝi estus karabena portrimeno, sian lancon. Antaŭ la roto flirtis la romana standardo kun sia senata skribaĵo, sin movante laŭtakte de la tambura sonado, kiel ĉiuj legianoj.

Impone luksa famulo paradis, svingante spadon, antaŭ ĉi tiu armeo. Gallardo rekonis lin preterpasante.

— Malbenaĵo! — li diris ridante sub sia masko —. Oni ne atentos pri mi. Ĉi tiun nokton nur lin oni aplaŭdados.

Li estis kapitano (60) Kaprido; cigana kantisto, kiu ĵus alvenis tiun matenon el Parizo mem, plenumante militistan devon por komandi siajn soldatojn.

Ne obei tiun disciplinan alvokon egalvaloris rezigni la kapitanan titolon. kiun montris Kaprido sur ĉiuj afiŝoj de la muzikkafejoj de Parizo, kie li kantadis kaj dancadis kun siaj filinoj. Ili estis, kvazaŭ graciaj lacertetoj bele viglaj, grandokulaj, kun alloganta malgraseco kaj diabla moviĝemo, per kiu ili frenezigis la virojn. Tiu plej aĝa ja prosperis, ĉar ŝi estis forkurinta kun princo kaj la Parizaj gazetoj temis dum kelkaj tagoj pri la malespero de "la brava oficiro de la hispana armeo", kiu deziris lin mortigi por venĝi sian honoron, kaj eĉ oni komparis lin kun Don Kiĥoto (61). En bulvarda teatro estis ludata opero pri tiu forkapto je la ciganino, kun toreadoraj dancoj, monaĥaj ĥoroj kaj ĉiuj ceteraj, "tipaj" scenoj el Hispanlando. Kaprido fine toleris tiun eksterleĝan bofilon, akceptante liajn monkompencojn kaj daŭrigis siajn ĉiutagajn dancojn en Parizo kun la restantaj filinoj, atendante alian riĉan altrangulon. Lia kapitana posteno dirigis multajn nehispanojn, kiuj kredis koni "ĝuste" ĉion okazantan en la mondo. "Ha Hispanujo!... Degenerita lando, kiu ne pagas siajn bravajn militistojn kaj devigas al la noblaj oficiroj prezenti iliajn filinojn en teatra scenejo...

Kiam Sankta Semajno proksimiĝis, kapitano Kaprido ne povis rezignacie foresti Seviljon kaj adiaŭis siajn filinojn kun mieno de maltolerema kaj severa patro.

— Filinoj, mi foriras. Kondutu bone. Agu serioze kaj dece... La roto atendas min. Kion ĝi dirus, se ĝia kapitano forestus?

Kaj li ekvojaĝis de Parizo al Seviljo, pensante fiere pri siaj patro, avo kaj praavoj, estintaj kapitanoj de *Macaren'aj* "judoj" kaj pri si mem, kiu liveris novan gloron al ĉi tiu heredaĵo el siaj antaŭuloj.

Okaze de loto por Nacia Loterio li gajnis dekmil pesetojn kaj ĉi tiun monkvanton li tute destinis por aĉeti "uniformon" indan je lia posteno. La kvartalaj virinoj rapidis por rigardi de proksime la kapitanon disradiantan lumon el la amaso da oraj brodaĵoj, el sia polurita, metala kiraso kaj el tiu bela kasko, de kiu pendis akvofale granda, blanka plumaro, kaj sur kies pura ŝtalo rebrilis ĉiuj

procesiaj lumoj. Tio estis ja ornama fantazio inda je ruĝhaŭtulo, princa kostumo, pri kiu revus ebria araŭkano. La virinoj prenis lian veluran jupeton por admiri de proksime ĝiajn brodaĵojn: najloj, marteloj, dornoj, ĉiuj aferoj rilatantaj la turmentadon kaj mortigon je Kristo. Liaj botoj ŝajnis tremi ĉiupaŝe pro la ekbriloj de metallentetoj, kaj falsaj gemoj kovrantaj ilin. Sub la kaskaj plumoj, kiuj eĉ pli rimarkigis lian afrikan brunecon, elmontriĝis grizaj, ciganaj vangoharoj. Ĉi tio ne estis ja militista ornamaĵo; la kapitano mem ĝin noble konfesis; sed li poste reiros Parizon kaj lia arto trudis al li tiun vizaĝoferon.

Li turnis sian kapon brave fiere, fiksante sian aglan rigardon sur siajn legianojn.

— Nu, la roto bone kondutu!... Oni agu dece kaj discipline!

Kaj li ordonis komande tra siaj difektitaj dentoj per tiu raŭka kaj kanajla voĉo mem, per kiu ardigis siajn filinojn sur la kafejaj estradoj.

La roto antaŭeniris, paŝante laŭ la malrapida takto de ĝia tamburo. En ĉiu strato estis kelkaj trinkejoj kaj ĉe iliaj pordoj, gajaj viroj kun postenigita ĉapelo kaj malfermita veŝto, kiuj jam forgesis la nombron da vinglasoj de ili trinkitaj por "sin konsoli pri la turmentado kaj morto de Jesuo".

Kiam ili vidis la imponan militiston, salutis lin kaj lin invitis de malproksime trinki glason da bonodora, sukcenkolora vino. La kapitano kaŝis sian trinkdeziron, direktante flanken sian rigardon kaj eĉ pli rigidiĝante en sia metala korsaĵo. Se li ne deĵorus nun!...

Kelkaj eĉ kuraĝis iri al li kaj meti la vinglason sub lian pluman akvofalon por tenti lin per ĝia parfumo; sed li, "nedelogebla rotestro", posteniĝis, direktante kontraŭ ilin sian spadpinton. Devo ja estas devo. Ĉi tiu jaro ne estos kiel la antaŭaj, ĉe kiuj la roto post ne longe de sia eliro iris sen ordo per ŝanceliĝantaj kruroj kaj netakte paŝante.

Tiel la iro tra la stratoj fariĝis vera turmento por kapitano Kaprido. Varmo ĝenis lin sub lia armilaro; disciplino certe ne malaperos pro iomete da vino. Kaj li akceptis glason kaj poste alian, kaj post malmulte da tempo lia tuta armeo iris kun nekompletaj vicoj, semante sian vojon per soldatoj, kiuj prokrastis en la apudaj trinkejoj sian revenon al la roto.

La procesio iris malrapidege, kiel ĉiam, ĉar haltis dum kompletaj horoj en stratkruciĝoj. Tempo ne premis. Estis la dekdua nokte kaj *Macarena* ne revenos hejmen ĝis la dekdua de la venonta mateno, bezonante por trairi la urbon pli multe da tempo, ol por vojaĝi de Seviljo ĝis Madrido.

Unue antaŭeniris granda soklo titolita "Juĝo je Jesukristo", sur kiu estis multenombraj figuroj, prezentante Pilatus'on sidanta sur ora trono kaj ĉirkaŭata de romanaj soldatoj kun diverskoloraj jupetoj kaj supre ornamita kasko, kiuj gardis malgajan Jesuon pretan iri en turmenton, portantan robon el purpura veluro superŝutita per brodaĵoj kaj tri orajn, rondajn plumarojn, kiuj imitis diajn

radiojn, ĉirkaŭante nimbe lian dornekronitan kapon. Malgraŭ tio ke ĉi tiu soklo surhavis tiel abundajn figurojn kaj ornamaĵojn, ne vekis atenton, kvazaŭ neniigite de tiu alia venanta tuj poste: la reĝino de la popolaj kvartaloj, miraklema Virgulino Espero, *Macarena*.

Kiam eliris el Sankta Ĝilo la rozvanga, longokulhara Virgulino sub tremanta baldakeno el veluro kaj lulate pro la movo de siaj kaŝitaj portistoj, surdiganta aklamado eksplodis el la popolamaso, kiu plenigis la placeton... Nu, kiel ŝi estas bela! Ŝi neniam maljuniĝas!

La riĉega, grandega mantelo kun dikaj, oraj brodaĵoj, kiuj imitis retajn maŝojn, etendiĝis post la skulptaĵa soklo, kvazaŭ falinta vosto de giganta pavo. Brilis ŝiaj vitraj okuloj, kiel se ili larmus pro emocio, respondante la aklamadon de la kredantoj, kaj al tiu brilo kuniĝis fulmado de juveloj, kiuj kovris ŝian korpon, konsistigante kvazaŭ alian vestaĵon el oro kaj gemoj sur tiu el brodita veluro. Ili estis centoj, eble miloj. Ŝi ŝajnis malsekigita de pluvo de lumaj gutoj, el kiuj konstante ekbrilis ĉiuj ĉielarkaj koloroj. De ŝia kolo pendis fadentraboritaj perlovicoj, oraj ĉenoj kun dekduoj da ringoj disĵetantaj, kiam moviĝis, ravajn eklumojn. Ŝia robo kaj antaŭa parto de la mantelo estis tute kovritaj per oraj poŝhorloĝoj fiksitaj per pingloj, orelringoj kun smeraldoj kaj briliantoj, ringoj kun grandegaj gemoj, kvazaŭ lumaj ŝtonoj. Ĉiuj kredantoj sendis siajn juvelojn por ornami *Macarena'n* dum procesio. Virinoj ĉi tiun nokton je religia ĉagreno portas neniun ornamaĵon ĉe siaj manoj kaj estas kontentaj, tial ke Dipatrino portas la karajn juvelojn, pro kiuj ili tiom fieras. La publiko konas la juvelaron, ĉar ĉiujn jarojn ĝin vidis kaj rimarkas la novaĵojn. Tio, kion montras Virgulino sur sia brusto pendantan de ĉeno, estas de Gallardo la toreadoro. Sed aliaj aferoj ankaŭ estis admirataj de la popolo. Virinoj rigardadis ravite du grandegajn perlojn kaj vicon de ringoj. Ili estis de junulino el la kvartalo forvojaĝinta en Madridon antaŭ du jaroj kaj, tial ke ŝi estis piulino de *Macarena*, revenis por ĉeesti tiun feston kune kun maljuna sinjoro. Kia bonsorta knabino!...

Gallardo, kun kaŝita vizaĝo kaj sin apogante sur la aŭtoritata bastono, iris antaŭ la virgulina skulptaĵo kun la asociaj ĉefuloj. Aliaj kapuĉuloj portis longajn trumpetojn ornamitajn per verdaj tukoj kun aro de pendantaj orfadenetoj ĉe iliaj randoj. Ili metis la blovinstrumentajn buŝetojn en truon de sia masko kaj korŝiranta trumpetado, turmenta sonado ekrompis silenton. Sed tiu terura muĝado neniel efikis ĉe la aŭdantoj, pensigante ilin pri morto. Tra la flankaj stratetoj mallumaj kaj senhomaj blovis printempa zefiro portanta ĝardenajn parfumojn, odoron el oranĝoj kaj floroj de terpotoj laŭvice lokitaj trans kradoj kaj balkonoj. La nokta ĉielo heliĝis per arĝenta lumo de la luno, kiu aperis el nuboj, montrante sian ĝojan vizaĝon inter tegmentaj randoj. Tiu funebra procesio ŝajnis iri kontraŭ Naturo kaj tial iom post iom ĝi perdis sian malgajan mienon. Vane la trumpetoj ĝemis primortajn plendojn kaj la kantistoj ploris per siaj religiaj kan-

tatoj kaj paŝis solene kun ekzekutista aspekto tiuj timindaj soldatoj de Romo. Printempa nokto ridis, disigante mildajn parfumojn. Neniu ja povis memori pri morto.

Ĉirkaŭ Virgulino iris tute senorde la entuziasmemaj macarenanoj; legomkulturistoj el la urbaj ĉirkaŭaĵoj kun siaj malbone kombitaj edzinoj, kiuj trenis vicon de infanoj por ekskursi procesie ĝis la sunleviĝo. Junuloj el la kvartalo kun novaj ĉapeloj kaj hartufoj sur siaj oreloj, svingadis bataleme pezajn bastonojn, kiel se iu intencus malrespekti la belan Madonon kaj estus necese, ke ili ŝin defendu. Ĉiuj iris konfuze, sin premante en la mallarĝaj stratoj inter la grandega, Virgulina soklo kaj la dommuroj, sed per siaj okuloj fikse rigardadis la skulptaĵon, parolante al ĝi, laŭdante ŝian virinan belecon kaj ŝian mirakleman potencon per tiu nekonscio kaŭzata de vino kaj de ilia vigla kaj birda pensado.

— Hura *Macarena!*... Plej bela Virgulino el la mondo!... Tiu, kiu senvaloriĝas la aliajn Virgulinojn!...

Ĉiujn kvin paŝojn haltis la sankta skulptaĵo. Estis nenecese rapidi; restis ankoraŭ multe da tempo. Oni postulis, ke Virgulino haltu antaŭ multajn domojn por satvidi ŝin. Ĉiu trinkeja mastro petis ankaŭ, ke ŝi ripozu antaŭ lia butiko, ĉar li tion rajtas, tial ke estas kvartalano.

Homo venis de la alia stratflanko kaj diris al la bastonportantaj kapuĉuloj antaŭe irantaj.

— Nu! haltu!... Ĉi tie estas la plej lerta kantisto el la mondo kaj deziras ĵeti kantsagon al Virgulino.

"La plej lerta kantisto el la mondo", sin apogante sur amiko, per ŝanceliĝantaj kruroj kaj donante al la alia sian glason, antaŭeniris ĝis la skulptaĵo, tusis kaj komencis kanti per raŭka voĉo tute nekomprenebla pro ĝiaj abundaj triloj. Nur estis klare, ke li kantis al la patrino, al Dipatrino, kaj, kiam li diris tiun vorton, lia voĉo fariĝis tremanta pro emocio, pro tiu sentemo de la popola poezio, kiu trovas siajn plej sincerajn inspirojn ĉe la patrina amo.

Ankoraŭ la kantisto ne estis atinganta la mezon de sia malrapida kantato, kiam alia voĉo eksonis kaj poste alia, kiel se estus muzikkonkuro kaj la strato pleniĝis per nevideblaj birdoj; kelkaj raŭkaj kun ektremoj de rompiĝinta pulmo, aliaj kriemaj kun traboranta altega sono, kiu pensigis pri ruĝa, ŝvelinta kaj preskaŭ krevanta gorĝo. La plimulto da kantantoj estis kaŝataj inter la popolamaso, ĉar ilia simpla pieco ne bezonis paradi, kiam ĝi eksplodis entuziasme; aliaj, fieraj pri sia voĉo kaj "stilo", deziregis elmontriĝi, sin metante mezen de la strato antaŭ sanktan *Macarena'n.*

Malgrasaj knabinoj kun malgracie falanta jupo kaj tre oleita hararo krucis siajn manojn sur sia maldika ventro kaj, fikse rigardante la okulojn de Sankta Madono, kantis per malfortaj voĉetoj pri la patrina doloro, kiam ŝi vidis sian filon sanganta kaj ŝanceliĝpaŝanta pro la kruca pezego.

tiu sudlandana ardeco dramatika, kiam ĝi montriĝas. Liaj kamaradoj kompatis lin, tute ne pensante ridi pro lia pentopuno, kaj prezentis al li glasojn kun vino. Li certe krevos pro lacego: li bezonas sensoifigi sin: tio ne estis ja moko, sed kamarada helpemo.

Sed li forigis sian rigardon de ilia invito, ĝin turnante al Virgulino, por ke ŝi atentu lian turmentadon. Jam li trinkos la morgaŭan tagon sen iu ajn timo, post kiam li lasos *Macarena'n* bone gardata en ŝian preĝejon.

La sankta skulptaĵo restis ankoraŭ ripozante en strato de kvartalo Foiro kaj jam la procesia kapo atingis la urban centron. La verdaj kapuĉuloj kaj la "armitoj" antaŭenırıs per batalema ruzeco, kiel armeo iranta ataki. Ili volis alveni apud Sonorilon, antaŭ ol alia ajn religia asocio, por okupi la enirejon de strato Serpentoj. Se la armea kapo sukcesos atingi ĉi tiun lokon, ili povos trankvile atendi, ke ilia Virgulino alvenos. Macarenanoj ĉiujn jarojn mastriĝis je tiu fama strato kaj bezonis kelkajn horojn por ĝin trairi, ĝuante pro la senpaciencaj protestoj de la asocianoj el aliaj kvartaloj; malsuperaj gentoj, kies sanktaj, skulptitaj bildoj tute ne estis kompareblaj al tiu de *Macarena,* kaj kiuj kaŭze de sia malgraveco devis humile atendi post ili.

Sonis la tamburo de la trupo de kapitano Kaprido ĉe la enirejo de strato Sonorilo samtempe, kiam aperis el alia flanko la nigraj kapuĉuloj de alia religia asocio, dezirante same rajti pasi unue. La popolamaso svarmis scivole inter ambaŭ procesiaj kapoj. Jen estos batado!... La nigraj kapuĉuloj ne multe respektis la "judojn" nek ilian teruran kapitanon. Ĉi tiu siaparte volis resti en malvarma supereco. La armeo devas ne partopreni bataletojn inter nemilitistoj. La macarenanoj eskortantaj la procesion estis, kiuj, por glorigi sian kvartalon, atakis la nigrajn "nazaretanojn", kaj komenciĝis batado per bastonoj kaj kandelegoj. Kuris la policanoj kaj arestis du junulojn plendantajn pro perdo je siaj ĉapeloj kaj bastonoj, dum oni kondukis en apotekon kelkajn senkapuĉajn "nazaretanojn", kiuj metis dolore siajn manojn surkapen.

Dume kapitano Kaprido ruze, kiel konkeranto, strategie antaŭenigis "siajn trupojn", okupante Sonorilon ĝis la enirejo de strato Serpentoj, akompanate de la tamburisto, kiu rapidis sian batadon per brua kaj triumfa gajeco, meze de aklamado de la bravaj helpantoj el la kvartalo "Ĉi tie okazis nenio! Vivu Virgulino *Macarena!...*"

Strato Serpentoj ŝajnis salonego pro siaj balkonoj tute plenaj je personoj, grandaj, elektraj lampoj pendantaj de kablo inter ambaŭ muroj, ĉiuj kafejoj kaj butikoj lumigataj kaj kun siaj fenestroj okupataj de multego da kapoj kaj vicoj de seĝoj apud la muroj, ĉe kiuj la personaro amasiĝis, sin suprenigante sur la sidiloj ĉiufoje, kiam malproksima trumpetado kaj tamburado anoncis, ke sankta skulptaĵo venas.

Tiun nokton neniu dormis en la urbo. Eĉ la timemaj maljunulinoj, ĉiam res-

tantaj hejme de post la rozaria horo, maldormas nun por rigardadi ĉirkaŭ la tagiĝo, kiel la nenombreblaj procesioj preterpasas.

Jam estis la tria nokthoro kaj nenio rimarkigis tian malfruecon. La personoj manĝis en kafejoj kaj trinkejoj. Tra la pordoj de la fiŝfritejoj eliĝis odoro de bolanta oleo. Meze de la strato restis kolportistoj, anoncante frandaĵojn kaj trinkaĵojn. Kompletaj familioj nur elmontriĝantaj strate en ĉi tiuj gravaj festoj estis tie de la dua posttagmeze, vidante kiel preterpasas senfina nombro da procesioj, virgulinaj manteloj treege luksaj, kiuj admire ekkriegis pro sia grandeco, kristoj ore kronitaj kaj vestitaj el orŝtofo, tuta mondo el absurdaj skulptobildoj, ĉe kiuj akre kontrastis ĝiaj tragedie sangantaj aŭ ploretantaj vizaĝoj kun tiuj riĉegaj, teatre luksaj vestaĵoj.

La fremduloj, altirite de tiu stranga, kristana ceremonio gaja, kiel greka politeisma festo, ĉe kiu estis neniu alia dolora aŭ malgaja gesto ekster tiu de ĝiaj skulptaĵoj, aŭdis ĉi ties nomojn al la seviljanoj sidantaj apud ili.

Preterpasis la procesiaj skulptaĵoj Sankta Dekreto, Sankta Silenta Kristo, Sankta Suferanta Madono, Jesuo kun Kruco sur Ŝultro, Sankta Madono de la Valo, Nia Patro Jesuo Trifoje Falanta, Sankta Larmanta Madono. Nia Patro Bonan Morton Liveranta kaj Sankta Madono Trinecesa kaj tiuj skulptitaj bildoj iris akompanate de nigraj, blankaj, ruĝaj, verdaj, bluaj kaj violkoloraj "nazaretanoj", ĉiuj maskitaj kaj kaŝantaj sub la akrepintaj kapuĉoj sian misteran personecon, el kiu nur ĝiaj okuloj montriĝis tra la maskaj truoj.

La pezaj sokloj antaŭeniris malrapide kaj pene pro la strata mallarĝeco. Kiam ili eliris el tiu embarasa pasejo kaj alvenis en placon Sankta Francisko antaŭ la estradojn starigitajn apud la Urbodomo, la sanktaj skulptaĵoj turniĝis, ĝis tio ke rezultis fronte al ili, kaj salutis per genuflekso de siaj portistoj la altrangajn fremdulojn kaj reĝajn familianojn, kiuj venis ĉeesti tiun ĉi feston.

Apud la skulptaĵaj sokloj iris viroj portante kruĉon kun akvo. Apenaŭ la sankta bildo haltis, leviĝis pinto de la velura jupo kaŝanta la internon kaj dudek aŭ tridek homoj aperis ŝvitante, malpuraj pro laceco, duonnudaj, kun tukoj ligitaj ĉirkaŭ la kapo kaj aspekto de laciĝintaj sovaĝuloj. Ili estas la "galicanoj", la fortaj portistoj, kiujn oni nomas per tiu geografia nomo, kiu ajn estas ilia regiona deveno, kiel se la enlandanoj sin kredus taŭgaj por neniu laciga kaj multedaŭra laboro. Ili trinkis avide akvon kaj, se trinkejo estis proksima, malobeis sian estron postulante vinon. Ili estas devigataj resti en tiu kaŝejo dum multaj horoj kaj tial manĝas kaŭrante kaj faras aliajn korpajn necesojn. Multajn fojojn, kiam la sankta skulptaĵo malproksimiĝas post longa restado, la popolamaso ridas vidante tion, kio aperis sur la pura pavimo; restaĵoj devigantaj al la urbaj balaistoj kuri kun korboj.

Ĉi tiu lacigante luksa pasado, fluo el porteblaj eŝafodoj kun kadavraj vizaĝoj kaj blindige brilaj vestaĵoj, daŭras frivole, gaje, teatre, dum la tuta nokto. Vane

la trumpetoj ĝemas funebre plorante la plej famkonatan el mondaj maljustaĵoj, la malhonorintan mortigon je Dio. Naturo tamen ne estas kortuŝata kaj ne konsentas kun tiu tradicia ĉagreno. La rivero daŭrigas sian ĉiaman murmureton sub la pontoj kaj sternas helan tukon inter la silentaj kampoj; la nokte parfumantaj orangarboj malfermas siajn milojn da blankaj buŝetoj, disigante en la aero karne voluptan odoron; la palmoj lulas siajn kvazaŭfontanojn el plumoj, sur la arabaj, fortikaĵaj muroj de Alkazaro; *Giralda* (62), blua fantomo, staris kaŝante ĉielpecon post sia gracia grandeco; kaj parfumebria luno ŝajnis rideti al la tero ŝvelanta pro printempa suko, al tiuj lumstrioj de la urbo, en kies ruĝeta fundo svarmis kontenta je la vivo formikaro, kiu trinkadis kaj kantadis, trovinte pretekston en malproksima morto por senĉese festi.

Jesuo estis mortinta: tial virinoj sin vestis nigre kaj viroj sin maskis per roboj kaj akrepintaj kapuĉoj, kiuj aspektigis ilin, kiel strangaj insektoj; la kupraj trumpetoj tion proklamis per teatraj plendoj; la temploj tion sciigis per sia malhela silento kaj nigraj vualoj sur siaj pordoj... Kaj la rivero daŭrigis sian murmurantan, idilian sopiradon, kvazaŭ ĝi invitus la gefianĉajn parojn sidiĝi sur ĝiajn bordojn, kaj la palmoj balancetis indiferentaj siajn kapojn super la fortikaĵaj turetoj; kaj la orangarboj dissendis sian tentantan parfumon, kiel se ili nur akceptis la majeston de la amo, kiu kreas la vivon kaj metas en ĝi ĉarmon; kaj la luno ridetis gaje; kaj la bluigata de la nokto turo malaperis en la misteran altecon, eble pensante per tiu simpla animo propra al materiaj aĵoj, ke homaj ideoj ŝanĝiĝas laŭ la temppasado kaj ke tiuj ĝin konstruintaj kredis ja pri tute aliaj diaĵoj, ol la nunaj.

La homamaso svarmis en strato Serpentoj per gaja scivolo. La sanktaj skulptaĵoj de *Macarena* nun konsistigis kunigitan procesion kaj antaŭeniris akompanate de muzikistaro. La tamburoj furioze sonadis, muĝis laŭtege la trumpetoj, kriis la bruega macarenana amaso kaj la personoj stariĝis sur la seĝoj por pli bone vidi tiun bruan kaj malrapidan pasadon.

Plenigis la stratmezon liberkolaj junuloj, svingante siajn bastonojn kaj aklamante Virgulinon. Malkombitaj kaj mizere vestitaj virinoj agitis siajn brakojn, sin konsciante en la centro de Seviljo, en strato Serpentoj, tra kiu nur malofte ili iris, kaj rigardataj de plej altrangaj personoj de la urbo.

La malriĉaj gemacarenanoj deziregis sin venĝi en ĉi tiu eksterordinara nokto kaj ĉiuj kriegis al la riĉuloj, kiuj plenigis la kafejojn, al la altranguloj kuniĝintaj en la kluboj:

— Jen estas gemacarenanoj! Venu ĉiuj vidi plej bonan aferon el la mondo! Vivu nia Virgulino!

Kelkaj virinoj tiris sian edzon irantan per mallevita kapo kaj fleksitaj kruroj post tri horoj da procesia marŝado. Ni iru hejmen!... Sed la ŝanceliĝanta macarenano kontraŭdiris per vinodoranta voĉo:

— Lasu min. Mi volas antaŭe trinki pokaleton honore al la Brunulino.

Kaj, post kiam li tusis kaj metis manon sur sian gorĝon, fikse rigardante la skulptaĵon, li ekkomencis kanti per obtuza voĉo nur aŭdebla de li mem, ĉar ĝi malaperis pro tiu bruega miksaĵo el muzikoj, krioj, trumpetado kaj aklamoj. Frenezeco regis en la mallarĝa strato, kiel se ebria, barbara trupo ĵus invadis ĝin. Cento da voĉoj kantadis samtempe, ĉiu el ili per malsama ritmo kaj tono. Palaj kaj ŝvitantaj junuloj, kvazaŭ estus tuj mortontaj, antaŭeniris ĝis la sankta skulptaĵo kun perdita ĉapelo, malbutonita veŝto, sin apogante mole sur ŝultroj de du kamaradoj kaj kantis al Virgulino per agonia voĉo. Ĉe la stratenirejo, sur la Sonorilaj trotuaroj restis kelkaj macarenanoj kuŝante kun vizaĝo al tero, kiel se ili estus la mortigitoj de glora militekskurso.

Apud la kafeja pordo Naciao rigardadis kun sia tuta familio la preterpasadon de la religia asocio. "Superstiĉo kaj malprogreso!..." Sed li laŭ ĝenerala kutimo venis ĉiujn jarojn por ĉeesti, kiel la bruemaj gemacarenanoj invadis straton Serpentoj.

Li tuj rekonis Gallard'on pro lia gracia alteco kaj la toreadora, brava sintenado, per kiu li portis la inkvizician vestaĵon.

— Joĉjo: haltigu la skulptaĵon. Estas en la kafejo aliurbaj sinjorinoj dezirantaj bone vidi *Macarena'n.*

Restis nemove la sankta soklo; la muzikistaro ekludis gracibravan marŝon el tiuj, kiuj gajigas la publikon en la taŭraj cirkoj kaj tuj la kaŝitaj portantoj je la skulptaĵo komencis levi samtempe iun kruron, poste la alian, dancante per movoj, kiuj akre balancis la sanktegan bildon, puŝante la homamason kontraŭ la murojn. Virgulino kun sia tuta ŝarĝo je juveloj, floroj, lanternoj kaj eĉ kun la peza baldakeno, dancis laŭ la muzika ritmo. Ĉi tio estis antaŭprovita spektaklo, pri kiu la macarenanoj fieris; fortaj junuloj el la kvartalo, preninte la soklan randon, ĝin subtenis, samtempe ke ili kriis arde pro tiu parado de forto kaj lerteco:

— Venu ĉiuj seviljanoj vidi ĉi tion!... Tio ĉi estas ja belaĵo! Nur macarenanoj kapablas fari tion ĉi...

Kaj, kiam la muzikistaro silentis, ĉesis la balancado kaj restis nemove la sankta skulptaĵo, tondra, malpia kaj malĉasta aklamo eksonis kun naiva entuziasmo. Ili huris al Sanktega *Macarena,* plej bela el ĉiuj ekzistantaj Virgulinoj, kiu malŝatas ĉiujn ceterajn konatajn kaj nekonatajn.

La religia asocio daŭrigis sian triumfan marŝadon, postlasante asocianojn en ĉiuj trinkejoj kaj falintojn en ĉiuj stratoj. Kiam la suno aperis, trovis ĝin tre malproksime de ĝia paroĥo, en la kontraŭa ekstremo de Seviljo, brilegigante per siaj unuaj radioj la surveston el juveloj de la skulptaĵo kaj lumigante la palegajn vizaĝojn de la popola eskorto kaj de la "nazaretanoj", kiuj estis demetintaj sian maskon. La skulptita bildo kaj ĝiaj akompanantoj ŝajnis tiam diboĉema trupo venanta el orgio.

nekonebla kapo, preskaŭ krevinta pro pafo tute apude farita. Estis neeble rekoni lin, sed liaj vestaĵoj, karabeno kaj ĉio cetera supozigis, ke li estas Plumeto.

Gallardo aŭskultis silente. Li ne vidis la banditon post sia taŭratingo, sed simpatie memoris pri li. Liaj bienanoj al li diris, ke dum lia danĝera stato la rabisto iris du fojojn en *Rinconada'n* por demandi pri lia farto. Poste, kiam li loĝis en la bieno kun sia familio, kelkefoje paŝtistoj kaj terlaboristoj parolis al li mistere pri Plumeto; kiu, tial ke renkontis ilin sur vojo kaj sciiĝis, pri tio ke ili estas el *Rinconada*, sendis saluton al sinjoro Johano.

Malfeliĉulo! Gallardo lin sincere kompatis, memorante liajn antaŭdirojn. Ne mortigis lin la ĝendarmaro. Oni lin murdis dum lia dormo. Li pereis per krimo de iu el siaj, de banditemulo, de iu el tiuj, kiuj venis poste, puŝante avide por atingi famon.

La dimanĉon lia ekiro al la cirko estis pli malĝojiga, ol alifoje. Karmeno klopodis sin montri trankvila kaj eĉ ĉeestis, kiam Strekaro vestis la majstron. Ŝi ridetis per dolora rideto: ŝi penis ŝajni gaja, ĉar kredis rimarki, ke ŝia edzo ankaŭ estas priokupata kaj intencis same afekti ĝojon. Sinjorino Angustio iris ĉirkaŭ la ĉambro, dezirante rigardadi plu sian Joĉjon, kiel se ŝi estus nepre perdonta lin.

Kiam Gallardo iris en la korton kun la ludbatala ĉapo surkapigita kaj la mantelo sur ŝultro, la patrino ĉirkaŭis plorante lian kolon per siaj brakoj. Ŝi diris nenion, sed ŝiaj bruaj sopiroj klare konigis ŝiajn pensojn. Nu, ludbatali unuafoje post sia malfeliĉaĵo en tiu cirko mem, kie li estis vundata!... Ŝi pro sia popolvirina superstiĉo ribelis kontraŭ tia malsingardemo. Ve, kiam vi lasos tiun malbenitan profesion! Ĉu vi ankoraŭ ne havas sufiĉe da mono?...

Sed la bofrato partoprenis aŭtoritate, kiel grava, familia konsilisto: "Nu, panjo, tio ne estas tiel grava afero. Taŭrfesto same riska, kiel la aliaj. Kio konvenas, estas lasi trankvila Johanon, ne forigi el li memfidon en la momento iri al la cirko".

Karmeno estis pli kuraĝa. Ŝi ne ploris kaj akompanis sian edzon ĝis la pordo; ŝi deziris lin animi. Plie, de kiam ilia reciproka amo renaskiĝis kaŭze de lia malfeliĉaĵo kaj ambaŭ vivadis trankvile, sin amante multe unu la alian, ŝi ne kredis, ke nova malbonaĵo malhelpos ilian feliĉon. Tiu taŭratingo estis ja ago de Dio, kiu multfoje liveras bonon, ĝin ĉerpante el malbono, kaj volis kunigi ilin per dolora okazaĵo. Johano certe ludbatalos same, kiel aliajn fojojn, kaj revenos hejmen tute sana.

— Bonsorto vin trafu!

Kaj ŝi rigardadis per amaj okuloj la veturilon, kiu malproksimiĝis sekvate de grupo de ravataj buboj envie rigardantaj la toreadorajn brilaĵojn. Kiam la malfeliĉulino restis sola, ŝi supreniris en sian ĉambron kaj ekflamigis kandelojn antaŭ bildo de Virgulino Espero.

Naciao veturis apud sia majstro kun kunigitaj brovoj kaj priokupata mieno.

Tiun dimanĉon okazis balotado, sed liaj kamaradoj el la bando eĉ ne sciiĝis pri tio. Oni nur parolis ĉie pri la morto de Plumeto kaj pri la tuja taŭrfesto.

La pikiletisto restis ĝis posttagmeze kun la aliaj komitatanoj, "laborante por sia idealo". Malbenita taŭrfesto, kiu interrompas lian agon de bona civitano kaj malhelpas, ke li voĉdonigos kelkajn amikojn, kiuj ne partoprenas balotadon, se li ne iras serĉi ilin por tio! Nur la partianoj iris en balotejojn: la urba loĝantaro ŝajnis nescii, ke okazas voĉdonado. Strate estis grandaj grupoj arde diskutante, sed tie oni nur parolis pri taŭroj. Kia landa karaktero!... Naciao indignis, memorante la trompojn kaj perfortojn de la malamikoj helpataj de tiu soleco. Don Joseĉjo, kiu protestis per sia tuta, oratora elokvento restis en malliberejo kune kun aliaj amikoj. La pikiletisto deziris esti ankaŭ arestata kun ili, sed li devis ilin forlasi por sin meti la lumveston kaj iri serĉi la majstron. Kaj ĉi tiu ago kontraŭ la civitanoj, ĉu restos sen puno? Kaj la popolo, ĉu ne ribelos?...

Kiam la veturilo pasis proksime al Sonorilo, la toreadoroj vidis grandan popolamason, kiu svingis bastonojn, kriegante ribele. La policistoj per sabro ĉe mano atakis ilin, ricevante bastonbatojn kaj kontraŭbatante per siaj sabroj.

Naciao leviĝis de sia sidloko kaj volis sin ĵeti malsupren el la veturilo. Ha fine! La momento alvenis!...

— Jen la revolucio! Jam eksplodis ribelo!

Sed la majstro duonridante-duonkolere residigis lin per puŝo.

— Ne estu malsaĝa, Sebastiano. Vi nur vidas ĉie revoluciojn kaj sensencaĵojn.

La bandanoj ridis, ĉar divenis la veron. Tio estis la nobla popolo indignanta, ĉar ĝi ne trovis enirbiletojn por la taŭrfesto en la fenestreto de Sonorilo kaj deziris ataki kaj bruligi ĝin; kion la policanoj baris, repuŝante la amason... Naciao mallevis malgaje sian kapon.

— Reakcio kaj malprogreso! Ne scii legi nek skribi!

Ili alvenis en la cirkon. Per brua ovacio, per senfina aplaŭdado oni akceptis la ĉeeston de la toreadoraj bandoj en la areno. Ĉiuj aplaŭdoj estis por Gallardo. La publiko salutis lian unuan aperon tie post lia terura taŭratingo, kiu dum tiom multe da tempo estis grava temo en la tuta Hispanlando.

Poste, en la momento, kiam Gallardo estis tuj mortigonta sian unuan taŭron, entuziasmo reeksplodis. La virinoj kun blanka mantilo rigardadis lin de siaj loĝioj per binoklo; ĉe la sunaj benkaroj oni aplaŭdis kaj aklamis lin same, kiel ankaŭ ĉe tiuj ombraj. Eĉ la malamikoj estis puŝataj de tiu simpatia blovo. Malfeliĉulo! Li tiom multe suferis!... La tuta publiko estis al li favora.

Gallardo neniam trovis amason tiel amike inklinan al li.

Li demetis sian ĉapon antaŭ la prezidejo por honore promesi la taŭron. Hura! Hura! Ĉiuj aŭdis nenion el lia diro, sed tamen ili entuziasmiĝis. Certe li diris tre belajn aferojn. Kaj oni daŭrigis la aplaŭdadon, dum li iris al la taŭro, ĉesante pro emocio en la momento, kiam oni vidis lin proksima al la bravbesto.

Li etendis la ruĝtukon, restante antaŭ la taŭro, sed iom malproksime, ne kiel aliajn fojojn, kiam li ardigis la publikon, ĉar malvolvis la ruĝan tukon preskaŭ sur la bestan nazpinton mem. Oni rimarkis ĉe la publiko ian movon pro miro, sed neniu diris ion. Kelkfoje frapis Gallardo la teron per piedo por inciti la beston, kaj ĉi tiu fine atakis milde kaj apenaŭ pasis sub la ruĝtuko, ĉar la toreadoro rapidis flankeniĝi tro frue. Multaj ĉeestantoj sin rigardis reciproke per demandaj okuloj. Kio estas tio?...

La spadulo vidis apud si Naciaon kaj iom pli malproksimen alian pikiletiston el sia bando, sed nun ne kriis "Ĉiuj for!".

El la benkaroj eliĝis murmuro produktata de interparoloj. La spadulaj amikoj opiniis konvene klarigi en la nomo de sia idolo:

— Li ankoraŭ estas netaŭga. Konvenus al li ne ludbatali. Tiu kruro!... Ĉu vi ne rimarkas tion?

Ambaŭ pikiletistoj helpis la spadulon per siaj manteloj dum liaj pasmovoj. La bravbesto moviĝis konfuzate inter tiuj ruĝaj ŝtofoj kaj apenaŭ atakis la matadoran ruĝtukon; ĝi ĉiam sentis, ke flugas apud ĝi mantelo de alia toreadoro, kiu ĝin altiras for de la spadulo.

Gallardo, kiel se deziris baldaŭ fini ĉi tiun situacion, rektiĝis kun la spado alte kaj sin ĵetis kontraŭ la taŭron.

Oni akceptis tiun strangan agon per mira murmuro. La spado penetris malpli, ol trionon, kaj restis balanciĝante kaj tuj foriĝonte el la kolo. Gallardo tro frue malproksimiĝis el la kornoj kaj tial ne enprofundigis la spadon ĝis la tenilo, kiel aliajn fojojn.

— Sed ĝi estas bone metita! — kriis liaj partianoj, montrante la spadon, kaj aplaŭdis bruege por kompensi tiel sian malgrandan nombron.

La ludbatalsciuloj ridetis kompate. Tiu junulo perdis la nuran kvaliton, kiu famigis lin: sian kuraĝon, sian sentimon. Ili vidis, kiel li instinkte fleksis sian brakon en la momento sin ĵeti al la taŭro kun la spado; ili vidis, kiel li turnis sian kapon flanken per tiu tima movo, per kiu la homoj sin blindigas por ne vidi danĝeron.

La spado falis teren kaj Gallardo, preninte alian, reiris al la taŭro, akompanate de siaj pikiletistoj. Naciao estis apud li preta ludi sian mantelon por distri la beston. Krom tio ke liaj muĝaj krioj konfuzis la taŭron kaj devigis ĝin turniĝi, kiam ĝi multe proksimiĝis al Gallardo.

Alia samspeca spadpiko kun pli, ol duono da ŝtalklingo ne enigita.

— Li ne proksimiĝas — komencis protesti la publiko —. Li abomenas la kornojn.

Gallardo etendis ambaŭflanken siajn brakojn por komprenigi la ĉeestantojn lokitajn post li, ke por la besto ja tiu spadpiko sufiĉas kaj, ke ĝi estas certe tuj falonta. Sed la besto restis starante kaj movis sian kapon de iu flanko al alia.

Naciao, ekscitante la taŭron per sia mantelo, ĝin kurigis kaj profitis iajn okazojn por bati per ĝi la bestan kolon tiom forte, kiom lia brako kapablis. La publiko, diveninte liajn intencojn, komencis protesti. Li kurigis la beston, por ke la movado pligrandigu ĝian vundon. Liaj fortaj mantelbatoj celis enprofundigi pli multe la spadon. Oni insulte nomis lin ŝtelisto kaj aludis lian patrinon per malhonorigaj vortoj; oni svingis ĉe la sunbenkaroj minacantajn bastonegojn kaj komencis fali sur la sablon, ĵetite per malica intenco, oranĝoj kaj boteloj; sed li elportis ĉi tiun pluvon de insultoj kaj ĵetaĵoj kaj daŭrigis sian taŭran kurigadon kontenta, ĉar li plenumis devon kaj savis amikon.

La bravbesto subite verŝis grandan kvanton da sango el sia buŝo kaj trankvile fleksis siajn krurojn, restante nemova, sed kun levita kapo, preta stariĝi kaj ataki. La cerbetpikisto proksimiĝis, dezirante fini kiel eble plej baldaŭ kaj forigi la majstron el lia embaraso. Naciao helpis lin, sin apogante sur la spadon kaŝeme kaj premante ĝin ĝis la tenilo.

La suna publiko, vidinte tian agon, stariĝis akre protestante.

— Ŝtelisto! Murdisto!...

Ili indignis je la nomo de la malfeliĉa taŭro, kvazaŭ ĉi tiu ne estus nepre mortonta; oni minacis per pugnoj Naciaon, kiel se ili estus ĵus ĉeestintaj krimon, kaj la pikiletisto kun mallevita kapo fine sin rifuĝis post la barilon.

Gallardo dume iris al la prezidejo por saluti, kaj liaj senkondiĉaj partianoj akompanis lin per aplaŭdado, tiel multe brua, kiel malmulte densa.

— Sorto ne favoris lin — diris ili per fervora, nedetruebla kredo malgraŭ ĉiuj realaĵoj —. Sed, kiel ĝuste direktataj spadpikoj!... Tio estas nediskutebla fakto.

La spadulo restis momente antaŭ la benkaro, kie sidis liaj plej entuziasmaj partianoj, kaj sin apogis sur la barilon, klarigante al ili la okazaĵon. La taŭro estis netaŭga: ekzistis neniu rimedo ludi brile ĝin.

Liaj fervoruloj estrataj de Don Josefo aprobis tiujn klarigojn, kiuj estis tiuj samaj antaŭe diritaj de ili.

Gallardo restis dum granda parto de la taŭrfesto apud la barila ŝtupeto. Tiaj klarigoj taŭgis por la partianoj, sed li interne kruele dubis kaj malfidis pri si mem, kion li antaŭe faris neniam.

La taŭroj ŝajnis al li pli grandaj kaj duoble rezistantaj kontraŭ la morto. Tiujn antaŭajn li renversis per sia spado mirakle facile. Nedubeble oni metis antaŭ lin la plej danĝerajn el tiu taŭrproduktejo, por ke li malsukcesu. Ĉikano el liaj malamikoj.

Alia suspekto moviĝis neklare en la plej profunda kaj malhela loko de lia pensado. Sed li ne volis rigardi ĝin de proksime; lin ne interesis, ĝin kapti el ĝia mistera mallumeco. Lia brako ŝajnis lin malpli longa, kiam li ĝin etendis kun spado direktata antaŭen. Alitempe li atingis per fulma rapideco la taŭran kolon: nun tio estas ja senfina vojaĝo, terura malplenaĵo, kiun li ne scias kiel transpasi.

Liaj kruroj ankaŭ estis alie. Ili ŝajnis vivi sendepende per propra vivpovo. Lia volo neefike ordonis al ili resti kviete kaj reziste, kiel aliajn fojojn. Ili ne obeis. Ŝajnis, kvazaŭ ili havus okulojn kaj vidus la danĝeron, kaj ili saltis tro rapide tuj, kiam eksentis la aerajn ondojn produktatajn de la besta ekpuŝiĝo, sen sufiĉa memfido por atendi.

Gallardo ĵetis kontraŭ la publikon la honton pro sia malsukceso, tiun koleron pro sia subita malforteco. Kion ili deziras? Ĉu tion, ke li sin lasu mortigi nur por plaĉi ilin?... Sufiĉe da postsignoj de senbrida kuraĝo li havas sur sia korpo. Li ne bezonas ja pruvi sian bravecon. Se li vivas nun, tio estas mirakle, dank'al ĉielaj helpoj, dank'al tio ke Dio estas bona kaj lia patrino kaj malfeliĉa edzino multe preĝis por li. Li estis vidinta apud sin la ostan vizaĝon de la morto, kiel malmultaj ĝin vidas, kaj tial sciis tre bone, kiom multe valoras la vivo.

— Eble vi kredas, ke vi mokos min! — li diris pense, dum rigardis la homamason.

Li de nun ludbatalos same, kiel multaj el siaj kamaradoj. Iujn tagojn li tion faros bone, aliajn malbone. Ludbatalado estas nur metio kaj, atinginte famon, plej interesa afero estas vivi, plenumante la taskon nur per la nepre necesa enriskiĝo. Ne kompensas, sin lasi kornovundi, tio ke ĉiuj poste laŭdegos lian kuraĝon.

Kiam alvenis la momento mortigi sian duan taŭron, ĉi tiuj pensoj igis lin trankvile kuraĝa.

Neniu besto lin mortigos! Li faros ĉion necesan por ne esti atingata de kornoj.

Irinte al la bravbesto, li kuraĝe, fiere diris, kiel ĉe siaj antaŭaj, gloraj tagoj: "Ĉiuj for!".

La homamaso ekmoviĝis kun kontenta murmuro. Li estas dirinta "Ĉiuj for!". Certe li faros iun el siaj bravaĵoj.

Sed ne alvenis tio, kion la publiko esperis, nek Naciao ĉesis iri post li kun mantelo sur brako, ruze diveninte, kiel antikva pikiletisto kutimiĝinta aŭdi trompajn fanfaronaĵojn al la matadoroj, la teatran malsincerecon de ĉi tiu ordono.

Li malvolvis la tukon iom malproksime de la taŭro kaj komencis rimarkeble time fari pasmovojn, restante post ĉiu el ili granddistance de la bravbesto kaj ĉiam helpate de la mantelo de Sebastiano.

Okaze de tio ke li estis momente kun mallevita ruĝtuko, la taŭro moviĝis, kiel se ĝi intencus ataki, sed faris nenion. La tro vigla spadulo trompiĝis pro tiu movo kaj posteniris kelkajn paŝojn, kiuj estis ja saltoj, forkurante de tiu besto tamen ne atakanta lin.

Li restis dum momento laŭ groteska sinteno pro tiu nenecesa postenkuro kaj parto de la publiko ridis inter miraj ekkrioj. Kelkaj ĉeestantoj ekfajfis.

— Vin gardu, ĉar ĝi atingas vin! — iu kriis ironie.

— Kia timo! — diris alia imitante virinan voĉon.

Gallardo ruĝiĝis pro kolero. Diri tion al li! Kaj en la Sevilja cirko!... Li ek-

sentis tiun kuraĝan korpuŝon de liaj unuaj tempoj, frenezan deziron sin ĵeti blinde sur la taŭron malgraŭ tio ajn, kio estis okazonta. Sed lia korpo ne volis obei. Lia brako ŝajnis pensi; liaj kruroj vidis la danĝeron, ribelante kontraŭ la postulo de lia volo.

Plie, la publiko reagis kontraŭ la insultantoj kaj trudis silenton, dezirante helpi lin. Trakti tiel viron ankoraŭ ne tute kuracitan je grava kornovundo!... Tio ja ne honorigas la publikon de Seviljo! Estas necese agi dece!

Gallardo profitis tiun simpatian kompaton, por fini sian embarasan situacion. Irinte iom flanke al la taŭro, li vundis ĝin per perfida kaj oblikva spadpiko. La besto falis, kiel buĉata, verŝante torenton de sango el sia buŝo. Iuj aplaŭdis, ne sciante kial; aliaj fajfis kaj la plimulto restis silenta.

— Oni metis antaŭ lin perfidajn hundojn — kriegis la kontraktfaristo de sia sidloko, malgraŭ tio ke la bestaro estis el la markiza taŭrproduktejo —. Ili ja ne estas taŭroj!... Ni atendu ĝis alia taŭrfesto, kiam oni liveros vere noblajn bestojn.

Elirante el la cirko, Gallardo rimarkis la popolamason silenta. Li preterpasis apud la grupoj kaj neniu salutis nek aklamis lin, kiel en la feliĉaj tagoj. Nek eĉ sekvis la veturilon tiu mizera bubaro, kiu restis ekster la taŭra cirko atendante sciigojn kaj, antaŭ kiam la taŭrfesto finiĝis, jam konis ĉiujn okazaĵojn kaj farojn de la majstro.

Gallardo unuafoje gustumis la amarecon de malsukceso. Eĉ liaj pikiletistoj estis silentaj kaj kun malbonhumora mieno, kiel frakasitaj soldatoj. Sed, kiam li alvenis hejmen kaj eksentis ĉirkaŭ sia kolo la brakojn de sia patrino, de Karmeno kaj eĉ de sia fratino same, kiel la kontakton de ĉiuj siaj nevetoj, kiuj alprenis liajn krurojn, la spadulo regajiĝis "Malbenaĵo!..." Plej interesa afero estas vivadi: ke la familio restu trankvila: gajni monon de la publiko, kiel aliaj toreadoroj, sen tiuj kuraĝaĵoj, kiuj pli-malpli frue okazigas morton.

La sekvintajn tagojn li deziris sin montri publike, paroli kun amikoj en popolkafejoj kaj en la kluboj de strato Serpentoj. Li konsideris, ke pro lia ĉeesto la kritikantoj ĝentile silentos kaj tiel konversacio pri lia malsukceso estos evitata. Li restis dum multaj horoj en la kuniĝejoj de neriĉaj taŭremuloj, kiujn li forlasis de antaŭ longe por serĉi la amikecon de altranguloj. Poste iris li en Kardek-kvinanan Klubon, kie la kontraktfaristo trudis siajn opiniojn per grandaj krioj kaj manbatoj sur tablon, defendante, kiel ĉiam, la gloron de Gallardo.

Kia fervora Don Josefo! Lia entuziasmo estis nedetruebla eĉ per bomba eksplodo; li neniam pensis, ke lia Joĉjo eble estas alie, ol kiel li opiniis lin. Li faris nek eĉ unu kritikon nek eĉ unu admonon pro lia malsukceso: kontraŭe li mem penis senkulpigi lin, krom tio ke amike lin konsilis:

— Vi ankoraŭ ne estas tute kuracita je via kornovundo. Estas tio, kion mi diras: "Vi jam vidos lin, kiam li plene bonfartos, kaj mi sciu tiam vian opinion..."

Agu same, kiel aliajn fojojn: Iru rekte al la taŭro per tiu kuraĝo, kiun Dio metis en vin, kaj jen! spadpiko ĝis la tenilo... kaj brila sukceso al vi.

Gallardo aprobis ĉion per enigma rideto... Brile sukcesi pri la taŭroj! Jes, li tion deziregis. Sed, ve! ili iĝis tiom grandaj kaj neregeblaj! Ili tiom multe kreskis, de kiam li ne iris en arenon!...

Vetludado konsolis Gallard'on, forgesigante al li liajn priokupojn. Ree per nova ardeco li perdis sian monon ĉe la verda tablo, ĉirkaŭate de tiuj junuloj, kiuj ne atentis pri liaj malsukcesoj, ĉar li estis eleganta toreadoro.

Iun vesperon kelkaj amikoj invitis lin vespermanĝi en kampomanĝejo *Eritaña*. Gaja diboĉado kun malvirtaj fremdulinoj, kiujn kelkaj el ili konis en Parizo. Ili estis venintaj en Seviljon por ĉeesti la festojn de Sankta Semajno kaj la Foiron, kaj ege deziris koni ĉion plej tipan el la lando. Ili estis je iom velkinta beleco reanimita per tiuj artifikoj, kiujn liveras eleganteco. La riĉaj junuloj amindumis ilin, altirate de la ĉarmo kaŭzata de alilandaĵoj kaj proponante al ili amorĝuojn, kiujn ili preskaŭ ĉiam akceptis.

Ili deziris koni iun faman toreadoron, spadulon el plej virbelaj, tiun Gallard'on, kies portreton ili rigardadis multfoje sur popolaj bildoj kaj alumetaj skatoletoj. Post kiam ili vidis lin en la arenon, petis al siaj amikoj, ke oni lin prezentu al ili.

La kunesto okazis en la granda manĝoĉambro de *Eritaña;* salonego meze de ĝardeno, ornamita per vulgara, araba stilo malriĉe imitanta la luksaĵojn de *Alhambra*. En ĉi tiu loko okazis politikaj festenoj kaj diboĉoj: oni tostis tie per arda oratoreco por la patrolanda plibonigado kaj ankaŭ tie balanciĝis la virinaj korpoj per tango-dancado laŭ ritmo de gitara muziko, dum en la ĉambraj anguloj eksonis kisoj kaj krioj kaj oni rompis botelojn.

Gallardo estis akceptata, kvazaŭ duondio, de tiuj tri virinoj, kiuj, forgesante siajn amikojn, nur rigardis lin kaj al si disputis reciproke la honoron sidi apud li, lin karesante per okuloj, kiuj esprimis amordeziron... Ilia aspekto rememorigis lin pri la alia, pri tiu, kiu forestis, pri tiu preskaŭ forgesita, pro iliaj oraj hararoj, iliaj elegantaj kostumoj kaj tiu subtila odoro de parfumita kaj tentema karno, kiu, eliĝante el iliaj korpoj, ŝajnis volvi lin per ebriiganta, spirala nubo.

La ĉeesto de liaj kunuloj kontribuis pli vigligi ĉi tiun rememoron. Ĉiuj estis amikoj de Doña Suno: kelkaj eĉ apartenis al ŝia familio, kaj li iam rigardis ilin, kiel parencojn.

Oni manĝis kaj trinkis per tiu sovaĝa englutemo propra je la noktaj festenoj, kie ĉiuj intencas nepre diboĉi, por kiel eble plej baldaŭ ebriiĝi kaj tiel kapti kapturnan gajecon.

En salona ekstremo ciganoj sonigis siajn gitarojn, kantante samtempe melankoliajn kantatojn. Iu el fremdulinoj per nevola entuziasmo supreniĝis sur tablon kaj komencis balanci mallerte siajn koksojn, dezirante imiti la enlandajn dancojn

kaj elmontri siajn dancsciojn lernitajn dum malmulte da tagoj sub instruado de seviljana majstro.

— Malgracia! Mallerta!... Senspica! — kriis ironie la amikoj, ŝin animante per ritmaj manplaŭdoj.

Ili mokis ŝian malviglecon, sed admiris per amordeziraj okuloj ŝian belan korpon. Kaj ŝi fieris pri sia arto, kredante entuziasmaj krioj la de ŝi nekompreneblajn vortojn, dum daŭrigis la movadon je siaj koksoj kaj levis la brakojn, kvazaŭ estus kruĉteniloj, ambaŭflanken de sia kapo, alten rigardante per la okuloj.

Post noktomezo ĉiuj estis ebriaj. La virinoj jam senhonte sieĝis per sia admiro la spadulon. Ĉi tiu lasis tute senemocie, ke ili disputante prenu lin, dum iliaj buŝoj pasie kisis liajn vangojn kaj kolon. Li estis ebria, sed per malgaja ebrieco. Ve, la alia!... La vera blondulino! La oreco de tiuj hararoj, kiuj komencis malkombiĝi apud li, estis artefaritaĵo kaj kovris dikajn kaj fortajn harojn, hardigitaj de ĥemiaj tinkturoj. Iliaj lipoj gustis, kiel parfumita butero. Iliaj korpaj belaĵoj estis malmolaj, sed kiel poluritaj per tuŝado; simile al tio, kio okazas ĉe la trotuaroj. Malgraŭ iliaj parfumoj li konsciis, ke ili nature odoris vulgare. Ve, la alia! la alia!...

Ne sciante kiamaniere, Gallardo sin trovis en la ĝardeno sub tiu solena silento, kiu ŝajnis veni de la steloj, inter ĝardenmanĝejoj kun densa kreskaĵaro, irante laŭ zigzaga vojeto, de kie estis videblaj tra la foliaro la manĝoĉambraj fenestroj lumigataj kvazaŭ buŝoj de infero, post kiuj pasis kaj repasis la homaj ombroj, kiel se estus nigraj demonoj.

Virino premis lian brakon, tirante ĝin, kaj Gallardo lasis, ke ŝi trenu lin, eĉ nek ŝin vidante kaj pensante pri io tre malproksima, tre malproksima.

Post unu horo li reiris en la manĝoĉambron. Lia akompanantino, malkombiĝinte kaj kun brilaj kaj malamikaj okuloj, parolis al siaj amikinoj. Tiuj ĉi ridis kaj montris lin per malŝatanta mieno al la ceteraj viroj, kiuj ankaŭ ridis... Ha, Hispanujo! Seniluziiganta lando, kie ĉio estas nur legendo, eĉ la braveco de ĝiaj herooj!...

Gallardo trinkis plu kaj plu. La virinoj, kiuj antaŭe interdisputis pri li kaj lin sieĝis per siaj karesoj, sin turnis nun dorse al li kaj sin metis ĉe la brakojn de aliaj viroj. La gitaristoj apenaŭ ludis kaj, ĉar ili estis sategaj je vino, ili nur kliniĝis sur siajn muzikilojn per plaĉa dormemo.

La toreadoro ankaŭ estis dormonta sur tabureto, kiam proponis al li iri hejmen en lia veturilo iu el la amikoj, kiu devis enlitiĝi, antaŭ kiam lia patrino, la grafino, vekiĝos, kiel ĉiujn tagojn, por ĉeesti tagnaskiĝan meson.

La nokta vento ne vigligis la toreadoron, kiam lia amiko lasis lin ĉe la angulo de lia strato. Gallardo marŝis per ŝanceliĝanta paŝado al sia domo. Li haltis apud ĝian pordon kaj sin tenis per ambaŭ manoj kontraŭ la muro, apogante sur ilin la kapon, kvazaŭ li ne povus subporti la pezon de siaj meditoj.

Li tute forgesis siajn amikojn, la vespermanĝon en *Eritaña* kaj tiujn tri fremdulinojn, kiuj unue konkuris inter si por atingi lian amoron kaj finis, lin insultante. Iom li memoris pri la alia; tio ĉiam!... sed kunfuze kaj malproksime. Nun lia penso pro iu el tiuj kapricaj ŝanĝoj, kiujn ebrieco okazigas, estis tute pri ludbatalado.

Li estas la plej brava matadoro el la mondo, hura! Tion asertas la kontraktfaristo kaj liaj amikoj kaj ĝi estas vero. La malamikoj jam vidos tion, kiam li ree ludbatalos. Kio okazis al li la alian tagon, estis simpla malzorgo: malbonsorto ĉikaninta lin.

Fiera pro tiu ĉiopova forto, kiun en tiu momento liveris al li ebrieco, li taksis ĉiujn andaluziajn kaj kastilajn taŭrojn, kiel se ili estus malfortaj kaproj, kiujn li povas renversi nur per manbato.

Kio okazis al li la alian tagon, estis nenio. Negravaĵo!... kiel Naciao diras: "Eĉ plej bona kantisto foje blekas".

Kaj ĉi tiu proverbo, lernita, ĉar li ĝin aŭdis al respektindaj, ludbatalartaj apostoloj okaze de malbonsorto en la areno, igis al li deziregi nepre kanti meze de la silento de tiu senhoma strato.

Kun la kapo daŭre apogita sur siaj brakoj li ekkantaĉis improvizatan de li kantaton konsistantan el tre granda laŭdo pri siaj meritoj: "Mi estas Joĉjo Gallardo... pli kuraĝa, ol Dio mem". Kaj, ĉar li ne sciis elpensi pli je sia honoro, ripetadis tiujn vortojn per raŭka kaj unutona voĉo, kiu rompis la silenton kaj bojigis nevidatan hundon ĉe la strata fundo.

Estis ja patra heredaĵo renaskiĝanta en li tiu manio kantadi, kiu akompanis sinjoron Johanon, la ŝuflikisto, dum liaj ĉiusemajnaj ebristatoj.

Oni malfermis la dompordon kaj Strekaro ankoraŭ duondormante antaŭenigis sian kapon por vidi la ebriulon, kies voĉon li ja kredis koni.

— Ha! ĉu ĝi estas vi? — diris la spadulo — atendu, ĉar mi tuj kantos la lastan.

Kaj ankoraŭ li ripetis kelkajn fojojn tiun nekompletan kantaton honore al sia kuraĝo, ĝis kiam li fine decidis eniri hejmen.

Li ne deziris enlitiĝi. Ĉar li divenis sian staton, li prokrastis la momenton supreniri en sian ĉambron, kie atendis lin Karmeno eble maldormante.

— Iru dormi, Strekaro. Mi estas faronta multajn aferojn.

Li ne sciis, kiuj ili estis; sed lia skribocambro altiris lin per ĉiuj siaj ornamajoj konsistantaj el grandaj portretoj, taŭrproduktejaj kokardoj prenitaj el taŭroj, kaj afiŝoj, en kiuj estis lia nomo.

Kiam eklumis la elektraj globoj kaj la servisto foriris, Gallardo restis meze

de la skriboĉambro kun ŝanceliĝantaj kruroj kaj rigardante admire ĉion, kio estis sur la muroj, kiel se li unuafoje rigardadus tiun gloran muzeon.

— Tre bone. Ja tre bone! — li murmuris —. Tiu bravulo estas mi: kaj tiu alia ankaŭ, kaj ĉiuj!... Nu, kaj ankoraŭ kelkaj mallaŭdas min!... Malbenaĵo! Mi estas la plej brava viro el la mondo. Don Josefo tion diras kaj li diras prave.

Li ĵetis sian ĉapelon sur la kanapon, kvazaŭ li demetus gloran kronon premantan peze lian frunton, kaj per zigzaga paŝado iris al la skribotablo, apud kiu li restis per apogitaj manoj kaj fikse rigardante la grandegan taŭrkapon, kiu ornamis la fundan muron de la skriboĉambro.

— He! Bonan nokton, bravulo!... Kion vi faras ĉi tie ... Muu! muu!

Li salutis ĝin per muĝoj, imitante kun infana ĝojo la taŭran blekadon en la herbejoj kaj arenoj. Li ne rekonis ĝin: li ne povis memori, kial tiu harriĉa kapo estis tie kun siaj minacantaj kornoj. Iom post iom li rememoris.

— Mi vin konas, amiko!... Mi memoras, kiom multe vi kolerigis min tiun tagon. La publiko fajfis kaj ĵetis al mi botelojn... eĉ oni insultis mian malfeliĉan patrinon, dum vi, tiel kontenta!... Kiel vi ĝojis! Ĉu ne, fripono?...

Pro lia ebriula vido al li ŝajnis, kvazaŭ tremus pro rido ĝia brilglazurita buŝo kaj ĝiaj lumvitraj okuloj. Eĉ li kredis, ke la korna besto movis konsente la kapon per malgranda balancado je ĝia kolo.

La ĝis tiam ridetanta kaj bonema ebriulo ekkoleriĝis, rememorante tiun malfeliĉan okazaĵon. Kaj, ĉu ankoraŭ ridas tiu malica besto?... Tiuj ruzaj, pripensemaj, malbonintencaj taŭroj, kiuj ŝajnas moki la toreadoron, estas kulpaj, pri tio ke bonulo troviĝas en ridinda situacio kaj oni insultas lin. Ha, kiom multe Gallardo ilin malamis! Kian malamikan rigardon li fiksis al tiuj vitraj okuloj de la kornohava kapo!...

— Ĉu ankoraŭ vi ridas, kanajlo? Malbeno al vi, mokemulo! Estu malbenata via bova patrino kaj via fripona mastro liverinta al vi paŝtadon en siaj herbejoj! Volu Dio, ke li estu en malliberejo... Ĉu ankoraŭ vi ridas? Ĉu ankoraŭ vi grimacas?

Puŝate de sia kolero li klinis sian buston sur la tablon kaj, malferminte la tirkestojn, serĉis en ili. Poste li rektiĝis kaj direktis manon al la taŭra kapo.

Pum! pum!... Du pafoj eksonis.

Dispecigate laŭ malgrandaj eroj eksaltis iu el la vitraj okuloj kaj en la besta frunto nigra kaj ronda truo inter duonbrulintaj haroj aperis.

VIII

Meze de printempo la vetero ree fariĝis vintra per tiu ekstrema krudeco de la Madrida klimato, ŝanĝema kaj freneza.

Malvarmo ekregis. La griza ĉielo verŝis fortajn pluvojn foje akompanatajn de neĝaj flokoj. Ĉiuj personoj, jam vestitaj per maldikaj, someraj kostumoj, malfermis ree ŝrankojn kaj kofrojn por elpreni mantelojn kaj surtutojn. Pluvo nigrigis kaj difektis la blankecon de la printempaj ĉapeloj.

De antaŭ du semajnoj okazis neniu spektaklo en la taŭra cirko. Ĉiu dimanĉa taŭrfesto estis prokrastata ĝis labortago, kiam vetero montriĝos agrabla. La impresario, la cirkaj oficistoj kaj ĉiuj multenombraj taŭremuloj, malbonhumoraj pro tiu deviga prokrastado, avide esploris la ĉielon, kiel terkulturistoj timantaj perdi rikolton. Sennuba ĉielspaco aŭ noktomeza apero de kelkaj steloj, kiam ili eliris el kafejoj, regajigis ilin.

— Baldaŭ la malbela vetero ĉesos... Postmorgaŭ okazos taŭrfesto.

Sed ree la nuboj kuniĝis kaj persistis la griza, ĉiela tavolo konstante ploranta, kaj la taŭremuloj indignis pro tiu vetero, kiu ŝajnis militi kontraŭ la nacia festo... Malfeliĉa lando! Eĉ ludbataloj ekneebliĝas en ĝi.

Gallardo dum tiuj du semajnoj trude ripozis. Liaj bandanoj plendis pri senagado. En iu ajn alia urbo el Hispanlando la toreadoroj certe rezignacius pri tiu prokrastado. La spadulo pagis la hotelan koston ĉie, esceptinte en Madrido. Tio estas neprava kutimo estigita antaŭ multe da tempo de la matadoroj loĝantaj en la ĉefurbo. Oni supozas laŭ tio, ke ĉiuj toreadoroj havas tie propran hejmon. Kaj la pikiletistoj kaj pikrajdistoj de Gallardo, kiuj gastis en la malriĉa hejmo de toreadora vidvino, ŝparis kiel eble plej multe, preskaŭ ne fumante kaj restante apud la kafejaj pordoj anstataŭ eniri. Ili pensis pri siaj familioj, kalkulante avare, kiel homoj nur ricevantaj manprenon da duroj por kompensi ilian riskan agadon. Kiam taŭrfesto okazos, jam ili estos la tutan gajnon elspezintaj por manĝi.

La spadulo montriĝis ankaŭ malbonhumora en sia hotela soleco; sed ne kaŭze de la vetero, sed pro sia malbona sorto.

Li ĵus ludbatalis en Madrido ja malsukcese. La publiko kondutis malamike kontraŭ lin. Ankoraŭ restis partianoj kun nedetruebla kredo obstine defendantaj lin; sed, kiuj antaŭ unu jaro estis entuziasmaj, bruaj kaj atakemaj, montris nun ian malgajecon kaj, kiam alvenis okazo lin aplaŭdi, ili faris tion time. Kontraŭe la malamikoj kaj preskaŭ la tuta publiko, ĉiam deziranta danĝerojn kaj mortojn,

kiel maljuste juĝis lin! kiel sentime lin insultis!... Tio, kion oni toleris al aliaj matadoroj, estis malpermesata al li.

Oni lin konis antaŭe sentima, sin ĵetanta blinde kontraŭ la danĝeron, kaj tia oni volis lin por ĉiam, ĝis kiam la morto lin trafos. Li estis bonsorta riskemulo dum sia profesia komenco, kaj la publiko ne toleris nun lian singardemon. Oni insultis lin ĉiam, kiam li intencis ne multe endanĝeriĝi. Apenaŭ li etendis de iom malproksime sian ruĝtukon antaŭ la taŭro, protesto eksplodis. "Li ne metas sin apuden! Li timas!". Kaj sufiĉis, ke li eksaltis posten, por ke la popolaĉo akceptis tiun movon per plej akraj malĝentilaĵoj.

La sciigo pri tio okazinta en la Paska taŭrfesto de Seviljo ŝajnis esti disfluginta tra la tuta Hispanlando. Liaj malamikoj tiel venĝis siajn longajn jarojn de envio. La profesiaj kamaradoj, kiujn li multfoje puŝis en danĝeron, ĉar konkuro tion postulis, diskonigis per hipokritaj, kompataj montroj la dekadencon de Gallardo. Lia kuraĝo finiĝis! La lasta taŭratingo igis lin tro singardema. Kaj la publikoj, impresite de tiuj sciigoj, atentis pri la toreadoro, de kiam li aperis en la arenon, pretaj opinii malbona ĉion, kion li faros, kontraŭe al tio ke oni eĉ liajn mallertaĵojn antaŭe aplaŭdis.

La tipa ŝanĝemeco de la homamaso kontribuis al tiu rezultato. Oni jam laciĝis admiri la kuraĝon de Gallardo kaj nun ĝuis vidante lian timon aŭ singardemon, kiel se pro tio ĝi mem estus pli brava.

La publiko neniam opiniis lin sufiĉe proksima al la taŭro. "Estas necese pliapudiĝi!". Kaj, kiam li per forta streĉo de sia volo sukcesis superregi sian organismon emantan foriĝi el danĝero, kaj mortigis taŭron, kiel alitempe, la ovacio ne estis tiel brua. Ŝajnis, kiel se la entuziasma ĉeno, kiu antaŭe kunigis lin al la publiko, estis rompita. Liaj malabundaj triumfoj nur taŭgis, por ke oni lin ĝenis per lecionoj kaj konsiloj: "Tiel oni devas mortigi! Tiel decas, ke vi ĉiam ludu, fripono!..."

La partianoj, kiuj restis fidelaj, konfesis liajn malsukcesojn, sed malgravigis ilin, parolante pri la bravaĵoj faritaj de Gallardo en la feliĉaj tagoj.

— Li iom malfervoras — diris ili —. Li laciĝis. Sed, kiam li volas!...

Ve! Gallardo ĉiam volis. Kial ne ludi bone kaj regajni la publikan aplaŭdadon?... Sed liaj sukcesoj, kiujn la taŭremuloj kredis kaprico de lia volo, estis rezultato de aro da cirkonstancoj, de tiu sentima antaŭsento de liaj bonaj tempoj, kiun nun malofte li spertis.

En kelkaj provincaj cirkoj oni jam fajfis lin. La sunanoj lin insultis per raŭka sonigado je ĉaskornoj kaj brutaraj sonoriloj, kiam li ne rapide mortigis la taŭron, tial ke nur duone trapikis ilin per sia spado, kio sufiĉis nek eĉ por fleksigi la krurojn al la bravbesto.

En Madrido la publiko "atendis lin per pretaj ungoj", kiel li diris. Apenaŭ la ĉeestantoj de la unua taŭrfesto vidis, kiel li ludis sian ruĝtukon kaj kiel li sin ĵetis por mortigi, skandalo eksplodis. Oni estas ŝanĝinta la "knabon" el Seviljo!

Tiu ne estas Gallardo; sed tute alia persono. Li fleksas sian brakon, turnas flanken la vizaĝon, kuras per sciura vigleco, por sin meti for de la taŭro, sen sufiĉa trankvilo por ĝin atendi firme starante. Oni rimarkis, ke liaj kuraĝo kaj forto tre multe malpliiĝis.

Tiu taŭrfesto estis ja malsukceso por Gallardo kaj en la kafejoj, kie la taŭremuloj kuniĝis por konversacii, oni multe parolis pri tio. La maljunuloj opiniantaj malbona ĉion nuntempan kritikis la netaŭgecon de la modernaj toreadoroj. Ĉi tiuj laŭ ili kuraĝege komencis sian profesion, sed, tuj kiam ili estis sentintaj en sia karno kornopikon... la braveco finiĝis.

Gallardo, devige ripozante pro la malbona vetero, atendis senpacience la duan taŭrfeston kun intenco fari ja kuraĝaĵojn. Al li multe doloris la mokoj de liaj malamikoj vundintaj lian memestimon. Se li reiros en provincajn urbojn post malsukceso en Madrido, li estos perdita. Li superregos sian nervemon, venkos tiun priokupon, kiu tro gardigis al li lian korpon kaj vidigis la taŭrojn pli grandaj kaj timindaj. Li sin konsideris tiel kapabla, kiel alitempe por ludbatali. Nur lia brako kaj kruro estis iom malpli fortaj; sed tio ne longe daŭros.

Don Josefo parolis al li pri tre profitodona kontrakto por kelkaj urboj el Ameriko. Ne: li ne iros trans la maron, sen tio ke antaŭe pruvos, ke li estas la brava spadulo, kiun ĉiuj konis. Poste li jam pensos pri tiu afero.

Pro la dezirego refamiĝi spertata de populara homo konscianta, ke lia taŭgeco malpliiĝas, Gallardo tre multe montriĝis en lokoj, kien ofte iras taŭremuloj. Li eniris la Anglan kafejon, kie kuniĝis partianoj de la andaluziaj toreadoroj kaj per sia ĉeesto evitis, ke kruela kritikado daŭre ĉikanis lian bonfamon. Li mem ridetante kaj modeste iniciatis ĉi tiun konversacion tiel humile, ke eĉ plej atakemaj ĉeestantoj simpatiis al li.

— Mi ja ne bone ludbatalis; tion mi konfesas... Sed vi juĝos en la proksima taŭrfesto, tuj kiam la vetero reboniĝos... Mi kondutos, kiel eble plej kontentige.

En aliajn kafejojn de Sunpordo, kie kuniĝis pli modestaj taŭremuloj, li ne kuraĝis eniri. Ili estis malamikoj de la andaluziaj toreadoroj; madridanoj, kiujn malplaĉis, ke ĉiuj matadoroj estas el Kordobo kaj Seviljo, sen tio ke neniu glora spadulo naskiĝis en la ĉefurbo. La memoro pri Fraĉjo, kiun ili konsideris madridano, ĉiam daŭris en ĉi tiuj konversaciejoj, kvazaŭ li estus miraklema sanktulo. Kelkaj el ili eĉ ne ĉeestis taŭrfestojn, de kiam la "negro" lasis la profesion. Por kio? Ili kontentiĝis per legado je gazetaj recenzoj, ĉar opiniis, ke jam estas nek bravaj taŭroj nek taŭgaj toreadoroj post la morto de Fraĉjo. Andaluziaj "knaboj", nur dancistoj, kiuj gracie moviĝas kaj ludas siajn mantelojn, sed tamen ne scias kuraĝe mortigi taŭrojn.

De tempo al tempo espereto flugis ĉe ili: Madrido ankaŭ naskis estonte faman matadoron. Ili ĵus malkovris taŭridiston el ekstera kvartalo, kiu, gloriĝinte en la

ludbatalejoj de *Vallecas* kaj *Tetuán*, partoprenas la dimanĉojn en la granda cirko malmultekostajn taŭrfestojn.

Lia nomo fariĝis populara. En la hararanĝejoj de la popolaj kvartaloj oni parolis entuziasme pri li, antaŭdirante plej gravajn triumfojn. La heroo iris de trinkejo en trinkejon, konsumante alkoholaĵojn kaj kolektante pli kaj pli partianojn. La malriĉaj taŭremuloj, kiuj ne povis ĉeesti la gravajn ludbatalojn, ĉar la enirbileto estis multekosta, kaj atendis la aperon de gazeto "*El Enano*" por kritiki la neviditan taŭrfeston, grupiĝis ĉirkaŭ la estontan majstron, lin protektante per sia longesperta saĝeco.

— Ni — diris ili fiere — malkovras la famajn toreadorojn, antaŭ ol la riĉuloj.

Sed la tempo pasis kaj la antaŭdiroj ne praviĝis. La heroo aŭ mortfalis pro kornovundo sen alia glora, funebra soleno ekster kelkaj gazetaj linioj aŭ li malkuraĝiĝis post taŭratingo kaj fariĝis iu el multaj promenantoj, kiuj paradas montrante sian vosteton en Sunpordo, dum atendas kontraktojn neniam realigatajn. Tiam la taŭremuloj metis sian atenton al aliaj komencantoj, esperante per nedetruebla kredo la aperon de matadoro liveronta gloron al Madrido.

Gallardo ne kuraĝis proksimiĝi al tiu taŭrema demagogio, kiu ĉiam malamis lin kaj ĝojis nun pro lia dekadenco. La plimulto el ili ne aliris en la cirkon por lin vidi kaj admiris neniun nuntempan toreadoron. Ili atendis sian Mesio'n (63) por alifoje ĉeesti ludbatalojn.

Kiam li vespere vagis tra la Madrida centro, li lasis, ke alparolu lin en Sunpordo kaj sur la trotuaro de strato Seviljo la toreadorvaguloj, kiuj estigas grupetojn tie, apud nekontraktitaj aktoroj, parolante pri siaj faroj kaj murmurante pri la majstroj per malamo propra al tiuj nenion posedantaj.

Ili estis junuloj, kiuj salutis lin kaj lin nomis "majstro" aŭ "sinjoro Johano"; multaj malsate aspektantaj per longaj rezonoj lin petis iujn pesetojn; sed ĉiuj estis dece vestitaj, puraj, brilaj kaj sin tenis fiere, kvazaŭ ili estus sategaj je ĉiuspecaj vivplezuroj, kaj elmontris multegon da falsaj ringoj kaj horloĝĉenoj.

Kelkaj estis honestaj knaboj intencantaj prosperi ludbatalante, por subteni sian familion per iom pli da mono, ol per laborista salajro. Aliajn malpli skrupulajn helpis fidelaj amikinoj, kiuj plenumis nekonfeseblajn taskojn, oferante sian korpon kontente, ĉar tiel ili kontribuis nutri kaj bone vesti belfortulon, kiu laŭ ilia diro fine fariĝos fama.

Ili ne havis pluajn vestaĵojn ekster tiuj, kiujn portis de mateno ĝis nokto, paradante en la centro de Madrido, kie ili paroladis pri kontraktoj de ili rifuzitaj, kaj sin ruze observis reciproke por scii, kiu havas monon por inviti siajn kamaradojn. Kiam iu el ili pro kaprico de la sorto atingis kontrakton por ludi taŭridojn en provinca urbeto, li bezonis pagi la pruntericevitan monon, kiun oni donis al li en pruntejo kontraŭ lia lumvesto, por rehavi ĝin. Tiu estis malnova kostumo aparteninta al kelkaj herooj, kun nebrilaj kaj kupraspektaj oraĵoj; kandelinga oro,

laŭ diro de la spertuloj. Sur ĝia silka ŝtofo estis abundaj flikaĵoj; gloraj memorigoj je kornovundoj, okaze de kiuj aperis antaŭ ĉies okuloj tolaĵoj kaj korpaj, nedecaj partoj, kaj ĝi estis makulita postaĵe per flavetaj rondoj; hontigaj postsignoj kaŭzitaj de timego.

Inter tiu toreadora plebo, kiun malsukceso amarigis kaj restigis nekonata pro ĝia mallerteco aŭ timo, ekzistis famuloj de ĉiuj respektataj. Oni timis iun el ili, kiu tamen forkuradis antaŭ la taŭroj, ĉar li emis uzi sian tranĉilon kontraŭ la aliajn okaze de disputoj. Alia estis malliberigita, tial ke li mortigis homon per pugnobato. La konata "ĉapelglutisto" estis fama de kiam en trinkejo de *Vallecas* formanĝis kordoban, frititan ĉapelon konvene pecigitan, helpate de abunda vintrinko, por pli facile ĝin pasigi tra sia gorĝo.

Kelkaj el ili, ĝentilaj, ĉiam bone vestitaj kaj ĵus razitaj, kuniĝis al Gallardo kaj akompanis lin dum liaj promenoj, esperante, ke li invitu ilin manĝi.

— Mi ne malprosperas, majstro — diris bonaspekta junulo —. Oni malmulte ludbatalas; tio nun estas malfacile atingebla; sed mi havas baptopatron... la markizo: vi jam konas lin.

Kaj dum Gallardo ridetis enigme, la juna toreadoro serĉis ion en siajn poŝojn.

— Li multe estimas min... Jen cigaredujo, kiun li donace portis al mi el Parizo!...

Kaj li montris fiere la metalan skatoleton, sur kies fermofolio estis nudaj, emajlaj anĝeletoj super preskaŭ ama dediĉo.

Aliaj, malmodestaj, kuraĝokulaj belkreskuloj, kiuj laŭŝajne fieris pri sia vireco, amuzis gaje la spadulon, rakontante al li siajn amajn aventurojn.

En la sunaj matenoj ili iris en promenejon Kastilanino ĉe tiu horo, kiam la gubernistinoj de riĉaj hejmoj eliris por promeni kun la geinfanoj. Ili estis anglaj aŭ germanaj fraŭlinoj ĵus alvenintaj en Madridon kun kapo plena je fantaziaj konceptoj pri ĉi tiu lando inda je legendo, kaj, kiam ili vidis belkreskulon kun tute razita vizaĝo kaj larĝa rondĉapelo, lin kredis tuj toreadoro... Kia feliĉo fianĉiniĝi kun toreadoro!

—Ili estas tiel senspicaj, kiel pano sen salo; jen, majstro. Grandaj piedoj, hararo, kiel kanabo; sed ili ne tre multe hontas; jes, ne tre multe!... Kaj, tial ke ili preskaŭ ne komprenas, kion ni diras, ili nur ridadas, montrante la dentojn, kiuj estas tre blankaj, kaj malfermas multe siajn grandajn okulojn. Ili ne parolas, kiel ni; tamen komprenas nin, kiam ni faras monpetan signon kaj, tial ke ni estas honestuloj kaj dank'al Dio ĉiam kondutas bone, ili donas al ni por fumadi kaj por aliaj aferoj kaj tiel ni daŭrigas nian vivadon.

Kaj, kiu tiel parolis, fieris pri sia nelacigebla allogemo, per kiu li iom post iom elspezis la ŝparojn de la gubernistinoj.

Aliaj sin dediĉis al fremdulinoj de "music-halls"; dancistinoj kaj kantistinoj alvenintaj en Hispanlandon, sopirante tuj fianĉiniĝi kun toreadoro. Ili estis viglaj

francinoj kun supreniĝinta nazpinto, korsaĵo plata pro ŝia malgraseco, kaj krispita kaj parfumita jupo; germaninoj kun masiva karno, pezaj, imponaj kaj blondaj, kiel "valkirioj"; italaninoj kun nigra kaj oleaspekta hararo, verdebruna vizaĝo kaj tragika rigardmaniero.

La junaj toreadoroj ridis memorante siajn unuajn intervidojn en ambaŭa soleco kun tiuj entuziasmaj fervorulinoj. La fremdulino ĉiam timas esti trompata, ĉar al ŝi ŝajnas strange, ke tiu legenda heroo estas viro, kiel la aliaj. Ĉu li vere estas toreadoro?... Kaj, por kontroli tion ĉi, ŝi serĉis lian haran vosteton, ridetante kontenta pro sia ruzaĵo, kiam palpis lian hartufon, kiel se ĝi estus certiganta dokumento.

— Vi, majstro, ne scias, kio estas tiuj virinoj. Ili dum la tuta nokto kisas nian vosteton, kiel se ni ne havus alian aferon pli taŭga... Kaj kiajn kapricojn! Por kontentigi ilin, oni estas devigata salti el la lito mezen de la ĉambro kaj klarigi al ili, kiel oni ludbatalas, kuŝigante seĝon surplanken, uzante por ludi littukon anstataŭ mantelo kaj ŝajne pikiletante per la fingroj... Kaj, krom tio, ĉar ili estas virinoj, kiuj iras tra la mondo ekspluatante ĉiun, kiu proksimiĝas al ili, ili tuj komencas petojn per miksita lingvo, kiun oni ne povas kompreni "Toreadoro fianĉo, donacu al mi orbroditan mantelon el tiuj viaj, por porti ĝin, kiam mi dancos". Konsideru, majstro, kiel petemaj ili estas. Kvazaŭ oni aĉetus ludbatalan mantelon same, kiel ĵurnalon! Kvazaŭ ni havus ilin dekduope!...

La juna toreadoro promesis malavare la petitan mantelon. Ĉiuj toreadoroj ŝajnas riĉuloj. Kaj, dum la bela donaco alvenas, intimeco inter ambaŭ grandiĝas kaj la fianĉo pruntepetas al sia amikino, kaj, se ŝi ne havas monon, li garantie ricevas ĝin kontraŭ iu el ŝiaj juveloj kaj pro ilia reciproka familiareco li prenas ĉion, kio troviĝas apud lia mano, kaj, kiam ŝi vekiĝas el sia ama revo kaj protestas pro tiaj liberecoj, la belkreskulo montras sian pasian amon kaj defendas sian honoron de legenda heroo per batado al ŝi.

Gallardo ĝojis aŭdante ĉi tiun rakonton, precipe ĝian lastan parton.

— Jen, vi pravas! — li diris per sovaĝa gajeco —. Batu tiujn virinojn! Vi scias konduti pri ili. Tiel pli multe ili amos vin. Plej malbona afero, kiu povas okazi al viro, estas malkuraĝiĝi antaŭ iaj virinoj. Viro devas trudi respekton al si.

Li naive admiris la senskrupulecon de tiuj junuloj, kiuj vivadas per ekspluatado je iluzioj de pasantaj fremdulinoj, kaj kompatis sin mem, memorante sian mankon de energio rilate al ia virino.

Krom ĉi tiuj amuzaĵoj, kiujn liveris al li la amikeco kun kelkaj, nefamaj toreadoroj, estis ankaŭ la humile obstina petado de entuziasma partiano. Li estis trinkejisto el kvartalo Kampogastejoj, galicano kun fortaj muskoloj, mallonga kolo kaj ruĝa vizaĝo, kiu sukcesis iom riĉiĝi per sia butiko, kie dancadis ĉiujn dimanĉojn servistinoj kaj soldatoj.

Li nur havis unu filon kaj tiun korpe malgrandan kaj malfortikan knabon lia patro destinis por esti iam fama toreadoro. La trinkejisto, tre entuziasma partiano de Gallardo kaj de ĉiuj ĉefaj spaduloj, decidis tion.

— La knabo taŭgas — li diris —. Vi jam scias, sinjoro Johano, ke mi estas iom sperta pri tiaj aferoj. Li havas mian helpon; sed, kvankam mi jam elspezis multe da mono por tiu celo, li bezonas protektanton por sukcesi, kaj neniu estas pli taŭga, ol vi, por tio. Se vi volus regi taŭridan feston, kie mia knabo mortigus!... tiel alirus multe da publiko: mi pagus ĉiujn kostojn.

Pro tiu facileco, per kiu la trinkejisto pagis la kostojn de la profesia, knaba lernado, li perdis multe da mono. Sed li iris antaŭen, puŝate de komerca spirito iganta, ke li subportis kontenta la malsukcesojn, esperante multege gajni, kiam lia filo estos fama toreadoro.

La malfeliĉa knabo, kiu dum sia infanaĝo montris inklinon ludbatali, kiel preskaŭ ĉiuj malgranduloj el lia socia klaso, estis nun turmentata pro la entuziasmo de sia patro. Ĉi tiu serioze kredis pri lia emo kaj rimarkis en lin ĉiumomente novajn, toreadorajn kapablojn. Lian hontemon li konsideris malagemeco, lian timon, manko de memestimo. Multego da parazitoj, senprofesiaj taŭremuloj, nefamaj toreadoroj, kies nura gloro konsistas havi vosteton, svarmis ĉirkaŭ la galicano, trinkante senpage kaj pruntepetante malgrandajn monkvantojn ŝanĝe je siaj konsiloj. Ĉiuj ĉi kune kun la patro konsistigis kvazaŭ kongreson, kies nura celo estis konigi al la publiko tiun toreadoran stelon kaŝitan en kvartalo Kampogastejoj.

La trinkejisto, ne konsultinte sian filon, aranĝis ludbatalojn en la taŭraj cirkoj de *Tetuán* kaj *Vallecas,* ĉiam "pagante ĉiujn kostojn". Ĉi tiuj eksterurbaj cirkoj estis je la dispono de ĉiuj dezirantaj, esti kornovundotaj aŭ hufpremotaj de taŭro. Sed tiaj batoj ne estis senpagaj. Por povi ruliĝi sur la sablo kun rompita pantaloneto kaj makulite de sango kaj besta ekskremento, estis necese antaŭe pagi la koston de la enirbiletoj, kiujn la ludbatalontoj mem aŭ ilia reprezentanto disdonis aŭ vendis.

La entuziasma patro plenigis la cirkon per amikoj, invitante la samprofesiulajn kamaradojn kaj malriĉajn taŭremulojn. Plie, li malavare pagis tiujn, kiuj konsistigis bandon kun lia filo; mantelistoj kaj pikiletistoj dungitaj el la vostetuloj vagantaj en Sunpordo, kiuj ludbatalis vestite per stratkostumo, dum la spadulo brile montriĝis kun lumvesto. Ĉio, por ke la knabo atingu famon.

— Li havas novan, toreadoran kostumon faritan de plej lerta tajloro, kiu mem fasonas tiujn de Gallardo kaj aliaj matadoroj. Sepmil realojn (64) ĝi kostis. Kompreneble per ĉi tio ĉiu ajn bele aspektas!... Li ankaŭ povas kalkuli je mi, kiu eĉ elspezus mian lastan peseton por lin helpi. Se multaj el komencantoj havus patron, kiel mi!...

La trinkejisto restis post la barilo, kuraĝigante sian filon per sia ĉeesto kaj per

svingado je dika bastono, kiun li ĉiam portis. Kiam la knabo ripozis apud rifuĝejo, li tuj vidis, kiel aperis, kvazaŭ terura fantomo, la ruĝa, vangodika vizaĝo de lia patro kaj la tenilo de tiu dika batilo.

— Ĉu mi monelspezas por tio? Ĉu, por ke vi vin ventumu, kiel fraŭlino? memestimu vin, fripono! Iru arenmezen kaj ludu brile. Ve, se mi estus juna, kiel vi, kaj malpli peza!...

Kiam la knabo staris antaŭ la taŭrido kun ruĝtuko kaj spado mane, pala kaj krurtremanta, lia patro, kiu sekvis lin post la barilo laŭ liaj iroj, sin metis ĉiam antaŭ liajn okulojn, kiel minacanta instruisto preta korekti plej malgravan malzorgon en la leciono.

Kion la kompatinda toreadoro, enigite en sian kostumon el ruĝa silko kun grandaj orajoj, plej multe timis, tio estis la reveno hejmen, kiam lia patro streĉis la brovojn, ĉar estis malkontenta.

Li eniris la trinkejon, kaŝante per sia riĉa kaj brila mantelo la ĉemizajn baskojn, kiuj eliĝis tra la ŝirajoj de lia pantaloneto, kun ostoj ankoraŭ dolorantaj pro la puŝbatoj, kiujn la taŭrido liveris al li. Lia patrino, forta kaj malamikmiena virino, kuris al li kun malfermitaj brakoj, kortuŝite de sia emocia atendo dum la tuta posttagmezo.

— Jen ĉi tiu mallertulo! — furioze ekkriis la trinkejisto —. Li malbonege ludis. Kaj, ĉu por tio mi elspezas mian monon?...

La timinda bastonego estis kolere levata kaj tiu silke kaj ore vestita viro antaŭ nelonge mortiginta du malgrandajn bravbestojn intencis forkuri, ŝirmante sian kapon per brako, dum lia patrino sin metis inter ambaŭ.

— Sed, ĉu vi ne vidas, ke li estas vundita?

— Vundita! — amare ekkriis la patro kun bedaŭro, ĉar tio ne estis realaĵo —. Tio nur okazas al veraj toreadoroj. Kudru lian pantaloneton kaj purigu ĝin... Certe multe makulis ĝian postan parton ĉi tiu fripono.

Sed post malmultaj tagoj la trinkejisto ree fidis. Ĉiu ajn okaze maltaŭgas. Li vidis eĉ famajn matadorojn tiel multe publike malsukcesi, kiel lia filo. Antaŭen, por atingi la celon! Kaj li aranĝis ludbatalojn en la taŭraj cirkoj de Toledo kaj *Guadalajara,* kiujn ŝajne impresariis kelkaj el liaj amikoj, sed kies kostojn li pagis reale, kiel ĉiam.

La taŭrida festo en la granda cirko de Madrido estis laŭ diro de la trinkejisto iu el plej famindaj, kiujn oni vidis iam. La spadulo kontraŭ sia kutimo mortigis ne malbone du taŭridojn, kaj la publiko plej gradparte enirinta senpage aplaŭdis la filon de la trinkejisto.

Ĉe la finiĝo de la festo aperis la patro, estrante multenombran, buban trupon. Li ĵus kolektis ĉiujn vagulojn, kiuj svarmis ĉirkaŭ la cirko kaj tiujn englitiĝintajn dank'al malviglado ĉe la enirejoj. La trinkejisto estis serioza homo pri siaj traktoj. Po kvindek centimoj li donos al ĉiu el ili, sed kun devigo kriegi ĝis raŭ-

kiĝo: "Vivu Maneto!" kaj porti sur ŝultroj la gloran taŭridiston, tuj kiam li eliros el la areno.

Maneto, tremante ankoraŭ pro la ĵus pasintaj danĝeroj, estis ĉirkaŭata, puŝata, levata alten de tiu brua bubaro kaj tiel portata triumfe de la ludbatalejo ĝis Kampogastejoj, tra la finiĝo de strato *Alcalá*, rigardate scivole de la publiko veturanta en la tramoj, kiuj malrespekte tranĉis tiun gloran manifestacion. La patro iris kontenta kun sia bastonego sub la brako, ŝajne ne partoprenante ĉi tiun entuziasmon; sed tuj, kiam la kriado malpliiĝis, li kuris al la grupa kapo, forgesante ĉiujn konvenaĵojn, same furioze, kiel komercisto, kiun oni trompis pri la kvanto aŭ kvalito de la pagitaj varoj. Li mem kriis animante: "Vivu Maneto!". Kaj la ovacio reardiĝis per forta muĝado.

Jam estis pasintaj multaj monatoj kaj la trinkejisto ankoraŭ emociiĝis, memorante tiun okazintaĵon.

— Oni portis lin hejmen sur ŝultroj, sinjoro Johano, same, kiel al vi okazis multfoje, kvankam ĉi tiu komparo estas neĝusta. Vi povas per tio juĝi, kiom multe la knabo taŭgas... Li nur bezonas protekton: ke vi helpu lin.

Kaj Gallardo, por liberiĝi el la trinkejisto, respondis lin per neklaraj promesoj. Li eble akceptos regi la taŭridan feston. Jam li decidos poste: ankoraŭ restas multe da tempo ĝis vintro.

Iun vesperon la spadulo, irante de Sunpordo en straton *Alcalá*, faris paŝon posten pro surprizo. Blonda sinjorino malsupreniris de veturilo apud la pordo de Hotelo Parizo... Doña Suno! Viro fremdulaspekta prezentis al ŝi sian manon por helpi la malleviĝon kaj post diro je kelkaj vortoj li foriris, dum ŝi eniris la hotelon.

Ŝi estas Doña Suno. La toreadoro ne dubis pri tio. Ankaŭ li ne dubis, pri kia speco de rilato estis inter ŝi kaj tiu fremdulo, vidinte iliajn rigardojn kaj la rideton, per kiu ili sin adiaŭis unu la alian. Tiel ŝi rigardis lin; tiel ŝi ridetis en la feliĉa tempo, kiam ili kune rajdis tra la senhomaj kamparoj milde lumigataj ruĝete de la kuŝanta suno. "Malbenaĵo!..."

Li restis malbonhumora kun amikoj ĝis malfrue; poste la spadulo malbone dormis, tial ke bildoj de pasintaj scenoj maltrankviligis lian sonĝon. Kiam li leviĝis, pala kaj malgaja lumo eniris tra la balkonoj. Pluvis kune kun falantaj neĝflokoj. Ĉio estis nigra: la ĉielo, la domfasadoj, la gutanta tegmentrando, kiun oni vidis de tie, la strata, kotmakulita pavimo, la veturilaj suprajoj, brilaj kiel speguloj, la irantaj ombrelkupoletoj...

La dekunua matene! Ĉu li iros al Doña Suno?... Kial ne? La pasintan nokton li forjetis kolere ĉi tiun penson. Tio estas ja subiĝo. Ŝi forkuris de li, dirante neniom, kaj poste, kiam ŝi sciis, ke morto minacas lin, apenaŭ ŝi interesiĝis pri lia farto. Nur telegramon en la unuaj momentoj kaj poste nenion: nek eĉ mallongan

leteron; kaj tion ŝi, kiu tiel diligente skribas al siaj amikoj. Ne; li ne iros al ŝi. Li estas ja digna viro...

Sed ĉe la morgaŭa mateno lia volo ŝajnis moligita de la dormo "Kial ne?" sin redemandis la matadoro. Li bezonas vidi ŝin ankoraŭ alian fojon. Ŝi estas laŭ li la ĉefa virino, kiun li ĝis tiam konis: ŝi altiris lin per tute malsama forto, ol la aliaj virinoj "Mi amas ŝin" diris al si la toreadoro, konfesante sian karakteran malfortaĵon... Ve! Kiom multe li suferis pro tiu longa malkunesto!...

La terura kornovundo en la cirko de Seviljo ĉesigis per ĝia kruda, fizika doloro lian aman, ofenditan dignosenton. La vundkuracado kaj poste lia dolĉa reamikiĝo kun Karmeno dum resaniĝado rezignaciigis lin pri sia malfeliĉaĵo. Sed forgesi!... Tio neniam. Li klopodis por ne plu memori pri tiu pasinta afero, sed eĉ plej malgrava okazaĵo: iri sur vojo, tra kiu li galope rajdis kun la bela sinjorino; renkonti strate blondan anglinon; interparoli kun tiuj junaj sinjoroj de Seviljo, kiuj estas ŝiaj parencoj; ĉio revivigis la imagbildon de Doña Suno. Ve, tiu ĉi virino!... Li certe ne trovos alian, kiel ŝin. Ĉar li perdis ŝin, Gallardo kredis, ke li posteniris pri rango. Li jam ne estas la sama. Li sin opiniis sur malpli supera ŝtupo en la sociala ŝatado. Eĉ li atribuis al ŝia forlaso la profesian malsukceson. Kiam li havis ŝin, li estis pli kuraĝa. La malbonsorto de la toreadoro komenciĝis en la momento mem, kiam la blondulino foriris. Se ŝi revenus, la gloraj tempoj certe renaskiĝus. Lia animo, fojojn subtenate kaj fojojn embarasate de siaj superstiĉoj, firme kredis tion.

La deziro vidi ŝin eble estis feliĉa antaŭsento egala al tiuj tiel ofte savintaj lin en la areno. Kial ne?... Li multe fidis pri si mem. Tiu facileco, per kiu li triumfis ĉe virinoj blindigitaj de lia famo, kredigis al li, ke lia persono estas ja nerezisteble alloga. Eble Doña Suno, vidante lin post tiel longa foresto... Jes, eble!... Ĉe la unua intervido kun ŝi en ambaŭa soleco tio okazis.

Kaj Gallardo, certa pri sia bonsorto, kun tiu kuraĝa trankvilo propra al sukcesulo nepre vekanta amdeziron en tiun, antaŭ kiu li estas, iris al Pariza Hotelo. lokita proksime.

Li estis devigata atendi pli longe, ol duonhoron, sur sofo, scivole rigardate de la hotelaj oficistoj kaj gastoj, kiuj aŭdis lian nomon.

Servisto invitis lin iri en lifton kaj lin kondukis poste en salonon ĉe la unua etaĝo, tra kies balkonoj oni povis vidi Sunpordon malhela, kun nigraj tegmentoj. trotuaroj kaŝataj de ombrelfluoj kaj placmezo pavimita per brila asfalto trairata de rapidaj veturiloj, kiujn pluvo vigligis, aŭ de tramoj irantaj ĉiudirekten senĉese tintante, por averti la piedirantojn, surdaj pro siaj dikaj, levitaj ŝirmokolumoj.

Malfermiĝis pordeto ŝajne ne ekzistanta en la tapetita muro, kaj Doña Suno aperis inter bruetantaj silkaĵoj kun forta parfumodoro de freŝa kaj blondulina karno kaj la tuta brila ĉarmo de sia vivsomero.

Gallardo avide rigardadis ŝin entute, kiel tiu, kiu bone konas kaj ne forgesas

detalojn. Same, kiel en Seviljo!... Ne; eble ankoraŭ pli bela, pli tentanta pro sia longa foresto.

Ŝi prezentis sin per eleganta negliĝo, vestite per fremda robo kaj ornamite per strangaj juveloj same, kiel li vidis ŝin unuafoje en ŝia Sevilja hejmo. Ŝiaj piedoj estis enigitaj en orkovritaj pantofloj, kiuj, kiam ŝi sidiĝis kaj krucis siajn krurojn, ŝajnis pretaj fali de la malgrandaj ekstremaĵoj. Ŝi etendis al li sian manon, ridetante per malvarma afableco.

— Kiel vi fartas, Gallardo?... Mi jam sciis, ke vi estas en Madrido. Mi vidis vin.

Vi!... Ŝi jam ne plu parolis al li je "ci", kiel altrangulino, al kiu li respekte respondas je "vi", ĉar sin konsideris amanto el malsupera klaso. Ĉi tiu "vi" ŝajne egaliganta ilin malesperigis la spadulon. Li volis esti, kvazaŭ servutulo levata pro amo ĝis la brakoj de tiu nobela sinjorino kaj li sin trovis traktata per tiu malvarma kaj ĝentila maniero, kiun vulgara amiko inspiras.

Ŝi klarigis, kiel vidis Gallard'on ĉeestante la unuan taŭrfeston okazintan en Madrido. Ŝi estis irinta en la cirkon kun fremdulo, kiu avidis koni la hispanajn, tipajn aferojn; amiko, kiu akompanis ŝin dum la vojaĝo, sed gastis en alia hotelo.

Gallardo respondis per jesa balancado je kapo. Li konis tiun fremdulon; li vidis lin ŝin akompananta.

Ambaŭ silentis dum kelkaj sekundoj, ne sciante, pri kio paroli. Doña Suno estis, kiu unue rompis ĉi tiun paŭzon.

Ŝi trovas la spadulon bonaspekta: neprecize memoras ŝi pri taŭratingo, kiun li ricevis: ŝi estas preskaŭ certa, pri tio ke telegrafis Seviljon petante sciigon. Pro tia vivmaniero, ĉiam de lando en landon kaj kun novaj amikaĵoj, ŝi tiom multe intermiksas siajn memorojn!... Sed nun ŝi vidas lin sana, kiel ĉiam kaj dum la taŭrfesto li ŝajnis al ŝi bravbela kaj forta, kvankam iom malbonsorta. Ŝi ja ne estas tre sperta pri taŭrarto.

— Ĉu ne gravis tiu taŭratingo?

Gallardo incitiĝis pro la indiferenta tono, per kiu tiu virino demandis tion ĉi. Kaj li dume nur pri ŝi pensanta, kiam estis inter vivo kaj morto!... Per malafableco kaŭzata de ofendita memestimo li parolis pri sia kornovundo kaj resaniĝado, kiu daŭris dum la tuta vintro.

Ŝi aŭskultis lin, ŝajne interesate, sed liaj okuloj montris indiferenton. Neniel ŝin kortuŝis la malfeliĉaĵoj de tiu batalisto... Ili ja estas profesiaj okazaĵoj nur por li interesaj.

Kiam Gallardo parolis pri sia resaniĝado en la bieno, ekvenis en lian memoron pro iderilato la bildo de homo, kiun Doña Suno kaj li estis samtempe konantaj.

— Kaj, ĉu vi memoras pri Plumeto?... Oni murdis la malfeliĉulon. Mi ne scias, ĉu vi jam konas tion.

Ankaŭ Doña Suno malklare memoris pri tio. Ŝi eble legis ĝin en la Parizaj

gazetoj, kiuj multe temis pri la bandito, konsiderante lin interesplena tipo el Hispanlando.

— Jen kompatindulo — diris indiferente Doña Suno —. Mi apenaŭ memoras, ke li estis kruda kaj ne interesa kampulo. De malproksime oni taksas ĝuste la aferojn. Kion mi plej bone memoras, tio estas lia tagmanĝo kun ni en la bieno.

Gallardo ankaŭ memoris pri tiu ĉi okazaĵo. Malfeliĉa Plumeto! Kiel emociite li gardis floron, kiun Doña Suno prezentis al li!... Ĉar, ĉu ŝi ne memoras esti doninta floron al la bandito, kiam ŝi adiaŭis lin?

La okuloj de Doña Suno montris sinceran miron.

— Ĉu vi estas certa pri tio?— ŝi demandis —. Ĉu tio estas vera? Mi ĵuras al vi, ke mi tute ne memoras... Ha! Tiu suna lando! La ebrieco kaŭzata de pentrindaĵoj! Kiajn malsaĝaĵojn oni faras!...

Ŝiaj ekdiroj montris iom da pento. Poste ŝi ekridis.

— Kaj tre eble tiu malfeliĉa kampulo gardis la floron ĝis la lasta momento. Ĉu ne, Gallardo? Tio okazis certe. Al li oni donis neniun alian floron en lia tuta vivado... Kaj ankaŭ eble sur lian kadavron oni trovis tiun velkintan floron, kiel mistera rememorigaĵo, kies signifon neniu konis... Ĉu vi, Gallardo, scias ion pri ĉi tio? Ĉu neniom diris la gazetoj?... Silentu: Ne diru, ke ne: ne malaperigu mian revon. Tiel ĝi devis okazi: mi volas, ke ĝi tiel estu okazinta. Malfeliĉa Plumeto! Kiel interesplena tipo! Kaj mi, kiu jam forgesis tiun aferon de la floro!... Mi rakontos ĝin al mia amiko, kiu intencas verki pri la pentrinda Hispanlando.

La mencio je ĉi tiu amiko, duafoje en malmultaj minutoj aperinta en la konversacio, malgajigis la toreadoron.

Li rigardis fikse la belan sinjorinon per siaj arabaj okuloj larmeme melankoliaj, kiuj ŝajnis humile peti kompaton.

— Doña Suno!... Doña Suno!... li murmuris per malespera tono, kiel se li plendis kontraŭ ŝi pro ŝia krueleco.

— Kio okazas, mia amiko? — ŝi demandis ridetante —. Kio estas ĉe vi?

Restis silenta Gallardo kaj mallevis sian kapon, timigite de la ironia rigardo de tiuj helaj, orharaj okuloj.

Poste rektiĝis per decida maniero.

— Kie vi estis dum tiel longa tempo, Doña Suno?...

— Tra la mondo — ŝi respondis neafekte —. Mi estas pasbirdo. En multaj urboj, kiujn vi certe eĉ nek nome konas.

— Kaj ĉu tiu fremdulo, kiu vin akompanas nuntempe, estas... estas?

— Amiko — ŝi diris malvarme —. Amiko, kiu bonvolis akompani min, profitante la okazon por koni Hispanlandon. Tre inteligenta kaj altranga homo. De tie ĉi ni ambaŭ vojaĝos en Andaluzion, kiam li elvidos la muzeojn. Kion vi deziras scii plu?...

En ĉi tiu demando arogante dirita oni rimarkis nepran volon ne lasi al la to-

readoro iri en familiarecon, restarigi inter ambaŭ la sociklasajn diferencojn. Gallardo perdis sian memfidon.

— Doña Suno! — li ĝemis naive —. Via konduto al mi estas nepardonebla. Vi agis malice pri mi, ja tre malice... Kial vi forkuris, dirante nenion?

Kaj liaj okuloj malsekiĝis, dum li fermis malespere la pugnojn.

— Ne malĝoju tiel, Gallardo. Kion mi faris, tio estis grava bono al vi... Ĉu ankoraŭ vi ne konas sufiĉe min? Ĉu vi ne laciĝis subporti mian karakteron?... Se mi estus viro, mi forkurus el virinoj kiaj mi. La malfeliĉulo, kiu enamiĝas je mi, estas ja memmortiganto.

— Sed, kial vi foriris? — insistis Gallardo.

— Mi foriris, ĉar estis tedita. Ĉu mi parolas klare?... —. Kaj, kiam mi enuas, rajtas forkuri por serĉi novajn amuziĝojn. Mi terure enuas ĉie: Kompatu min.

— Sed mi amas vin tutkore! — ekdiris la toreadoro per drama kaj naiva maniero, kiu certe ridigus dirate de alia viro.

— Mi amas vin tutkore! — ripetis Doña Suno imitante lian elparolon kaj geston —. Nu, kion altrudas tio?... Ha, ĉi tiuj egoistoj, kiuj, ĉar estas aplaŭdataj de la amaso, kredas, ke ĉio en la mondo estis kreata nur por ili!... "Mi amas vin tutkore kaj tio ĉi devas sufiĉi, por ke vi ankaŭ amu min...". Nu, ne sinjoro. Mi ne amas vin, Gallardo. Vi estas mia amiko kaj nenio plu. Tio de Seviljo estis nur bela revo, freneza kaprico, pri kiu mi apenaŭ memoras kaj kiun forgesi konvenas al vi.

La toreadoro stariĝis, irante al ŝi kun etenditaj manoj. Li ne sciis, kion diri, divenante, ke liaj mallertaj vortoj tute ne taŭgis, por konvinki tiun virinon. Li fidis al la ago siajn dezirojn kaj esperojn kaj intencis per arda nepripenso kapti ŝin, ŝin altirante apud lin, por forigi tiel la glacian muron ilin disigantan.

— Doña Suno! — li petegis, etendante siajn manojn.

Sed ŝi per simpla manbato de sia vigla, dekstra mano flankenigis la toreadorajn brakojn. Fiera kaj kolera fulmo ekbrilis sur ŝiaj okuloj, kaj atakeme ŝi antaŭenigis sian buston, kvazaŭ oni estus ŝin insultinta.

— Haltu, Gallardo!... Se vi daŭrigos tian konduton, vi ne plu estos mia amiko, kaj mi forpeligos vin.

La toreadoro falis de la ago en grandan konsternon kaj restis laŭ humila kaj hontanta sinteno. Tiel pasis kelke da tempo, ĝis kiam Doña Suno fine ekkompatis Gallard'on.

— Ne estu, kiel infano — ŝi diris —. Por kio voli tion, kio jam estas neebla? Por kio pensi pri mi?... Vi havas vian edzinon, kiu laŭ mia scio estas bela kaj simpla; bona kamaradino. Kaj, se vi ne amas ŝin, aliajn. Konsciu kiom multe da belaj virinoj estas en Seviljo el tiuj, kiuj portas ŝalon kaj surkapajn florojn, el tiuj, kiuj min tiom multe plaĉis antaŭe kaj konsideros granda feliĉaĵo esti amataj de Gallardo. Tio mia jam finiĝis. Al vi doloras via fiereco de fama viro kutimi-

ĝinta al sukceso; sed tiel estas; tio finiĝis: amiko kaj nenio pli. Mi estas alia afero. Mi enuas kaj neniam reiras sur sama vojo. Revoj nur daŭras mallonge ĉe mi kaj pasas ne lasante postsignojn. Mi estas kompatindulino; kredu min.

Ŝi rigardis la toreadoron per kompatemaj kaj scivolaj okuloj, kiel se ŝi divenis subite ĉiujn liajn krudajojn kaj malperfektajojn.

— Mi pensas pri aferoj, kiujn vi ne komprenus — ŝi daŭrigis —. Al mi vi sajnas alia. La Sevilja Gallardo estis diferenca al tiu de ĉi tie. Mi ne dubas, pri tio ke vi estas la sama...; sed por mi vi estas alia... Kiel mi klarigos al vi ĉi tion?... En Londono mi konis raĵaon... Ĉu vi scias, kio estas raĵao?

Gallardo skuis nee sian kapon, dum liaj vangoj ruĝetiĝis, hontante pro sia malklereco.

— Ĝi estas hinda princo.

La antikva ambasadoredzino memoris pri tiu hinda altrangulo; pri lia kuprebruna vizaĝo kun nigraj lipharoj; pri lia blanka, grandega turbano kun dika, blindige brila brilianto sur ĝia fronto; pri la ceteraj korpopartoj kovritaj per helaj vestaĵoj kaj delikataj kaj pluraj vualoj, similaj al korolaj florfolioj.

— Li estis bela; li estis juna; li adoris min per siaj misteraj okuloj de arbara besto; kaj mi tamen opiniis lin ridinda kaj lin mokis ĉiufoje, kiam li balbutis angle iun el siaj orientaj ĝentilaĵoj. Li tremis pro malvarmo; nebulo tusigis lin; li moviĝis, kvazaŭ birdo sub pluvo, skuante siajn vualojn same, kiel se ili estus malsekaj flugiloj... Kiam li parolis al mi pri amo, min rigardante per siaj gazelaj okuloj, mi ekdeziris aĉeti al li surtuton kaj ĉapon, por ke li ne plu tremu. Kaj tamen mi konfesas, ke li estis bela kaj ke li taŭgis por feliĉigi dum kelkaj monatoj virinon avidantan ion eksterordinaran. Tio nur estis media, sceneja afero... Vi, Gallardo, ne scias, kion signifas tio.

Kaj Doña Suno restis pensema, memorante pri la malfeliĉa raĵao ĉiam tremanta pro malvarmo, kun liaj ridindaj vestaĵoj en la nebula lumo de Londono. Ŝi imagis lin tien, en lian landon, aliformita de lia majesta posteno kaj la sunlumo. Lia kuprebruna haŭto meze de la verdaj koloroj de la tropika vegetaĵaro ŝajnis el arta bronzo. Ŝi pense vidis lin sur lian paradan elefanton kun longaj, oraj subselkovraĵoj, kies malsupraj randoj ŝoviĝis sur tero, kaj eskortata de batalemaj rajdistoj kaj sklavoj, kiuj portis parfumantajn fajrujojn. Ŝia imagpovo bildis lian dikan turbanon ornamitan de blankaj plumoj kaj gemoj; lian bruston kovritan per briliantaj ordensignoj; lian talion zonatan de larĝa rubando el smeraldoj, de kiu pendis ora, kurba sabro; ĉirkaŭ lin, bajaderojn kun pentritaj okuloj kaj malmolaj mamoj; drezitajn tigrojn; multegon da starantaj lancoj; kaj ĉe la fonon, pagodojn kun pluraj, supermetitaj tegmentoj kaj pendantaj sonoriloj, kiuj dissendis misterajn sinfoniojn eĉ pro plej delikata zefireto; palacojn kun milde malvarmetaj kortoj kaj sekretaj koridoroj; verdajn densaĵojn, en kies duonlumo saltadis kaj rampadis sovaĝaj, multkoloraj bestoj... Ho la medio! Se ŝi estus vi-

dinta tiel la malfeliĉan raĵaon, fiere bela, kiel dio, sub seka ĉielo intense lazura kaj meze de tia brileco kaŭzata de arda suno, ŝi certe ne estus tentita donaci al li surtuton. Tre eble ŝi mem estus irinta al liaj brakoj, sin donante, kiel ama sklavino.

— Vi memorigas al mi la raĵaon, amiko Gallardo. Tie en Seviljo kun via kampa kostumo kaj la pikstango sur ŝultro vi estis tre bone. Vi estis pejzaĝa kompletigaĵo. Sed ĉi tie!... Madrido multe eŭropiĝis: nun ĝi estas urbo, kiel la aliaj. Jam ne ekzistas popolaj kostumoj. La Manilaj ŝaloj apenaŭ estas vidataj ekster la scenejoj. Ne konsideru vin ofendita, Gallardo; sed, mi ne scias kial, vi memorigas al mi la hindon.

Ŝi rigardis tra la balkonaj vitroj la pluvan kaj malgajan ĉielon, la malsekan placon, la neĝajn flokojn maldense falantajn, la personaron, kiu rapidis sub la multe gutegantaj ombreloj. Poste ŝi direktis siajn okulojn al la spadulo, rimarkante mire lian hartufon etenditan sur la kranio, lian kombaĵon kaj ĉapelon, unuvorte, ĉiujn detalojn proprajn je la profesio, kiuj kontrastis kun lia moderna kaj eleganta kostumo.

La toreadoro estis laŭ opinio de Doña Suno ekster "sia kadro". Ve, tiu Madrido pluvanta kaj malgaja! Ŝia amiko, kiu venis revante pri eterne lazurĉiela Hispanlando, estas konsternita. Ŝi mem, vidante sur la trotuaron apud la hotelon la grupojn de junaj, brave sintenantaj toreadoroj, pensis nevole pri la alilandaj bestoj portataj de sunaj landoj en la zoologiajn ĝardenojn, kie regas griza lumo kaj pluvema ĉielo. Tie, en Andaluzio Gallardo estis la heroo, la spontanea produktaĵo de tiu lando de taŭraroj. Ĉi tie li ŝajnas al ŝi aktoro pro lia tute razita vizaĝo kaj liaj nenaturaj manieroj propraj al homo kutimiĝinta al la publika aklamo: aktoro, kiu anstataŭ dialogi en scenejo vekas tragedian emocion batalante kontraŭ bravbestoj.

Ho! La trompema allogo de la sunaj landoj! La reviganta ebrieco pro lumo kaj koloroj!... Kaj ŝi, kiu amis dum kelkaj monatoj tiun krudan kaj maldelikatan viron kaj laŭdis, kiel se ili estus spritaĵoj, liajn plebajn malklerajojn kaj eĉ postulis, ke li ne forlasu siajn morojn, ke li odoru taŭre kaj ĉevale, ke li ne malaperigu per parfumoj la bravbestan atmosferon, kiu ĉirkaŭis lin!... Ho, la medio! Kiajn frenezaĵojn ĝi farigas!...

Ŝi memoris la danĝeron perei, en kiu ŝi estis antaŭ atakanta taŭro. Poste, sian tagmanĝon kun la bandito, kiun ŝi aŭskultis per admira atentego kaj al kiu ŝi fine donis floron. Kiaj malsaĝaĵoj! Kiel malproksima ŝi nun konsideras ĉion ĉi!...

El tiu pasintaĵo kaŭzanta al ŝi penton pro ridindeco nur restas nun tiu forta viro nemova antaŭ ŝi, kun humile petegantaj okuloj kaj infana obstino por revivigi tiajn tempojn... Malfeliĉulo! Kvazaŭ oni povus ripeti la frenezaĵojn, kiam oni pensas senpasie kaj mankas revemeco; ĉarma kapablo de la homa spirito!...

— Ĉio finiĝis — diris Doña Suno —. Estas necese forgesi la pasinton, tial ke,

se ni vidas ĝin duafoje, ĝi ne estas ornamata de samaj koloroj. Mi ja multe dezirus, ke miaj okuloj estus, kiel alitempe!... Kiam mi nun revenas en Hispanlandon, ĝi ŝajnas al mi alia. Vi ankaŭ estas malsama, ol kiam mi konis vin. Eĉ mi kredis rimarki la alian tagon, vidante vin en la arenon, ke vi ne tiel multe kuraĝis..., ke la publiko malpli entuziasmiĝis.

Ŝi diris tion tute naive, sen intenco ĝeni; sed Gallardo kredis diveni ĉe ŝia voĉo iom da moko kaj mallevis sian kapon, dum liaj vangoj ruĝiĝis.

"Malbenaĵo!". La profesiaj priokupoj renaskiĝis en lia penso. Ĉar li ne proksimiĝas nun sufiĉe al la taŭroj, okazas al li ĉiuj ĉi malbonaĵoj. Ŝi klare diris tion al li. Ŝi opinias lin alia". Se li ree estus la antikva Gallardo, eble ŝi pli bone akceptus lin. Virinoj nur amas la bravulojn.

Kaj la toreadoro eraris pri tiuj juĝoj, konsiderante mortintan por ĉiam kapricon momenta, ama malinklino, kiun li povos venki per multe de kuraĝaĵoj.

Doña Suno stariĝis. La vizito rezultis longa kaj la toreadoro ŝajne ne intencis foriri, kiel se li deziris resti apud ŝi, fidante konfuze pri sortŝanĝo rekunigonta ilin.

Gallardo estis devigata imiti ŝin. La altrangulino klarigis sian decidon, ĉar bezonas eliri. Ŝi atendas sian amikon: ambaŭ estas irontaj kune al Muzeo Prado.

Poste ŝi invitis lin tagmanĝi alian tagon. Intima tagmanĝo en ŝiaj ĉambroj. La amiko ankaŭ venos. Lin nedubeble plaĉos vidi de proksime toreadoron. Apenaŭ li scias paroli hispane, sed li ĝojos koni Gallard'on.

La spadulo premis ŝian manon, respondante per konfuzaj vortoj kaj eliris el la ĉambro. Kolero malklarigis lian vidadon: liaj oreloj zumis.

Ŝi adiaŭis lin tiel malvarme, kiel ĝenantan amikon! Kaj tiu virino estas la sama, kiel en Seviljo!... Kaj ŝi invitis lin tagmanĝi kun ŝia amiko, por ke ĉi tiu ĝoju ekzamenante lin de proksime, kvazaŭ strangan beston!...

Malbenaĵo! Li ja estas energia viro... Tio finiĝis. Li ne plu vidos ŝin.

IX

En tiuj tagoj Gallardo ricevis kelkajn leterojn de Don Josefo kaj de Karmeno.

La kontraktfaristo intencis kuraĝigi la matadoron, konsilante, kiel ĉiam, ke li iru rekte al la taŭro... "Jen! spadpiko kaj finita afero": sed malgraŭ lia entuziasmo oni rimarkis ĉe li ian senesperon, kiel se lia kredo komencis ruiniĝi kaj li jam ekdubis, ĉu Gallardo estas "la plej brava homo el la mondo".

Li jam ricevis sciigojn pri la malamikeco, per kiu la publikoj akceptis lin. La lasta taŭrfesto en Madrido malkuraĝigis Don Josefon. Ne; Gallardo ne estas kiel aliaj spaduloj, kiuj malatentas la fajfadojn de la publiko, nur dezirante gajni monon. Lia matadoro estas profesia dignulo kaj nur povas iri en arenon por esti entuziasme akceptata. Ludi mezbone egalvaloras, kiel malvenko. La homamaso kutimiĝis admiri lin pro lia granda kuraĝego kaj ne persisti en tia sentimeco estas ja malsukceso.

Don Josefo intencis scii, kio okazas al la spadulo. Ĉu manko de kuraĝo?... Neniam. Li eĉ lasus, ke oni mortigus lin, antaŭ ol konfesi ĉi tiun mankon ĉe sia heroo. Certe tio okazis, ĉar li estas laca, ĉar li ankoraŭ ne tute resaniĝis el sia vundo. Kaj tiucele — li konsilis en ĉiuj siaj leteroj — "pli bone estas, ke vi ne ludbatalu kaj ripozu dum kelke da tempo. Poste vi alifoje ludbatalos kaj estos la ĉiama famulo...". Li proponis sin por aranĝi ĉion ĉi. Kuracista dokumento sufiĉos por certigi lian momentan netaŭgecon kaj la kontraktfaristo konsentos kun la cirkaj impresarioj pri la neplenumotaj kontraktoj, sendante novulan matadoron, kiu certe anstataŭos Gallard'on ŝanĝe de negranda monkvanto. Ili eĉ gajnos monon per ĉi tiu rimedo.

Karmeno estis pli arda pri siaj petoj kaj iris rekte al sia afero. Li devas ne plu ludbatali: li devas "tondi sian vosteton", kiel diras la samprofesiuloj, kaj iri en *Rinconada'n* aŭ en sian Seviljan hejmon, por trankvile vivadi tie kun siaj familianoj, kiuj estas la nuraj personoj vere amantaj lin. Ŝi ne povas kvietiĝi: ŝi nun pli multe timas, ol en la unuaj jaroj de sia edziniĝo, kiam ĉiu taŭrfesto kaŭzis al ŝi tiel teruran maltrankvilon kaj kruelan atendon. Ŝi antaŭsentas per tiu virina instinkto malofte eraranta pri siaj timoj, ke grava malbonaĵo estas okazonta. Apenaŭ ŝi dormas: ŝi pensas malkuraĝigite pri la noktaj horoj kun ĝiaj sangaj sonĝoj.

Poste la edzino de Gallardo furiozis en siaj leteroj kontraŭ la publiko. Amaso da maldankemuloj, kiuj jam ne memoras pri tio, kion la toreadoro faris en aliaj okazoj, kiam li fartis pli fortike. Maliculoj dezirantaj lian morton por sin amuzi, kiel se ŝi ne ekzistus, kiel se li ne havus patrinon: "Johano, panjo kaj mi tion ĉi petas al vi: Lasu vian profesion. Por kio plu ludbatali? Ni havas sufiĉe por vivadi kaj min multe ĉagrenas scii, ke tiu fipersonaro insultas vin valorante malpli, ol vi... Kaj kio okazus, se alia malfeliĉaĵo trafus vin? Ho, Dio! Mi certe freneziĝus".

Ĉi tiuj leteroj priokupigis Gallard'on. Lasi sian profesion!... Kia malsaĝaĵo! Virina konsilo! Tion oni povas diri facile, instigate de la amo, sed ĝi estas tute nerealigebla. "Tondi sian vosteton", estante tridekjara! Kiom multe la malamikoj ridus! Li "ne rajtas" lasi sian profesion, dum li estas nekriplita kaj kapablas ludbatali. Neniam okazis tia absurdaĵo. Mono ne estas ĉio. Ĉu gloro ne ekzistas? Ĉu ankaŭ ne la profesia digno? Kion dirus pri li tiuj multaj miloj da entuziasmaj

partianoj, kiuj admiras lin? Kion li respondus al la malamikoj, kiam ili asertus, ke Gallardo lasis sian profesion pro timo?...

Krom tio la matadoro pensis, ĉu lia havaĵo permesus al li tiun ĉi solvon. Li estas riĉa kaj ne. Lia sociala situacio ne firmiĝis. Ĉio, kion li posedas, estas afero de la unuaj jaroj post lia edziĝo, kiam li plej multe ĝojis, ŝparante por surprizi Karmenon kaj panjon per sciigo al ili pri novaj akiraĵoj. Poste li ankaŭ gajnis monon eble pli multkvante, sed ĝi disiĝis kaj malaperis tra senfina nombro da truoj fariĝintaj en lia nova ekzistado. Li multe vetludis kaj luksege vivadis. Kelkaj kampoj aldonitaj al la vasta bieno por ĝin kompletigi estis aĉetataj per mono, kiun pruntis Don Josefo kaj aliaj amikoj. Vetludado devigis lin pruntepeti al kelkaj aliurbaj taŭremuloj. Li estas riĉa, sed, se li lasus sian profesion kaj sekve perdus la belegan enspezon, kiun liveras ludbatalado (de ducent-mil ĝis tricent-mil pesetoj ĉiujare), li estus devigata, post pagado je siaj ŝuldoj, vivadi, kiel kampa sinjoro, per la gajno produktata de la biena kulturado, ŝparante kaj li mem viglante la laborojn, ĉar ĝis tiam *Rinconada,* forlasite laŭ regado de dungitoj, apenaŭ monliveris.

Tiu ĉi nebrila, terkulturista ekzistado, ĉe kiu oni ĉiam estas devigata ŝpari kaj batali kontraŭ la malabundo, timigis Gallard'on; belforta kaj ornama homo kutimiĝinta al la publika aplaŭdado kaj al la multemona elspezado. Lia riĉeco estis elasta afero kreskanta, laŭ tio ke li progresis en sia profesio, sed ĝi neniam tute sufiĉis por liaj bezonoj. Alitempe li sin konsiderus riĉega per nur malgranda parto de sia nuna havaĵo... Nuntempe li fariĝus preskaŭ malriĉulo, se li rezignus ludbataladi. Li estus devigata ne plu aĉeti Habanajn cigarojn, kiujn li disdonis abunde, nek andaluziajn vinojn ja multekostajn; li estus devigata deteni sian altrangulan donacemon kaj ne plu krii "Mi invitas ĉiujn" en kafejoj kaj trinkejoj; malavaremo propra al homo kutimiĝinta batali kontraŭ la morto, pro kio li igis sian vivadon freneza elspezado: li estus devigata malvarbi la trupon el parazitoj kaj flatemuloj, kiuj svarmis ĉirkaŭ li, ridigante lin per siaj ploremaj petoj, kaj, kiam iu el belaj popolvirinoj irus al li (se iu venus, sciante ke li ne ludbataladas), li jam ne povus paligi ŝin pro emocio, metante ĉe ŝiajn orelojn orelringojn el oro kaj perloj, nek amuziĝi makulante per vino ŝian riĉan, Manilan ŝalon, por poste surprizi ŝin per alia pli valora.

Tiel li vivadis kaj tiel li bezonas vivi estonte. Li estas el la tipaj, antikvaj toreadoroj tiel, kiel oni ĝenerale konscias taŭran matadoron: malavara, belforta, skandale elspezema, ĉiam preta helpi per princindaj almozoj la malfeliĉulojn, se ĉi tiuj sukcesis emocii lian maldelikatan sentimentalecon.

Gallardo mokis multajn el siaj kamaradoj, novespecaj toreadoroj, vulgaraj sindikatanoj el la ludbatala industrio, kiuj vojaĝas de cirko en cirkon, kiel komercaj agentoj kaj estas ordemaj kaj detalemaj pri siaj elspezoj. Kelkaj el ili, kiuj estas preskaŭ infanoj, portas en sia poŝo, por kalkuli sian monstaton, notka-

jeron, en kiun ili notas eĉ la kvincentiman moneron pagitan por akva glaso en stacidomo. Ili nur rilatas kun riĉuloj, por akcepti iliajn donacojn, eĉ nek pensante foje, siaparte inviti iun. Aliaj hejme boligis grandajn potojn da kafo, kiam proksimiĝis la vojaĝa sezono, kaj portis kun si en boteloj la nigran fluidaĵon, kiun ili revarmigis en la hoteloj, por eviti al si tiun elspezon. La viroj el kelkaj toreadoraj bandoj eĉ malsatas, grumblante publike kontraŭ la avareco de siaj majstroj.

Gallardo ne pentis pri sia luksega vivado. Kaj, ĉu ili volas, ke li rezignu ĝin? Plie, li pensis pri la necesoj de sia propra hejmo, kie ĉiuj kutimiĝis al facila, oportuna kaj senĝena ekzistado, kiel familio nebezonanta kalkuli la monon nek priokupiĝi pri ĝia gajno, ĉar vidas, ke ĝi senĉese fluas, kvazaŭ fonto. Krom sia patrino kaj sia edzino, li havas ankaŭ sur si la alian familion, t. e: lia fratino, lia babilema bofrato, kiu ne laboris, kiel se esti parenco de famulo rajtigus lin paraziti, kaj la tuta trupo de genevetoj, kiuj kreskis kaj estas ĉiufoje pli multe elspezigaj. Kaj li tiel estus devigata trudi ordon kaj moderon al ĉiuj ĉi personoj kutimiĝintaj vivadi per lia mono laŭ gaja kaj malŝparema senzorgo!... Kaj ĉiuj, eĉ la malfeliĉa Strekaro, estus devigataj loĝi en la bieno, kie ili fariĝus rostitaj de la suno kaj brutaj, kiel kampuloj! Kaj la kompatinda panjo jam ne povus gajigi siajn lastajn vivtagojn per malavaraj helpoj, disdonante monon al la malriĉaj virinoj el la kvartalo kaj malrektiĝante, kiel hontema infanino, kiam ŝia filo ŝajne koleras, tial ke el cent duroj donitaj al ŝi antaŭ du semajnoj restas nenio!... Kaj Karmeno, kiu estas ŝparema, rapidus malgrandigi la elspezojn, sin oferante unuavice per neakiro je multaj vantaĵoj, kiuj allogigas ŝian ekzistadon!...

Malbenaĵo!... Ĉio ĉi signifus malaltiĝo de la familia rango, malgajeco ĉe lia hejmo. Gallardo hontis pensante, ke tio povus okazi. Ja estus krimo, ne plu liveri al ili tion, pri kio li mem ilin kutimigis. Nu, kio estas necesa por eviti ĉion ĉi?... Tute simple, pli multe proksimiĝi al la taŭroj: ludbatali kiel antaŭe... Li nepre proksimiĝos!

Li respondis la kontraktfariston kaj Karmenon per mallongaj kaj pene skribitaj leteroj, kiuj montris lian firman volon neniam lasi ludbatali.

Li nepre decidis ludi, kiel ĉiam ludis; li ĵuris tion al Don Josefo. Agos li laŭ liaj konsiloj: "Jen! spadpiko kaj ĉio finita". Lia koro ŝvelis kontenta kaj li sentiĝis kapabla fulme mortigi ĉiujn taŭrojn eĉ plej grandajn.

Rilate al sia edzino li montriĝis gaja, kvankam iom ofendita, ĉar ŝi ŝajnis dubi pri lia taŭgeco. Jam ŝi ricevos sciigojn pri la tuja taŭrfesto. Li mirigos la publikon, por ke ĝi hontu pro siaj antaŭaj insultoj. Se la taŭroj estos bonaj, li ludos, kiel Roger de Flor mem..., tiu famulo, kies nomon tiel ofte diras lia malsaĝa bofrato.

La bonaj taŭroj! Ĉi tio estis nun la priokupo de Gallardo. Antaŭe li fieris tute ne pensi pri ili kaj neniam iris en la cirkajn kortojn por ilin vidi antaŭ la taŭrfesto.

— Mi mortigos ĉiun ajn taŭron, kiun oni metos antaŭ min — li diris arogante.

Kaj li konis unuafoje la bravbestojn, kiam ili aperis en la arenon.

Nun li volis ekzameni ilin de proksime, ilin elekti, preparante tiel la sukceson per ĝisfunda studado je iliaj kvalitoj.

La vetero sennubiĝis; la suno brilis: la morgaŭan tagon okazos la dua taŭrfesto.

Gallardo posttagmeze iris sola en la taŭran cirkon. Ĉi tiu el ruĝaj brikoj, kun arabaj fenestroj, montris izole sian konturon sur fono el verdaj montetoj. Funde de ĉi tiu vasta kaj unutona pejzaĝo estis blankaĵo simila al malproksima ŝafaro. Ĝi estis tombejo.

Kiam kelkaj ĉifonuloj vidis la toreadoron en la cirkaj ĉirkaŭaĵoj, iris al li. Ili estis parazitoj el la cirko, vaguloj, kiuj dormas pro kompato en ĝiaj staloj kaj sin nutras per almozoj de taŭremuloj kaj restaĵoj el tio, kion oni manĝas en la proksimaj trinkejoj. Kelkaj el ili venis de Andaluzio okaze de taŭra kondukado, loĝante por ĉiam en la cirkaj apudaĵoj.

Disdonis Gallardo kelkajn monerojn inter ĉi tiuj almozuloj, kiuj sekvis lin kun sia ĉapo mane, kaj eniris la cirkon tra Ĉevaleja pordo.

En la korto li vidis grupon da taŭremuloj ĉeestantaj la provojn de la pikrajdistoj. Kuiraĵo, portante grandajn "bovinspronojn" kaj pikstangon, estis preta rajdi. La stalaj servistoj sekvis la ĉevalliveriston; grasa, kun granda, kordoba ĉapelo, parolmalvigla homo, kiu respondis per trankvila malrapideco la insulteman kaj senpripensan babiladon de la pikrajdistoj.

La "saĝaj simioj", kun siaj ĉemizaj manikoj volvitaj supren, tiris la mizerajn ĉevalaĉojn, por ke la rajdistoj provu ilin. Jam dum kelkaj tagoj oni rajdis kaj dresis tiujn malgajajn ĉevalojn, sur kies flankoj ankoraŭ estis videblaj la spronpikaj postsignoj. Oni trotigis ilin tra la cirka ĉirkaŭaĵo, ilin ŝajne revigligante per la kalkanaj feraĵoj, dum la malfeliĉaj bestoj estis devigataj ronde kuri, por ke ili kutimiĝu al la arena irado. La ĉevaloj revenis en la cirkon kun siaj flankoj tute makulitaj de sango kaj, antaŭ kiam ili eniris la stalon, oni baptis ilin per kelkaj siteloj da akvo. Ĉirkaŭ la ĉevaltrinkvazo konstruita apud ĝi la akvo restanta inter la pavimaj ŝtonoj estis nigre ruĝa, kvazaŭ disverŝita vino.

Oni elirigis preskaŭ trenante la ĉevalojn destinitajn por la morgaŭa taŭrfesto, por ke la pikrajdistoj ekzamenu kaj akceptu ilin.

Antaŭeniris la malgajaj ĉevalmizeraĵoj, montrante per sia trema paŝado kaj siaj turmentitaj flankoj melankolian maljunecon, malsanojn kaj la homan maldankemon, kiu tiel facile forgesas ilian valoran servadon. Iuj estis eksterordinare malgrasaj skeletoj kun akreliĝantaj randoj ŝajne tuj ŝirontaj ilian felon el longaj kaj malglataj haroj. Aliaj viglokulaj kaj kun brila felo moviĝis fiere, paŝante energie per fortaj kruroj; belaj bestoj, pri kiuj estis neeble kompreni, kial oni enkalkulis ilin inter tiuj sentaŭgaj restaĵoj destinitaj por morto: bonegaj ĉevaloj

ŝajne ĵus demetitaj el luksa veturilo. Ĉi tiuj estis tamen plej timindaj: nekuraceblaj bestoj, kiuj malbonfartis pro frenezo aŭ aliaj similaj malsanoj, kaj kiuj okaze falis subite teren, dum la rajdisto malsuprenflugis super ĝiaj oreloj. Kaj post ĉi tiuj ekzempleroj el mizero kaj malsanoj eksonis la feraĵoj de la laborkripluloj; ĉevaloj el panfarejoj kaj fabrikoj, terkulturistaj kaj veturilaj bestoj, ĉiuj dormemaj pro la multjara kutimo treni plugilon aŭ ĉaron, malfeliĉaj "parioj" ekspluatataj ĝis ilia lasta momento, por amuzi la publikon per siaj eksaltoj kaj baraktado, kiam ili eksentis, kiel penetras en ilian ventron la taŭraj kornoj.

Tio estis kvazaŭ procesio el bonemaj, nebrilaj kaj flavetaj okuloj; el falantaj koloj, sur kiuj elsuĉis sangavidaj, ŝvelintaj kaj verdenigraj muŝoj; el multostaj vizaĝoj, sur kies felo insektoj rampis; el multangulaj flankoj kun torditaj tufoj, kiel se ili estus lano; el mallarĝaj brustoj skuataj de pena spirado; el malfortaj kruroj, kiuj ŝajnis proksimaj rompiĝi ĉiupaŝe kaj estis kovrataj de longaj haroj ĝis la hufoj, kvazaŭ ili portus pantalonon. Iliaj stomakoj, malmulte kutimiĝintaj al la nutra greno, per kiu oni intencis revigligi ilian organismon, malbone digestis kaj semis la pavimon per fumantaj ekskrementoj. Por rajdi sur tiuj mizeraj ĉevaloj tremantaj pro frenezo aŭ minacantaj fali pro malforteco estis necese tiom da kuraĝo, kiom por kontraŭstari taŭron. Kelkaj el ili preskaŭ fleksis siajn krurojn, kiam eksentis sur sin la grandan, araban selon kun ĝiaj altaj ekstremaĵoj, flava sidparto kaj bovinistaj piedingoj.

Kuiraĵo arogante traktis kun la ĉevalliveristo, parolante en sia propra nomo kaj en tiu de siaj kamaradoj, kaj ridigis eĉ la "saĝajn simiojn" per siaj gigantaj malbenoj. Lasu al li la aliaj pikrajdistoj diskuti kun la kontraktisto. Neniu pli bone scias, kiamaniere trudi honestecon al tiaj homoj.

Antaŭeniris al li servisto, tirante kapmallevitan ĉevalaĉon kun longaj haroj kaj kompatinde elmontriĝanta riparo.

— Kio estas tio? — diris Kuiraĵo, alparolante la ĉevalkontraktiston —. Tio ne estas ricevebla. Tio estas bestaĉo, sur kiu neniu povas rajdi. Por via patrino!...

La nerapidema kontraktisto respondis per trankvila seriozeco. Se Kuiraĵo ne kuraĝas rajdi sur ĝi, tio estas, tial ke la nuntempaj pikistoj timas pri ĉio. Per tiel bona kaj paca ĉevalo, kiel tiu, sinjoro Calderón, Trigo aŭ alia rajdisto el pasintaj tempoj kapablus piki taŭrojn dum du sinsekvaj tagoj, falante nek eĉ unu fojon kaj sen tio ke la besto ricevus nek eĉ grataĵon. Sed nun!... Nuntempe nur estas multe da timo kaj malmulte da digno.

La pikrajdisto kaj la cevalliveristo sin reciproke insultis per amika trankvilo, kiel se ĉe ili plej gravaj, ofendaj diroj iĝis pro kutimo amuzantaj ŝercoj.

— Vi estas — respondis Kuiraĵo — malhonestulo pli rabema, ol Josefo Mario (65). Sin metu sur tiun ĉi ĉevalaĉon via avino, kiu rajdeflugas sur balailo ĉiujn sabatojn post la dekdua, kiel sorĉistino.

Ridis la ĉeestantoj kaj la kontraktisto nur faris leveti siajn ŝultrojn.

— Nu, kio okazas al ĉi tiu ĉevalo? — li diris trankvile —. Atentu pri ĝi, maliculo! Ĝi estas pli bona, ol aliaj, kiuj malsanas pro morvo aŭ frenezo kaj sur kiuj vi rajdis en la areno, flugante super ĝiaj oreloj, antaŭ kiam vi proksimiĝus al la taŭro. Pli sana ĝi estas, ol pomo. Tio estas tiel vera, ke ĝi dum dudek jaroj trenis ĉaron de fabriko de gastrinkaĵoj, sen tio ke iu ajn mallaŭdis ĝin. Kaj nun vi, kriemulo, parolas pri difektaĵoj kaj insultas ĝin, kiel se ĝi estus herezulo!...

— Nu, mi ĝin ne volas!... Gardu ĝin!

La ĉevalliveristo malrapide proksimiĝis al Kuiraĵo kaj trankvile, kiel spertulo pri tiaj traktoj, li flustris ion en lian orelon. La pikrajdisto ŝajne incitite iris fine apud la ĉevalaĉon. Nu, li cedas. Li ne volas, ke oni konsideru lin egoisto kapabla malutili kamaradon.

Metante piedon en la piedingon, li ŝarĝis la malfeliĉan ĉevalaĉon per sia pezega korpo. Poste li, metinte sian pikstangon sub la dekstran brakon, apogis ĝin kontraŭ grandan trabon enigitan en la muron, pikante tre forte kelkfoje, kiel se li estus antaŭ potenca taŭro. La kompatinda besto tremis kaj duonfleksis siajn krurojn pro tiuj krudaj kolisioj.

— Ĝi ne malbone obeas — diris Kuiraĵo per konsenta tono —. La ĉevalaĉo estas pli taŭga, ol tio, kion mi supozis. Ĝia buŝo estas vigla kaj ĝiaj kruroj fortaj... Via volo plenumiĝis. Oni apartigu ĝin.

Kaj la pikrajdisto tereniĝis preta akcepti ĉion, kion la kontraktisto prezentos al li, post lia mistera flustro.

Gallardo foriris el la grupo de taŭremuloj ĉeestantaj gaje ĉi tiun traktadon. Cirka pordisto akompanis lin en la lokon, kie la taŭroj estis. Li trairis pordeton kaj sin trovis en la kortoj. Masonbarilo alta ĝis homkolo ĉirkaŭis la korton laŭ tri flankoj. Ĉi tiu mureto estis firmigata per dikaj palisoj, kiujn oni kunigis al la supera galerio. De spaco en spaco fendiĝis tiom mallarĝaj elirejoj, ke nur povas ilin trapasi flankeniranta homo. En tiu vasta korto estis ok taŭroj, ĉu kuŝantaj sur siaj kruroj, ĉu starantaj kaj kun mallevita kapo por flari kaj manĝi el la herba amaso, kiun oni metis antaŭ illn.

La toreadoro iris laŭlonge de ĉi tiuj galerioj, ekzamenante la bestojn. De tempo al tempo li eliris tra la mallarĝaj fendoj kaj svingis siajn brakojn, kriante sovaĝe kaj bataleme, por ke la taŭroj moviĝu. Iuj eksaltis ekscite, atakante per mallevita kapo tiun homon venintan ĝeni ilin. Aliaj stariĝis firme kaj atendis per levita kapo kaj malamika sinteno, ke tiu netimemulo proksimiĝos al ili.

Gallardo, kiu rapidis sin kaŝi alifoje post la barilon, ekzamenis la aspekton kaj karakteron de la bravbestoj, sen tio ke li decidis, kiuj du taŭroj estos ludataj de li.

La paŝtista estro staris apud li; atleto kun gamaŝoj kaj spronoj, vestita per dikaj drapaĵoj kaj portanta kampan ĉapelon fiksitan per mentonrimeno. Oni nomis lin vulgare Lupido, kaj li estis maldelikata rajdisto, kiu preskaŭ la tutan jaron

vivadis en la kamparo kaj, kiam iris en Madridon, sen tio ke li deziris viziti ĝin nek iri ekster la cirkajn ĉirkaŭaĵojn, li ŝajnis ja sovaĝulo.

Laŭ lia konscio la ĉefurbo de Hispanlando nur konsistis el cirko kun nefruktodonaj montetoj kaj fosaĵoj ĉe ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kaj pli malproksimen mistera domaro, kiun li neniam deziris koni. Laŭ li plej grava butiko el Madrido estis la trinkejo de Kokino, lokita apud la taŭra cirko; delica, ĉarma palaco, kie li manĝadis je la kostopago de la impresario, ĝis kiam li reiris al la herbejo, rajdante sur sia ĉevalo, kun malhela kovrotuko sur la sela antaŭaĵo, provizsakoj sur ĝia postaĵo kaj pikstango sur ŝultro. Li eniris la trinkejon, ĝuante timigi la servistojn per siaj amikaj salutoj: teruraj premoj, kiuj krakigis la ostojn kaj dolore kriigis ilin. Li ridetis kontenta pro sia forto kaj pro tio ke oni nomis lin "bruta", kaj li sidiĝis antaŭ la manĝotaĵon konsistantan el amaso da viando kaj terpomoj, kiu plenigis teleron grandan, kiel lavpelvo, krom kruĉo da vino.

Li gardis la taŭrojn aĉetitajn de la impresario, iujn fojojn en la paŝtejoj de bieno *Muñoza,* aliajn, kiam varmo estis tro granda, en la herbejoj de montaro *Guadarrama.* Li kondukis ilin en la kortojn du tagojn antaŭ la taŭrfesto, noktomeze, irante trans la malgrandan rivereton *Abroñigal,* ĉe la Madridaj ĉirkaŭaĵoj, akompanate de paŝtistoj kaj rajdistoj. Kiam la malbona vetero malpermesis la feston, kaj sekve la bestaro restis en la cirko, li furiozis, ĉar ne povis baldaŭ reiri en la kvietajn solejojn, kie paŝtiĝis la aliaj taŭroj.

Malgraŭ sia malrapida dirado kaj mallerta penspovo ĉi tiu "centaŭro", kiu odoris lede kaj fojne, arde parolis pri sia paŝtista vivado kun la bravbestoj. Al li ŝajnis malgranda kaj malpli stelhava la Madridan ĉielon. Li priskribis sobre kaj per kruda beleco la herbejajn noktojn kun ĝiaj dormantaj taŭroj sub la disvenanta stellumo kaj la profunda silento ŝirata de misteraj bruetoj el la densaĵo. La montaj kolubroj kantadas per stranga voĉo meze de tiu kvieteco. Ili kantadas, jes. Neniu rajtas diskuti tion al Lupido: li milfoje ĝin aŭdis, kaj dubi pri ĉi tio egalvaloras diri, ke li mensogas, riskante pro tio sperti, kiel pezaj estas liaj manegoj. Kaj same, kiel la rampbestoj kantas, la taŭroj parolas, kvankam li ne sukcesis ankoraŭ kompreni ĉiujn misterojn el ilia lingvo. Estas ili, kvazaŭ homoj, nur kun tiu diferenco, ke ili marŝas kvarpiede kaj havas kornojn. Vidinde estas, kiam ili vekiĝas ĉe la tagiĝo. Ili saltadas ĝoje, kiel infanoj; ili ludas, sin nevere atakante reciproke kaj krucante siajn kornojn; ili intencas rajdi iuj sur la aliajn per brua gajeco, kiel se ili salutis la aperon de la suno, kiu estas ja Dia gloro. Poste li parolis pri siaj malrapidaj ekskursoj en la montaro *Guadarrama* laŭ la riveretoj malsupren portantaj de la montaltaĵoj la degelitan neĝon travideblan, kiel vitro, kaj nutrantan la riverojn; pri la paŝtejoj, kies herboj estas superŝutitaj per floretoj; pri la birdoj, kiuj sin metas inter la kornojn de la preskaŭ dormantaj taŭroj, svingante siajn flugilojn; pri la lupoj malgaje blekantaj nokte, ĉiam malproksime, tre malproksime, kiel se ili timas la bravbestojn, kiuj sekvas

la brutarajn sonorilojn kaj malpliigas ilian montan solecon... Li ne volas aŭdi paroli pri Madrido, kie oni malbone spiradas. Li nur ŝatas el ĉi tiu vastega domamaso, la vinon de Kokino kaj liajn bongustajn kuiraĵojn.

Helpis Lupido la spadulon elekti siajn du taŭrojn. La paŝtista estro ne montris miron nek respekton pri tiuj famuloj, tiom multe admirataj de la ceteraj personoj. Kontraŭe, la taŭra gardisto preskaŭ malestimis la toreadorojn. Mortigi tiel noblajn bestojn per ĉiuspecaj trompoj! Nur ja estas kuraĝulo li, kies vivado trakuras inter ili, ĉiam apud iliaj kornoj, sen plua defendilo ekster sia brako, kaj, sen tio ke oni aplaŭdas lin.

Kiam Gallardo eliris el la korto, alia homo kuniĝis al la grupo, salutante tre respekte la majstron. Li estis maljunulo, kies okupo konsistis purigadi la cirkon. Dum multaj jaroj li plenumis tiun taskon kaj konis ĉiujn famajn toreadorojn el sia epoko. Li malriĉe sin vestis; sed ofte portis fingre virinajn ringojn kaj, por purigi sian nazon, li tiris el sia kitelpoŝo batistan naztuketon, kiu delikate parfumodoris, estis borderita de tre valora punto kaj havis grandajn broditliterojn.

Sen plua helpo li sole dum la semajno balais la grandegan cirkon kun ĝiaj loĝioj kaj laŭŝtupaj benkaroj, neniam plendante pro tiel multa, laciga laboro. Kiam la impresario ne estis kontenta pri li kaj volis lin puni, permesis, ke la bubaro vaganta ĉirkaŭ la cirko eniru ĝin, kaj la malfeliĉulo malesperis kaj promesis sin korekti, por ke ĉi tiuj invadantaj aliuloj ne faru lian taskon.

Li nur foje akceptis la kunlaboron de tre malmultaj buboj; toreadoraj lernantoj, kiuj estis al li fidelaj, kondiĉe ke li permesu al ili ĉeesti taŭrfestojn de la "hunda loĝio"; kradita pordo apud la taŭrejoj, tra kiu oni elirigis okaze la vunditojn. La purighelpantoj vidis la feston de trans la feraĵo, baraktante kaj disputante, kiel enkaĝigitaj simioj, por okupi la unuan vicon.

La maljunulo lerte destinis ilin por la dumsemajna laboro. La knaboj purigis la sunbenkarojn; tiuj okupitaj de malpura kaj malriĉa publiko, kiu lasas plej ofte, kiel restaĵon post sia foriro, amason da oranĝŝeloj, paperoj kaj cigaredaj ekstremoj.

— Atentu bone pri la tabako! — li avertis sian trupon —. Kiu gardos por si cigarrestaĵon, ne vidos la dimanĉan taŭrfeston.

Li purigis pacience la ombran cirkoparton, kiel serĉisto je trezoroj, klinante sian buston por preni kaj gardi en siajn poŝojn la misterajn trovitaĵojn: sinjorinaj ventumiloj, ringoj, naztuketoj, falintaj moneroj, virinaj vestornamaĵoj, unuvorte, ĉion, kion lasas post si dekkvarmila personinvado. Li amasigis la restaĵojn, kiujn ĵetis la fumuloj, por dispecigi, sune sekigi kaj poste vendi ilin, kiel distranĉitan tabakon. La valoraj objektoj estis por aĉetvendistino, kiu kutimis akiri tiujn aĵojn apartenintajn al la forgesema aŭ emociita publiko.

Gallardo respondis la flateman saluton de la maljunulo, donante al li cigaron kaj adiaŭis Lupidon. Li ĵus konsentis kun la paŝtisto, pri tio ke ĉi tiu enĉeligos

por li ambaŭ elektitajn taŭrojn. La aliaj spaduloj ne protestos. Ili estas bonsortaj knaboj, sentimaj junuloj mortigontaj ĉion, kion oni metos antaŭ ilin.

Kiam Gallardo reiris en la korton, kie oni provis la ĉevalojn, li vidis, ke el la grupo de ĉeestantoj foriris alta, maldika kaj kuprebruna viro aspektanta toreadoro. Sub lia nigra rondĉapelo montriĝis grizaj hartufoj kaj ĉirkaŭ la buŝo, kelkaj sulkoj.

— Kiel vi fartas, Fiŝvendisto? — diris Gallardo, premante lian manon per sincera ĝojo.

Li estis antikva spadulo, kiu en sia juneco ĝuis glorajn momentojn, sed pri kies nomo malmultaj memoris. Aliaj matadoroj poste alvenantaj velkigis lian etan famon, kaj Fiŝvendisto, kiu poste ludbatalis en Ameriko kaj estis kelkfoje kornovundata, fine lasis sian profesion kaj vivadis per malgranda, ŝparita kapitalo. Gallardo sciis, ke li posedas trinkejon en la cirkaj proksimaĵoj, kie li vegetis, rilatante apenaŭ taŭremulojn kaj toreadorojn. Ne esperis Johano trovi lin en la cirko, sed Fiŝvendisto respondis per melankolia maniero.

— Nu, pro inklino. Mi malofte ĉeestas taŭrfestojn, sed ankoraŭ altiras min la profesio, kaj mi foje venas, kiel privatulo. Nuntempe mi nur estas trinkejisto.

Gallardo rigardadis lian malgajan aspekton; li memoris pri la Fiŝvendisto, kiun li konis en sia infanaĝo; iu el la herooj plej admirataj de li; belforta, amata de virinoj, fiere montranta en Sonorilo, kiam li iris en Seviljon, sian veluran, rondĉapelon, la vinkoloran jaketon kaj tiun silkan, multekoloran volvostrion, dum li sin apogis sur ebura bastono kun ora tenilo. Kaj same li mem rezultus vulgara kaj forgesita, se lasus sian profesion!...

Ili interparolis kelke da tempo pri la profesiaj aferoj. Fiŝvendisto, kiel ĉiuj maljunuloj amaritaj de malbonsorto, montriĝis pesimisto. Jam ne estas bonaj toreadoroj. Oni ne plu vidas kuraĝulojn. Nur mortigas taŭrojn "vere" Gallardo kaj tre malmultaj aliaj. Eĉ la taŭroj ŝajnas malpli potencaj. Kaj post ĉi tiuj plendoj li insiste petis al sia amiko, ke li akompanu lin en lian hejmon. Ĉar ili renkontis sin unu la alian kaj la matadoro estas faronta nenion, li devas viziti lian butikon.

Konsentis Gallardo kaj en iu el nefinitaj stratoj apud la taŭra cirko li eniris trinkejon egalan al ĉiuj ceteraj, kun ruĝe kolorigita fasado, vitrita pordo kun samkoloraj tukoj, kaj montrofenestro, en kiu estis prezentataj sur polvoplenaj teleroj faruntegitaj kotletoj, frititaj birdoj kaj boteletoj enhavantaj vinagren trempitajn legomojn. En la butika interno estis zinka montrotablo, bareloj kaj boteloj, rondaj tabloj ĉirkaŭataj de lignaj taburetoj kaj sur la muroj, multenombraj, kolorigitaj bildoj prezentantaj famajn toreadorojn kaj la plej ĉefajn ludojn el la nacia festo.

— Ni trinkos glasojn da vino el *Montilla* — diris Fiŝvendisto, vokante junulon, kiu staris trans la montrotablo kaj ridetis, vidante Gallard'on.

Ĉi tiu atentis pri lia vizaĝo kaj pri iu el la jakaj manikoj tute senbraka, kiu penetris en poŝon de la dekstra flanko.

— Mi kredas, ke mi konas vin — diris la matadoro.

— Certe vi konas lin — interdiris Fiŝvendisto —. Li estas Pepulo.

La kromnomo tuj rememorigis al Gallardo lian historion. Brava knabo, kiu bonege pikiletis kaj estis ankaŭ nomata de aro da taŭremuloj la "estonta plej ĉama toreadoro". Iun tagon, en la Madrida cirko li ricevis kornovundon ĉe brakon kaj oni bezonis amputi ĝin, pro kio li rezultis netaŭga por ludbatali.

— Mi loĝigis lin en mian hejmon — daŭrigis Fiŝvendisto —. Mi ne havas familion: mia edzino mortis kaj ŝajnas al mi, kvazaŭ li estus mia propra filo... Mizeraĵoj! Sed se homo malfeliĉa ne estas bonkora, por kio utilas?... Ne supozu, ke multe gajnas Pepulo kaj mi. Ni vivadas, kiel ni povas; sed ĉio, kion mi havas, estas ankaŭ lia kaj ni daŭrigas nian ekzistadon dank'al la antikvaj amikoj foje venantaj por manĝeti posttagmeze aŭ por kartoludi, kaj precipe dank'al la lernejo.

Gallardo ridetis. Li estis aŭdinta paroli pri taŭrarta lernejo fondita de Fiŝvendisto proksime al sia trinkejo.

— Nu, amiko! — diris ĉi tiu, kiel se li senkulpigis sin —. Estas necese liveri al si vivrimedojn kaj la lernejo monproduktas pli multe, ol ĉiuj trinkejaj konsumantoj. Venas ĉi tien tre strangaj personoj: junaj sinjoroj, kiuj volas lerni por brile ludi ĉe la taŭridetaj festoj; fremduloj, kiuj entuziasmiĝas en la taŭra cirko kaj ekmanias fariĝi toreadoroj, estante maljunaj. Nun estas unu ricevanta lecionon. Li ĉiujn tagojn venas. Vi vidos.

Kaj, irinte al la alia stratflanko, ili alvenis antaŭ sendoman lokon ĉirkaŭatan de alta tabulbarilo. Super ĝia pordo elmontriĝis granda, gudra skribaĵo diranta "Ludbatalarta Lernejo".

Ili eniris. Kio unue altiris la atenton de Gallardo, estis la taŭro; ligna kaj junka besto kun radetoj, stupa vosto, kapo el plektita pajlo, korka kolo kaj paro da aŭtentikaj, grandegaj kornoj, kiuj timigis la lernantojn.

Junulo kun ne butonumita ĉemizo, ĉapo kaj du hartufoj sur ambaŭ oreloj estis, kiu komunikis sian saĝon al la bravbesto, ĝin puŝante kontraŭ la "studentojn", kiam ĉi tiuj sin metis antaŭ ĝin kun mantelo ĉe siaj manoj.

Meze de la ĉirkaŭbarita loko, maljuna, dika kaj malalta sinjoro kun ruĝa vizaĝo kaj blankaj, fortikaj lipharoj staris sen jako, svingante pikiletojn. Apud la tabulbarilo, sidante sur seĝo kaj apogante siajn brakojn sur alia, estis same dika sinjorino preskaŭ tiel aĝa, kiel li, kaj kun ĉapelo tute plena je floroj. Ŝia ruĝhaŭta vizaĝo, kvazaŭ ŝutita per flavaj, branaj makuloj, larĝiĝis pro entuziasmo ĉiufoje, kiam ŝia kunulo ludis lerte. Ŝiaj ridoj agitis la ĉapelajn florojn kaj la ne ŝiajn treege blondajn buklojn el ŝia hararo. Ŝi aplaŭdis, malfermante samtempe siajn krurojn, kiuj, tial ke tiris la jupon, vidigis parton el ŝiaj grasaj kaj velkintaj allogaĵoj.

Fiŝvendisto ĉe la pordo rakontis al Gallardo la devenon de tiu paro. Ili eble estas gefrancoj aŭ alilandanoj; tio al li ne interesas; geedzoj irantaj tra la mondo, kiuj ŝajnas koni ĉiujn landojn. Li plenumis multajn metiojn laŭ sia diro: ministo en Afriko, terkulturisto en malproksimaj insuloj, ĉevalĉasisto per kaptŝnuro en la vastegaj herbejoj de Ameriko. Nun li volas ludbatali por gajni monon same, kiel la hispanoj, kaj venas ĉiujn posttagmezojn per tiu konstanteco propra al obstina infano, pagante malavare la lecionojn.

— Imagu kiel malbelaspekta toreadoro!... Kaj pli aĝa, ol kvindekjara!...

Kiam ili vidis, ke ambaŭ homoj eniris, la lernanto mallevis siajn brakojn armitajn per pikiletoj kaj la sinjorino aranĝis sian jupon kaj sian multefloran ĉapelon. Ho, "cher maître"!...

— Bonan vesperon "mosiú"; restu feliĉe "madame" — diris la majstro, levante sian manon al la ĉapelo —. Montru "mosiú", kiel vi lernis tiun lecionon. Vi jam scias, kion mi diris al vi: Restu kviete sur via loko, incitu la beston, por ke ĝi ataku, lasu ke ĝi venu, kaj, kiam estos apud vi, iomete flankeniĝu kaj kroĉu la stangetojn, pikante sur ĝian kolsupron. Vi bezonas okupiĝi pri nenio: la taŭro faros ĉion necesan. Atentu... Ĉu preta?

Sin metinte flanken, la majstro vokis la teruran taŭron aŭ, pli ĝuste dirite, la bubon, kiu estis poste por puŝi ĝin.

— Heee!... Ataku, Maŭreto!

Fiŝvendisto faris ja teruran muĝegon, por ke la taŭro ataku, incitante per tiaj krioj kaj per furiozaj piedfrapoj sur teron ĝian aeran kaj junkan internaĵon kaj ĝian pajlan cerbon. Kaj Maŭreto atakis, kiel aŭtentika bravbesto, per granda radbruego, movante sian kapon kaŭze de la teraj malglataĵoj kaj akompanate de tiu paĝio, kiu puŝis ĝin, por ke ĝi ne tiel multe laciĝu. Neniam iu ajn taŭro estis komparebla pri inteligento kun ĉi tiu Maŭreto; senmorta besto milfoje pikiletita kaj spadpikita sen aliaj rezultatoj ekster negravaj vundoj, kiujn kuracis al ĝi lignaĵisto. Ĝi ŝajnis tiel saĝa, kiel homo. Kiam ĝi alvenis apud la lernanton, ĝi ŝanĝis sian direkton, por ne tuŝi lin per siaj kornoj, malproksimiĝante poste kun la kroĉitaj stangetoj sur ĝia korka kolo.

Oni ovaciis la fremdulon pro ĉi tiu lertaĵo, post kiu li restis sur sama loko, aranĝante la pantalonan ŝelkon kaj la manumojn de sia ĉemizo. Lia edzino per arda entuziasmo postenigis sian buston, samtempe ridante kaj aplaŭdante, kaj alifoje ŝia jupo pro tiaj movoj malkovris ŝiajn malsuprajn belaĵojn.

— Kiel majstro, "mosiú"! — kriis Fiŝvendisto —. Tiun pikiletan paron vi kroĉis lertege.

Kaj la fremdulo, emociite de la instruista laŭdo, respondis modeste per duonhispana lingvaĉo, batante sian bruston.

— Ĉe mi estas plej grava kvalito: Kuraĝo, tre multe da kuraĝo.

Poste, por festi sian faritaĵon, li diris al la paĝio de Maŭreto, kiu ŝajnis an-

taŭgustumi, divenante tiun ordonon, ke oni alportu botelon da vino. Jam estis tri malplenaj sur tero apud la pli kaj pli purpurvizaĝa kaj jupmovema sinjorino, kiu ridis bruege kontenta ĉiufoje, kiam ŝia edzo faris toreadoran lertaĵon.

Kiam ŝi sciiĝis, pri tio ke, kiu ĵus alvenis kun la majstro, estas la fama Gallardo, kaj ŝi rekonis lian vizaĝon tiel ofte admiratan de ŝi sur gazetoj kaj alumetskatoloj, la fremdulino paliĝis kaj ŝiaj okuloj preskaŭ larmis pro emocio. Ho, "cher maître"!... Ŝi ridetis al li kaj sin frotis kontraŭ lin, dezirante sin ĵeti inter liajn brakojn malgraŭ sia pezego kaj falema dikego.

Reciproke tuŝis sin la vinglasoj por la gloro de la nova toreadoro. Eĉ Maŭreto partoprenis la triumfon, trinkante en ĝia nomo la bubo vartanta ĝin.

— Antaŭ ol du monatoj, "mosiú" — diris Fiŝvendisto per sia andaluzia, serioza mokemo — vi pikiletos en la Madrida cirko tiel lerte, kiel plej fama toreadoro, kaj vi rikoltos ĉiujn aplaŭdadojn kaj la tutan monon kaj ĉiujn virinojn ankaŭ... se tio ne malplaĉas vian edzinon.

Kaj la sinjorino, ĉiam rigardante Gallard'on per emociitaj okuloj, ridadis bruege, dum ĝojaj ektremoj kuris, kvazaŭ ondoj, tra ŝia grasa korpo.

Daŭrigis la fremdulo sian lecionon per energia obstino. Estas necese profiti bone la tempon. Li deziras kiel eble plej baldaŭ stari en la Madrida areno, konkerante ĉion, pri kio parolis la majstro. Lia ruĝetvizaĝa kunulino, ĉar ambaŭ toreadoroj jam ekforiris, residiĝis, gardante la vinan botelon.

Fiŝvendisto akompanis Gallard'on ĝis la stratfiniĝo.

— Adiaŭ Johano — diris li serioze —. Eble morgaŭ ni vidos nin unu la alian en la cirko... Vi jam vidas tion, al kio mi alvenis. Mi bezonas nuntempe por manĝi, tiel trompadi kaj arlekenadi.

Gallardo malproksimiĝis priokupate. Ve! Tiu homo, kiun li vidis malŝparanta monon, kvazaŭ princo, tute fidanta pri sia estonteco!... Li perdis sian havaĵon pro mallertaj negocoj. La toreadora vivmaniero ja ne permesas lerni la administradon je kapitalo. Kaj ankoraŭ oni konsilas al li, ke li lasu sian profesion! Neniam. Nepre li proksimiĝos al la taŭroj.

Dum la tuta nokto ĉi tiu decido flugadis en la malhelaj nebuloj de lia sonĝo. Estas necese proksimiĝi! Kaj li la morgaŭan matenon per firma volo persistis pri sia penso. Proksimiĝos kaj miregigos li la publikon per grandaj kuraĝaĵoj.

Li estis tiel animata, ke veturis en la cirkon sen tiu superstiĉa maltrankvilo, kiu ĝenis lin aliajn fojojn. Li estas certa pri sia triumfo kaj io lin puŝas al sentimaĵoj, kiel en la gloraj tagoj.

La taŭrfesto estis akcidentoriĉa de sia komenciĝo. La unua taŭro eliris, brave atakante, precipe la rajdistojn. En la daŭro de unu momento ĝi faligis teren la tri pikistojn, kiuj atendis ĝin kun preta lanco sub brako, kaj el iliaj ĉevalaĉoj du restis mortante sur sablo, dum ĵetis el la vundoj de sia brusto fluon da ŝprucanta, malhela sango. La alia kuradis freneze pro doloro kaj surprizo de ekstremo al

ekstremo de la areno kun fendita ventro kaj duonfalanta selo, inter kies piedingoj kaj rimenoj pendis ĝiaj bluruĝaj intestoj similantaj al grandegaj kolbasoj. Ĝi trenis ilin sur la sablo kaj ĉar ĝi mem ilin hufpremis dum irado per siaj postaj kruroj, la intestaro malvolviĝis, kvazaŭ komplika fadenaĵo, kiu disiĝas. La taŭro, altirate de ĉi tiu kurado, persekutis ĝin kaj, metinte sian potencan kapon sub la ventron, ĝin levis kaj ĵetis teren per siaj kornoj, daŭre kaj kruele pikante poste ĝian mizeran kaj ĉifonitan korpon. Kiam la bravbesto forlasis la mortantan kaj baraktantan ĉevalon, "saĝa simio" iris al ĝi por mortigi fulme per cerbetpiko kaj tiel sensuferigi la malfeliĉan beston. Tiu ĉi dum la agoniaj ektremoj mordis la manon de la homo, kiu dolore ekkriis, skuante la sangomakulitan manon, kaj penetrigis plu la ponardon, ĝis kiam la unuhufulo ĉesis moviĝi kaj restis kun rigidaj kruroj. Aliaj cirkaj servistoj rapidis de loko al loko en la areno, portante grandajn korbojn da sablo, per kiu ili superŝutis la sangajn lagetojn kaj la ĉevalkadavrojn.

La publiko staris, kriegante kaj gestante. Ĝi estis entuziasmigata de la besta braveco kaj, tial ke en la areno restis nek eĉ unu pikrajdisto, protestis ĥore petante: "Ĉevalojn! Ĉevalojn!".

Ĉiuj jam sciis, ke ili estas tuj elirontaj, sed indignis, pro tio ke dum kelkaj minutoj okazis nenia buĉado. La taŭro restis sola, meze de la areno, fiere muĝante, kun levita kapo kaj kornoj makulitaj per sango, dum flirtis super ĝia kolo, sur kiu montriĝis bluaj kaj ruĝaj ŝirstrioj, la rubandoj de la taŭrprodukteja kokardo. Novaj rajdistoj eliris kaj ree okazis la abomeninda spektaklo. Apenaŭ proksimiĝis iu el ili kun antaŭen direktata pikilo kaj iranta duonflanken ĉevalo, por ke ĝi ne vidu la bravbeston pro la tiuflanka, kovrita okulo, kiam tuj okazis atakpuŝego kaj renversfalo. La pikstango rompiĝis krakante, flugis la ĉevalo, puŝate de la potencaj kornoj, ŝprucis sango, eliĝis ekskrementoj kaj internaĵoj, kaŭze de tiu mortiga kolizio, kaj ruliĝis sur la sablon la pikrajdisto, kvazaŭ flavkrura marioneto, kiun tuj ŝirmis per flirtantaj manteloj la pikiletistoj, altirante la atenton de la taŭro aliloken.

El la ventro de ĵus vundita ĉevalo ŝprucis disen naŭziga pluvo da verda ekskremento, kiu malpurigis la kostumoj de la proksimaj toreadoroj.

La publiko montris sian ĝojon pro la bruaj renversfaloj de la rajdistoj per ridoj kaj ekkrioj. Obtuza sono kaŭzis la batego kontraŭ la sablon de tiuj pezaj korpoj kun fertegitaj kruroj. Kelkaj falis dorsen, kvazaŭ tutplenaj sakoj, kaj ilia kapo, ektuŝegante okaze la bariltabulojn, ekkrakis funebre.

— Tiu ne leviĝos — oni kriis ĉe la publiko —. Lia "melono" (66) certe rompiĝis.

Kaj tamen li leviĝis, etendis siajn brakojn, gratis la kontuzitan kranion, reprenis sian fortikan, rondan ĉapelon kaj ree supreniĝis sur la saman ĉevalon, kiun la "saĝaj simioj" starigis per puŝegoj kaj vergobatoj. La brile vestita rajdisto

trotigis sian beston trenantan sur sablo siajn intestojn pli kaj pli longajn kaj pezajn pro la movado mem. La pikisto sur tiu ĉi agonianta estulo aliris renkonti la taŭron.

— Je via honoro! — li kriis, ĵetante sian ĉapelon al grupo da amikoj.

Kaj tuj, kiam li sin metis antaŭ la taŭron, pikante ĝian kolon, homo kaj ĉevalo flugis alten kaj disiĝis en la aero pro tiu forta puŝego, falante teren kaj ruliĝante, ĉiu sur malsama loko. Aliajn fojojn, antaŭ ol la taŭro atakis, la "saĝaj simioj" kaj parto el la publiko avertis lin: "Malsupreniĝu". Sed, antaŭ kiam li povus tion fari pro la embaraso kaŭzata de la rigidaj, ferŝirmitaj kruroj, la ĉevalo subite ekfalis mortinte, kaj la pikrajdisto, ĵetite super ĝiaj oreloj, iris, kvazaŭ peza kuglego, obtuze ektuŝegi per kapo kontraŭ la sablon.

La kornoj de la taŭro neniam sukcesis atingi la rajdiston, sed iuj el ili restis post tio nemove sur tero kaj kelkaj ludbatalservistoj devis porti lin en la malsanulejon, por ke oni kuracu al li ostorompiĝon, aŭ lin veku el lia cerba skuo ja aspektanta, kiel morto.

Gallardo, dezirante altiri al si la publikan simpation, iris de loko al loko kaj estis tre multe aplaŭdata, ĉar li tiris taŭron je ĝia vosto por savi pikrajdiston, kiu kuŝis tere en grava risko esti kornovundota.

Dum oni pikiletis, Gallardo, apogite sur la barilo, rigardadis la loĝiojn. Certe en iu el ili estas Doña Suno. Fine li vidis ŝin, sed sen blanka mantilo, sen io ajn rememoriganta pri tiu sinjorino el Seviljo, simila al "*maja*" (67) de Goya. Ŝi ŝajnis, pro sia blonda hararo kaj sia originala kaj eleganta ĉapelo, fremdulino el tiuj ĉeestantaj unuafoje taŭrfeston. Apud ŝi estis ŝia amiko; la homo, pri kiu ŝi parolis iom admire kaj al kiu ŝi montris la plej interesajn aferojn el la lando. Ha, Doña Suno! Baldaŭ ŝi vidos, kiel kuraĝa estas la belfortulo, kiun ŝi forlasis. Ŝi devos aplaŭdi lin antaŭ tiu malamata fremdulo; ŝi entuziasmiĝos eĉ kontraŭ sia volo, trenate de la publika imitemo.

Kiam alvenis la momento, en kiu Gallardo devis mortigi sian taŭron, kiu estis la dua, la publiko akceptis lin favore, kiel se ĝi forgesis sian incitiĝemon dum la antaŭa taŭrfesto. La du pluvaj semajnoj da prokrasto ŝajnis influi sur la homamason, igante ĝin tolerema. Ĝi deziris trovi ĉion bona en tiu tiel atendita, taŭra festo. Plie, la braveco de la taŭroj kaj la granda nombro da mortintaj ĉevaloj bonhumorigis la publikon.

Iris Gallardo al la bravbesto kun nekovrita kapo post la honora promeso, portante la ruĝtukon antaŭen kaj movante sian spadon, kiel se ĝi estus bastono. Post li, kvankam je kelka distanco, sekvis Naciao kaj alia toreadoro. Kelkaj voĉoj el la publiko protestis. Kiom multe da helpantoj!... Tio ŝajnas ja paroĥa pastraro iranta al enteriga procesio.

— Ĉiuj for! — kriis Gallardo.

Kaj ambaŭ sekvantoj haltis, ĉar li diris vere tion, per tono ne naskanta dubojn.

Li daŭrigis sian iradon antaŭen, ĝis kiam alvenis en la taŭran proksimecon kaj tie malvolvis sian ruĝtukon, ankoraŭ plu apudiĝante, kiel faris en siaj bonaj tempoj, ĝis tio ke li per la tuko preskaŭ tuŝis la malsekan nazpinton de la besto. Li faris pasmovon, hura!... Kontenta murmuro trakuris la benkarojn. La "knabo" el Seviljo ree ludas brave; li havas profesian dignon. Certe li intencas fari iun el siaj kuraĝaĵoj, kiel en sia plej brila epoko. Kaj liaj ruĝtukaj pasmovoj estis akompanataj de bruaj, entuziasmaj ekkrioj, dum ĉe la publiko liaj partianoj reanimiĝis kaj sin direktis parole al la kontraŭuloj. Kion ili opinias pri tio? Gallardo certe nebone ludis kelkajn fojojn; ili konfesas tion..., sed kiam li volas!...

Tiun tagon ĉio favoris. Kiam li vidis, ke la taŭro haltis nemove, li sin ĵetis, instigate de la publiko mem, kiu konsilis: Nun! Piku ĝin!

Kaj Gallardo pikis la beston per sia spado, elirante rapide el la minacantaj kornoj.

Eksonis aplaŭdo, sed nur momente, kaj tuj leviĝis malaproba murmurado, el kiu eliris akraj fajfoj. Liaj partianoj ĉesis rigardi la taŭron por sin turni indigne kontraŭ la ceteran publikon. Kia maljustaĵo! Kia manko da taŭrarta scio! Li tre bone sin ĵetis por mortigi...

Sed la malamikoj montris la taŭron, ne ĉesante protesti, kaj la tuta homamaso kuniĝis al ili per surdiganta fajfeksplodo.

La spado penetris oblikve, trapikante la beston, kaj ĝia pinto montriĝis el korpa flanko apud la antaŭa kruro.

Ĉiuj gestis kaj svingis la brakojn per afekta indigno. Kia mallertaĵo! Tion farus, nek eĉ malbona taŭridisto!...

La taŭro, pro tio ke la spadtenilo kuŝis sur ĝia kolo, dum la pinto aperis el krura komenciĝo, ekpaŝis lame, balancante sian pezegan korpomason. Malfeliĉa besto! Tiel bona; tiel nobla!... Kelkaj furioze antaŭenigis sian buston, kvazaŭ ili volus sin ĵeti per kapo al la areno. Rabisto! Fripono!... Tiel turmenti taŭron pli kuraĝan, ol li!... Kaj ĉiuj kriadis per arda kompato, kiel se ili ne estus pagintaj monon, por vidi ĝian morton.

Gallardo, miregigate de sia propra faritaĵo, mallevis sian kapon sub la diluvo da insultoj kaj minacoj. "Malbenita sorto!...". Li sin ĵetis por mortigi same, kiel en siaj bonaj tempoj, superregante la nervan impreson, kiu turnigis al li lian kapon, kiel se li ne povis rezisti la vidon je la bravbesto iranta kontraŭ lin. Sed deziro eviti la danĝeron, foriĝi el la kornoj, kiel eble plej baldaŭ, okazigis, ke li finis la mortigan agon per tiu mallerta kaj skandala spadpiko.

En la benkaroj la amaso agitiĝis disputante: "Li tute ne scias mortigi. Turnas li flanken sian vizaĝon. Li ja mallerte agas". Kaj la Gallard'aj partianoj senkulpigis sian idolon ne malpli arde: "Tio okazas al iu ajn. Trafis lin malbonsorto. Plej grave estas sin ĵeti brave, kiel li faris".

La taŭro, kurinte lame per doloraj balanciĝoj, kiuj muĝigis indigne la publikon, restis fine nemova por ne sin mem turmenti.

Gallardo prenis alian spadon kaj sin metis antaŭ ĝin.

Oni divenis lian intencon. Li estas cerbetpikonta la taŭron: Nur ĉi tion li povos fari post sia krimo.

Li apogis la spadpinton inter ambaŭ kornoj, dum per la alia mano malalte agitis la ruĝtukon, por ke la besto, altirate de la ŝtofo, mallevu sian kapon ĝis tero. Puŝis li malsupren la spadon, kaj la taŭro, sentinte la vundon, demetis per skuo la armilon.

— Unu! — kriis moke la popolamaso.

La matadoro alifoje intencis piki la bestan cerbeton kaj alifoje tremigis la bravbeston.

— Du! — oni ĥore kantis ĉe la benkaroj.

Ripetis li sian agon sen alia rezulto ekster muĝo de la dolorigita taŭro.

— Tri!...

Sed al tiu ironia kalkulo de parto el la publiko kuniĝis fajfoj kaj krioj de protesto. Nu, kiam tiu matadoro estos finanta?...

La kvaran fojon trafis Gallardo per la spadpinto ĝian vivcentron, la komenciĝon de la spina medolo, kaj la taŭro ekfalis fulme, kuŝrestante sur flanko kaj kun rigidaj kruroj.

La spadulo viŝis sian ŝviton kaj ekiris al prezidejo per malrapida paŝado, lace spiregante. Fine li sin liberigis el tiu besto. Li timis neniam fini. La publiko akceptis lin dum lia preterpaso per kruelaj spritaĵoj aŭ per malŝata silento. Neniu aplaŭdis. Li salutis la prezidanton meze de la ĝenerala indiferento kaj sin rifuĝis post la barilon, kiel lernanto, kiu hontas pro sia malbona konduto. Dum Strekaro prezentis al li glason da akvo, la matadoro rigardis la loĝiojn kaj li renkontis la okulojn de Doña Suno, kiu lin sekvis ĝis lia kaŝejo. Kiel certe malŝatas lin tiu virino! Kiel ŝi ridis kune kun sia amiko, vidante ke la publiko lin insultas!... Kian malbenitan ideon ŝi havis veni ĉeesti la taŭrfeston!...

Li restis en la arena ĉirkaŭirejo kaj evitis al si ĉiun ajn laciĝon, ĝis kiam oni elirigos la alian taŭron mortigotan de li. Doloris lia vundita kruro, tial ke li multe kuris. Li jam ne plu estas la sama: li tion al si konfesis. Efikis nek liaj bravaĵoj nek lia volo por proksimiĝi. Liaj kruroj ne estas viglaj kaj firmaj, kiel alitempe, kaj lia dekstra brako ne scias sentime etendiĝi, dezirante kiel eble plej baldaŭ atingi la taŭran kolon. Nun ĝi fleksiĝas kaj ne obeas lian volon per tiu malsaĝa instinkto de iaj bestoj, kiuj kaŝas sian vizaĝon por eviti tiel la danĝeron.

Liaj antikvaj superstiĉoj subite aperis, teruraj kaj obstinaj.

— Mi estas malbonsorta — pensis Gallardo —. Mi antaŭsentas, ke la kvina taŭro trafos min... Ĝi trafos min; tio estas nepra!

Tamen, kiam aperis la kvina taŭro, kion ĝi unue renkontis, tio estis la mantelo

de Gallardo. Kia besto! Ĝi ŝajnas malsama, ol tiu, kiun li elektis ĉe la kortoj la hieraŭan posttagmezon. Oni certe eraris pri la ordo, laŭ kiu elirigis la taŭrojn. Timo daŭre flustris ĉe liajn orelojn: "Kia malbonsorto!... Ĝi trafos min: hodiaŭ oni min forportos el la areno kun miaj piedoj antaŭen...".

Malgraŭ tio li daŭrigis ludante la bravbeston kaj ĝin ĉiam malproksimigis de la endanĝerigitaj pikrajdistoj. Unue li mantelludis meze de malŝatema silento. Poste la publiko iom reamikiĝis al li kaj oni lin aplaŭdis iomete.

Kiam alvenis la momento mortigi kaj Gallardo sin metis antaŭ la bravbeston, ĉiuj divenis lian animstaton. Li moviĝis konfuzite; sufiĉis kapskuo de la taŭro, por ke li, kredante, ke tiu ĉi ekatakas, per longaj eksaltoj posten intencis sin savi, dum la publiko mokis lin ironie.

— Kuru!... Ĉar ĝi atingas vin!

Subite, kiel se li deziris fini per ia ajn maniero, li sin ĵetis sur la beston kun sia spado, sed oblikve, por kiel eble plej baldaŭ foriĝi el la danĝero. Eksonis eksplodo de fajfoj kaj krioj. La spado nur penetris kelkajn centimetrojn kaj, post kiam ĝi fleksiĝis sur la kolo de la bravbesto, ĝi estis ĵetata de ĉi tiu malproksimen.

Gallardo reprenis sian spadon kaj proksimiĝis al la taŭro. Li rektiĝis por sin ĵeti kontraŭ ĝin, kaj en tiu sama momento la besto atakis lin. Volis li forkuri, sed liaj kruroj jam ne havis sian alitempan viglecon. Li estis atingata kaj ruliĝis teren sekve de la kolizio. Oni aliris helpi lin, kaj Gallardo sin levis tute sablokovrite, kun longa ŝiraĵo ĉe la postparto de sia pantaloneto, tra kiu eliĝis internaj tolaĵoj, kaj perdinte unu pantoflon kaj la kokardon, per kiu li ornamis sian harvosteton.

Tiu belforta kaj eleganta viro, kiun tiel multe admiradis antaŭe la publiko, montriĝis kompatinda kaj ridinda pro sia eliĝinta ĉemizbasko, sia malkombita hararo kaj la malplektita kaj malgaje falinta vosteto.

Oni etendis ĉirkaŭ lin kelkajn mantelojn, por lin helpi kaj protekti. Eĉ la aliaj spaduloj pro bonkora kamaradeco preparis la taŭron, por ke li rapide elmortigu ĝin. Sed Gallardo ŝajnis blinda kaj surda: li nur vidis la beston, por posteniĝi okaze de eĉ la plej malgrava ataksigno, kiel se la ĵusa renversrulo frenezigis lin pro timo. Li ne komprenis, kion liaj kunuloj diris al li kaj kun palega vizaĝo kaj sulkigante la brovojn por streĉi sian atenton, li balbutis nekonscie:

— Ĉiuj for. Lasu min sola!

Dume en lia cerbo la timego daŭrigis sian flustradon: "Hodiaŭ vi mortos! Hodiaŭ okazos via lasta taŭratingo".

La publiko, vidante la spadulan nesinregon, divenis, kion li pensis.

— Li timas la taŭron! Li ja deziras tute ne vidi ĝin!...

Kaj eĉ la plej fervoraj partianoj de Gallardo hontis silente, ne komprenante tiun neniam antaŭe vidatan okazaĵon.

La homamaso ŝajnis ĝui pro lia teruro per tiu netolerema braveco montrata de tiu, kiu estas en senriska loko. Aliaj, pensante pri la enirbileta kosto, kriadis kontraŭ tiu homo, kiu sin lasis kapti de instinkta memkonservemo, ne realigante ilian plezuresperon. Tio estas ja ŝtelo!

Malĝentiluloj insultadis la matadoron per vortoj ofendantaj lian virecon. Malamo rememorigis post multaj jaroj, dum kiuj oni admiris lin, iajn okazintaĵojn de lia toreadora infaneco forgesitajn eĉ de li mem. Ili kriis pri lia nokta konduto inter la bubaro en la aleo Herkuleso. Oni ridis je lia ŝirita pantaloneto kun eliĝantaj tolaĵoj tra ĝia fendo.

— Kaŝu ĝin, ĉar ĝin ni vidas! — ekkriis iuj per virina voĉo.

Gallardo, protektate per la mantelludado de siaj kamaradoj, profitis ĉiujn okazojn, kiam la taŭro estis distrita, por vundi ĝin per sia spado, ne aŭdante la publikan malovacion. La besto preskaŭ ne sentis liajn spadpikojn. Pro sia timego pri taŭratingo, se li etendus la brakon, li ĉiam restis malproksima kaj nur vundis ĝin per la spadpinto.

Kelkajn fojojn la spado falis tuj, post kiam ĝi penetris en la karnon: Aliajn ĝi restis fikse inter ostoj, sed malmulte enigite kaj fleksiĝante balance laŭ la movoj de la bravbesto. Ĉi tiu iris kun mallevita kapo laŭ la arena konturo, muĝante enue pro tiu daŭra turmento. Sekvis ĝin la spadulo kun sia ruĝtuko, dezirante fini, sed timante sin riski, kaj post li la tuta trupo da helpantoj, svingante siajn mantelojn, kiel se ili volus per tiu rimedo konvinki la beston, pri tio ke ĝi fleksu siajn krurojn kaj kuŝiĝu. La apudbarila preterpaso de la taŭro kun sia gutanta nazpinto kaj kolo plena je starantaj spadoj kaŭzis eksplodojn de ridoj kaj insultoj.

— Ĝi estas "Suferanta Virgulino"! —diris iuj.

Aliaj komparis la beston kun pingla kuseneto. Bandito! Malbona toreadoro! Plej insultemaj persistis ofendi la virecon de Gallardo per nomŝanĝo.

— Jonjo! Ne risku vin!...

Multe da tempo estis jam pasinta kaj parto el la publiko, ĉar deziris kulpigi pri tio alian krom la toreadoro, sin turnis al la prezidloĝio... "Prezidanta Moŝto! Ĝis kiam daŭros ĉi tiu skandalo?..."

La prezidanto faris geston por ĉesigi la protestojn kaj ordonis ion. Oni tuj vidis, ke pedelo kun tegola plumĉapelo kaj surŝultre flirtanta manteleto kuras post la barilo kaj alvenas apud la lokon, kie estas la taŭro. Tie li etendis al Gallardo manon kun unu levita fingro. La publiko aplaŭdis. Tio estas la unua averto. Se, antaŭ ol ricevi la trian, li ne estos mortiginta la taŭron, ĉi tiu reiros en la korton kaj la spadulo restos tute senhonorigite.

Gallardo, kiel se li vekiĝus el hipnota dormado, terurite per tiu ĉi minaco,

metis horizontale sian spadon kaj sin ĵetis sur la taŭron. Kroma spadpiko nemulte penetrinta en la korpon de la bravbesto.

La spadulo lasis siajn brakojn pendi senespere. Nu, tiu taŭro ja estas nemortigebla!... Spadpikoj ne efikas ĝin. Ŝajnas, ke ĝi neniam falos.

Post tiu lasta, neutila provo la publiko furiozis. Ĉiuj stariĝis. La fajfado surdigis kaj devigis la virinojn ŝtopi siajn orelojn. Multaj homoj svingis la brakojn kaj antaŭenigis sian buston, kiel se ili volus ĵetiĝi al la areno. Sur la sablon falis oranĝoj, panpecoj, sidkusenoj, kvazaŭ rapidaj kugloj destinitaj por la matadoro. De la sunaj benkaroj eliĝis laŭtegaj voĉoj, muĝoj similaj al tiuj de vaporfajfegoj, laŭsajne neeble produktitaj de homa gorĝo. De tempo al tempo eksonis bruegante brutara sonorilo. Proksime al la taŭrejoj multenombra ĥoro kantis la pastran kantaton por la mortintoj.

Multaj ĉeestantoj turniĝis al la prezidejo. Kiam la dua averto? Gallardo viŝis sian ŝviton per naztuko, rigardante ĉien, kiel se li miris pro la publika maljustaĵo kaj kulpigis la taŭron pri ĉio okazanta. En ĉi tiuj momentoj li atentis la loĝion de Doña Suno. Ĉi tiu prezentis sian dorson al la areno por ĝin ne vidi: eble ŝi kompatis lin; eble ŝi hontis pri siaj pasintaj amfavoroj al li.

Alifoje li sin ĵetis por mortigi, kaj tre malmultaj personoj povis vidi, kion li faris, ĉar lin kaŝis la manteloj senĉese etenditaj ĉirkaŭ lin... La taŭro falis, ĵetante el sia buŝo fluon de sango.

Fine!... La publiko kvietiĝis kaj ĉesis mansvingi, sed la fajfoj kaj krioj daŭris ankoraŭ. La besto estis elmortigata de la cerbetpikisto; oni eligis la spadojn sur ĝi ankoraŭ hirtajn kaj hokligis ĝian kapsupron al la muletoj, kiuj ĝin trenis ekster la arenon, lasante larĝan vojon kaj sangajn striojn tuj malaperigatajn de la cirkaj servistoj per erpilaj batoj kaj korboj da sablo.

Gallardo sin kaŝis post la barilon, evitante la insultojn kaj protestojn, kiujn kaŭzis lia ĉeesto. Tie li restis laca kaj senspira kun doloranta kruro, sed kontenta meze de sia senespero, ĉar li sin savis el danĝero. Li ne mortis kornotrafite de la bravbesto..., sed tion ŝuldis al sia singardemo. Ha, la publiko! Amaso da murdistoj, kiuj avidas homan morton, kiel se nur ili amus la vivon kaj havus familion!...

La vojo hejmen estis malgaja, tra la popolamaso okupanta la cirkajn ĉirkaŭaĵojn, tra la veturiloj kaj aŭtomobiloj, tra la longaj vicoj de tramoj.

Iris la Gallard'a veturilo malrapide, por ne renversatingi la ĉeestintojn, kiuj laŭ grupoj eliris el la taŭrcirko. Ĉi tiuj flankeniĝis, vidante la mulojn; sed, kiam ili rekonis la spadulon, ŝajnis penti pri sia ĝentileco.

Gallardo divenis, vidante la movon de iliaj lipoj, ke oni terure insultis lin. Preterpasis apude aliaj veturiloj okupataj de belaj virinoj kun blankaj mantiloj. Kelkaj turnis sian kapon, por ne vidi la toreadoron: aliaj rigardis lin kompate.

La spadulo malŝvelis, kiel se li volis esti nerimarkata: li sin kaŝis post la granda korpo de Naciao, kiu sidis silenta, kun streĉitaj brovoj.

Grupo da buboj komencis fajfi, dum sekvis la veturilon. Multaj aliaj, el tiuj starantaj sur la trotuaroj, faris same, por tiel sin venĝi pri sia malriĉeco kaŭzinta, ke ili restis dum la tuta posttagmezo ekster la cirko, esperante vidi ion. Ili jam sciiĝis pri la malsukceso de Gallardo kaj insultis lin kontentaj, ĉar humiligis homon gajnantan multege da mono.

Ĉi tiu protesto ĉesigis la rezignacian silenton de la spadulo.

— Malbenaĵo!... Kial ili fajfas?... Ĉu ili ĉeestis la taŭrfeston?... Ĉu ili pagis monon por tio?...

Ĵetita ŝtono batis radon. La bubaro kriegis apud la veturila ŝtupeto; sed alvenis du rajdantaj policistoj kaj disigis la manifestacion, eskortante poste dum la tuta, alta parto de strato *Alcalá* la faman Gallard'on... "la plej bravan homon el la mondo".

X

La toreadoraj bandoj ĵus iris en la arenon, kiam eksonis fortaj frapoj ĉe la Ĉevaleja Pordo.

Cirka oficisto proksimiĝis al ĝi kaj kriis malbonhumore, ke tiu pordo ne estas por la publiko kaj, ke oni serĉu alian. Sed voĉo respondis lin de ekstere insistante, kaj li malfermis.

Eniris viro kaj virino; li portis blankan, kordoban ĉapelon; ŝi, nigran vestaĵon kaj mantilon.

La homo premis la manon de la oficisto, lasante en ĝin ion, kio ĝentiligis lian malamikan mienon.

— Vi konas min, ĉu ne? — diris la ĵus veninto —. Ĉu vere vi ne konas min?... Mi estas la bofrato de Gallardo kaj ĉi tiu sinjorino, lia edzino.

Karmeno rigardis ĉien en la silenta korto. Malproksimen, trans la dikajn murojn el brikoj oni aŭdis muzikon kaj la popolamasan spiregon interrompatan de entuziasmaj krioj kaj murmuroj pro scivolo. La toreadoraj bandoj paradis antaŭ la prezidejo.

— Kie li estas? — demandis avide Karmeno.

— Kie alie li povus esti? — respondis malafable la bofrato —. En la areno, plenumante sian devon... Estas ja frenezaĵo veni ĉi tien; granda malsaĝaĵo. Kiel malmulte energie mi ĉiam agas!

Karmeno daŭrigis sian rigardadon ĉirkaŭ sin, sed iom nedecide, kiel se pentis pri sia alveno ĝis tie. Kion ŝi estas faronta?...

La oficisto kortuŝite de la manpremo de Antono kaj, tial ke ambaŭ venintoj

estas geparencoj de fama matadoro, montriĝis ĝentila. Se la sinjorino volas atendi ĝis la festa finiĝo, ŝi povas ripozi en la pordista loĝejo. Se ŝi deziras vidi la taŭrfeston, li jam irigos ilin en bonan lokon, kvankam ili ne havas enirbiletojn.

Karmeno tremis pro tiu propono. Vidi la taŭrfeston!... Ne. Ŝi alvenis ĝis la taŭra cirko per granda streĉado je sia volo kaj pentas pri tio. Ne rezistus ŝi vidi sian edzon en la arenon. Neniam ŝi ĉeestis, kiam li ludbatalis. Tie atendos ŝi tiel longe, kiel povos.

—Nu! — diris rezignacie la ledaĵisto —. Ni restos do, kvankam mi ne scias, kion ni solvas ĉi tie antaŭ la ĉevalejoj.

De la antaŭa tago la edzo de Enkarnacio zorgis sian bofratinon, suferante plorojn kaj ektimojn de ŝia ekscitata nervemo.

La sabaton, tagmeze, Karmeno parolis lin en la skribocambro de la majstro. Ŝi estas ironta al Madrido! Jam ŝi decidis tiun ĉi vojaĝon. Estas neeble al ŝi resti en Seviljo. La kompatinda edzino de antaŭ preskaŭ unu semajno ne dormis, imagante teruraĵojn. Ŝia virina instinkto avizis gravan danĝeron. Ŝi bezonas kuri al Johano. Ŝi ne scias, por kio nek kion povos atingi per tiu rimedo, sed deziregis esti apud Gallardo, puŝate de tiu amema, nekonscia kredo pri malpliigo je risko per restado apud la amatulo.

Tio ja ne estas vivo. Ŝi sciiĝis per la gazetoj pri la granda malsukceso de Johano la pasintan dimanĉon en la Madrida cirko. Konas Karmeno la profesian fierecon de la toreadoro: ŝi divenas, ke li ne toleros rezignacie ĉi tiun malbonan okazon. Certe li faros frenezaĵojn, por ree meriti la publikan aplaŭdadon. Per sia lasta letero li tion neklare komprenigis.

— Ne, tute ne — diris ŝi energie al sia bofrato —. Mi nepre vojaĝos hodiaŭ mem al Madrido. Se vi volos, akompanu min: se ne, mi veturos sola. Precipe diru nek eĉ unu vorton al Don Josefo: li barus certe mian intencon... Ĉi tion scias nur panjo.

La ledaĵisto konsentis. Kia okazo! Senpaga vojaĝo al Madrido, kvankam ĝi estos kun malgaja kunulino!... Dum la vojiro Karmeno precizigis siajn dezirojn. Ŝi parolos energie sian edzon. Kial daŭrigi ludbatalado? Ĉu ili ne havas sufiĉajn vivrimedojn?... Li devas tuj lasi la profesion, se ne, ŝi certe mortos. Estas necese, ke li hodiaŭ lastafoje iru en arenon... Eĉ tio ŝajnas al ŝi atendi tro multe. Ili alvenos ja ĝustatempe al Madrido, por ke ŝia edzo ne ludbatalu tiun posttagmezon. Ŝi antaŭsentas,ke per sia ĉeesto evitos gravan malfeliĉaĵon.

Sed la bofrato protestis indigne, kiam aŭdis tion ĉi.

— Kia malsaĝaĵo! Kiel naivaj la virinoj estas! Vi ĉiuj obstinas en viaj simplaj pensoj. Ĉu vi kredas, ke ekzistas nek aŭtoritato nek leĝoj nek ludbatala regularo, kaj ke sufiĉus, ke virino subite ĉirkaŭprenus sian edzon pro timo, por ke taŭrfesto ne efektiviĝus kaj la publiko ree forirus hejmen?... Vi diros, kion vi

volos al Johano, sed nur post la taŭrfesto. La aŭtoritato ne permesas petolaĵojn; ni ĉiuj irus en malliberejon.

La ledaĵisto antaŭdiris la plej dramatikajn sekvojn, se Karmeno persistos en sia malsaĝa ideo sin prezenti al sia edzo kaj sukcesos, pri tio ke li ne ludbatalos. Oni arestos ĉiujn. Li jam sin imagis en malliberejo, kiel helpanto por ĉi tiu ago, kiun li konsideris ja krimo.

Kiam ili alvenis en Madridon, li estis devigata alifoje klopodi, por ke lia kunulino ne kuru en la hotelon, kie loĝas ŝia edzo. Kion ŝi estas atingonta tiel?...

— Vi maltrankviligos lin per via ĉeesto kaj poste li iros en la cirkon malbonhumora kaj sen memregeco, kaj vi estos kulpa, se okazos al li io malbona.

Ĉi tiu rezono kvietigis Karmenon, kiu sin metis sub la direktadon de sia bofrato. Ŝi sin lasis konduki en hotelon, kiun ĉi tiu elektis kaj tie restis dum la tuta mateno, kuŝante sur sofo en sia ĉambro kaj plorante, kiel se ŝi konsideris jam certa lian malfeliĉaĵon. La ledaĵisto, kontenta ĉar estis en Madrido bone gastante, indignis kontraŭ tiu malespero, kiun li opiniis ridinda.

— Nu!... Kio la virinoj estas! Oni kredus vin vidvino, kaj via edzo certe en ĉi tiu momento estas tiel kontenta, sin pretigante por la taŭrfesto kaj sana kaj bonfarta, kiel Roger de Flor mem. Kiaj malsaĝaĵoj!

Karmeno apenaŭ tagmanĝis, malgraŭ tio ke ŝia bofrato multe laŭdis la hotelan kuiriston. Posttagmeze ŝia rezignacio malaperis alifoje.

Ili gastis proksime al Sunpordo kaj ĝis tie atingis la bruado de la homamaso iranta al la cirko. Ne; ŝi ne povas resti en tiu nepropra ĉambro, dum ŝia edzo riskas sian vivon. Estas necese, ke ŝi vidu lin. Karmeno ne kuraĝis ĉeesti la spektaklon, sed deziris sin konscii proksima al li: ŝi volas iri al la cirko. Sed, kie ĝi estas? Neniam la toreadora edzino ĝin vidis. Se oni ne permesos al ŝi eniri, ŝi vagos en la ĉirkaŭaĵoj. Kio ja gravas, tio estas ŝia proksimeco al li, kiun ŝi kredis influanta la bonŝancon de Gallardo.

La ledaĵisto protestis. Kia malagrablaĵo! Li jam estis aĉetonta enirbileton, ĉar intencis vidi la taŭrfeston kaj nun Karmeno pro sia obstino iri en la taŭrcirkon renversis lian planon.

— Nu, kion vi povos fari tie, naivulino? Kion vi solvos per via ĉeesto?... Imagu, se Joĉjo vidos vin...

Ili diskutis longe, sed ŝi obstine respondis al ĉiuj liaj rezonoj:

— Ne akompanu min... Mi iros sola.

Fine la bofrato cedis. Ili iris en luveturilo al la taŭrcirko kaj eniris ĝin tra Ĉevaleja Pordo. La ledaĵisto multe memoris pri la cirko kaj ĝiaj dependaj konstruaĵoj, post kiam li akompanis Gallard'on dum iu el liaj vojaĝoj en Madridon por la printempaj ludbataloj.

Li kaj la oficisto montriĝis nedecidaj kaj malbonhumoraj antaŭ tiu virino kun ruĝiĝintaj okuloj kaj malŝvelintaj vangoj, daŭre staranta meze de la korto, ne

sciante, kion fari... Ambaŭ viroj estis altirataj de la malproksima bruado de la homamaso kaj la muziko, kiu sonadis en la cirko. Ĉu ili devos resti tie dum la tuta posttagmezo, ne vidante la taŭrfeston?...

La oficisto pensis taŭgan proponon.

— Ĉu via sinjorina moŝto volas iri en la kapelon?...

La parado de la toreadoraj bandoj ĵus finiĝis. Tra la pordo por eniri la arenon revenis trote kelkaj rajdantoj. Ili estis la pikistoj ne apartenantaj al la bando deĵoranta dum la unua taŭro, kiuj atendos en la korto, ĝis kiam eliros tiu ilia. Ligitaj al feraj ringoj fiksaj sur la muroj, estis laŭvice ses selitaj ĉevalaĉoj unue elirontaj en la arenon por anstataŭi la mortintojn. Post ili la pikrajdistoj sin distris, ekzercante siajn bestojn. Stalisto rajdis sur ektimema kaj brava ĉevalino, kiun li galopigis tra la korto, por ke ĝi laciĝu, kaj poste li ĝin donis al la pikistoj.

Hufbatis la kvarkruruloj, turmentate de la muŝoj, kaj tiris siajn ferringojn, kiel se ili divenus baldaŭan danĝeron. Dume trotis la aliaj ĉevaloj spronate de la rajdantoj.

Karmeno kaj ŝia bofrato estis devigataj sin rifuĝi sub la arkadojn. kaj fine la toreadora edzino akceptis la inviton iri en la kapelon. Ĝi estis senriska kaj kvieta loko kaj tie ŝi povos fari ion utilan por ŝia edzo.

Kiam ŝi sin trovis en la sanktan ĉambron kun densa atmosfero pro la spirado de la publiko ĉeestinta la preĝon de la toreadoroj, Karmeno rigardis la malriĉan altaron. Kvar brulantaj lumigiloj staris antaŭ Virgulino Kolombo, sed al ŝi ŝajnis mizera tiu ofero.

Ŝi malfermis sian mansaketon por doni unu duron al la oficisto. Ĉu li ne povas liveri pliajn kandelojn?... La viro hezite gratis sian tempion. Kandeloj! kandeloj!... Ĉe la taŭrcirka ilaro li certe ne trovos ilin. Sed subite li rememoris pri matadoraj fratinoj, kiuj alportas tiajn vaksaĵojn ĉiam, kiam ilia frato ludbatalas. La lastaj apenaŭ konsumiĝis kaj ili eble estas garditaj en iu kapela loko. Post longedaŭra serĉado li trovis ilin. Mankis kandelingoj; sed la oficisto, vigla homo, venis kun paro da malplenaj boteloj kaj, eniginte en iliajn kolojn la kandelojn, bruligis kaj metis ilin apud la aliajn lumigilojn.

Karmeno genuiĝis kaj ambaŭ viroj profitis ŝian nemovemon, por kuri al la cirko, avidante vidi la unuajn okazojn de la taŭrfesto.

Restis la virino scivole rigardante tiun neklaran skulptaĵon ruĝigatan de la lumoj. Ŝi ne konis ĉi tiun Virgulinon certe dolĉan kaj bonkoran, kiel tiu de Seviljo, al kiu Karmeno tiel ofte preĝe petegis. Krom tio ŝi estis la toreadora Virgulino, kiu aŭskultas iliajn lastmomentajn preĝojn, kiam la proksimeco de la danĝero igas la maldelikatajn virojn sincere piaj. Sur tiu planko mem multfoje genuis ŝia edzo. Kaj ĉi tiu penso sufiĉis, por ke ŝi simpatie kaj per religia familiareco rigardadis la skulptitan bildon, kiel se konus ĝin de sia infanaĝo.

Ŝiaj lipoj moviĝis aŭtomate rapide, ripetante preĝojn, sed ŝia pensado forkuris aliloken, kvazaŭ altirate de la popolamasaj bruoj atingantaj ŝin.

Ve, tiu muĝado de intermitanta vulkano, de malproksimaj marondoj, de tempo al tempo rompata per tragike silentaj momentoj!... Karmeno imagis ĉeesti la nevidatan batalon. Ŝi divenis per la diversaj tonoj de la cirkaj bruoj, kiamaniere la tragedio disvolviĝis en la areno. Iujn fojojn venis eksplodo de indignaj krioj akompanataj de fajfoj; aliajn, estis multaj miloj da voĉoj kriantaj ĥore nekompreneblajn vortojn. Subite eksonis terura ekkriego multedaŭra kaj akra, timema kaj avida, kiu ŝajnis flugi alten ĝis la ĉielo kaj imagigis milojn da kapoj palaj pro emocio kaj etenditaj por sekvi per la okuloj la rapidan kuradon de taŭro persekutanta de proksime viron... ĝis kiam, subite ĉesis la kriego kaj revenis trankvilo. La danĝero estas malaperinta.

Longaj silentoj regis kelkfoje: absoluta silento, kiel tiu de interstelaj malplenaĵoj, en kiu sonis pligrandigate la zumado de muŝoj flugintaj el la ĉevalejoj; kvazaŭ la grandega cirko estus senhoma; kvazaŭ estus iĝintaj senmovaj kaj senspiraj tiuj dekkvar mil personoj sidantaj en ĝiaj laŭŝtupaj benkaroj kaj nur Karmeno restus vivante en ĝia interno.

Subite leviĝis el ĉi tiu silento, longa kaj brua frapado, kiel se ĉiuj cirkaj brikoj sin batadus reciproke. Tio estis densega aplaŭdado tremiganta la konstruaĵon. En la korto, apud la kapelo, eksonis vergobatoj kontraŭ la mizeraj ĉevaloj, grumbloj, hufferaj bruoj kaj krioj. Novaj pikrajdistoj estis bezonataj en la areno. "Kiu estas laŭvice ironta?"

Krom ĉio ĉi oni aŭdis pli proksimajn voĉojn. Iuj paŝis en la apudaj ĉambroj kaj malfermis krakantajn pordojn: estis kompreneble pro iliaj lacspiroj, ke kelkaj homoj kunportas grandan pezon.

— Ĝi ne gravas... nur kontuzeto. Sango ne estas. Antaŭ kiam la festo finiĝos, certe ree vi pikos.

Kaj raŭka voĉo malfortigita de sufero, kvazaŭ ĝi eliĝis el pulmaj fundoj, ĝemis sopirante, kun parolmaniero memoriganta al Karmeno ŝian regionon.

— Virgulino Soleco!... Mi kredas, ke io rompiĝis en mi. Esploru bone, doktoro... Ve, miaj gefiloj!

Karmeno ektremis. Ŝi direktis al Virgulino siajn pro teruro strabantajn okulojn. Ŝia nazo ŝajnis iĝi pli akreranda inter la palaj kaj malŝvelintaj vangoj. Ŝi sentiĝis malbonfarta kaj timis ekfali, sveninte, sur la plankon. La kompatinda virino penis alifoje preĝi, izoliĝi en sia pia adoro, por ne aŭdi la eksterajn bruojn, kiujn la muroj transsendis kun malpacienciga klareco. Sed malgraŭ tiu intenco atingis ŝian orelon funebra, akva plaŭdado kaj voĉoj de homoj, kiuj certe estis kuracistoj kaj flegistoj kuraĝigantaj la pikrajdiston.

Ĉi tiu plendis per kamporajdista krudeco, dezirante samtempe kaŝi pro virfiereco la doloron de sia falbategita korpo.

— Virgulino Soleco!... Miaj gefiloj!... Kion manĝos la malfeliĉaj idoj, se ilia patro ne povos piki!...

Karmeno leviĝis. Ve, ŝi ne plu rezistas! Ŝi certe ekfalos teren, se restos en tiu senluma loko, atingate de doloraj ekkrioj. Aero kaj suno estas necesaj por ŝi. Ŝajnis, kvazaŭ ŝiaj propraj ostoj suferus saman turmentadon, kiel tiuj de la ĝemanta nekonatulon.

Ŝi eliris al la korto. Estis ĉie sango: sango sur tero kaj sur la apudaĵoj de kuvoj, kie akvo miksiĝis kun la ruĝa fluidaĵo.

La pikrajdistoj foriris el la areno. Jam oni faris la signalon por pikileti kaj la rajdantoj alvenis sur siaj sangomakulitaj ĉevaloj, al kiuj la taŭro ŝiris la felon kaj fendis la ventron, el kies interno naŭziga intestaro pendis.

Malsupreniĝis la pikistoj, vigle parolante pri la taŭrfestaj okazoj. Karmeno vidis Kuiraĵon, kiu sin metis malrapide teren pro sia pezega kaj forta korpomaso, ĵetante serion da malbenoj kontraŭ la "saĝan simion", mallerte helpantan lin. Li ŝajnis embarasata de siaj nevideblaj, feraj krurŝirmiloj kaj de kelkaj dolorigaj falbategoj, sed konsolis sian dorson per mangratado, dum ridetis montrante sian flavan, kvazaŭ ĉevalan dentaron.

— Ĉu vi rimarkis, kiel brave ludis Johano? — diris li al ĉiuj lin ĉirkaŭantaj—. Hodiaŭ la majstro venis ja preta fari kuraĝaĵojn.

Kiam li vidis la nuran virinon, kiu estis en la korto, rekonis ŝin sen miro.

— Bonan tagon, sinjorino Karmeno! Kiel mi ĝojas vin trovante ĉi tien!...

Kaj la pikisto parolis trankvile, kiel se pro tiu duondormo, en kiu ĉiam vivadis kaŭze de drinkado kaj de sia propra barbareco, nenio el la mondo kapablis mirigi lin.

— Ĉu vi vidis Johanon? — daŭrigis Kuiraĵo —. Li kuŝiĝis sur teron antaŭ la taŭra nazpinto mem. Kion tiu viro faras, neniu alia kapablas fari... Iru lin rigardi, ĉar hodiaŭ li estas ja kuraĝa.

Oni vokis la rajdiston de la malsanuleja pordo. Lia vundita kamarado deziris paroli al li, antaŭ kiam oni transportos lin en la hospitalon.

— Adiaŭ, sinjorino Karmeno. Mi iras al tiu malfeliĉulo, por scii, kion li volas. Ostorompiĝo pro falbatego laŭŝajne. Tiu ne povos repiki en la tuta sezono.

Karmeno sin rifuĝis sub la arkadaron, dezirante fermi siajn okulojn por ne vidi la abomenindan, kortan spektaklon; sed samtempe ŝi estis altirata de la kapturniga sanga ĉeesto.

La "saĝaj simioj" kondukis per la bridaj rimenoj la ĉevalojn, kiuj trenis siajn internaĵojn sur tero, lasante fali samtempe pro timo el sub la vosto verdeflavan, fluidan skrementon.

Kiam vidis ilin stalestro, li komencis svingi piedojn kaj manojn per febra diligenteco.

— Agu forte, bravuloj! — kriis li, alparolante la ĉevalejajn servistojn —. Jen!... Enigu tien!

Stalisto, irinte singardeme apud ĉevalon hufbatadantan pro doloro, demetis al ĝi ĝian selon, kaptis ĝiajn krurojn per rimenoj kaj poste, kunigante ilin per kuntirado je ĉi tiuj lastaj, faligis teren la beston.

— Jen bravulo!... Enigu! Enigu en ĝin! — kriadis daŭre la stalestro, ĉiam svingante manojn kaj piedojn.

Kaj la servistoj kun suprenigitaj ĉemizmanikoj kliniĝis al la fendita ventro de la ĉevalo, kiu lasis disfali ĉirkaŭen sangon kaj urinon, klopodante enmeti per siaj manoj tra la korna ŝiraĵo la pezajn ventropartojn, kiu pendis ekstere.

Alia tenis la kondukilojn de la falinta besto kaj premis kontraŭ la tero ĝian malgajan kapon, metinte piedon sur ĝin. Ĝiaj naztruoj moviĝis konvulsie pro doloro, dum la longaj, flavetaj dentoj, skuate klakis pro tia turmento, kaj ĝiaj obtuzaj blekoj malaperis en la polvon, sufokite de la pieda premado. Penis la stalservistoj remeti per siaj sangomakulitaj manoj en la fenditan kavon la eliĝintajn ventropartojn, sed la avida spirado de la viktimo ŝveligis kaj forigis ilin alifoje. Grandega veziko malhelpis speciale tiun ĉi aranĝon.

— Jen la globeto, bravuloj! — kriis la direktanto —. Enigu la globeton!

Kaj fine la veziko kune kun ĉiuj siaj apudaj internaĵoj malaperis en la fundon de la ventro, dum du stalistoj per vigla lerteco kudris la felon.

Kiam la ĉevalo jam estis "riparita" per barbara rapideco, oni verŝis sitelon da akvo sur ĝian kapon, liberigis la krurojn el la rimenaj ligiloj kaj batis ĝin per vergo, por ke ĝi stariĝu. Iuj, apenaŭ irinte du paŝojn, ekfalis subite, verŝante fluon de sango tra la vundo flikita per maldika ŝnureto. Aliaj sin tenis firme per tiuj nekonataj energioj de la besta vivemo. La servistoj post tiu "riparado" kondukis ilin al la "glazurado" konsistanta, ĵeti kontraŭ ĝiajn krurojn kaj ventron kelkajn akvositelojn. La blanka aŭ kastana koloro de la bestoj tiel iĝis brila, dum la felaj haroj gutegis rozkoloran fluidaĵon, miksaĵo el akvo kaj sango.

Oni rebonigis la ĉevalojn, kvazaŭ ili estus malnovaj ŝuoj kaj oni ekspluatis ilian nedefendemon ĝis la lasta momento, daŭrigante ilian agonion kaj morton. Restis sur tero pecoj de intestoj, kiujn oni tranĉis por faciligi la "riparon". Aliaj kuŝis en la areno, kovrite per sablo, ĝis kiam la taŭro mortos kaj la cirkaj servistoj povos forporti tiujn sangajn ĉifonojn per siaj korboj. Multajn fojojn la spacon okupatan de la mankantaj organoj plenigis la barbaraj kuracistoj per manprenoj da stupo, kiujn ili enigis en la ventron.

Nur gravas, ke ĉi tiuj bestoj povu stari dum kelkaj, pluaj minutoj, ĝis kiam la pikrajdistoj reiros en la arenon: la taŭro poste finos ilian detruon... Kaj la mortantaj ĉevalaĉoj suferis sen protesto tiun funebran aliformigon. La lamirantajn bestojn oni vigligis per bruaj vergobatoj tremigantaj ilin de la hufoj ĝis la oreloj. Foje milda ĉevalo pro malespera furiozo intencis mordi la "saĝajn

simiojn", kiuj proksimiĝis al ĝi. Inter siaj dentoj ankoraŭ ĝi konservis pendantajn pecojn da felo kaj ruĝajn harojn. Kiam sentis la mizera besto la kornan pikon en ĝian ventron, mordis la taŭran kolon per ŝafa kolero.

Blekis malgaje la vunditaj ĉevaloj kaj levis sian voston por brue gaselpeli: haladzo el sango kaj vegetajaj ekskrementoj disiĝis en la korto: la ruĝa fluidaĵo restis inter la pavimŝtonoj, nigriĝante, kiam ĝi fariĝis seka.

Ĝis tie atingis la bruaro de tiu nevidata popolamaso. Okaze estis ekkrioj pro maltrankvilo; iu "ha! ha!" elĵetita de miloj da buŝoj, kiu divenigas forkuron de pikiletisto persekutata de proksime de taŭro. Poste, absoluta silento. La viro reiras al la bravbesto kaj eksplodas brua aplaŭdado, por premii lerte de li kroĉitan pikiletparon. Eksonis trumpetoj post tio, anoncante la mortigon je la taŭro, kaj oni aplaŭdis ripete.

Karmeno volis foriri. Virgulino Espero! Kion ŝi tie faras?... Ŝi ne scias, laŭ kiu ordo la matadoroj ludas. Eble tiu signalo mem montris la momenton, kiam ŝia edzo devos sin meti antaŭ la bravbeston. Kaj ŝi estas tie je malmultaj paŝoj da distanco kaj tamen, ne vidante lin!... La malfeliĉulino deziris forkuri, por sin liberigi el tia turmentado.

Plie ŝin korpremis la vido je tiu sango fluanta en la korto kaj la suferado de la kompatindaj ĉevaloj. Ŝia virina sentemo ribelis kontraŭ tiuj kruelaĵoj kaj ŝi ŝtopis samtempe per naztuko sian nazon, por ne flari tian buĉejan haladzon.

La edzino de Gallardo neniam iris en taŭran cirkon. Antaŭ ŝi oni tre ofte parolis pri ludbataloj, sed per la rakontoj je ĉi tiuj festoj ŝi nur konis la eksteraĵon, kion ĉiuj vidas, la ludojn en la areno meze de sunlumo, kun briloj de silko kaj brodaĵoj, la luksegan prezentadon, sciante tamen neniom pri la abomenindaj pretigoj, kiuj okazas post la kulisoj. Kaj ili ĉerpis siajn vivrimedojn el tiu festo kaŭzanta tiajn naŭzigajn turmentojn al pacemaj bestoj! Kaj oni faris ilian riĉaĵon per tiaj spektakloj!...

Eksplodis brua aplaŭdado interne de la cirko. Oni ordonis ion en la korto per imperativa voĉo. La unua taŭro ĵus mortis. Malfermiĝis pordoj ĉe la fundo de la pasejo, tra kiu iras la ĉevaloj en la arenon kaj iĝis pli klaraj kaj energiaj la bruoj de la homamaso kaj la sonoj de la muzikistaro.

Muletoj eniris la cirkon, por forigi la mortintajn ĉevalojn; aliaj, por treni la taŭran kadavron.

Karmeno vidis, ke ŝia bofrato venas sub la arkadaro. Ankoraŭ li tremas, entuziasmigite de tio, kion li ĵus vidis.

— Johano... bravega! Hodiaŭ li ludas pli bone, ol iam ajn. Ne timu. Li kapablas venki taŭron eĉ sen spado!

Poste li rigardis ŝin maltrankvile, ĉar timis perdi tiel interesan spektaklon... Kion ŝi decidas? Ĉu ŝi kuraĝas iri en la cirkon?

— Akompanu min! — diris la kompatinda edzino per sufera tono —. Konduku

min baldaŭ for el ĉi tie. Mi malbonfartas...; lasu min en la unuan preĝejon, kiun ni trovos.

La ledaĵista mieno iĝis malkontenta. Kia kontraŭaĵo! Ne vidi tiel belegan taŭrfeston!... Kaj dum ilia iro al la pordo li pensis, kie li povos forlasi Karmenon, por reveni kiel eble plej baldaŭ en la cirkon.

Kiam la dua taŭro eliris, ankoraŭ Gallardo, apogite sur la barilo, ricevis gratulojn el siaj admirantoj. Kiel kuraĝa li estas... "kiam li volas"!... La tuta publiko aplaŭdis lin en la daŭro de lia unua taŭro, forgesante sian furiozon kontraŭ lin ĉe la ĵus pasintaj taŭrfestoj. Okaze de tio ke pikrajdisto falis teren kaj tie restis nemove pro la terura batego, Gallardo alkuris kun sia mantelo, allogante la bravbeston mezen de la areno. Estis ja brila flirtigado je la tuko, per kiu li fine lacigis la taŭron kaj restigis ĝin kvieta post ĝia daŭra atakado al tiu trompanta homo. La toreadoro, profitante la miron de la besto, rektiĝis, starante proksima al la nigra nazpinto, kaj antaŭenigis sian ventron, kvazaŭ li ĝin incitus al batalo. La spadulo spertis la feliĉan "antaŭsenton", kiu puŝis lin al grandaj kuraĝaĵoj. Estas necese konkeri la publikan favoron per sentima faro, kaj li genuiĝis antaŭ la kornojn, preta sin levi, se la taŭro montros eĉ plej malgrandan intencon ataki.

La bravbesto staris nemove. Gallardo etendis manon por tuŝi ĝian malsekan nazpinton kaj ĝi restis kvieta. Tiam li kuraĝis fari ion, kio kaŭzis, ke la publiko restis en korprema silento. Iom post iom li kuŝiĝis sur la sablon kun sia mantelo inter la brakoj, kvazaŭ litkuseno, kaj tiel restis dum kelkaj sekundoj sub la nazo de la taŭro, kiu flaris lin iom timeme, kiel se ĝi suspektis danĝeron en tiu korpo sin metanta sen protekto sub ĝiajn kornojn.

Kiam la bravbesto mallevis fine la kapon por ataki lin, la toreadoro vigle ruliĝis al ĝiaj kruroj, per kio la kornoj ne povis lin atingi kaj la taŭro pasis super li, serĉante vane pro sia blinda furiozeco la homon ĵus kuŝintan antaŭ ĝi.

Sin levis Gallardo, forskuante la polvon el siaj vestoj kaj la publiko, kiu amas sentimaĵojn, aplaŭdis lin entuziasme, kiel alitempe. Ne nur ĝi premiis lian kuraĝon. Ĝi ankaŭ aplaŭdis sin mem, admirante sian propran potencon, ĉar divenis, ke tiu toreadora faritaĵo estis nur por reamikiĝi al ĝi, por alifoje gajni ĝian favoron. Gallardo venis ja en la arenon preta fari plej grandajn bravaĵojn, por konkeri aplaŭdojn.

— Li ne sufiĉe penas — oni diris ĉe la benkaroj —; multajn fojojn li ne arde ludas, sed estas digna toreadoro kaj klopodas remeriti la perditan honoron.

La entuziasmo de la publiko kaj ĝia gaja moviĝemo, kiam ĝi memoris la Gallard'an faritaĵon kaj tiun trafan spadpikon, per kiu la alia majstro mortigis la unuan taŭron, estis anstataŭataj per protestoj post la apero de la dua en la arenon. Ĝi estis grandega kaj belaspekta, sed kuris meze de la cirko, rigardante mire la bruantan homamason el la benkaroj, timigite de la voĉoj kaj fajfoj, per kiuj oni intencis eksciti ĝin, kaj forkurante eĉ de sia propra ombro, kiel se ĝi ĉie suspek-

tis ĉiuspecajn riskojn. La toreadoroj kuris, etendante al ĝi sian mantelon. Ĝi atakis la ruĝan ŝtofon kaj ĝin persekutis dum kelkaj momentoj, sed subite blovegis malkonfide, sin turnis posten kaj forkuris per grandaj saltoj laŭ alia direkto. Ĝia vigla forkuremo indignigis la publikon.

— Tio ja ne estas taŭro... ĝi estas simio!

La majstroj per siaj manteloj sukcesis fine konduki ĝin al la barilo, apud kiu la pikrajdistoj ĝin atendis kun la pikstango sub sia dekstra brako kaj nemove sur siaj ĉevaloj. Ĝi proksimiĝis al rajdanto per mallevita kapo kaj furiozaj blovmuĝoj, kiel se ĝi intencus ataki. Sed, antaŭ kiam la ferpinto povus piki ĝian kolon, ĝi eksaltis kaj forkuris, pasante inter manteloj, kiujn etendis al ĝi la piedirantaj toreadoroj. En sia vojo ĝi renkontis alian pikrajdiston kaj la taŭro ripetis siajn blovmuĝojn, eksalton kaj forkuron. Poste ĝi alvenis apud trian rajdanton, kiu per antaŭenigo je sia lanco ĝin pikis kolen, pro kio ĝia timo kaj forrapido pligrandiĝis.

La publiko amase stariĝis, svingante la brakojn kaj kriante. Malbrava taŭro! Kia trompo!... Ĉiuj sin turnis al la prezidanto per furioza protestado: "Prezidanta moŝto! Tio ja estas netolerebla!"

El kelkaj benkaroj ekaŭdebliĝis ĥoro ripetanta ian vorton per ĉiam sama tono.

— Fajjjro!... fajjjro!

La prezidanto ŝajnis dubi. Kuris la taŭro persekutate de la toreadoroj, kiuj sekvis ĝin kun mantelo sur brako. Kiam iu el ili sukcesis sin meti antaŭ ĝin por ĝin haltigi, la besto flaris la ŝtofon per sia ĉiama blovego kaj malproksimiĝis laŭ alia direkto, saltante kaj hufbatante.

Pligrandiĝis la brua protestado pro tiuj forrapidoj. "Prezidanta moŝto! Ĉu vi estas blinda!..." Ekfalis sur la sablon ĉirkaŭ tiun malatakeman beston malplenaj boteloj, oranĝoj kaj sidkusenoj. La publiko malamis ĝin pro ĝia malbraveco. Botelo trafis iun el ĝiaj kornoj kaj ĉiuj aplaŭdis la lertan ĵetinton, eĉ ne sciante, kiu li estis. Multaj ĉeestantoj antaŭenigis sian buston, kvazaŭ ili intencus sin ĵeti al la areno, por dispecigi per siaj manoj tiun malestimindan beston. Kia skandalo! Meti en la Madridan cirkon bovon nur taŭgan por buĉejo! Fajro! fajro!

La prezidanto fine svingis ruĝan tuketon kaj aplaŭda eksplodo premiis lian decidon.

Fajraj pikiletoj estis ja eksterordinara spektaklo; neatendita afero, kiu plu interesigis la taŭrfeston. Multaj ĝis raŭkiĝo protestintoj ĝojis interne pro tiu okazaĵo. Ili estis vidontaj taŭron dumvive rostatan kaj freneze kurantan pro la eksplodoj, kiuj okazos sur ĝia kolo.

Antaŭeniris Naciao, portante du dikajn pikiletojn, kiuj pendis de liaj manoj kun la pintoj malsupren kaj ŝajnis tegitaj per nigra papero. Li iris al la taŭro senzorge, kiel se ĝia malbraveco meritis nenian singardon, kaj li kroĉis la inferajn stangojn, dum la homamaso venĝeme aplaŭdis.

Eksonis krako, kvazaŭ io rompiĝus kaj du fluoj da blanka fumo ekeliĝis brue el la besta kolo. Pro la sunlumo oni ne vidis la fajron, sed la haroj malaperis brulinte kaj nigra makulo disvastiĝis sur la kolsupro.

La taŭro kuris surprizite de la atako kaj rapidis, kiel plej multe ĝi povis, kvazaŭ per tiu rimedo sin liberigus el la turmento, ĝis kiam subite ekkrevis sur ĝia kolo akraj eksplodoj similaj al karabenpafoj, dum flugis ĉirkaŭ ĝi brulantaj paperaĵoj. La besto saltadis vigle pro teruro, metante samtempe siajn kvar krurojn en la aeron kaj turnante posten sian kornan kapon, por demeti per la buŝo tiujn demonojn, kiuj fiksiĝis sur ĝian kolsupron. La ĉeestantoj ridis kaj aplaŭdis, amuzate per tiuj eksaltoj kaj tordiĝoj. Ŝajnis, kvazaŭ la peza kaj dika besto dancadus per dresita lerteco.

— Kiel multe ili jukas ĝin! — ekdiris la publiko per sangavida rido.

La pikiletoj ĉesis bruli kaj krevi. Bolis la grasa vezikaro de la karbigita kolo. La taŭro, kiam jam ne sentis la fajran impreson, restis nemove lacega, kun mallevita kapo, eligante sekan, malhele ruĝan langon.

Alia pikiletisto proksimiĝis al ĝi kaj kroĉis duan paron. Ree la fumaj fluoj ekaperis sur la bruligita karno, eksonis la pafoj kaj la taŭro kuris alifoje, klopodante meti sian buŝon apud la turmentilon per tordo je sia masiva korpo; sed nun la movoj estis malpli energiaj, kiel se la fortika besto kutimiĝis al sufero.

Oni ankoraŭ pikiletis ĝin per tria paro kaj ĝia kola supro fariĝis karbo; disiĝis tra la tuta cirko naŭziga odoraĉo de fandita graso, duonbrulinta ledo kaj haroj, kiuj malaperis pro la fajro.

La publiko daŭrigis sian aplaŭdadon kun venĝema ardo, kvazaŭ la paca besto estus kontraŭulo por ĝia religia kredo kaj ĝi farus sanktan agon per ĉi tiu bruligo.

Ridis la homamaso, vidante kiel la taŭro treme staris kun ruĝiĝintaj okuloj kaj febra movado je siaj flankoj, kvazaŭ estus ili forĝeja blovilo, dum ĝi muĝis per dolora blekado kaj trenis sian langon sur la sablo, avidante malvarmeton.

Gallardo, proksima al la prezidejo, atendis la signalon por mortigi, apogite sur la barilo. Strekaro tenis sur ĝia rando la spadon kaj ruĝtukon jam pretaj.

Malbenaĵo! Ja la taŭrfesto favore komenciĝis kaj nun destinas por li la malbona sorto ĉi tiun taŭron, kiun li mem estis elektinta pro ĝia bela aspekto, sed kiu en la areno tamen montriĝis tiel malbrava!...

Li senkulpigis jam sian ankoraŭ ne okazintan, eble nebonan ludadon, dum interparolis kun la spertuloj sidantaj ĉe la plej proksimaj benkoj.

— Mi penos mortigi ĝin, kiel eble malplej malbele — li diris, levetante siajn ŝultrojn.

Poste la spadulo rigardis la loĝion de Doña Suno. Ŝi antaŭe aplaŭdis lin, kiam li faris la miregigan sentimaĵon kuŝiĝi antaŭ la taŭron. Ŝiaj ganttegitaj manoj frapadis, dum li revenis al la barilo, salutante la publikon. Kiam Doña Suno

konsciis, ke la toreadoro rigardas ŝin, ŝi sendis al li amike afablan rideton kaj eĉ la akompananto, tiu antipatiulo, kuniĝis al la saluto per granda kliniĝo de sia korpo, kiel se ĝi estus rompiĝonta ĉe la talio. Poste li surprizis kelkfoje, ke ŝi persiste rigardadis aŭ serĉis lin per sia binoklo en lian postbarilan rifuĝejon. Kia virino!... Ĉu tiu blondulino alifoje estas altirata de la bravuloj? Gallardo intencis viziti ŝin la morgaŭan tagon, ĉar eble ŝi ŝanĝis sian opinion.

Eksonis la signalo por mortigi, kaj la spadulo post mallonga honorpromeso iris al la taŭro.

La entuziasmaj partianoj konsilis lin kriante:

— Mortigu ĝin baldaŭ! Ĝi estas ja bovo inda je nenia penado.

La toreadoro malvolvis sian ruĝtukon antaŭ la beston kaj ĉi tiu atakis, sed per malrapida kuro, memorante la ĵus ricevitan punon kaj kun klara intenco vundi kaj dispremi iun, kiel se la turmento estis vekinta ĝian bravecon. Tiu homo estis la unua, kiu sin metis antaŭ ĝiajn kornojn post la fajraĵo.

Ĉe la popolamaso laŭgrade malaperis ĝia venĝema malamikeco al la taŭro. Ĝi ja ne malbone batalas; ĝi atakadas. Hura! Kaj ĉiuj entuziasme akompanis per ĥoraj ekkrioj la pasmovojn de Gallardo, samtempe aprobante per ili la toreadoron kaj la bravbeston.

Restis nemove la taŭro kun mallevita kapo kaj pendanta lango. Fariĝis tiu silento anoncanta la mortigan spadpikon: pli absoluta silento, ol tiu de interstela spaco, kaŭze de multaj haltigitaj spiradoj. Tiel profunda estis ĉi tiu silento. ke eĉ plej etaj bruoj el la areno atingis ĝis la lastaj benkoj. Ĉiuj klare aŭdis malgrandan kraketon el lignaĵoj frapantaj iuj kontraŭ la aliajn. Tio estis, ke Gallardo per la pinto de sia spado puŝis posten sur la taŭran kolon la duonbrulintajn stangojn de la pikiletoj, kiuj montriĝis inter la kornoj. Post tiu aranĝo, por senbarigi la vundotan lokon, la homamaso ankoraŭ pli antaŭenigis siajn kapojn, divenante per mistera instinkto la intencon de la matadoro. Li volas renversi la taŭron per majstra spadpiko: "Nun!" — diris ĉiuj pense.

Sin ĵetis Gallardo kontraŭ la taŭron kaj ĉiuj spiris brue samtempe post tiu emociiga atendo. Post la kolizio inter la homo kaj la besto ĉi tiu ekkuris, muĝante furioze, dum el la benkaroj eksplodis fajfoj kaj protestoj. Kiel ĉiam. Gallardo turnis la kapon flanken kaj fleksis sian brakon en la momento mem, kiam li pikis. La besto portis nefikse kaj balanciĝanta la spadon ĉe la kolo, kaj post malmultaj paŝoj la ŝtala klingo eksaltis el la karno kaj ruliĝis sur la sablon.

Parto el la publiko mallaŭde alkriis Gallard'on. Ĵus rompiĝis la sorĉa ligilo, kiu kunigis ĝin al la spadulo dum la festa komenciĝo. Reaperis malfido: malamo kontraŭ la toreadoro kruele efikis; ĉiuj ŝajnis, kvazaŭ estus forgesintaj la ankoraŭ freŝan, entuziasmigan faritaĵon.

Gallardo reprenis la spadon kaj kun mallevita kapo kaj ne kuraĝante protesti

kontraŭ la malindulgemo de tiu homamaso, tolerema al aliaj kaj severa por li, duafoje li iris al la taŭro.

Konfuzite li neklare vidis, ke toreadoro sin metis apud lin. Certe li estas Naciao.

— Trankviliĝu, Johano! Ne perdu sinregadon.

"Malbenaĵo! Ĉu ĉiam okazos same al li? Ĉu li jam ne plu povos enigi sian brakon inter la kornojn, kiel alitempe, spadpikante ĝis la tenilo? Ĉu li dum sia tuta, restanta vivado ridigos la publikojn?... Kaj tio okaze de bovo, kiun oni bezonis fajrpuni!".

Sin metis Gallardo antaŭ la beston, kiu ŝajnis atendi lin per nemovaj kruroj, kiel se ĝi dezirus fini, kiel eble plej baldaŭ, sian multedaŭran turmenton. Li ne volis fari pluajn pasmovojn kaj rektiĝis kun ruĝtuko apud tero kaj spado horizontale direktata je alteco de liaj okuloj... Nun enigi la brakon!

La publiko rapide stariĝis. Dum kelkaj sekundoj homo kaj bravbesto kuniĝis laŭ nur unu maso kaj tiel ili iris kelkajn paŝojn. La plej spertaj pretigis jam siajn manojn, avidante aplaŭdi. Li sin ĵetis por mortigi same brave, kiel en sia plej fama epoko. Ja ĝisfunda spadpiko!

Sed subite la homo estis ĵetata, kvazaŭ kuglo, el la kornaro, per potenca kapbato kaj ruliĝis sur la sablon. La taŭro mallevis poste sian kapon, hokante per la kornoj lian nemovan korpon, ĝin levis dum momento de la tero kaj lasis ĝin fali por daŭrigi sian kuradon, portante surkole la tenilon de la tute penetrinta spado.

Gallardo leviĝis malvigle kaj la tuta ĉeestantaro ekaplaŭdis per surdiga maniero, dezirante kompensi al li sian maljustaĵon. Hura la viroj! Jen bravulo el Seviljo! Li ludis kuraĝe...

Sed la toreadoro ne respondis tiujn entuziasmajn ekkriojn. Li metis la manojn kontraŭ sian ventron fleksiĝante pro doloro kaj ekiris per ŝanceliĝanta paŝado kaj mallevita kapo. Du fojojn li levis ĉi tiun por rigardi la elirejan pordon, kiel se li timis ne trovi ĝin kaŭze de sia zigzaga, tremanta, kvazaŭ ebria irmaniero.

Subite li falis sur la sablon maletendite, kiel grandega vermo el silko kaj oro. Kvar cirkaj servistoj per mallerta tirado lin metis sur siajn ŝultrojn Naciao kuniĝis al la grupo, subtenante la kapon de la spadulo, pala, flaveta kun malklara rigardo tra siaj kruciĝintaj okulharoj.

La publiko surprizate ĉesis aplaŭdi. Ĉiuj rigardis sin reciproke, ne sciante, kion pensi pri la graveco de tiu okazaĵo... Sed baldaŭ cirkulis optimismaj sciigoj, kies devenon neniu konis; ĝi estis tiu anonima opinio akceptata de ĉiuj kaj kiu en iaj momentoj ardigas aŭ konsternas la popolamasojn. Nenio grava. Kontuzo ĉe la ventro sveniginta lin. Sangon vidis neniu.

La publiko jam trankviligite residiĝis, atentante anstataŭ la vundita toreadoro la bravbeston, kiu ankoraŭ staris kaj rezistis la premon de la morto.

Naciao helpis meti lian majstron sur liton en la malsanulejon. Li falis sur ĝin, kvazaŭ sako, sen konscio, kun brakoj pendantaj ambaŭflanken.

Sebastiano, kiu tiel ofte vidis la spadulon sangomakulita kaj vundita, ne perdante malgraŭ tio sian trankvilon, nun timis rigardante lin senmova, verde blanka, kiel se li estus mortinta.

— Nu! — li diris ĝememe —. Ĉu ne estas kuracistoj? Ĉu estas neniu ĉi tie?

La malsanulejaj oficistoj, post kiam ili kuracis la kontuzitan pikrajdiston, iris en sian cirkan loĝion.

La pikiletisto atendis malpacience; la sekundoj ŝajnis al li horoj; li alkriis Strekaron kaj Kuiraĵon, kiuj estis tie, ne sciante certe, kion li diris al ili.

Alvenis fine la kuracistoj kaj, post kiam fermis la pordon, por ke neniu embarasu ilin, ili hezite restis antaŭ la senmova korpo de la spadulo. Estas necese malvesti lin. Sub la lumo penetranta tra plafona fenestro, Strekaro komencis malbutoni, malkudri kaj ŝiri la vestojn de la toreadoro.

Naciao apenaŭ povis vidi la korpon. La kuracistoj ĉirkaŭis la vunditon, sin konsultante reciproke per rigardo. Ĝi certe estas sinkopo, kiu aspektigas lin mortinta. Oni ne trovis sangon. La ŝiraĵoj sur liaj vestoj fariĝis nedubeble, kiam la taŭro renversis lin.

Eniris urĝe doktoro Ruiz kaj liaj samprofesiuloj lasis al li pasi en la unuan vicon pro respekto je lia majstreco. Li malbenis nerveme, dum helpis al Strekaro malfermi la vestojn de la toreadoro.

Okazis ekmovo pro miro, pro dolara surprizo ĉirkaŭ la lito. La pikiletisto ne kuraĝis demandi. Li rigardis tra la kapaj interspacoj kaj vidis la korpon de Gallardo kun la ĉemiza basko ĉifita sur lian bruston kaj la kalsono sur la femurojn. La ventro tute malkovrita surhavis fendon, kies randoj, tra kiuj oni vidis freŝe bluajn internaĵojn, estis sangomakulitaj.

Doktoro Ruiz skuis malgaje la kapon. Krom tiu grandega kaj nekuracebla vundo la toreadoro ricevis fortegan baton de la ekpuŝego. Li ne spiris.

— Doktoro!... doktoro!... — ĝemis la pikiletisto, petegante por scii la veron.

Kaj doktoro Ruiz post longa silento alifoje skuis sian kapon.

— Ĉi tio finiĝis, Sebastiano... Vi devas serĉi alian majstron.

Naciao levis alten siajn okulojn. Jen kiamaniere finiĝis homo, kiel li, povante nek premi la manon al siaj amikoj nek diri eĉ unu vorton, subite, kiel mizera kuniklo, kies nukon oni batas!

La malespero puŝis lin for el la malsanulejo. Ha! li ne rezistas tian vidon! Ne estas li, kiel Kuiraĵo, kiu restis nemove kaj kun streĉitaj brovoj apud la litpostaĵo, rigardante la kadavron, kvazaŭ ne vidus ĝin, dum turnis sian rondan ĉapelon per la fingroj.

Li estis ploronta, kiel infano. Lia premata brusto ne povis apenaŭ spiri, dum larmoj ŝveligis liajn malĝojajn okulojn.

En la korto li flankeniĝis, por ne bari la pasantajn pikrajdistojn, kiuj reiris en la arenon.

La terura sciigo komencis flugi tra la taŭra cirko. Gallardo estas mortinta!... Iuj dubis pri ĝia vereco; aliaj konsideris ĝin certa, sed neniu forlasis sian sidlokon. Oni tuj lasos eliri la trian taŭron. Ankoraŭ ili ne alvenis en la taŭrfestan mezon kaj neniu deziris vidrezigni la restantan parton.

Tra la pordo de la "Ĉevaloj" atingis la korton la obtuza bruado de la homamaso kaj muzikaj sonoj.

La pikiletisto eksentis, kiel naskiĝis en lia koro terura malamo pri ĉio, kio ĉirkaŭis lin en tiu momento; akra abomeno al sia metio kaj al la publiko, kiu ĝin vivigas. Ŝvebis en lia memoro la pravaj vortoj, per kiuj ridigis li siajn kunulojn kaj li trovis nun en ili novan sencon de justeco.

Lia pensado bildis la taŭron, kiun oni trenis sur sablo en tiu momento mem, kun karbigita kaj sangomakulita kolo, rigidaj kruroj kaj, kvazaŭ vitraj okuloj rigardantaj, kiel la mortintoj rigardas, la bluan ĉielon.

Poste li imagis la amikon, kiu kuŝas proksime trans brika muro, ankaŭ nemova, kun rigidaj membroj, kun kapo sur brusto, ventro fendita, kaj nebrila kaj mistera heleco inter la kruciĝintaj okulharoj.

Malfeliĉa taŭro! Malfeliĉa spadulo!... Subite la bruema amaso ekkriis gaje. La spektaklo daŭras. Naciao fermis siajn okulojn kaj streĉis siajn pugnojn.

Jen kiel la vera, la nura rabbesto raŭke blekas.

FINIĜO

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego
Nr 90
FILIA Nr 14
w Białymstoku

KLARIGOJ

R. DE T. — Tial ke bravaj virbovoj, speciale elektitaj kaj zorgitaj por ludbataloj, estas nur en Hispanlando aŭ aliaj hispanlingvaj landoj, ni konsideras tiun ĉi beston kaj la al ĝi rilatantajn aferojn, kiel specialaĵoj kaj tial ni uzos por ĝi kaj ili specialajn vortojn devenantajn de "taŭro", zodiaka nomo de tiu besto.

Ni ankaŭ konsideras la kunmetitan vorton "ludbatali" nepre necesa por esprimi ĝuste, kion faras la toreadoro rilate al la taŭro, ĉar tio estas ja ne nur krude batali, sed ankaŭ bele, gracie kaj arte ludi kaj tre ofte oni eĉ multe pli ŝatas tion ĉi, ol la batalon mem, kiu nur por atingi sian celon, la venkon je la taŭro, certe ne bezonus tiom multe da apudaĵoj.

(1) Taŭra cirko, ludbatalejo aŭ taŭrludejo estas nekovrita konstruaĵo simila al la antikvaj, romanaj cirkoj.

(2) Profesia permeso estas permeso por ludmortigi plenaĝajn taŭrojn kaj certigo pri la koncerna lerteco.

(3) Hispane "gallardo" signifas altan kaj vire belfortan.

(4) Hispanaj, famaj toreadoroj de la pasinta jarcento. Hispane: *Lagartijo* kaj *Frascuelo.*

(5) Spadulo estas la ĉefa toreadoro de la ludbatala bando. Li estas nur, kiu mortigas taŭrojn per spado kaj tial, oni nomas lin ankaŭ "matadoro" (hispane mortigisto).

(6) Religia festo.

(7) Lumvesto estas speciala, ore aŭ arĝente brodita kostumo de freŝa koloro, ornamita per multaj brilaj eroj kaj uzata de toreadoroj dum ludbatalo.

(8) Kromnomo, kiun, kiel ĉiujn ceterajn, ni tradukis Esperanten.

(9) Hispana monero valoranta 5 pesetojn.

(10) Hispana titolo uzata de la alta kaj meza, socialaj klasoj kaj metata antaŭ la nomo. Por virinoj ĝi fariĝas "Doña".

(11) Famkonata firmo de taŭra produktado.

(12) Hispane oni kutime diras miuro anstataŭ Miur'a taŭro.

(13) Servisto de matadoro, kies ĉefa zorgo estas pretigi la spadon al ĉi tiu, kiam ĝi estas necesa dum ludbatalo.

(14) Ludbataloj, ĉe kiuj oni ne mortigas la taŭrojn, sed nur agas pri ili per specialaj manteloj ludataj de la toreador-lernanto.

(15) Vostoforme plektata tufo, kiun havas ĉiuj toreadoroj ĉe la menciita kaploko.

(16) En Hispanlando "ci" estas ofte uzata; nome: inter familianoj, intimaj amikoj, kamaradoj, gefianĉoj, infanoj ktp.

(17) Famkonata, estinta toreadoro.

(18) Ĉapelo kutime uzata de toreadoroj kaj taŭremuloj (ne kun lumvesto).

(19) Pikiletoj uzataj laŭpare ĉe la unua duono de ludbatalo kaj konsistantaj el stangeto ornamita per krispitaj kolorrubandoj el papero kaj finiĝanta per fera faldita pinto, por ke ĝi kroĉiĝu en la karnon kaj ne falu.

(20) Ruĝa tuko metita sur stangon kaj manludata por inciti la taŭron kaj gvidi ĝiajn atakojn, kiam oni estas ĝin mortigonta.

(21) Nuntempe preskaŭ ekskluzive ĉi tiuj.

(22) Du rajdistoj, kiuj paradas antaŭ la toreadoraj bandoj, post kiam, galope sur belaj ĉevaloj, kaptis aeren ĵetitan de la prezidanto ŝlosilon.

(23) Katolika sakramento por tiuj tuj mortontaj.

(24) Pioniro: toreadoro, kiu kune kun aliaj pioniroj helpas la majstron per ludmantelo kaj kapturnas komence la taŭron, ĝin pretigante al posta agado.

(25) Promeso farata de la matadoro al grava ĉeestanto (prezidanto, altrangulo, amiko ktp.) pri bela kaj brava taŭromortigo por lia honoro. Ĝi estas paroladeto simila al tosto.

(26) Pasmovo konsistas el pasigo je la atakanta taŭro sub la horizontale etendita ruĝtuko tenata per mano, dum la toreadoro flankenigas sian korpon nur sufiĉe, por ne esti atingata de la kornoj.

(27) Per ĉi tiu vorto oni aludas la *vere* danĝeran kaj malfacilan agon mortigi.

(28) Hispane "puntillero": homo armita de speciala ponardo, per kiu li pikas la cerbeton de la duonmortinta besto, por ke ĝi tuj mortu kaj ne plu suferu.

(29) Fama, andaluzia vino.

(30) Ĉe la vilaĝoj, kie plej ofte ne estas cirka konstruaĵo, oni pretigas la ĉefplacon por ludbataloj.

(31) Specialaj, ludaj mantelmovoj.

(32) Religia ĉeffesto.

(33) En Hispanlando, kiam la fianĉino loĝas en teretaĝo, la gefianĉoj kutimas ame interparoli tra iu fenestra krado dum longaj horoj.

(34) Kapelo, kie la kondamnitoj restis alitempe dum la antaŭtago de la ekzekuto.

(35) Nazareto, urbo el Sirio proksima al Jeruzalemo, kie loĝis Jesuo longtempe.

(36) Vestitaj per malmultaj, subtilaj kaj travideblaj vestaĵoj.

(37) Famkonatulo el la franca revolucio.

(38) Flamenka kanto estas popola, andaluzia kantstilo.

(39) Kristana preĝo.

(40) Vulgare oni diras hispane, ke iu scias latinlingvon, kiam li estas fripono.

(41) Tiel oni nomas hispane la malĉastulinojn.

(42) Duonsfera kaj rondranda ĉapelo.

(43) Mezepoka, hispana, venkinta heroo kontraŭ la invadintaj maŭroj.

(44) Nomo de la monto, sur kies supro oni krucmortigis Kriston.

(45) Popolaj kantatoj de Andaluzio.

(46) Antikva, ceremonia vestaĵo formosimila al frako.

(47) Hispana, nobela signo.

(48) Kompreneble, nuntempe ili parolas prefere pri aŭtomobiloj kaj sportoj.

(49) Fingroturno simila al tiu de ŝraŭbilo, farata apud tempio, por montri, ke mankas al lia kapo ŝraŭboj kaj sekve malbone funkcias ĝi.

(50) Hispane oni diras tion ĉi, parolante pri mortinta parenco.

(51) Datreveno de la reviviĝo de Kristo.

(52) Ili estis ĝis la proklamo je la Respubliko, en 14-a — aprilo — 1931, ruĝa kaj flava; de tiam, ruĝa, flava kaj violkolora.

(53) Antikva, buŝlarĝa pafilo uzata iam de hispanaj banditoj.

(54) Benkaroj rostataj de la suno malpli multekostaj, ol tiuj ombraj.

(55) Ŝtalaj, horizontalaj kabloj fortike fiksitaj antaŭ la benkaroj por eviti, ke taŭro eksaltu en ilin.

(56) Religia soleno por danki al Dio bonan, gravan okazintaĵon.

(57) Tio estas: adeptoj de Kristo, nomata "La Nazaretano".

(58) Ironia priskribo je la drinkemuloj, rilatanta la iron de Kristo en monton Kalvario por esti ekzekute krucpendigata.

(59) Religia, kanta soleno de tiu tago. Tiu de muzikverkisto Eslava estas la plej famkonata.

(60) Ĉi tiu kapitano kaj lia roto neniel rilatas la hispanan armeon. Ili estas nur procesiaĵoj.

(61) Imagita heroo el plej famkonata, hispana, literatura verko.

(62) Famkonegata turo de Seviljo.

(63) Dia, atendata de la hebreoj homarsavonto.

(64) Kvarono da peseto.

(65) Fama, andaluzia bandito el la pasinta jarcento.

(66) Oni aludas la kapon.

(67) Popola, tipa madridanino majstre pentrita de Goya.

Neoficialaj vortoj uzataj por teknikaĵoj aŭ specialaj, neĉiulandaj aferoj: *alkazaro* = araba kastelo; *anestezi* = sensentigi por operacio; *araŭkano* = indiĝeno el Sudameriko; *bajadero* = hinda dancistino; *bicepso* = fleksmuskolo de la brako; *centaŭro* = duonhoma-duonĉevala, mitologia estaĵo; *duro* (vidu 9); *kaciko* = persono ĉiopova en vilaĝo pro sia politika influo; *kasako* (v. 46); *kolapso* = rapida malpliiĝo de forto kaj funkcioj ĉe malsanulo; *mantilo* = virina kapvesto hispana; *miuro* (v. 12); *pario* = ano el plej malsupera, hinda kasto; *peseto* = hispana monunuo; *plako* = preparita vitrplataĵo por fotografi; *raĵao* = hinda landestro; *taŭro* = ludbatala virbovo; *trabuko* (v. 53); *valkirioj* = fabelaj, germanaj heroinoj; *zalionoj* = rajdistaj femurŝirmiloj el ledo.

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego
Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

LA LIBROKOVRILA BILDO

Jen bela hispanino portanta la tipan, diantornamitan mantilon por taŭrfestoj kaj puntan ventumilon kun bildo prezentanta matadoron en la momento mortigi taŭron. Dekstre estas la gracia, famkonata turo Giralda *kaj maldekstre, procesia vidaĵo kun krucifiksa soklo kaj akrepintaj kapuĉuloj.*

ARTES GRÁFICAS
E. BERDEJO CASAÑAL
ZARAGOZA

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0000090